

荀子

世界语

翻译者 佐々木照央

XUNZI
ESPERANTIGITA
DE SASAKI TERUHIRO

埼玉

2019

目次 ĈAPITROJ

导言 ANTAŬPAROLO

1 劝学 INSTIGO AL LERNADO	5
2 修身 MEMKULTURIĜO	13
3 不苟 SENAFEKTADO	21
4 荣辱 HONORO KAJ MALHONORO	29
5 非相 KONTRAŬ FIZIOGNOMIKO	40
6 非十二子 KONTRAŬ DEK DU IDEOLOGOJ	50
7 仲尼 KONFUCEO	58
8 儒效 EFIKO DE KONFUCEANISMO	64
9 王制 REĜA REGADO	82
10 富国 RIĈIGO DE ŜTATO	100
11 王霸 REĈA HEGEMONIO	118
12 君道 LA VOJO DE REGANTOJ	137
13 臣道 LA VOJO DE MINISTROJ	154
14 致士 VARBADO DE PERSONOJ	162
15 议兵 DEBATO PRI MILITA OPERACIO	166
16 强国 LA FORTA ŜTATO	185
17 天论 DISKURSO PRI LA ĈIELO	197
18 正论 KOREKTADO DE TEZOJ	206
19 礼论 DISKURSO PRI DECREGULOJ	224
20 乐论 DISKURSO PRI MUZIKO	242
21 解蔽 MALKOVRO	250
22 正名 ĜUSTIGO DE NOMOJ	265
23 性恶 MALBONECO DE LA HOMA NATURO	279
24 君子 LA NOBLULO	292
25 成相 LABORKANTOJ	296
26 赋 POEZIECA KVIZPROZO	305
27 大略 KOMPENDIO	313
28 宥坐 DEKSTRESTARANTA VAZO-DEVIZO	333
29 子道 LA VOJO DE FILOJ	340
30 法行 LAŬREGULARA KONDUTO	345
31 哀公 LA DUKO AI	348
32 尧问 DEMANDOJ DE LA REĜO YAO	355

ANTAŬPAROLO

Xunzi, alinome Xun Kuang, aŭ Sun Qing, vivis en la epoko de Militlandoj. Estas ne sciate pri precizaj jaroj de lia naskiĝo kaj morto, do diversas opinioj inter esploristoj. Mi provizore sekvas la opinion de Luo Genze, kaj koncize skribas pri kronologion de la vivo de Xunzi.

Laŭ Luo, Xunzi naskiĝis ĉirkaŭ en 312 a. K. en Zhao-regno. En 266 a. K. li vizitis Qin-regnon, kaj vidis la reĝon Zhao kaj la ministron Fan Sui. En 264 a. K. li iris al Qi-regno, kiam li estis 50-jara (laŭ *Shiji* de Sima Qian). Tie en la akademio en la ĉefurbo Linzi, nomata Jixia, li fariĝis tri fojojn la ĉefa lekciisto, nomata Ji Jiu. En 255 a. K. Chun Shen-jun, ĉefministro de Zhu-regno konfidis al Xunzi la perfekton de la provinco Lanling, situanta najbare de la eksa bieno de Meng Chang-jun, lando Xue (nuna Zaohuang). En 250 a. K. li debatis pri milit-taktiko kun Lin Wu-jun antaŭ la reĝo de Zhao-regno. En 247 a. K. Li Si (la estonta ĉefministro ĉe Qin shi Huangdi) kaj Han Fei-zi lernis sciencon pri reĝa politiko ĉe Xunzi. En 238 a. K. Chun Shen-jun estis atencita kaj Xunzi estis depostenigita de la perfekto, kaj restis en Lanling ĝis la morto.

Xunzi konsideris sin mem kiel konfuceano, ortodoksa heredanto de konfuceanismo. Sed dum la Kultura Revolucio en Ĉinio Xunzi estis laŭdata kiel legalisto, adepto de la doktorino de laŭdekreta regado.

El lernintoj de Xunzi aperis tre famaj ideologoj de ĉina legalismo, Han Fei-z. Kiam Li Si fariĝis konsilisto-ĉefministro de Qin-regno, Xunzi “ne povis eĉ manĝi”. Xunzi ofte kritikis la malbonan inklinon de legalismo en sia verko.

“Reguloj estas ekstrema parto de la regado, la reganto estas la fonto de la reguloj. Do, se estas la reganto, tiam eĉ se la reguloj mankus, sufiĉe universale estas regate; se mankas la reganto, tiam eĉ se estus reguloj, eraras je la laŭtempa aplikado kaj ne eblas respondi al ŝanĝigantaj aferoj, tiel povas malordiĝi. Kiu, ne sciante pri la justeco de reguloj, nur multigas nombrojn de reguloj por pravigi, tiu, kvankam estus erudicia, tamen nepre perturbas la ĝustatempan traktadon de aferoj.” [pp. 136]

Por Xunzi la plej grava estas disvolviĝinta personeco, aparte la reĝo kaj la noblulo 君子, kiu estas pli decida ol leĝaro kaj regularo. Laŭ Xunzi, nobla personeco ne kreskas spontane, sed formiĝas nur per senĉesa trejnado per disciplinoj – decreguloj, edukado, memkulturado, ĉar la denaska naturo de homoj estas malbona. Xunzi kritikis Mengzi pro tio, ke la lasta rigardis la homan denaskan naturon bona. Postaj konfuceanoj respektis Mengzi kiel la duan sanktulon, do en Ĉinio Xunzi estis taksata kiel malortodoksa dumlonge.

Xunzi konsideras grava apartigon aŭ distingon en klasdividoj. Kritikante Mohismon

pro la troa egalismo, Xunzi emfazis la gravecon de labordivido kaj klasdivido ne nur en la ekonomia sfero, sed ankaŭ en la socia hierarkio por teni la socion stabila en bonordo. Do al nuntempuloj, kutimiĝintaj al demokratio, ŝajnas, ke Xunzi estas diskriminaciisto, kontraŭa al valoro de liber-demokratismo. Spite tion, lia pensmaniero estas utila defio al ĥaoso, kaŭzata de nuna fi-demokratismo. Xunzi avertas, ke demokratio sen disciplino de dereguloj estas fia, ke ĝi kondukas la societon al ĥaoso.

Legante la verkon de Xunzi, ni povas scii, kiel li kopodis por kreskigi kleran reĝon, noblulon kaj oficiston kiel memstalan noblan personecon en la antikva Ĉinio. Kvankam li substrekis la gravecon de klasdivido, sed tamen li alvokis al regantoj transiri la klasan limon por utiligi la kapablan personecon.

Mi komencis traduki la Xunzi en la fino de mia laboro en Zaozhuang. Prof. Park Giwan portis min per sia aŭto al la tombo de Xunzi. S-ro Semio, Sun Mingxiao, kuraĝigis min je eltrovo de kultura trezoro en tiu loko. Mi estis tre feliĉa, ĉirkaŭite de bonaj kolegoj. Ebligis la tradukon la akademia atmosfero de Zaozhuang universitato. Por Esperantigo mi ĉefe uzis la tekston, kompilitan de Fang Da kaj Fan Yong en 2016.

Sasaki Teruhiro

15-a de decembro 2019

1 劝学

INSTIGO AL LERNADO

君子曰：学不可以已。

Noblulo diras: “Lernadon oni ne devas ĉesi.”

青，取之于蓝而青于蓝；冰，水为之而寒于水。

Bluo, prenita el de indigujo, estas pli blua ol indigo; glacio, fariĝinta el akvo, estas pli malvarma ol la akvo.

木直中绳，輮以为轮，其曲中规，虽有槁暴¹，不复挺者，輮使之然也。

Ligno fariĝas rekta laŭ tuĉsnuro, sed, kurbigite per varmotrakto, ĝi fariĝas rado. Ĝi rondiĝas kiel cirklo laŭ cirkelo. Eĉ se sekigite, ĝi ne rerektiĝas. La varmotrakto faris tian efektan sur naturo, kia ĝi estiĝis.

故木受绳则直，金就砺则利，君子博学而日参省乎己，则知明而行无过矣。

Tiel do ligno, ricevinte tuĉsnuron, fariĝas rekta, metalo pere de akriĝoŝtono fariĝas akra. Noblulo, vaste lernante kaj reflektante sin mem tri fojon ĉiutage, faras sian scion klara kaj sian konduton senerara.

故不登高山，不知天之高也；不临深谿，不知地之厚也；不闻先王之遗言，不知学问之大也。

Se ne supreniras la altan monton, oni ne povas la altecon de la ĉielo; se ne rigardas suben profundan ravinon, oni ne povas scii la dikecon de la tero. Se ne aŭskultas testamentojn de antaŭaj reĝoj, oni ne povas scii ja la grandecon de scienco-lernado.

干，越，夷，貉之子，生而同声，长而异俗，教使之然也。

Infanoj de landoj, kiel Gan, Yue, Yi, Mo,² naskiĝas, havante la saman voĉon, sed tamen, kreskante, ili iĝas malsamaj je moro. Jen kion faras la instruado al ilia naturo.

《诗》曰：“嗟尔君子，无恒安息。靖共尔位，好是正直。神之听之，介尔景福。”³

Estas dirite en *Poezio*: “Ho, nobluloj, vi ne ripozu longe. Vi humile plenumu vian taskon de posteno, kaj ŝatu la ĝustan kaj la rektan. Perceptu tion per via animo kaj aŭskultu tion, kaj tio helpas vin kaj donacos al vi feliĉegon.”⁴

神莫大于化道，福莫长于无祸。

¹ 曝 senŝirma al sunlumo.

² Gan estas Wu 吴. Yi kaj Mo estis landoj de nord-orientaj barbaroj.

³ Citaĵo el *诗经*, 小雅, 小明 Iuj esploristoj de *Poezio* prenas 君子 por prapatra spirito, sed tia kompreno ne konformas al la kunteksto de Xunzi.

⁴ Estas alia interpreto: “Spiritoj aŭdas tion, kaj helpas vin kaj donacos al vi feliĉegon.” [Hutton,p.1]

Neniu animstato estas pli granda ol Taŭo de transformiĝo, neniu feliĉo estas pli bona ol sen katastrofo.

吾尝终日而思矣，不如须臾之所学也；吾尝跂而望矣，不如登高之博见也。

Mi iam tutan tagon meditis, sed tio estis malpli bonefika, ol kurtatempa lernado. Mi iam rigardis malproksimen, starante sur piedpintoj, sed tio estas malpli bonefika ol spekti vaste de sur monto, kiun mi supreniras.

登高而招，臂非加长也，而见者远；顺风而呼，声非加疾也，而闻者彰。

Se vi supreniris alten kaj svingas manon, kvankam via brako ne iĝas pli longa, tamen videblas de malproksime; se laŭ favora vento vi krias, kvankam voĉo ne laŭtas, tamen aŭdeblas klare al aŭskultanto.

假舆马者，非利足也，而致千里；假舟楫者，非能水也，而绝江河。

Kiu utiligas ĉevalĉaron, tiu, ne uzante siajn piedojn, atingas mil liojn; kiu utiligas boaton kaj remilon, tiu, eĉ ne kapabla je naĝado, transveturas riverojn kiel Changjiang kaj Huanhe.

君子生非异也，善假于物也。

Noblulo naskiĝas ne kiel apartulo, sed bone utiligas aĵojn.

南方有鸟焉，名曰蒙鸠，以羽为巢，而编之以发，系之苇苕，风至苕折，卵破子死。

Sude vivas birdoj, nomataj trogriditoj. Ili faras neston per plumoj kaj teksas ĝin per haroj, ligas ĝin al tigo de kano. Kiam blovas vento, la tigo rompiĝas. Ovoj frakasiĝas kaj idoj mortas.

巢非不完也，所系者然也。

La nesto ne estas malkompleta, sed iĝas tia laŭ nature pro alligita loko.

西方有木焉，名曰射干，茎长四寸，生于高山之上，而临百仞之渊，木茎非能长也，所立者然也。

Okcidente troviĝas iu arbo, nomata belamakando. Ĝia tigo estas longa je 4 *cun*, kaj ĝi kreskas sur la alta monto, do ĝi spektas suben abismon, profundan je cent *ren*. La tigo ne povas esti tiom longa, sed tion ebligas la loko, kie ĝi staras.

蓬生麻中，不扶而直。

Artemizio, naskiĝinta en kanaboj, kreskas rekta sen helpo.

兰槐之根是为芷，其渐之滫，君子不近，庶人不服，其质非不美也，所渐者然也。

Radiko de apiaco, umbelifero, se ĝi estas trempita en urino, noblulo ne alproksimiĝas al ĝi, popolanoj ne prenas ĝin por medikamento. Tiel estas ne pro tio, ke ĝia kvalito estas malbela, sed pro tio, ke ĝi, trempite, fariĝis tia.

故君子居必择乡，游必就士，所以防邪僻而近中正也。

Tial noblulo, ekloĝante, nepre devas elekti vilaĝon, kaj nepre ludi kun alta persono. Tiel

do eblas preventi malbonan kutimon kaj alproksimiĝi al vera ĝusteco. ..

物类之起，必有所始。

Je tio, ke okazas diversspecaj aĵoj, nepre estas la komenco.

荣辱之来，必象其德。

Al homo, honorigite kaj hontigite, nepre aperas la virto.

肉腐出虫，鱼枯生蠹。

Al putriĝinta viando ekaperas vermoj; al malfreŝa fiŝo naskiĝas larvoj.

台慢忘身，祸灭乃作。

Maldiligentulo forgesas sin, kaj okazas katastrofo kaj ruiniĝo.

强自取柱，柔自取束。

Io malmola estas hakita por kolono, io mola estas kunligita en fasko.

邪秽在身，怨之所构。

Iu, mem kovrite per malbono kaj malpuro, alvokas vengemon al si.

施薪若一，火就燥也；

Ŝajnas sama la pretigita brullignaro, tamen per fajro tuj ekbrulas la sekigita.

平地若一，水就湿也。

Ŝajnas sama la ebena tero, tamen akvo fluas laŭ malseka loko.

草木畴生，禽兽群焉，物各从其类也。

Herboj kaj arboj kreskas sur tere, birdoj kaj bestoj gregiĝas, ĉiuj estaĵoj vivas laŭ sia klasifiko.

是故质的张而弓矢至焉，林木茂而斧斤之焉，树成阴而众鸟息焉，醯酸而蚋聚焉。

Tiel do, se celtabulo estas pendigita, sago estas pafita per arko. Kie kreskas arbaro, tien alvenas toporo kaj hakilo. Kie arboj faras ombrojn, tie amaso da birdoj ripozas. Al acidiĝa viandpeklaĵo svarmas simuloj.

故言有招祸也，行有招辱也，君子慎其所立乎！

Kiu parolas, tiu povas alvoki plagon; kiu agas, tiu povas altiri honton. Noblulo devas esti prudenta pri kie stari.

积土成山，风雨兴焉；积水成渊，蛟龙生焉；积善成德，而神明自得，圣心备焉。

Se tero, akumulite, faras monton, tiam blovas vento kaj puvas.

Se akvo, akumulite, faras profundan abismon, tiam drakonoj kreskas tie.

Se bono, akumulite, faras virton, tiam akireblas spirita klereco kaj estas preta la sankta koro.

故不积跬步，无以至千里；不积小流，无以成江海。

Tial, se ne akumuli po unu paŝon, ne atingeblas mil ligoj; se ne akumuli fluetojn, ne fariĝos rivero kaj maro.

骐骥一跃，不能十步；弩马十驾，功在不舍。

Eĉ se bona ĉevalo ekimpetas unu fojon, ĝi ne povas transsalti foren je dek paŝoj. Sed eĉ ĉevalaĉo, atingas celon, dum dek tagoj senĉese trairante.

楔而舍之，朽木不折；楔而不舍，金石可镂。

Ekĉizinte, se paŭzas, oni ne povas elĉizi eĉ putriĝintan arbon; ekĉizinte, se ne paŭzas, oni povas endesegni eĉ sur metalon kaj ŝtonon.

螾无爪牙之利，筋骨之强，上食埃土，下饮黄泉，用心一也；蟹六跪而二螯，非蛇蟺之穴无可寄托者，用心操也。

Tervermo ne havas ungon nek denton, nek fortajn muskolon kaj oston, sed ĝi supre manĝas polvojn kaj teron, sube trinkas subteran fonton, ĉar ĝi koncentriĝas je koro. Krabo, kun ses piedoj kaj du pinĉiloj, ne havas al si loĝejon pli ol se truon de serpento aŭ angilo, ĉar ĝi estas malkoncentra hastemulo.

是故无冥冥之志者，无昭昭之明；无惛惛之事者，无赫赫之功。

Tial do, kiu ne havas kaŝitan strebon, tiu ne atingas brilantan lumon; kiu ne akumulis modestan aferon, tiu ne atingas glorplenan sukceson.

行衢道者不至，事两君者不容。

Kiu volus iri ambaŭ vojojn ĉe vojforko, tiu nenien atingas; kiu servas al du estroj, tiu ne povas esti bone akceptata.

目不能两视而明，耳不能两听而聪。

Okuloj ne povas samfoje vidi du direkciojn, do estas klaraj; oreloj ne povas samfoje aŭskulti el du direkcioj, do estas akraj.

螣蛇无足而飞，梧鼠五枝而穷。

Sankta serpento povas flugi sen piedoj, sed sciuro, kun kvin talentoj, inklinas embarasiĝi.

《诗》曰：“尸鸠在桑，其子七兮。淑人君子，其仪一兮。其仪一兮，心如结兮。”故君子结于一也。

Estas dirite en *Poezio*: “Upupoj, loĝante ĉe morusarbo, naskas siajn ovojn po sep. Sinjoroj nobluloj tenas la principon en ritoj unusola. Ĉar la principo en ritoj estas unusola, la koro estas kunligiĝinta.”⁵ Tiel do nobluloj koncentriĝas je unu.

昔者瓠巴鼓瑟而流鱼出听，伯牙鼓琴而六马仰秣。

Antikve Huba ekludis kotoon, tiam fiŝoj de rivero alnaĝis aŭdi; Boya ekludis citron, tiam ses ĉevaloj⁶ deturnis sin de furaĝo.

⁵ Citata el “诗经，曹风，尸鸠”. Pri 尸鸠 *shijiu* estas diversaj opinioj. Iu konjektas, ke ĝi estas kukolo, la alia – turto. Kaj rilate al 淑人君子, iuj komprenas ĝin esprimanta unu homon kiel “bonan noblulon”, la aliaj – du homojn kiel solĉistinon kaj spiriton. (vd. 詩經·中·新釈漢文大系、明治書院、1998, p. 112)

⁶ Al reĝa kaleŝo estis aligitaj ses ĉevaloj.

故声无小而不闻，行无隐而不形；玉在山而草木润，渊生珠而崖不枯。

Tiel do neniuj ajn voĉeto, ne estas aŭdita, neniuj ajn konduto ne estas kaŝita; Se estas jado en la monto, tie kreskas riĉe herboj kaj arboj, se estas perlo en profunda akvo, ĉe ties bordoj ne velkas.

为善不积邪，安有不闻者乎？

Ĉu vi ne akumulus bonon? Se vi akumulas, kial ne estus aŭdate iam pri via bono?

学恶乎始？恶乎终？

Kie komenciĝas la lernado? Kie ĝi finiĝas?

曰：其数则始乎诵经，终乎读礼；其义始乎为士，终乎为圣人。

Estas dirite: Tiu procezo ja ekas je recitado de sutroj⁷, kaj finiĝas legado de decreguloj; la celo komenciĝas per fariĝo de firma persono, kaj finiĝas per fariĝo de sanktulo.

真积力久则入，学至乎没而后止也。

Per vera akumulado de fortoj, longdaŭra, estas enirebla kaj atingebla la lernado, kiun haltigas nur la morto.

故学数有终，若其义则不可须臾舍也。

Nur tiam finiĝas la procezo de lernado, sed la celo ne devas esti forlasita eĉ momenton. 为之，人也；舍之，禽兽也。

Kiu faras tion, tiu estas homo; kiuj forlasas, tiuj estas birdoj kaj bestoj

故“书”者，政事之纪也；“诗”者，中声之所止也；“礼”者法之大分，类之纲纪也，故学至乎“礼”而止矣。

Tiel do *Libro* estas kronikoj de politiko-regado; *Poezio* estas registro de optimumaj voĉoj; *Decreguloj* estas granda leĝa distingo kaj klasifika disciplino. Tial la lernado atingas la celon per *Decreguloj*.

夫是之谓道德之极。

Tio estas, t. n. la kulmino de la Vojo-Virto.

“礼”之敬文也，“乐”之中和也，“诗”“书”之博也，“春秋”之微也，在天地之间者毕矣。

Decreguloj estas respekto al kulturo, *Muziko* estas atingo de harmonio, *Poezio* kaj *Libro* estas vastigo de scioj, *Chun-Qiu* estas historia subtileco. Ili ampleksas ĉion, kio troviĝas inter la Ĉielo kaj la tero.

君子之学也，入乎耳，箸乎心，布乎四体，形乎动静，端而言，蠕而动，义可以为法则。

Je lernado ĉe noblulo – kio eniras tra oreloj, tio atingas lian koron, penetras en kvar membrojn. aperas en lia movo kaj senmovo, en liaj vortetoj kaj subtila movo. Lia justu povas fariĝi leĝo-reguloj.

⁷ 诵经 metodo de legado, rekomendata de Xunzi. Trejnado por recitado de tekstoj.

小人之学也，入乎耳，出乎口。

Je lernado ĉe malgrandulo – kio eniras tra oreloj, tio tuj eliras de lia buŝo.

口耳之间则四寸耳，曷足以美七尺之躯哉！

Distanco inter oreloj kaj buŝo estas nur kvar *cunoj*, kiel sufiĉas al li per tio por fari bela la tutan korpon je sep *ĉhój*?

古之学者为己，今之学者为人。

Antikve oni faris la lernadon por si mem, sed nun faras ĝin por aliuloj.

君子之学也，以美其身；小人之学也，以为禽犊。

Ke noblulo lernas, tio estas por beligi sin mem; ke malgrandulo lernas, tio estas por fariĝi oferota bovo.

故不问而告谓之傲，问一而告二谓之囋。

Tiel do, estas arogante, se raporti, ne demandite. Estas altrudigeme, se, demandite, dufoje raportadi.

傲，非也；囋，非也。

Aroganteco estas malbona; altrudiĝemo estas malbona.

君子如向矣。

Noblulo similas al eĥo.

学莫便乎今其人。“礼”“乐”法而不说，“诗”“书”故而不切，“春秋”约而不速。

Ĉe lernado nenio estas pli konvena ol alproksimiĝo al la specialisto. *Decreguloj* kaj *Muziko* montras leĝojn sed ne rakontas. *Poezio* kaj *Libroj* traktis malnovajn aferojn sed ne aplikeblas al praktiko. *Printempo-Aŭtuno* estas konciza kaj ne tuj komprenebla.

方其人之习君子之说，则尊以遍矣，周于世矣。

Rekte ĉe la specialisto lerni pri ideoj de nobluloj estas preferinde kaj amplekse, pli komplete kaj validas al la mondo.

故曰：学莫便乎近其人，隆礼次之。

Tial estas dirite: Ĉe lernado nenio estas pli konvena ol alproksimiĝi al la specialisto. Se ne, la sekva rimedo estas respekti decregulojn.

上不能好其人，下不能隆礼，安特将学杂识志，顺“诗”“书”而已耳，则末世穷年，不免为陋儒而已。

Kiam supre ne haveblas la bona specialisto, sube ne eblas respekti decregulojn, en tiu okazo laŭhazarde oni devas lerni pri diversaĵoj kaj koni ideojn, sekvante nur *Poezion* kaj *Librojn*, tiel do en la fino de vivo ne eviteblas nur fariĝi obstina konfuceano.,

将原先王，本仁义，则礼正其经纬蹊径也。

Se oni volus preni antaŭajn reĝojn kiel precedencon kaj prenas bonvolecon kaj juston kiel fundamenton, tiam *Decreguloj* estas la rekta sutro kaj la rekta vojo.

若挈裘领，诎五指而顿之，顺者不可胜数也。

En tio estas arkano samkiel vesti sin en felaĵo – fleksinte kvin fingrojn, svingetu, oni povas multe pli glate vestiĝi.

不道礼宪，以“诗”“书”为之，譬之犹以指测河也，以戈舂黍也，以锥食壶也，不可以得之矣。

Se ne estas vojo, nek decreguloj, nek leĝoj, tiuokaze oni devas anstataŭigi ilin per *Poezio* kaj *Libroj*, – tio estas samkiel kvazaŭ per fingroj mezuri riveron aŭ per halebardo pisti panikon aŭ per alenoj anstataŭigi manĝobastonetojn por manĝi el potoj. Nenio iras bone. 故隆礼，虽未明，法士也；不隆礼，虽察辩，散儒也。

Do respekti decregulojn, kiom ajn ne sufiĉe klera vi estus, tamen faras vin persono kun leĝo. Ne respekti decregulojn, kiom ajn observema kaj diskutema vi estus, tamen faras vin senutila konfuceano.

问楛者勿告也，告楛者勿问也，说楛者勿听也，有争气者勿与辩也。

Al tiu, kiu demandas maldece, ne respondu. Tiu, kiu diras maldece, ne demandu. Tiun, kiu parolas maldece, ne aŭskultu. Kun tiu, kiu estas kverelema, ne diskutu. 故必由其道至，然后接之，非其道则避之。

Do vi akceptu nur tiun, kiu alvenas nepre laŭ la Vojo. Se ne laŭ la Vojo, evitu lin. 故礼恭而后可与言道之方，辞顺而后可与言道之理，色从而后可与言道之致。

Do kun tiu, kiu estas deca kaj humila, eblas paroli pri koncepto de la Taŭo; kun tiu, kies vortoj estas kvietaj, eblas paroli pri rezono de la Taŭo; kun tiu, kies mieno estas humila, eblas paroli pri kulmina celo de la Taŭo.

故未可与言而言谓之傲，可与言而不言谓之隐，不观气色而言谓之瞽。

Tiel do paroli vorton, kiun oni ne devas eldiri, estas aroganteco; ne paroli vorton, kion oni devas eldiri, estas kaŝo; paroli, ne observante aeron kaj mienon, estas blindeco. 故君子不傲，不隐，不瞽，谨顺其身。

Do nobululo, estante ne aroganta nek kaŝema nek blinda, tenas sin prudenta kaj humila.

《诗》曰：“匪交匪舒，天子所予。” 此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Esti ne societema nek loza – jen kia estas la Ĉiela filo.”⁸

Tio signifas la supre menciitan.

百发失一，不足谓善射；千里跬步不至，不足谓善御；伦类不通，仁义不一，不足谓善学。

Kiu, pafinte centojn, maltrafis unu, tiun ne eblas nomi bona pafarkisto. Kiu, kondukante ĉaron mil *liojn*, ne povas atingi finfine la celon, tiun ne eblas nomi bona

⁸ Citaĵo el *poetiko*, *小雅*, *采菽* de *Antaŭa frazo en nuna eldono estas 彼交匪舒*.

kondukisto. Homon kun klasifiko de etiko nekonsekvenca, kun bonvoleco kaj justo ne unuigita, ne eblas nomi bona klerulo.

学也者，固学一之也。

Lernanta klerulo estas tiu, kiu koncentriĝas al unu lernado.

一出焉，一入焉，涂巷之人也。

Kiu jen eliras, jen eniras, tiu estas vulgarulo.

其善者少，不善者多，桀，纣，盗跖也。

El vulgaruloj troviĝas da bonuloj malmulte kaj multe da malbonuloj, kiel tiranoj Jie, Zhou, rabisto Zhi.

全之尽之，然后学者也。

Kiu faras lernadon perfekta kaj kompleta, tiu poste fariĝos klerulo.

君子知夫不全不粹之不足以为美也，故诵数以贯之，思索以通之，为其人处以之，除其害者以持养之，使目非无欲见也，使耳非是无欲闻也，使口非是无欲言也，使心非是无欲虑也。

Noblulo scias, ke ne eblas konsideri neperfektecon kaj malfajnecon bela, do li penetras en sciojn per multfoja recitado-legado, trapenetas per la pensado-serĉado, faras sian personecon kapabla je traktado de scioj, elimini obstaklon kaj teni sin nutranta ilin. Li lasas siajn okulojn ne vidi kion li ne ŝatas, lasas siajn orelojn ne aŭdi kion li ne ŝatas, lasas sian buŝon ne diri kion li ne ŝatas kaj lasas sian koron ne pensi kion li ne ŝatas.

及至其致好之也，目好之五色，耳好之五声，口好之五味，心利之有天下。

Kaj li atingas la plejan plaĉon: la okuloj ŝatas la lernadon kiel kvin kolorojn, la oreloj ŝatas ĝin kiel kvin voĉojn, la buŝo ŝatas ĝin kiel kvin bongustojn kaj la koro profitas ĝin al la tuta mondo.⁹

是故权利不能倾也，群众不能移也，天下不能荡也。

Tiel do nek potenco nek profito povas deklini lin, nek homamaso povas deviigi lin, nek mondo povas ŝanceligi lin.

生乎由是，死乎由是，夫是之谓德操。

Li vivas kun la lernado, mortas kun la lernado. Tio estas nomata, ke la virto estas bontenata.

德操然后能定，能定然后能应，能定能应，夫是之谓成人。

Post kiam la virto estas bontenata, fiksiĝas la personeco; post kiam ĝi fiksiĝas, eblas respondi; se eblas fiksiĝi kaj respondi – eblas t. n. fariĝi persono.

天见其明，地见其光，君子贵其全也。

La Ĉiel vidas lin klera, la tero vidas lin lumanta, tiel perfektigi la altvalora noblulo.

⁹ Multaj esploristoj prenas la propoziciojn kiel komparativon “pli..ol..”.

2 修身

MEMKULTURIĜO

见善，修然必以自存也；见不善，愀然必以自省也。

Se vi vidas bonon, vi nepre korektu vin mem por ke ĝi estu ankaŭ ĉe vi; se vi vidas malbonon, vi malĝoju kaj nepre vi retrospektu vin mem en reflektu.

善在身，介然必以自好也；不善在身，菑然必以自恶也。

Se la bono troviĝas en vi mem, vi nepre firme ŝatu tion; se la bono ne troviĝas en vi mem, vi nepre riproĉu al vi mem tion, kiel plagon.

故非我而当者，吾师也；是我当者，吾友也；谄谀我者，吾贼也。

Do, kiu kritikis min, tiu estas al mi instruisto; kiu aprobas min, tiu estas al mi amiko; kiu flatas min, tiu estas al mi fripono.

故君子隆师而亲友，以致恶其贼。

Tiel do noblulo respektas sian instruiston kaj ŝatas sian amikon, kaj finfine malŝatas friponon.

好善无厌，受谏而能诚，虽欲无进，得乎哉？

Li ne satŝatas bonon, kaj, ricevinte admonon, disciplinas sin. Eĉ se li mem ne volus progresi, li povas gajni frukton.

小人反是，致乱而恶人之非己也，致不肖而欲人之贤己也，心如虎狼，行如禽兽而又恶人之贼己也。

Malgrandulo kontraŭe konfuziĝas ege kaj malamas tiun, kiu kritikis lin. Li faradas stultaĵon ĝissate sed dezirus, ke aliuloj taksu lin saĝa. Lia koro estas simila al tigra aŭ lupa.

谄谀者亲，谏争者疏，修正为笑，至忠为贼，虽欲无灭亡，得乎哉？

Li faras flatulon intima, forigas admonanton, mokridas reformiston, rigardas la plej lojalan rabisto. Spite ke li ne dezirus pereon, ĝi neeviteblas.

《诗》曰：“嘒嘒皆皆，亦孔之哀。谋之其臧，则具是违；谋之不藏，则具是依。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Estas triste, ke oni amase kalumnias sin reciproke. Kiam la entrepreno estas bona, oni kontraŭas unu al la alia; kiam la entrepreno estas malbona, oni akordiĝas kune.”¹⁰ Tio signifas la supre menciitan.

扁善之度，以治气养生则后彭祖，以修身自名则配尧，禹。

Mezuro de ĝenerala bono estas jena. Se regi *Cĵ*-on kaj nutri vivon, tiam eblas longevivi

¹⁰ Citata el *Poezio* 诗经, 小雅, 小旻

pli ol Peng Zu. Se alte kulturi sin kaj sian nomon, eblas egaligi sin al reĝoj Yao kaj Yu.
宜于时通，利以处穷，礼信是也。

Kio ĉiam estas oportuna kaj profitodona eĉ en krizo, tio estas decreguloj kaj fido.
凡用血气，志意，知虑，由礼则治通，不由礼则勃乱提侵；
食饮，衣服，居处，动静，由礼则和节，不由礼则触陷生疾；
容貌，态度，进退，趋行，由礼则雅，不由礼则夷固僻违，庸众而野。

Ĝenerale oni kondukas per sanga energio, strebo, intenco, saĝo kaj penso, se laŭ decreguloj, oni sukcesas en ordo; se ne laŭ decreguloj, oni konfuziĝas, embarasiĝas kaj lantmoviĝas. Ĉe manĝado, trinkado, vestiĝo, loĝado, movo kaj senmovo, se laŭ decreguloj oni harmonias kaj prudentas; se ne laŭ decreguloj oni faras abomenindaĵon kaj malsaniĝas. Je mieno, sinteno, antaŭen- kaj malantaŭen-irado, rapideta kaj ordinara paŝado, se laŭ decreguloj oni estas eleganta; se ne laŭ decreguloj oni fariĝas kruda, malmola, nerafinita, nefajna, rureska kaj sovaĝa.

故人无礼则不生，事无礼则不成，国家无礼则不宁。

Tiel do homoj sen decreguloj ne povas vivi, aferoj sen decreguloj ne efektiviĝas, regnoj sen decreguloj ne stabilas.

《诗》曰：“礼仪卒度，笑语卒获。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: «Kie decreguloj estas perfektaj je modereco, tie rido kaj parolo iras perfektaj.»¹¹ Tio signifas la supre menciitan.

以善先人者谓之教，以善和人者谓之顺；以不善先人者谓之谄，以不善和人者谓之谀。

Antaŭiranto je bono estas nomata instruisto, akordiĝanto je bono estas nomata humilulo; antaŭiranto je malbono estas nomata flatisto, akordiĝanto je malbono estas nomata flatemulo.

是是，非非谓之知，非是，是非谓之愚。

Kiu konsideras jesadon jesa kaj neadon nea, tiu estas nomata intelektulo; kiu konsideras neadon jesa kaj jesadon nea, tiu estas nomata stultulo.

伤良曰谗，害良曰贼。

Kiu damaĝas bonon, nomiĝas kalumniulo; kiu malhelpas bonon, nomiĝas kanajlo.

是谓是，非谓非曰直。

Kiu diras jesadon jes kaj neadon ne, estas honestulo-rektulo.

窃货曰盗，匿行曰诈，易言曰诞。

Kiu ŝtelas varon, nomiĝas ŝtelisto; kiu kaŝas la konduton, nomiĝas trompanto; kiu

¹¹ Citata el *Poezio* 诗经, 小雅, 楚茨. En la *Poezio* tiuj frazoj pri 礼仪 estas uzataj kiel ritoj por inviti spiritojn, do postsekvas la frazo 神保是格 (spiritoj descendas por gardi). Ĉe Xunzi, kiel konfuceano, la terminoj 礼仪 jam ne havas religian sencon.

ŝanĝas facile eldiron, nomiĝas mensogulo.

趣舍无定谓之无常，保利弃义谓之至贼。

Kiu ne estas stabila je elektado kion preni kaj kion forĵeti, estas nomata nekonstanta.

多闻曰博，少闻曰浅；多见曰闲，少见曰陋。

Kiu aŭskultas multe, estas erudita; kiu aŭskultas malmulte, estas malprofunda; kiu vidas multe, tiu estas kvieta; kiu vidas malmulte, tiu estas obstina.

难进曰促，易忘曰漏。

Al kiu estas malfacile progresi, tiu estas lantkapulo; kiu estas forgesema, tiu estas malatentulo.

少而理曰治，多而乱曰耗。

Ke, eĉ se malmulte, estas en ordo, tio estas bona regado; ke, eĉ se multe, estas en malordo, tio estas vana konsumiĝo.

治气养心之术：血气刚强，则柔之以调和；知虑渐深，则一之易良；勇胆猛戾，则辅之以道顺；齐给便利，则节之以动止；狭隘褊小，则廓之以广大；卑湿重迟贫利，则抗之以高志；庸众驽散，则刳之以师友；怠慢僇弃，则炤之以祸灭；愚款端悖，则合之以礼乐，通之以思索。

Rimedo por regi *Ĉjion* kaj nutri koron: kiam sanga *Ĉjio* estas tro malmola kaj forta, ĝi devas esti moligita kaj harmoniigita; kiam scio-pensado estas tro profundiĝinta, ĝi devas esti simple unueca kaj bone facila; kiam kuraĝo iĝas tro feroça, ĝi devas esti mildigita per ĝentileco laŭ Taŭo; kiam oni frivole hastas serĉi oportunecon, necesas prudenteco por haltigi la movon; kiam estas tro malvaste kaj malgrande, necesas vastigi kaj grandigi je spaco; kiam oni estas tro humila, inerta kaj avara por profito, necesas kontraŭi al tio per alta strebo; kiam vulgara popolamaso estas fuŝe ŝanceliĝanta, necesas averti por ke ĝi estu kun instruisto kaj amiko; kiam oni estas maldiligenta kaj facilanima, tiam necesas klarigi atenditan pereon kaj katastrofon; kiam oni estas stulta simplulo kaj skrupula honestulo, necesas konduki onin konforme al decreguloj kaj muziko, per tio klerigi onin al pensado kaj serĉado.

凡治气养心之术，莫径由礼，莫要得师，莫神一好。

Ĝenerale se temas pri la rimedo por regado de *Ĉjio* kaj nutrado de koro, troviĝas nenio pli bona ol tra decreguloj, nenio pli grava ol havigi al si instruiston, nenio pli bona ol koncentri sian spiriton en unu.

夫是之谓治气养心之术也。

Jen kio kuŝas t. n. la rimedo por memregado de *Ĉjio* kaj nutrado de koro.

志意修则骄富贵，道义重则轻王公，内省而外物轻矣。

Kiu kulturas sin kun alta strebo, tiu malŝatas riĉon kaj rangon; kiu konsideras la Taŭon kaj juston grava, tiu rigardas reĝojn kaj dukojn malgravaj.

传曰：“君子役物，小人役于物。” 此之谓矣。

Estas dirite de antikve: “Noblulo uzas aĵojn, malgrandulo estas uzata de aĵoj.” Tio estas ankaŭ mia opinio.

身劳而心安，为之；利小而义多，为之。

Noblulo, eĉ estante laca je la korpo, estas kvieta je la koro, kaj faras tion. Li faras tion, se troviĝas multe da justo, spite malmulte da profito.

事乱君而通，不如事穷君而顺焉。

Por li estas pli bone vivi laŭ Taŭo kaj justo, servante al malriĉa estro, ol atingi altrangon je servado al freneza estro.

故良农不为水旱不耕，良贾不为折阅不市，士君子不为贫穷怠乎道。

Tiel do bona kamparano ne ĉesas terkulturi eĉ dum sekego, bona komercisto ne ĉesas komerci pro malprofito, firma persono kaj noblulo ne maldiligentas je sekvado de Taŭo eĉ en mizera malriĉeco.

体恭敬而心忠信，术礼义而情爱人，横行天下，虽困四夷，人莫不贵。

Se via sinteno estas humila kaj respektplena, kaj via koro estas lojala kaj fidinda, kaj via principo baziĝas sur decreguloj kaj justo, en tiu okazo, kien ajn vi iras en la mondo, eĉ en kvar barbaroj troviĝas neniuj, kiu ne respektas vin.

劳苦之事则争先，饶乐之事则能让，端恣诚信，拘守而详，横行天下，虽困四夷，人莫不任。

Se vi antaŭ ĉio faras malfacilan aferon pli frue ol aliuloj kaj cedas al ili ĝojplenan aferon, kaj tenas vin honesta, sincera, fidela, firma kaj skrupula, en tiu okazo, kien ajn vi iras en la mondo, eĉ en kvar barbaroj troviĝas neniuj, kiu ne fidus vin.

体倨固而心执诈，术顺墨而精杂污，横行天下，虽达四方，人莫不贱。

Se via sinteno obstina kaj via koro rigidanima, kaj via principo baziĝas sur Mohismo kaj via spirito fuŝa-malpura, en tiu okazo, kien ajn vi iras en la mondo, eĉ en kvar direktoj troviĝas neniuj, kiu ne malestimas vin.

劳苦之事则偷儒转脱，饶乐之事则佞兑而不曲，辟违而不恚，程役而不录，横行天下，虽达四方，人莫不弃。

Se vi evitas malfacilan aferon samkiel fuŝa Konfuceano¹² sin retiras el tio, kaj vi ĝojplenan aferon tuj ruze kaptas al vi, kaj eskapante malhoneste, maldiligentas je la asignita tasko, en tiu okazo, kien ajn vi iras en la mondo, eĉ en kvar direktoj troviĝas neniuj, kiu ne rifuzas vin.

¹² 偷儒 Multaj esploristoj anstataŭigas la ideogramon 儒 per 懦(malfortika).

行而供冀，非渍淖也；行而俯项，非击戾也；偶视而先俯，非恐惧也。

Oni iras kun manoj interpremitaj antaŭ si ne pro timo, ke oni falu en ŝlimejon; oni iras klinante sin ne pro timo, ke oni koliziu kun io; oni mallevas sian rigardon unue je renkontiĝo ne pro timo, ke oni estu terurata.

然夫士欲独修其身，不以得罪于比俗之人也。

Ĉar alta personeco deziras sole kulturi kaj perfektigi sin mem, por ke li ne estu vane akuzata de mondanoj.

夫骥一日而千里，弩马十驾则亦及之矣。

Bonega ĉevalo trakuras mil *lojn* en unu tago, sed ankaŭ ĉevalaĉo povas en dek tagoj atingi la saman distancon.

将以穷无穷，逐无极与？其折骨绝筋，终身不可以相及也。

Se iu provus atingi senlimon kaj ĉasus la infiniton? Li, nur rompante ostojn kaj tendenojn, dumvive ne povas atingi tion.

将有所止之，则千里虽远，亦或迟或速，或先或后，胡为乎其不可以相及也？

Se estas dumvojaj haltejoj, eblas atingi eĉ mil *lojn* spite malproksimecon. Tute egale ĉu malfrue aŭ frue, ĉu antaŭe aŭ poste, kial ne eblas atingi la celon?

不识步道者，将以穷无穷，逐无极与？意亦有所止之与？

Ĉu tiu, kiu ne scias vojon por piediri, provus atingi senlimon kaj ĉasi la infiniton? Li volus havigi al si dumvojan haltejon, ĉu ne?

夫坚白，同异，有厚无厚之察，非不察也，然而君子不辩。止之也；倚魁之行，非不难也，然而君子不行，止之也。

Pri la temoj de 'Blankeco-Hardeco', 'Sameco-Malsameco' aŭ 'Dikeco-Maldikeco', noblulo ne nekonsideras, sed nur ne argumentas, ĉar li haltas primediti tion pro sia fina celo.

Pri la farado de io aparta kaj ekterordinara, kvankam al noblulo ne estas malfacile fari, tamen li ne ekfaras tion, ĉar li haltas primediti tion pro sia fina celo.

故学曰：“迟，彼止而待我，我行而就之，则亦或迟或速，或先或后，胡为乎其不可以同至也？”

Tiel do estas dirite: “Eĉ se mi malfruus, la celo-haltejo atendas min, do se mi iras, nepre atingos ĝin, tute egale ĉu estus malfrue aŭ frue, ĉu antaŭe aŭ poste. Kial mi ne povas atingi la samon?”

故躡步而不休，跛鳖千里；累土而不辍，丘山崇成；厌其源，开其渚，江河可竭；一进一退，一左一右，六骥不致。

Tiel, piedirante ĉiam po duonpaŝo senĉese, eĉ lama testudo atingos mil *lojn*; amasigate po terpeco senĉese, montoj fariĝos altaj. Ŝtopite je la fontoj, malfermite je la kanaloj, eĉ riveroj, kiel Changjiang kaj Huanghe, povus elsekiĝi. Kaleŝo kun ses bonaj ĉevaloj ne atingos la celon sen akorde, se unu ĉevalo iras antaŭen, la alia – malantaŭen, unu iras

maldekstern, la alia – dekstren.

彼人之才性之相县也，虽若跛鳖之与六骥足哉？

Ĉu la diferenco inter homoj aŭ homaj naturoj estus tiom granda, kiom inter lama testudo kaj ses bonĉevaloj？

然而跛鳖致之，六骥不致，是无它故焉，或为之，或不为尔。

Tio, ke la lama testudo atingas kaj ses bonĉevaloj ne atingas, dependas de nenio alia, ol unu faras celkonforme kaj la aliaj ne.

道虽迩，不行不至；事虽小，不为不成。

Kiel ajn proksima estas la vojo, se ne iri, oni ne povas atingi ĝin; kiel ajn malgranda estas la afero, se ne fari, oni ne povas efektiviĝi ĝin.

其为人也多暇日者，其出入不远矣。

Eĉ se oni farus, se kun multe da paŭzo, oni ne povas atingi malproksimen je la rezulto.好法而行，士也；笃志而体，君子也；齐明而不竭，圣人也。

Kiu, ŝatante leĝojn, kondutas, tiu estas alta persono; kiu kun firma strebo praktikas, tiu estas noblulo; kiu, havante kleran saĝecon, ne elĉerpiĝas, tiu estas sanktulo.

人无法，则侘傺然；有法而无志其义，则渠渠然；依乎法而又深其类，然后温温然。

Homo sen leĝoj nepre ŝanceliĝas; eĉ kun leĝoj, se sen strebo al la justo, li maltrankviliĝas; apogante sin sur leĝoj kaj trapenetrante la kategorion ĝisfunde, li povas finfine resti trankvila.

礼者，所以正身也；师者，所以正礼也。

Decreguloj rektigas personon; instruistoj rektigas la decregulojn.

无礼，何以正身？无师，吾安知礼之为是也？

Sen decreguloj, per kio oni povus rektigi sin? Sen instruistoj, kiel ni povus scii decregulojn kaj praktiki ilin?

礼然而然，则是情安礼也；师云而云，则是知若师也。

Se desreguloj estas plenumataj per si mem, tiam la sento kutimiĝis al decreguloj. Oni povas diri tion, kio estas dirita de instruistoj, se onia saĝo similas al ilia.

情安礼，知若师，则是圣人也。

Tiu, kies sento kutimiĝis al decreguloj kaj kies saĝo similas al de instruistoj, estas ja sankta homo.

故非礼，是无法也；非师，是无师也。

Do ignori decregulojn estas perdo de leĝoj; ignori instruistojn – perdo de instruistoj.

不是师法而好自用，譬之是犹以盲辨色，以聋辨声也，舍乱妄无为也。

Ne laŭ instruistoj kaj leĝoj, se iu ŝatas arbitre praktiki la sian, tio similas, ke blindulo

distingus kolorojn aŭ surdulo distingus voĉojn, – do li lasas al si malordon, deliron kaj povas fari nenion.

故学也者，礼法也。

Tiel do, lernado estas lerni decregulojn kaj leĝojn.

夫师，以身为正仪而贵自安者也。

Majstro-instruisto estas tiu, kiu per sia tuta korpo praktikas ĝustan modelon kaj tenas sin nobla kaj trankvila je tio.

《诗》云：“不识不知，顺帝之则。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: “Senkonscie, senscie, oni obeas fidele al reguloj de Dio.”¹³ Jen kion mi menciis supre.

端悫顺弟，则可谓善少者矣；加好学逊敏焉，则有钧无上，可以为君子者矣。

Kiu estas bonorda, honesta kaj obeema kiel plijuna frato, tiu povas esti nomata bonuleto; se aldonitaj al li ŝato de lernado, humileco kaj spriteco, estante semkompare ekvilibra, li povas esti konsiderata kiel noblulo.

偷儒惮事，无廉耻而嗜乎饮食，则可谓恶少者矣；加惕悍而不顺，险贼而不弟焉，则可谓不详少者矣，虽陷刑戮可也。

Kiu timide okupas sin pri aferoj samkiel ruza konfuceano¹⁴, kaj senhontinde trinkas kaj manĝas bongustaĵojn, tiu povas esti nomata malbonuleto; aldone, kiu estas timema kaj flamiĝema, kaj ne obeema, dangere ribelema kaj malobeema, tiu povas esti nomata malprudentuleto, do tiun oni povas eĉ punmortigi.

老老而壮者归焉，不穷穷而通者积焉，行乎冥冥而施乎无报，而贤不肖一焉。

Kie maljunulo estas respektata kiel pliaĝa, tien ankaŭ plenaĝulo revenas; kie mizeruloj ne traktata mizere, tien ankaŭ sukcesuloj kolektiĝas; kie oni faras kaŝe favoron al aliaj senrekompence, tie homoj, tute egale ĉu saĝaj aŭ ne, unuiĝas.

人有此三行，虽有大过，天其不遂乎？

Kiam iu homo praktikas tiujn tri kondutojn, eĉ se li farus grandan eraron, ĉu la Ĉielo ne efektivigus la favoron al li?

君子之求利也略，其远害也早，其避辱也惧，其行道理也勇。

Al noblulo estas maltenace serĉi profiton, subite malproksimiĝi de malutilo, skrupule eviti hontindaĵon kaj brave konduti laŭ Taŭo kaj rezono.

君子贫穷而志广，富贵而体恭，安燕而血气不惰，劳勩而容貌不枯，怒不过夺，喜不过予。

Eĉ se en mizero la noblulo tenas strebon vasta; en riĉo kaj honoro li tenas sin humila; en

¹³ Citaĵo el *poetiko*·*da*·*regulo*·*regulo*. La frazon diris la supra Dio al la reĝo Wen.

¹⁴ Multaj esploristoj anstataŭigas la ideogramon 儒 per 儒(malbravulo).

komforteco li, estante energia je sango kaj *Ĉjō*, ne maldiligentas; en laciĝo el laboro li ne velkas je vizaĝo; en kolero li ne tro forprenas kaj en ĝojo li ne tro prodigas.

君子贫穷而志广，隆仁也；富贵而体恭，杀势也；安燕而血气不惰，柬理也；劳勩而容貌不枯，好交也；怒不过夺，喜不过予，是法胜私也。

Noblulo, eĉ estante malriĉa kaj mizera, tenas la strebon vasta kaj estas plena je bonvoleco; estante riĉa kaj honora, li tenas sin humila kaj ne montras potencon; en ripozo li estas energia je sango kaj *Ĉō*, ne estas maldiligenta kaj sekvas la rezonon; eĉ en laciĝo pro laboro li ne velkas je la vizaĝo kaj bone interrilatas; en kolero li ne tro forprenas kaj en ĝojo li ne tro prodigas, ĉar eĉ li leĝo-reguloj superas egoismon.

《书》曰¹⁵: “无有作好，遵王之道；无有作恶，遵王之路。” 此言君子之能以公义胜私欲也。

En *Libro* estas skribite: “Ne ekhavante inklinon de favorado, sekvu la reĝan vojon, ne ekhavante inklinon de malfavorado, sekvu la reĝan padon.” Ĉi tiu frazo esprimas kapablon de noblulo, ke publika justo superas egoismecan deziron.

¹⁵ Citaĵo el 尚书, 洪范.

3 不苟

SENAFEKTADO

君子行不贵苟难，说不贵苟察，名不贵苟传，唯其当之为贵。

Rilate al konduto noblulo ne taksas alta ion tro malfacilan, ne ĝojas pri troa harfenda rezonado, ne estimas nomon nur pro fameco, sed estimas la konvenecon alta.

故怀负石而赴河，是行之难为者也，而申徒狄能之；然而君子不贵者，非礼义之中也。

Estas malfacile mergiĝi kun ŝtono en riveron, kiel eblis fari tion al Shentu Di¹⁶, sed noblulo ne taksas tion, ĉar tiu konduto ne trafas decregulojn kaj juston.

山渊平，天地比，齐，秦袭，入乎耳，出乎口，钩有须，卵有毛，是说之难持者也，而惠施，邓析能之；然而君子不贵者，非礼义之中也。

“Monto kaj abismo estas ebena je nivelo; ĉielo kaj tero estas egala; Qi-regno kaj Qin-regno situas apude; kio eniras tra oreloj, tio eliras de buŝo; virino havas barbon; ovo tenas harojn” – tiuj argumentoj estas malfacile haveblaj. Sed tio eblas al Hui Shi kaj Deng Xi¹⁷. Tamen noblulo ne estimas tion, ĉar tio ne trafas decregulojn kaj juston.

盗跖吟口，名声若日月，与舜，禹俱传而不息；然而君子不贵者，非礼义之中也。

Pri Rabisto Zhi oni paroladas per buŝo kaj lia famo tiom senĉese brilas kvazaŭ suno kaj luno, kiom reĝoj Shun kaj Yu, sed tamen, nobluloj ne estimas lin, ĉar li ne taŭgas por decreguloj kaj justo.

故曰：君子行不贵苟难，说不贵苟察，名不贵传，唯其当之为贵。

Tiel do oni diras: “Rilate al konduto noblulo taksas ĝin alte ne pro la malfacileco, taksas la nomon alte ne pro la cirkuliĝo, sed nur estimas la taŭgecon.”

《诗》曰：“物其有矣，唯其时矣。” 此之谓也。

En *Poezio* estas skribite: “Aĵo ekzistas bona nur en la tempo propra.”¹⁸ Tio signifas la supre menciitan.

君子易知而难狎，易惧而难胁，畏患而不避义死，欲利而不为所非，交亲而不比，言辩而不辞。

Ku noblulo estas facile konatiĝi, sed malfacile familiariĝi. Li estas zorgema, sed ne

¹⁶ 申徒狄 sinmortigis pro protesto al la despoto de Yin-dinastio – Zhou, portante pezan ŝtonon, mergiĝis en Flavan riveron.

¹⁷ 惠施 estas unu el nominalistoj, ĉef-ministro de Liang, amiko de Zhuangzi. 邓析 estas Zheng-regnanto en la epoko Printempo-aŭtuno, kritikis Zi Chan 子产.

¹⁸ Citata el 诗经, 小雅, 鱼丽

evitas morton por justo. Li deziras profiton-utilecon, sed ne faras kion li konsideras malbona. Li estas sociema, sed ne partiema. Li argumentas kaj disputas, sed ne ĵonglas per sofismo.

荡荡乎，其有以殊于世也。

Estante grandanima, li posedas al si ion pli diferencon ol mondanoj.

君子能亦好，不能亦好；小人能亦丑，不能亦丑。

Noblulo kapabla estas simpatia, eĉ se ne kapabla, li estas simpatia; malgrandulo, se kapabla, estas malbela, kaj ne kapabla, li estas malbela.

君子能则宽容易直以开道人，不能则恭敬縳紕以畏事人；小人能则倨傲僻违以骄溢人，不能则妒嫉怨诽以倾覆人。

Noblulo kapabla estas tolerema kaj grandanime honesta, kaj gvidas la aliajn malfermi vojon, li, eĉ se ne kapabla, estante respektema kaj modesta, humile servas al aliaj. Malgrandulo, se kapabla, estante aroganta kaj bigota, senrespekte rigardas la aliajn sentaŭgaj, li, se ne kapabla, havante ĵaluzon kaj venĝemon, endanĝerigas la aliajn.

故曰：君子能则人荣学焉，不能则人乐告之；小人能则人贱学焉，不能则人羞告之。

Do estas dirite: “Se kapabla estas la noblulo, tiam oni sentas honoron lerni ĉe li, se li ne kapabla, oni afable sciigi lin pri io ajn; se kapabla estas la malgrandulo, tiam oni abomenas lerni ĉe li, se li ne kapabla, oni hontas sciigi lin pri io ajn.”

是君子，小人之分也。

Jen en kio kuŝas la distingo inter noblulo kaj malgrandulo.

君子宽而不慢，廉而不刿，辩而不争，察而不激，寡立而不胜，坚强而不暴，柔从而不流，恭敬谨慎而容，夫是之谓至文。

Noblulo estas grandanima sed ne loza, sagaca sed ne trudema, elokventa sed ne kverelema, explorema sed ne ekscesa, izole sendependa sed ne superema, firma sed ne perforta, mole obeema sed ne cedema, humile prudenta sed tolerema, - tiu estas ja persono de pleja kulturo.

《诗》曰：“温温恭人，惟德之基。” 此之谓矣。

En *Poezio* estas skribite: «Milda, humila personeco estas ja la bazo de virto.»¹⁹ Tio signifas la menciitan supre.

君子崇人之德，扬人之美，非谄谀也；正义直指，举人之过，非毁疵也；言己之光美，拟

¹⁹ Citata el *Poezio*, 诗经·大雅·抑 Iuj esploristoj de *Poezio* skribas, ke 温温恭人 estas la prapatra spirito. Sed Xunzi citas ĉi tie ne en tiu senco. [Vd. 『詩經』下、新积漢文大系 (石川忠久注) p. 220]

以舜，禹，参于天地，非夸诞也；与时屈伸，柔从若蒲苇，非怯懦也；刚强猛毅，靡所不信，非骄暴也。

Noblulo iam adoras alies virton kaj laŭdas alies belecon, tamen tio ne estas flatado; li, iam rekte prezentante justecon, elmontras alies eraron, tamen tio ne estas kalumnio; li iam parolas pri sia brila beleco, kvazaŭ Shun kaj Yu farus al la Ĉielo kaj la tero, tamen tio ne estas fanfaronio; li iam laŭ situacio iĝas kurba aŭ rekta flekseble, kvazaŭ tifaŭ kaj fragmito, tamen tio ne estas pro timo; li iam iĝas forta, kuraĝa kaj plena de memfido, tamen tio ne estas pro aroganteco.

以义变应，知当曲直故也。

Ĉar li laŭ justo povas ŝanĝi sin kurba aŭ rekta konforme al situacio.

《诗》曰：“左之左之，君子宜之；右之右之，君子有之。”此言君子能以义屈信变应故也。

Estas dirite en *Poezio*: “Se estas necese helpi maldekstren, tiam maldekstren, noblulo konvene turnadas sin; se helpi dekstren, tiam dekstren, la noblulo sintenadas konvene.”²⁰ Tio signifas, ke la noblulo povas laŭ justo kurbiĝi je fido aŭ ŝanĝiĝi responde de konveneco.

君子，小人之反也。

Noblulo kaj malgrandulo staras tute male unu kontraŭ la alia.

君子大心则天而道，小心则畏义而节；知则明通而类，愚则端恇而法；见由则恭而止，见闭则敬而齐；喜则和而理，犹则静而理；通则文而明，穷则约而详。

La noblulo, grandanima, respektas la Ĉielon kaj sekvas la Taŭon, se li estas etanima, li estas skrupula je justo kaj prudenta; kiu estas saĝa, tiu klare penetras diversajn kategoriojn; kiu estas stulta, tiu honeste obeas leĝojn; dungite, li estas humila kaj detenas sin; ne dungite, li restas respektema kaj ordema; Estante ĝoja, li tenas sin harmonia kaj racia; estante malĝoja, li tenas sin kvietaj kaj racia; estante en favora situacio, li estas kulturita kaj klera; estante en sufero, li sindetenas streĉita kaj skrupula.

小人则不然，大心则慢而暴，小心则淫而倾；知则攫盗而渐，愚则毒贼而乱；见由则兑而倨，见闭则怨而险；喜则轻而翾，犹则骄而偏，穷则弃而[彳隰]。

Ne tia estas la malgrandulo. Sentante sin grandanima, li iĝas aroganta kaj feroca; estante etanima, li diboĉas kaj degeneras; se li estas sagaca, li ŝtelas kaj trompas; se stulta, li banditas kaj tumultas; dungite, li rabas kaj fieracetas; ne dungite, li iĝas venĝema kaj danĝera; kiam li ĝojas, li estas facilanima kaj hastema; kiam malĝojas, li estas orgojla kaj obstina; en malfavora situacio li tuj kapitulacas kaj deprimiĝas.

²⁰ Citaĵo el *Poezio*: 诗经·小雅·裳裳者华. Iuj esploristoj de *Poezio* konsideras 君子 kiel prapatran spiriton (詩經中 p. 431), sed ĉi tie Xunzi ne uzas la terminon en tia senco.

传曰：“君子两进，小人两废。” 此之谓也。

Oni diras: “Noblulo antaŭeniras en ajna situacio, malgrandulo difektiĝas en ajna sitacio, ĉu favora aŭ malfavora.” Tio signifas la supre menciitan.

君子治治，非治乱也。

Reĝo ordigas regadon, sed ne ordigas kaoson.²¹

曷谓邪？ 曰：礼义之谓治，非礼义之谓乱也。

Kial estas dirite tiel? Estas dirite: “Decreguloj kaj justo signifas regadon, manko de decreguloj kaj justo signifas kaoson.”

故君子者，治礼义者也，非治非礼义者也。

Do la reĝo regas landon, kie estas decreguloj kaj justo, sed ne regas landon, kie mankas decreguloj kaj justo.

然则国乱将弗治与？ 曰：国乱而治者，非案乱而治之之谓也，去乱而被之以治；人污而修之者，非案污而修之之谓也，去污而易之以修。

Se tiel, ĉu li ne regas la landon en kaoso? Estas dirite: “Ordigi la landon en kaoso ne signifas ordigi la regadon pere de kaoso, sed forigi la kaoson kaj poste regi; tio estas samkiel kulturi putriĝinton ne signifas kulturadon pere de putrigo, sed forigon de putraĵo, kaj poste estos facile kulturi.

故去乱而非治乱也，去污而非修污也。

Tiel do forigo de kaoso ne estas regado de kaoso, forigo de putraĵo ne estas kulturigo de putriĝinto.

治之为名，犹曰君子为治而不为乱，为修而不为污也。

La termino 'regi' signifas, ke reĝo ordigas la regadon, sed ne la kaoson, samkiel la kulturado ne estas por putriĝinto.

君子絮其辩而同焉者合矣，善其言而类焉者应矣。

Noblulo ĝustigas sian argumenton, do akordiĝas kun li sampensuloj, li plibonigas sian parolon, do samspeculoj respondas al li.

故马鸣而马应之，非知也，其势然也。

Unu ĉevalo henas kaj la alia respondas – tio estas ne pro saĝeco, sed pro la natureco.

故新浴者振其衣，新沐者弹其冠，人之情也。

Kiu ĵus banis sin, tiu ekskuas la vestaĵon, kaj kiu lavis sin, tiu frapetas la ĉapon – tio estas la natura homa sento.

²¹ Mi uzas la vorton ‘reĝo’ por la traduko de 君子 ĉi tie. Laŭ Xunzi, regebla estas la lando, kie landanoj estas edukitaj per decreguloj kaj justo. Estas skribite en la ĉap. 正论: 征暴诛悍，治之盛。 Tumulton konkeras subpremo per 征诛. Kie mankas decreguloj, tie ne eblas la regado, sed nur eblas la korektpunado.

其谁能以己之漁漁，受人之緘緘者哉！

Kiu do povus, havante sian klaran penson, ricevi alies obskurantismon?

君子养心莫善于诚，致诚则无它事矣，唯仁之为守，唯义之为行。

| Al noblulo estas nenio pli bona ol kulturi koron por fariĝi honesta. Por atingi honestecon estas necesa nenio alia ol nur teni bonvolecon kaj nur fari juston.²²

诚信守仁则形，形则神，神则能化矣；诚心行义则理，理则明，明则能变矣。

Konvinkiĝo je honesteco kaj tenado de bonvoleco prenas la formon, kaj la formo fariĝas spirito, kaj la spirito povas transformi; honesteco en koro kaj konduto iĝas justo kaj rezono, la rezono iĝas klera, kaj la klereco povas ŝanĝi.

变化代兴，谓之天德。

Okazadas unu post la alia laŭvice ŝanĝiĝo kaj transformiĝo – tio estas nomata la Ĉiela virto.

天不言而人推高焉，地不言而人推厚焉，四时不言而百姓期焉。

Kvankam la Ĉielo diras nenion, tamen homoj supozas la altecon, la Tero diras nenion, tamen homoj supozas la dikecon, la sezonoj diras nenion, tamen popolo anticipas.

夫此有常，以至其诚者也。

Estas ĉe ili la konstanteco, ĉar ili estas la plej honestaj.

君子至德，嘿然而喻，未施而亲，不怒而威。

Noblulo atingis pleje la virton, do spite ke li silentas, oni komprenas lin; spite ke li ne faras ian favoron, oni sentas lin intima; spite ke li ne koleras, oni sentas lin majesta.

夫此顺命，以慎其独者也。

Li sekvas la Ordonon kaj prudente zorgas pri sia sendependeco.²³

善之为道者，不诚则不独，不独则不形，不形则虽作于心，见于色，出于言，民犹若未从也，虽从必疑。

Je la vojo por fari bonon, se vi ne estas honesta, vi ne povas esti sendependa; se vi ne estas sendependa, vi ne povas formiĝi firma; se vi ne formiĝas, kiel ajn vi klopodus je la koro, kiel ajn vi afektus, kiel ajn vi parolus, popolanoj ne obeas vin, aŭ eĉ se obeas, ili nepre dubas vin.

天地为大矣，不诚则不能化万物；圣人为知矣，不诚则不能化万民；父子为亲矣，不诚则不

²² En pensmaniero de Xunzi miksiĝas celo kaj rimedo: ĉu honesteco estas celo aŭ rimedo?

²³ La ideogramo 命 havas diversajn signifojn. Do iu interpretas ĝin kiel destinon, la alia – kiel ordonon. Diversas ankaŭ la kompreno de 独 – iu prenas ĝin kiel “sin dediĉi nur al justo”, la alia – unikeco. Hutton translates: “His orders are obeyed with such diligence because he is vigilantly steadfast.”[p20] Knoblock – “Because he preserves authenticity of his individual uniqueness, he is obedient to his destiny.”[p59] La interpreto de tiu propozicio koncernas la tutan strukturon de la ideo de Xunzi. Do mi tradukis laŭlitere.

疏；君上为尊矣，不诚则卑。

La Ĉielo kaj la Tero faras la grandan, sed se ili ne estas honestaj, ne povas ŝanĝi ĉion; sanktulo faras la saĝan, sed se li ne estas honesta, ne povas ŝanĝi ĉiujn popolojn; patro kaj filo estas intimaj, sed se ili ne estas honestaj, ili iĝas fremdaj; reĝo estas respektinda, sed se li ne estas honesta, li estas malnobla.

夫诚者，君子之所守也，而政事之本也。

La honesteco estas tio, kion nobluloj devas konservi kaj tio, kio estas la fundamento de politikaj aferoj.

唯所居以其类至，操之则得之，舍之则失之。

Se li sidas sur ĝi, kolektiĝas la similaj al li. Se li manovras honeste, li akiras; se li forlasas honestecon, li perdas.

操而得之则轻，轻则独行，独行而不舍则济矣。

Kiu povas manovri kaj akiri, al tiu facilas; al kiu estas facile, tiu povas iri sendependa; kiu povas iri sendependa kaj ne forlasas la aferon, tiu perfektigas.

济而材尽，长迁而不反其初则化矣。

Kiam li perfektigis ĉiujn materialojn dum longe kaj ili jam ne revenas al komenco, tiam estas plenumita la ŝanĝiĝo.

君子位尊而志恭，心小而道大，所听视者近而所闻见者远。

Noblulo estas respektinda je la statuso sed humila je la strebado, malgranda je la koro sed granda je la Taŭo. Li aŭskultas kaj rigardas proksimen, sed aŭdas kaj vidas malproksimen.

是何邪？则操术然也。

Kial estas tio? La maniero de manovro estas tia.

故千人万人之情，一人之情是也；天地始者，今日是也；百王之道，后王是也。

Por li sentoj de mil homoj aŭ dek mil homoj egalas senton de unu homo. Komenco de la Ĉielo kaj la Tero egalas la nunon. Vojo de cent antaŭaj reĝoj egalas la vojon de postaj reĝoj.

君子审后王之道而论于百王之前，若端拜而议。

Noblulo esploras la vojon de postaj reĝoj kaj samtempe argumentas pri antaŭaj cent reĝoj, do eblas klare diskutadi pri ambaŭ.

推礼义之统，分是非之分，总天下之要，治海内之众，若使一人，故操弥约而事弥大。

Supozi pri la fonto de decreguloj kaj justo, distingi dividon de praveco kaj malpraveco, amplekse kompreni la subĉielan esencon, kaj regi popolamason en la mondo kvazaŭ uzi unu homon, tiel do ju pli simpla la maniero de manovro, des pli granda fariĝas la afero. 五寸之矩，尽天下之方也。

Tio estas same, kiel per mezurilo longa je 5 cunoj tutmezuri la mondan kvadraton.

故君子不下室堂而海内之情举积此者，则操术然也。

Tial, la noblulo ne eliras el sia halo kaj informoj de la mondo amase kolektiĝas ĉe li, ĉar la maniero de manovro estas tia.

有通士者，有公士者，有直士者，有恇士者，有小人者。

Estas personeco trapenetrema, estas personeco publikema, estas personeco rekta, estas personeco honesta, kaj estas personeco malgranda.

上则能尊君，下能爱民，物至而应，事起而辨，若是，则可谓通士矣。

Kiu povas supre respekti reĝon kaj sube ami popolon, kaj povas respondi al ekstrema ŝanĝiĝo de aĵoj kaj povas mastrumi ajnan okazintaĵon, tiun eblas nomi trapenetrema personeco.

不下比以暗上，不上同以疾下，分争于中，不以私害之，若是，则可谓公士矣。

Kiu ne konspiras kune kun la subo kontraŭ la supro, aŭ kiu ne turmentas la subon obeante al la supro, kaj en konflikto ne damagas aliajn pro sia egoismo, tiujn eblas nomi senpartia personeco.

身之所长，上虽不知，不以悖君；身之所短，上虽不知，不以取赏，长短不饰，以情自竭，若是，则可谓直士矣。

Kiam la supro ne scias, ke vi havas meriton, tiam vi ne perfidas la reĝon; kiam la supro ne scias, ke vi havas malfortaĵon, tiam vi mem ne akceptas la laŭdadon, kaj vi, ne ornamante vian fortaĵon kaj malfortaĵon, elmontras vian senton; se tiel, eblas nomi vin rektanima personeco.

庸言必信之，庸行必慎之，畏法流俗而不敢以其所独甚，若是，则可谓恇士矣。

Se via ordinara parolado estas nepre fidinda kaj via konduto estas nepre prudenta, kaj kun timo de leĝo vi ne aŭdacas sekvi mondan modon, kaj ne falas en la egocentran, se tiel, eblas nomi vin honesta personeco.

言无常信，行无常贞，唯利所在，无所不倾，若是，则可谓小人矣。

En parolado ĉiam mankas fidindaĵo, en konduto ĉiam mankas ĉasteco, kaj serĉas nur profiton ĉie ajn – tian personon eblas nomi malgrandulo.

公生明，偏生暗，端恇生通，诈伪生塞，诚信生神，夸诞生惑。

Senpartiemo naskas lumon, partiemo naskas mallumon, sincereco naskas trapenetreblecon, trompo kaj artifiko naskas ŝtopiĝon, fidinda honesteco naskas spiritecon, fanfaronado naskas ŝanceliĝon.

此六生者，君子慎之，而禹，桀所以分也。

Kion tiuj ses naskas, pri tio noblulo devas esti skrupula, ĉar en tio kuŝas la diferenco

inter Yu kaj Jie.

欲恶取舍之权：见其可欲也，则必前后虑其可恶也者；见其可利也，则必前后虑其可害也者；而兼权之，孰计之，然后定其欲恶取舍。

Je la pensado de ŝato kaj malŝato, kiam vi vidas ion ŝatatan, vi devas nepre konsideri antaŭe kaj poste ion malbonan en ĝi. Kiam vi vidas profiton-utilon, vi devas nepre konsideri antaŭe kaj poste ion malutilan en ĝi. Post kiam vi pesadis kaj plene kalkuladis tion, vi devas decidi akcepti aŭ malakcepti la deziratan.

如是，则常不失陷矣。

Tiel do vi povas ĉiam eviti perdojn.

凡人之患，偏伤之也。

Aflikto de ordinaruloj estas, ke ili vundiĝas per unuflankeco.

见其可欲也，则不虑其可恶也者；见其可利也，则不顾其可害也者。

Vidante la deziratan, ili ne konsideras pri ĝia malbono; vidante profiton, ili ne zorgas, ke ili povas malprofiti pro ĝi.

是以动则必陷，为则必辱，是偏伤之患也。

Tial do ili, moviĝante, nepre falas en eraron; farante, ili nepre estas hontigitaj. Tio estas aflikto, vundita per unuflankeco.

人之所恶者，吾亦恶之。

Kion oni malŝatas, tion ankaŭ mi malŝatas.

夫富贵者则类傲之，夫贫贱者则求柔之，是非仁人之情也，是奸人将以盗名于晦世者也，险莫大焉。

Sed, rigardi riĉulojn-nobelojn arogantaj laŭ klaso aŭ rigardi malriĉulojn-mizerulojn inklinaj al mildeco – tio ne estas sento de bonvoleculo. Tia rigardo estas de malbonintenculo, ŝtelanta nomon en malluma mondo, kaj ne estas la danĝero pli granda ol tio.

故曰：盗名不如盗货。田仲，史鳧不如盗也。

Tial do estas dirite: “Ŝtelado de nomo estas malpli bona ol ŝtelado de varoj.” Tian Zhong kaj Shi Qiu estas malpli bonaj ol ŝtelistoj.²⁴

²⁴ 田仲 (alinome 陈仲子) estis Qi-regnanto en Milit-epoko. 史鳧(子鱼, 史鱼) estis granda oficisto de Wei-regno, admonis la dukon Ling 卫灵公 per sia morto. Ili ambaŭ estis famaj je sia pureco, sed Xunzi kritikis ilin pro kontraŭnatura konduto. Vd. en la 6-a ĉap.

4 荣辱

HONORO KAJ MALHONORO

僑泄者，人之殃也。

Aroganteco alportas al homoj malbonon.

恭俭者，偃五兵也。

Humileco repuŝas kvin armilojn.

虽有戈矛之刺，不如恭俭之利也。

Kvankam halebardo kaj lanco pikas, tamen tio ne povas superi efekton de humileco.

故与人善言，暖于布帛；伤人之言，深于矛戟。

Tiel do bona vorto de homo estas pli varma ol lintolaĵo kaj silkaĵo; vundo el homa vorto estas pli profunda ol el lanco kaj halebardo.

故薄薄之地，不得履之，非地不安也。

Se iu tero estas maldika por trapaŝi, la danĝereco estas ne pro malstabila tero.²⁵

危足无所履者，凡在言也。

Tie estas danĝere, ne ĉar piedpremi nenien, sed ĝenerale ĉar vortoj danĝeraj.

巨涂则让，小涂则殆，虽欲不谨，若云不使。

Estante sur stratego, oni devas cedi unu al la alia; estante sur strateto, oni devas esti atentema je danĝereco.²⁶ Eĉ se vi dezirus esti maldiskreta, vi ne povas lasi vin tia.

快快而亡者，怒也；察察而残者，忮也；博而穷者，訾也；清之而俞浊者，口也；豢之而俞瘠者，交也；辩而不说者，争也；直立而不见知者，胜也；廉而不见贵者，别也；勇而不见惮者，贫也；信而不见敬者，好剽行也。

Memplaĉa sed pereiga estas kolero; sagaca sed vundanta estas malamo; io ju pli vasta des pli persekuta estas kalumnio; io ju pli puriga des pli malklara estas buŝo; ke ju pli oni nutrigas des pli malgrasigas, tio estas interrilato; ke ju pli oni disputas des pli malagrablas – tio estas kverelo; kio ne videblas dum oni rekte staras – tio estas venko; kio ju pli sincera des pli malnobla – tio estas atenco; kio eĉ kun kuraĝo ne eviteblas – tio estas malriĉo; se iu kun konvinko ne estas respektata, tio estas ĉar li ŝatas despote konduki.

此小人之所务而君子之所不为也。

²⁵ 薄薄 Multaj esploristoj prenas la ideogramon por 溥 (vasta).

²⁶ Esploristoj prenas la ideogramon 让 por 攘, sed mi tradukis laŭlitere.

Tiel kondutas malgrandulo, sed noblulo ne faras tion.

斗者，忘其身者也，忘其亲者也，忘其君者也。

Kverelemulo estas tiu, kiu forgesas sin mem, forgesas sian parencaron, forgesas sian estron.

行其少顷之怒而丧终身之躯，然且为之，是忘其身也；家室立残，亲戚不免于刑戮，然且为之，是忘其亲也；君上之所恶也，刑法之所大禁也，然且为之，是忘其君也。

Li laŭ sia portempa ekkolero perdas la korpon por ĉiam. Li faras tion, ĉar li forgesas sin mem; malgraŭ ke li damaĝas sian familion kaj lia parencaro ne povas eviti punon aŭ mortopunon, tamen li faras tion, ĉar li forgesas la parencaron; tion malŝatas la supra estro kaj malpermesas la punjuroj, malgraŭe li faras tion, ĉar li forgesas sian estron.

忧忘其身，内忘其亲，上忘其君，是 刑法之所不舍也，圣王之所不畜也。

Kiu pro sia ĉagreno forgesas sin mem, interne forgesas siajn gepatrojn, ekstere forgesas sian estron, tiun ne preterlasas punjuro nek nutras ajna sankta reĝo.

乳彘触虎，乳狗不远游，不忘其亲也。

Porkidoj ne proksimiĝas al tigro, hundidoj ne vagas malproksimen, ĉar ili ne forgesas siajn gepatrojn.

人也，忧忘其身，内忘其亲，上忘其君，则是人也而曾狗彘之不若也。

Sed homoj povas forgesi sin mem pro sia ĉagreno, interne forgesi siajn gepatrojn, ekstere forgesi sian estron, ĉar tiaj homoj ne estas tiel egalaj, kiel hundoj kaj porkoj.

凡斗者，必自以为是而以人为非也。

Kiu kverelas, tiu nepre taksas sin prava kaj aliulojn malpravaj.

己诚是也，人诚非也，则是己君子而人小人也，以君子与小人相贼害也。

Tiu konsideras vere sin prava, la alian vere malprava. Tiel tiu mem estas reĝo kaj la alia estas malgrandulo. Tiu, rigardante sin reĝo, damaĝas malgrandulon kiel kanajlon. 忧以忘其身，内以忘其亲，上以忘其君，岂不过甚矣哉！

Pro sia ĉagreno tiu forgesas sin mem, interne forgesas siajn gepatrojn, supre forgesas sian estron – kia eraro tio ja estas!

是 人也，所谓“以狐父之戈鏹牛矢”也。

Tiu homo estas, t. n., homo, kiu “tranĉas fekaĵon de bovo per majstra lanco de Hufu”.

将以为智邪？则愚莫大焉。

Ĉu oni rigardas tion saĝa? Nenio estas pli malsaĝa ol tio.

将以为利邪？则害莫大焉。

Ĉu oni rigardas tion profitdona? Nenio estas pli malhelpa ol tio.

将以为荣邪？则辱莫大焉。

Ĉu oni rigardas tion honorinda? Nenio estas pli malhonorinda ol tio.

将以为安邪？则危莫大焉。

Ĉu oni rigardas tion sekura? Nenio estas pli danĝera ol tio.

人之有斗，何哉？我欲属之狂惑疾病邪，则不可，圣王又诛之。

Homoj kverelas, kial? Mi volus atribui tion al furiozo kaj malsano, sed ne sufiĉas. Ankaŭ sankta reĝo akuzas tion.

我欲属之鸟鼠禽兽邪，则不可，其形体又人，而好恶多同。

Mi volus atribui tion al kondutoj de birdoj, ratoj, bestoj, sed ne sufiĉas. Tiuj homoj havas la saman korpon, kiel la ordinaraj, kaj ili estas preskaŭ samaj je gustoj, ŝato kaj malŝato.

人之有斗，何哉？我甚丑之！

Homoj kverelas, kial? Mi tre malŝatas tion!

有狗彘之勇者，有贾盗之勇者，有小人之勇者，有士君子之勇者：争饮食，无廉耻，不知是非，不辟死伤，不畏众强，恇恇然唯利饮食之见，是狗彘之勇也。

Estas kuraĝo de hundoj kaj porkoj, estas kuraĝo de komercistoj kaj rabistoj, estas kuraĝo de malgranduloj, estas kuraĝo de kavaliroj-nobluloj: barakti por trinkaĵo-manĝaĵo sendetene kaj senhonte, ne sciante pravecon-malpravecon, ne zorgante je morto kaj vundo, ne timante amason nek potencon, – voreme vidi nur profiton de trinkado kaj manĝado – jen tio estas kuraĝo de hundoj kaj porkoj.

为事利，争货财，无辞让，果敢而振，猛贫而戾恇恇然唯利之见，是贾盗之勇也。

Fari aferon nur por profito, barakti por mono, neniam cedi, aŭdaci kaprice agi, feroce malvirte avidi, voreme vidi nur profiton – jen tio estas kuraĝo de komercistoj kaj rabistoj.

轻死而暴，是小人之勇也。

Malestimi morton kaj violenti – jen tio estas kuraĝo de malgranduloj.

义之所在，不倾于权，不顾其利，举国而与之不为改视，重死持义而不挠，是士君子之勇也。

Serĉante justecon, ne inklini al potenco, ne zorgadi pri sia profito, ne ŝanĝi sian rigardon spite ke tuta regno subtenas la alian opinion, estimi morton grava, teni firme juston senlace – jen tio estas kuraĝo de kavaliroj-nobluloj.

儵[魚本]者浮阳之鱼也，胠于沙而思水，则无逮矣。

Leŭcisko estas fiŝo, turnanta sin supren al la suno, sed jam estos malfrue al ĝi sopiri akvon en malflusa ŝlimejo.²⁷

挂于患而欲谨，则无益矣。

²⁷儵[魚本] – nomo de fiŝo, sed nun ne troviĝas la ideogramo[魚本]. 儵 aperas en *Zhuangzi*, kiam li kun Huizi vidis la fiŝon ĉe la rivero 濠梁.

Estas jam vane teni sin diskreta post afliktiĝo.

自知者不怨人，知命者不怨天，怨人者穷，怨天者无志。

Kiu konas sin mem, tiu ne riproĉas la aliajn; kiu scias destinon, tiu ne riproĉas la Ĉielon. Kiu riproĉas la aliajn, tiu falas en mizeron; kiu riproĉas la Ĉielon, tiu ne havas sian strebon.

失之己，反之人，岂不迂乎哉！

Perdi sin mem kaj atribui la kulpon al aliuloj – tio estas ja absurda elvojiĝo.

荣辱之大分，安危利害之常体：先义而后利者荣，先利而后义者辱；荣者常通，辱者常穷；通者常制人，穷者常制于人，是荣辱之大分也。

Se temas pri la divido inter honoro kaj malhonoro, pri ĝenerala normo de sekuro kaj danĝero, profito kaj malprofito – honora estas tiu, kiu faras juston unua kaj profiton dua; estas malhonora tiu, kiu faras profiton unua kaj juston dua. La honorata ĉiam sukcesas, la malhonorata ĉiam falas en mizeron. La sukcesinto ĉiam regas homojn, la mizerulo estas ĉiam regata de homoj. Jen estas la divido inter honoro kaj malhonoro.

材悫者常安利，荡悍者常危害；安利者常乐易，危害者常忧险；乐易者常寿长，忧险者常夭折，是安危利害之常体也。

La honesta je karaktero ĉiam gajnas sekuron kaj profiton, diboĉa sovaĝulo ĉiam renkontas danĝeron kaj malutilon; al homo en sekuro kaj profito ĉiam estas ĝoje kaj facile, sed al homo en danĝero kaj malutilo estas ĉiam splene kaj danĝere; ĉiam longe vivas tiu, al kiu estas ĝoje kaj facile, ĉiam antaŭtempe mortas tiu, kiu estas en spleno kaj danĝero. Jen tiaj ĉiam estas la homoj en sekureco kaj en danĝero, la homoj kun profito kaj malprofito.

夫天生蒸民，有所以取之。

La Ĉielo naskas amason da popolo, tial do posedas ilin.

志意致修，德行致厚，智虑致明，是天子之所以取天下也。

Strebo kaj volo sufiĉe estas kulturata, virto kaj konduto estas sufiĉe alta, saĝo kaj zorgo estas sufiĉe klara – jen kial la Ĉiela Filo posedas la mondon sub la Ĉielo.

政令法，举措时，听断公，上则能顺天子之命，下则能保百姓，是诸侯之所以取国家也。

Dekretoj konformas al la leĝoj, konduto konformas al la tempo, juĝoj rezolute estas senpartiaj, kaj supre povas bone obei al la ordono de la Ĉiela Filo, sube povas bone teni centon da subuloj sekuraj – jen kial landestroj posedas la landojn.

志行修，临官治，上则能顺上，下则能保其职，是士大夫之所以取田邑也。

Strebo kaj konduto estas kulturata, regas bone ŝtataparaton kiel burokurato, supre povas bone obei al la supro, sube povas bone teni la oficon – jen kial grandaj oficistoj posedas kampojn kaj urbojn.

循法则，度量，刑辟，图籍，不知其义，谨守其数，慎不敢损益也，父子相传，以持王公，是故三代虽亡，治法犹存，是官人百吏之所以取禄秩也。

Obeante bone al leĝoj kaj reguloj, lojale al mezuriloj-pesiloj, al punjuroj kaj al libroj, kvankam ne sciante la signifon, tamen prudente tenante la ciferojn akurataj, skrupule ne aŭdacas manipuli arbitre deficiton-profiton, kaj de patra generacio al fila generacio daŭre subtenas reĝojn kaj dukojn, kaj tiel la administrado per leĝoj ekzistas eĉ post la pereado de antikvaj tri dinastioj²⁸ – jen kial centoj da oficistoj ricevas salajron kaj rangon. 孝弟原憲，鞫录疾力，以敦比其事业而不敢怠傲，事庶人之所以取暖衣饱食，长生久视，以免于刑戮也。

Dezirante esti sincera je fila pietato kaj obeemo al supro, esti diligenta tuj kaj tutforte, je dispono de laboroj ne aŭdacas maldiligenti – jen kial popolanoj ricevas sufiĉe da varmaj vestaĵoj kaj manĝaĵoj, longe vivas kun plezuro kaj evitas punon kaj mortpunon. 饰邪说，文奸言，为倚事，陶诞，突盗，惕，悍，僇，暴，以偷生反侧于乱世之间，是奸人之所以取危辱死刑也。

Ornami maljustan opinion, paroli perversaĵon, fari strangaĵon, kalumnii, kaŝe derabi, diboĉi, fari brutalaĵon, aroganti, perforti, kaj vivi renverse en kaosa mondo – jen kiel kanajlo ricevas danĝeron, malhonoron kaj mortpunon.

其慮之不深，其擇之不謹，其定取舍楛慢，是其所以危也。

La pensado de tia homo ne estas profunda, lia elekto ne estas prudenta, lia decido kion preni aŭ forĵeti estas malglata kaj kaprica, kaj tiel estas danĝere.

材性知能，君子小人一也。

Je dotitaĵo, naturo, intelekto kaj kapablo, ĉe noblulo kaj malgrandulo estas unu same. 好荣恶辱，好利恶害，是君子小人之所同也，若其所以求之之道则异矣。

Ambaŭ ŝatas honoron kaj malŝatas malhonoron, ŝatas profiton kaj malŝatas malprofiton. En tio estas tute same inter nobluloj kaj malgranduloj. Sed diversas la vojo, laŭ kiu ambaŭ serĉas ilin.

小人也者，疾为诞而欲人之信己也，疾为诈而欲人之亲己也，禽兽之行而欲人之善己也。

Malgrandulo klopodas fanfaroni por akiri alies fidon al si, klopodas trompi por akiri alies favoron al si, kondutas kiel besto por ke aliaj rigardu lin bona.

慮之難知也，行之難安也，持之難立也，成則必不得其所好，必遇其所惡焉。

Malfacile estas kompreni lian pensmanieron, malfacile estas, ke lia konduto estu stabila, malfacile estas, ke li staru daŭre. Sekve, io ŝatata de li ne sukcesas, ion malŝatatan li nepre renkontas.

故君子者，信矣，而亦欲人之信己也；忠矣，而亦欲人之亲己也；修正治辨矣，而亦欲人之

²⁸ 三代虽亡 tri dinastioj estas Xia, Yin, Zhou 夏，殷，周。

善己也。

Dume noblulo, estante mem fidinda, deziras, ke ankaŭ la aliaj fidu lin mem; estante mem lojala, deziras, ke ankaŭ la aliaj estu favoraj al li mem; estante mem ordema je sia moralo kaj afero, deziras, ke ankaŭ la aliaj estu bonaj al li mem.

慮之易知也，行之易安也，持之易立也，成則必得其所好，必不遇其所惡焉。

Lia konsidero estas facile komprenebla, lia konduto estas facile stabila, kaj li facile staras firme, finfine nepre sukcesas io ŝatata de li kaj nepre ne renkontas ion malŝatatan.

是故窮則不隱，通則大明，身死而名彌白。

Tiel do, eĉ se li falus en malfacilon, li ne perdiĝas; se li sukcesas, li brilegas; se li mortos, lia nomo des pli sublimos.

小人莫不延頸舉踵而願曰：“知慮材性，固有以賢人矣。”

Malgranduloj, adorante lin kaj starante sur piedpintoj kun kolo longigite, volas diri: “Je intelekto, pensado kaj natura dotitaĵo li estas denaska saĝulo origine.”

夫不知其與己無以異也，則君子注錯之當，而小人注錯之過也。

Ĉar ili ne scias, ke estas nenia diferenco inter ili kaj li. Nur trafis ĝuste tio, ke noblulo ĉefe interesiĝas, kaj maltrafis tio, ke malgranduloj ĉefe interesiĝas.

故孰察小人之知能，足以知其有餘，可以為君子之所為也。

Do, se observi intelekton kaj kapablon de malgranduloj, ili havas sufiĉe da intelekto, eĉ superflue, kaj povus fari kion noblulo faras.

譬之越人安越，楚人安楚，君子安雅，是非知能材性然也，是注錯习俗之節異也。

Se diri parabole, tio estas samkiel Yue-landanoj loĝas pace en Yue kaj Chu-landanoj loĝas pace en Chu-regno, kaj noblulo loĝas pace en eleganta fajneco, ne pro la intelekta kapablo kaj natura dotitaĵo, sed pro apartiga diferenco de intereso kaj moro.²⁹

仁義德行，常安之術也，然而未必不危也；污慢，突盜，常危之術也，然而未必不安也。

Bonvoleco, justo, konduto de virto estas ĉiam rimedo por paco, sed tamen ankoraŭ tio ne garantias nepran sendanĝerecon; kalumunio kaj abrupta ŝtelado estas ĉiam la rimedo de danĝero, sed tamen tio ne ĉiam okazigas nepran malpacon. .

故君子道其常而小人道其怪。

Sed noblulo iras ĉiam laŭ la konstanta vojo kaj malgranduloj laŭ la bizara vojo.

凡人有所一同；飢而欲食，寒而欲暖，勞而欲息，好利而惡害，是人之所生而有也，是无待而然也，是禹，桀之所同也。

Ĉiuj homoj havas unu samecon: se ili malsatas, deziras manĝi; se estas malvarme, ili deziras varmon; ili ŝatas profiton kaj malamas damaĝon – ĉio estas tio, kion la homoj

²⁹ Iuj esploristoj (王引之) konsideras 雅 kiel alinomon de 夏, kiu signifas 中国.

denaske havas, do iĝas tiel sen atendi. Tio estas sama inter Yu kaj Jie.

目辨白黑美恶，耳辨音声清浊，口辨酸咸甘苦，鼻辨芬芳腥臊，骨体肤理辨寒暑疾养，是又人之所常生而有也，是无待而然也，是禹，桀之所同也。

Okuloj distingas blankon kaj nigron, belon kaj malbelon; oreloj distingas sonon kaj voĉon, konsonantojn senvoĉan kaj voĉan; buŝo distingas la acidan kaj la salan, la dolĉan kaj la amaran, nazoj distingas parfuman aŭ aromon bonodoron kaj rancan aŭ fetoran malbonodoron, ostoj, karno kaj haŭtoj distingas malvarmon kaj varmon, doloron kaj jukon – ĉio estas ankaŭ tio, kion la homoj denaske ĉiam havas, do iĝas tiel sen atendi. Al Yu kaj al Jie estas tute same.

可以为尧，禹，可以为桀，跖，³⁰可以为工匠，可以为农贾，在势注错习俗之所积耳，是又人之所生而有也，是无待而然者也，是禹，桀之所同也。

Homoj povas fariĝi Yao, Yu; homoj povas fariĝi Jie, Zhi; homoj povas fariĝi metiistoj, inĝenieroj; homoj povas fariĝi kamparanoj kaj komercistoj. Tio estas nur la sekvo de intereso, kutimo kaj moro, amasigitaj dum la vivo de ĉiu homo. Ĉion la homoj denaske havas, do iĝas tiel sen atendi. Tiel estas same al Yu kaj al Jie.

为尧，禹则常安荣，为桀，跖则常危辱；为尧，禹则常愉佚，为工匠，农贾则常烦劳。

Sed al Yao kaj Yu estis ĉiam sekure kaj prosperige, al Jie kaj Zhi estis ĉiam dangere kaj hontinde; al Yao kaj Yu estis ĉiam ĝojige kaj facile, al metiistoj-inĝenieroj kaj kamparanoj-komercistoj estas ĉiam ĝene kaj penige laboregi.

然而人力为此而寡为彼，何也？曰：陋也。

Spite tion homoj klopodas fari ĉi tion kiel la lastaj kaj estas malmulte da homoj, kiuj faras tion kiel la unuaj. Kial? Ĉar ili estas etanime obstinaj.

尧，禹者，非生而具者也，夫起于变故，成乎修修之为，待尽而后备者也。

Yao kaj Yu ne estis denaske ekipitaj per tia karaktero, ili ŝanĝis sin en tiajn, kaj fariĝis tiaj sekve de sinkulturado. Atendante plejan penadon, ili estiĝis poste pretigitaj.

人之生固小人，无师无法则唯利之见耳。

Homoj estas denaske malgranduloj, tial do se mankas instruisto kaj leĝo-reguloj, ili vidas nur profiton.

人之生固小人，又以乱世，得乱俗，是以小重小也，以乱得乱也。

Homoj naskiĝas kiel malgranduloj, kaj aldone en senorda mondo havigante al si senordan moron, despli iĝas malgrandaj kaj malgrandaj, ekipite per senordo en ĥaoso.

君子非得势以临之，则无由得开内焉。

Se noblulo ne havus majestecon por regi ilin, tiam al ili neniel eblas disvolviĝi de interne.

³⁰ 尧 Yao kaj 禹 Yu estas sanktaj reĝoj, 桀 Jie estas fama tirano, 跖 Zhi – rabisto.

今是人之口腹，安知礼义？安知辞让？安知廉耻隅积？

Nun kiel la homoj kun buŝo kaj ventro sciiĝus pri decreguloj kaj justo? Kiel ili sciiĝus pri senegoisma intercedemo? Kiel ili sciiĝus pri konscio de pura honoro kaj honto kiel bazangulaj ŝtonoj?

亦啍啍而噍，乡乡而饱已矣。

Ili nur maĉadas manĝaĵon kaj satmanĝadas.

人无师无法，则其心正其口腹也。

Se ne estas instruistoj kaj leĝo-reguloj, ili zorgas en koro nur pri sia buŝo kaj ventro.

今使人生而未尝睹刍豢稻粱也，惟菽藿糟糠之为睹，则以至足为在此也。

Imagu, ke estu iu homo, kiu neniam probis viandojn, rizon kaj setarion, kiu nur manĝas legumenojn, legomojn, feĉojn, branojn. Li estas tute kontenta je ĉi tiu manĝaĵo.

俄而粲然有秉刍豢稻粱而至者，则矐然视之曰：“此何怪？”

Abrupte iam oni alportas al li viandojn, rizon kaj setarion. Tiam li surprizite ekrigardas ilin, dirante: “Kio estas tiu strangaĵo?”

彼臭之而无嫌于鼻，尝之而甘于口，食之而安于体，则莫不弃此而取彼矣。

Li, snufante, trovas ilin ne malagrablaj al sia nazo kaj provas ilin kaj sentas ilin dolĉaj al buŝo. Li manĝas kaj sentas ilin agrablaj al sia korpo. Tiel do li forĵetas la antaŭan kaj preferas la novan.

今以夫先王之道，仁义之统，以相群居，以相持养，以相藩饰，以相安固邪？

Se nun oni prenis la vojon de antaŭaj reĝoj kiel regadon per bonvolenco kaj justo, tiam oni povus amase loĝadi komune unu kun la alia, nutri sin reciproke, subtenante unu la alian, distinge beligi sin reciproke per decreguloj kaj teni sin reciproke trankvila kaj firma, ĉu ne?

以夫桀，跖之道，是其为相县也，几直夫刍豢稻粱之县糟糠尔哉！

Se la vojon de Jie kaj Zhi, oni pendigus sin reciproke sur danĝero, kaj tiel la diferenco estas inter manĝaĵoj el viandoj-cerealoj kaj feĉoj-branoj.

然而人力为此而寡为彼，何也？ 曰：陋也。

Magraŭ tio, homoj klopodas fari la lastan, kaj nur malmultaj faras la unuan. Kial? Ĉar ili estas etanime obstinaj.

陋也者，天下之公患也，人之大殃大害也。

La etanima obstineco estas ĝenerala malsano en la mondo, granda plago kaj granda lezo de homoj.

故曰：仁者好告示人。

Estas dirite: “Bonvoleculo deziras instrui kaj montri bonon al homoj.”

告之示之，靡之儆之，鈗之重之，则夫塞者俄且通也，陋者俄且侷也，愚者俄且知也。

Rilate homojn, oni devas instruadi kaj montradi, edifadi por al kutimigi kaj tuj praktigi,

observigi kaj ripetigi la instruatan – tiel eblas trabati la ŝtopiĝon, stimuli al etanimaj obstinuloj kaj klerigi stultulojn.

是若不行，则汤，武在上曷益？桀，纣在上曷损？

Sen fari tiel, ĉu saĝaj reĝoj kiel Tang kaj Wu povus atingi bonan rezulton. Tiranoj, kiel Jie kaj Zhou povis plie aldoni malbonon.

汤，武存则天下从而治，桀，纣存则天下从而乱。

Ĉe Tang kaj Wu la mondo obeis kaj estis bone regata, ĉe Jie kaj Zhou la mondo obeis kaj malordiĝis.

如是者，岂非人之情固可与如此，可与如彼也哉！

Tio montras, kia fariĝas la homa naturo depende de la supro, ĉu tia aŭ ĉi tia!

人之情，食欲有刍豢，衣欲有文绣，行欲有舆马，又欲夫馀财蓄积之富也，然而穷年累不知不足，是人之情也。

Se temas pri homa naturo, manĝi oni deziras viandojn, vestiĝi deziras broditaĵon, iradi deziras per ĉaro kaj ĉevalo, ankaŭ deziras rezervi trezoron kaj akumuli riĉaĵon. Sed jarojn post jaroj dum longe oni ne scias ĝissate kontentiĝi – tia estas la homa natura sento.

今人之生也，方知蓄鸡狗猪彘，又蓄牛羊，然而食不敢有酒肉；馀刀布，有困窳，然而衣不敢有丝帛；约者有筐篚之藏，然而行不敢有舆马。是何也？

Nun homoj vivas, sciante rezervi viandojn – kokojn, hundojn, aprojn kaj porkidojn – kaj rezervi bovojn kaj ŝafojn. Sed oni ne aŭdacas manĝi vinojn kaj viandojn. Havante superflue glav-monojn, posedante rezervejon kaj tenejon, oni tamen ne aŭdacas vesti sin per silkaĵoj. Posedante trezorojn en kestoj kaj ŝrankoj, oni tamen ne aŭdacas veturi per ĉaro kaj ĉevalo. Kial?

非不欲也，几不长虑顾后而恐无以继之故也。

Ne ĉar oni ne deziras tion. Sed ĉar, pripensante ne longe, oni timas kun atento, ke tio ne povus daŭri longe.

于是又节用御欲，收敛蓄藏以继之也，是于己长虑顾后，几不甚善矣哉！

Ĉar, estante ŝparema, oni detenas la deziron, rezervas kaj akumulas havaĵon, por ke ĝi longe daŭru. Ĉar oni faras tion post longa pripensado. Ĉu tio ne estas tre bona?

今夫偷生浅知之属，曾此而不知也，粮食大侈，不顾其后，俄则屈安穷矣，是其所以不免于冻饿，操瓢囊为沟壑中瘠者也。

Sed kiu ŝtelĝuas sian vivon sen profunda scio, tiu ne komprenas tion. Li nur voras multe da manĝaĵo, ne zorgante pri la postaj sinsekvaj, ke li subite sen sekureco falos en mizeron. Ne eviteblas al li frostiĝi kaj malsatiĝi, almozetadi kun trinkujo-manĝujo kaj finfine mortaĉos ie en foso aŭ valo.

况夫先王之道，仁义之统，“诗”，“书”，“礼”，“乐”之分乎？

Al li estas despli malproksime je la vojo de antaŭaj reĝoj, je principo de bonvoleco kaj justo, je ideo de laŭdeva distingo, esprimita en *Poezio, Libro, Decreguloj, Muziko*.

彼固天下之大虑也，将为天下生民之属长虑顾后保万世也，其[不]长矣，其温厚矣，其功盛姚远矣，非孰修为之君子莫之能知也。

La ideo estas granda konsidero pri la mondo, ke la popolanoj en la mondo zorgu longe por konservi dum dek miloj da generacioj. Do la fluo estas longa, la varmokoreco estas dika, la merito estas aktiva kaj longdaŭra, ke neniu krom la kulturita noblulo povas kompreni tion.

故曰：短绠不可以汲深井之泉，知不几者不可与及圣人之言。

Tial do estas dirite: “Per mallonga baskulsiteleto oni ne povas ĉerpi akvon el fonto de profunda puto, senintelektulo ne povas atingi la vorton de sanktuloj.”

夫“诗”，“书”，“礼”，“乐”之分，固非庸人之所知也。

La ideo de laŭdeva distingo, esprimita en *Poezio, Libro, Decreguloj, Muziko*, estas ja neatingebla al ordinaruloj.

故曰：一之而可再也，有之而可久也，广之而可通也，虑之而可安也，反躬察之而俞可好也。

Do estas dirite: “Se vi ekfaris ion unu fojon, tiam al vi eblas fari tion denove; kio unufoje ekzistas, tio povas ekzisti longe; kio estas vasta, tio povas sukcesi; kio estas elpensata bone, tio povas esti sekura; ju pli vi ripetas kaj esploras ion, des pli vi povas ŝati tion.”³¹

以治情则利，以为名则荣，以群则和，以独则足，乐意者其是邪？

Se tiamaniere regi naturan senton, vi akiros profiton; se tiamaniere vi faras vian nomon alta, vi prosperos; se tiamaniere vi kolektiĝas, vi harmoniiĝos; se tiamaniere vi restas en soleco, vi kontentiĝos. Jen kio faras vin ĝoja je volo.

夫贵为天子，富有天下，是人情之所同欲也。

Fariĝi tiel nobla, kiel Ĉiela Filo, kaj tiom riĉa kiom posedi la mondon – tio estas ja komuna deziro de la homa natura sento.

然则从人之欲则势不能容，物不能贍也。

Tamen, se sekvi la homan deziron, je la cirkonstancaro mankas kapacito, kaj je aĵoj ne eblas sufiĉi.

故先王案为之制礼义以分之，使用贵贱之等，长幼之差，知愚，能不能之分，皆使人载其事而各得其宜，然后使恣禄多少厚薄之称，是夫群居和一之道也。

Tial do antaŭaj reĝoj pripensis establi decregulojn kaj juston kaj distingis laŭdevan

³¹ Iuj esploristoj prenas la signifon alie: “Se vi ekfaris unu fojon, vi devas fari denove; se vi havigis al vi ion, vi devas fari tion eterna...”

dividon – t. e., klasdividon inter nobeloj kaj malnobeloj, diferencon laŭ aĝa privilegio inter la pliaĝaj kaj la malpliaĝaj, dividon inter la saĝaj kaj malsaĝaj, dividon inter kapabluloj kaj senkapabluloj, kaj al ĉiuj homoj atribuis laboron kaj ĉiu el ili ricevis taŭgan al si devon. Kaj poste estas pagata salajro-honorario pli aŭ malpli laŭ merito, tio estas la vojo, ke amaso da homoj kunloĝadu harmonie en unu.

故仁人在上，则农以力尽田，贾以察尽财，百工以巧尽械器，士大夫以上至于公侯，莫不以仁厚知能尽官职，夫是之谓至平。

Do bonvoleculoj estas supre, terkulturistoj penas plej diligente labori sur kampoj, komercistoj klopodas pleje akumuli riĉaĵon, diversaj metiistoj pleje lertas je manipulado de maŝinoj, oficistoj-ministroj kaj supre ĝis dukoj-markizoj ne devas ne okupi sin je ofic-aferoj laŭeble plej bonvolece kun sia scio kaj kapablo. Tia estas t. n. la pleja egaleco. 故或禄天下而不自以为多，或监门，御旅，抱关，击柝而不自以为寡。

Do kiu ricevas salajron por la monda afero, tiu mem ne faras ĝin multo; kiuj servas kiel pordgardisto, vojaĝkontrolisto, barieristo, taktilistoj, tiuj ne konsideras sian salajron malmulto.

故曰：“斩而齐，枉而顺，不同而一。”夫是之谓人伦。

Tiel do estas dirite: “Kvankam dispecigita, tamen tuteca; kvankam kurba, tamen rekta; kvankam malsama, tamen unu tuta.” Jen kia estas t. n. humaneco.

《诗》曰：“受小共大共，为下国骏蒙。”此之谓也。

En *Poezio* estas skribite: “Akceptante jadon malgrandan kaj grandan, reĝo povas submeti la landon kvazaŭ rajdi bonan ĉevalon.”³² Jen kio estas la supremenciita.

³² Citaĵo el 诗经·商颂·长发.

5 非相

KONTRAŬ FIZIOGNOMIKO

相人，古之人无有也，学者不道也。

Fizionomiodiveno ne ekzistis ĉe antikuloj, kaj scienculoj ne pritraktis ĝin.

古者有姑布子卿，今之世，梁有唐举，相人之形状颜色而知其吉凶妖祥，世俗称之。

Antikve estis Gubu Ziqing, nuntempe estas Tang Ju en Liang, kiuj, observante fizionomion kaj vizaĝon, sciis la sorton bonan aŭ malbonan, feliĉan aŭ malfeliĉan.³³

Oni en vulgara mondo laŭdis ilin.

古之人无有也，学者不道也。

Tia divenado ne estis ĉe antikvuloj, kaj scienculoj ne pritraktis ĝin.

故相形不如论心，论心不如择术。

Ĉar fizionomiodiveno estas malpli efekta ol teorio de koro, kaj la lasta malpli efekta ol faka scienco.

形不胜心，心不胜术。

Fizionomio ne superas koron, la koro ne superas sciencon.

术正而心顺之，则形相虽恶心术善，无害为君子也；形相虽善而心术恶，无害为小人也。

Kiam la scienco estas ĝusta, la koro sekvas ĝin. Do, spite ke la fizionomio estus malbona, se la scienco pri koro juĝas bona, al tiu homo ne malhelpas esti noblulo. Malgraŭ la bona fizionomio, se la scienco juĝas la koron malbona, tiu homo certe devas esti malgranda.

君子之谓吉，小人之谓凶。

Eblas diri, ke La fizionomio de nobluloj estas bonaŭgura kaj tiu de malgranduloj estas malbonaŭgura.

故长短，小大，善恶形相，非吉凶也。

Tial do esti malgranda aŭ granda, esti bona aŭ malbona je fizionomio – ne estas aŭguroj bona aŭ malbona.

古之人无有也，学者不道也。

Do ĉe antikvuloj ne estis tia divenado, kaj scienculoj ne pritraktis ĝin.

盖帝尧长，帝舜短，文王长，周公短，仲尼长，子弓短。

³³ Gubu Ziqing, Zheng-regnato, estis ministro ĉe Zhao Rangzi kaj divenis fizionomion de Konfuceo. Tang Ju, Wei-regnato, divenis fizionomion de ministroj, Li Duo 李兑 kaj Cai Ze 蔡泽.

Cetere, la imperiestro Yao estis alta je statur, sed la imperiestro Shun – malalta. La reĝo Wen estis alta, sed la duko Zhou estis malalta. Konfuceo estis alta, sed Zigong estis malalta.³⁴

昔者卫灵公有臣曰公孙吕，身长七尺，面长三尺，焉广三寸，鼻目耳具，而名动天下。

Antaŭe, ĉe la duko Ling de Wei-regno estis subulo, nomata Gongsun Lü, kiu estis altstatura je 7 *chi*, kies vizaĝo estis longa je 3 *chi*, vasta je 3 *cun*, kun nazo, okuloj kaj oreloj. Lia famo movis la mondon.³⁵

楚之孙叔敖，期思之鄙人也，突秃长左，軒較之下，而以楚霸。叶公子高，微小短瘠，行若将不胜其衣。

Sunshu Ao de Chu-regno devenis de iu vilaĝo, nomata Qisi, estis kalva je la verto kaj havis tro longan maldekstran gambon, kaj, starante sub apogstango de kaleŝo, liveris al la Chu-regno hegemonion. La duko She Zigao, tre malgranda kaj magra je fizika strukturo, piediras peza kvazaŭ premite per sia vestaĵo,

然白公之乱也，令尹子西，司马子期皆死焉；叶公子高入据楚，诛白公，定楚国，如反手尔，仁义功名善于后世。

Sed dum la ribelo de la duko Bo, kiam ĉefministro Zixi kaj generalo Ziqi mortis, la duko She Zigao ekregis Chu-regnon kaj batis la dukon Bo, kvietigis la Chu-regnon subite, kvazaŭ turni manon renverse. Do lia fameco je bonvolemo, justo, merito kaj bonago estas transdonita al postaj generacioj.

故事不揣长，不揆大，不权轻重，亦将志乎尔。

Tiel do la aferoj ne postulas longecon, nek kalkulas grandon, nek pesas malpezon aŭ pezon, sed nur rigardas la strebon grava.

长短，小大，美恶形相，岂论也哉！

En la argumentado jam ne temas pri fizionomio, ĉu longa aŭ mallonga, malgranda aŭ granda, bela aŭ hida!

且徐偃王之状，目可瞻马；仲尼之状，面如蒙俱；周公之状，身如断菑。

Cetere Yan, la reĝo de Xu, havis ĉevalsimilajn okulojn; Zhong Ni (Konfuceo) havis aspekton kvazaŭ ogran maskon; Zhou Gong havis figuron kvazaŭ velkintan trunkon.

皋陶之状，色如削瓜；閔天之状，面无见肤；傅说之状，身如植鳍；伊尹之状，面无须麋；禹跳，汤扁，尧，舜参牟子。

Gao Yao ŝajnis senŝeligita kukumo je koloro; haŭto de vizaĝo ĉe Hong Yao ne videblas; korpo de Fu Yue ŝajnis kovrita per naĝiloj; vizaĝo de Yi Yin estis sen brovoj; Yu lamis,

³⁴ La reĝo Wen estis la patro de la reĝo Wu, fondinto de Zhou dinastio. La duko Zhou, nomata Dan, estis pli juna frato de la reĝo Wu kaj fariĝis regento por la filo de Wu. Zigong estis unu el disĉiploj de Konfuceo, lia formala nomo Ran Yong 冉雍.

³⁵ Ne estas sciate pri Gongsun Lü.

Tang havis hemiplecion, Yao kaj Shun estis strabuloj.³⁶

从者将论志意，比类文学邪？

Karaj, vi argumentas pri la strebo kaj volo, komparas literaturon, ĉu ne?

直将差长短，辨美恶，而相欺傲邪？

Ĉu vi atentigas fizionomian diferencon je longeco-mallongeco, distingas belon-malbelon, kaj malrespektas unu la alian?

古者桀，纣长巨姣美，天下之杰也；筋力越劲，百人之敌也。

Antikvaj Jie kaj Zhou estis altstatura, tre belaj kaj elstaraj en la mondo; ilia muskoloj estas tiom fortaj kaj streĉitaj, kiom la unuopoj povis kontraŭstari al cent malamikoj.

然而身死国亡，为天下大谬，后世言恶则必稽焉。

Sed tamen ili mem mortis kaj la regnoj pereis, do ili fariĝis por la mondo nomoj hontindaj, kaj, se temas pri malbonuloj, la postaj generacioj nepre citadis ilin.

是非容貌之患也，闻见之众，论议之卑尔。

Tio ne estas pro malbona vizaĝo, sed pro tio, ke ili, aŭdate kaj vidate, estis onidire malpopularaj kaj malestimindaj en diskutado de publika opinio.

今世俗之乱君，乡曲之儇子，莫不美丽姚冶，奇衣妇饰，血气态度拟于女子；妇人莫不愿得以为夫，处女莫不愿得以为士，弃其亲家而欲奔之者，比肩并起。

Nun diboĉaj nobeloj en la vulgara mondo kaj facilanimuloj en la provincoj ege klopodas esti belaspektaj, zorgas vesti sin strange kun inecaj ornamoj, kaj laŭ temperamento kaj sinteno similas al virinoj; kaj virinoj ege dezirus fari ilin edzoj, fraŭlinoj ege dezirus fari ilin siaj kavalerioj, kaj unuj post la aliaj sekvas tiaj inoj, kiuj dezirus amfuĝi kun ili, forlasante siajn hejmojn.

然而中君羞以为臣，中父羞以为子，中兄羞以为弟，中人羞以为友，俄则束乎有司而戮乎大市，莫不呼天啼哭，苦伤其今而后悔其始。

Sed meza nobelo hontas fari ilin subuloj, meza patro hontas fari ilin filoj, meza frato hontas fari ilin siaj plijunaj fratoj, meza homo hontas fari ilin siaj amikoj. Kiam ili, abrupte arestite de oficistoj kaj elpelite por ekzekuto sur la grandan merkaton, ege alvokas kaj plorkrias al la Ĉielo, nur tiam ili ekpentas finfine je siaj amaraj kulpoj.

是非容貌之患也，闻见之众，论议之卑尔。

Tio ne estas pro malbona vizaĝo, sed pro tio, ke ili, aŭdate kaj vidate, estis onidire

³⁶徐偃王 Yan, la reĝo de Xu, ribelis ĉe la reĝo Mu 穆 de Zhou-dinastio kaj estis batita de Wen, la reĝo de Chu-regno. 皋陶 Gao Yao estis vasalo ĉe Yao kaj Shun. 阎夭 Hong Yao servis al reĝoj Wen kaj Wu de Zhou. 傅说 Fu Yue servis al Gao Zong 高宗 de Yin-dinastio. 伊尹 Yi Yin servis al la reĝo Tang, fondinto de Yin.

malpopularaj kaj malestimindaj en diskutado de publika opinio.

然则从者将孰可也？

Se tiel, kion vi, karaj, opinias akceptebla?

人有三不祥：幼而 不肯事长，贱而不肯事贵，不肖而不肯事贤，是人之三不祥也。

Ĉe homoj estas tri malbonaŭguraj trajtoj: Estante infaneca, ne volas sekvi al estroj; estante malnobela, ne volas sekvi al nobeloj; estante malgranda, ne volas sekvi al saĝuloj – jen tio al homoj estas tri malbonaŭguraj trajtoj.

人有三必穷：为上则不能爱下，为下则好非其上，是人之一必穷也。

Ĉe homoj estas tri nepraj krizoj: Estante supra, ne povas ami la subajn; estante suba, ŝatas kalumni la suprajn – jen tio estas al homa estulo la unua nepra krizo.

乡则不若，僭则谩之，是人之二必穷也。

Vidalvide kun iu estante ne tia, tamen dorse insultas lin – tio estas al homa estulo la dua nepra krizo.

知行浅薄，曲直有以相县矣，然而仁人不能推，知士不能明，是人之三必穷也。

Je la intelekto kaj konduto estas malprofunde, je la vido al rekteco-malrekteco estas diste, tamen ne eblas sekvi al bonvolemuloj, nek eblas lerni ĉe intelektuloj – jen tio estas al homa estulo la tria nepra krizo.

人有此三数行者，以为上则必危，为下则必灭。

Kiam homa estulo kondutas, havante tiujn tri, se por suprujoj estas nepra danĝero, se por subuloj estas nepra perejo.

“诗”曰：“雨雪濛濛，宴然聿消。莫肯下隧，式居屡骄。”此之谓也。

En *Poezio* estas skribite: “Pluvo kaj neĝo, eĉ se falas multe, sub la suno en la alia tago tuj malaperas; sed homa estulo ne volus humiliĝi, tiel do daŭre restas aroganta.” Jen kio estas supremenciita de mi.

人之所以为人者，何已也？曰：以其有辨也。

Kial homo estas homa estulo? Oni diras: “Ĉar li havas distingemon.”

饥而欲食，寒而欲暖，劳而欲息，好利而恶害，是人之所生而有也，是无待而然者也，是禹，桀之所同也。

Estante malsata, deziras manĝi; estante malvarme, deziras varmon; estante laca, deziras ripozi; ŝatante utilon, malŝatas malutilon – estas tio, kion homo, vivanto, havas. Ne atendente, oni nature havas tion same, kiel Yu aŭ Jie.

然则人之所以为人者，非特以二足而无毛也，以其有辨也。

Tiel do homo estas homa estulo ne pro tio, ke li aparte havas du piedojn sen haroj, sed pro tio, ke li havas distingemon.

今夫狴狴形笑，亦二足而毛也，然而君子啜其羹，食其馘。

Nun gorilo havas ridindan fizionomion, havante du piedojn sen haroj, sed monduma homo suĉas la supon el ĝi kaj manĝas la viandon.

故人之所以为人者，非特以其二足而无毛也，以其有辨也。

Do homo estas homa estulo ne pro tio, ke li havas du piedojn sen haroj, sed pro tio, ke li havas distingemon.

夫禽兽有父子而无父子之亲，有牝牡而无男女之别，故人道莫不有辨。

Ĉe birdoj kaj bestoj estas patroj kaj filoj, sed ne estas la intima rilato inter patroj kaj filoj. Ĉe ili estas masklo kaj femalo, sed ne estas distingo inter viro kaj virino. Do homa vojo ne estiĝas sen ia distingo.

辨莫大于分，分莫大于礼，礼莫大于圣王。

Se temas pri distingo, nenio estas pli granda ol la divido en socio; rialte al la socia divido, nenio estas pli granda ol decreguloj; se temas pri la decreguloj, nenio estas pli granda ol starigitaj de sanktaj reĝoj.

圣王有百，吾孰法焉？故曰：文久而息，节族久而绝，守法数之有司极礼而褫。

Estis cento da sanktaj reĝoj, kaj kiun do ni devas preni kiel modelon? Oni diras: Kulturo daŭras longe kaj mortas, muziko daŭras longe kaj malaperas, estis multe da leĝo-reguloj, obeataj de oficistoj, sed ankaŭ ili ĉesiĝis.

故曰：欲观圣王之迹，则于其粲然者矣，后王是也。

Do estas dirite: Se vi dezirus sekvi la piedsignon de sanktaj reĝoj, tiam sekvu la plej brilantan, t. e. la lastan reĝon.

彼后王者，天下之君也。

La lasta reĝo estas la reĝo de la nuna mondo.

舍后王而道上古，譬之是犹舍己之君而事人之君也。

Forlasi la lastan reĝon kaj sekvi vojon de la antikvaj estus same, kiel, forlasante la sian reĝon, servi al alies reĝo.

故曰：欲观千岁则数今日，欲知亿万则审一二，欲知上世则审周道，欲知周道则审其所贵君子。

Do estas dirite: Se vi volus observi mil jarojn, tiam kalkulu la nunan tagon; se volus scii pri miliardo da aĵoj, tiam esploru pri unu kaj du; se volus scii pri antikva mondo, esploru la vojon de Zhou dinastio; se volus scii pri la vojo de Zhou, tiam esploru la noblulojn, estimataj de homoj.

故曰：以近知远，以一知万，以微知明。此之谓也。

Do estas firite: Sciu pri malproksimo surbaze de nuno, sciu pri dek miloj pere de unu, sciu pri klara fakto pere de subtilo. Tio signifas la supre menciitan de mi.

夫妄人曰：“古今异情，其以治乱者异道。”

Jen malklerulo diras: “Inter antikve kaj nun diferencas cirkonstancoj, do la ordigo de malordo ankaŭ malsamas je la vojo.”

而众人惑焉。彼众人者，愚而无说，陋而无度者也。

Kaj homoamaso ŝanceliĝas. La homoamaso estas stulta kaj ne havas opinion, obskura kaj ne havas sian norman mezurilon.

其所见焉，犹可欺也，而况于千世之传也！

Per tio, kion estas vidata, ili povas esti trompitaj. Do des pli per transdonitaĵo de mil generacioj!

妄人者，门庭之间，犹可诬欺也，而况千世之上乎！

Malkleruloj, vivante inter pordo kaj ĝardeno, povas trompi je nuno, des pli je antikvo de mil generacioj!

圣人何以不欺？曰：圣人者，以己度者也。

Kial sanktuloj ne trompiĝas, ne trompas? Estas dirite, ke la sanktuloj havas sian mezurilon.

故以人度人，以情度情，以类度类，以说度功，以道观尽，古今一度也。

Tial do ili mezuras homojn laŭ homeco, mezuras sentojn laŭ natursento, mezuras klasifikon laŭ klasoj, mezuras meriton laŭ eldiroj, observas plenumon laŭ vojo – ili havas unu mezurilon tra antikvo kaj nuno.

类不悖，虽久同理，故乡乎邪曲而不迷，观乎杂物而不惑，以此度之。

Se la klasifiko ne eraras, kvankam malnova, tamen restas sama je principo. Do, alfrontante ajnan malpravecon, oni ne devojiĝas, kaj, vidante fimiksaĵon, ne ŝanceliĝas. 五帝之外无传人，非无贤人也，久故也。

Escepte de kvin imperiestroj, ne estas transdonite pri taŭguloj. Tio ne signifas, ke ne ekzistis saĝuloj, sed nur ke la temo estis malnova.

五帝之中无传政，非无善政也，久故也。

Sub kvin imperiestroj ne troviĝas pri la politiko, tio ne signidas, ke ne ekzistis bona politiko, sed, ke la temo estis malnova.

禹，汤有传政而不若周之察也，非无善政也，久故也。

Pri la politiko de la reĝoj Yu kaj Tang estas kvankam transdonite, tamen ne tiel plenesplore, kiel pri la Zhou-dinastio. Tio ne signifas, ke ne ekzistis bona politiko, sed, ke la temo estis malnova.

传者久则论略，近则论详，略则举大，详则举小。

Estas malprecize pri tio, kio estas transdonita antaŭ delonge. Estas detale pri tio, kio okazis proksime. Grandiĝas tio, kio estas malpreciza. Prezentiĝas skrupule tio, kio estas detale skribita.

愚者闻其略而不知其详，闻其详而不知其大也，是以文久而灭，节族久而绝。

Stultuloj, aŭdante nur la malprecizan, ne scias la detalon; aŭdante la detalon, ili ne scias la grandan. Tiel do kulturo pereas dumlonge, muziko ĉesas dumlonge.

凡言不合先王，不顺礼义，谓之奸言，虽辩，君子不听。

Ĝenerale, ajna parolado, malakorda al antaŭaj reĝoj aŭ ne konforma al decreguloj kaj justo, estas t. n. aĉa parolado, do eĉ se tie estus io analizi-argumenti, nobluloj ne aŭskultas tion.

法先王，顺礼义，党学者，然而不好言，不乐言，则必非诚士也。

Kaj nepre ne estas serioza klerulo ankaŭ tiu, kiu ne ŝatas paroladon nek ĝuas argumenton, eĉ se li estus scienculo, sekvanta antaŭajn reĝojn kaj obeanta al decreguloj kaj justo.

故君子之言也，志好之，行安之，乐言之。

Do, koncerne la paroladon de noblulo, la strebo estas bona, la konduto estas stabila kaj li ĝuas la argumenton.

故君子必辩。

Tial do nobluloj nepre analizas-argumentas.

凡人莫不好言其所善，而君子为甚。

Ĉiuj homoj ne povas ne ŝati la paroladon, konsideratan kiel bona, des pli forte la nobluloj.

故赠人以言，重于金石珠玉；观人以言，美于黼黻，文章；听人以言，乐于钟鼓琴瑟。

Do la parolado, donacita al aliulo, estas pli peza, ol oro, gemo, perlo kaj jado; la parolado, prezentata de homoj, estas pli bela ol desegnoj de antikva rit-vestaĵo kaj emblemo; la parolado, aŭdata de homoj, estas pli belsona ol sonorilo, tamburo, liuto kaj citaro.

故君子之于言无厌。

Do noblulo paroladas sen abomensento.

鄙夫反是，好其实，不恤其文，是以终身不免埤污佣俗。

Vulgaruloj, kontraŭe al tio, ŝatas la profitdonan realon kaj ne zorgas pri la desegnoj, do al ili dum la tuta vivo ne eviteblas malpuro kaj trivialeco.

故《易》曰：“括囊，无咎无誉。” 腐儒之谓也。

Tial do estas dirite en *Libro de Ŝanĝiĝo*: “Fermite en sako, li havigas al si nek kulpon nek honoron.”³⁷ Tiu eldiro koncernas putriĝintajn konfuceanojn.

凡说之难，以至高遇至卑，以至治接至乱。

Ĝenerale diri, estas malfacile akcepti la plejan malnoblan per la pleja alteco, trakti la

³⁷ Citaĵo el 周易，坤卦.

plejan malordon per la pleja bonordo.

未可直至也，远举则病繆，今世则病佣。

Netransdoneblas io ajn rekte unu al la alia. Sed, se kun malproksima ekzemplo oni riskas fali en absurdon, se kun proksima nuntempa ekzemplo oni riskas banaliĝi.

善者于是间也，亦必远举而不繆，今世而不佣，与时迁徙，与世偃仰，缓急羸绌，府然若渠，屢隳括之于己也，曲得所谓焉，然而不折伤。

Bonulo ekzistas meze: eĉ se temas pri io malproksima, li ne falas en absurdon, kaj temante pri io nuntempa, li ne falas en banalon. Kun tempo li ŝanĝiĝas, kaj kun mondo li adaptiĝas. Li estas libera kaj elasta je rapideco kaj malrapideco, kvazaŭ reguligate de kanalo kaj digo aŭ de rektigilo, kurbiĝas laŭ konvene, sed ne vundiĝas.

故君子之度己则以绳，接人则用拙。

Noblulo mezuras sin mem per tuĉsnulo-lineo, akceptas aliulojn kiel gastojn de ŝipo.³⁸
度己以绳，故足以为天下法则矣。

Mezuri sin mem per tuĉsnulo-lineo – per tio eblas fariĝi leĝ-obeo modelo en la mondo.
接人用拙，故能宽容，因求以成天下之大事矣。

Akcepti aliulojn kvazaŭ ŝip-gastojn – per tio eblas fariĝi tolerema kaj alvoki homojn plenumi la grandan aferon de la mondo.

故君子贤而能容罢，知而能容愚，博而能容浅，粹而能容杂，夫是之谓兼术。

Tiel do noblulo, estante mem saĝa, povas indulgi laciĝintojn; estante intelekta, povas indulgi stultulojn; estante erudicia, povas indulgi facilanimulojn; estante pura, povas indulgi iujn malpurajn. Tio estas nomata ‘persono kun grandampleksa arto’.

《诗》曰：“徐方既同，天子之功。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: “Eĉ provinca lando Xu jam akordiĝis – tio estas merito de la Ĉiela Filo.” Tio signifas la supremenciitan de mi.³⁹

谈说之术：矜庄以莅之，端诚以处之，坚强以持之，分别以喻之，譬称以明之，欣驩芬芻以送之，宝之珍之，贵之神之，如是则说常无不受。

Arto de persvado estas jena: paroli al la aliaj sian konvinkon kun respekto kaj digno, trakti ĝin kun serioza honesteco, subteni ĝin firme kaj forte, komprenigi ĝin klare kun distingo, klarigi ĝin kun analogio kaj metaforo, transdoni ĝin kun ĝojo kaj aromo, estimi ĝin kiel karan trezoron, respekti ĝin kaj sanktigi ĝin – se tiel fari, la parolado estos nepre ĉiam akceptita.

虽不说人，人莫不贵，夫是之谓为能贵其所贵。

Eĉ se troviĝus iu homo, al kiu ĝi ne plaĉus, tamen neniu rigardos ĝin malkara. Tio estas

³⁸ 拙 Iu prenas la ideogramon kiel rektigilo de pafarko, la alia – kiel remilo de ŝipo.

³⁹ Citaĵo el 诗经，大雅，常武

nomata – “Fari la karan, kio estas rigardata kara.”

传曰：“唯君子为能贵其所贵。” 此之谓也。

Estas dirite: “Nur noblulo povas fari la karan, kio estas rigardata kara”. Tio signifas la supremenciitan.

君子必辩。凡人莫不好言其所善，而君子为甚焉。

Nobluloj nepre argumentas. Ĝenerale homoj ne malŝatas diradi ion bonan, des pli nobluloj.

是以小人辩险而君子辩言仁也。

Okazas, ke malgranduloj argumentas pri danĝera temo, sed nobluloj parolas pri ‘bonvoleco’.

言而非仁之中也，则其言不若其默也，其辩不若其呐也；言而仁之中也，则好言者上矣，不好言者下也。故仁言大也。

Se la parolado ne enhavas bonvolecon en si, tiam estas pli bone silenti ol paroli aŭ pli bone balbuti ol argumenti; se la parolado enhavas en si bonvolecon, tiam bona parolanto estas supra kaj malbona parolanto estas suba. Tial do bonvolema parolado estas grava. 起于上所以道于下，正令是也；起于下所以忠于上，谋求是也。

Kio estas donata el supro al subo, tio estas ordono kaj dekreto; kio estas lojale donata el subo al supro, tio estas konsilo kaj admono.

故君子之行仁也无厌。

Do konduto de nobluloj estas bonvolema kaj senabomena.

志好之，行安之，乐言之，故言君子必辩。

La strebo estas bona, la konduto estas stabila, io plezuriga estas parolata – do estas dirite, ke nobluloj nepre argumentas.

小辩不如见端，见端不如见本分。

Skrupula argumentado ne superas pli ol montri ekstremon, kaj la montrado de ekstremo ne superas pli ol montri principon kaj distingon.

小辩而察，见端而明，本分而理，圣人士君子之分具矣。

Oni esploras per skrupula argumentado, klarigas per montrado de ekstremo, kaj komprenas racion per principo kaj distingo – sanktuloj kaj kleruloj-nobluloj posedas ĉion laŭ distingo, dividante unu kun la alia.

有小人之辩者，有士君子之辩者，有圣人之辩者：不先虑，不早谋，发之而当，成文而类，居错迁徙，应变不穷，是圣人之辩者也。

Estas elokventulo inter malgranduloj, estas elokventulo inter kleruloj-nobluloj, estas elokventulo inter sanktuloj. Kiu ne antaŭzorgaĉas, nek hastaĉe cerbumas, ekfaras

konvene, verkas laŭ klasifiko, translokiĝas bonorde, senlime transformiĝas kaj ŝanĝiĝas, tiu estas ja elokventulo inter sanktuloj.

先慮之，早謀之，斯須之言而足听，文而致实，博而党正，是士君子之辯者也。

Kiu antaŭzorgas, rapide cerbumas, parolas ion aŭskultindan per kelke da frazoj, verkas plej fruktodone, estas erudicia kaj senpartia, tiu estas elokventulo inter kleruloj kaj nobluloj.

听其言则辞辯而无统，用其身则多诈而无功，上不足以顺明王，下不足以和齐百姓，然而口舌之均，瞻唯则节，足以为奇伟偃却之属，夫是之谓奸人之雄。

Kaj estas tiu, en kies eldiro, se aŭskultate, mankas koherenco, kaj se dungi lin, li multe trompas kaj nenion meritas, kaj supre li ne povas sufiĉe sekvi la kleran reĝon, kaj sube li ne povas akordigi popolanojn. Sed li diradas tiom glate per buŝo kaj lango, facilparolante tiom multe laŭorde, ke oni rigardas lin eksterordinarulo, apartenanta al temera fierulo. Li estas ja, t. n. kanajlo el kanajloj.

圣王起，所以先诛也，然后盜賊次之。盜賊得变，此不得变也。

Lin antaŭ ĉio akuzos la sankta reĝo, tuj kiam surtroniĝos, kaj poste ŝtelistojn-rabistojn.

La ŝtelistoj-rabistoj estas ŝanĝeblaj, tamen li ne ŝanĝeblas.

6 非十二子

KONTRAŬ DEK DU IDEOLOGOJ

假今之世，饰邪说，文奸言，以梟乱天下，僞宇嵬琐，使天下混然不知是非治乱之所存者有人矣。

En efemera nuntempo plenas de tiuj, kiuj, ornamante sian fiideojn kaj beligante perversan paroladon, aŭdacas malordigi la mondon. Ili, kun absurdaĵo kaj ruza argumentado, faligas la mondon tute en kaoson tiom, ke oni ne scias, kio estas prava aŭ malprava, orda aŭ malorda.

纵情性，安恣睢，禽兽行，不足以合文通治；然而其持之有故，其言之成理，足以欺惑愚众，是它器，魏牟也。

Malbridi denaskan inklinon, lasi arbitran arogantecon, konduti simile al birdoj-bestoj, kaj ne povi konformigi sin al kultura regado. Spite tion ili posedas ĉe si rezonon kaj ilia parolado havas certan logikon, sufiĉan por trompi stultan homoamason. Tiaj estas Tuo Xiao kaj Wei Mu.⁴⁰

忍情性，褻谿利跂，苟以分异人为高，不足以合大众，明大分；然而其持之有故，其言之成理，足以欺惑愚众，是陈仲，史鱣也。

Deteni la denaskan inklinon, eskapi foren kaj izoliĝi, diferencigi sin altaj de aliaj homoj, sed ne povi akordigi la homoamason nek distingi klare por socia klasifiko. Malgraŭ tio ili posedas ĉe si rezonon kaj ilia parolado havas certan logikon, sufiĉan por trompi stultan homoamason. Tiaj estas Chen Zhong kaj Shi Qiu.⁴¹

不知壹天下，建国家之权称，上功用，大俭约而慢差等，曾不足以容辨异，县君臣；然而其持之有故，其言之成理，足以欺惑愚众，是墨翟，宋钐也。

Ne sciante pri unueco de la mondo, nek pri konstruado de ŝtataj leĝo-reguloj, prelegi utilismon kaj estimi ŝparadon, kaj malestimante diskriminacion, ne povi diferencigi nek distingi inter estroj kaj subuloj. Malgraŭ tio ili posedas ĉe si rezonon kaj ilia parolado havas certan logikon, sufiĉan por trompi stultan homoamason. Tiaj estas Mo Di kaj Song Jian.⁴²

尚法而无法，下修而好作，上则取听于上，下则取从于俗，终日言成文典，反紃察之，则

⁴⁰ Wei Mu estis princido en Wei-regno kaj feŭdita al Zhongshan-lando en Milita-Tempo. Nenio estas sciata pri Tuo Xiao. Sed laŭ mi la pensmanisero similas al Yang Zhu 杨朱.

⁴¹ Chen Zhong estas 田仲子, Qi-regnanto. Shi Qiu estas 子鱼, grandoficisto de Wei-regno 卫 en la epoko de Milit-regnoj.

⁴² Mo Di estas Mozi 墨子, Song Jian estis pensulo, alte taksata en Zhuangzi.

偶然无所归宿，不可以经国定分；然而其持之有故，其言之成理，足以欺惑愚众，是慎到，田骈也。

Estimante leĝojn, ignoras la leĝojn; pledante por sinkulturadon, ŝatas kreadi⁴³; turnante sin al supro, aŭdas la supron; turnante sin al subo, obeas vulgarulojn. Kvankam ili tutan tagon diskutadas pri klaŭzoj de leĝaro kaj ripete esploradas, tamen ili, deŝirite de realo, ne havas fundamentan hejmon por reveni, nek povas regi ŝtaton kun certa distingado. Malgraŭ tio ili posedas ĉe si rezonon kaj ilia parolado havas certan logikon, sufiĉan por trompi stultan homoamason. Tiaj estas Shen Dao kaj Tain Pian.⁴⁴

不法先王，不是礼义，而好治怪说，玩琦辞，甚察而不惠，辩用无用，多事而寡功，不可以为治纲纪；然而其持之有故，其言之成理，足以欺惑愚众，是惠施，邓析也。

Estas tiuj, kiuj ne sekvas antaŭajn reĝojn, nek decregulojn kaj juston, sed ŝatas mastri strangan logikon kaj ludaĉas kuriozajn frazojn. Ili multe esploradas detalaĵojn senfruktodone. Argumentadas sen ajna utilo, faras multe kun malmulte da merito, ne kapablas ordigi leĝojn-regulojn por la regado. Malgraŭ tio ili posedas ĉe si rezonon kaj ilia parolado havas certan logikon, sufiĉan por trompi stultan homoamason. Tiaj estas Hui Shi kaj Deng Xi.

略法先王，而不知其统，犹然而材剧志大，闻见杂博。

Estas tiuj, kiuj preteratentas antaŭajn reĝojn, ne komprenante la tradician unuecon. Spite tion ili kun arda karaktero aplombe tenas la strebon granda kaj ilia scio per aŭdado kaj vidado estas senorde vasta.

案往旧造说，谓之五行，甚僻违而无类，幽隐而无说，闭约而无解，案饰其辞而祇敬之曰：此真先君子之言也。

Laŭ antikve ili kreis doktorinon, kiun ili nomas Kvin konduktreguloj, ege deviantaj sen certa klasifiko, mistifikitaj sen klarigo, esoteraj nekompreneble. Ili paradis per belaj vortoj, respektplene dirante: “Tio estas vere la vortoj de antaŭaj nobluloj.”

子思唱之，孟轲和之，世俗之沟犹瞽儒，嚙嚙然不知其所非也，遂受而传之，以为仲尼，子游为兹厚于后世，是则子思，孟轲之罪也。

Zi Si ekpredikis tion kaj Meng Ke aprobis. Ekscitite sekvis vulgaraj obskuraj konfuceanoj, ne sciante kritiki ilin, konsideris ilin fidelaj posteuloj de Konfuceo kaj Zi You. En tio kulpas Zi Si kaj Meng Ke.

若夫总方略，齐言行，壹统类，而群天下之英杰而告之以大古，教之以至顺；奥窔之间，

⁴³下修而好作 Mi komprenas la ideogramon 下 kiel fari ion, kaj 作 kiel uzatan en Mozi: 君子不作(耕柱).

⁴⁴ Shen Dao, Tian Pian estis legalismaj pensuloj, kolektiĝintaj en Qi-regno, 稷下.

簟席之上，斂然圣王之文章具焉，佛然平世之俗起焉；六说者不能入也，十二子者不能亲也；无置锥之地，而王公不能与之争名，在一大夫之位，则一君不能独畜，一国不能独容；成名况乎诸侯，莫不愿以为臣。

Se estas iu, kiu sintezas principon kaj strategion, koincidigas vortojn kaj agon, unuigas klasojn, prelegas al amaso da bravuloj de la mondo pri antikvaj instruoj kaj mem ĝisfunde sekvas la instruojn, tiu persono, sidante eĉ en profunda halo sur bambua mato, kolektas kaj kompilas la tekstojn de sanktaj reĝoj, eklevas impete la mondon de ordinaruloj. Tiam ne povus interveni tiuj ses skoloj, nek povus proksime penetri tiuj dek du ideologoj, nek havus lokon tiuj pikiloj.⁴⁵ Kun tiu persono ne povus konkurenci je fameco eĉ reĝoj kaj dukoj. Se li estus granda oficisto, unu sola reĝo ne kapablus teni lin kiel subulon, nek unu sola regno ne kapablus monopoligi lin. Lia fameco superas ajnajn landestrojn, dezirantajn dungi lin sia subulo.

是圣人之不得势者也，仲尼，子弓是也。

Tiu estas iu specca sanktulo, ankoraŭ ne havanta potencon. Al tiu speco apartenas Konfuceo kaj Zigong.⁴⁶

一天下，财万物，长养人民，兼利天下，通达之属，莫不从服，六说者立息，十二子者迁化，则圣人之得势者，舜，禹是也。

Estas iu, kiu unuigas ĉiujn sub la ĉielo, utiligas ĉiujn aĵojn, nutras longe la popolon, universale profitigas la mondon. Lin ne devas ne obei ĉiea loĝantaro, kaj ses skoloj tuj ĉesas ekzisti, eĉ dek du ideologoj ŝanĝiĝas. Li estas sankta potenculo, kiel Shun kaj Yu. 今夫仁人也，将何务哉？上则法舜，禹之制，下则法仲尼，子弓之义，以务息十二子之说。 Kion devas fari nunaj bonvolemuloj? Supre ili devas sekvi reĝimon de Shun kaj Yu, sube ili devas sekvi reĝimon de Konfuceo kaj juston de Zigong. Per tio ili devas ĉesigi la pensmanieron de dek du ideologoj.

如是则天下之害除，仁人之事毕，圣王之迹著矣。

Tiel forigeblas la subĉiela malutilo, kaj plenumebblas la afero de bonvolemuloj, manifestiĝas la signo de sanktaj reĝoj.⁴⁷

⁴⁵无置锥之地 Multaj esploristoj prenas tiun frazon alie: “Spite ke tiu persono ne posedas teritorion tiom, kiom eblus piki per pikilo.”

⁴⁶ Ne klaras, kiu estas Zigong, laŭdata de Xunzi. Iuj prenas lin por Zi You 子游, aliaj por Zhong Gong 仲弓 en Analektoj.

⁴⁷ Kritiko al du dek ideologoj montras nur la pozicion de Xunzi el lia propra vidpunkto. Ideoj de antikvaj ĉinaj pensuloj estas pli ampleksaj kaj originalaj. Notinde, ke Xunzi severe kritikis alian faman heredanton de konfuceanismo, Mengzi, rigardanta homan denaskan naturon bona. Mengzi konsideras grava subjektan sincerecon 诚, sed Xunzi – eksteran decregulojn 礼.

信信，信也；疑疑，亦信也。贵贤，仁也；贱不肖，亦仁也。

Kredi la kredindan estas kredi; dubi la dubindan estas ankaŭ kredi. Estimi la saĝan estas bonvoleco; malestimi la malsaĝan estas ankaŭ bonvoleco.

言而当，知也；默而当，亦知也。故知默犹知言也。

Ke eldiro trafas ĝuste estas intelekto; ke silento trafas ĝuste ankaŭ estas intelekto. Do scii kiam silenti kaj scii kiam diri estas same grave.

故多言而类，圣人也；少言而法，君子也；多少无法而流湎然，虽辩，小人也。

Do kies multaj eldiroj konformas al klasifiko, tiu estas sanktulo; kies malmultaj eldiroj konformas al reguloj, tiu estas noblulo. Kiu, kvankam argumentas, tamen eldiroj, egale ĉu multaj aŭ malmultaj, ne konformas al reguloj kaj nur glitadas flue, tiu estas malgrandulo.

故劳力而不当民务谓之奸事，劳知而不律先王谓之奸心，辩说譬喻，齐给便利而不顺礼义谓之奸说。

Do se iu, kiom ajn penus kun forto, tamen ne kontribuas al popola afero, tio estas nomata fuŝentrepreno. Se la alia, kiom ajn penus kun sagaco, tamen ne respondas al reguloj de antaŭaj reĝoj, tio estas nomata fuŝfidelo. Se la tria, kiom ajn argumentas spritplene kun parabolo kaj metaforo, tamen ne konformas al decreguloj, tio estas nomata fuŝdiskurso.

此三奸者，圣王之所禁也。

Ĉi tiujn tri fuŝaĵoj estis malpermesitaj de la sanktaj reĝoj.

知而险，贼而神，为诈而巧，言无用而辩，辩不惠而察，治之大殃也。

Iu, estante intelekta sed danĝera, kanajla sed spiriteca, faras trompon tre lerte, parolas ion senutilan tre elokvente, argumentas nenion bonfaran sed skrupule, – administrado far de tiu specia persono estas ege riskplena.

行辟而坚，饰非而好，玩奸而泽，言辩而逆，古之大禁也。

Li agas devie kaj obstine, ŝajnigas malpravon bona, ludas fuŝaĵon sinsekve, argumentas elokvente sed inverse, – tio estas severe malpermesita de antikve.

知而无法，勇而无惮，察辩而操僻，淫大而用之，好奸而与众，利足而迷，负石而坠，是天下之所弃也。

Troviĝas iu, kiu ŝajnas saĝa sed senjusta, temera sed senprudenta, argumentas skrupule sed manipulas devie, uzas tiun diboĉon ekscese, ŝatas fuŝadi kune kun homamaso, serĉas profiton ĝissate kaj devojiĝas. Eĉ se okazus, ke li mem falas kun ŝtono suben por sinmortigi, la mondo devas forlasi lin.⁴⁸

⁴⁸ 申徒狄 Shen Dudi por montri sian moralan purecon sinmortigis, falinte kun ŝtonego en akvon.

兼服天下之心；高上尊贵不以骄人，聪明圣知不以穷人，齐给速通不争先人，刚毅勇敢不以伤人；不知则问，不能则学，虽能必让，然后为德。

Rimedo por submetigi universale la mondan koron estas jena. Estante mem supre alta je rango kaj alte respektate, oni ne arogantas antaŭ la aliaj. Estante mem klera kaj sankta je scio, oni ne suferigi la aliajn. Estante mem lerta kaj rapidmova, oni ne konkurencas kun la aliaj por antaŭeco. Estante mem brava kaj kuraĝa, oni ne damaĝas la aliajn. Se ne scias, oni demandas. Se ne kapablas, oni lernas. Eĉ se kapablas, oni nepre cedas. Post tio oni akiras la virton.

遇君则修臣下之义，遇乡则修长幼之义，遇长则修子弟之义，遇友则修礼节辞让之义，遇贱而少者则修告导宽容之义。

Turniĝante al reĝo, oni kondutas laŭ justo de ministroj-subuloj; al samvilaĝano oni kondutas laŭ justo de jaraĝa distingo inter la plijuna kaj la maljuna; al estro oni kondutas laŭ justo de fila pietato kaj frateca distingo; al amiko oni kondutas laŭ justo de decreguloj kaj cedemo; al mizerulo kaj minoritato oni kondutas oni kondutas laŭ justo de instruo, gvido kaj toleremo.

无不爱也，无不敬也，无与人争也，恢然如天地之苞万物，如是则贤者贵之，不肖者亲之。

Oni ne amas neniun, ne respektas neniun, ne luktas kontraŭ neniun, sed vaste ĉion ampleksas kvazaŭ la Ĉielo kaj tero: se saĝan, estimante lin, se malkleran, favorante lin. 如是而不服者，则可谓詖怪狡猾之人矣，虽则子弟之中，刑及之而宜。

Estante tia, severe oni turnas sin al la neobeemuloj, t. n. ruzuloj, kanajloj kaj friponoj, eĉ se ili apartenas al parencaro, t. e. rigore punas ilin laŭ bontrovo.

《诗》云：“匪上帝不时，殷不用旧。虽无老成人，尚有典刑。曾是莫听，大命以倾。”此之谓也。

En *Poezio* estas skribite: “Neniam la supra Dio ne eraras je tempo. Kvankam iam Yin-dinastio ne sekvis la antikvecon, aŭ iam mankas aĝaj veteranoj, tamen ekzistas kodo de punleĝaro. Kiu ne aŭskultas tion, tiun la granda ordono pereigas.” Jen pri tio estas supremenciite.⁴⁹

古之所谓士仕者，厚敦者也，合群者也，乐富贵者也，乐分施者也，远罪过者也，务事理者也，羞独富者也。

Antikve t. n. kleruloj-oficistoj tenis sin majeste trankvilaj, harmonie akordigis homamason, ĝojis, ke la aliaj iĝas riĉaj kaj noblaj, ĝojis dividi bonkoran donon kun aliaj, distancigis sin for de krimo kaj peko, administris en ordo la ofic-aferojn, kaj hontis mem sole riĉiĝi.

⁴⁹ Citaĵo estas el “诗，大雅，荡”

今之所谓士仕者，污漫者也，贼乱者也，恣睢者也，贫利者也，触抵者也，无礼义而唯权势之嗜者也。

Nunaj t. n. kleruloj-oficistoj estas koruptemaj, rabemaj kaj ribelemaj, kapricaj kaj orgojlaj, avaraj je serĉado de profito, leĝrompantoj, fremdaj al deereguloj kaj justo, kaj nur regamaj, avidaj al potenco.

古之所谓处士者，德盛者也，能静者也，修正者也，知命者也，箸是者也。

Antikve aktualaj oficistoj estis plenaj je virto, kapablaj je kvieteco, korektis sin ĝustaj, sciis la destinon kaj manifestis pravecon.

今之所谓处士者，无能而云能者也，无知而云知者也，利心无足而佯无欲者也，行伪险秽而强高言谨恇者也，以不俗为俗，离纵而跂訾者也。

Nuntempe t. n. aktualaj oficistoj estas nekapablaj aŭ fi-kompetentaj, malintelektaj aŭ fi-intelektaj, nesatigeble profitamaj, kvankam ŝajnigante sin malavaraj. Ili kondukas intrigeme kaj malpure, forte kaĵolante sin kvazaŭ sinceraj kaj honestaj. Prenante la neordinaran por la ordinara, ili estas senbridaj, disiĝinte de ordinareco, arogantas, rigardante sin altaj.

士君子之所能不能为：君子能为可贵，不能使人必贵己；能为可信，不能使人必信己；能为可用，不能使人必用己。

Kion al noblulo eblas kaj ne eblas fari – noblulo povas fari la noblan, sed ne povas igi aliulojn nepre estimi lin kiel la noblan. Li povas fari la fidindan, sed ne povas igi aliulojn nepre fidi lin. Li povas fari ion utilan, sed ne povas utiligi al aliuloj lin mem.

故君子耻不修，不耻见污；耻不信，不耻不见信；耻不能，不耻不见用。

Do noblulo hontas je sia nekulturado, sed ne hontas, ke oni rigardas lin malpura; li hontas, ke li estu malfidinda, sed ne hontas, ke oni ne vidas lin fidinda; li hontas je sia nekapableco, sed ne hontas, ke oni ne vidas lin utila.

是以不诱于誉，不恐于诽，率道而行，端然正己，不为物倾侧，夫是之谓诚君子。

Tiel do li ne estas tentata per honoro, nek timas kalumnion. Li kondukas ĝuste laŭ la vojo, rektigante sin, kaj ne faras sin devia pro aĵoj. Tial li estas nomata sincera noblulo.

《诗》云：“温温恭人，维德之基。”此之谓也。

En Poezio estas dirite: “Al aliuloj oni devas teni sin varma kaj humila – tio estas la bazo de virto.”⁵⁰ La signifo estas sama, kiel la supremenciita.

士君子之容：其冠进，其衣逢，其容良，俨然，壮然，祺然，蕤然，恢恢然，广广然，昭昭然，荡荡然，是父兄之容也。

⁵⁰ Citata el 《诗经，大雅，抑》

Aspekto de klerulo·noblulo estas jena: la ĉapo estas alta, la vesto estas gemuta, la mieno estas bona, strikta kaj impona, kvieta kaj relasa, grandanima kaj energie ampleksa – tia estas la aspekto de patro kaj pliaĝa frato.

其冠进，其衣逢，其容恣，俭然，惨然，辅然，端然，訾然，洞然，缀缀然，瞿瞿然，是子弟之容也。

Kies ĉapo estas alta, vesto estas gemuta, mieno ŝajnas honesta, diskreta, deteniĝema, helpema, digna, diligenta, pensema, kompleza, modesta, ties aspekto estas de filo kaj plijuna frato.

吾语汝学者之鬼容：其冠统，其纓禁缓，其容简连；填填然，狄狄然，莫莫然，睥睨然，瞿瞿然，尽尽然，盱盱然。

Mi rakontas al vi, kiel hida estas la aspekto de scienculoj: ilia ĉapo estas klinita, iliaj mentona rimeno kaj zono estas lozaj, iliaj mienoj estas arogantaj. Ili estas memkontentaĉaj, flirtemaj, silentemaj, tro detalemaj, malaplombaj, enfermiĝemaj, globokulaj.

酒食声色之中则瞞瞞然，瞑瞑然；礼节之中则疾疾然，訾訾然；劳苦事业之中则億億然，离离然，偷儒而罔，无廉耻而忍谗诟。见学者之鬼也。

Ili ŝajnigas teni sin fermantaj okulojn kaj nenionvidantaj dum bankedo kun vino, manĝado kaj kantado; kritikemaj dum ritoj kun decreguloj kaj festo; pigraj kaj kaŝiĝemaj dum laboro kaj farado de penigaj aferoj. Pretendante konfuceanojn, ili ne timas, nek hontas, sed eltenas ajnan riproĉon. Jen tia estas hideco de scienculoj.

弟陀其冠，神禪其辞，禹行而舜趋，是子张氏之贱儒也。

Iuj kun la ĉapo klinigita, kun la sekaj vortoj, imitas iradon de Yu kaj hastan paŝadon de Shun. Tiaj estas fuŝkonfuceanoj laŭ skolo de Zi Zhang.

正其衣冠，齐其颜色，讷然而终日不言，是子夏氏之贱儒也。

Aliaj kun vesto kaj ĉapo formalaj, kun la mienoj ordigitaj, silentas grimace tutan tagon sen parolo. Tiaj estas fuŝkonfuceanoj laŭ skolo de Zi Xia.

偷儒惮事，无廉耻而奢饮食，必曰君子固不用力，是子游氏之贱儒也。

La triaj, kvankam pretendante konfuceanojn skrupulajn je aferoj, tamen sen honto ŝatas trinki kaj manĝi, dirante nepre: “Nobluloj principe ne uzas forton.” Tiaj estas fuŝkonfuceanoj laŭ skolo de Zi You.⁵¹

⁵¹ Xunzi severe kritikis diversajn skolojn de konfuceanismo: de Zi Zhang, de Zi Xia, de Zi You, kaj de Mengzi. Lia kritiko similas al la kritiko far de Mozi. Xunzi, kritikante ankaŭ mohismon, memfidis sin ‘ortodoksa’ konfuceanisto. Specifiko de lia vidpunkto kuŝas en tio, ke li konsideras la denaskan homan naturon malbona. Do por lia filozofio gravas edukado kaj eksteraj leĝ-reguloj. Estas memkompreneble, ke disĉiploj de Xunzi fariĝis ideologoj de legalisma skolo.

彼君子则不然，佚而不惰，劳而不慢，宗原应变，曲得其宜，如是，然后圣人也。

Nobluloj ne estas tiaj. Ili relasiĝas, sed ne maldiligentas. Ili laboras, sed ne transpaŝas. Sekvante fonton, ili ŝanĝiĝas laŭokaze, povas kurbiĝi konvene. Jen fariĝinte tiaj, ili estas sanktuloj.

7 仲尼

KONFUCEO

仲尼之门人，五尺之竖子言羞称于五伯，是何也？曰：然。彼诚可羞称也。

Inter lernantoj de Zhong Ni eĉ knabo hontis eldiri nomojn de kvin hegemoniuloj. Kial? Mi diras: “Jes. Ĉar estas ja hontinde diri pri ili.”

齐桓，五伯之盛者也，前事则杀兄而争国；内行则姑姊妹之不嫁者七人，闺门之内，般乐奢汰，以齐之分奉之而不足；外事则诈邾，袭莒，并国三十五。

Huan de Qi-regno estis la plej potenca el kvin hegemoniuloj. Li antaŭe mortigis sian pliaĝan fraton kaj luktis por akiri la regnon. Interne li ne lasis al siaj sep parencoj, t. e. onklino kaj fratinoj, edziniĝi kaj en la buduaro adis orgion tiom diboĉe, ke mankas al Qi-regno la fisko. Ekstere li insidis kontraŭ Zhu-lando, atakis Ju-landon, kaj tiel aneksis 35 landojn.

其事行也若是其险污淫汰也，彼固曷足称乎大君子之门哉？

Lia afero kaj konduto estis plenaj de danĝero, malpuro kaj volupto. Kial oni povus nomi lin unu el la Grandaj Reĝoj?

若是而不亡，乃霸，何也？

Se tia estus li, kial li ne pereis, sed fariĝis hegemonia?

曰：於乎！夫齐桓公有天下之大节焉，夫孰能亡之？倏然见管仲之能足以托国也，是天下之大知也。

Mi diras: “Ho! Ĉar la duko Huan adoptis grandan demarŝon por la mondo, kiel do li povus pereji? Certe, tuj li trovis Guan Zhong kapabla por konfidi al li la ŝtatregadon – tio estas ja grandega saĝeco de la mondo.

安忘其怒，出忘其讎，遂立以为仲父，是天下之大决也。

Interne forgesante la koleron, ekstere forgesante la venĝemon, la duko finfine starigis lin kiel “Onklon” – tio estis ja la granda decido por la mondo.

立以为仲父，而贵戚莫之敢妒也；与之高，国之位，而本朝之臣莫之敢恶也；与之书社三百，而富人莫之敢距也。

Al la starigo kiel «Onklon», neniu el nobelaj parencoj havis envion; al promocio de lia rango same alta, kiel klano Gao kaj klano Guo, neniu el aŭtentikaj ministroj ne aŭdacis havi antipation; kontraŭ la donaco al li je tricent distriktoj, neniu el riĉuloj ne aŭdacis protesti.

贵贱长少，秩秩焉莫不从桓公而贵敬之，是天下之大节也。

Ĉiuj ajn, ĉu nobelaj aŭ malnobelaj, ĉu aĝuloj aŭ malpliaĝuloj, en orde obeis la dukon Huan kaj respektis lin – tio estas ja la granda administrado.

诸侯有一节如是，则莫之能亡也；桓公兼此数节者而尽有之，夫又何可亡也？

Landestroj, estante kun unu el tiaj regadrimedoj, neniam povas pereji. Ĉe la duko Huan universale estis ĉiom da tiuj regadrimedoj, kial do li povus pereji?

其霸也宜哉！非幸也，数也。

Estas nature, ke li fariĝis hegemonia! Tio estiĝis ne laŭ bonsorto, sed laŭ nepreco.

然而仲尼之门人，五尺之竖子言羞称乎五伯，是何也？

Sed lernantoj de Zhong Ni, eĉ knabo alta je 5 *chǐ*oj hontas diri la nomojn de kvin hegemoniuloj – kial?

曰：然。彼非本政教也，非致隆高也，非綦文理也，非服人之心也。

Mi diras: “Estas prave. La duko Huan ne estas persono kun justa politika ideo, nek disvolvis la subliman, nek atingis altecon literaturan kaj racian, nek povis lasi popolon elkore obei.

乡方略，审劳佚，畜积修斗而能颠倒其敌者也。诈心以胜矣。

Li, okupite per strategioj, vanta laboro kaj amuzo, akumulado kaj luktado, povis nur renversi malamikojn. T. e. trompante koron, li venkis.

彼以让饰争，依乎仁而蹈利者也，小人之杰也，彼固曷足称乎大君子之门哉！

Li tiel beligis konfliktojn, uzante la nomon de *Ren*=bonvoleco, gajnis profiton. Tio estas heroeco de malgranduloj. Kial li povus esti nomata unu el ‘Grandaj Regnestroj’!

彼王者则不然。致贤而能以救不肖，致强而能以宽弱，战必能殆之而羞与之斗，委然成文以示之天下，而暴国安自化矣，有灾繆者然后诛之。故圣王之诛也，綦省矣。

La vera reĝo ne estas tia. Li, atinginte saĝecon, povas savi malsaĝulojn; li, estante forta, povas indulgi malfortulojn; se militas, li nepre konkeras malamikojn, sed li hontas ekbatali. Li, aplombe montrante kulturon al la mondo, transformas violentan landon en la pacan. Se foje troviĝas la perversa, li poste disbatas ĝin por puni. Tio estas puno far de la sankta reĝo., kiel la plej rara.

文王诛四，武王诛二，周公卒业，至于成王则安以无诛矣。

La reĝo Wen punadis kvar fojojn, la reĝo Wu – du fojojn, la duko de Zhou finplenumis la aferon. Ĉe la reĝo Cheng regas la paco kaj jam neniam puno bezonas.

故道岂不行矣哉！文王载百里地而天下一，桀，纣舍之，厚于有天下之势而不得以匹夫老。

Kial ne eblus efektiviĝi la Taŭon! La reĝo Wen, havante teritorion nur cent *lǐ*ojn kvadrate, fariĝis la plej unua estro en la mondo. La reĝoj, kiel Jie kaj Zhou, forlasinte

ĝin, malgraŭ ke ili sufiĉe havis la potencon sur la mondo, tamen ne atingis grandaĝigon tiom altan, kiom ordinaraj popolanoj.

故善用之，则百里之国足以独立矣；不善用之，则楚六千里而为讎人役。

Tiel do, se eblas utiligi ĝin, tiam eblas stari sendependa eĉ al la lando malgranda je cent *li*oj kvadrate. Se ne povas utiligi ĝin, tiam eĉ Chu-regno, granda je sesmil *li*oj kvadrate, fariĝas servuto al la malamiko.

故人主不务得道而广有其势，是其所以危也。

Tial, se la ĉefo ne penas havigi al si la Taŭon, zorgante nur pligrandigi la potencon, tiam la regno estas endanĝerigata.

持宠处位终身不厌之术：主尊贵之，则恭敬而傳；主信爱之，则谨慎而嘽；主专任之，则拘守而详；主安近之，则慎比而不邪；主疏远之，则全一而不倍；主损絀之，则恐惧而不怨。

Jen la arto por havigi al si favoron kaj por ne esti malamata de supro. Se la estro alte estimas vin, vi devas humile respekti lin kaj submetiĝi; se la estro kredas kaj amas vin, vi devas teni vin prudenta kaj modesta; se la estro aparte konfidas vin, vi devas esti singardema kaj skrupula; se la estro senzorge lasas vin proksima al si, vi devas esti atentema, ke vi ne faru klikon kontraŭ li nek malbonon; se la estro malintime forlasas vin, en tiu okazo vi devas dediĉi vin tute al li kaj ne kontraŭi al li; se la estro malestimas kaj degradas vin, vi devas esti timeme humila kaj havi nenian rankoron al li.

贵而不为夸，信而不处谦，任重而不敢专，财利至则善而不及也，必将尽辞让之义然后受，福事至则和而理，祸事至则静而理，富则施广，贫则用节，可贵可贱也，可富可贫也，可杀而不可使为奸也，是持宠处位终身不厌之术也。

Estante nobela, ne fieru. Konfidate, tenu vin nedubinde. Okupante gravan postenon, ne aŭdacu despotumi. Riĉiĝinte je akumulado, faru bonon kaj kondutu humile. Nepre plenumante juston sindediĉe kun laŭeble plej humila sinteno, nur poste ricevu rekompenccon. Se vi estas rekompencata per feliĉo, vi estu pace milda kaj racia, se – per malfeliĉo, estu kvietaj kaj racia. Se riĉa, oferu vaste, se malriĉa, ŝparu ekonomie. Tio estas tute egale, ĉu nobela aŭ malnobela, ĉu riĉa aŭ malriĉa. Tian mortemulon oni ne povas rigardi kanajlo. Jen la arto por havigi al si favoron kaj por ne esti malamata de supro.

虽在贫穷徒处之势，亦取象于是矣，夫是之谓吉人。

Eĉ se tia persono estus en malriĉo kaj mizero sen ajna rango, oni povas lin preni kiel modelon. Jen t. n. la feliĉulo.

《诗》云：“媚兹一人，应侯顺德。永言孝思，昭哉嗣服。”此之谓也。

En Poezio estas dirite: “Jes troviĝas unu amata, ĝuste konforma al virto. Havante por ĉiam la senton de fila pietato, li heredas la aferon de antaŭuloj.” La supre menciita

signifas tion. ⁵²

求善处大重，理任大事，擅宠于万乘之国，必无后患之术：莫若好同之，援贤博施，除怨而无妨害人。

Jen esta la arto por bone plenumi grandan taskon, racie okupiĝi pri granda afero, esti favorata en la granda regno kun dek mil batalĉaroj kaj nepre eviti postsekvantajn zorgojn. Nenio estas pli bona ol akordiĝi-adaptiĝi, subteni saĝulojn kaj vaste oferadi, elimini rankoron kaj ne malhelpi al homoj.

能耐任之，则慎行此道也。能而不耐任，且恐失宠，则莫若早同之，推贤让能而安随其后。

Kiu estas sufiĉe kompetenta por la tasko, tiu povas iri modeste laŭ la vojo. Kiu ne estas sufiĉe kompetenta al la tasko kaj timas perdi favoron, tiu devas akordiĝi-adaptiĝi laŭeble plej frue kaj promocii saĝulojn por ke ili povu plenumi la taskon, kaj poste devas sekvi ilin trankvile.

如是，有宠则必乐，失宠则必无罪，是事君者之宝而必无后患之术也。

Tiele, kiu estas favorate, tiu nepre povas ĝui, kaj eĉ kiu perdis la favoron, tiu povas eviti la punon. Jen en kio kuŝas la trezoro por servantoj de estro kaj la arto por eviti postajn zorgojn.

故知者之举事也，满则虑谦，平则虑险，安则虑危，曲重其豫，犹恐及其祸，是以百举而不陷也。

Do la pensmaniero de intelektulo, kiu faras aferojn, estas jena: Estante plena je sukceso, atentu humiliĝi; estante en ordinareco, kalkulu krizon; estante en paco, konsideru danĝeron; ĉe ĉiuspeca kurbiĝo antaŭpreparu al estonto, timante la katastrofon. Tiel estas eble eviti la disfalon eĉ en cent aferoj.

孔子曰：“巧而好度必节，勇而好同必胜，知而好谦必贤。”此之谓也。

Konfuceo diris: “Kiu, estante lerta, ŝatas mezuron, tiu nepre ne transpasas; kiu, estante kuraĝa, ŝatas akordiĝon-adaptiĝon, tiu nepre venkas; kiu, estante intelekta, ŝatas esti prudenta, tiu nepre atingas la saĝon.” La supre menciita de mi signifas tion.

愚者反是。外重擅权，则好专事而妒贤能，抑有功而挤有罪，之骄盈而轻旧怨，以鄙啬而不行施道乎上，为重招权于下以妨害人，虽欲无危，得乎哉！

Al stultuloj estas male. Ili majeste montras sian potencon eksteren, ŝatas monopoli la aferon kaj envias la pli saĝan kaj kapablan. Ili depremas meritulojn kaj imputas al la aliaj kulpon. Ili tro arogantas kaj malestimas la malnovan, estante vengemaj. Estante avaraj, ili de supre ne donas aferojn laŭ la vojo. Ili deprenas de sube la potencon kaj malhelpas homojn. Se nur ne ekestu io danĝera, sed ĉu eblus esperi tion?

⁵² Citata el “诗经·大雅·下武”

是以位尊则必危，任重则必废，擅宠则必辱，可立而待也，可炊而儻也。

Se ilia rango estas alte respektenda, estas nepre danĝere. Se ilia tasko estas grava, nepre fiaskas. Kvankam lertaj esti favorata, tamen ili nepre estos hontigitaj. Tia rezultoj tuj estiĝos dum momenta atendo kaj ilia kariero finiĝos dum unu kuirado.

是何也？则墮之者众而持之者寡矣。

Kial estas tio? Ĉar tiujn tirfaligas multaj homamasoj, sed subtenas malmultaj.

天下之行术：以事君则必通，以为仁则必圣，立隆而勿贰也。

Por konduti en la mondo estas la arto, kiu nepre ebligas servi al estroj kaj nepre sankte praktiki la bonvolecon, starigante rekte kaj ne perfidante.

然后恭敬以先之，忠信以统之，慎谨以行之，端慝以守之，顿穷从之疾力以申重之。

Poste por pelnumi tion, antaŭ ĉio oni havigas al si humilecon kaj respektemon, firmigas tion per lojaleco kaj fideleco, praktikas tion per diskreto kaj prudento, konservas tion per ekstrema honesteco, kaj eĉ en la malfacila tempo sekvas tion, por tutforte etendi kaj estimi tion.

君虽不知，无怨疾之心；功虽甚大，无伐德之色；省求，多功，爱敬不倦：如是，则常无不顺矣。

Eĉ se estro ne sciuz vin, ne havu veĝeman koron; eĉ se via merito estus grandega, ne faru mienon por fieri vian virton. Ne estante tro postulema, vi multigu vian meriton kaj ne laciĝu ami kaj respekti. Tiel farante, vi ĉiam ne devas esti neobeema.

以事君则必通，以为仁则必圣，夫是之谓天下之行术。

Jen tia estas la arto, kiu nepre ebligas servi al estroj kaj nepre sankte praktiki la bonvolecon, t. n. por konduti en la mondo.

少事长，贱事贵，不肖事贤，是天下之通义也。

Ke la malpliaga servas al la pliaga, la malnobela servas al la nobela, la malsaga servas al la saĝa, estas la normala justo en la mondo.

有人也，势不在人上而羞为人下，是奸人之心也。

Sed troviĝas iu, kiu hontas submetiĝi, ne havante kapablon kiel supro. Tiu estas ja koro de kanajlo.

志不免乎奸心，行不免乎奸道，而求有君子圣人之名，辟之是犹伏而啞天，求经而引是足也。说必不行矣，俞务而俞远。

Kies strebo ne evitas la kanajlan koron, ties konduto ne evitas la kanajlan vojon. Li, serĉante al si la famon de noblulo kaj sanktulo, se diri parable, kraĉas al la Ĉielo la salivon, aŭ por savi sinpendiganton subentiras la kruron. La tiaĵo ne estas bona, ĉar ju pli da penado, des pli foriras la celo.

故君子时讫则讫，时伸则伸也。

Tial do la noblulo submetas sin dum la tempo submetiĝenda, etendas sin dum la tempo favora.

8 儒效

EFIKO DE KONFUCEANISMO

大儒之效：武王崩，成王幼，周公屏成王而及武王以属天下，恶天下之倍周也。

La efiko de granda konfuceanismo⁵³ videblas jen en tio. Kiam la reĝo Wu mortis, la sekva reĝo Cheng estis ankoraŭ infano, do dume la duko Zhou patronis la reĝidon Cheng kaj heredis la reĝon Wu, tiel la subĉiela mondo submetiĝis, ĉar oni malŝatis, ke la subĉiela mondo malobeu al Zhou-regno.

履天子之籍，听天下之断，偃然如固有之，而天下不称贫焉；杀管叔，虚殷国，而天下不称戾焉；兼制天下，立七十一国，姬姓独居五十三人，而天下不称偏焉。

La duko fariĝis regento por la Ĉiela filo kaj administris la mondon, kvazaŭ tia devas esti origine. Kaj la mondo ne nomis lin potencavida. Li mortigis sian fraton Guan Shu kaj ruinigis la landon Yin, sed la mondo ne nomis lin brutala. Li, unuiginte la mondon, starigis sepdek unu landojn kaj feŭdis tie kvindek tri Ji-klananojn favore al sia parencaro, sed tamen la mondo ne nomis lin partia.⁵⁴

教诲开导成王，使谕于道，而能揜迹于文，武。

Li instruis kaj gvidis la reĝon Cheng kaj igis lin kompreni la Taŭon, por ke la lasta povu sekvi la reĝojn Wen kaj Wu.

周公归周，反籍于成王，而天下不辍事周，然而周公北面而朝之。

La duko Zhou, restariginte la Zhou-regnon, redonis ĝin al la reĝo Cheng, kaj la mondo ne ĉesis servi al la Zhou-regno, do la duko Zhou, turnante sin je vizaĝo al la nordo kiel subulo, frekventis la matenan konsilion en kortego.

天子也者，不可以少当也，不可以假摄为也。

La Ĉiela filo ne povas plenumi sian taskon en sia infaneco, nek povas mastrumadi sen la helpo de regento.

能则天下归之，不能则天下去之，是以周公屏成王而及武王以属天下，恶天下之离周也。

Ke la mondo obeis lin kaj ne povis forlasi lin, tio estis dank' al la duko Zhou, protektanta

⁵³ Konfuceanismo ĉi tie estas konsiderata kiel ideologio, historie estinta jam delonge antaŭ Konfuceo mem. La agmaniero de Zhou Gong Dan 周公旦 estas la modelo de la justeco por konfuceanoj.

⁵⁴ Guan Shu estis pliĝa frato de la duko Zhou. Post kiam la reĝo Wu venkobatis Yin-dinastion, Wu feŭdis Wu Geng 武庚, postlasitan filon de la tirano Zhou 纣 kiel unu el landestrojn 诸侯, kaj faris Guan Shu kaj Cai Shu 蔡叔 ties prizorgantoj. Sed kiam la duko Zhou ekposedis regnopotencon, ambaŭ prizorgantoj ekribelis. Tial la duko batis ilin.

la reĝidon Cheng, tiel do estis heredata la afero de la reĝo Wu kaj la mondo submetiĝis, ĉar oni en la mondo malŝatis foriri de la Zhou-regno.

成王冠，成人，周公归周反籍焉，明不灭主之义也。

Kiam la reĝo Cheng, plenkreskinte, estis kronita, tiam la duko Zhou redonis la regadon al la reĝo de Zhou, klare konfirmante, ke ne perdiĝas la reĝa justo.

周公无天下矣，乡有天下，今无天下非擅也；成王乡无天下，今有天下，非夺也，变势次序节然也。

La duko Zhou nun ne posedas la mondon, sed antaŭe li posedis la mondon. Ke li ne posedas la mondon, tio ne signifas, ke li koncedis ĝin. Ke la reĝo Cheng, antaŭe ne havante la mondon, nun posedas la mondon, tio ne signifas, ke li rabis ĝin. Laŭ ŝanĝiĝo de situacio kohere viciĝas en ordo al ordo.

故以枝代主而非越也，以弟诛兄而非暴也，君臣易位而非不顺也。

Tial do ne estas malhumile, se branĉo anstataŭus ĉefan trunkon; ne estas brutale, eĉ se plijuna frato akuzus la pliaĝan; ne estas malobeeme, eĉ se estro kaj subulo ŝanĝus la postenon.

因天下之和，遂文，武之业，明枝主之义，抑亦变化矣，天下厌然犹一也。

Ĉar por la paco en la mondo estis perfektigata la afero de Wen kaj Wu, kaj estis klarigita la justo inter la branĉo kaj la ĉefo. Kvankam estis ŝanĝo, tamen la mondo unuiĝis pace. Ne ŝajnas ke oni povas fari tiu, kio estas la afero de Wen kaj Wu, kaj estis klarigita la justo inter la branĉo kaj la ĉefo. Kvankam estis ŝanĝo, tamen la mondo unuiĝis pace. Ne ŝajnas ke oni povas fari tiu, kio estas la afero de Wen kaj Wu, kaj estis klarigita la justo inter la branĉo kaj la ĉefo.

Se ne sanktulo, tiam ne fareblas la afero. Tio estas nomata la efiko de granda konfuceanismo.

秦昭王问孙卿子曰：“儒无益于人之国？”

Zhao, la reĝo de Qin-regno, demandis Xunzi, dirante: “Ĉu ne utilas konfuceanoj por la ŝtato de homoj?”⁵⁵

孙卿子曰：“儒者法先王，隆礼义，谨乎臣子而致贵其上者也。人主用之，则势在本朝而宜；不用，则退编百姓而恚，必为顺下矣。

Xunzi respondis: “Konfuceanoj kondukas konforme al antaŭaj reĝoj por fortigi decregulojn kaj juston, estante humilaj kiel subuloj kaj filoj, alte estimante la supron. Se iu estro uzas ilin, tiam ili bone taŭgas por servado en kortego; se oni ne uzas ilin, eĉ tiuokaze ili retiriĝas kiel popolanoj, restante honestaj kaj nepre lojalaj de sube.

虽穷困冻餒，必不以邪道为贫；无置锥之地，而明于持社稷之大义；呜呼而莫之能应，然而通乎财万物，养百姓之经纪。

Eĉ se ili en mizera malfacilo estu frostiĝantaj kaj malsataj, en tiu povreco ili nepre ne falas en malbonan vojon. Eĉ se ne havante peceton da tereno, ili klare portas grandan

⁵⁵ Zhao Xiang 昭襄王(324-251 a. K.) Sun Qing zi 孙卿子 estas Xunzi.

juston de la sankta altaro je grenoj kaj tero. Kvankam nenia respondo, ho ve, troveblas al ili, tamen ili utiligas la trezoron kaj aĵojn por nutri popolanojn laŭ leĝe.

势在人上则王公之材也，在人下则社稷之臣，国君之宝也。

Estante supre sur homoj, ili estas taŭgaj personoj kiel reĝoj kaj dukoj. Estante sube, ili estas vasaloj de la sankta altaro por grenoj kaj tero, estas la ŝtataj trezoroj por regnestro. .

虽隐于穷阎漏屋，人莫不贵之，道诚存也。

Malgraŭ tio, ke ili loĝas en mizera domaĉo kun pluvo tralikanta, homoj ne povas ne estimi ilin pro ilia honesta vojo.

仲尼将为司寇，沈犹氏不敢朝饮其羊，公慎氏出其妻，慎溃氏踰境而徙，鲁之粥牛马者不豫贾，必蚤正以待之也。

Dum Konfuceo estis ministro de justico, iu Shen You ne aŭdacis trinkigi siajn ŝafojn ĉiumatene, iu Gon Shen forpelis sian edzinon, iu Shen Gui trans landlimon transloĝiĝis, vendistoj de ĉevaloj kaj bovoj en Lu-regno ne trompatis je komerco, ĉar Konfuceo antaŭ ĉio administris ĝuste kaj traktadis ĉiujn.⁵⁶

居于阙党，阙党之子弟罔不分，有亲者取多，孝弟以化之也。

Kiam li loĝis en Quedang, tieaj uloj je dividado de predoj disdonis pli multe al la filoj, havantaj gepatrojn. Tio estas rezulto de konfuceanisma instruado pri fila pietato.

儒者在本朝则美政，在下位则美俗，儒之为人下如是矣。”

Konfuceanoj, estante en kortego, faras bonan administradon, kaj sube tenis bonan moron. Tia estas la konduto de konfuceanoj por homoj.

王曰：“然则其为人上何如？”

La reĝo diris: “Se tiel, kia estas ili rilate al suprujoj?”

孙卿曰：“其为人上也广大矣：志意定乎内，礼节修乎朝，法则度量正乎官，忠信爱利形乎下，行一不义，杀一无罪而得天下，不为也。

Xunzi diris: “Rilate al supraj homoj ili estas vastaj kaj grandaj – ilia strebo kaj volo ĝuste estas stabilaj interne, decreguloj estas kulturitaj laŭ kortego, leĝoj kaj mezuroj estas konformaj al oficistoj, lojaleco, fideleco, amo kaj profito ĉe ili manifestiĝas kiel modelo al subo. Eĉ se kun celo profitigi la mondon, ili neniam faras maljusteton aŭ mortigas unu senkulpulon.

此君义信乎人矣，通于四海，则天下应之如讜，是何也？则贵名自而天下治也。

Tial do la justo de regnestro, fideleco de la homoj, disvastiĝas tra la kvar maroj, kaj la

⁵⁶ Konfuceo, pli ol 50 jaraĝa, fariĝis ministro de justico ĉe la duko Ding 定公. Shen You trinkigis al ŝafoj akvon por multigi pezon. Gong Shen forpelis sian edzinon pro malĉasteco. Shen Gui tro disipis.

mondo respondas tuj al la alvoko. Kial? Ĉar pere de la alta nomo estas regata la mondo. 故近者歌讴而乐之，远者赜蹶而趋之，四海之内若一家，通达之属莫不从服，夫是之谓人师。 Tiel do proksimuloj kantas kaj ĝojas, malproksimuloj hastas alveni spite ĉion malfacilan, kaj faras unu grandan familion en la tuta mondo. Ĉiuj apartenantaj al ĝi estas neniam malobeemaj. Tiu estas nomata la majstro de homoj.

《诗》曰：‘自西自东，自南自北，无思不服。’此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: ‘Alvenante de okcidento, de oriento, de sudo, de nordo, neniu volas malobei.’⁵⁷ Tio signifas la supre menciitan.

夫其为人下也如彼，其为人上也如此，何谓其无益于人之国也？”

Tiel do, tia estas, se la konfuceanoj estas sube, kaj ĉi tia estas, se ili estas supre. Kial eblus diri, ke ili neniom profitigas la landon de homoj?

昭王曰：“善。”

La reĝo Zhao diris: “Estas bone dirite.”

先王之道，仁之隆也，比中而行之。

La vojo de antaŭaj reĝoj estas laŭdegi bonvolecon kaj fari tion laŭ oramezo.

曷谓中？曰：礼义是也。

Kio estas la oramezo? Mi diras, ke tio estas ja decreguloj kaj justo.

道者，非天之道，非地之道，人之所以道也，君子之所道也。

La vojo ne estas Ĉiela vojo, nek estas Tera vojo, sed la vojo de homoj kaj la vojo de nobluloj.⁵⁸

君子之所谓贤者，非能遍能人之所能之谓也；君子之所谓知者，非能遍知人之所知之谓也；君子之所谓辩者，非能遍人之所辩之谓也；君子之所谓察者，非能遍察人之所察之谓也：有所正矣。

Saĝeco de noblulo ne estas tia kapablo, ke li povus disponi ion ajn, kion ordinaruloj povas disponi. Intelkto de noblulo ne estas tia kapablo, ke li povus scii ion ajn, kion la ordinaruloj povas scii. Elokventeco de noblulo ne estas tia kapablo, ke li povus argumenti ion ajn, kion ordinaruloj povas argumenti. Klarvideco de noblulo ne estas tia kapablo, ke li povus esplori ion ajn, kion la ordinaruloj povas esplori. Li havas kapablon ĝustigi.

相高下，视堯肥，序五种，君子不如农人；通财货，相美恶，辩贵贱，君子不如贾人；设规矩，陈绳墨，便备用，君子不如工人；不恤是非然不然之情，以相荐擢，以相耻忤，君子不

⁵⁷ Citaĵo el *Poezio*: 诗·大雅·文王有声 Xunzi esprimis sian idealon de personeco kun forta karaktero kiel ĉiam *obeema* al supro, tute egale ĉu favorate de la supro aŭ ne. Granda estas la diferenco inter konfuceanismo kaj mohismo, kies idealo estas *kritite* pensanta personeco.

⁵⁸ En tiu eldiro manifestiĝas la diferenco inter taoismo kaj konfuceanismo de Xunzi.

如惠施，邓析。

Je mezurado de terena alto kaj malalto, je observado de sterilo kaj fekundeco, je vico-tempo de la semado de kvin cerealoj, noblulo estas ne tiel lerta, kiel kamparano. Je informo de varoj, je observado de ilia belo kaj malbelo, je kompreno pri altvaloro kaj malaltvaloro, noblulo estas ne tiel lerta, kiel negocisto. Je mezurado pere de cirkelo kaj ortilo, je uzado de tuĉrektoŝnuro, je liverado de aparato kaj maŝinaro, noblulo estas malpli lerta, ol metiisto. Je transcendo de 'Jes aŭ Ne' kaj 'aserto aŭ negativo', je artifiko de rekomendo kaj malrekomendo, je hontigado de kontraŭulo en disputo, noblulo ne estas tiel lerta, kiel Hui Shi kaj Deng Xi.

若夫谥德而定次，量能而授官，使贤不肖皆得其位，能不能皆得其官，万物得其宜，事变得其应，慎，墨不得进其谈，惠施，邓析不敢窜其察，言必当理，事必当务，是然后君子之所长也。

Sed li estas lerta je jeno. Li povas mezuri virtecon kaj vicigi subulojn, kalkuli kapablon kaj doni al ili postenon, asigni al saĝuloj kaj malsaĝuloj la rangojn, kaj tiel povas ricevi sian oficon kaj kapablulojn kaj nekapablulojn. Tial do ĉio estas aranĝita en bona ordo kaj aferoj ŝanĝiĝas tiel konvene, ke ideologoj de skoloj Shen kaj Mo ne povu enŝovi sian nazon, nek teoriistoj kiel Hui Shi kaj Deng Xi aŭdacu altrudi sian argumenton. Kion li parolas, ĉio konformas al rezono. Kion li faras, ĉio konformas al devo. Jen en kio kuŝas la supereco de noblulo.

凡事行，有益于理者立之，无益于理者废之，夫是之谓中事。

Ĝenerale je ĉiu afero kaj ĉiu entrepreno, se ĝi estas utila al la bonordo, starigu ĝin; se senutila al la bonordo, forĵetu ĝin – tio estas nomata la ago ĝustigi ĉion laŭ ora mezo.

凡知说，有益于理者为之，无益于理者舍之，夫是之谓中说。

Ĝenerale je ĉiu doktorino, se ĝi estas utila al la bonordo, praktiku ĝin; se senutila al la bonordo, forlasu ĝin – tio estas nomata la teorio ĝustigi laŭ ora mezo.

事行失中谓之奸事，知说失中谓之奸道。

Afero aŭ entrepreno, perdinta la mezon, estas nomata 'maljusta afero'; doktorino, perdinta la mezon, estas nomata la 'maljusta vojo'.

奸事奸道，治世之所弃，而乱世之所从服也。

Kaj maljustan aferon kaj maljustan vojon oni forĵetas en la epoko bone regata, sed en la epoko senorda oni sekvas kaj obeas ilin.

若夫充虚之相施易也，坚白，同异之分隔也，是聪耳之所不能听也，明目之所不能见也，辩士之所不能言也，虽有圣人之知，未能倭指也。

Koncernante la aserton, kiel pleneco kaj malpleneco alterne ŝanĝiĝas unu en la alian, kiel distingi inter dureco kaj blankeco, sameco kaj malsameco, tion ne povas kompreni

eĉ la havanto de akraj oreloj, ne povas vidi eĉ havanto de klaraj okuloj, ne povas paroli eĉ elokventa oratoro. Tiaĵon eĉ se havanto de scio kiel sanktulo ankoraŭ ne povas elkalkuli.

不知无害为君子，知之无损为小人。

Ne sciante tian aserton, noblulo difektiĝas neniom. Sciante tian aserton, malgrandulo ŝanĝiĝas neniom.

工匠不知无害为巧，君子不知无害为治。

Ne sciante tiaĵon, metiisto difektiĝas neniom je sia lerteco. Ne sciante tiaĵon, noblulo neniom difektiĝas je sia regado.

王公好之则乱法，百姓好之则乱事。

Se reĝo kaj duko ŝatas tiaĵon, tiuokaze leĝo-reguloj malordiĝas; se cent klanoj ŝatas tiaĵon, tiuokaze la aferoj malordiĝas.

而狂惑戇陋之人，乃始率其群徒，辩其谈说，明其辟称，老身长子，不知恶也。

Sed frenezaj obskurantoj, ekgvidante amason da popolanoj, argumentas elokvente tian paroladon kaj propagandas la fablojn, kaj ĝis sia maljuniĝo ne komprenas la malbonon. 夫是之谓上愚，曾不如相鸡狗之可以为名也。

Tio estas t. n. la pleja stulteco, ke ili ne superas tiujn, kiuj distingas nomojn je klasifiko de kokoj kaj hundoj.

《诗》曰：“为鬼为蜮，则不可得。有靦面目，视人罔极。作此好歌，以极反侧。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: ““Se fantomo, se monstra testudo, tio ne akireblas; se io havanta mienon kaj okulojn, videblas klarege al homoj. Tiu bona kanto estas versita, por ke la plej grava ne kliniĝu flanken.”⁵⁹ Tio esprimas la supremenciitan de mi.

我欲贱而贵，愚而智，贫而富，可乎？ 曰：其唯学乎！

Estante malalta, tamen mi volus fariĝi nobla; estante stulta, tamen mi volus fariĝi intelekta; estante malriĉa, tamen mi volus fariĝi riĉa. Ĉu eblas? Mi diras, ke nur necesas lerni!

彼学者，行之，曰士也；敦慕焉，君子也；知之，圣人也。

Kiu praktikas kion lernas, tiu estas nomata alta persono. Kiu diligentas, tiu estas noblulo. Kiu scias tion, tiu estas sanktulo.

上为圣人，下为士君子，孰禁我哉！

En la plej bona okazo li povas fariĝi sanktulo. Minimume, li povas fariĝi noblulo. Kiu do malpermesas min fariĝi tia!

乡也，混然涂之人也，俄而并乎尧，禹，岂不贱而贵矣哉！

Antaŭe, personoj, ne konataj al la mondo, fariĝis subite reĝoj kiel Yao aŭ Yu. Ĉu tio ne

⁵⁹ Citaĵo el la *Poezio*: 诗经·小雅·何人斯. Vd. la ĉap. 22.

estas la ekzemplo, ke la malaltaj fariĝis noblaj?

乡也，效门室之辨，混然曾不能决也，俄而原仁义，分是非，图回天下于掌上而辩白黑，岂不贫而知矣哉！

Kiu, antaŭe, ne havante kapablon distingi eĉ aferetojn eksteran kaj internan de sia familio, ne povis decidi ion ajn en sia granda konfuzo, tiu subite, ekkomprenante bonvolecon kaj juston, klare distingas pravecon kaj malpravecon kaj tiel turnas la mondon kvazaŭ sur siaj manplatoj kaj distingas, kio estas blanka aŭ nigra. Ĉu tio ne estas la ekzemplo, ke povrulo fariĝas intelektulo!

乡也，胥靡之人，俄而治天下之大器举在此，岂不贫而富矣，哉！

Kiu antaŭe nenion posedis, tiu subite ekregas la mondon, havante eĉ si la grandan potencon. Ĉu tio ne estas la ekzemplo, ke povrulo fariĝas riĉulo!

今有人于此，屑然藏千溢之宝，虽行賁而食，人谓之富矣。

Nun estu iu, kiu, kvankam kaŝe posedante trezoron valoran je mil yí, tamen vivas almoze. Homoj tamen nomas lin riĉa.

彼宝也者，衣之不可衣也，食之不可食也，卖之不可僂售也，然而人谓之富，何也？

Spite ke li havas tian trezoron, li ne povas vesti sin en bona vestaĵo, nek manĝi bonan manĝaĵon, nek vendi tuj ion valoran. Sed tamen oni nomas lin riĉa. Kial?

岂不大富之器诚在此也？是杆杆亦富人已，岂不贫而富矣哉！

Ĉar instrumento de granda riĉiĝo estas vere kuŝas en li, ĉu ne? Kiu estas grandega je personeco, tiu estas ja riĉulo. Ĉu tio ne estas la ekzemplo, ke la povra fariĝas riĉa?

故君子无爵而贵，无禄而富，不言而信，不怒而威，穷处而荣，独居而乐，岂不至尊，至富，至重，至严之情举积此哉！

Tiel do noblulo eĉ sen titolo estas nobla, sen salajro estas riĉa, sen parolo estas fidinda, sen kolero estas majesta, prosperas eĉ en malfacila situacio, ĝojas en izoleco. Ĉu en tio ne estas akumulita io plej respektinda, plej riĉa, plej digna kaj plej prestiĝa?

故曰：贵名不可以比周争也，不可以夸诞有也，不可以势重胁也，必将此然后就也。

Do estas dirite, ke nobla fameco ne akireblas per konkurenco inter klikoj-partioj, nek per fanfaronado, nek per potencavida hegemonio, sed nepre per supremenciita tia sintenado.

争之则失，让之则至，遵道则积，夸诞则虚。

Se oni konfliktas, perdas; se oni cedas, atingas la celon; se oni fidele sekvas la vojon, akumuliĝas; se oni fanfaronas, malpleniĝas.

故君子务修其内而让之于外，务积德于身而处之以遵道，如是，则贵名起如日月，天下应之如雷霆。

Tial noblulo devas kulturi interne sin mem por lerni kiel cedi ekstere al aliuloj, devas

akumuli al si virton por fidele sekvi la vojon. Per tia konduto lia nobla nomo altiĝas kiel la suno kaj la luno, kaj la mondo respondas al li kvazaŭ ekbatite per fulmo-tondro.

故曰：君子隱而顯，微而明，辭讓而勝。

Do estas dirite, ke noblulo, eĉ se kaŝita, tamen elmontriĝos, kvankam subtila, tamen luminiĝos, kvankam cedema, tamen venkos.

《诗》曰：“鹤鸣于九皋，声闻于天。”此之谓也。

En *Poezio* estas skribite: “Voĉo, ke gruo krias en fora marĉo, atingas la Ĉielon.” Tio signifas la supremenciitan.⁶⁰

鄙夫反是，比周而誉俞少，鄙争而名俞辱，烦劳以求安利，其身俞危。

Vulgaruloj, male, kungregiĝante en kliko-partio, ju pli malhonoras sin, ju pli en bagatela konflikto estas hontigata ilia nomo, des pli en vanta laboro ili serĉas facilan profiton kaj danĝerigas sin mem.

《诗》曰：“民之无良，相怨一方。受爵不让，至于已斯亡。”此之谓也。

En *Poezio* estas skribite: “Malbonas popolanoj, havante vengemon unu kontraŭ la alia. Ricevante titolon, ili ne volas cedi. Tiel ili pereas per si mem.” Tio signifas la supremenciitan.⁶¹

故能小而事大，辟之是犹力之少而任重也，舍粹折无适也。

Ĉe ili la kapablo estas malgranda por la afero granda, ekzemple, ilia forto estas malgranda sed la tasko estas granda, ke ili, klopodegante per ĉiuj siaj fortoj, ne taŭgas al la devo.

身不肖而诬贤，是犹偃伸而好升高也，指其顶者愈众。

Ke iu, estante mem malgranda sentaŭgulo, ŝajnigas sin saĝa, tio estas sama kiel ĝibulo etendus sin kaj supreniras alten. Tion vidante, mokridas pli da homoamaso.

故明主讷德而序位，所以为不乱也；忠臣诚能然后敢受职，所以为不穷也。

Tial do, klera estro mezuras al subuloj ilian virton kaj gradigas rangon por ke ne malordiĝu. Lojala subulo, estante honesta, aŭdacas ricevi postenon por ke li ne restu en mizero.

分不乱于上，能不穷于下，治辩之极也。

Distingu, por ke ne malordiĝu supre, kaj povu fari, ke oni ne mizeru sube – tio estas la ultima ĉefpunkto por regi kaj dividi.

《诗》曰：“平平左右，亦是率从。”是言上下之交不相乱也。

En *Poezio* estas skribite: “Bone ekvilibrigite je dekstro kaj maldekstro, ĉiuj sekvas en ordo.”⁶² Tiel estas dirite pri tio, ke la supro kaj la subo ne konfliktas reciproke inter si.

⁶⁰ Citata el 诗经·小雅·鹤鸣

⁶¹ Citata el 诗经·小雅·角弓

⁶² Citata el 诗经·小雅·采芣

以从俗为善，以货财为宝，以养生为已至道，是民德也。

Konsideri la kutiman moron bono, la proprietaĵon trezoro, la longvivecon sia pleja vojo – estas la virto de popolanoj.

行法至坚，不以私欲乱所闻，如是，则可谓劲士矣。

Kiu, kondukante laŭleĝe kun la volo plej firma, ne perturbas lernitaĵon per privata deziro – tiu estas, t. n. la forta persono.

行法至坚，好修正其所闻以桥饰其情性，其言多当矣而未谕也，其行多当矣而未安也，其知虑多当矣而未周密也，上则能大其所隆，下则能开道不己若者，如是，则可谓笃厚君子矣。

Estas tiu, kiu, kondukante laŭleĝe kun la volo plej firma, bone korektas la lernitaĵon per beligo de sia denaska naturo. Li, kvankam ankoraŭ ne sufiĉe komprenante, tamen parolas multe da taŭgaĵoj. Li, kvankam estante ankoraŭ ne stabila, tamen kondukas multe laŭ taŭgeco. Li, kvankam ankoraŭ ne sufiĉe plena, tamen scias kaj konsideras multe da taŭgaĵo. Li povas al supro respekti nepran regulon kaj al subo malfermi la vojon por la malpli sperta ol si. Tiu ja estas, t. n. la honesta noblulo.

修百王之法若辨白黑，应当时之变若数一二，行礼要节而安之若生四枝，要时立功之巧若诏四时，平正和民之善，亿万之众而博若一人，如是，则可谓圣人矣。

Estas tiu, kiu, ellerninte leĝo-regulojn de cent reĝoj, klare distingas blankon kaj nigron, respondas al ŝanĝoj de tempo ĝuste kvazaŭ kalkulante ciferojn unu-du. Li kondukas laŭ decreguloj per certa modereco laŭnature kvazaŭ kreskas kvar membroj de sia korpo. Li elmontras sian meriton kaj teknikon ĝustatempe kvazaŭ laŭ alveno de kvar sezonoj. Li glate politikas kun harmonio por bono de la popolo kaj regas vaste kelkcent mil da popolanoj kvazaŭ unu homon. Tiu ja estas, t. n. la sanktulo.

井井兮其有理也，严严兮其能敬己也，分分兮其有终始也，猷猷兮其能长久也，乐乐兮其执不殆也，炤炤兮其用知之明，修修兮其用统类之行也，绥绥兮其有文章也，熙熙兮其乐人之臧也，隐隐兮其恐人之不当也，如是，则可谓圣人矣。

Estas iu, kiu havas la principon, rigore povas respekti sin mem, distingas klare finon kaj komencon, pace povas longigi la vivon, facile faras aferon sendanĝere, brile utiligas la intelekton, lerte klasifikas utilecon kaj praktikas, riĉe havas stilon ornami kaj desegni, ĝojas je la bono de ĝojantoj, kaŝe timas alies malkonvenon. Tia persono povas esti nomata 'sanktulo'.

此其道出乎一。曷谓一？曰：执神而固。曷谓神？曰：尽善挟治之谓神，万物莫足以倾之之谓固。

Ĉi tiu vojo devenas de unu. Kio do estas la unu? Mi diras: teni la animon firma. Kio estas la animeco? Mi diras: fari bonon laŭeble, regante sin streĉite – tio estas nomata 'animeco', do tenu la animon firme, por ke dek mil aĵoj ne povu defleksi ĝin.

神固之谓圣人。圣人也者，道之管也。天下之道管是矣，百王之道一是矣。

Kies animo estas firma, ties nomo estas 'sanktulo'. La sanktulo estas ja konduktubo de Taŭo, tra kiu iras en unueco la vojo de cent reĝoj.

故《诗》《书》《礼》《乐》之归是矣。

Do pri tiu ĉi vojo estas skribite en la libroj: *Poezio*, *Dokumentoj*, *Ritualoj*, *Muziko*.

《诗》言是，其志也；《书》言是，其事也；《礼》言是，其行也；《乐》言是，其和也；《春秋》言是，其微也。

Vortoj en *Poezio* esprimas la strebon; vortoj en *Dokumentoj* esprimas la aferojn; vortoj en *Ritualoj* esprimas la konduton; vortoj en *Muziko* esprimas la harmonion; vortoj en *Chun-Qiu Analoj* esprimas la subtilaĵojn.

故《风》之所以为不逐者，取是以节之也；《小雅》之所以为《小雅》者，取是而文之也；《大雅》之所以为《大雅》者，取是而光之也；《颂》之所以为至者，取是而通之也：天下之道毕是矣。

Do eĉ regionaj popolkantoj *Feng* ne degeneras en troa libero, ĉar ili estas kolektitaj kun modereco. *Xiao Ya* estas rigardata eleganteta, ĉar ĝi estas kolektita por beletro. *Da Ya* estas rigardata elegantega, ĉar ĝi estas kolektita por glorigo. *Odo* estas rigardata apogeo, ĉar ĝi estas kolektita por perfektigo. Jen la Taŭo de la subĉiela mondo entute estas inkluzivita.

乡是者臧，倍是者亡。乡是如不臧，倍是如不亡者，自古及今，未尝有也。

Kiu turnas la kapon al tio, tiu estas bona; kiu turnas la dorson al tio, tiu pereas. De antikve ĝis nun ne troviĝas tiu, kiu ne estas bona, turnante sin al tio, nek troviĝas tiu, kiu ne pereis, turnante la dorson al tio.

客有道曰：“孔子曰：‘周公其盛乎！身贵而愈恭，家富而愈俭，胜敌而愈戒’。”

Iu asertas, ke Konfuceo diris: “Kia granda sukcesinto la duko Zhou estas! Ju pli altranga li mem estas, des pli li iĝis humila; ju pli riĉa lia familio, des pli li iĝis modesta; ju pli li venkis malamikojn, des pli detenis sin.”

应之曰：“是殆非周公之行，非孔子之言也。武王崩，成王幼，周公屏成王而及武王，履天子之籍，负扆而坐，诸侯趋走堂下。

Responde al tio mi diras: “Tia ne estas la konduto de la duko Zhou, nek la eldiro de Konfuceo. Kiam la reĝo Wu forpasis, ankoraŭ en infaneco estis la reĝo Cheng, do la duko Zhou skrenis la reĝon Cheng kaj heredis la reĝon Wu, okupis la postenon de la Ĉiela filo, sidis surfone de la reĝa vando, kaj tial landestroj kuretante kolektiĝis sub la halo.

当是时也，夫又谁为恭矣哉！

Tia fariĝis bonokaze, kiu do povus rigardi lin humila?

兼制天下，立七十一国，姬姓独居五十三人言，周之子孙苟不狂惑者，莫不为天下之显诸侯，

孰谓周公俭哉！

Li superregis la tutan subĉielan mondon, starigis 71 feŭdajn landojn, el kiuj 53 konsistigis nur la klano de Ji. Filoj de familio Zhou, escepte de frenezuloj, povis fariĝi landestroj en la mondo. Kial eblas nomi la dukon Zhou modesta?

武王之诛纣也，行之日以兵忌，东面而迎太岁，至汜而泛，至怀而坏，至共头而山隧。

Kiam la reĝo Wu punis la tiranon Zhou, la tago de ekmarŝo estis malbonaŭgura por ekmiliti: oriente ekaperis la stelo Jupitero, ĉe la rivero Si inundis, la citadelo Huai rompiĝis, ĉe la monto Gong Tou okazis terfalo.

霍叔惧曰：‘出三日而五灾至，无乃不可乎？’

Huo Shu, plijuna frato de Wu, ektimis, dirante: ‘Post ekmilitiro ne pasis 3 tagoj, jam okazadis kvin plagoj, ĉu ne estus malbone militi?’

周公曰：‘刳比干而囚箕子，飞廉，恶来知政，夫又恶有不可焉？’

La duko Zhou diris: ‘Bigan estas dissekcita, s-ro Ji estas malliberigita, Feilian kaj Elai ekadministris – Ĉu ankaŭ tio ne estas malbone militi?’

遂选马而进，朝食于戚，暮宿于百泉，厌旦于牧之野，鼓之而纣卒易乡，遂乘殷人而诛纣。

Tiel do li lasis la formitan vicon de ĉevaloj antaŭeniri, la armeo matenmanĝis ĉe Qi kaj tranoktis bivake ĉe Bai Quan (Cent fontanoj), frumatene subpremis malamikan armeon sur la kampo de Mu (Paŝtejo). Sub la tamburo soldatoj de la tirano Zhou facile retiriĝis kaj kaptante la okazon de retireton per Yin-anoj, oni punmortigis la tiranon Zhou.

盖杀者非周人，因殷人也。

Tio signifas, ke li estis mortigita ne de Zhou-landanoj, sed de Yin-anoj.

故无首虏之获，无蹈难之赏，反而定三革，偃五兵，合天下，立声乐，于是《武》《象》起而《韶》，《护》废矣。

Tial do al neniu estis donita la gratifiko por senkapigo aŭ kaptado de malamikoj, al neniu estis donita la premio por malfacila batalo. Male, oni devis forlasi tri ledajn armaĵojn kaj kvin armilojn, tiel do estis okazigita la kunveno por unuigo de la mondo. Estis starigita la nova voĉa muziko de Zhou-dinastio, nomata “Wu” kaj “Xiang”, kaj ĉesigita la malnova muziko de Yin-dinastio – “Shao” kaj “Hu”.

四海之内，莫不变心易虑以化顺之，故外闔不闭，跨天下而无薪。

Ene de kvar maroj, ŝanĝiĝis ĉio – koro ŝanĝiĝis, penso transformiĝis, kaj oni bonorde sekvis tion. Tiel do oni jam ne ŝlosis al ekstero kaj estis nuligitaj la limoj tra la mondo. 当是时也，夫又谁为戒矣哉！”

En tia tempo al kiu restas skrupule por singardi?”

造父者，天下之善御者也，无舆马则无所见其能。

Zao Fu estis la plej bona kondukisto de ĉaro en la mondo, sed sen ĉaro kaj ĉevalo li ne

povus montri sian kapablon.

羿者，天下善射者也，无弓矢则无所见其巧。

Yi estis la mondfama bona pafarkisto, sed sen pafarko li ne povus montri sian lertecon.

大儒者，善调一天下者也，无百里之地则无所见其功。

Granda konfuceano estas tiu, kiu bone akordigas en unu la mondon, sed sen teritorio kun cent li kvadrate li ne povus montri sian meriton.

舆固马选矣，而不能以至远一日而千里，则非造父也。

Havante zorge-elektitajn ĉaron kaj ĉevalon, se li ne povus atingi mil liojn for en unu tago, li ne rajtus nomiĝi Zao Fu.

弓调矢直矣，而不能以射远中微，则非羿也。

Havante agorditan pafarkon kaj rektan sagon, se li ne povus pafi malproksimen kaj maltrafus celon, li ne rajtus nomiĝi Yi.

用百里之地，而不能以调一天下，之强暴，则非大儒也。

Posedante teritorion kun cent lioj kvadrate, se li ne povus akordigi en unu la mondon, li ne rajtus nomiĝi granda konfuceano.

彼大儒者，虽隐于穷阎漏屋，无置锥之地，而王公不能与之争名；在一大夫之位，则一君不能独畜，一国不能独容，成名况乎诸侯，莫不愿得以为臣；用百里之地而千里之国莫能与之争胜，笞捶暴国，齐一天下，而莫能倾也。是大儒之征也。

Kun la granda konfuceano, kaŝe vivanta en povra domaĉo, kie tralikas pluvakvo, loĝanta sur sufoke malvasta terpeco, eĉ reĝoj kaj dukoj ne povus konkurenci por renomo. Se li okupas la rangon de granda oficisto, tiam unu reĝo ne povas monopoli lin kiel subulon, unusola lando ne povas monopole dungi lin, ĉar la renomo estas vaste konata al landestroj, kiuj volus dungi lin kiel vasalon. Se li posedus teritorion de cent lioj kvadrate aŭ landon de mil lioj kvadrate, neniu povus konkurenci kun li. Li skurĝus violentajn landojn kaj unuigus en ordo la mondon, kiun ne eblus faligi. Jen tia estas la konkera afero de la granda konfuceano.

其言有类，其行有礼，其举事无悔，其持险应变曲当，与时迁徙，与世偃仰，千举万变，其道一也。是大儒之稽也。

Je lia parolado estas bone klasifikate, je lia konduto kunestas decreguloj, je lia entrepreno de aferoj estas neriproĉeble. Dangĉeron kaj riskon li traktas flekseble laŭ ŝanĝiĝo, kaj moviĝas konforme al la tempo, kaj lerte sintenas kaŝe aŭ malkaŝe laŭ monda situacio. Spite mil aŭ dek mil ĉiaspecajn ŝanĝiĝojn lia vojo restas unusola. Jen en kio kuŝas merito de la granda konfuceano.

其穷也，俗儒笑之；其通也，英杰化之，嵬琐逃之，邪说畏之，众人愧之。

Pro lia suferplena vivo vulgaraj konfuceanoj mokridas. Ĉe lia trapenetranta kohereco, eĉ herojoj-bravuloj asimiliĝas kun li, bigotoj evitas lin, herezuloj timas lin, popolamasoj

ekhontas pri si mem.

通则一天下，穷则独立贵名，天不能死，地不能埋，桀，跖之世不能污，非大儒莫之能立，仲尼，子弓是也。

Kiam li je la scio trapenetras la mondon, eĉ se li estus povra, li staras sendependa kun alta nomo. Tiam la Ĉielo ne povas mortigi lin, la tero ne povas enterigi lin. Tirano Jie aŭ ŝtelisto Zhi ne povas malpurigi lin. Se ne granda konfuceano, neniu povas stariĝi tia. Jen kiaj estis Zhong Ni kaj Zi Gong.

故有俗人者，有俗儒者，有雅儒者，有大儒者。

Do estas vulgarulo, estas vulgara konfuceano, estas klera konfuceano, estas granda konfuceano.

不学问，无正义，以富利隆，是俗人者也。

Kiu ne lernas sciencon, sen justeco serĉante nur riĉon kaj profiton, tiu estas vulgarulo. 逢衣浅带，解果其冠，略法先王而足乱世术，缪学杂举，不知法后王而一制度，不知隆礼义而杀《诗》《书》；其衣冠行伪已同于世俗矣，然而不知恶者；其言议谈说已无异于墨子矣，然而明不能别；呼先王以欺愚者而求衣食焉，得委积足以揜其口则扬扬如也；随其长子，事其便辟，举其上客，**患**然若终身之虏而不敢有他志，是俗儒也。

Kun larĝa vesto, loza zono, portante ĉapon kun tentaklformaj pintoj, iu konfuceano preteratentas la leĝojn de antaŭaj reĝoj kaj sufiĉe malordigas sciencon de la nuna mondo. Kun scio plena de eraroj kaj fuŝoj, li ne scipovas sekvi la leĝojn de postaj reĝoj kaj la unuigitan normon-reĝimon, nek scipovas respekti la decregulojn kaj posedi⁶³ *Poezion* kaj *Dokumentojn*; malgraŭ ke lia vestaĵo kaj ĉapo, lia agmaniero, jam estas tute samaj al vulgaraj mondanoj, tamen li ne scipovas malŝati tion; lia parolado kaj opinio jam ne diferencas de Mozi, sed li ne povas klare distingi tion; li, invokante antaŭajn reĝojn, trompadas stultulojn por depreni vestaĵon kaj manĝaĵon, kaj vikle kun fiera mieno akumulas riĉon por vivteni sin. Obeante la unuajn filojn, flatante la favoratajn oficistojn, li estas akceptata de ili kiel honora gasto, kaj tiel do li, restante tutan vivon kontenta sklavo, ne kuraĝas havigi al si la alian strebon. Jen kia estas la vulgara konfuceano.

法后王，一制度，隆礼义而杀《诗》《书》，其言行已有大法矣，然而明不能齐法教之所不及，问见之所未至，则知不能类也；知之曰知之，不知曰不知，内不自以诬，外不自以欺，以是尊贤畏法而不敢怠傲，是雅儒者也。

La alia sekvas la postan reĝon kaj unuigitan normon-reĝimon, respektante decregulojn kaj posedante *Poezion* kaj *Dokumentojn*, kaj lia parol-konduktmaniero jam konformas al

⁶³ Mi prenas la ideogramon 殺 kiel 獲 (akiri, posedi) laŭ la vortaro de Morohashi Tetuzi 諸橋徹次.

granda normo, malgraŭ ke li ne povas solvi klare kion la normo ankoraŭ ne instruas. Pri kio ankoraŭ ne estas aŭdate nek vidate de li, tion li ne scipovas klasifiki. Do, li scias tion, pri kio estas sciante, sed ne povas ekscii tion, pri kio ne estas sciante. Interne sen sia memo li ne kalumnias la eksteron, ekstere sen sia memo li ne trompas la internon. Tiel do li, respektante saĝon kaj timante normon, ne aŭdacas maldiligenti kaj aroganti. Jen kia estas la klera konfuceano.

法先王，统礼义，一制度，以浅持博，以古持今，以一持万，苟仁义之类也，虽在鸟兽之中，若别白黑；倚物怪变，所未尝闻也，所未尝见也，卒然起一方，则举统类而应之，无所儼作心，张法而度之，则晻然若合符节，是大儒也。

La tria sekvas la normon-regulojn de antaŭaj reĝoj, unuformigas decregulojn kaj unuigas la normon-reĝimon. Uzante la malprofundan, li traktas la profundan; uzante la antikvon, li traktas la nunon; uzante unu, li traktas dek mil. Eĉ la kategorion de bonvoleco kaj justo li povas trovi en la mondo de birdoj kaj bestoj tiel klare, kiel distingi blankon kaj nigran. Ĉe eksterordinara transformiĝo de strangaĵo, kiun oni antaŭe ne aŭdis nek vidis, tuj kiam ĝi okazis, li subite kaptas la ĝian kategorion je klasifiko kaj ĝuste povas respondi al tio, kaj sen ajna dubo-hezito li solvas tion laŭ vastigita normo tiel akurate, kiel ĝuste kunmetitan identigilon. Jen kia estas la granda konfuceano.

故人主用俗人则万乘之国亡，用俗儒则万乘之国存，用雅儒则千乘之国安，用大儒则百里之地久，而后三年，天下为一，诸侯为臣，用万乘之国举错而定，一朝而伯。

Do, se iu estro uzas la vulgarulon, la lando de dek mil militĉaroj pereas; se estos uzata la vulgara konfuceano, la lando de dek mil militĉaroj apenaŭ travivus; se uzata la klera konfuceano, la lando de mil militĉaroj stabilas; se uzata la granda konfuceano, la tero de cent lioj kvadrato longe vivos, kaj tri jarojn poste la subĉiela mondo unuiĝos, kaj aliaj landestroj fariĝos vasaloj. Se li estos uzata en la lando de dek mil militĉaroj, subite ordiĝos malordo, kaj la reĝo tuj sekvan matenon fariĝos hegemonia el landestroj.

不闻不若闻之，闻之不若见之，见之不若知之，知之不若行之，学至于行之而止矣。

Ne aŭdi ion estas malpli supere ol aŭdi tion, aŭdi tion ne estas pli supere ol vidi tion, vidi tion ne estas pli supere ol scii tion, scii tion ne estas pli supere ol fari tion. Lernado atingas la celon per praktikado.

行之，明也，明之为圣人。

Praktikante, oni iĝas klera. Kiu iĝa klera, tiu fariĝas sanktulo.

圣人也者，本仁义，当是非，齐言行，不失豪厘，无他道焉，已乎行之矣。

La sanktulo, baziĝinte sur bonvoleco kaj justo, juĝas pravecon-malpravecon kaj ordigas parolon kaj konduton, do li ne perdas la plejan detalaĵon. Al li ne estas alia vojo ol nur laŭiri pluen.

故闻之而不见，虽博必谬；见之而不知，虽识必妄；知之而不行，虽敦必困。

Kiu, aŭdante, ne vidas, tiu nepre eraras, eĉ se aŭdus kiom ajn vaste. Kiu, vidante, ne scias, tiu, kiom ajn erudicia, nepre devias. Kiu, sciante, ne faras, tiu nepre konfuziĝas, kiom ajn skrupula.

不闻不见，则虽当，非仁也。其道百举而百陷也。

Kiu nek aŭdas nek vidas, tiu estas ne bonvolema, kiom ajn li celtrafus. Kion ajn sur tia vojo entreprenu cent fojojn, ĉio cent fojojn fiaskos.

故人无师无法而知，则必为盗；勇，则必为贼；云能，则必为乱；察，则必为怪；辩，则必为诞。

Sen instruisto kaj sen principo, – tiu, kiu havas scion, nepre fariĝas ŝtelisto; kiu havas kuraĝon, nepre fariĝas rabisto; kiu estas kapabla, nepre ekribelas; kiu estas lerta, nepre faras strangajon; kiu estas elokventa, nepre ĉikanas.

人有师有法而知，则速通；勇，则速威；云能，则速成；察，则速论。

Havigante al si instruiston kaj principon, – kiu scias, subite komprenas; kiu estas kuraĝa, subite akiras majestan prestiĝon; kiu estas kapabla, subite plenumas taskon; kiu estas lerta, subite argumentas.

故有师法者，人之大宝也；无师法者，人之大殃也。

Kiu havas al si instruiston kaj principon, al tiu estas dotita la granda trezoro; kiu ne havas instruiton kaj principon, al tiu estos donita la granda fiasko.

[人无师法则隆情矣。]人无师法则隆性矣，有师法则隆积矣，而师法者，所得乎情，非所受乎性，不足以独立而治。

[Homo sen instruisto kaj sen principo disvolvas al si arbitre la pasion.]⁶⁴ Homo sen instruisto kaj sen principo disvolvas al si arbitre la denaskan naturon. Sed homo kun instruito kaj principo disvolvas al si ion akumuloblan. De instruisto kaj principo estas akirebla la pasio, sed ne akirebla la denaska naturo, ĉar ne sufiĉas memstareco kaj memregado.

性也者，吾所不能为也，然而可化也；情也者，非吾所有也，然而可为也。

La denaska naturo ne povas esti farita pere de nia kapablo, sed ŝanĝebla. La pasio povas esti forĝita, eĉ se ĝi ankoraŭ mankas al ni.

注错习俗，所以化性也；并一而不二，所以成积也。

Se kutimo kaj moro estu aranĝita bonorde, tiam la denaska naturo transformiĝos. Se koncentriĝi al unu kaj ne disdubiĝi, vi sukcesos ion akumuli.

习俗移志，安久移质，并一而不二则通于神明，参于天地矣。

⁶⁴ En la libro, kompilita de Fang Yong mankas la frazo. En la alia, kompilita laŭ 影宋台州本荀子, troviĝas tiu ĉi frazo. La frazo estis ekskludita, ĉar iuj kompilintoj konsideris, ke agnosko de 'pasio' kontraŭus al la ideo de Xunzi 性恶说. (vd. 荀子集解上, 2016, p. 170)

La kutimo kaj moro ŝanĝas vian volon, kaj se daŭrigu tion dum longe, transformiĝos via kvalito. Koncentriĝo je unu sen disduiĝo plenklerigas vin kaj kondukas vin al spirita luminiĝo kaj engaĝiĝo en la afero de la Ĉielo kaj la Tero.

故积土而为山，积水而为海，旦暮积谓之岁，至高谓之天，至下谓之地，宇中六指谓之极，涂之人百姓积善而全尽谓之圣人。

Akumulite terpeco fariĝas monto, akumulite akvo fariĝos maro, akumulite aŭroro kaj krepusko fariĝos jaro. La plej supra fariĝos la Ĉielo, la plej suba fariĝos la tero. Ses direktoj en la universo atingas la ekstremojn. Ordinara homo el cent klanoj, akumulante bonon per la tuta forto, estos nomata la sankta.

彼求之而后得，为之而后成，积之而后高，尽之而后圣。故圣人也者，人之所积也。

Li, serĉante, atingis tion poste. Praktikante, poste li sukcesis. Akumulante tion, atingis poste la altecon. Penante per tuta forto, poste li fariĝis sankta. Do la sanktulo estas rezulto de akumulado far homo.

人积耨耕而为农夫，积斲削而为工匠，积反货而为商贾，积礼义而为君子。

Akumulanta agrokulturadon, iu fariĝas kamparano. Akumulante teknikon de tranĉado kaj rabotado la alia fariĝas metiisto. Akumulante sperton de aĉetado-vendado la tria fariĝas negocisto. Akumulante konduton de decreguloj kaj justo, la kvara fariĝas noblulo.

工匠之子莫不继事，而都国之民安习其服，居楚而楚，居越而越，居夏而夏，是非天性也，积靡使然也。

Filoj de metiisto ne devas ne heredi la laboron, popolanoj de ĉiu lando sekvas respektive la sian kutimon kaj obeas al ĝi. Loĝantoj en Chu vivas laŭ moro de Chu, Yue-landanoj – laŭ la moro de Yue, Xia-landanoj – laŭ la moro de Xia. Tio estas ne rezulto de denaska naturo, sed akumulita kutimo influas fari tion.

故人知谨注错，慎习俗，大积靡，则为君子；纵性情而不足问学，则为小人也。

Do, kiu scipovas atenti sian agmanieron, tenas sin prudenta al moro kaj akumulas la kutimon sinpoluradi, tiu fariĝos noblulo. Sed, kiu, obeante al sia denaska naturo kaj pasio, ne havigas al si lernadi, tiu fariĝas malgrandulo.

为君子则常安荣矣，为小人则常危辱矣。

Fariĝinte noblulo, oni povas ĝui pacon kaj prosperi por ĉiam. Fariĝinte malgrandulo, oni estas ĉiam endanĝerigata kaj malhonorigata.

凡人莫不欲安荣而恶危辱，故唯君子为能得其所好，小人则日徼其所恶。

Ĉiuj homoj dezirus pacon kaj prosperon, malŝatus danĝeron kaj malhonoron. Sed nur noblulo povas fari kaj atingi la ŝatatan, malgrandulo akiras la malŝatatan per ĉiutaga penado.

《诗》曰：“维此良人，弗求弗迪；唯彼忍心，是顾是复。民之贫乱，宁唯荼毒。”此之谓也。 En *Poezio* estas skribite: “Jen estas ĉi tie bona homo, sed tiun oni ne serĉas nek dungas. Oni, male, la kruelan favoras kaj klopodas. Popolo malriĉas kaj tumultas, nur farante la amaran kaj la venenan.” Tio esprimas mian eldiron.⁶⁵

人论：志不免于曲私而冀人之以己为公也，行不免污漫而冀人之以己为修也，其愚陋沟瞽而冀人之以己为知也，是众人也。

Se klasifiki homojn, troviĝas iu, kiu, ne evitante esti mem kurbiĝanta kaj siaflanka, tamen dezirus, ke la aliaj rigardu lin publikema, aŭ troviĝas la alia, kiu, kondukante mem malpure, dezirus, ke la aliaj rigardu lin kulturita, aŭ troviĝas la tria, kiu, estante stulta, malklera kaj senscia, tamen dezirus, ke la aliaj rigardu lin saĝa. Tiuj estas la homoamaso.

志忍私然后能公，行忍情性然后能修，知而好问然后能才，公修而才，可谓小儒矣。

Troviĝas tiu, kiu havas strebon konkeri sin mem kaj poste povas servi al publiko, troviĝas tiu, kiu kondukas konkerante denaskan naturon kaj povas elkulturi sin mem, troviĝas tiu, kiu, estante intelekta, ŝatas demandadi kaj kapablas. Persono por publiko, sinkulturado, kaj kapabla, povas esti nomata malgranda konfuceano.

志安公，行安修，知通统类，如是则可谓大儒矣。大儒者，天子三公也。

Kies strebo laŭas publikeco, konduto laŭas sinkulturadon, intelekto penetras unuigitan klasifiksistemon, ties nomo povas taŭgi grandan konfuceanon. La grandaj konfuceanoj povas esti la Ĉiela filo kaj Tri dukoj.

小儒者，诸侯大夫士也。众人者，工农商贾也。

Malgrandaj konfuceanoj povas esti landestroj, grandaj oficistoj kaj kleruloj. Homoamasoj estas metiistoj, terkulturistoj, negocistoj kaj komercantoj.

礼者，人主之所以为群臣寸尺寻丈俭式也。人伦尽矣。

Decreguloj estas mezurilo, laŭ kiu estroj de homoj povas dividi amason da subuloj akurate kaj detale de mikroskope ĝis grandskale.

君子言有坛宇，行有防表，道有一隆。

Je la parolado la noblulo ĝuste havas fundamenton kaj tegmenton, je la konduto – digon kaj indikilon, je la vojo – unu sferon respektindan.

言道德之求，不下于安存；言志意之求，不下于士；言道德之求，不二后王。道过三代谓之荡，法二后王谓之不雅。

Koncernante moralon, li ne parolas krom paca ekzistado; koncernante strebon, li ne parolas krom klera personeco; koncernante vojon kaj virton, li ne parolas krom lastaj reĝoj. Se rilate al pli antikvaj ol tri dinastioj, la vojo ne povas esti sciata precize, kaj

⁶⁵ Citaĵo el 诗经·大雅·桑柔

rilate al pli postaj ol la lastaj reĝoj, la leĝo-regulojn oni nomas nerafinitaj.

高之下之，小之臣之，不外是矣，是君子之所以骋志意于坛宇宫廷也。

Je alteco kaj malalteco, kiom ajn malgrandaj estus la subuloj, noblulo ne transpaŝas eksteren la limon, tiel do la noblulo libervole kuradas de fundamento ĝis tegmento en la reĝa korto.

故诸侯问政不及安存，则不告也；匹夫问学不及为士，则不教也；百家之说不及后王，则不听也。

Do, kiam landestroj demandas pri regado, se la demando ne koncernas la pacan ekzistadon, la noblulo ne diras la opinion. Kiam ordinarulo demandas pri la lernado, se li foras de klera personeco, la noblulo ne instruas al li. Eĉ kiam cent ideologoj diradas, se liaj eldiroj foras de ideoj ĉe lastaj reĝoj, la noblulo ne aŭskultas tion.

夫是之谓君子言有坛宇，行有防表也。

Ĉar je la parolado la noblulo ĝuste havas al si la fundamenton kaj la tegmenton, je la konduto – digon kaj indikilon.

9 王制

REGA REGADO

请问为政？曰：贤能不待次而举，罢不能不待须而废，元恶不待教而诛，中庸民不待政而化。分未定也则有昭缪。

Demandu kio estas la regado? Mi diras: Saĝulon kaj kapablulon promocii trans la vicon kaj rangon. Nekapablulon eksigi, ne atendante la limtempon. Ĉefan malbonulon akuzi, ne atendante la instruon. Ordinarulon ŝanĝi, ne atendante la ĝustigon. Koncerne tiun, kiu ankoraŭ ne apartenas al iu rango, oni difinu lian rangon laŭ tombo de liaj prapatroj.

虽王公士大夫之子孙，不能属于礼义，则归之庶人。

Spite filojn-nepojn de reĝoj, dukoj aŭ grandaj oficistoj, se ili ne povas sekvi decregulojn, tiam oni devas degradigi ilin al plebanoj.

虽庶人之子孙也，积文学，正身行，能属于礼义，则归之卿相士大夫。

Spite filojn-nepojn de plebanoj, se ili, akumulante lernadon de sciencoj, ĝustigante sin laŭ konduto, povas sekvi la decregulojn, tiam oni devas promocii ilin al ministroj, nobeloj aŭ grandaj oficistoj.

故奸言，奸说，奸事，奸能，遁逃反侧之民，职而教之，须而待之，勉之以庆赏，惩之以刑罚，安职侧畜，不安职则弃。

Rilate al popolanoj, kiuj fuĝas kaj malobeas, diraĉante, parolaĉante, faraĉante aferojn, uzaĉante kapablon, oni devas laborigi kaj instrui ilin, kaj atendante portempe, se ili penas, tiuokaze oni devas laŭdi ilin per premio, se ne, disciplini ilin per punado. Se ili laboras stabile, oni daŭre tenas ilin, se ne, devas forĵeti ilin.

五疾，上收而养之，材而事之，官施而衣食之，兼覆无遗。

Koncernante homojn kun kvin malsanoj, oni devas akcepti la pli bonajn el ili kaj nutri ilin, oni devas asigni al taŭguloj la laboron, donante al ili vestiĝi kaj manĝi per la ŝtata elspezo. Oni devas protekti ĉiujn kaj ne restigi ĉiujn forlasitaj.

才行反时者死无赦。夫是之谓天德，王者之政也。

Kiu kontraŭas al tempo per sia kapablo kaj konduto, tiun oni devas mortigi kaj ne pardoni. Tio estas nomata “la Ĉiela virto” aŭ “la reĝa regado”..

听政之大分：以善至者待之以礼，以不善至者待之以刑。

Ĉe la regado estas grave distingi: Kiu alvenas kun bona intenco, tiun akceptu ĝentile kun decreguloj; kiu alvenas kun malbona intenco, tiun akceptu severe kun punado.

两者分别则贤不肖不杂则英杰至，是非不乱则国家治。

Se distingi ambaŭ flankojn, tiam ne estos mikstate inter la saĝo kaj la malsaĝo kaj alvenos bravuloj, tiel do la ŝtato estos bone regata, ĉar ne malordiĝos je praveco kaj malpraveco.

若是，名声日闻，天下愿，令行禁止，王者之事毕矣。

Se tiel, nomo de la reĝo altiĝos tagon post tago, la tuta mondo deziras, ke la dekreto estu plenumata kaj la malpermeso estu observata. Tiel do la reĝa afero plenumiĝos.

凡听，威严猛烈而不好假道人，则下畏恐而不亲，周闭而不竭，若是，则大事殆乎弛，小事殆乎遂。

Ĝenerale en regado, se la estro estas tro majesta, tro severa kaj senindulga, tiam subuloj, timante lin, ne proksimiĝas al li, iĝas kaŝema kaj ne sindonema. Se tiel, la granda afero danĝere malstreĉiĝas, kaj la malgranda afero estas endanĝerigata per misaĵoj.

和解调通，好假道人而无所凝止之，则奸言并至，尝试之说锋起，若是，则听大事烦，是又伤之也。

Se la estro estas tro milda, familiara kaj indulgema, ke li ne povas bonorde subpremi la subon, tiam perturbaj opinioj ekscese leviĝos kaj arbitraj paroloj ekŝvelos. Se tiel, komplikiĝos la administrado pri grandaj aferoj kaj vundiĝos la regado.

故法而不议，则法之所不至者必废；职而不通，则职之所不及者必队。

Do oni ne povas diskuti pri leĝoj-reguloj, ke ili ne atingos la celon kaj nepre senvalidiĝos. Rilate al la administrado de funkciuloj, ankaŭ estos malglate, ke nepre enoficiĝos netaŭguloj al la posteno.

故法而议，职而通，无隐谋，无遗善，而百事无过，非君子莫能。

Se oni povas bone diskuti pri leĝoj-reguloj kaj la administrado de funkciuloj estas farata glate, tiam nenia insido restos kaŝita kaj nenia bonfarado restos forlasita, kaj ne estos eraroj en cent aferoj. Tio eblas al neniuj krom la nobla reĝo.

故公平者，职之衡也；中和者，听之绳也。

Do justeco kaj egaleco estas pesilo de la administrado de funkciuloj, neŭtraleco kaj harmonio estas lodfadeno de la regado.

其有法者以法行，无法者以类举，听之尽也；偏党而无经，听之辟也。

Kiam eblas juĝi laŭ ekzistanta leĝo, efektivigu la leĝon; kio ne troviĝas laŭ la leĝo, tion rezonu klasifikigi analogie laŭ la precedenco. Tiel plenumebblas la tasko de la regado. Partio kaj devojiĝo estas perversaj al la regado.

故有良法而乱者有之矣；有君子而乱者，自古及今，未尝闻也。

Povas esti malordiĝo spite la bonan leĝon. Sed de antikve ĝis nun mi ne aŭdas la kazon, ke estiĝus malordo spite la ekziston de nobla reĝo.

传曰：“治生乎君子，乱生乎小人。”此之谓也。

Oni diras tradicie: “Bonordo naskiĝas ĉe la nobla reĝo, malordo naskiĝas ĉe malgranduloj.” Tio esprimas mian opinion.

分均则不偏，势齐则不壹，众齐则不使。

Se averaĝus la divido, nedistingeblus; se egalus potencoj, neunuigeblus; se egalus homoamaso, ne uzeblus.

有天有地而上下有差，明王始立而处国有制。

Kiel ekzistas la ĉielo kaj la tero, tiel same ekzistas diskriminacio inter la supro kaj la subo, do klera reĝo antaŭ ĉio ekstarigas la reĝimon por administri la landon.

夫两贵之不能相事，两贱之不能相使，是天数也。

Se ekzistas du respektendaj, tiam ambaŭ ne povas kune fari aferojn. Se ekzistas du nenobelaj, ambaŭ ne povas uzi unu la alian. Tio estas nepreco de la Ĉielo.

势位齐而欲恶同，物不能澹则必争，争则必乱，乱则穷矣。

Se ekzistas potenculoj egalaj, ili deziras kaj malŝatas la saman tiom, ke ne akireblas la celata aĵo, tiel do ili nepre luktas inter si. Se ili luktas, nepre malordiĝas kaj en malordo oni mizeras.

先王恶其乱也，故制礼义以分之，使有贫富贵贱之等，足以相兼临者，是养天下之本也。

Antikvaj reĝoj malŝatis la malordon kaj tial starigis reĝimon kun dereguloj kaj distingis klasojn por ke estu varieco inter la povraj kaj la riĉaj, la nobelaj kaj la nenobelaj, kaj tiel estu sufiĉe regeblas entute kaj integre. Jen en kio kuŝas la fundamento je nutrado de la tuta mondo.

《书》曰：“维齐非齐。”此之谓也。

En la *Dokumentoj* estas dirite: “La unueco bonteniĝas nur se havante malegalecon.”⁶⁶ Tio esprimas mian opinion.

马骇舆则君子不安舆，庶人骇政则君子不安位。

Se ĉevalo ektimas la kaleŝon, la noblulo malkvietiĝas en la kaleŝo, se popolanoj timas la regadon, la reĝo sentas sin malstabila ĉe la trono.

马骇舆则莫若静之，庶人骇则政则莫若惠之。

Kiam la ĉevalo timas la kaleŝon, nenio estas pli bona ol lasi ĝin kvietita. Kiam popolanoj timas la regadon, nenio estas pli bona ol bonfari al ili.

选贤良，举笃敬，兴孝弟，收孤寡，补贫穷，如是，则庶人安政矣。庶人安政，然后君子安位。

Elekti bonan saĝulon, promocii honestan respektindan personon, rekompenci lojalan personon kun fila pietato kaj obeeman al la supro, akcepti kompleze orfojn kaj vidvinojn,

⁶⁶ Citaĵo el 尚书, 吕刑.

subteni malriĉulojn kaj mizerulojn. Tiel farate, popolanoj trankviliĝas sub la regado. Post kiam la popolanoj eksentas sin trankvilaj sub la regado, la reĝo fariĝas stabila sur la trono.

传曰：“君者，舟也；庶人者，水也。水则载舟，水则覆舟。”此之谓也。

Oni diras tradicie: “Reĝo estas boato, popolanoj estas akvo. La akvo subportas la boaton kaj la akvo renversas la boaton.” Tio esprimas mian eldiron.

故君人者欲安则莫若平政爱民矣，欲荣则莫若隆礼敬士矣，欲立功名则莫若尚贤使能矣，是君人之大节也。

Tial do, se reĝo volus pacon, nenio estas pli bona ol glatigi la regadon kaj ami popolon. Se li dezirus prosperon, nenio estas pli bona ol instigi decregulojn kaj respekti fortan personecon. Se li dezirus al si la meritoplenan renomon, nenio estas pli bona ol promocii la saĝan kaj utiligi la kapablan. Tiuj tri disciplinoj estas ja granda principo por reĝo.

三节者当，则其余莫不当矣；三节者不当，则其余虽曲当，犹将无益也。

Kiam ĉiuj tri estas ĝuste farataj, tiam aliaj aferoj per si mem ne povas esti maltrafaj. Kiam tri disciplinoj ne estas ĝuste plenumataj, tiam, eĉ se la aliaj aferoj estus farataj ne malbone, neniu profito akireblas.

孔子曰：“大节是也，小节是也，上君也。大节是也，小节一出焉，一入焉，中君也。大节非也，小节虽是也，吾无观其馀矣。”

Konfuceo diris: “Kiu sekvas la grandan principon kaj malpli grandan, tiu estas supera noblulo. Kiu, sekvante la grandan, sekvas la malpli grandan nur de tempo al tempo, tiu estas mezgrada noblulo. Kiu ne sekvas la grandan, kvankam sekvante la malgrandan, tiun mi ne atentis kaj liaj aliaj faroj ne atentindas.”

成侯，嗣公，聚敛计数之君也，未及取民也；子产，取民者也，未及为政也；管仲，为政者也，未及修礼也。

Markizo Cheng kaj duko Si estis landestroj, nur kalkulantaj la impostenspezon, ne sukcesis allogi al si popolon. Zi Chan sukcesis allogi al si popolon, sed ne sukcesis je la administrado. Guan Zhong administris, sed ne povis kulturi decregulojn.

故修礼者王，为政者强，取民者安，聚敛者亡。

Do, kiu elkulturas decregulojn, estas reĝo; kiu administras, fariĝas potenca; kiu allogas popolon, estiĝas stabila; kiu elpremas imposton, pereos.

故王者富民，霸者富士，仅存之国富大夫，亡国富筐篋，实府库。

Do, la reĝo riĉigas popolon, la potenculo riĉigas oficistojn. La ŝtato, apenaŭ ekzistanta, riĉigas nur grandan oficiston. Kiu nur riĉigas sian monkeston kaj la ŝtatan trezorejon, pereigas la landon.

筐篋已富，府库已实，而百姓贫，夫是之谓上溢而下漏。

Ju pli riĉa la monkesto, ju pli plena la ŝtata trezorejo, des pli malriĉiĝas la popolanoj,

nome, la supro iĝas plenplena kaj la subo restas malplena pro tralikiĝo.

入不可以守，出不可以战，则倾覆灭亡可立而待也。

Tiam ne eblas gardi ene de la kastelo, kaj ekstere ne eblas militi, sed endas nur starante atendi disfalon kaj pereon.

故我聚之以亡，敌得之以强。

Tiel do, amasiginte mi pereas per si mem, kaj malamikoj, preninte la mian, fortiĝas.

聚敛者，召寇，肥敌，亡国，危身之道也，故明君不蹈也。

Kiu elpremas troan impostojn, tiu, invitante la agreson, grasigas la malamikojn pli dikaj kaj pereigas sian landon, kondukas sin al danĝera vojo. Tial klera reĝo ne alpaŝas tien.

王夺之人，霸夺之与，强夺之地。

Reĝo gajnas homojn, hegemoniulo gajnas kunulojn, fortulo gajnas terojn.

夺之人者臣诸侯，夺之与者友诸侯，夺之地者敌诸侯。

Gajninto de homoj faras landestrojn vasaloj, gajninto de kunuloj faras landestrojn amikoj, gajninto de terojn faras landestrojn malamikoj.

臣诸侯者王，友诸侯者霸，敌诸侯者危。

Kiu faras landestrojn vasaloj, tiu estas reĝo; kiu faras landestrojn amikoj, tiu estas hegemoniulo; kiu faras landestrojn malamikoj, tiu estas endaĝerigita.

用强者，人之城守，人之出战，而我以力胜之也，则伤人之民必甚矣。

Se iu apogas sin sur forto, kiam la alia defendas la remparon aŭ ekbatalas, tiu devas venkobati per forto la alian kaj nepre ege vundi la alies popolon.

伤人之民甚，则人之民恶我必甚矣；人之民恶我甚，则日欲与我斗。

Se vundi ege la alies popolon, la alies popolo nepre ege malamos min; se la alies popolo ege malamas min, ili iam volus batali kontraŭ mi.

人之城守，人之出战，而我以力胜之，则伤吾民必甚矣。

Kiam la alia defendas la remparon aŭ ekbatalas, mi devas per forto venkobati lin, tiam nepre ege vundiĝos ankaŭ mia popolo.

伤吾民甚，则吾民之恶我必甚矣；吾民之恶我甚，则日不欲为我斗。

Se mia popolo ege vundiĝis, ankaŭ mia popolo nepre ege ekmalamas min; se mia popolo ege malamas min, iam ili ne dezirus ekbatali por mi.

人之民日欲我斗，吾民日不欲为我斗，是强者之所以反弱也。

Kiam alies popolo iam dezirus ekbatali min, sed mia popolo tiam ne dezirus batali por mi, tiam mia forteco ŝanĝiĝos en malfortecon.

地来而民去，累多而功少，虽守者益，所以守者损，是以大者之所以反削也。

Eĉ se estu gajnita la tero, de kie la popolo foriris, tiam kontraŭ multa laciĝo malmultas

la merito. Eĉ se estu mobilizitaj la garnizonoj, senvaloriĝas io defendinda. Jen en kio kuŝas la kialo de malfortiĝo por la pligranda.

诸侯莫不怀交接怨而不忘其敌，伺强大之间，承强大之敝，此强大之殆时也。

Landestroj, kvankam ne ĉesigante la interrilaton, restas vengemaj kaj ne forgesas la malicon. Ili gvatas malfortan spacon kaj konsumiĝon de la granda potenc-regno. Tio estas ja danĝera tempo por la granda potenc-regno.

知强大者不务强也，虑以王命全其力，凝其德。

Kiu scias fortecon, tiu ne klopodas per forto. Li tutforte strebas al la reĝa mandato kaj diligente kulturas la virton.

力全则诸侯不能弱也，德凝则诸侯不能削也，天下无王霸主则常胜矣。

La perfektan forton landestroj ne povas malfortigi, la kulturatan virton landestroj ne povas estingi. Dum en la mondo ne troviĝas alia reĝo aŭ hegemoniulo, li venkas ĉiam. Is know the strong之道也。

Ĉar li scias la vojon de fortulo.

彼霸者不然，辟田野，实仓廩，便备用，案谨募选阅材伎之士，然后渐庆赏以先之，严刑罚以纠之。

La vera hegemoniulo ne estas tia. Li kultivebligas kampojn, plenigas grenejojn, plibonigas instrumentojn konvenaj, skrupule planas, rekrutigas kaj elektas kapablajn personojn kaj artistojn, kaj aldone, aprezas ilin antaŭ ĉio per laŭdado, kaj punas severe krimojn por la korektado.

存亡继绝，卫弱禁暴，而无兼并之心，则诸侯亲之矣；修友敌之道以敬接诸侯，则诸侯说之矣。

Li savas perdiĝanton, lasante lin plu ekzisti, kaj gardas la malfortan, detenante la forton de lia arbitro. Kaj li ne havas intencon aneksi ĉiujn, do landestroj alproksimiĝas al li. Li prenas la vojon ŝanĝi la malamikon en la amikon kaj kun respekto rilatas al landestroj, do la landestroj tre ĝojas je tio.

所以亲之者，以不并也，并之见则诸侯疏矣；所以说之者，以友敌也，臣之见则诸侯离矣。

Ili alproksimiĝas, ĉar li ne aneksas. Se ili vidus la intencon de la aneksado, ili malproksimiĝas de li. Ili estas ĝojaj, ĉar li traktas malamikojn kiel amikojn. Se la landestroj vidus en li ian intencon de subnetigi, ili forirus de li.

故明其不并之行，信其友敌之道，天下无王霸主，则常胜矣。是知霸道者也。

Tiel do, se li per sia konduto montras klare, ke li havas nenian intencon aneksi, kaj se ili kredas, ke li prenas la vojon trakti la malamikon kiel amikon, tiuokaze li ĉiam venkas, nur se ne troviĝas la alia reĝo aŭ hegemoniulo. Ĉar li scias la vojon de hegemonio.

闵王毁于五国，桓公劫于鲁庄，无它故焉，非其道而虑之以王也。

La reĝo Min estis frakasita de kvin landoj, kaj la duko Huan estis perforte devigita de la duko Zhuang de Lu-regno.⁶⁷ En tio estis kialo, ke ili ne prenis la vojon, zorgante pri sia reĝeco.

彼王者不然，仁眇天下，义眇天下，威眇天下。

Ĉe la vera reĝo ne estas tiel. La bonvoleco disvastiĝas tutmonde, la justo disvastiĝas tutmonde, la majesteco disvastiĝas tutmonde.

仁眇天下，故天下莫不亲也；义眇天下，故天下莫不贵也；威眇天下，故天下莫敢敌也。

Ĉar la bonvoleco tutmondiĝase, oni en la mondo ne devas ne proksimiĝi. Ĉar la justo tutmondiĝas, oni en la mondo ne devas ne esti nobla. Ĉar la majesteco tutmondiĝas, oni en la mondo ne aŭdacas kontraŭstari.

以不敌之威，辅服人之道，故不战而胜，不攻而得，甲兵不劳而天下服。是知王道者也。

Estante majesta sen kontraŭuloj, prenante la vojon por lasi homojn submetiĝi, li venkas sen batali, akiras sen ataki. Dum li ne lacigas armitajn soldatojn, la mondo submetiĝas, ĉar li scias la Reĝan Vojon.

知此三具者，欲王而王，欲霸而霸，欲强而强矣。

Kiu scias la tri supremenciitajn, tiu fariĝas la reĝo, se volus; fariĝas la hegemoniulo, se volus; fariĝas potenculo, se volus.

王者之人：饰动以礼义，听断以类，明振毫末，举措应变而不穷。

Homo de la vera reĝo – ornamas la konduton per decreguloj kaj justo, juĝas proceson laŭ la klasifiko de jurisprudencoj, klarigas explore detalojn ĝisfunde, agadas ĝuste konforme al la cirkonstanco senlime kaj ne elĉerpiĝas.

夫是之谓有原。是王者之人也。

Li estas, t. n. havanto de la principo. Jen tia estas la homo de la reĝo.⁶⁸

王者之制：道不过三代，法不贰后王。

Reguloj de la reĝo – koncerne de la vojo ne retroiras ĝis antaŭ tri dinastioj, koncerne de la leĝoj ne devias de la lastaj reĝoj.

道过三代谓制荡，法贰后王谓之不雅。

Se rilate al la vojo ili retroirus ĝis antaŭ la tri dinastioj, tio estas nomata 'malprudenteco'. Se rilate al la leĝoj ili devius de la lastaj reĝoj, tio estas nomata 'maleleganteco'.

⁶⁷ La reĝo Min, alinome 湣, estis la reĝo de Qi-regno, fuĝis al la urbo Ju 莒, kiam generalo 乐毅 kun soldatoj de Yan, Zhao, Chu, Wei, Qin, atakis Qi-on en sia 40-a jaro de surtroniĝo. La reĝo Huan en sia 5-a jaro de surtroniĝo, redonis al la reĝo Zhuang la akiritan teritorion, minacate de la subulo de Zhuang 曹沫 per glaveto.

⁶⁸ Iu prenas la vorton 王者之人 kiel reĝon mem, la alia – subulo de reĝo.

衣服有制，宫室有度，人徒有数，丧祭械用皆有等宜，声则凡非雅声者举废，色则凡非旧文者举息，械用则凡非旧器者举毁。

Koncerne al vestaĵoj estas ankaŭ reguloj, al reĝa familio estas iu skalo, al laboruloj estas iu cifero, al ĉiuj instrumentoj por funebro, ritoj kaj festo estas iu oportuneco. Rilate al kantoj, se ili ne estas elegantaj, devas esti forĵetitaj; al koloroj, se ili ne laŭas antikvajn desegnojn, devas esti forigitaj; al la instrumentoj, se ili ne konformas al la antikvaj, devas esti detruitaj.

夫是之谓复古。是王者之制也。

Tio estas, t. n. Restaŭro, kiu estas ja la reĝa regulo.

王者之论：无德不贵，无能不官，无功不赏，无罪不罚，朝无幸位，民无幸生，尚贤使能而等位不遗，析愿禁悍而刑罚不过，百姓晓然皆知夫为善于家而取赏于朝也，为不善于幽而蒙刑于显也。

La principo de reĝo – Kiu ne estas virta, tiu ne estas altetaksata; kiu ne estas kompetenta, tiu ne estas enoficigata; kiu ne meritas, tiu ne estas laŭdata; kiu ne kulpas, tiu ne estas punata. En registaro neniu oficisto okupas la rangon nur laŭ bonsorto, neniu popolano akiras la vivrimedon nur laŭ bonsorto. La saĝaj estas honorataj, la kapablaj estas uzataj, kaj al ĉiu estas asignata la taŭga posteno, ne preterlasate. Selekti la honestan kaj inhibicii la krudan, kaj ne troas la punado. Ĉiu el multaj popolanoj klare scias fari bonon por sia familio kaj ricevas laŭdon de la registaro. Kiu faras malbonon kaŝite, estas punata malkaŝite.

夫是之谓定论。是王者之论也。

Jen estas, t. n. la fiksa principo. Tio estas ja la reĝa principo.

王者之等赋，政事，财万物，所以养万民也。

Reĝa impostpolitiko, administrado, financo, por nutri la tutan popolon.

田野什一，关市几而不征，山林泽梁以时禁发而不税，相地而衰政，理道之远近而致贡，通流财物粟米，无有滞留，使相归移也。

Kolekti imposton de kampo je dekono, ne tarifoj ĉe bariero de limo kaj ĉe merkato, nur inspektante. Ne impostoj ĉe montoj-arbaroj kaj ĉe nasoj, nur laŭtempe permesante kaj malpermesante. Laŭ tera fekundeco diferencigi la imposton, asigni la tributon laŭ la distanco, ĉu malproksima aŭ proksima, glate cirkuligi varojn kaj grenojn reciproke al diversaj lokoj sen ajna stagnado.

四海之内若一家，故近者不隐其能，远者不疾其劳，无幽闲隐僻之国莫不趋使而安乐之。

Tiel la tuta mondo fariĝas unu familio, do la proksimaj elmontras sian kapablon senkaŝe, la malproksimuloj klopodas labori senlace. Eĉ foraj landoj el profundaj

provincoj haste turnas sin servi al la reĝo kaj kontente ĝuas la pacon.

夫是之为人师。是王者之法也。

Oni faras lin la majstro por homoj. Tio estas ja la reĝa leĝo.

北海则有走马吠犬焉，然而中国得而畜使之；南海则有羽翮，齿革，曾青，丹干焉，然而中国得而财之；东海则有紫，紘，鱼，盐焉，然而中国得而衣食之；西海则有皮革，文旄焉，然而中国得用之。

Ĉe la Norda maro ja vagas la ĉevaloj kaj vojas la hundoj, sed la Centra Ŝtato akiras, bredas kaj uzas ilin. Ĉe la Suda maro ja estas birdaj plumoj, eburoj, feloj, verdigro, cinabro, sed la Centra Ŝtato ilin akiras kaj faras ilin trezoroj. Ĉe la Orienta maro ja estas purpura tinkturo, blanka silko, fiŝoj, salto, sed la Centra Ŝtato ilin akiras, vestiĝas kaj manĝas. Ĉe la Okcidenta maro ja estas feloj kaj ledoj, fajna vosto de poefago, sed la Centra Ŝtato ilin akiras kaj uzas.

故泽人足乎木，山人足乎鱼，农夫不斫削，不陶冶而足械用，工贾不耕田而足菽粟。

Tiel do al marĉaj homoj sufiĉas arboj kaj lignoj, al montaj homoj sufiĉas fiŝoj, al kamparanoj por uzi aparatojn necesas ne haki-ĉizi, nek bakargili nek metaligi, al metiistoj kaj komercistoj sen terkulturi sufiĉas faboj-grenoj.

故虎豹为猛矣，然君子剥而用之。

Eĉ el tigroj kaj leopardoj ferocaj nobluloj faras felojn kaj uzas ilin.

故天之所覆，地之所载，莫不尽其美，致其用，上以饰贤良，下以养百姓而安乐之。

Do ĉion ajn, la senlime belegan, kion la Ĉielo kovras kaj la tero portas, oni ekspuatas – supre ornamente saĝulojn kaj bonulojn, sube nutrante popolanojn en komforteco.

夫是之谓大神。

Tio estas nomata la Granda Dieco.

《诗》曰：“天作高山，大王荒之。彼作矣，文王康之。”此之谓也。

En la Poezio estas dirite: “La Ĉielo kreis altan monton, la granda reĝo ekspluatis ĝin. Surbaze de faritaĵo, la reĝo Wen faris ĝin pace stabila.”⁶⁹ La supremenciita signifas tion.

以类行杂，以一行万，始则终，终则始，若环之无端也，舍是而天下以衰矣。

Per klasifiko laŭ kategorioj aranĝi diversajojn en ordo, per unututeco aranĝi miriadon en ordo. La komenco ja estas la fino, la fino ja estas la komenco, samkiel ĉe cirklo sen ekstremo. Sen tiu principo la mondo kadukiĝos.

天地者，生之始也；礼义者，治之始也；君子者，礼义之始也。

La Ĉielo kaj la tero estas la komenco de vivo; decreguloj kaj justo estas la komenco de

⁶⁹ Citata el 诗经，周颂，天作。la granda reĝo 王 estas 古公亶父，avo de la reĝo Wen.

regado; nobla persono estas la komenco de decreguloj kaj justo.⁷⁰

为之，贯之，积重之，致好之者，君子之始也。

Konduiti laŭ tio, efektiviĝi tion konsekvence, akumuli tion kaj elkore ŝategi tion – estas la komenco de la nobla persono.

故天地生君子，君子理天地。

Tiel la Ĉielo kaj la tero naskas la noblan personon, kaj la nobla persono komprenas racion de la Ĉielo.

君子者，天地之参也，万物之总也，民之父母也。

Nobla persono kune kun la Ĉielo kaj la tero konsistigas la triadon, kaj estas la sintezo de ĉiuj estaĵoj, kaj estas gepatroj por la popolo.

无君子则天地不理，礼义无统，上无君师，下无父子，夫是之谓至乱。

Sen la nobla persono mankas la kompreno pri racio de la Ĉielo kaj la tero, mankas la unueco de decreguloj kaj justo, supre ne troviĝas reĝo-majstro, sube ne troviĝas patro-filo – t. e. ĉio disfalos, t. n., en la plejan ĥaoson.

君臣，父子，兄弟，夫妇，始则终，终则始，与天地同理，与万世同久，夫是之谓大本。

Reĝo kaj subuloj, patro kaj filo, pliaĝa frato kaj plijuna frato, edzo kaj edzino, – en ĉio la komenco estas ja la fino kaj la fino estas ja la komenco, do troviĝas la sama leĝo, kiel en la Ĉielo kaj la tero, la sama eterneco, kiel en dek mil generacioj. Tio estas ja, t. n. la Granda Fundamento.

故丧祭，朝聘，师旅一也，贵贱，杀生，与夺一也。

Troviĝas la unututeco ankaŭ inter funebro kaj ceremonio, regado kaj diplomatio, militaj aferoj; troviĝas la unututeco inter nobeloj kaj malnobeloj, morto kaj vivo, fordono kaj forpreno.

君君，臣臣，父父，子子，兄兄，弟弟一也，农农，士士，工工，商商一也。

La unututeco signifas, ke reĝo devas konduki kiel reĝo, subulo – kiel subulo, patro – kiel patro, filo – kiel filo, pliaĝa frato – kiel la pliaĝa, plijuna frato – kiel la plijuna. Kaj la unututeco ankaŭ signifas, ke terkulturisto devas konduki kiel terkulturisto, klerulo – kiel klerulo, metiisto – kiel metiisto, komercisto – kiel komercisto.

水火有气而无生，草木有生而无知，禽兽有知而无义，人有气，有生，有知，亦且有义，故最为天下贵也。

Akvo kaj fajro havas *Qron*, sed ne havas vivon. Herboj kaj arboj havas la vivon, sed ne havas konscion. Bestoj kaj birdoj havas la konscion, sed ne havas juston. Homo

⁷⁰ Ĉi tie mi tradukis la terminon *Junzi* 君子 per nobla persono. Ĝenerale ĝi estas tradukata kiel reĝo aŭ noblulo. Laŭ Wang Chongfang – noblulo, virtulo, ĝentilhomino k. a. En la angla trraduko estas uzata la termino *gentleman*.

havas *Qí*-on, la vivon, la konscion, kaj ankaŭ la juston, do estas la plej nobla en la mondo.

力不若牛，走不若马，而牛马为用，何也？ 曰：人能群，彼不能群也。

Je la forto homo estas malpli kapabla ol bovo, je la kurado li estas malpli kapabla ol ĉevalo. Sed li uzas la bovon kaj la ĉevalon, kial? Mi diras, ke homoj povas fari komunan socion, la aliaj ne povas fari la komunan socion.

人何以能群？ 曰：分。分何以能行？ 曰：义。

Kial homoj povas fari la socion? Mi diras: “Pro la kapablo distingi kaj dividi.” Kial la distingo kaj divido povas bone funkcii por la socio? Mi diras: “Pro la justo.”⁷¹

故义以分则和，和则一，一则多力，多力则强，强则胜物，故宫室可得而居也。

Do la justo pere de la socia distingo kaj divido faras la akordon. la akordo faras unuigon, la unuigo faras multe da forto, kaj la multaj fortoj faras potencon, la potenco konkeras aĵojn-objektojn, do estas akireblaj la palacoj kaj ĉambroj, kie oni povas loĝi.

故序四时，裁万物，兼利天下，无它故焉，得之分义也。

Tiel do sekvas en ordo la kvar sezonoj, ĉiuj estaĵoj moviĝas laŭ leĝe, la mondo profitas universale – en tio ne estas la alia kialo ol oni atingis la socion kun la distingo kaj divido laŭ justo.

故人生不能无群，群而无分则争，争则乱，乱则离，离则弱，弱则不能胜物，故宫室不可得而居也，不可少顷舍礼义之谓也。

Homoj ne povas vivi sen socio, la socio sen la distingo kaj divido falas en konflikton, la koflikto kreskas tumulto, la tumulto disigas, la disiĝo malfortigas, la malforto ne povas konkeri aĵojn, do oni ne povas akiri palacojn kaj ĉambrojn por loĝi. Tio signifas, ke oni ne devas ignori decregulojn kaj juston eĉ dum momento.

能以事亲谓之孝，能以事兄谓之弟，能以事上谓之顺，能以使下谓之君。君者，善群也。

La kapablo servi al gepatroj estas nomata “Fila Pietato”, la kapablo servi al pliaĝa frato estas nomata “Devo de plijuna frato”, la kapablo servi al la supro estas nomata “Obeo”, la kapablo uzi la subon estas nomata “Sinjoreco”. Sinjoro faras la socion bona.

群道当则万物皆得其宜，六畜皆得其长，群生皆得其命。

Se la socio iras laŭ la vojo, tiam al ĉiuj estaĵoj estas konvene. Ses dombestoj ĉiuj povas kreski bone, kaj al ĉiu vivanto en la socio estas asignata la propra misio.

⁷¹ 分 estas unu el la plej gravaj konceptoj en la konfuceanismo de Xunzi. Laŭ Wang Chongfang ĝi estas Esperantigita kiel “dividi, (dis)partigi, apartigi, disigi. Xunzi konsideras la socian dividon en klasoj nepra kondiĉo por la stabila reĝimo. Kontraŭis tiun pensmanieron la mohistoj, ke ĝi estas malvasta amo, apartiganta homojn 别爱. Mozi, anstataŭe, starigis la universalan amon 兼爱 grava por paca kunekzistado de homoj. Mozi difinas “juston” kiel “profiton 利”, dum konfuceanoj aldonas al “justo” pli metafizikan valoron por akordigi homojn.

故养长时则六畜育，杀生时则草木殖，政令时则百姓一，贤良服。

Tiel do, nutrate longe, ses dombestoj kreskas; herboj kaj arboj estas plantataj ĉiam, kiam ili, mortinte, forvelkis; poplanoj estas unuigitaj per leĝo-reguloj kaj dekretoj. Kaj la saĝa-bona persono obeas lojale.

圣王之制也，草木荣华滋硕之时则斧斤不入山林，不夭其生，不绝其长也；鼃鼃，鱼鳖，鳅鱓孕别之时，罔罟毒药不入泽，不夭其生，不绝其长也；春耕，夏耘，秋收，冬藏四者不失时，故五谷不绝而百姓育馀食也；污地，渊沼，川泽谨其时禁，故鱼鳖优多而百姓用也；斩伐养长不失其时，故山林不童而百姓有馀材也。

La reĝa regulo estas jena. Dum herboj kaj arboj kreskas sukoplene, oni ne eniras kun hakiloj en arbaron, por ke ili ne mortu frue nek ekstermiĝu; dum testudoj, ŝlimtestudoj, fiŝoj kaj argiloj estas gravedaj frajtempe, oni ne eniras kun reto kaj veneno en marĉon, por ke ili ne mortu frue nek ekstermiĝu. Se oni ne preterlasas la tempon de kvar sezonoj je plugado en printempo, sarkado en somero, rikoltado en aŭtuno, rezervado en vintro, tiam kvin grenoj kaj cerealoj ne perdiĝas, ke ili nutras popolanojn ĝissate kaj restas multe. Ĝustatempe estas malpermesate fiŝadi en ŝlimejoj, lagoj, riveroj kaj marĉoj, tiel do multe da fiŝoj kaj ŝlimtestudoj abundas je dispono al popolanoj. Ĉar ne estas perdata la tempo por hakadi, plantadi kaj kreskigi, la montoj kaj arbaroj ne kalviĝas, kaj popolanoj povas havigi al si sufiĉe da lignoj.

圣王之用也，上察于天，下错于地，塞备天地之间，加施万物之上，微而明，短而长，狭而广，神明博大以至约。

Jen tia estas la uzmaniero far de la sankta reĝo. Li esploras ĉion supran laŭ la Ĉielo kaj traktas ĉion suban kombine laŭ la tero, tiel do li plenumas la taskon inter la Ĉielo kaj la tero kaj aldonas favoron sur ĉiuj estaĵoj subtile kaj klare, kurze kaj longe, malvaste kaj vaste. Lia dieca merito estas grandega kaj plej konciza.

故曰：一与一是为人者谓之圣人。

Tial do estas dirite: “Kiu donas al homoj favoron unu post la alian, tiu estas nomata la sanktulo.”⁷²

序官：宰爵知宾客，祭祀，飨食，牺牲之牢数，司徒知百宗，城郭，立器之数，司马知师旅，甲兵，乘白之数。

Ofica vicordo: Taskoj de *Zaijue*, intendanto – akcepti eminentajn gastojn, diservi je oferado kaj festo, okazigi bankedon, aranĝi kvanton de oferotaj bestoj. Taskoj de *Situ*,

⁷² Pri kompreno de la farazo 一与一是 estas diversaj opinioj. Iu prenas 是 por 夺 “depreni”, alia – por 统一 “unuigi”, la tria – por “esti”. Mi sekvas la trian [荀子集解上 196].

ministro por internaj aferoj – censo de loĝantaro je centoj da klanoj, bontenado de kasteloj-citadeloj, normkontrolo de iloj, ujoj kaj mezuriloj. Taskoj de *Sima*, ministro de la milito – kontrolo de divizioj kaj brigadoj en armeo, kono pri nombroj de ekipaĵoj, armiloj, ĉaroj kaj standardoj.

修宪命，审诗商，禁淫声，以时顺修，使夷俗邪音不敢乱雅，大师之事也。

Taskoj de *Dashi*, granda mastro de muziko, estas korekti leĝojn kaj dekretojn, observi poezion kaj melodion, malpermesi volupteman kanton, korekti ilin konforme al la tempo, kaj malhelpi iun barbaran, vulgaran, malĉastan muzikon konfuzi la fajnecon de moro.⁷³

修堤梁，通沟浚，行水潦，安水臧，以时决塞，岁虽凶败水旱，使民有所耘艾，司空之事也。 Taskoj de *Sikong*, ministro de laboro por civilinĝenieraj aferoj, estas ripari digojn, pontojn, nasojn, trapasigi kanaletojn, drenadi defluilojn, gardi akvorezervejojn, reguligi akvofluon konforme al la tempo, kaj lasi popolanojn terkultivadi spite sterilegon, inundon aŭ sekegon.

相高下，视肥瘠，序五种，省农功，谨蓄藏，以时顺修，使农夫朴力而寡能，治田之事也。

Taskoj de direktoro pri terkulturaj aferoj estas inspekti nivelon de farmoj ĉu alta aŭ malalta, superrigardi fekundecon de tero, lasi semadi kaj plantadi kvin cerealajn bonorde, observi terkulturadon, prizorgi konservadon kaj rezervadon de grenoj, bone kontroli konforme al la tempo, kaj lasi terkulturistojn diligente labori kaj malkonsumi kapablon.

修火宪，养山林藪泽草木鱼鳖百索，以时禁发，使国家足用而财物不屈，虞师之事也。

Taskoj de *Yushi*, mastro por provizado, estas protekti kontraŭ fajro, nutri arbaron, arbustojn, marĉojn, herbojn, fiŝojn, testudojn kaj centojn da legomoj, iam malpermesante ekspluati ilin konforme al la tempo, kaj doni al la regno sufiĉe da provizaĵoj senĉese.

顺州里，定廛宅，养六畜，闲树艺，劝教化，趋孝弟，以时顺修，使百姓顺命，安乐处乡，乡师之事也。

Taskoj de *Xiangshi*, vilaĝmastro, estas akordigi loĝantaron en distrikto aŭ provinco, difini al loĝantaro loĝejojn, nutri ses dombestojn, stimuli hortikulturadon por libera tempo, instigi edukadon, subteni filan pietaton kaj obeemon al pliaĝuloj, modifante tion konforme al la tempo, kaj lasi popolanojn obei al ordonoj kaj doni al sia propra vilaĝo pacon kaj feliĉon.

论百工，审时事，辨功苦，尚完利，便备用，使雕琢文采不敢专造于家，工师之事也。

Taskoj de *Gongshi*, mastro por metioj, estas okupiĝi pri centoj da metiistoj, esplorante taŭgan tempon kaj aferon, distingante meriton kaj malmeriton, strebi perfektecon kaj

⁷³ Ofte montriĝas la frazo 以时顺修 (korekti konforme al la tempo). Tio signifas, ke Xunzi esprimas sian opinion kun fleksebleco, konvene al ĉiu situacio.

profiton, prepari ion utilan, fari tian ekstraordinarajn skulptaĵon, ĉizaĵon kaj desegnaĵon, ke oni ne povus mem krei en sia hejmo.⁷⁴

相阴阳，占禘兆，钻龟陈卦，主攘择五卜，知其吉凶妖祥伛巫，跛击之事也。

Taskoj de ĝibaj aŭguristinoj kaj lamaj aŭguristoj estas observadi *yin* kaj *yang*, diveni la influon sur sorton, aŭguri per bakado de testuda karapaco, elekti la ĉefon el kvin prognozoj kaj sciigi bonan aŭ malbonan, strangan aŭ feliĉan antaŭsignon.

修採清，易道路，谨盗贼，平室律，以时顺修，使宾旅安而货财通，治市之事也。

Taskoj de urbestroj estas ripari tombojn kaj necesejojn, faciligi vojojn kaj stratojn, subpremi ŝtelistojn kaj rabistojn, stabiligi luprezojn de loĝejoj, korektante tion konforme al la tempo, doni al gastoj pacan vojaĝon kaj cirkuligi monon kaj varojn.

抃急禁悍，防淫除邪，戮之以五刑，使暴悍以变，奸邪不作，司寇之事也。

Taskoj de *Sikou*, justicestro, estas bati ekstremon kaj malpermesi brutalaĵojn, preventi malĉastecon kaj elimini volupton, puni la krimojn per kvin specoj de punado, kaj tiel fari violentulojn kaj brutalojn ŝanĝiĝi, malhelpi kanaĵojn fari malbonon.

本政教，正法则，兼听而时稽之，度其功劳，论其庆赏，以时慎修，使百吏免尽而众庶不偷，冢宰之事也。

Taskoj de *Zhongzai*, grandestro pri tomboj, estas laŭ principo de politika instruo rektigi leĝojn, universale aŭskultante la opiniojn kaj prizorgante ĝustatempe, taksi meritulojn kaj honori ilin per ordeno, skrupule korektante tion konforme al la tempo, lasi centon da oficistoj servi diligente kaj ne lasi popolanojn mallaboremaj.

论礼乐，正身行，广教化，美风俗，兼覆而调一之，辟公之事也。

Taskoj de landestroj estas laŭ decreguloj kaj muziko rektigi ĉe si konduton-agmanieron, disvastigi instruon, beligi moron, kaj tiel universale kovri la landon per tio kaj harmonie unuigi.

全道德，致隆高，綦文理，一天下，振毫末，使天下莫不顺比从服，天王之事也。

Taskoj de la ĉiela reĝo estas fari la vojon-virton perfekta, plejeble prospera kaj alta, kaj pere de literaturo kaj racio unuigi la subĉielan mondon, skrupule observante ĝis detaloj, lasi la mondon ne malobei nek kontraŭi.

故政事乱，则冢宰之罪也；国家失俗，则辟公之过也；天下不一，诸侯俗反，则天王非其人也。

Ke okazas politika tumulto, en tio kulpas grandestro de tomboj; ke perdiĝas la moro en la lando, tio rezultas el miso far de landestroj; en la mondo mankas la unueco, tumultas landestroj kaj popolanoj pro tio, ke la ĉiela reĝo ne estas taŭgulo por la tasko.

具具而王，具具而霸，具具而存，具具而亡。

⁷⁴ Multaj esploristoj prenas la frazon 不敢专造于家 por alia signifo, ke popolanoj mem ne produkti tiujn aĵojn laŭplaĉe hejme.

Ekipite per kondiĉoj, ekzistas la reĝo; ekipite per kondiĉoj ekzistas la hegemoniulo; per kondiĉoj oni ekzistas, per kondiĉoj oni pereas.

用万乘之国者，威强之所以立也，名声之所以美也，敌人之所以屈也，国之所以安危臧否也，制与在此，亡乎人。

Kiu regas la regnon kun dek mil militĉaroj, tiu povas stari majesta kaj forta, beligi sian famon, subigi malamikojn. Paco aŭ krizo, bono aŭ malbono por la lando estaas determinita de tio, ne de la alia.

王，霸，安存，危殆，灭亡，制与在我，亡乎人。

Paca ekzistado, danĝero, pereado de reĝo kaj hegemoniulo dependas de mi mem, ne de la alia.

夫威强未足以殆邻敌也，名声未足以县天下也，则是国未能独立也，岂渠得免夫累乎！

Dum la majesteco kaj forto ne sufiĉas por endanĝerigi najbarajn malamikojn, dum la fameco ne sufiĉas por kovri la mondon, la lando ankoraŭ ne kapablas memstari, do kiel al ĝi eblus eviti embarason?

天下胁于暴国，而党为吾所不欲于是者，日于桀同事同行，无害为尧，是非功名之所就也，非存亡安危之所堕也。

Kiam la mondo estas minacata de brutale potencaj regnoj, se iu, alligante unu partion, farus kion li mem ne volus, tiam li devas fari la samon, kion faris Jie. Eĉ se tio ne malhelpus al li fariĝi Yao, tamen li ne povos atingi meriton kaj famon, nek povos postvivi trans danĝeron de sia pereado aŭ degenero.

功名之所就，存亡安危之所堕，必将于愉殷赤心之所。

Atingeblas merito kaj famo ne tiam, kiam la paca ekzisto estas endanĝerigita en degenero, sed nepre tiam, kiam sincere simpla koro ĝojas plene.

诚以其国为王者之所，亦王；以其国为危殆灭亡之所，亦危殆灭亡。

Kie la lando faras sincere por la reĝo, tie povas stari la reĝo; kie la lando inklinas al danĝero kaj al pereado, tie ĝi endanĝerigite detruigis kaj pereos.

殷之日，案以中立无有所偏而为纵横之事，偃然案兵无动，以观夫暴国之相卒也。

En siaj prosperaj tagoj oni sekve povas teni sin neŭtrala kaj sendevia inter la vertikala kaj la horizontala aliancoj, povas sekve, estante trankvila, ne mobilizi sian armeon kaj povas nur observi, kiel agresemaj landoj interbatalas reciproke unu kontraŭ la alia.

案平政教，审节奏，砥砺百姓，为是之日，而兵剽天下劲矣；案然修仁义，伉隆高，正法则，选贤良，养百姓，为是之日，而名声剽天下之美矣。

Se oni faras sian ĉiutagan taskon glatigi regadon kaj politikon, prizorgi ritmon de decreguloj kaj muziko, trejnadi kaj eduki popolanojn, oni povas krei sian armeon la plej

forta en la mondo. Se oni faras ĉiutagan taskon ellerni bonvolecon kaj juston bonorde, respekti alte decregulojn, ĝustigi leĝojn, elekti la saĝajn kaj la bonajn kaj nutri popolanojn, tiam oni kun sia glora reputacio povas atingi la mondiskalan belecon .

权者重之，兵者劲之，名声者美之。

Tiel oni povas fari la potencon prestiĝa, la armeon forta kaj la famon bela.

夫尧，舜者，一天下也，不能加毫末于是矣。

Yao kaj Shun, unuigintaj la mondon, ne povus aldoni al tia afero eĉ hareton.

权谋倾覆之人退，则贤良知圣之士案自进矣；刑政平，百姓和，国俗节，则兵劲城固，敌国案自诘；务本事，积财物，而勿忘栖迟薛越也，使群臣百姓皆以制度行，则财物积，国家案自富矣。

Post kiam eksiĝis intrigantoj kaj uzurpintoj, promociiĝos saĝaj, intelektaj kaj sanktaj personoj. Punjuroj kaj administrado glatiĝos, cent klanoj akordiĝos, la lando kaj popolanoj ordiĝos decaj kun disciplinoj, tial do iĝos la armeo tiom forta kaj la kastelo tiom firma, ke malamikaj landoj sekve ne aŭdacus interveni. Ĉiu plenumos sian ĉefan taskon, akumulante trezoron, ne forgesante vivteni sin modeste-ŝpareme, kaj vasaloj, ministroj kaj popolanoj – ĉiuj kondutos laŭ la certa sistemo, akumulante trezoron kaj provizaĵojn, tiel do la ŝtato fariĝos riĉa per si mem.

三者体此而天下服，暴国之君案自不能用其兵矣。何则？彼无与至也。

Se tri tavoloj estos tiaj, tiam la tuta mondo obeos, kaj eĉ reĝo de agresema lando mem ne povus ekmovi sian armeon. Kial? Kune kun li volus agi neniu.

彼其所与至者，必其民也，其民之亲我也欢若父母，好我芳若芝兰；反顾其上则若灼黥，若仇讎。

Kun li devus agi nepre lia popolo, se la popolo rigardus lin kiel patron kaj patrinon, amante lin kvazaŭ aroman orkidon. Sed male, se li estas rigardata kiel ekzekuciisto per brulŝtampado aŭ pun-tatuado, rigardata kiel malamikego?

彼人之情性也虽桀，跖，岂有肯为其所恶贼其所好者哉！彼以夺矣。

Eĉ se iu popolano havus saman inklinon kiel de tirano Jie aŭ rabisto Zhi, ĉu li povus obei al tiu kanajlo-rabisto agresi la sian amatan? Ankaŭ li estas rabita viktimo.⁷⁵

故古之人有以一国取天下者，非往行之也，修政其所莫不愿，如是而可以诛暴禁悍矣。

El inter antikvuloj troviĝis unu lando, kies estro prenis la mondon, sed li ne iris eksteren fari tion. Li korektis la administradon de sia lando per ne nedezirata maniero. Tiel do al li iĝis eble akuzi kruelulojn kaj malhelpi brutalojn.

故周公南征而北国怨，曰：“何独不来也？”

⁷⁵ Multaj esploristoj komprenas la frazon 彼以夺矣 alie, por ekzemplo: “La vera reĝo kaptis lian koron.”[荀子集解 204]

Kiam la duko Zhou militiris suden, nordlandanoj plendis, dirante: “Kial do li ne venos al ni?”

东征而西国怨，曰：“何独后我也？”

Kiam li militiris orienten, okcidentlandanoj plendis, dirante: “Kial do li postlasis nin?”

孰能有与是斗者与？安以其国为是者王。

Kiu do povus kontraŭstari por lukti tiun personon? La reĝo estas tiu, kiu faras sian regnon tia.

殷之日，安以静兵息民，慈爱百姓，辟田野，实仓廩，便备用，安谨募选阅材伎之士；然后渐赏庆以先之，严刑罚以防之，择士之知事者使相率贯也，是以厌然畜积修饰而物用之足也。

En la tagoj de prospero, mi lasas soldatojn kvietaj kaj popolon ripozi, korfavoras popolanojn, kultivebligas kampojn, plenigas proviztenejojn, preparas ilojn, skrupule varbas kaj elektas personojn kapablajn je teknikoj kaj artoj; kaj unue per laŭdado kolektas ilin kaj supergardas ilin per punado. Elektante personojn, taŭgajn por administrado, mi lasas ilin gvidi kaj aranĝi la aferojn. Per tio esblas akumuli percize sufiĉe la aĵojn por ornamoj kaj la vivnecesajojn.

兵革器械者，彼将日日暴露毁折之中原，我今将修饰之，拊循之，掩盖之于府库；货财粟米者，彼将日日栖迟薛越之中野，我今将畜积并聚之于仓廩；材之股肱，健勇爪牙之士，彼将日日挫顿竭之于仇敌，我今将来致之，并阅之，砥砺之于朝廷。

Rilate al armiloj, militekipaĵoj kaj bataliloj, la aliulo ĉiam tagon post tago elmontras kaj detruadas ilin meze de batalkampo, mi nun ilin bontenas, poluradas, kaj kovras ilin en arsenalo. Varojn, trezorojn, setariojn kaj grenojn li ĉiutage malŝparas sur la batalkmpoj de Xue kaj Yue landoj, sed mi nun kolektas kaj akumulas ilin en la provizejoj. Dum personojn fidelajn, bravajn kaj fortajn ili ĉiutage detruas kaj miskonsumas en bataloj kontraŭ malamikoj, mi nun venigas ilin al mi, revuas ilin kaj plenpoluras ilin en mia kortego.

如是，则彼日积敝，我日积完；彼日积贫，我日积富；彼日积劳，我日积佚。

Tiel do, dum li konsumigas ĉiutage, mi ĉiutage perfektigas. Dum li ĉiutage malriĉigas, mi ĉiutage riĉigas. Li ĉiutage laciigas, mi ĉiutage amuzas min.

君臣上下之间者，彼将厉厉焉日日相离疾也，我今将顿顿焉日日相亲爱也，以是待其敝。

Koncerne interrilaton de estro kaj vasaloj, de supro kaj subo, ĉe li disiĝas ili grave unuj de la aliaj tagon post tago, sed ĉe mi nun ĉiun tagon ili intimiĝas profunde unuj kun la aliaj, atendante ellaciĝon de malamikoj.

安以其国为是者霸。

Kiu faras sian regnon tia, estas ja hegemoniulo.

立身则从佣俗，事行则遵佣故，进退贵贱则举佣士，之所以接下之人百姓者则庸寬惠，如是者则安存。

Estas iu, kiu sintenas persiste laŭ vulgareco, okupiĝas pri administrado obstine laŭ la antaŭa precedenco, promocias banalajn homojn en la personara aranĝo de la nobla kaj la malnobla, kaj traktas la subulojn kaj popolanojn kun ordinara indulgo kaj favoro. Al tiu eblus nur ekzistadi.

立身则轻楛，事行则蠲疑，进退贵贱则举佞倖，之所以接下之人百姓者好取侵夺，如是者危殆。

Estas iu, kiu sintenas facilanima kaj kruda. okupiĝas pri la administrado vermaĉe kaj suspekteme, promocias flatulojn kaj spritaĉulojn en la personara aranĝo de la nobla kaj la malnobla, kaj traktas la subulojn kaj popolanojn por forrabadi kaj ekspluatadi ilin. Al tiu estas danĝere ekzisti.

立身则僇暴，事行则倾覆，进退贵贱则举幽险诈故，之所以接下之人百姓者，则好用其死力矣，而慢其功劳，好用其籍敛矣，而忘其本务，如是灭亡。

Estas iu, kiu sintenas aroganta kaj violenta, renversas kaj pereigas la aferojn je administrado, promocias intrigantojn kaj trompantojn en la personara aranĝo de la nobla kaj la manobla, traktas la subulojn kaj popolanojn por ekspluati liajn fortojn ĝis morto, rekompencas ilin por ilia merito per nenio, kaj nur ŝatas elpreni de ili la pezan imposton, forgesante sian ĉefan taskon. Al tiu estas destinite nur pereii.

此五等者，不可不善择也，王霸，安存，危殆，灭亡之具也。

Oni ne devas ne elekti la preferindan el tiuj kvin specoj de regantoj: reĝa, hegemonia, gardema por kvieta ekzistado, danĝeriga aŭ pereiga.

善择者制人，不善择人制之；善择之者王，不善择之者亡

Per bona elekto eblas regi homojn, per malbona elekto devus esti regate de homoj. Kiu elektas la bonon, fariĝas reĝo, kaj kiu elektas la malbonon, pereas.

夫王者之与亡者，制人之与人制之也，是其为相县也亦远矣。

Inter la reĝo kaj la pereanto, inter reganto de homoj kaj regato de homoj – la diferenco estas granda.

10 富国

RIĈIGO DE ŜTATO

万物同宇而异体，无宜而有用为人，数也。

Ĉiuj estaĵoj, ekzistante en la sama kosmo, inter si diferencas je sia korpo, kaj ĉiu el ili, ne monopolante al si la plejecon je valoro, utilas por homoj – tio estas ja optimumo laŭ matematiko.

人伦并处，同求而异道，同欲而异知，生也。

Homoj, etike kunvivante, kvankam serĉas la samon, tamen diferencas je la vojoj, kvankam deziras la samon, tamen diferencas je la scioj – tio estas ja reala vivo.

皆有可也，知愚同；所可异也，知愚分。

Ĉiuj povas aprobi la samon, estante samaj je saĝeco kaj malsaĝeco; sed ĉiuj povas esti malsamaj, dividitaj laŭ saĝeco kaj malsaĝeco.

势同而知异，行私而无祸，纵欲而不穷，则民心奋而不可说也。

Inter homoj, se samaj kaj egalaj je rango, spite ke diferencaj je scio, se iuj kondutas egoisme sen punataj kaj aliaj diboĉas senbride, tiam popolanoj incitiĝas je koro tiom, ke ne eblus regadi ilin.

如是，则知者未得治也，知者未得治则功名未成也，功名未成则群众未县也，群众未县则君臣未立也。

Se tiel, saĝuloj ne povas administri; se la saĝuloj ne povas administri, tiam ne povas montriĝi merituloj nek honoraj nomoj; se ne montriĝas merituloj nek honoraj nomoj, tiam inter homamasoj ne estas distingo, tiel do ne povas esti starigita la reĝo kaj la subuloj.

无君以制臣，无上以制下，天下害生纵欲。

Se sen reĝo regi subulojn, sen la supro regi la subon, difektiĝos la mondo kaj eksvarmos diboĉado kaj orgio.

欲恶同物，欲多而物寡，寡则必争矣。

Oni deziraĉus la samon, avidus tro multe, aĵoj malmultiĝus. Se malmultas la aĵoj, nepre okazos konfliktoj.

故百技所成，所以养一人也。

Per provizaĵoj far de centoj da metioj estas nutrata ĉiu unuopa homo.

而能不能兼技，人不能兼官，离居不相待则穷，群而无分则争。

Ne eblas kumuladi multajn metiojn, ne eblas al unu persono kumuladi oficojn. Se oni, loĝante unu disde la alia, ne povus helpadi unu la alian, tuj ekfalus en mizeron. Se oni

nur gregiĝus, ne dividante taskon inter si, tiam ekbatalus inter si. .

穷者患也，争者祸也，救患除祸，则莫若明分使群矣。

Mizero estas ja malsano, kverelo estas plago. Por savi el la malsano kaj elimini la plagon estas preferinde distingi-diferencigi ilin klare kaj poste lasi ilin kungregi. .

强胁弱也，知惧愚也，民下违上，少陵长，不以德为政，如是，则老弱有失养之忧，而壮者有分争之祸矣。

Se la pliforta minacus la malpli fortan, la pli saĝa timigus la malpli saĝan, inter popolo la subo kontraŭus la supron, la malgranda superus la estron, tiam oni administrus ne per virto. Se tiel, okazus malĝojo, ke la maljuna kaj la malforta povus perdi por si nutraĵon kaj okazus katastrofo, ke plenkreskuloj batalus disiĝante inter si.

事业所恶也，功利所好也，职业无分，如是，则人有树事之患，而有争功之祸也。

Se afero kaj entrepreno estus malŝatata, sed nur ŝatata la utileco-profitito, tiam la profesioj ne estus dividitaj. Se tiel, okazus malsano, ke homoj laborus propravole kaj arbitre, okazus katastrofo, ke oni interbatalus pro merito.

男女之合，夫妇之分，婚姻媾内送逆无礼，如是，则人有失合之忧，而有争色之祸矣。

Neniigus decreguloj je la unuiĝo de viroj kaj virinoj, je distingo de edzoj kaj edzinoj, je proceduro de geedziĝa ceremonio, kiel propono, fianĉdonaco, forsendo kaj akcepto. Se tiel, okazus malĝojo, ke homoj perdus akordiĝon, okazus katastrofo, ke oni batalus por adultadi.

故知者为之分也。

Tial do je tio la saĝuloj starigis la distingon-dividon.

足国之道，节用裕民而善臧其余。

La vojo por plenumi la landon estas jena – ŝparado-ekonomio, bonstato de la popolo kaj bona rezervado de restaĵoj.

节用以礼，余民以政。彼裕民，故多余。

Efektivigi la ŝparado-ekonomion per decreguloj kaj la bonstaton de la popolo per ĝusta regado. Kie bonstatas la popolo, tie restas multe da supergajnoj.

裕民则民富，民富则田肥以易，田肥以易则出实百倍。

Kie la popolo bonstatas, tie riĉiĝas la popolo, kaj kie la popolo estas riĉa, tie la kompo fekundas bone prizorgate. Kie la kampo estas fekunda kaj bone prizorgata, tie oni produktas centoble.

上以法取焉，而下以礼节用之，馀若丘山，不时焚烧，无所臧之，夫君子奚患乎无馀？

Supre oni administras per leĝoj, sube oni vivtenas kun decreguloj kaj ekonomie ŝparadas. Tiel do la riĉaĵo abundas kvazaŭ montoj tiom multe, kiom ne troviĝus rezervejo, se ne portempe bruligi ĝin. Kial nobluloj povus timi pro manko de restaĵoj?

故知节用裕民，则必有仁义圣良之名，而且有富厚丘山之积矣。

Tial do, kiu scipovas ekonomie ŝpari kaj efektivi la bonstaton de la popolo, tiu akiras nomon de bonvoleco, justo, sankteco kaj bono, kaj samtemte akumulas multe da riĉaĵoj kvazaŭ montojn.

此无它故焉，生于节用裕民也。

Por tio ne estas alia rimedo ol ŝparado-ekonomio kaj la popola bonstato.

不知节用裕民则民贫，民贫则田瘠以稔，田瘠以稔则出实不半，上虽好取侵夺，犹将寡获也，而或以无礼节用之，则必有贫利纠讟之名，而且有空虚穷乏之实矣。

Kie oni ne scipovas efektivi la ekonomian ŝparadon kaj la popolan bonstaton, tie la popolo malriĉiĝas. Se la popolo estas malriĉa, la kampoj iĝas magraj kaj sterilaj. Ĉe la kompoj magraj kaj sterilaj produktiĝas malpli ol duono. Tiam, eĉ se la supro sukcesus rabi la aliajn kaj ekspluati, tamen da predoj akirus malmulte, kaj sen decreguloj kaj ŝparado-ekonomio, nepre ĝi ricevas la nomon de avarulo kaj peza impostanto, kaj tiel ĝia regado rezultas vana, mizera, ne fruktodona.

此无它故焉，不知节用裕民也。

Je tio ne estas alia kialo ol estas ne sciate kiel efektivi la ekonomian ŝparadon kaj la popolan bonstaton.

《康诰》曰：“弘覆乎天，若德裕乃身。”此之谓也。

En “Eldiro de Kuang” estas dirite: “Vaste kovrite de la Ĉielo, oni fariĝas virta kaj bonstata per si mem.” Tio diras kion mi supre menciis.⁷⁶

礼者，贵贱有等，长幼有差，贫富轻重皆有称者也。

Koncerne de decreguloj estas ja rangoj je la nobela kaj la malnobela, estas diferenco je la pliaĝa kaj la malpli aĝa, estas titoloj je ĉiuj, kiel la malriĉa, la riĉa, la malpeza, la peza.

故天子衮衣冕，诸侯玄衮衣冕，大夫裨冕，士皮弁服。

Do la Ĉiela Filo, portante kronon, surmetas la veston, broditan per desegno de ruĝa drako; landestro, portante la kronon, surmetas la veston, broditan per desegno de nigra drako; grandoficisto, portante kronon, surmetas la ceremonian veston; oficisto portas la ĉapon faritan el la blanka cervofelo kaj vestiĝas laŭ sia rango.

德必称位，位必称禄，禄必称用。

Al la virto nepre konformiĝas la rango, kaj al la rango nepre konformiĝas la salajro, kaj al la salajro nepre konformiĝas la utileco.

由士以上则必以礼乐节之，众庶百姓则必以法数制之。

Ranguloj, pli altaj ol oficistoj, nepre sindetenas laŭ konvencio de decreguloj kaj muzikritualoj, popolamasoj nepre obeas al leĝoj kaj normaj ciferoj.

⁷⁶ 《康诰》 estas unu el ĉapitroj en la libro 《尚书》.

量地而立国，计利而畜民，度人力而授事，使民必胜事，事必出利，利足以生民，皆使衣食百用出入相揜，必时臧余，谓之称数。

Laŭ termezurado estas starigitaj la ŝtatoj, per kalkulado de profitoj estas nutrataj la popolo, laŭmezure de homa forto estas asignata la laboro, tiel oni nepre donas al la popolanoj labori, kaj la laboro nepre donas profiton, la profito sufiĉas por nutri la popolon. kaj ĉiuj ĝuas vestaĵojn, manĝaĵojn kaj centon da necesaj eventoj kun ekvilibro inter elspezoj kaj enspezoj, eĉ nepre kun superflujaj rezervoj. Tio estas nomata la mastrumado de laŭnorma cifero. .

故自天子通于庶人，事无大小多少，由是推之。

Tiele de la Ĉiela Filo ĝis ordinaraj popolanoj, ĉiu plenumas sian ajnan aferon, tute egale ĉu grandan aŭ ne, ĉu multan aŭ ne.

故曰：朝无幸位，民无幸生。此之谓也。

Do estas dirite: “Ne laŭ bonsorto hazarde estas asignata la posteno en kortego, ne laŭ bonsorto hazarde la vivo estas donata al la popolo.” Tio signifas la supre menciitan.

轻田野之税，平关市之征，省商贾之数，罕兴力役，无夺农时，如是，则国富矣。

Malpliigi la impostojn de kampoj, ĝustigi doganon kaj merkatoĵon, simpligi nombron de proceduroj por komerco, malpezigi la fizikan laboron, ne malhelpi la tempojn de agrikulturado – tiel farante, la regno riĉiĝas.⁷⁷

夫是之谓以政裕民。

Tio estas nomata la politko por la popola bonstato.

人之生，不能无群，群而无分则争，争则乱，乱则穷矣。

Por vivi ne eblas al homoj ne kungregiĝi. Se ne estus iu distingo-divido en la grego, oni ekbatalus inter si. Se interbatalus, tumultus. Se tumultus, mizerus.

故无分者，人之大害也；有分者，天下之本利也；而人君者，所以管分之枢要也。

Do sen divido homoj ricevas damaĝegon. La divido estas ja bazo de la monda profito. La homa reĝo estas la akso por la administrado de distingo-divido.

故美之者，是美天下之本也；安之者，是安天下之本也；贵之者，是贵天下之本也。

Do la beleco de la reĝo estas ja bazo de la bela mondo; lia stabileco estas bazo de la stabila mondo; lia nobleco estas bazo de la nobla mondo.

古者先王分割而等异之也，故使或美或恶，或厚或薄，或佚或乐，或劬或劳，非特以为淫泰夸丽之声，将以明仁之文，通仁之顺也。

Antikvaj reĝoj dividis kaj distingis la klason, tiel do distingiĝis klasoj aŭ bela aŭ malbela, aŭ dika je favoro aŭ maldika, aŭ distra aŭ facila, aŭ laciga aŭ pena. Ili

⁷⁷省商贾之数 Esploristoj prenas la frazon por “malmultigi ciferon de negocistoj”. Mi komprenas la vorton 数 kiel la signifon de “komplikaĵo”.

distingis ne nur melodiojn aparte inter diboĉan, trankvilan, paradan kaj belan, sed ankaŭ klarigis bonvolecan kulturon kaj diskonigis bonvolecan disciplinon.

故为之雕琢，刻镂，黼黻，文章，使足以辨贵贱而已，不求其观；为之钟鼓，管磬，琴瑟，竿笙，使足以辨吉凶，合欢定和而已，不求其余；为之官室台榭，使足以避燥湿，养德，辨轻重而已，不求其外。

Koncernante skulpturon, gravuraĵon, gliptikon, kolorojn, desegnaĵojn, estis sufiĉe, se nur distingiĝas la grado de nobleco, pli alta aŭ malpli alta, kaj ne estis postulata la eksteraĵo. Rilate al sonoriloj, tamburoj, blov-, perkut-, kord-instrumentoj, estis sufiĉe, se nur distingiĝas aŭguroj, ĉu bona aŭ malbona, eblas ĝui akordiĝon kaj harmonion, kaj ne estis bezonata krome. Rilate al konstruaĵoj kiel palacoj, oficaĵoj ĉambroj kaj belvederoj, estis sufiĉe, se nur eviteblas troa sunfrapo kaj malsekeco, se helpas kulturadon de virto, eltenas pezon-malpezon, kaj ne estis bezonata krome.

《诗》曰：“雕琢其章，金玉其相。亶亶我王，纲纪四方。” 此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Havante skulpturojn kun la taŭga desegno, orojn kaj gemojn kun la taŭga aspekto, diligentas mia reĝo, kies disciplinoj disvastiĝas kvar flankojn.”⁷⁸ Tio signifas la supre menciitan.

若夫重色而衣之，重味而食之，重财物而制之，合天下而君之，非特以为淫泰也，固以为王天下，治万变，材万物，养万民，兼制天下者，为莫若仁人之善也夫！

La ĉefo estas vestita en diverskolora vestaĵo, manĝas multediversajn frandaĵojn, posedas multediversajn trezorojn, kaj akordigas la mondon kiel la reĝo ne por ke li mem aparte dronu en diboĉadon kaj facilan vivon kiel la reganto de la mondo, sed por ke li kontrolu ĉiujn ŝanĝojn, utiligi ĉiujn aĵojn, nutri ĉiujn popolanojn. Nenio estas pli bona al la bonvolemulo ol universale regi la mondon.

故其知虑足以治之，其仁厚足以安之，其德音足以化之，得之则治，失之则乱。

Lia saĝeco kaj klopodo sufiĉas por la administrado de la socio, lia profunda bonvoleco sufiĉas por ĝia stabiligo, lia belsona virto sufiĉas por ĝia transformado. Ĉe li ĝi estas bone regata, sen li ĝi tumultas en kaoso.

百姓诚赖其知也，故相率而为之劳苦以务佚之，以养其知也；诚美其厚也，故为之出死断亡以覆救之，以养其厚也；诚美其德也，故为之雕琢，刻镂，黼黻，文章以藩饰之，以养其德也。

La popolanoj sincere apogas sin sur lia saĝeco, do ili ĉiuj kune laboras penege por ke li povu plenumi la taskon, ĝuante senĝenan ripozon kaj kulturante plu la saĝon. Ili sincere laŭdas belecon de lia granda favoro tiom, ke ili sindonas vivriske je sia morto por savi lin, por ke li plutenu la favoradon granda. Ili sincere laŭdas lin je lia virto tiel, ke ili aparte ornamas lin bela per skulpturoj, gravuraĵoj, gliptikoj, koloroj, desegnaĵoj,

⁷⁸ Citaĵo el 诗经，大雅，棫朴.

por ke li daŭre kulturu al si la virton.

故仁人在上，百姓贵之如帝，亲之如父母，为之出死断亡而愉者，无它故焉，其所是焉诚美，其所得焉诚大，其所利焉诚多。

Tiel do, se la bonvolemulo situas supre, la popolanoj respektas lin kiel imperiestron, intimiĝas al li kiel al gepatroj, sindonas ĝojege al li vivriske je sia morto kaj estas kontentaj je tio, pro nenia alia kialo ol ili nur sincere laŭdas lian belecon, vere akiras ion grandan kaj vere profitas multe.

《诗》曰：“我任我犂，我车我牛，我行既集，盖云归哉！”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Mi plenumas mian devon, tirante mian kaleŝon, mian ĉaron, mian bovon, kaj mi pretas ekveturi kaj jam kolektiĝas. Ni kune iru hejmen!”⁷⁹ Tio signifas la supre menciitan.

故曰：君子以德，小人以力。力者，德之役也。

Do estas dirite, ke nobluloj utilas per virto kaj malgranduloj per forto. La forto laboras por la virto.

百姓之力，待之而后功；百姓之群，待之而后和；百姓之财，待之而后聚；百姓之势，待之而后安；百姓之寿，待之而后长。

La forto de popolanoj ekmeritos nur poste, atendante ĝis maturiĝo. La grego de popolanoj harmonios nur poste, atendante ĝis maturiĝo. La riĉaĵo de popolanoj amasiĝos nur poste, atendante ĝis maturiĝo. La energio de popolanoj stabiliĝos nur poste, atendante ĝis maturiĝo. La vivdaŭro de popolanoj longiĝas nur poste, atendante ĝis maturiĝo.

父子不得不亲，兄弟不得不顺，男女不得不欢，少者以长，老者以养。

Patro kaj filoj ne devas ne esti intimaj, fratoj ne devas ne obeemaj, geviroj ne devas ne ĝuigi unu la alian. Junuletoj kreskas per tio kaj maljunuloj estas nutrataj per tio.

故曰：“天地生之，圣人成之。”此之谓也。

Do estas dirite: “La Ĉielo kaj la tero naskas kaj sanktuloj kreskigas.” Tio signifas la supre menciitan.

今之世而不然：厚刀布之敛以夺财，重田野之税以夺之食，苛关市之征以难其事。

En nuna mondo statas ne tiel: Oni impostas multe je glav-monoj kaj ŝtofoj kaj forprenas proprajn, impostas peze al kampoj kaj forrabas nutraĵon, impostas senindulge al dogano kaj merkato kaj malhelpas la negocojn.

不然而已矣，有掎絜伺诈，权谋倾覆，以相颠倒，以靡敝之，百姓晓然皆知其污漫暴乱而将大危亡也。

Ne nur tiel statas aferoj. Estas tiraligoj kaj denuncoj, intrigoj kaj renversoj, reciprokaj interbataloj – per tio ĉiuj laciĝas kaj konsumiĝas. Ĉiuj popolanoj klare scias la

⁷⁹ Citata el 诗经, 小雅, 黍苗.

malpuran tumulton, danĝeran je granda pereo.

是以臣或弑其君，下或杀其上，粥其城，倍其节，而不死其事者，无它故焉，人主自取之。

Vasaloj atencas la reĝon, subuloj mortigas la supron. Ili perfide transdonas al la malamikoj la urbon, sintenante kontraŭ la moralo, ne mortas por sia mastro. La kaŭzo estas ne alia ol ke ĉiu egoisme prenas la sian.

《诗》曰：“无言不讎，无德不报。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Neniu vorto sen respondo, neniu virto sen rekompenco.”⁸⁰ Tio signifas la supre menciitan.

兼足天下之道在明分。

La vojo por universale kontentigi la mondon estas distingi la socian dividon de klasoj. 掩地表亩，刺中殖谷，多粪肥田，是农夫众庶之事也。

Aranĝi agrojn, ordigi la limojn de kulturejoj, sarki herbaĉon kaj planti grenojn, sterki kampojn per abundaj fekaĵoj – tio estas la aferoj de kamparanoj kaj popolamasoj.

守时力民，进事长功，和齐百姓，使人不偷，是将率之事也。

Konforme al tempoj laborigi la popolon, akceli la aferojn kaj altigi la efikojn, akordigi la popolanojn, igi homojn ne maldiligenti – tio estas la tasko de gvidantoj.

高者不旱，下者不水，寒暑和节而五谷以时孰，是天下之事也。

Zorgadi, ke ne okazu sekego en altaj terenoj, ne okazu inundo en malaltaj terenoj, kaj ke kvin grenoj maturiĝu laŭtempe, kiam ajn en varmo kaj malvarmo, kaj en ajna sezono – tio estas ja la monda afero.

若夫兼而覆之，兼而爱之，兼而制之，虽凶败水旱，使百姓无冻馁之患，则是圣君贤相之事也。

Ke la mondo estu tiel universale zorgeme kovrita, estu amata universale, estu enorde regata universale, kaj spite ajnan sterilegon, inundon aŭ sekegon, la popolanoj povu eviti la mizeron de malsato kaj frostiĝo – tio estas ja la tasko de sanktaj reĝoj kaj saĝaj ministroj.

墨子之言，昭昭然为天下忧不足。

Mozi diras malkaŝe al la mondo pri sia timo je neadekvateco de vivrimedoj.⁸¹ 夫不足，非天下之公患也，特墨子之私忧过计也。

La neadekvateco ne estas timinda al la tutmonda publiko, sed estas ja nura senbaza timo kaj troa zorgemo de Mozi sola.

今是土之生五谷也，人善治之则亩数益，一岁而再获也，然后瓜桃枣李一本数以盆鼓，然后荤菜百蔬以泽量，然后六畜禽兽一而制车；鼃鼃，鱼鳖，鳅鱣以时别，一而成群，然后飞鸟

⁸⁰ Citaĵo el *诗经*, *大雅*, *抑*.

⁸¹ Iuj esploristoj prenas la vorton 昭昭然 por signifo “timeme”.

鳧雁若烟海，然后昆虫万物主其间，可以相食养者不可胜数也。

Nuntempe tereno naskas kvin grenojn tiomgrade, kiom homoj kun bona mastrumado povas produkti kelke da *pelvoj* el unu *mu*, krome povas rikoltadi du fojojn en unu jaro.⁸² Plue, melonoj, persikoj, jujuboj, prunoj estas produktataj el ĉiu unu trunko *penoj-guoj*. Plue sinapoj kaj centoj da legomoj abundas je kvantoj. Plue ses dombestoj-kortbirdoj abundas, ke nura unuopo el ili okupas unu ĉaron. Kelonioj kaj testudoj, fiŝoj kaj ŝlimtestudoj, koibitoj kaj angiloj en diversaj tempoj are svarmas. Plue flugantaj birdoj, anasoj, anseroj amasiĝas kvazaŭ fumo kovranta maron. Krome troviĝas insektoj kaj miloj da estaĵoj. Tiel do estas nekalkuleblaj la manĝaĵoj, nutrantaĵoj homojn.

夫天地之生万物也，固有馀足以食人矣；麻葛，茧丝，鸟兽之羽毛齿革也，固有馀足以衣人矣。

Multaj estaĵoj, kiujn naskas la Ĉielo kaj la tero, sufiĉas per si mem por manĝigi homojn. Kanaboj, puerarioj, silkoj, plumoj de birdoj kaj feloj-dentoj de bestoj sufiĉas per si mem por vesti homojn.

夫有馀不足，非天下之公患也，特墨子之私忧计也。

Neadekvateco ne estas timinda al la tutmonda publiko, sed nur senbaza timo kaj troa zorgemo de Mozi sola.

天下之公患，乱伤之也。胡不尝试相与求乱之者谁也？

La monda komuna timo estas damaĝo el tumulto. Kial ne provu ni kune serĉi, kiu do incitas la tumulton？

我以墨子之“非乐”也则使天下乱，墨子之“节用”也则使天下贫，非将堕之也，说不免焉。Mi konsideras, ke Mozi kun sia penso “Kontraŭ al muziko” kondukas la mondon al tumulto, kaj Mozi kun sia ideo pri “Ŝparado-ekonomio” mizerigas la mondon malriĉa. Mi ne intencas kalumni lin ĉi tie, sed mi diras, ke al lia ideo estas ne evitebla tia rezulto.

墨子大有天下，小有一国，将蹙然衣粗食恶，忧戚而非乐，若是则瘠，瘠则不足欲，不足欲则赏不行。

Se Mozi ekregus la grandan mondon, aŭ almenaŭ unu malgrandan landon, oni forŝrumpante vestus sin kruda kaj manĝus magre, malgajus sen muziko, kaj tiom malgrasiĝus, ke reduktus ajna deziro pro troa malgrasiĝo, tiom reduktus la deziro, ke jam ne efikus ajna laŭdado por stimuli.

墨子大有天下，小有一国，将少人徒，省官职，上功劳苦，与百姓均事业，齐功劳，若是则

⁸² 益 *pen*, antikva mezurilo, enhavanta 6 *dou* 斗 4 *sheng* 升. 亩 *mu*, mezurunuo de kampoj, valoranta 1/15 hektaron aŭ 6.667 arojn. 鼓 *gu* – 10 *dou*.

不威，不威则罚不行。

Se Mozi ekregus la mondon grandan, aŭ almenaŭ iun landon malgrandan, li malpliigus funkciulojn ĝis malgranda nombro, reduktus oficojn kaj postenojn, supruoj diligente laborus por meriti, dividante kun popolanoj egale la aferojn kaj egaligante laboron kaj meritaĵon. Sed se tiel, ili perdus aŭtoritaton, kaj sen la aŭtoritato ne estus plenumbla la tasko puni.

赏不行，则贤者不可得而进也；罚不行，则不肖者不可得而退也。

Ankaŭ laŭdado ne eblus, do la saĝaj ne povus esti promociitaj. Ne eblus la punado, do netaŭguloj ne povus esti forpelitaj.

贤者不可得而进也，不肖者不可得退也，则能不能不可得官也。

Se la saĝaj ne povus esti promociitaj kaj netaŭguloj ne povus esti forigitaj, ĉu eblus kolekti administrantojn?

若是，则万物失宜，事变失应，上失天时，下失地利，中失人和，天下敖然，若烧若焦。

Tiam ĉiuj estaĵoj perdus sian konvenecon, ne eblus adaptiĝi al ŝanĝiĝo de aferoj, la supro perdus la Ĉielan tempon, la subo perdus la teran profiton, la mezo perdus la homan harmonion, tiel do la mondo konfuziĝus en ĥaoso, kvazaŭ flam-brul-infero.

墨子虽为之衣褐带索，嚙菽饮水，恶能足之乎？

Kvankam Mozi mem simple portas krudan vestaĵon, zonite kun ŝnuro, kaj manĝas legumenan kaĉon kaj trinkas akvon, tamen ĉu sufiĉus per tio?

既以伐其本，竭其原，而焦天下矣。

Ĉar la bazo estas jam hakita, la fonto estas elĉerpiĝinta, la mondo estas forbruligita.

故先王圣人为之不然。

Sed antikvaj reĝoj, sanktuloj, faris ne tiel.

知夫为人主上者不美不饰之不足以一民也，不富不厚之不足以管下也，不威不强之不足以禁暴胜悍也。

Ili sciis, ke ĉefo ne bela sen ornamoj ne povus sufiĉe unuigi la popolon, ke ĉefo ne riĉa sen digno ne povus sufiĉe konduki la subon, ke ĉefo ne majesta sen forto ne povus sufiĉe subpremi violenton kaj kvietigi perturbon.

故必将撞大钟，击鸣鼓，吹笙竽，弹琴瑟以塞其耳，必将錡琢，刻镂，黼黻，文章以塞其目，必将刍豢稻粱，五味芬芳以塞其口，然后众人徒，备官职，渐庆赏，严刑罚以戒其心。

Do ili, frapante grandan sonorilon, batante tamburon, blovante anĉ-blov-instrumentojn, ludante liron-citron, nepre plenigas la orelojn, kaj nepre per skulpturo, gravuraĵo, ĉizaĵo, desegnaĵoj, plenigas la okulojn, kaj nepre per bonkvalitaj viandoj, grenoj, kvin bongustaĵoj kaj bonodoraj frandaĵoj plenigi al si la buŝojn, kaj poste ili klopodas kolekti amason da laboruloj, aranĝi oficojn-postenojn, instali panegiradon-laŭdadon kaj

severan punadon, por atentigi al homoj la koron.

使天下生民之属皆知己之所愿欲之举在是于也，故其赏行；皆知己之所畏恐之举在是于也，故其罚威。

La laŭdado efikas nur tiam, kiam oni sciigis al vivantaj popolanoj en la mondo, en kio estas ilia deziro; la punado efikas, kiam ĉiuj scias, kion ili timas kaj respektegas.

赏行罚威，则贤者可得而进也，不肖者可得而退也，能不能可得而官也。

Kie efikas la laŭdado kaj majestas la punado, tie okaze de supozata enoficigo eblas promocii saĝulojn kaj forigi netaŭgulojn.

若是，则万物得宜，事变得应，上得天时，下得地利，中得人和，则财货浑浑如泉源，汭汭如河海，暴暴如丘山，不时焚烧无所臧之，夫天下何患乎不足也？

Tiel do, al ĉiuj estaĵoj estas asignata la tasko responde al ŝanĝiĝo de aferoj – la supro akiras la ĉielan tempon, la subo akiras la teran profiton, la mezo akiras la homan harmonion, riĉaĵoj-rezervoj elfontas ŝprucante, abundas kvazaŭ riverego kaj maro, amasiĝas kiel montoj tiomgrade, ke, se ne bruligus ilin, nenie eblus konservi ilin. Kial oni en la mondo devas timi pri la manko de vivnecesaĵoj?

故儒术诚行，则天下大而富，使而功，撞钟击鼓而和。

Se estus praktikata la ideo de konfuceanismo, tiam la mondo fariĝus granda kaj riĉa, homoj laborus laŭmerite, harmonie kun la ritmo de sonoriloj kaj tamburoj.

《诗》曰：“钟鼓喤喤，管磬琤琤，降福简简，威仪反反。既醉既饱，福禄来反。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Belsonas la sonoriloj kaj tamburoj, blovas ŝalmoj, tintas kariljonoj, pluvas feliĉo leĝere, ritoj iras solene, al ĉiuj jam kune ebriaj jam sataj alvenas feliĉo-trezoro unu post la alia.”⁸³ Tio signifas la supremenciitan.

故墨术诚行则天下尚俭而弥贫，非斗而日争，劳苦顿萃而愈无功，愀然忧戚非乐而日不和。

Se la ideo de Mozi estus praktikata, la mondo malriĉiĝus pro Ŝparado-ekonomio. Kvankam li predikis kontraŭ milito, tamen homoj kverelus ĉiutage, ju pli oni laborus diligente ĝis laciĝo, des malpli rezultus la merito, ke oni, estante trista kaj malĝoja, sen muziko sen plezuro⁸⁴, ĉiutage malharmonius kaj malakordiĝus.

《诗》曰：“天方荐瘡，丧乱弘多。民言无嘉，憯莫怨嗟。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “La Ĉielo iĝas plena de ĉagreno-malsano, da mortiga tumulto pli disvastiĝas. Malaperas ĝojo en popola parolado, nur aŭdiĝas ĝemspiroj.”⁸⁵ Tio signifas la supremenciitan.

垂事养民，拊循之，呢呕之，冬日则为之饘粥，夏日则与之瓜瓠，以偷取少顷之誉焉，是

⁸³ Citaĵo el 诗经，周颂，执竞.

⁸⁴ 非乐 havas duoblan signifon: sen muziko, sen plezuro.

⁸⁵ Citaĵo el 诗经，小雅，节南山.

偷道也，可以少顷得奸民之誉，然而非长久之道也。

Se provi per provizora entrepreno nutri la popolon, flatmildigi ĝin kaj amuzigi ĝin, por ekzemplo, liveri al ĝi kaĉon en vintro aŭ doni al ĝi melonon kaj hordeo-kaĉon en somero, tio estas ja provo ŝtelricevi ŝajnan honoron per malgranda favoraĵo, ne alia ol ŝtelado de la vojo. Per tio eblus almenaŭ akiri honoretan de perfidulo, sed tio ne estas la longa daŭrigpova vojo.

事必不就，功必不立，是奸治者也。

Afero nepre ne povos esti efektivigita, merito nepre ne estas atingebla, do tio estas ja malbona fuŝregado.

儻然要时务民，进事长功，轻非誉而恬失民，事进矣而百姓疾之，是又不可。偷偏者也。徙坏堕落，必反无功。

Senkohere ĉiam ajn al la popolo estas devigate laboradi kaj antaŭenpuŝi la laboron longdaŭran, sen laŭdado, la popolo iom post iom perdiĝas je stimulo, kun la irado de afero malsaniĝas la popolanoj. Ankaŭ tio estas malbona, ĉar tio estas ja troa ŝtelado, perdinta ekvilibron, ke oni difektiĝas kaj falas en degeneron, tiam nepre okazas kontraŭefiko senmerita.

故垂事养誉不可，以遂功而忘民亦不可，皆奸道也。

Do la nutrado per provizora entrepreno ne estas laŭdinda. Dum la meritserĉado forgesi la popolon estas malbone. Ĉiuj tiaj rimedoj estas ja malbona fuŝvojo.

故古人为之不然，使民夏不宛暘，冬不冻寒，急不伤力，缓不后时，事成功立，上下俱富，而百姓皆爱其上，人归之如流水，亲之欢如父母，为之出死断亡而愉者，无它故焉，忠信调和均辨之至也。

Antikvuloj faris ne tiel, ili zorgis la popolon por ke ĝi ne estu frapita de varmaĉo en somero, ne estu frostiĝanta pro malvarmo en vintro, en rapideco ne difektiĝu je la forto, en senhasteco ne malfruiĝu je la tempo, tiel do la aferoj sukcese efektiviĝis. La supro kaj la subo ambaŭ riĉiĝis, la popolanoj ĉiuj amis la supron, al kiu homoj obeis kvazaŭ fluanta akvo kaj intime proksimiĝis kvazaŭ al siaj gepatroj, ke ili mem ĝojis volonte por sia supro kune kuniri, morti kaj pereji. En tio ne estas alia kaŭzo ol la pleja lojaleco, fideleco, harmonio, akordiĝo kaj ekvilibra divido-distingo.

故君国长民者欲趋时遂功，则和调累解，速乎急疾；忠信均辨，说乎赏庆矣；必先修正其在我者，然后徐责其在人者，威乎刑罚。

Do en la lando regata de la reĝo, ambaŭ suprujoj kaj popolo deziras sukcese plenumi sian taskon laŭtempe, akordiĝante harmonie kaj solvante komplikajn nodon pacience, plenumas tiele pli frue ol per hastigo. Ili ambaŭ estas lojalaj kaj fidelaj, ekvilibre divid-distingitaj, kaj ĝojaj se laŭdate-honorate. Oni antaŭ ĉio nepre korektas sin mem ĝusta

kaj poste akuzas tolereme alies kulpon. Tial, en la punado troviĝas la majesteco.⁸⁶

三德者诚乎上，则下应之如景向，虽欲无明达，得乎哉！

Se tri virtoj sincere apartenas al la supro, tiuokaze la subo respondas konekse al ĝi kvazaŭ ombro aŭ eĥo.⁸⁷ Eĉ se oni ne volus malkaŝe fariĝi tia, tamen ne devas ne esti tia.

《书》曰：“乃大明服，惟民其力懋，和而有疾。”此之谓也。

Estas skribite en *Libroj*: “Se la reĝo estas laŭleĝe klera, oni atentis la popolon je ilia tutforta penado milde kaj zorgeme kvazaŭ rilate al malsanuloj.”⁸⁸ Tio signifas la supre menciitan.

故不教而诛，则刑繁而邪不胜；教而不诛，则奸民不惩；诛而不赏，则勤属之民不劝；诛赏而不类，则下疑俗俭而百姓不一。

Se, ne instruante, nur akuzi, tiuokaze la punado tro oftas kaj ne konkereblas malbono. Se, instruante, ne akuzi, tiam ne korekteblas la malbona popolo. Se, nur akuzante, ne laŭdi, tiam ne eblas stimuli la popolon diligenti. Se akuzi kaj laŭdi sen ajna klasifika principo, tiam la subo dubas, la moro falas en danĝeron kaj popolanoj ne unuigas.

故先王明礼义以壹之，致忠信以爱之，尚贤使能以次之，爵服庆赏以申重之，时其事，轻其任以调齐之，潢然兼覆之，养长之，如保赤子。

Do la antaŭaj reĝoj difinis klare la decregulojn kaj juston por unuigi la popolon, faris ilin lojalaj-fidelaj por ami ilin, elektis la saĝajn kaj uzis la kapablajn por gradigi ilin, donis al ili taŭgajn rangojn, kostumojn, panegirojn kaj laŭdojn por trakti ilin afable, elektis taŭgan tempon por fari aferojn, faris la devon pli facila por aranĝi ilin en akordo, kovris ilin vaste kaj universe, kreskigis ilin grandaj, kvazaŭ klopodis bebojn.

若是，故奸邪不作，盜賊不起，而化善者劝勉矣。

Tiel do oni ne faris la malbonon kaj maljusotn, ne aŭdacis ŝteli, faris sin bona kaj penadis esti diligenta.

是何邪？则其道易，其塞固，其政令一，其防表明。

Kial tio estis? Ĉar la vojo estas facila, la citadelo estas firma, la dekretoj estas unuigitaj, la normo por gardi estas klara.⁸⁹

故曰：上一则下一矣，上二则下二矣，辟之若中木，枝叶必类本。此之谓也。

Do estas dirite: “Se la supro estas unuigita, la subo ankaŭ unuigas; se la subo estas

⁸⁶ 说乎赏庆矣，威乎刑罚 iuj esploristoj prenas la frazojn kiel komparativon, tradukante: “Tio estas pli ĝojiga ol la laŭdado”, “tio estas pli majesta ol la punado.” Sed mi komprenas la frazojn alie, ĉar Xunzi konsideras la laŭdadon kaj la punadon grava.

⁸⁷ Tri virtoj estas – lojaleco-fideleco, harmonio-akordiĝo, ekvilibra divid-distingo 忠信调和均辨.

⁸⁸ Citata el 尚书, 康诰. 力懋 estas skribite en alia eldono 勅懋. Signifo estas: “oni rekomencas la popolon por la peno.”

⁸⁹ Iuj prenas 防表 por digo kaj mezurilo de profundeco.

disduigita, la subo ankaŭ disduiĝas. Tio estas samkiel herbo kaj arbo – la branĉoj kaj folioj nepre devenas de siaj fontoj-radikoj.

不利而利之，不如利而后利之之利也；不爱而用之，不如爱而后用之之功也。

Ke, ne profitigante la popolon, profitigi sin, estas malpli profitodone ol ke, profitiginte ĝin, poste profitigi sin. Ke, ne amante, ekspluati ĝin, estas malpli meritodone ol ke amante ekspluati ĝin.⁹⁰

利而后利之，不如利而不利者之利也；爱而后用之，不如爱而不用者之功也。

Tiu, kiu, profitante por la popolo, poste profitigi sin, ne estas pli profitodona ol tiu, kiu profitigas ĝin sen sia profito. Tiu, kiu, amante ekspluatas ĝin, ne estas pli meritodona, ol tiu, kiu neekspluante amas ĝin.

利而不利也，爱而不用也者，取天下矣。

Profitiganto sen sia profito, amanto sen ekspluati – prenas la mondon.

利而后利之，爱而后用之者，保社稷者也。

Kiu post profitigo de la popolo profitigas sin, kaj kiu amante ekspluatas ĝin, tiu tenas la societeton – la sanktejon de la tero kaj grenoj.

不利而利之，不爱而用之者，危国家也。

Kiu, ne profitante al la popolo, provas profitigi sin, kaj kiu ne amante ekspluatas ĝin, tiu endaĝerigas la ŝtaton.

观国之治乱臧否，至于疆易而端已见矣。

Se vi volus observi la landon, ĉu bone regata aŭ ĥaosa, ĉu bone administrata aŭ ne, tiam la signo facile videblas jam ĉe la landlimo.

其候徼支繚，其竟关之政尽察，是乱国已。

Se limgardantoj kaj pikedanoj tro bagatelemaj, la doganistoj ekzamenadas tro detale, tio signifas, ke la lando estas en ĥaoso.

入其竟，其田畴秽，都邑露，是贫主已。

Enirante tra la limon, vi vidas la kampon malpura kaj la urbon elmetita al detruo – tio signifas, ke la landestro estas povra.

观其朝廷则其贵者不贤，观其官职则治者不能，观其便嬖则其信者不恧，是暗主已。

Se vi vidas la noblulojn en la kortego ne saĝaj, aŭ vi vidas la oficistojn ne kapablaj je administrado, aŭ vidas la konfiditajn favoratojn ne honestaj, tiam tio signifas, ke la landestro estas malsaĝa.

凡主相臣下百吏之俗，其于货财取与计数也，须孰尽察，其礼义节奏也，芒勃慢楛，是辱国已。

Se ĝenerale supre de la landestro kaj la ministroj sube ĝis cento da oficistoj oni estas tro

⁹⁰ Ĉi tie mi prenas la pronomon 之 kiel la estron.

detalema je kalkulado de varoj kaj valoraĵoj, ĝisfunde esplorante ilin, sed rilate decregulojn-juston kaj labor-ritmon estas loza kaj malzorgema, – tio signifas, ke la lando estas hontinda.

其耕者乐田，其战士安难，其百吏好法，其朝廷隆礼，其卿相调议，是治国已。

Se vi vidas la terkulturistojn ĝuantaj laboradi je kampo, la soldatojn plezure pretaj alfronti malfacilon, la cent oficistojn fidelaj al laŭleĝeco, la kortegon respektanta decregulojn, la ministrojn konsiliĝemaj inter si – tio signifas, ke la lando estas bone regata.

观其朝廷则其贵者贤，观其官职则其治者能，观其便嬖则其信者恣，是明主已。

Se vi vidas la noblulojn en la kortego saĝaj, la oficistaron kapabla je la administrado, la konfidentajn favoratojn honestaj – tio signifas, ke la landestro estas klera.

凡主相臣下百吏之属，其于货财取与计数也，宽饶简易，其于礼义节奏也，陵谨尽察，是荣国已。

Se ĝenerale supre de la landestro kaj la ministroj sube ĝis cent oficistoj oni estas malbagatelemaj kaj simplaj je la kalkulado de varoj kaj valoraĵoj, sed rilate al decreguloj-justoj kaj labor-ritmo oni estas rigore skrupulaj kaj ĝisfunde atentemaj – tio signifas, ke la lando prosperas.

贤齐则其亲者先贵，能齐则其故者先官，其臣下百吏，污者皆化而修，悍者皆化而愿，躁者皆化而恣，是明主之功已。

Se vi vidas, ke je la promocio de egalnivelaj saĝuloj unue estas donata prioritato al la parencoj kaj je la enoficigo de egalnivelaj kapabluloj unue estas donata prioritato al la proksimaj konatoj, se el vasaloj kaj cent oficistoj ĉiuj korputemuloj ŝanĝiĝas en la kulture edukitajn, la kruduloj ĉiuj ŝanĝiĝas en la humilajn, la facilanimuloj ĉiuj ŝanĝiĝas en la honestajn – tio signifas, ke meritas la klera landestro.

观国之强弱贫富有征：上不隆礼则兵弱，上不爱民则兵弱，已诺不信则兵弱，庆赏不渐则兵弱，将率不能则兵弱。

Estas iuj signoj por observi la landon, ĉu ĝi estas forta aŭ malforta, ĉu malriĉa aŭ riĉa. Se la supro ne respektas decregulojn, la armeo estas malforta; se la supro ne amas la popolon, la armeo estas malforta; se la vortoj de promeso estas nefidindaj, la armeo estas malforta; se la laŭdado ne trafas, la armeo estas malforta; se oficiroj ne kapablas gvidi, la armeo estas malforta.

上好功则国贫，上好利则国贫，士大夫众则国贫，工商众则国贫，无制数度量则国贫。

Se la supro ŝatas utilecon, la lando iĝas malriĉa; se la supro ŝatas la profiton, la lando iĝas malriĉa; se da la subaj kaj altaj oficistoj estas multe, la lando iĝas malriĉa; se de metiistoj kaj komercistoj estas multe, la lando iĝas malriĉa; se mankas la preciza

mezurilo kaj pesilo, la lando iĝas malriĉa.

下贫则上贫，下富则上富。

Se la subo iĝas malriĉa, la supro ankaŭ iĝas malriĉa; se la subo iĝas riĉa, la supro iĝas riĉa.

故田野县鄙者，财之本也；垣窳仓廩者，财之末也。

Do, kampoj kaj provincoj estas la bazo de riĉaĵo; magazenoj, tenejoj kaj provizejoj estas la branĉo de riĉaĵo.

百姓时和，事业得叙者，货之源也；等赋府库者，货之流也。

Ke la popolanoj harmonias kun sezonoj, kaj ke negocoj, entreprenoj kaj aferoj iras bonorde en bona ritmo, estas la fonto de varoj; la ŝtata trezorejo, kolektita per impostoj, estas la fluo de varoj.

故明主必谨养其和，节其流，开其源，而时斟酌焉，潢然使天下必有余而上不忧不足。

Do klera landestro nepre povas diskrete nutradi la harmoniecon, ekonomie kontroladi la fluon, ekspluatadi la fonton, prizorgante konforme al la tempo – tiam nepre povas fari la mondon aplombe riĉa je plusmono tiom, ke la supro ne ĝenas sin pro manko.

如是上下俱富，交无所藏之，是知国计之极也。

Tiel la supro kaj la subo ambaŭ fariĝas kune riĉaj tiom, kiom nenie eblus rezervi en tenejoj – tio estas ja la pleja scio de bona ŝtatplanado.

故禹十年水，汤七年旱，而天下无菜色者，十年之后，年谷复熟而陈积有余。

Tiel do ĉe Yu, atakate de la inundo dum 10 jaroj kaj ĉe Tang, atakate de sekeco dum 7 jaroj, en la mondo ne troviĝis paliĝintaj pro nutroperturbo, kaj 10 jarojn poste la dumjara produkto de grenoj restariĝis eĉ kun amaso da plusrezervo.

是无它故焉，知本末源流之谓也。

La kialo estas ne alia ol, t.n. la scio pri bazo kaj branĉo, fonto kaj fluo.

故田野荒而仓廩实，百姓虚而府库满，夫是之谓国蹶。

Do, se la magazenoj kaj tenejoj plenas dum la kampoj detruigatas en mizero, se la ŝtata trezorejo plenas dum la popolanoj suferas pro malpleneco, tiam la lando stumblas t. n. en krizo de disfalo.

伐其本，竭其源，而并之其末，然而主相不知恶也，则其倾覆灭亡可立而待也。

Haki la fundamenton, elsekigi la fonton, kaj alteniĝi al branĉa ekstremaĵo, tio estas pro tio, ke la estro kaj ministroj ne scias en kio kuŝas malbono. Tiel ne eviteblas la disfalo kaj la pereco.

以国持之而不足以容其身，夫是之谓至贫，是愚主之极也。

Se iu posedanto de la lando plendas pro manko de loĝejo kien meti eĉ sin mem, tiu enfalas t. n. en la plejan avidon – tio estas la kulmino de stulteco por la landestro.

将以求富而丧其国，将以求利而危其身。

Serĉante la riĉon, li perdis la landon; serĉante la profiton, li endanĝerigis sin mem.
古有万国，今有十数焉。

Antikve ekzistis dek mil landoj, sed nun restas nur dek kelkaj landoj.
是无它故焉，其所以失之一也。

Tio rezultas ne de la aliaj kaŭzoj, sed oni perdas ĝin pro ununura kialo.
君人者亦可以觉矣。百里之国足以独立矣。

Se la reĝo kun liaj personoj povus nur vekiĝi je tio, tiam eĉ la lando kun teritorio de cent
lĵoj kvadrato povus esti tenata sendepende.

凡攻人者，非以为名，则案以为利也，不然，则忿之也。

Ĝenerale, kiu atakas la aliajn, ne faras tion pro reputacio, sed intencas fari pro profito.
Se ne, pro kolero.

仁人之用国，将修志意，正身行，伉隆高，致忠信，期文理。

Bonvolemulo utiligas la landon por kulturaj strebaj kaj voloj, por rektigi sin kaj sian
kondukon, por altigi personecon, por fideli kun lojaleco, por praktiki sciencojn.

布衣紉屨之士诚是，则虽在穷阎漏屋，而王公不能与之争名；以国载之，则天下莫之能隐匿
也。

Al tia sincera persono, vestita malriĉe kun pajlsandaloj, loĝanta en malvasta domaĉo
kun tegmento nerezistebla al pluvo, eĉ reĝoj kaj dukoj ne povas konkurenci je reputacio.
Se en iu lando ekzistas tia persono, kiun ne eblas kaŝi al la mondo.

若是，则为名者不攻也。

Se tiel, kiu respektas la nomon, tiu ne atakas la landon.

将辟田野，实仓廩，便备用，上下一心，三军同力，与之远举极战则不可。

Kontraŭ la lando, kie estas bone kulturataj la kampoj, plenigitaj la grenejoj, unuigita la
koro inter la supro kaj la subo, koncentritaj la fortoj de tri armeoj, ne eblas militiri de
malproksime eĉ per la pleja forto.⁹¹

境内之聚也，保固视可，午其军，取其将，若拨糴。

Ĉar popolamaso ene de la lando estas firma je gardado kaj akrevida, povas renkonti la
malamikan armeon, preni la generalojn kvazaŭ sarki tifeojn.

彼得之不足以药伤补败。

Eĉ se sukcese invadus, al ili mankas medikamentoj por kuraci vunditojn.

彼爱其爪牙，畏其仇敌，若是，则为利者不攻也。

Se ili amas siajn ungojn kaj dentojn, ili timas la malamikojn. Tiel, kiu zorgas pri profito,
tiu ne agresas.

⁹¹ 三军 Unu armeo konsistas el 12500 soldatoj.

将修小大强弱之义以持慎之，礼节将甚文，珪璧将甚硕，货赂将甚厚，所以说之者，必将雅文辩慧之君子也。

Kiu kulturas al si la juston por la lando, tute egale ĉu malgranda aŭ granda, ĉu forta aŭ malforta, tiu diskrete tenas sin prudenta, kaj la morreguloj estas tre kulturaj, jadoj kaj gemoj estaas tre fajnaj, donac-varoj estas tre riĉaj. Tiel do, kiu ĝojas je tio, nepre estas noblulo kun alta talento de verkado kaj parolado.

彼苟有人意焉，夫谁能忿之？

Kiu do povas koleri tiun homon, havantan la homecan volon?

若是，则忿之者不攻也。

Tial, eĉ koleremulo ne atakas.

为名者否，为利者否，为忿者否，则国安于盘石，寿于旗，翼。

Ne alvenas ataki serĉanto de reputacio, nek de profito, nek korelemulo, do la ŝtato estas stabila kvazaŭ neskuebla roko, longviva kvazaŭ steloj.

人皆乱，我独治；人皆危，我独安；人皆丧失之，我按起而治之。

Dum en la aliaj ĉiuj malordas, ĉe ni sola estas regate en ordo; dum la aliaj ĉiuj estas en danĝero, ĉe ni sole ragas la paco; dum la aliaj ĉiuj perdiĝas, ni staras kaj regas bonorde. 故仁人之用国，非特将持有而已也，又将兼人。

Tiel do, kiam bonvolemuloj regas la landon, ili ne nur tenas sin mem aparte bonorde, sed ankaŭ ampleksas la aliajn per universala amo.

《诗》曰：“淑人君子，其仪不忒。其仪不忒，正是四国。” 此之谓也。

Do estas dirite en *Poezio*: “Puranima noblulo, lia sinteno ne devojiĝas. Ĉar lia sinteno ne devojiĝas, li rektigas kvar landojn.”⁹² Tio signifas la supre menciitan.

持国之难易：事强暴之国难，使强暴之国事我易。

Se temas pri malfacileco kaj facileco je la bontenado de ŝtato – estas malfacile servi al violenta regno, estas facile servi violentan regnon al ni.

事之以货宝，则货宝单而交不结；约信盟誓，则约定而畔无日；割国之锜铍以赂之，则割定而欲无厌。

Se servadi al ĝi pere de mono kaj trezoro, tiam kun forkonsumiĝo de la mono kaj la trezoro ne eblos la ligo. Eĉ ligite kun ia promeso, fido, ĵuro kaj voto, tiu interkonsento estos tenata apenaŭ nur unu tagon. Se dividi al ĝi parteton de sia teritorio por subaĉeti ĝian favoron, per tiu koncesio ne eblos kontentigi ĝian avidecon.

事之弥烦，其侵人愈甚，必至于资单国举然后已。

Ju pli zorgoplene vi servadas al ĝi, des pli ĝi entrudiĝas en vin, kaj nepre nur post kiam

⁹² Citaĵo el 诗经, 曹风, 尸鸠. Iuj esploristoj prenas 淑人君子 por ŝamanino kaj spiritoj de prapatroj, sed en la citaĵo far de Xunzi tia kompreno ne konformas al kunteksto.

viaj kapitaloj forkonsumiĝos, finiĝos la trudado.

虽左尧而右舜，未有能以此道得免焉者也。

Per tia vojo, eĉ se havante Yao maldekstraflanke kaj Shun dekstraflanke, vi ne povas eviti tiun rezulton.

譬之是犹使处女婴宝珠，佩宝玉，负戴黄金而遇中山之盗也，虽为之逢蒙视，诘要桡脘，君卢屋妾，由将不足以免也。

Tiu fi-rimedo similas al tio, ke oni sendas unu fraŭlinon kun perlo, gemo kaj oro, do survoje en la monto ŝi renkontos rabiston, al kiu ŝi, deturnante sian rigardon kaj kliniĝante, iel ajn ripete petus sian savon kompanse fariĝi lia konkubino, ŝi ne povos eskapi lin.

故非有一人之道也，直将巧繁拜请而畏事之，则不足以持国安身，故明君不道也。

Do, sen la vojo por unuigi la homojn, kiom ajn vi servadus humile kaj respektplene kun ripeta riverencado al ĝi, ne sufiĉas al vi daŭre bonteni la ŝtaton kaj vin mem sekure. Tial, la klera reĝo ne prenas tian vojon.

必将修礼以齐朝，正法以齐官，平政以齐民，然后节奏齐于朝，百事齐于官，众庶齐于天下。

Li nepre antaŭ ĉio ellernas la decregulojn kaj per tio ordigas la kortegon, per ĝustaj leĝoj ordigas la burokrataron, per la stabila politiko ordigas la popolon, kaj poste ordiĝas la ritmo en kortego, ordiĝas cento da aferoj en la oficejoj, ordiĝas la popolamasoj en la mondo.

如是，则近者竞亲，远方致愿，上下一心，三军同力，名声足以暴炙之，威强足以捶笞之，拱揖指挥，而强暴之国莫不趋使，譬之是犹乌获与焦侥搏也。

Tiel do, proksimumoj des pli konkure intimiĝas, malproksimumoj des pli alvenas kun peto, la supro kaj la subo unuigas je koro, tri armeoj kooperas kune, ilia reputacio estas sufiĉa por pun-kaŭterizi la violenton, ilia prestiĝo estas sufiĉa por vipi ĝin, nur per unu komando sen movo de manoj oni faros la violentan regnon oportuna mesaĝisto. Se diri per parabolo, tio estus kvazaŭ liliputano Jiao Yao frontus al granda fortulo Wu Huo.⁹³ 故曰：事强暴之国难，使强暴之国事我易。此之谓也。

Do estas dirite: Estas malfacile servadi la violentan regnon, sed estas facile servigi la violentan regnon al ni. Tio signifas la supre menciitan.

⁹³ Wu Huo estas la legenda fortulo en Qin regno, Jiao Yao estas la legenda nano kun staturo je 3 *chi*. Multaj esploristoj komprenas la malesperan lukton inter fortulo kaj malfortulo. Sed mi prenas la frazon inversa. En la epoko de Milit-regnoj, ununura vojo por malgrandaj landoj por survivi estis lerte manovri kun fortegaj regnoj. Eĉ per tiu manovro ne eviteblis ilia perejo inter fortaj hegemoniuloj. Sed finfine la venkinta Qin ne longedaŭris.

11 王霸

REĈA HEGEMONIO

国者，天下之制利用也；人主者，天下之利势也。

Ŝtato estas la efika aparato en la mondo; homa estro estas la efika potenco en la mondo.

得道以持之，则大安也，大荣也，积美之源也。

Kiam oni posedas ilin konforme al la vojo, ege stabiliĝas, ege prosperas, fariĝas la fonto por la akumulado de beleco.

不得道以持之，则大危也，大累也，有之不如无之，及其綦也，索为匹夫不可得也，齐愍，宋献是也。

Kiam oni posedas ilin ne konforme al la vojo, estas ege dangere kaj ege lacige tiom, ke estus preferinde ne posedi ilin, kaj finfine atingos la mizeran ekstremon, ke jam ne eblus fariĝi eĉ simplaj popolanoj. Tiaj estis la reĝo Min de Qi-regno kaj la reĝo Xian de Song-regno.

故人主，天下之利势也，然而不能自安也，安之者必将道也。

Kvankam homa estro estas la efika potenco en la mondo, tamen stabiliĝi li ne povas per si mem, sed povas nepre nur konforme al la vojo.

故用国者，义立而王，信立而霸，权谋立而亡。

Koncernate la mastrumadon de regno, la justo starigas reĝon, la konfido starigas hegemoniulon, sed la maĥinacia intrigo kondukas ilin al la pereco.

三者，明主之所谨择也，仁人之所务白也。

Klera estro skrupule elektas el tiuj tri alternativoj, kaj bonvolemulo penas klarigi la vojon.

挈国以呼礼义而无以害之，行一不义，杀一无罪而得天下，仁者不为也，攢然扶持心国，且若是其固也。

Suprentirante la landon per decreguloj kaj justo, senigante nocon, la bonvolemulo ne faras eĉ unu maljustan, nek mortigas eĉ unu senkulpan pretekste por la mondo. Li tiel firme tenas sian koron kaj sian landon sekura.

之所与为之者之人，则举义士也；之所以为布陈于国家刑法者，则举义法也；主之所极然帅群臣而首乡之者，则举义志也。

Kiuj agas kune kun li por la afero, ĉiuj estas justaj personoj. Punleĝaro, proklamata en la ŝtato, enhavas tute justajn leĝojn. La volo, kun kiu la reĝo subite gvidas la generalojn,

vasalojn kaj samlandanojn, estas direktata al la justa cel-strebado.

如是，则下仰上以义矣，是綦定也。

Tiel do, la subo suprenrigardas la supron respektplene kun justo – tio estas la fiksa fundamento.

綦定而国定，国定而天下定。

Sur la fiksa fundamento staros la fiksa ŝtato, sur la fiksa ŝtato staros la fiksa mondo.

仲尼无置锥之地，诚义乎志意，加义乎身行，著之言语，济之日，不隐乎天下，名垂乎后世。

Konfuceo havis neniun terpeceton eĉ kiom pinton de borilo, sed li havigis al si sincerecon, juston, kaj strebon, volon, aldone la konduton laŭ la justo, kaj manifestis tion per parolo kaj lingvo, do en la tago kiam estas rivelite pri tio, lia nomo, nekaŝebla al la mondo, disvastiĝis kaj restas en postaj generacioj.

今亦以天下之显诸侯诚义乎志意，加义乎法则度量，著之以政事，案申重之以贵贱杀生，使袭然终始犹一也，如是，则夫名声之部发于天地之间也，岂不如日月雷霆然矣哉！

Nun, se landestroj en la mondo fariĝus sincerej, justaj kun altaj aspiroj, aldonnate juston al leĝaro kaj metrologio, manifestus tion per politika afero kaj administrado, skrupule konsiderus je altigo de malaltigo de personoj nobelaj-malnobelaj, je mortigo kaj vivigo, igus la regadon kohera, trapenetrita per unueco de la komenco ĝis la fino, tiam ilia fama nomo disradius el inter la Ĉielo kaj la tero, samkiel suno, luno, fulmo, tondro.

故曰：以国齐义，一日而白，汤，武是也。

Do estas dirite: Kiu ordigis la regnon per justo, tiu reveliĝas blanka en unu tago. Tiaj estis Tang kaj Wu.

汤以亳，武王以鄙，皆百里之地也，天下为一，诸侯为臣，通达之属莫不从服，无它故焉，以济义矣。

Tang, ekreganta la urbon Bo, kaj la reĝo Wu, ekreganta la urbon Hao, ĉiuj ekposedis teritorion nur je cent *li*ojn kvadrato. Post kiam ili unuigis la mondon, landestroj ekturnis sin kiel iliajn vasalojn, neniun el ĉirkaŭaj landoj malobeis al ili, ĉar estas ordigite per justo.

是所谓义立而王也。

Oni povas diri, ke la justo starigis ilin reĝoj.

德虽未至也，义虽未济也，然而天下之理略奏矣，刑赏已诺，信乎天下矣，臣下晓然皆知其可要也。

Okazas, ke, kvankam la virto ankoraŭ ne estas matura, nek la justo ankoraŭ disvastiĝas, tamen akordiĝas la administrado de la mondo – oni en la mondo fidus je la punado kaj laŭdado, la permeso kaj promiso, kiujn devas obei ĉiuj vasaloj kaj subuloj

kun konsento.

政令已陈，虽睹利败，不欺其民；约结已定，虽睹利败，不欺其与。

Foje iu dekreto estas jam proklamita, oni fidas, ke kvankam eblus okaze malprofiti, tamen tio ne perfidas la popolon; foje estas decidita iu promeso aŭ interkonsento, kvankam eblus okaze malprofiti, tamen tio ne perfidas la konsentintojn.

如是，则兵劲城固，敌国畏之，国一褻明，与国信之，虽在僻陋之国，威动天下，五伯是也。 Tiel do, la soldatoj estas fortaj kaj la kastelo estas firma tiom, ke malamika lando timas tion. Unuiĝas sur klara fundamento la lando, kiun la aliaj landoj fidas. Spite ke la lando situas en malproksima loko, ĝi majeste movas la mondon. Tia estis la kvinopo de reĝoj.⁹⁴ 非本政教也，非致隆高也，非褻文理也，非服人之心也，乡方略，审劳佚，谨畜积，修战备，鬬然上下相信，而天下莫之敢当。

Ili ne baziĝis sur iu alta politika doktrino, nek atingis altajn decregulojn, nek havis la fundamenton de sciencoj, nek obeigis koron de homoj, sed tamen ili estis lertaj je taktiko, je la esplorado de homa laboro kaj distro, diligentaj je la akumulado de rezervoj, ellernintaj je la milita preparado, kapablaj kredigi la supron kaj la subon reciproke ĝuste kvazaŭ dentoj supraj kaj subaj. Tial do la mondo ne aŭdacis konfronti kun ili.

故齐桓，晋文，楚庄，吴阖闾，越勾践，是皆僻陋之国也，威动天下，强殆中国，无它故焉，略信也。

Do, la reĝoj Huan de Qi-regno, Wen de Jin, Zhuan de Chu, Helu de Wu, Goujian de Yue – ĉiuj, estante en la malproksimaj lokoj, majeste movis la mondon, minacis forte la centrajn regnojn, ĉar estis ĝenerale fidindaj.

是所谓信立而霸也。

Eblas diri, ke la fido starigas la hegemonian regnon.

挈国以呼功利，不务张其义，齐其信，唯利之求，内则不惮诈其民而求小利焉，外则不惮诈其与求大利焉，内不修正其所以有，然常欲人之有，如是，则臣下百姓莫不以诈心待其上矣。

Estas tiu, kiu instigas la regnon al serĉado de utilo-profito, ne devigante disvastigi la juston, nek certigi la fidon, nur serĉadas por ĝi la profiton. Li interne ne sinĝenas trompi la popolon por serĉadi profiteton, ekstere ne sinĝenas trompi la alilandanojn por serĉadi profitegon. Li ne intencas korekti tion, kion li jam posedas, sed ĉiam deziras preni tion, kion la aliuloj posedas. Tiel do, liaj vasaloj, subuloj kaj popolanoj ne devas ne atendi trompeme la supron.

上诈其下，下诈其上，则是上下析也，如是，则敌国轻之，与国疑之，权谋日行而国不免危削，褻之而亡，齐闵，薛公是也。

⁹⁴ 五伯: Kvinopo estis sube menciitaj kvin reĝoj.

La supro trompas la subon, la subo trompas la supron, do diseriĝas la supro kaj la subo. Tiel do, la malamikaj landoj malestimas ĝin, la aliaj landoj dubas ĝin, ĉiam estas farataj iuj intrigoj en ĝi, kaj al ĝi ne eviteblas la danĝero de reduktiĝo, ke ĝi pereas pro tio. Tiaj estis la reĝo Min de Qi-regno kaj la duko de Xue.⁹⁵

故用强齐，非以修礼义也，非以本政教也，非以一天下也，绵绵常以结引驰外为务。

La unua, kvankam kun la forta Qi-regno, tamen ne elkulturis la decregulojn kaj juston, nek havis fundamenton de la politika doktorino, nek povis unuigi la mondon. La alia, ĉiam ĉirkaŭkurante, manovradis zorgeme je demarŝoj.

故强，南足以破楚，西足以诎秦，北足以败燕，中足以举宋。

Ili estis tiom fortaj, ke sude disbatis la Chu-regnon, okcidente humiligis la Qin-regnon, norde venkis la Yan-regnon, centre pereigis la Song-regnon.

及以燕，赵起而攻之，若振槁然，而身死国亡，为天下大戮，后世言恶则必稽焉。

Sed post kiam Yan kaj Zhao-regnoj kune ekatakis, la Qi-regno pereis, forskuite kvazaŭ velkinta arbo, kaj la reĝo mem mortis, kaj fariĝis granda malhonoriĝinto, insultate kaj mokate de postaj generacioj.

是无它故焉，唯其不由礼义而由权谋也。

Tiele iĝis nur ĉar ili baziĝis ne sur decreguloj kaj justo, sed sur perforto kaj intrigoj.

三者，明主之所以谨择也，而仁人之所以务白也。

Rilate tri punktojn, klera estro devas prudente konsideri, kaj bonvolemulo devas penadi klarigi.

善择者制人，不善择者人制之。

Kiu elektas la bonon, tiu regas homojn; kiu elektas la malbonon, tiu estos regata de homoj.

国者，天下之大器也，重任也，不可不善为择所而后错之，错险则危；不可不善为择道然后道之，涂蔑则塞，危塞则亡。

Ŝtato estas granda instrumento de la mondo, do grava je la tasko. Ne devas ne esti bona la elektado kaj la starigo, ĉar starigite sur la krutaĵo ĝi estas en danĝero. Ne devas ne esti bona la elektado de la vojo kaj la starigo sur la vojo, ĉar kotmakulite la vojo ŝtopiĝos, kaj se ŝtopite danĝere, ĝi pereos.

彼国错者，非封焉之谓也，何法之道，谁子之与也。

Starigi la ŝtaton ne signifas feŭdiĝi, sed tio signifas la vojon, laŭ kiu leĝo kaj kun kiuj iri.

故道王者之法与王者之人为之，则亦王；道霸者之法与霸者之人为之，则亦霸；道亡国之法与亡国之人为之，则亦亡。

⁹⁵ 齐闵，薛公 La reĝo Min de Qi (323-284 a. K.) kaj la duko Meng Changjun (?-279 a. K.)

Do, se iri laŭ la vojo kun reĝa leĝo kaj kun taŭgaj al reĝa vojo homoj, fariĝos la reĝo; se iri laŭ la vojo kun hegemonia leĝo kaj kun la taŭgaj al hegemonia vojo homoj, fariĝos hegemoniulo; se iri laŭ la vojo kun leĝo pereiga al la ŝtato kaj kun homoj pereigaj al ĝi, ĝi pereos.

三者，明主之所以谨择也，而仁之人所以务白也。

El tiuj tri opcioj la klera estro devas skrupule elekti, kaj bonvolemulo devas klopodi fari la taskon klara.

故国者，重任也，不以积持之则不立。

Do la ŝtato portas tiel grandan taskon, ke ĝi ne stareblas sen la konstanta akumulado de subteno.

故国者，世所以新者也，是惇惇，非变也，改王改行也。

Do la ŝtato estas tio, kion oni kun renovigo de generacio al generacio, sen ŝanĝo, atenteme kaj skrupule reformadas je reĝoj kaj reformadas je la regado.⁹⁶

故一朝之日也，一日之人也，然而厌焉犹千岁之固，何也？

Unu tago estas unufoja kaj la homo de la tago estas unufoja, sed tamen troviĝas tia firma ŝtato, daŭranta stabile dum mil jaroj, kial?

曰：援夫千岁之信法以持之也，安与夫千岁之信士为之也。

Estas dirite, ke tio subteneblas helpe de miljare fidinda leĝo kaj fareblas pere de personoj, miljare fidindaj.

人无百岁之寿，而有千岁之信士，何也？

Homo ne havas jarojn pli ol cent jarojn, sed estas la persono, miljare fidinda, kial?

曰：以夫千岁之法自持者，是乃千岁之信士矣。

Estas dirite, ke, kiu tenas ĉe si la leĝon miljare daŭran, tiu estas ja persono miljare fidinda.

故与积礼义之君子为之则王，与端诚信全之士为之则霸，与权谋倾覆之人为之则亡。

Do kiu iras kun nobluloj, akumulantaj decregulojn kaj juston, povas fariĝi la vera reĝo; kiu iras kun personoj, plej seriozaj kaj plene fidindaj, povas fariĝi hegemoniulo; kiu iras kun homoj, inklinaj al politika intrigo kaj renverso, povas pere.

三者，明主之所以谨择也，而仁人之所以务白也。

El tiuj tri opcioj, la klera estro devas elekti prudente, kaj bonvolemulo devas klopodi fari la taskon klara.

善择之者制人，不善择之者人制之。

⁹⁶ 国者，世所以新者也，是惇惇，非变也，改王改行也. La frazo devas esti traktata skrupule, ĉar depende de la kompreno oni povas diverse karakterizi ideologion de Xunzi pri revolucio aŭ reformo. Multaj esploristoj prenas la vorton 王 por jado 玉, ne por reĝo, eble, timante pri radikaleco de la frazo por ĉina imperio.

Kiu elektas la bonan regas la aliajn homojn, kaj kiu elektas la malbonan estos regata de la aliaj.

彼持国者必不可以独也，然则强固荣辱在于取相矣。身能相能，如是者王。

Kiu tenas la regnon, tiu nepre ne devas esti soleca, ĉar la forteco-firmeco kaj honoro-malhonoro dependas de tio, ĉu povus havigi al si la konsilanton. Kiam estas kapablaj kaj si-mem kaj konsilanto, tiu povus fariĝi la vera reĝo.

身不能，知恐惧而求能者，如是者强。

Kiam ne estas kapabla li mem, sed, scipovante timi je tio, li serĉas kapablulojn, tiam li povus fariĝi forta.

身不能，不知恐惧而求能者，安唯便僻左右亲比己者之用，如是者危削，篡之而亡。

Kiam li mem ne estas kapabla kaj ne povoscias timi je tio nek serĉi kapablulojn, nur konfidante al favoratoj, intimaj dekstre kaj maldekstre al si, tiam tiu estas en danĝero de dedukto kaj pereas pro tio.

国者，巨用之则大，小用之则小，篡大而王，篡小而亡，小巨分流者存。

Ŝtato grandiĝas, uzate grandskale kaj malgrandiĝas, uzate etskale. Kiu grandigas ĝin pleje, tiu fariĝas vera reĝo, sed kiu malgrandigas pleje, tiu pereas, kaj kiu kunhavas du fluojn, malgrandan kaj grandan, tiu povus teni sin almenaŭ ekzistanta.

巨用之者，先义而后利，安不恤亲疏，不恤贵贱，唯诚能之求，夫是之谓巨用之。

Kiu utiligas la ŝtaton grandskale, tiu antaŭ ĉio serĉas unue la juston pli ol la profiton. Ne zorgante pri proksimeco-malproksimeco, nek pri nobeleco-malnobeleco, li nur serĉas la personojn sincerajn kaj kapablajn. Tio estas t. n. la grandskala uzado.

小用之者，先利而后义，安不恤是非，不治曲直，唯便僻亲比己者之用，夫是之谓小用之。

Kiu utiligas ĝin etskale, tiu antaŭ ĉio unue serĉas la profiton ol la juston. Ne zorgante pri la praveco-malpraveco, ne korektante la kurban, li nur uzas favoratojn, proksimajn al si. Tio estas t. n. la etskala uzado.

巨用之者若彼，小用之者若此，小巨分流者亦一若彼，一若此也。

Estas iu, kiu utiligas ĝin grandskale, estas la alia, kun utiligas ĝin etskale, kaj troviĝas ankaŭ la tria, kiu kunhavas al si ambaŭ fluojn, iam malgrandan kaj iam grandan.

故曰：粹而王，駁而霸，无一焉而亡。此之谓也。

Do estas dirite, ke la pure granda povas esti la vera reĝo, la miksa – la hegemoniulo, kaj la kroma, estante neniu el ili – pereos. Tio signifas la supre menciitan.

国无礼则不正。

Ŝtato sen decreguloj ne estas prava.

礼之所以正国也，譬之犹衡之于轻重也，犹绳墨之于曲直也，犹规矩之于方圆也，既错之而

人莫之能诬也。

Per decreguloj rektiĝas la ŝtato, kvazaŭ pezo-malpezo estas mezurata per pesilo, kurbo-rekto – per tuĉ-ŝnuro, kvadrato kaj cirklo – per ortilo kaj cirkelo. Neniu povas trompi je tio, kio estas mezurata tiel.

《诗》云：“如霜雪之将将，如日月之光明，为之则存，不为则亡。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Kvazaŭ severececo de prujno kaj neĝo, kvazaŭ lumo de suno kaj luno, dank’ al tio ekzistas ĉio ajn, sen tio pereas ĉio.” Tio signifas la supre menciitan.⁹⁷

国危则无乐君，国安则无忧民。

Se la ŝtato estas en danĝero, ties reĝo ne komfortas; se la ŝtato estas stabila, la popolo ne ĝenas sin. .

乱则国危，治则国安。

Se tumultas, la ŝtato estas endanĝerigita, bone regate, la ŝtato estas stabila.

今君人者急逐乐而缓治国，岂不过甚矣哉！

Nuntempe reĝoj hastas serĉi por si ĝuon, malrapidas je regado de la ŝtato – ĉu tio ne estas tro granda eraro?

譬之是由好声色而恬无耳目也，岂不哀哉！

Tio similas al tiu, kiu ŝatas belsonon kaj kolorojn, ne zorgante je oreloj kaj okuloj. Ĉu tio ne estas mizera?

夫人之情，目欲綦色，耳欲綦声，口欲綦味，鼻欲綦臭，心欲綦佚。

Se temas pri homaj sentoj, okuloj deziras ja koloron, oreloj ja sonon, buŝo ja guston, nazo ja odoron, koro ja plezuron.

此五綦者，人情之所不免也。

Tiuj kvin elementoj ne eviteblas al la homa sento.

养五綦者有具，无其具则五綦者不可得而致也。

Je la nutrado de kvin elementoj necesas iloj, sen kiuj ne eblas atingi la kvin elementojn. 万乘之国，可谓广大，富厚矣，加有治辨，强固之道焉，若是，则恬愉无患难矣，然后养五綦之具具也。

La ŝtato kun dek-mil militĉaroj, eblas diri, estas grandega, riĉega, aldone bone regata kun distingo, estante firma je la vojo, tiel ĝojas sen aflikto kaj malfacilo, rezulte estas je sia dispono tiuj iloj por nutri kvin elementojn de homa sento.

故百乐者生于治国者也，忧患者生于乱国也，急逐乐而缓治国者，非知乐者也。

Do cent plezuroj estiĝas en la bone regata ŝtato, ĝenoj kaj afliktoj naskiĝas en malordaj ŝtatoj. Kiu, haste serĉante ĝuon, malrapidas regi la ŝtaton, tiu ne scipovas ĝui.

故明君者必将先治其国，然后百乐得其中；暗君必将急逐乐而缓治国，故忧患不可胜校也，

⁹⁷ Citaĵo ne troviĝas en nun ekzistanta *Poezio*.

必至于身死国亡然后止也，岂不哀哉！

Tial, klera estro nepre antaŭ ĉio provas bone regi la landon, poste lasas al ĝi havi cent plezurojn. Malklera estro, nepre haste serĉante ĝuojn, malrapidas je la regado de la lando, do ĝeno kaj afliktoj ne estas kalkuleblaj, kaj atingos ĝis tia fino, ke nepre li mem mortos kaj la lando pereos. Ĉu tio ne estas mizera?

将以为乐，乃得忧焉；将以为安，乃得危焉；将以为福，乃得死亡焉，岂不哀哉！

Dezirante ĝuon, li akiras aflikton; dezirante sekuron, akiras danĝeron; dezirante feliĉon, akiras morton kaj pereon – ĉu tio ne estas mizera?

于乎！君人者亦可以察若言矣。

Ho ve! Reĝoj sur homoj devas kompreni tiun vorton.

故治国有道，人主有职。

Tial do estas la vojo por regi landon kaj estas profecieco por estri homojn.

若夫贯日而治详，一日而曲列之，是所使夫百吏官人为也，不足以是伤游玩安燕之乐。

Aferoj, pri kiuj tagojn oni devas okupiĝi precize, aŭ pri kiuj iun tagon oni detaleme disponi, devas esti komisiata al cent oficistoj. Pro tiuj aferoj ne necesas forlasi al reĝo distriĝon, ludon, ripozon, ĝuon.

若夫论一相以兼率之，使臣下百吏莫不宿道乡方而务，是夫人主之职也。

Elekti unu kancleron, lasi kiun totale gvidi tuton, igi vasalojn, subulojn kaj cent oficistojn iri senĉese laŭ la vojo al la celo kaj al la plenumado de taskoj – jen kio estas la profecieco de homa estro.

若是，则一天下，名配尧，禹。

Tiel estos unuigita la mondo, kaj la nomo viciĝos kun Yao, Yu.

之主者，守至约而详，事至佚而功，垂衣裳，不下簟席之上，而海内之人莫不愿得以为帝王。

Ĉe tiu estro, la defendo estas plej konciza sed preciza, la administrado estas plej facila sed meritplena, do li, vestite en loza fajnkostumo, mem ne moviĝante de sur la tapiŝita seĝo, estos rigardata de ĉiuj homoj en la tuta mondo kiel la dezirata imperiestro.

夫是之谓至约，乐莫大焉。

Li estas t. n. la plej konciza, sed ĝuanta la plezuron plej grandan.

人主者，以官人为能者也；匹夫者，以自能为能者也。

Estro de homoj estas tiu, kiu povas administri la aliajn; nura laborulo estas tiu, kiu povas nur labori sole per sia kapablo.

人主得使人为之，匹夫则无所移之。

La estro de homoj uzas la aliajn por fari ion, sed nura laborulo ne povas komisii sian laboron al la aliaj.

百亩一守，事业穷，无所移之也。

Li nur konservas sian terenon je cent *muoj*, sed, kiam la entrepreno pli ekscesas, li ne povas komisii la eksceson al la alia.

今以一人兼听天下，日有余而治不足者，使人为之也。

Se nun, unu persono, regante totale la mondon, ne havas sufiĉan tempon por mastrumi, li igas la aliajn fari tion.

大有天下，小有一国，必自为之然后可，则劳苦秭頔莫甚焉，如是，虽臧获不肯与天子易势业。

Se oni, posedante la mondon en kazo granda aŭ la landon en kazo malgranda, devus fari ĉion nepre nur per sia forto, tiam, ege ŝarĝite de tro da peno kaj laciĝo, eĉ sklavo ne volus anstataŭi la rolon de Ĉiela filo.

以是县天下，一四海，何故必自为之？

Kial oni devus fari ĉion nepre per sia propra penado por bonorde teni la mondon aŭ kvar marojn?

为之者，役夫之道也，墨子之说也。

Tiel fari propramane estas la vojo de laborulo, kio plaĉas al Mozi.

论德使能而官施之者，圣王之道也，儒之所谨守也。

Prelegante virton, utiligi la kapablajn kaj administri je plenumado de aferoj – tio estas la vojo de sanktaj reĝoj, kiun konfuceanoj devas teni prudente.

传曰：“农分田而耕，贾分货而贩，百工分事而劝，士大夫分职而听，建国诸侯之君分土而守，三公总方而议，则天子共己而已。”

Estas dirite tradicie: “Terkulturistoj dividas laboron kulturadi kampojn, negocistoj dividas la laboron je vendado de varoj, cent metiistoj dividas laboron diligente je manufakturado, oficistoj dividas laboron je administrado, reĝoj-fondintoj kaj landestroj dividas laboron gardi la teritoriojn, Tri dukoj totale kontrolas taskojn de oficejoj kaj konsilas, kaj la Ĉiela filo nur sidas kun siaj brakoj krucataj.”

出若入若，天下莫不平均，莫不治辨，是百王之所同也，而礼法之大分也。

Se tiel ekstere kaj interne, la mondo estas ekvilibla, regata kun distingo, tiel same, kiel estis farata de cent reĝoj. Tio rezultas de la Granda Divido laŭ etiketkodo.

百里之地，可以取天下，是不虚，其难者在人主知之也。

Tio, ke kun teritorio je cent *lioj* kvadrato eblas preni la mondon, ne estas malvero. La malfacilo kuŝas en tio, ĉu la homa estro sciis la vojon.

取天下者，非负其土地而从之之谓也，道足以一人而已矣。

Preni la mondon ne signifas igi la aliajn oferi la terojn kaj obei al vi. Suficas, se troviĝas nur la vojo por unuigo de homojn.

彼其人苟一，则土地且奚去我而适它？

Se homoj unuanime submetiĝis al vi, kien do iliaj teroj povus foriri de vi?

故百里之地，其等位爵服足以容天下之贤士矣，其官职事业足以容天下之能士矣，循其旧法，择其善者而明用之，足以顺服好利之人矣。

Do eĉ la teritorio je cent *lioj* kvadratoe sufiĉas por akcepti saĝajn personojn de la mondo kiel altrangulojn kaj nobelojn, sufiĉas por akcepti kapablajn personojn kiel burokratojn, oficistojn aŭ entreprenistojn. Se, respektante la ekzistantajn leĝojn, vi elektas el ili la bonajn kaj utiligas ilin klare, tiam vi povas facile subigi tiujn, kiuj amas profiton.

贤士一焉，能士官焉，好利之人服焉，三者具而天下尽，无有是其外矣。

Unuanime kolektiĝas saĝuloj, enoficiĝas kapabluloj kaj submetiĝas profitamantoj – se la mondo pleniĝas je la triopo, tiam necesas nenio kroma.

故百里之地足以竭势矣，致忠信，著仁义，足以竭人矣，两者合而天下取，诸侯后同者先危。

Do la teritorio je cent *lioj* kvadratoe al vi sufiĉas por ensorbi potencojn, efektivigi lojalecon kaj fidelecon, manifesti decregulojn kaj juston, kaj sufiĉas por ensorbi homojn. Kun la duopo⁹⁸ unuigita vi povas preni la mondon. Kuniĝas landestroj, kaj kiu malfruas je akordiĝo, sentos sin endanĝerigota.

《诗》曰：“自西自东，自南自北，无思不服。”一人之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “De okcidento, de oriento, de sudo, de nordo, neniu intencas malobei.” Tio signifas la unuigon de homoj.⁹⁹

羿，彘门者，善服射者也；王良，造父者，善服驭者也；聪明君子者，善服人者也。

Yi kaj Fengmen estas tiuj, al kiuj submetiĝas bonaj pafarkistoj, Wang Liang kaj Zaofu estas tiuj, al kiuj submetiĝas bonaj stiristoj, saĝa klera nobluloj estas tiuj, al kiuj submetiĝas bonaj homoj.

人服而势从之，人不服而势去之，故王者已于服人矣。

Kiun obeas homoj, tiun sekvas potenco; kiun ne obeas homoj, tiun forlasas potenco. Do reĝo estas tiu, kiun obeas homoj.

故人主欲得善射，射远中微则莫若羿，彘门矣；欲得善驭，及速致远，则莫若王良，造父矣；欲得调一天下，制秦，楚，则莫若聪明君子矣。

Do, se iu estro de homoj volus havigi al si bonan pafarkiston, je preciza pafado por longa distanco neniu pli taŭgas ol Yi kaj Fengmen. Se li volus havigi al si bonan stiriston, je rapida spirado por langa distanco neniu pli taŭgas ol Wang Liang kaj Zaofu. Se li volus unuigi kaj bonteni la mondon, konkerante regnojn Qin kaj Chu, nenio estas pli bona ol uzi saĝajn kaj klerajn noblulojn.

其用知甚简，其为事不劳而功名致大，甚易处而极可乐也，故明君以为宝，而愚者以为难。

⁹⁸ La duopo montras la potencojn kaj la homojn.

⁹⁹ Citaĵo el *poezio*, *Da Ya*, *Wen Wang You Sheng*

Kun ilia saĝeco efektiviĝi la aferon estas tre simple, estas tre senlace, kaj eblas altigi pleje la nomon kaj eblas tre facile ĝojegi je apogeo de la gloro. Do oni rigardas kleran noblulon trezoro, la stultan plago.

夫贵为天子，富有天下，名为圣王，兼制人，人莫得而制也，是人情之所同欲也，而王者兼而有是者也。

Esti nobla kiel la Ĉeila Filo, havi riĉaĵon de la mondo, esti renoma kiel sankta reĝo, universale regi homojn, ke la homoj ne regu vin – tion dezirus same homoj laŭ sia pasio. Reĝo estas tiu, kiu posedas ĉe si ĉion.

重色而衣之，重味而食之，重财物而制之，合天下而君之，饮食甚厚，声乐甚大，台谢甚高，园囿甚广，臣使诸侯，一天下，是又人情之所同欲也，而天子之礼制如是者也。

Vestiĝi en diverskoloraj vestaĵoj, gustumi diversajn manĝaĵojn, posedi multajn riĉaĵojn, unuigi la mondon kaj fariĝi ties reĝo, trinkadi kaj manĝadi abunde, ĝui ĝissate belsonan muzikon, rigardi panoramon de sur altega konstruaĵo, promenadi en la propra vastega ĝardeno, fari landestrojn siaj vasaloj, unuigi la tutan mondon – tiuj estas ja deziro komuna por homoj laŭ dispozicio. Decreguloj kaj regado sub la Ĉiela Filo estas ja tia deziro.

制度以陈，政令以挟，官人失要则死，公侯失礼则幽，四方之国有侈离之德则必灭，名声若日月，功绩如天地，天下之人应之如景向，是又人情之所同欲也，而王者兼而有是者也。

Post kiam estas starigita la reĝimo kaj proklamitaj la dektreto-ordono, la oficistoj-burokratoj, se eraris grave, devas tuj morti, la dukoj-landestroj, erarintaj je etiketkodo, devas esti izolitaj aŭ ekzilitaj. Se ajnaj landoj je kvar direktoj havus ribelinklinon, ili nepre estos ekstermitaj. Ke la reputacio estu luma kvazaŭ suno kaj luno, la meritoj estu solidaj kvazaŭ la Ĉielo kaj Tero, homoj en la tuta mondo respondu, reflektante kvazaŭ al spegulo aŭ eĥo, – tion deziras same homoj laŭpasie. Reĝo ja povas universale posedi ĉe si ĉion.

故人之情，口好味而臭味莫美焉，耳好声而声乐莫大焉，目好色而文章致繁妇女莫众焉，形体好佚而安重闲静莫愉焉，心好利而谷禄莫厚焉，合天下之所同愿兼而有之，宰牢天下而制之若制子孙，人苟不狂惑戇陋者，其谁能睹是而不乐也哉！

Se temas pri la homa dispozicio, neniu povas ĝui pli ol reĝo, ekzemple, je frandaĵoj per buŝo, ĉu bonaj aŭ malbonaj, neniu povas gustumi pli bone, je plezuro per oreloj kiel belsono kaj muziko, neniu povas ĝui pli grande, je belkoloro de desegnoj kaj virinoj neniu povas havigi al si pli multe, je korpa ripozo kaj mensa paco-kvieto neniu povas distriĝi plie, je kora plezuro per profito kaj grenoj-salajroj neniu povas esti pli riĉa. La reĝo posedas universale ĉion, kio estas dezirata de ĉiuj en la mondo, regas firmgarde la mondon, kvazaŭ regi la siajn gefilojn kaj genepojn. Kiu, krom frenezulo kaj stultulo, ne

povus ĝui, vidante tiajn plezurojn?

欲是之主并肩而存，能建是之士不世绝，千岁而不合，何也？

Estroj, dezirantaj tion, svarmas kunŝultiĝante. Personoj, kapablaj je ties konstruado, ne ĉesas ekzisti en generacioj. Sed tamen ambaŭ ne konkordas en unuiĝo mil jarojn, kial?

曰：人主不公，人臣不忠也。

Mi diras, ke ĉar estroj de homoj ne estas senpartiemaj kaj subuloj ne estas lojalaj.

人主则外贤而偏举，人臣则争职而妒贤，是其所以不合之故也。

La estroj de homoj forpelas saĝulojn, kaj la subuloj, konkerante por postenoj, ĵaluzas saĝulojn, do ambaŭ ne povas konkordi unui kun la aliaj.

人主胡不广焉无恤亲疏，无偏贵贱，惟诚能之求？

Kial la estroj de homoj ne povas serĉi tion sincere, estante vastanimaj rilate al la proksimaj aŭ malproksimaj, estante sendeviaj rilate al nobelo-malnobelo,

若是，则人臣轻职业让贤而安随其后，如是，则舜，禹还至，王业还起。

Se ili povus, tiam la subuloj facile cedus la postenojn al saĝuloj kaj postsekvus la lastajn.

Tiel, al ili atingeblus reĝojn Shun kaj Yu, ankaŭ restarigeblas la reĝa afero.

功一天下，名配舜，禹，物由有可乐如是其美焉者乎？

Iu el Ili sukcesus unuigi la mondon, kaj lia nomo viciĝus egale kun Shun kaj Yu. Ĉu troviĝas iu plezuro pli bela ol tio?

呜呼！君人者亦可以察若言矣。

Ho! Reĝoj de homoj devas kompreni tiun opinion.

杨朱哭衢涂，曰：“此夫过举跬步而觉跌千里者夫！”哀哭之。

Iam Yang Zhu esploris sur disvojo, dirante: “Ĉi tiu unu paŝo, se erarus, forkondukos al la loko, pli diferenca ol la alia je mil *lioj*!” Kaj pti tio li tristis plorkrie.¹⁰⁰

此亦荣辱安危存亡之衢已，此其为可哀甚于衢涂。

De tiu forkvojo ja dependas honoro-malhonoro, paco-danĝero, postvivo-pereo, do endas ege tristi pro tio sur la disvojo.

呜呼哀哉！君人者，千岁而不觉也。

Sed, ho ve! Reĝoj de homoj ne komprenas tion mil jarojn.

无国而不有治法，无国而不有乱法；无国而不有贤士，无国而不有罢士；无国而不有愿民，无国而不有悍民；无国而不有美俗，无国而不有恶俗。

Troviĝas neniu ŝtato sen leĝo orda, neniu ŝtato sen leĝo malorda; neniu ŝtato sen saĝaj personoj, neniu ŝtato sen malvirtaj personoj; neniu ŝtato sen honestaj popolanoj,

¹⁰⁰ 杨朱 Yang Zhu estas pensulo pri egoismo, aperinta tuj post Mozi. Tiu sama epizodo pri la plorado sur disvojo apartenas ankaŭ al Mozi. Spite diferencon inter egoismo de Yanzhu kaj altruismo de Mozi, iuj konfuceanoj, kiel Mengzi, inklinas trakti ambaŭ pensulojn sendistinge.

neniu ŝtato sen perfortemaj popolanoj; neniu ŝtato sen belaj moroj, neniu ŝtato sen malbonaj moroj. .

两者并行而国在，上偏而国安，在下偏而国危，上一而王，下一而亡。

Du flankoj, supra kaj suba, paralele ekzistas ce unu ŝtato. Kie superas la subo, tie la ŝtato estas sekura; kie superas la subo, tie la ŝtato estas endanĝerigata. Se unuigite per la supro, estiĝas la reĝa lando; unuigite per la subo, ĝi pereas.

故其法治，其佐贤，其民愿，其俗美，而四者齐，夫是之谓上一。

Do, regate per leĝoj, helpate de saĝuloj, kun honestaj popolanoj kaj belaj moroj, tiuj kvar elementoj ekestas en ordo kaj la ŝtato povas unuiĝi laŭ supra flanko.

如是则不战而胜，不攻而得，甲兵不劳而天下服。

Tiam, ĝi venkas sen militi, akiras sen ataki, la tuta mondo submetiĝos sen lacigo de armeoj kaj soldatoj.

故汤以亳，文王以鄘，皆百里之地也，天下为一，诸侯为臣，通达之属莫不从服，无它故焉，四者齐也。

Do Tang kun la ĉefurbo Bo, la reĝo Wen kun Hao, havante unue nur la teritorion je cent ĵoj kvadrato, unuigis la mondon, kaj landestroj fariĝis la subulojn, kaj neniu el la koncernantaj landoj ne submetiĝis al ili. La kialo estis nenio alia, ke la kvar kondiĉoj estis en ordo.

桀，纣即序于有天下之势，索为匹夫而不可得也，是无它故焉，四者并亡也。

Sed, Jie kaj Zhou, potencaj mem en la mondo, ne povis konduki siajn laborulojn pro tio, ke la kvar kondiĉoj tute seniĝis.

故百王之法不同若是，所归者一也。

Kvankam malsamaj estu leĝoj ĉe cent reĝoj, tamen ĉiuj revenas al unu principo.

上莫不致爱其下而制之以礼，上之于下，如保赤子。

La supro senfine zorgas kun amo pri la subo kaj reguligas la lastan laŭ decreguloj, do la sintenado de la supro al la subo similas la klopodon al bebo.

政令制度，所以接下之人百姓，有不理者如豪末，则虽孤独鳏寡必不加焉。

Se iu reĝimo de politiko kaj dekreto, koncernanta la subajn popolojn, entenus en si eĉ plej etan malracion, tiam nepre oni ne aplikas ĝin al orfoj, soluloj, vidvoj kaj vidvinoj.

故下之亲上欢如父母，可杀而不可使不顺。

La subo vivas en tia intimeco kun la supro, kvazaŭ kun siaj gepatroj, ke ajna alilandano ne povus submetigi tiun subon al si krom povus mortigi ĝin.

君臣上下，贵贱长幼，至于庶人，莫不以是为隆正。

Reĝo kaj vasaloj, la supro kaj la subo, la nobeloj kaj la malnobeloj, la pliaĝaj kaj la malpli aĝaj, ĉiuj ĝis simplaj popolanoj prenas tion respektante kiel la ĝustan principon.,

然后皆内自省以谨于分，是百王之所以同也，而礼法之枢要也。

Kaj ĉiu interne memekzamenas por esti humila laŭ divido je stato kaj klaso, – tio estas same, kiel estis farata ĉe cent reĝoj, estas ja la pivoto de etiketkodo.

然后农分田而耕，贾分货而贩，百工分事而劝，士大夫分职而听，建国诸侯之君分土而守，三公总方而议，则天子共己而止矣。

Kaj ĉiu el ili plenumas asignitan al si la taskon laŭ divido je stato kaj klaso – kamparanoj terkulturas, negocistoj varojn kolektas kaj vendas, cent metiistoj faras diligente siajn laborojn, funkciuloj kaj grand-oficistoj okupiĝas je sia ofico kaj administrado, landfondintoj kaj landestroj gardas feŭditan landon, Tri dukoj ĝenerale direktas la aferojn kaj konsilas, kaj la Ĉiela Filo nur povas sidi kunpremante manojn.

出若入若，天下莫不平均，莫不治辨，是百王之所同而礼法之大分也。

Kaj ekstere kiel ankaŭ interne, ĉio ekvilibras en la mondo, ĉio estas regata kaj distingita en ordo, – jen kio estas ja la Granda Divido laŭ etiketkodo, same daŭranta seninterrompe dum cent reĝoj.

若夫贯日而治平，权物而称用，使衣服有制，宫室有度，人徒有数，丧祭械用皆有等宜，以是用挟于万物，尺寸寻丈莫得不循乎制度数量然后行，则是官人使吏之事也，不足数于大君子之前。

Koncerne al ĉiutaga mastrumado de ordinaraĵoj, al ekzamenado de aĵoj kaj mezurado de ilia utileco, al reguligo de vestaĵoj, al kriterio de palacoj kaj ĉambroj, al nombro de laboruloj, al laŭklasa konveneco de ĉiuj instrumentoj uzataj por funebro aŭ festo kaj ĉiuj porteblaj iloj, koncerne al io farenda nur post la mezurado de ciferoj kaj kvantoj ĝis unuoj de *chi*, *cun*, *xun*, *zhang*, – tiuj laboroj apartenas al pedeloj, uzataj sub oficistoj, sed, tute ne al grandaj nobluloj aŭ reĝoj, ĉar tiuj estas la taskoj, ne asignendaj al la lastaj.

故君人者立隆政本朝而当，所使要百事者诚仁人也，则身佚而国治，功大而名美，上可以王，下可以霸。

Preferinde, la reĝo de homoj devas starigi la politikan fundamenton por registaro, servigi sincerajn bonvolemajn personojn, okupiĝantajn je cento da aferoj. Tiam la regno estas bone regata dum li mem distras sin, granda estas lia merito, bela estas lia nomo. Se supre li povas fariĝi vera reĝo, se pli sube povas esti hegemoniulo.

立隆正本朝而不当，所使要百事者非仁人也，则身劳而国乱，功废而名辱，社稷必危，是人君者之枢机也。

Se, ne povante starigi ĝuste la fundamenton en la registaro, li servigas ne bonvolemulojn por trakti centon da aferoj, tiam la regno malordiĝos spite ke li mem laciĝos, fuŝa estos lia merito, malhonorigota estas lia nomo, kaj nepre estos endanĝerigita la regna sanktejo de la tero kaj grenoj. Jen tio estas la pivoto por reĝo de

homoj.

故能当一人而天下取，失当一人而社稷危，不能当一人而能当千人百人者，说无之有也。

Preni la mondon dependas de tio, ĉu eblus trovi almenaŭ unu personecon. Se perdita la unu personeco, tiam la regna sanktejo de la tero kaj la grenoj estos endanĝerigita. Mi ne aŭdis, ke iu, ne povante trovi unu personecon, povus eltrovi mil aŭ cent personojn.

既能当一人，则身有何劳而为，垂衣裳而天下定。

Kiu povis trovi la unu personecon, tiu povas fari la aferojn sen ajna laciĝo dum sidante mem en loza robo, kaj la mondo estas regata pace.

故汤用伊尹，文王用吕尚，武王用召公，成王用周公旦。

Do Tang uzis Yi Yin, la reĝo Wen uzis Lü Shang, la reĝo Wu uzis la dukon Shao, la reĝo Cheng uzis Zhou Gong Dan.

卑者五伯，齐恒公闺门之内，县乐奢泰游玩之修，于天下不见谓修，然九合诸侯，一匡天下，为五伯长，是亦无他故焉，知一政于管仲也，是君人者之要守也。

Eĉ ne tiagrade, sed estis ankaŭ ekzemplo de Kvin Hegemoniuloj. La duko Heng de Qi-regno instalas en sia interna ĉambro luksegan muzikilaron por disipe ludadi ĝissate, kvankam ne rigardate de la mondo bonedukita, tamen li, kelkfoje kuniginte landestrojn, fariĝis la ĉefo de kvin hegemoniuloj, ĉar li scipovis komisii la administradon al Guan Zhong. Tion devas teni al si atenteme la reĝoj de homoj.

知者易为之兴力而功名纂大，舍是而孰足为也？

Kiu scias tion, tiu facile pliiĝas la forton kaj faras sian nomon grandega kiel meritulo. Kiel oni povus sufiĉe fari sen tio?

故古之人有大功名者，必道是者也；丧其国，危其身者，必反是者也。

La antikvuloj, meritoplenaj kaj renomaj, estis nepre irintaj laŭ ĉi tiu vojo. Kiu perdis la landon kaj endanĝerigis sin, tiu nepre kontraŭis tion.

故孔子曰：“知者之知，固以多矣，有以守少，能无察乎？愚者之知，固以少矣，有以守多，能无狂乎？”此之谓也。

Do Konfuceo diris: “Da saĝeco de saĝuloj estas multe per si mem, do ĉu ili povus ne kompreni malmulton por gardi atenteme? Da saĝeco de stultuloj estas malmulte per si mem, do ĉu ili povus ne freneziĝi je multeco necesa por gardi atenteme?” Tio signifas la supre menciitan.

治国者，分已定，则主相，臣下，百吏各谨其所闻，不务听其所不闻；各谨其所见，不务视其所不见。

En la regno bone regata, kie jam estas establite pri la divido de laboroj, – la estro kaj la ministroj, vasaloj kaj subuloj, cent oficistoj, – ĉiu el ili okupiĝas prudente je sia aŭdata devo, do ne intervenas en la aferon neaŭdatan; ĉiu el ili prudente okupiĝas je la

devo pri afero vidata, sed ne pri la afero nevidata.

所闻所见诚以齐矣，则虽幽闲隐辟，百姓莫敢不敬分安制以化其上，是治国之征也。

Ĉiu honeste plenumas en ordo la taskon aŭdata kaj vidata, do loĝante en ajna loko fora aŭ kaŝita, popolanoj ne aŭdacas malestimi la asignitan al si taskon laŭ divido en la klasa sistemo kaj submetiĝas al la supro. Jen estas ja pruvo de la bone regata regno.

主道治近不治远，治明不治幽，治一不治二。

La vojo de la regado per la estro estas regi ion proksiman, sed ne regi ion malproksiman, regi la klaran, sed ne la malklaran, regi la unuan, sed ne la duan.

主能治近则远者理，主能治明则幽者化，主能当一则百事正。

Se la estro povas regi la proksiman, tiam la malproksima komprenos; se la estro povas regi la klaran, tiam la malklara ŝanĝiĝos kaj submetiĝos; se la estro povas trafe trakti unu aferon, tiam cent aferoj rektiĝos.

夫兼听天下，日有余而治不足者加此也，是治之极也。

Al tiu, kiu devas universale regi la mondon, mankas la tempo por regi la troabundan, do tio estas la plej bona vojo por la regado.

既能治今，又务治远；既能治明，又务见幽；既能当一，又务正百，是过者也。

Estas jam troeco, se iu, povante regi la prosiman, devus ankaŭ regi la foran, se povante regi la klaran, devus ankaŭ vidi la malklaran, se povante trakti la unu aferon, devus ankaŭ rektigi cent aferojn.

过，犹不及也；辟之是犹立直木而求其景之枉也。

Troeco ne estas pli bona ol nepleneco. Se diri parabole, tio similas, kvazaŭ iu, starigante arbon rekta, dezirus vidi ĝian ombron kurba.

不能治近，又务治远；不能察明，又务见幽；不能当一，又务正百，是悖者也，辟之是犹立枉木而求其景之直也。

Estas kontraŭdire, se iu, ne povante regi la proksiman, devus regi la foran, ne povante kompreni la klaran, devus vidi la malklaran, ne povante trakti unu aferon, devus rektigi centon. Se diri parabole, tio similas, kvazaŭ starigante kurban arbon, dezirus vidi ĝian ombron rekta.

故明主好要而暗主好详。

Klera estro ŝatas koncizan esencon, sed malklera estro ŝatas detalaĵojn.

主好要则百事详，主好详则百事荒。

Ĉe la estro, ŝatanta la koncizan esencon, la detalaĵoj de cent aferoj iras en ordo. Ĉe la estro, ŝatanta la detalaĵojn, cent aferoj malordiĝas.

君者，论一相，陈一法，明一指，以兼覆之，兼炤之，以观其盛者也。

Reĝo, konsilante nur al ministro, proklamante unu leĝon, klarigante per unu fingro, universale kovras ĉion, lumigas universale ĉion, kaj vidas en ĉio la sukcesan rezulton.

相者，论列百官之长，要百事之听，以饰朝廷臣下百吏之分，度其功劳，论其庆赏，岁终奉其成功以效于君。

La ministro devas asigni ĉefojn de cent burokratoj, administri cent aferojn, aranĝi por dividi rolojn de vasaloj kaj cent oficiroj en la registaro, mezuri ilian meriton kaj kontribuon, konsili pri ilia honorigo kaj laŭdado, kaj tiel en la jarfino raporti efike al la reĝo pri la sukceso.

当则可，不当则废。

Estas bone, se oni plenumas la taskon, sed se ne, oni estas eksigota.

故君人劳于索之，而休于使之。

Tiel do la reĝo unue zorgas serĉi la taŭgulojn, kaj poste mem senĝene ripozas, uzante ilin.

用国者，得百姓之力者富，得百姓之死者强，得百姓之誉者荣。

Se iu landreganto akiris la forton de siaj popolanoj, tiu riĉiĝas; se li akiris al si la popolanojn, pretajn je morto por gardi la landon, li estas forta; se li estas honorigita de popolanoj, li prosperas.

三得者具而天下归之，三得者亡而天下去之；天下归之之谓王，天下去之之谓亡。

Kiu akiris la menciitan triopon, al tiu submetiĝos la mondo; kiu perdis la triopon, tiun forlasos la mondo. Al kiu la mondo submetiĝas, tiu estas nomata la reĝo; kiun forlasis la mondo, tiu estas nomata la pereinto.

汤，武者，循其道，行其义，兴天下同利，除天下同害，天下归之。

Reĝoj Tang kaj Wu laŭ la vojo praktikis la juston, disvolvis la mondon per komuna profitigo kaj eliminis komunan nocon de la mondo, do la mondo submetiĝis al ili.

故厚德音以先之，明礼义以道之，致忠信以爱之，赏贤使能以次之，爵服赏庆以申重之，时其事，轻其任以调齐之，潢然兼覆之，养长之，如保赤子。

Tiel do ili iniciate ekzemplis al la popolo la virton multe, kun klara etiketkodo gvidis ĝin, kun plena lojaleco kaj fideleco amis ĝin, distingis ĝin laŭdante la saĝan kaj uzante la kapablan, kiujn gratulis per nobela titolo, kostumo, premio aŭ panegirado. Ili laborigis laŭ la konvena tempo, bonorde aranĝis laboron per malpezigo de ŝarĝoj, vaste ampleksis ĉiujn, nutrante, kreskigante kaj gardante, kvazaŭ bebojn.

生民则致宽，使民则綦理，辩政令制度，所以接天下之人百姓，有非理者如毫末，则虽孤独鰥寡必不加焉。

Ili plej indulge lasis la popolon vivi, uzis la poplon laŭ pleja rezono, ordigis politikon, dekretan, reĝimon kaj sistemon, tiel traktis la popolanojn de la mondo, ke preskaŭ ne troviĝus mistraktatoj, do eĉ al orfoj, soluloj, vidvoj, vidvinoj nepre estis eble eviti tian

mizeron.¹⁰¹

是故百姓贵之如帝，亲之如父母，为之出死断亡而不愉者，无它故焉，道德诚明，利泽诚厚也。

Do poplanoj estimis ilin kiel imperiestron, sentante ilin tre proksimaj kiel gepatrojn, senkonsidere pri sia vivo aŭ morto dediĉis sin al ili, ĉar estis klare je sincereco de la vojo kaj la virto kaj estis vere granda la profito.

乱世不然：污漫，突盜以先之，权謀傾覆以示之，俳优，侏儒，妇女之请謁以悖之，使愚詔知，使不肖临賢，生民則貧隘，使民則綦勞苦。

En malorda mondo estas ne tiel: la estro koruptas kaj ŝtelas antaŭ ol la aliaj, intrigas kaj renversas kiel ekzemplo, malmoralas ĉirkaŭate de aktoroj, nanoj kaj virinoj, igis stultulojn ordoni al intelektuloj, lasas al netaŭguloj gvidi saĝulojn, igas la popolon vivi malriĉe kaj mizere, faras la popolon laca kaj suferanta.

是故百姓賤之如𠂇匡，惡之如鬼，日欲司間而相與投藉之，去逐之。

Do la popolanoj malestimas lin kiel ĝibulon, malamas lin kiel ogron, ĉiutage dezirus kunjure forĵeti lin gvatante la ŝancon kaj finfine forpelas lin.

卒有寇難之事，又望百姓之為己死，不可得也，說無以取之焉。

Kiam la malamikoj abrupte alvenas ataki la landon, eĉ se li volus, ke la popolanoj mortu por li, ne eblas realiĝi, por nenion paroli jam pri tio.

孔子曰：“審吾所以適人，適人之所以來我也。”此之謂也。

Konfuceo diris: “Zorgu unue, kiel vi povas taŭgi al la alia, por ke la alia venu taŭgi al vi.” Tio signifas la supre menciitan.¹⁰²

伤国者何也？曰：以小人尚民而威，以非所取于民而巧，是伤国之大灾也。

Kio nocas regnon? Estas dirite – lasi al malgranduloj direkti la popolon kaj uzi aŭtoritaton, ekspluati la popolon maljuste aŭ lerte, – jen la granda plago, kiu nocas la regnon.

大国之主也，而好见小利，是伤国；其于声色，台榭，园囿也，愈厌而好新，是伤国；不好循正其所以有，啖啖常欲人之有，是伤国。

Se temas pri estro de granda regno: kiu ŝatas serĉi malgrandan profiton, tiu nocas la regnon. Kiu ŝatas ĉiam nesatigeble ion novan je belsono, belino, belvidejo kaj ĝardeno, tiu nocas la regnon. Kiu, ne estante kontenta je plibonigo de tio, kion jam posedas, deziras ĉiam avido kion la aliaj posedas, tiu nocas la regnon.

三邪者在匈中，而好以权謀傾覆之人断事其外，若是，则权轻名辱，社稷必危，是伤国者也。

¹⁰¹ En iu eldono la ideogramo 辯 estis uzata 辨. 藤井專英訳 荀子 新釈漢文大系 p. 330

¹⁰² En la libro 群書治要 ne troviĝas la ideogramo 適 en la lasta frazo. Tio similas al la evangelio el Luko: “kiel vi volas, ke la homoj faru al vi, faru ankaŭ al ili tiel same.”(6:31)

Nocas la regnon tiu, kiu, havante en la sino tiujn tri malicojn, ŝatas lasi personojn intrigemajn kaj renversemajn decidi pri aferoj k. a. kaj tiel malestimi la prestiĝon kaj malhonorigi la nomon, endanĝerigi nepre la regnan sanktejon de la tero kaj grenoj.

大国之主也，不隆本行，不敬旧法，而好诈故，若是，则朝廷群臣亦从而成俗于不隆礼义而好倾覆也。

Se la estro de granda regno ne estimas la bazon de konduto, ne respektas ekzistantan leĝon, sed ŝatas ŝanĝi la malnovan, tiam ankaŭ amaso da korteganoj, ministroj, vasaloj kaj servantaj subuloj ne estimas la etiketkodon kaj iĝas renversemaj.

朝廷群臣之俗若是，则夫众庶百姓亦从而成俗于不隆礼义而好贪利矣。

Se tiaj estas la korteganoj, ministroj, vasaloj kaj subuloj, tiam amaso da simplaj popolanoj, sekvantaj ilin, ne estimas la etiketkodon kaj iĝas avaraj profitekuloj.

君臣上下之俗莫不若是，则地虽广，权必轻；人虽众，兵必弱；刑罚虽繁，令不下通。

Se tiaj estas reĝo kaj vasaloj, la suproj kaj la suboj, tiam kvankam vasta la teritorio, tamen la aŭtoritato estas nepre malpeza; kvankam multe da homoj, tamen la armeo nepre esta malforta; kvankam estas multe da punleĝaro, tamen la ordono ne estas aŭdata de la suboj.

夫是之谓危国，是伤国者也。

T. n. endanĝerigi la regnon kaj noci la regnon.

儒者为之不然，必将曲辨：朝廷必将隆礼义而审贵贱，若是，则士大夫莫不敬节死制者矣。

Konfuceanoj faras ne tiel, sed nepre faras ion ajn kurban ĝuste distingebla. En kortego oni nepre estimas ĝuste etiketkodon por atentigi pri la divido inter la nobla kaj la malnobla. Tiel do, oficistoj kaj grandoficistoj ne devas ne respekti la lojalecon je la kosto de sia morto.

百官则将齐其制度，重其官秩，若是，则百吏莫不畏法而遵绳矣。

Cent burokratoj ĝuste tenas en ordo la reĝimon kaj rigardas la rangon kaj salajron kiel la gravan, tiel do cent funkciuloj ne devas ne respekti la leĝaron kaj observas la normon. Kiam oni ne impozas, la leĝoj estas ne observataj, kiel, tiam komercistoj ne devas ne esti honestaj kaj ne trompas.

Ĉe doganoj kaj merkatoj oni kontrolas sed ne impozas, oni devigas promeson por ne fari la malpermesitan nek fraŭdi. Tiel do, komercistoj-negocistoj ne devas ne esti honestaj kaj ne trompas.

百工将时斲伐，徧其期日而利其巧任，如是，则百工莫不忠信而不楛矣。

Oni lasas al cent metiistoj ĝustatempe okupiĝi je la tranĉado kaj hakado, indulgas je la limdato kaj profitigas laŭ ilia lerteco. Tiel do, ankaŭ la cent metiistoj ne devas ne esti lojalaj kaj fidelaj, ke ili ne fuŝlaboras.

县鄙则将轻田野之税，省刀布之敛，罕举力役，无夺农时，如是，则农夫莫不朴力而寡能矣。

En provincoj kaj ruroj oni ĝuste malpezigas la impostojn de kampoj, reduktas la takson per glav-mono kaj ŝtofo, moderigas plejble la fizik-laboron de servuto, ne rabas al kamparanoj la tempon de terkulturado. Tiel do ankaŭ kamparanoj ne devas ne esti simplaj-diligentaj, ke ili ne malcentralizas sian kapablon.

士大夫务节死制，然而兵劲。

Oficistoj kaj grandoficistoj plenumas la taskon je la kosto de morto, do ankaŭ la armeo estas forta.

百吏畏法循绳，然后国常不乱。

Cent funkciuloj respektas leĝaron kaj observas la normon, do la regno ĉiam ne malordiĝas.

商贾敦悫无诈则商旅安，货通财，而国求给矣。

Komercistoj-negocistoj estas honestaj kaj ne trompas, do komerco kaj vojaĝo iras pace. Cirkuladas mono kaj varoj, ke en la regno glate iras la proponado kaj la postulado.

百工忠信而不楛，则器用巧便而财不匮矣。

Cent metiistoj, lojalaj kaj fidelaj, ne fuŝlaboras, ili produktas ilojn lerte kaj konvene, do la varoj ne mankas.

农夫朴力而寡能，则上不失天时，下不失地利，中得人和，而百事不废。

Kamparanoj, simplaj kaj diligentaj, koncentras la kapablon, kaj supre ne perdas la tempon, donitan de la Ĉielo, nek sube la profiton, donitan de la Tero, 是之谓政令行，风俗美。

T. n. la politiko kaj la ordono iras bone, kaj la moro estas bela.

以守则固，以征则强，居则有名，动则有功。此儒之所谓曲辨也。

Tial do, la regno estas firma je la gardado, forta je la militirado, renoma je la restado ene, meritplena je la movado. Jen kio estas la rezulto de konfuceanismo, kiu klare distingas ion ajn kurban.

12 君道

LA VOJO DE REGANTOJ

有乱君，无乱国；有治人，无治法。

Troviĝas iu reganto, kiu malordigas, sed ne troviĝas iu lando, kiu malordigas sin. Estas persono, kiu regas, sed ne estas reguloj, kiuj regas.¹⁰³

羿之法非亡也，而羿不世中；禹之法犹存，而夏不世王。

Regulo de Yi, la pafarkisto, estas senmorta, sed Yi ne aperos plu en postaj generacioj. Regulo de Yu, la antikva reĝo de Xia-regno, ankoraŭ troviĝas, sed en la dinastio Xia ne aperis plu reĝo kiel Yu.

故法不能独立，类不能自行，得其人则存，失其人则亡。

Do reguloj ne povas stari sendepende, nek kategorioj povas funkcii per si mem, sed la persono ja ekzistas, kaj se la persono perdiĝas, tiam ili malfunkcias.

法者，治之端也；君子者，法之原也。

Reguloj estas ekstrema parto de la regado, la reganto estas la fonto de la reguloj.

故有君子则法虽省，足以遍矣；无君子则法虽具，失先后之施，不能应事之变，足以乱矣。

Do, se estas la reganto, tiam eĉ se la reguloj mankas, sufiĉe universale estas regate; se mankas la reganto, tiam eĉ se estus reguloj, eraras je la laŭtempa aplikado kaj ne eblas respondi al ŝanĝiĝantaj aferoj, tiel povas malordiĝi.

不知法之义而正法之数者，虽博，临事必乱。

Kiu, ne sciante pri la justeco de reguloj, nur multigas nombrojn de reguloj por pravigi, tiu, kvankam estus erudicia, tamen nepre perturbas la ĝustatempan traktadon de aferoj.

故明主急得其人，而暗主急得其势。

Do klera estro hastas akiri la taŭgan personon, malklera estro hastas havi la potencon. Eĉsede, tiam eĉ se la persono akiriĝas, tamen la persono ne estas akirita, tiam eĉ se la persono akiriĝas, tamen la persono ne estas akirita, tiam eĉ se la persono akiriĝas, tamen la persono ne estas akirita.

Kiu hastas akiri la personon, tiu ripozas mem, regante la landon, kaj tiel la merito estas granda kaj la renomo estas bela. La plej supra povas fariĝi reĝo, la malpli povas fariĝi hegemoniulo. Kiu ne hastas akiri la personon, nur hastante havi la potencon, tiu mem laciĝas, perturbante la landon, kaj tiel la merito restos neniam kaj la nomo estos

¹⁰³ Estas malfacile traduki ĉi tie la ideogramoj 君, 法. Se uzi la terminon “reĝo” por la unua, estus nedistingebla la diferenco inter 君道 kaj 王道. Se uzi la terminon “leĝo” por la dua, tiam ĝi enhavas ankaŭ la signifon “leĝo de la naturo”.

malhonorata, kaj la landa sanktejo estos endanĝerigita..

故君人者劳于索之，而休于使之。

Do la nobla reganto zorgas pri la serĉado de personoj, kaj ripozas, uzante ilin.

《书》曰：“惟文王敬忌，一人以择。”此之谓也。

Estas dirite en *Libro*: “La reĝo Wen, estante respektinde detenema, elektis unu personon.” Tio signifas la supre menciitan.¹⁰⁴

合符节，别契券者，所以为信也；上好权谋，则臣下百吏诞诈之人乘是而后欺。

Identigiloj, kiel kontramarkoj kaj biletoj, estas por kredigi, sed se la supro estas potencema kaj intrigema, tiam liaj ministroj, subuloj, cent funkciuloj iĝas fraŭdisttoj, kaj, uzante la ilojn, trompas.

探筹，投钩者，所以为公也；上好曲私，则臣下百吏乘是而后偏。

Lotoj, tirataj aŭ ĵetataj, estas por egaligi ŝancon, sed se la supro estas egoismeca, tiam liaj ministroj, subuloj, cent funkciuloj iĝas samaj, kaj, utiligante la ilojn, devias.

衡石，称县者，所以为平也；上好倾覆，则臣下百吏乘是而后险。

Pesiloj, kiel pesŝtono kaj vektpesilo, estas por ekvilibrigi, sed se la supro ŝatas kliniĝon, tiam liaj ministroj, subuloj, cent funkciuloj iĝas samaj, kaj kliniĝas.

斗斛敦概者，所以为喷也；上好贪利，则臣下百吏乘是而后丰取刻与，以无度取于民。

Volumenometroj kaj niveliloj estas por mezuri volumenojn, sed se la supro estas profitavida, liaj ministroj, subuloj, cent funkciuloj sekvas lin, prenante multe kaj donante avare, senlime ekspluatas la popolon.

故械数者，治之流也，非治之原也；君子者，治之原也。

Do nombro-mezuriloj estas por la regado nur disfluo, sed ne fonto; reĝo estas la fonto de la regado.

官人守数，君子养原，原清则流清，原浊则流浊。

Oficistoj kontrolas la nombrojn, la reĝo nutras la fonton; se la fonto pura, la fluo ankaŭ pura, se la fonto malpura, la fluo ankaŭ malpura.

故上好礼义，尚贤使能，无贪利之心，则下亦将褊辞让，致忠信，而谨于臣子矣。

Do se la supro ŝatas decregulojn, estimas la saĝan kaj uzas la kapablan, ne estas profitavida en sia koro, tiam ankaŭ la subo intercedas humile kaj modeste ĝisfunde, servas lojale kaj fidinde, diligentas kiel subuloj kaj filoj.

如是，则虽在小民，不待合符节，别契券而信，不待探筹，投钩而公，不待衡石，称县而平，不待斗斛敦概而喷。

Tiel do, ankaŭ ĉe malgranduloj-popolanoj, oni fidas unu la alian sen atendi la uzadon de identigiloj, sen biletoj, oni egalas je rajtoj sen atendi la uzadon de lotoj, tirata aŭ ĵetata,

¹⁰⁴ Citaĵo el 尚书，康诰. Sed en la nuna eldono ne troviĝas en la plena formo.

oni interŝanĝas juste sen atendi la uzadon de ŝtonpesiloj kaj vertpesiloj, oni mezuras ĝuste sen atendi la uzadon de volumenometroj kaj niveliloj.

故赏不用而民劝，罚不用而民服，有司不劳而事治，政令不烦而俗美，百姓莫敢不顺上之法，象上之志，而劝上之事，而安乐之矣。

Do sen laŭdado la popolo diligentas, sen punado la popolo obeas, sen lacigo de oficistoj estas regate en ordo, sen apogo sur politiko kaj dekretoj la moro beliĝas, popolanoj ne povas ne sekvi la regulojn far de la supro, konformas al aspiro de la supro, diligentas je la plenumado de aferoj por la supro, kaj ĝuas la ĝojplenan vivon.

故藉敛忘费，事业忘劳，寇难忘死，城郭不待饰而固，兵刃不待陵而劲，敌国不待服而诘，四海之民不待令而一。

Do ili senĝene pagas la imposton, entreprenas senlace, alfrontas la malfacilon sen timo de sia morto, kaj kasteloj estas firmaj sen ajna ornamaĵo, armeo kaj armiloj estas fortaj sen polurado, malamikaj landoj obeas sen venko. Kaj tiel la popolo de la tuta mondo unuiĝos sen ordono.

夫是之谓至平。

Tio estas nomata la pleja paco.

《诗》曰：“王犹允塞，徐方既来。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Kie estas plene de la reĝa aspiro, tien eĉ de Xu-lando oni alvenas”. Tio signifas la supre menciitan.¹⁰⁵

请问为人君？ 曰：以礼分施，均遍而不偏。

Kiu do estas ja homeca reĝo? Mi diru: tiu, kiu dividas kaj distribuas laŭ decreguloj juste kun egaleco kaj sen flankeniĝo.

请问为人臣？ 曰：以礼待君，忠顺而不懈。

Kiu do estas homeca ministro? Mi diru: tiu, kiu servas al sia reĝo laŭ decreguloj kaj kun lujaleco-obeemo sen pigreco.

请问为人父？ 曰：宽惠而有礼。

Kiu do estas homeca patro? Mi diru: tiu, kiu estas indulgema kaj favora kun decreguloj.

请问为人子？ 曰：敬爱而致文。

Kiu do estas homeca filo? Mi diru: tiu, kiu respektplene amas kun pleja civilizeco.

请问为人兄？ 曰：慈爱而见友。

Kiu do estas homeca pliaĝa frato? Mi diru: tiu, kiu kompatplene amas kun frateco.

请问为人弟？ 曰：敬谦而不苟。

Kiu do estas homeca malpliaĝa frati? Mi diru: tiu, kiu respektplene humiliĝas sen fuŝe.

请问为人夫？ 曰：致功而不流，致临而有辨。

¹⁰⁵ Citaĵo el 诗经，大雅，常武.

Kiu do estas homeca edzo? Mi diru: tiu, kiu estas pleje diligenta sen drivado kaj staras alta je observado kun kapablo de distingo. .

请问为人妻? 曰: 夫有礼, 则柔从听侍; 夫无礼, 则恐惧而自竦也。

Kiu do estas homeca edzino? Mi diru: tiu, kiu, al la ĝentila edzo kun decreguloj, ĝentile sekvas kaj, aŭdante, servas, sed al la senĝentila edzo, timas humile kaj restas senmove. 此道也, 偏立而乱, 俱立而治, 其足以稽矣。

Tiu vojo eblas nur se ambaŭ flankoj estu bone regataj, se staras nur unu flanko, tiam senordiĝas. Tio estas sufiĉe pruvebla.

请问兼能之奈何? 曰: 审之礼也。

Kiel do universale povas esti en ordo? Mi diru: klarigi decregulojn.

古者先王审礼以方皇周浹于天下, 动无不当也。

La antikvaj reĝoj klarigis decregulojn kaj disvastigis tion al la tuta mondo, kaj ilia agado neniam maltrafis.

故君子恭而不难, 敬而不巩, 贫穷而不约, 富贵而不骄, 并遇变态而不穷, 审之礼也。

Do noblulo estas humila kaj evitas malfacilon, respektema kaj maltima, ne ĉagreniĝas eĉ en povreco kaj krizo, ne arogantas en riĉo kaj honoro, ne embarasiĝas ĉe ajna abrupta ŝanĝo – tio estas dank' al la klerigo laŭ decreguloj.

故君子之于礼, 敬而安之; 其于事也, 径而不失; 其于人也, 寡怨宽裕而无阿; 其为身也, 谨修饰而不危; 其应变故也, 齐给便捷而不惑; 其于天地万物也, 不务说其所以然而致善用其材; 其于百官之事, 技艺之人也, 不与之争能而致善用其功; 其待上也, 忠顺而不懈; 其使下也, 均遍而不偏; 其交游也, 缘义而有类; 其居乡里也, 容而不乱。

Tiel do la noblulo laŭ decreguloj vivas respektema en paco, je sia plenumo de aferoj ne eraras eĉ sur streta pado, rilate al homoj ne estas venĝema, sed tolerema kaj neniam flatas, en la sintenado estas prudenta je ornamo kaj evitas danĝeron, ĉe ajna abrupta ŝanĝiĝo ĝuste kaj subite respondas en ordo kaj ne ŝanceliĝas, kaj ankaŭ rilate al la Ĉielo, la tero kaj ĉiuj aĵoj, kia ajn estu la kialo, faras ĉiujn materialojn utilaj, kaj ankaŭ koncerne al aferoj de cent oficistoj kaj metiistoj-artistoj, ne instigante inter ili vantan konflikton, bonege utiligas ilian meriton. Do oni al la supro estas lojala-obeema, ne maldiligentas, al la subo traktas ĉiujn egale kaj senpartie, je reciproka interrilato kun homoj estimante kunligitecon kaj justecon, distingas laŭ klasifiko, kaj je sia loĝado en la hejmo oni, estante indulgema, ne malordiĝas.

是故穷则必有名, 达则必有功, 仁厚兼覆天下而不闵, 明达用天地, 理万变而不疑, 血气和平, 志意广大, 行义塞于天地致间, 仁知之极也。

Tial, estante en kia ajn mizero, li nepre havas la renomon; atinginte sukceson, li nepre havas la meriton. Lia granda bonvoleco kovras universale la mondon senĝene. Lia klereco atingas la Ĉielon kaj la teron, ĉio laŭ racio ŝanĝiĝas sendube, sango kaj energio

Qi harmonias en paco, la strebo estas vasta kaj granda, la justo je konduto estas plen-plena inter la Ĉielo kaj la tero, kaj li ĝisfunde scias la bonvolecon.

夫是之谓圣人，审之礼也。

Tiu estas ja nomata la Sanktulo, kiu mastras la decregulojn.

请问为国？曰：闻修身，未尝闻为国也。

Kio estas «fari regnon»? Mi diras: Mi aŭdas pri sinkulturanto, sed neniam aŭdis pri regnonfaranto.

君者，仪也，仪正而景正；君者，槃也，槃圆而水圆；君者，盂也，盂方而水方。

Reĝo estas formalajo, se la formo estas rekta, la reflektado ankaŭ iĝas rekta; reĝo estas pelvo, se la pelvo estas ronda, la akvo ankaŭ iĝas ronda; reĝo estas ujo, se la ujo estas kvadrata, la akvo ankaŭ iĝas kvadrata.¹⁰⁶

君射则臣决。楚庄王好细腰，故朝有饿人。

Se la reĝo pafas, tiam la subulo iĝas la ellasilo. Zhuang, la reĝo de Chu-regno, ŝatis maldikan lumbon, do el iliaj korteganoj troviĝis malsatiĝantoj.

故曰：闻修身，未尝闻为国也。

Do mi diras: Mi aŭdas pri sinkulturanto, sed neniam aŭdis pri regnonfaranto.

君者，民之原也，原清则流清，原浊则流浊。

Regnestro estas la fonto por la popolo. Se la fonto estas pura, la fluo estas pura; se la fonto malpura, ankaŭ la fluo malpura.

故有社稷者而不能爱民，不能利民，而求民之亲爱己，不可得也。

Do, se la estro de la regna sanktejo ne povas ami la popolon, nek povas profitigi la popolon, tiam li neniom povas postuli de la popolo intiman amon al si.

民不亲不爱，而求其为己用，为己死，不可得也。

Ne intimante nek amante la popolon, li ne povas postuli de ĝi labori por si aŭ morti por si.

民不为己用，不为己死，而求兵之劲，城之固，不可得也。

Se ne povante al si laborigi la popolon, ne povante lasi la popolon morti por si, li ne povas esperi, ke soldatoj estu fortaj kaj la citadelo estu firma.

兵不劲，城不固，而求敌之不至，不可得也。

Se soldatoj ne estas fortaj, se la citadelo ne estas firma, li ne povas esperi, ke malamikoj ne ataku lin.

¹⁰⁶ Iu prenas la ideogramon 仪 kiel gnomonon. Vd. 方达, p.214 Esploristoj konsideras, ke devas sekvi la frazo post tiu 民者景也, kaj post 君者槃也 - 民者水也.

敌至而求无危削，不灭亡，不可得也。

Kiam la malamikoj alvenas, li ne povas esperi, ke estu nek danĝero de redukto nek pereco.

危削，灭亡之情举积此矣，而求安乐，是狂生者也。

En tia situacio, akumulita per danĝereco de redukto kaj pereco, povas esperi la pacan komforton nur vivanta frenezulo.

狂生者，不胥时而落。

La vivanta frenezuro estas tiu, kiu estas falanta, ne konsiderante la tempon.

故人主欲强固安乐，则莫若反之民；欲附下一民，则莫若反之政；欲修政美国，则莫若求其人。

Do, la estro de homoj, deziranta fortecon, firmecon, pacon, komforton, ne devas kontraui al la popolo; se li dezirus submetigi la popolon en unu tuto, li ne devas kontraui al ĝusta politiko; se li dezirus plibonigi la politikon por bela lando, li ne devas ne serĉi la taŭgan personon.

彼或蓄积而得之者不世绝，彼其人者，生乎今之世而志乎古之道。

Tia persono, strebanta akumuladi kaj akiradi virton, ne ĉesas en la mondo kaj vivas ankaŭ nun, aspirante al la antikva vojo.

以天下之王公莫好之也，然而于是独好之；以天下之民莫欲之也，然而于是独为之；好之者贫，为之者穷，然而于是独将为之也，不为少顷辍焉。

Eĉ se reĝoj kaj dukoj en la mondo ne ŝatas tion, tamen li sola ŝatas tion; eĉ se la popolo en la mondo ne dezirus tion, tamen li sola praktikas tion. Kiel ajn malriĉa estu la ŝatanto, kiel ajn mizera estu la praktikanto, li sola sendepende daŭrigas fari tion kaj neniom devojiĝas nek ĉesigas.

晓然独明于先王之所以得之，所以失之，知国之安危，臧否若别白黑。

Komprenante klare kial la antikvaj reĝoj sukcesis akiri aŭ perdis, li sciigas pri landa paco kaj danĝero, bono kaj malbono, kvazaŭ distingo inter blanko kaj nigro.

是其人者也，大用之，则天下为一，诸侯为臣；小用之，则威行邻敌；纵不能用，使无失其疆域，则国终身无故。

Se grandskale utiligi tiun personon, eblas unuigi la mondon kaj fari landestrojn vasaloj; eĉ se malgrandskale, eblas montri prestiĝon sur najbaroj kaj malamikoj. Se ne eblas utiligi la personon, la teritorio estos perdita, kaj la lando finiĝos sendube.

故君人者爱民而安，好士而荣，两者无一焉而亡。

Tial do estro de homoj amas la popolon kaj ĝuas pacon, ŝatas la personon kaj prosperas. Sen ambaŭ kondiĉoj li pereos.

《诗》曰：“介人维藩，大师维垣。” 此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Personoj estas gardovando, ministroj estas ŝtonmuro.” Tio

signifas la supre menciitan.¹⁰⁷

道者，何也？曰：君道也。

Kio estas la Vojo? Mi diras: Tio estas la Vojo de estro.

君者，何也？曰：能群也。

Kiu estas la estro? Mi diras: Tiu, kiu kapablas krei komunumon.

能群也者，何也？曰善生养人者也，善班治人者也，善显设人者也，善藩饰人者也。

Kio estas la kapablo por krei komunumon? Mi diras: bone vivteni kaj nutri homojn, bone organizi kaj regi homojn, bone elmontri kaj asigni homojn, bone distingi kaj ornami homojn.

善生养人者，人亲之；善班治人者，人安之；善显设人者，人乐之；善藩饰人者，人荣之。

Kiu bone vivtenas kaj nutras homojn, al tiu la homoj iĝas intimaj; kiu bone organizas kaj regas homojn, ĉe tiu la homoj iĝas pacaj; kiu bone elmontras kaj asignas homojn, ĉe tiu la homoj ĝojas; kiu bone ŝirmas kaj ornamas, ĉe tiu la homoj prosperas.

四统者俱而天下归之，夫是之谓能群。

Al kompleta posedanto de tiuj kvar punktoj apartenas la mondo, – tio estas t. n. la kapablo por krei komunumon.

不能生养人者，人不亲也；不能班治人者，人不安也；不能显设人者，人不乐也；不能藩饰人者，人不荣也。

Al tiu, kiu ne povas vivteni kaj nutri homojn, la homoj ne iĝas intimaj; ĉe tiu, kiu ne povas organizi kaj regi homojn, la homoj ne iĝas pacaj; ĉe tiu, kiu ne elmontras kaj ne asignas homojn, la homoj ne ĝojas; ĉe tiu, kiu ne povas ŝirmi kaj ornami homojn, la homoj ne prosperas.

四统者亡而天下去之，夫是之谓匹夫。

Ne posedanton de tiuj kvar punktoj forĵetas la mondo, – tio estas t. n. vulgarulo.

故曰：道存则国存，道亡则国亡。

Do mi diras: Kie ekzistas la Vojo, tie ekzistas la lando; kie pereas la Vojo, tie pereas la lando.

省工贾，众农夫，禁盗贼，除奸邪，是所以生养之也。

Restrikti metiistojn kaj komercistojn, multigi terkulturistojn, malpermesi ŝtelistojn kaj rabistojn, elimini kanajlojn kaj friponojn, – tio estas ja la vivtenado kaj la nutrado.

天子三公，诸侯一相，大夫擅官，士保职，莫不法度而公，是所以班治之也。

Ke la Ĉielan Filon servas Tri Duko, ĉiun landestron servas unu ministro, grandoficistoj lertas je administrado, personoj-funkciuloj bone tenas la aferojn, ĉio estas farata juste

¹⁰⁷ Citaĵo el 诗经, 大雅, 板. Iuj esploristoj prenas 大师 kiel popoloamason, aliaj – kiel unu el Tri Duko 三公.

laŭ leĝoj kaj reguloj, – tio estas ja la organizado kaj la regado.

论德而定次，量能而授官，皆使其人载其事而各得其所宜。

Decidi vicordon konsidere al virto, enoficigi kalkulante kapablon, lasi ĉiun okupiĝi je sia afero kaj havi la taŭgan postenon.

上贤使之为三公，次贤使之为诸侯，下贤使之为士大夫，是所以显设之也。

La plej saĝan uzi kiel Tri Dukojn, la duan saĝan uzi kiel landestron, la trian saĝan uzi kiel grandoficiston, – tio estas ja la elmontrado kaj la asignado.

修冠弁衣裳，黼黻文章，珮琢刻镂皆有等差，是所以藩饰之也。

Diverseco je ĉapo, kufo, vesto, robo; diverseco je desegnoj kun koloroj; diverseco je skulptaĵo, gravuraĵo, inkrustaĵo, en ĉio estas diferencigo kaj distingo. -Jen estas ja la ŝirmado kaj la ornamado. -

故由天子之于庶人也，莫不骋其能，得其志，安乐其事，是所同也。

Tiel do de la Ĉiela Filo ĝis simplaj popolanoj ĉiu ne devas ne aperigi sian kapablon, efektivigi sian aspiron, pace ĝui je sia afero, – jen en kio troviĝas ja la sameco.

衣暖而食充，居安而游乐，事时制明而用足，是又所同也。

Vestas sin varme kaj manĝas plene, loĝas pace kaj vojaĝas ĝoje, laboras ĝustatempe, diligente, klare kaj sufiĉas je uzado, – jen en kio ankaŭ troviĝas la sameco.

若夫重色而成文章，重味而成珍备，是所衍也。

Riĉigi kolorojn kaj desegnaĵojn, riĉigi frandaĵojn kaj kuiri bongustaĵojn – tio estas ja la tolerebla libereco.

圣王财衍以明辨异，上以饰贤良而明贵贱，下以饰长幼而明亲疏，上在王公之朝，下在百姓之家，天下晓然皆知其非以为异也，将以明分达治而保万世也。

Sankta reĝo akumulas riĉaĵojn libere kaj distingas diferencojn klare, la supro ornamas saĝulojn-bonulojn kaj per tio distingas la nobelan-malnobelan, la subo ornamas la pliaĝan-malpliaĝan kaj distingas la intiman-malintiman, kaj tiel supre en la kortego de reĝoj-dukoj, sube en la domoj de popolanoj, ĉiuj en la tuta mondo bone komprenas tion ne kiel diferencigon por diskriminacio, sed kiel klaran dividon por atingi la regadon kaj bonteni multajn generaciojn. .

故天子，诸侯无靡非之用，士大夫无流淫之行，百吏无怠慢之事，众庶百姓无奸怪之俗，无盗之罪，其能以称义遍矣。

Do la Ĉiela Filo kaj landestroj ne dronas sin en tro luksan malŝparemon, grandoficistoj ne mergiĝas en la diboĉadon, cent oficistoj ne maldiligentas je la aferoj, simplaj popolamasoj ne absorbiĝas en kanajla aŭ fripona moraĉo nek krimas je ŝtelado, – tion eblas nomi “universaligo de justo”.

故曰：“治则衍及百姓，乱则不足及王公。”此之谓也。

Do estas dirite: “Ĉe la bona regado atingas la libera tolerebleco la popolanojn, ĉe la

malordo atingas la malsufiĉo la reĝon-dukon.” Tio signifas la supre menciitan.

至道大形：隆礼至法则国有常，尚贤使能则民知方，綦论公察则民不疑，赏克罚偷则民不怠，兼听齐明天下归之。

La Granda formigo de la pleja Vojo kuŝas jen en tio: Faras la landon konstanteca la respektado de decreguloj kaj leĝoj, faras la popolon scianta la direkton la estimo de saĝuloj kaj la utiligo de kapabluloj, faras la popolon maldubema la vasta diskutado kaj publika esplorado, faras la popolon diligenta la laŭdado de sinregantoj kaj punado de ŝtelintoj, faras la mondon obeema al la universala aŭskultado kaj la ordiga klarvido.

然后明分职，序事业，材技官能，莫不治理，则公道达而私门塞矣，公义明而私事息矣。

Sekve, klare dividi la taskojn-laborojn, vicigi la aferojn-entreprenojn, utiligi kapablajn inĝenierojn kaj funkciulojn, se tiel, estos neniam ne regate en bonordo, ĉar publika Vojo estas atingita kaj egoismeca pordo estas ŝtopit, kaj tiel klariĝos la publika justo kaj ĉesiĝos la egoismeca konduto.

如是，则德厚者进而佞说者止，贪利者退而廉节者起。

Tiel do, antaŭen iros virtuloj kaj haltos flatemuloj, retiriĝos avidaj profitemuloj kaj leviĝos honestuloj.

《书》曰：“先时者杀无赦，不逮时者无赦。”

En la *Libro* estas dirite: “Sen pardoni mortigu tiun, kiu anticipas tro frue ol ĝustatempe; sen pardoni mortigu tiun, kiu malfruas pli ol ĝustatempe.”¹⁰⁸

人习其事而固，人之百事如耳目鼻口之不可以相借官也，故职分而民不探，次定而序不乱，兼听齐明而百事不留。

Homoj lernas firme sian aferon, kaj cent aferoj de la homo, estante samaj, kiel oreloj, okuloj, nazo kaj buŝo, ne estas prunteblaj per la aliaj funkciuloj, do pro la divido de profesioj popolanoj jam ne zorgas pri alies taskoj, sekve kun vicoj deciditaj la sistemo ne malordiĝas, sub la universala aŭskultado kaj la klara akraĵo ne stagnas cent aferoj.

如是，则臣下，百吏至于庶人莫不修己而后敢安正，诚能而后敢受职，百姓易俗，小人变心，奸怪之属莫不反恚。

Tiel do, subuloj, de cent funkciuloj ĝis simpluloj ne devas ne sinkulturadi kaj rezulte povas fariĝi pacemaj kaj rektaj, fariĝi sinceraj kaj kapablaj por ricevi profesion. Popolanoj facile ŝanĝas vulgaran moron, malgranduloj ŝanĝiĝas je koro, eĉ kanajloj k. s. ne devas ne ŝanĝiĝi honestaj.

夫是之谓政教之极。

Tio estas nomata la kulmina politiko kaj instruado.

¹⁰⁸ Citaĵo el pseŭda arkivo 伪古文尚书, 胤征, kie estas kritikata la astrologo, ne zorganta pro ebriiĝo pri averto de suneklipso.

故天子不视而见，不听而聪，不虑而知，不动而功，块然独坐而天下从之如一体，如四[月只]之从心。

Do la Ĉiela Filo vidas, ne rigardante; aŭdas, ne aŭskultante; scias, ne pripensante; meritas, ne moviĝante; mem sidante sola, la tuta mondo obeas kiel unu tuto de la korpo, samkiel kvar membroj obeas la koron.

夫是之谓大形。《诗》曰：“温温恭人，维德之基。”此之谓也。

Tio estas nomata la Granda formigo. Estas dirite en *Poezio*: “Milda humilulo havas ja la bazon de virto.” Tio signifas la supre menciitan.

为人主者，莫不欲强而恶弱，欲安而恶危，欲荣而恶辱，是禹，桀之所同也。

Neniu el estroj ne deziras esti forta kaj malamas esti malforta, deziras pacon kaj malamas danĝeron, deziras prosperon kaj malamas honton, – tio estas sama kaj por sankta Yu, kaj por kruela Jie.

要此三欲，辟此三恶，果何道而便？曰：在慎取相，道莫径是矣。

Por efektivi tiujn tri dezirojn kaj eviti tiujn tri malbonon, kia Vojo estas konvena? Mi diras: Elektu skrupule ministron, neniu vojo estas pli proksima ol tio.

故知而不仁不可，仁而不知不可，既知而仁，是人主之宝也，而王霸之佐也。

Al saĝulo estas ne permesebla la malbonvolemo, al bonvolemo estas ne permesebla la malsaĝeco. Kaj saĝeco kaj bonvolemo – estas la trezoro de la estro de homoj kaj la helpilo de la hegemoniulo.

不急得，不知；得而不用，不仁。无其人而幸其功，愚莫大焉。

Tiu, kiu ne hastas akiri taŭgulon, estas malsaĝa; Tiu, kiu, akirinte lin, ne uzas, estas malbonvolema. Sen trovi la taŭgan personon, nur esperi sukceson estas tro stultege.

今人主有六患：使贤者为之，则与不肖者规之；使知者虑之，则与愚者论之；使修士行之，则与污邪之人疑之。

Estas nun ses malsanoj al estroj de homoj: Kvankam uzante por la regado saĝulon, tamen samtempe lasi al sentaŭguloj kontroli sur lin; komisiante intelektulon klopodi pri la regado, samtempe lasi al stultuloj pridisputi lin; komisiante profesiulon fari la regadon, samtempe lasi al malpuraj friponoj dubi pri li.

虽欲成功，得乎哉！譬之是犹立直木而恐其景之枉也，惑莫大焉。

Se tiel, kiom ajn dezirus la sukceson, oni ne povas atingi tion! Se diri parabole, kvazaŭ oni timas, ke kurbiĝus la ombro de la arbo, staranta rekte. Nenia dubo pli granda ol tio. 语曰：“好女之色，恶者之孽也。公正之士，众人之痤也。循乎道之人，污邪之贼也。”

Estas dirite: “Beleco de bona virino ŝajnas plago al malbonulinoj. Justa personeco ŝajnas akneo al popolgrego. Kiu estas sekvanta la justan vojon, tiu ŝajnas kanajlo al malpuraj maliculoj.”

今使污邪之人论其怨贼而求其无偏，得乎哉！

Se nun, lasante al la malpura maliculo kritiki lian melbenitan kanajlon, postuli de li senpartiemon, kiel eblus sukcesi?

譬之是犹立枉木而求其景之直也，乱莫大焉。

Tio similas, kvazaŭ postuli rektecon de la ombro, kies arbo staras kurba. Nenio estas absurdo pli granda ol tio.

故古之人之为之不然。其取人有道，其用人有法。取人之道，参之以礼；用人之法，禁之以等。

La antikvuloj faris ne tiel. Ili alprenis personojn laŭ justa Vojo, uzis personojn laŭ justa leĝo. Estis la Vojo ĉe la dungado de personoj, estis decreguloj por la estimado. Ilia rimedo ĉe la uzado de personoj malpermesis la egaligon.

行义动静，度之以礼；知虑取舍，稽之以成；日月积久，校之以功。

Konduti laŭ justo kaj movi sin kviete, mezuri laŭ decreguloj; juĝi ion je prenado kaj forĵetado, konsiderante la rezulton; juĝi ies dumlonge akumulatan penadon, kalkulante la meriton.

古卑不得以临尊，轻不得以县重，愚不得已谋知，是以万举不过也。

Tiel do ne eblas al malnobelo kunesti nobelon egale, ne eblas al malgravulo juĝi gravulon, ne eblas al stultulo taksi saĝulon, – per tio ne okazas misagoj en dek mil entreprenoj.

故校之以礼，而观其能安敬也；与之举措迁移，而观其能应变也；与之安燕，而观其能无流悖也；接之以声色，权利，忿怒，患险，而观其能无离守也。

Do ekzamenante la agon laŭ decreguloj observi la kapablon laŭ respektindeco; kune laborante en la procezo de entreprenoj observi la kapablon de fleksebleco je laŭokaza traktado; kune bankedante observi la kapabon de sinregado al senmoraligo; vidante la aspekton de voĉo kaj vizaĝo, la avidon al potenco kaj profito, la emocion je kolero kaj indigno, la sintenon je malsano kaj danĝero, observi la kapablon je singardemo.

彼诚有之者与诚无之者，若白黑然，可诘邪哉！

Ĉu li estas honesta aŭ malhonesto, montriĝas klare, kiel blanko kaj nigro, kaj ne eblas erari je distingo.

故伯乐不可欺以马，而君子不可欺以人，此明王之道也。

Koncernante ĉevalojn oni ne povas trompi la ĉevalekspertiziston. rilate personojn oni ne povas trompi la noblulon. Tio estas ja la Vojo de klera reĝo.

人主欲得善射，射远中微者，县贵爵重赏以招致之，内不可以阿子弟，外不可以隐远人，能中是者取之，是岂不必得之之道也哉！虽圣人不能易也。

Se iu estro de homoj volus havigi al si la bonan pafarkiston, kapablan ĝuste trafi malproksiman celtabulon, li devas inviti tiun per nobela titolo kaj alta salajro, kaj li ne

devas favore preferi sian samsangulojn de interne, nek forigi malproksimulojn de ekstere. Li dungas nur la kapablan trafi celtabulon. Nur tio estas ja la vojo por akiri la bonan pafarkiston. Tion ne povas ŝanĝi eĉ la sanktuloj.

欲得善驭速致远者，一日而千里，县贵爵重赏以招致之，内不可以阿子弟，外不可以隐远人，能致是者取之，是岂不必得之之道也哉！虽圣人不能易也。

Se li volus dungi la bonan koĉeron, kapablan rapide veturigi foren je mil *lioj* en unu tago, li devas inviti tiun per nobela titolo kaj alta salajro, ne preferante favore siajn samsangulojn de interne kaj ne forigante malproksimulojn de esktere. Li prenas nur la kapablan por veturigo. Nur tio estas ja la vojo por akiri la bonan koĉeron! Tion ne povas ŝanĝi eĉ sanktuloj.

欲治国驭民，调一上下，将内以固城，外以拒难，治则制人，人不能制也，乱则危辱灭亡可立而待也。

Se, dezirante regi la landon kaj kontroli la popolon, li nur unu sola provus ordigi la rilaton inter la supro kaj la subo, interne firmigi la fortreson kaj ekstere forbati malamikan agreson, kvankam li povus regi kaj kontroli la aliajn, tamen ĉar la aliaj ne povus regi, tiam devas esti nepre atendata la danĝero de hontiga pereco pro iufoja kaosa tumulto.

然而求卿相辅佐，则独不若是其公也，案唯便嬖亲比己者之用也，岂不过甚矣哉！

Do je la serĉado de ministroj por liaj konsilantoj li sole, ne estante senpartia, intencas uzadi nur proksimajn al si favoritojn-flatulojn, – ĉu tio ja ne estas troa eraro!

故有社稷者莫不欲强，俄则弱矣；莫不欲安，俄则危矣；莫不欲存，俄则亡矣。

Se tiel, eĉ se la estro de la ŝtata sanktejo dezirus, ke la lando estu forta, ĝi tuj malfortiĝas; kvankam li dezirus la stabilecon, tamen ĝi tuj estas endanĝerigita; kvankam li dezirus la daŭran ekzistadon, tamen ĝi tuj pereos.

古有万国，今有数十焉，是无它故，莫不失之是也。

Antikve ekzistis dek mil landoj, sed nun troviĝas nur dekkelke, ĉar eraris nune je tio kaj sen la alia kialo.

故明主有私人以金石珠玉，无私人以官职事业，是何也？曰：本不利于所私也。

Do klera estro iam favoras al siaj proksimaj per oroj, gemoj kaj jadoj, sed neniam per gravaj oficoj kaj postenoj por la aferoj-entreprenejoj. Kial? Mi diras, ke la privata favorado estas ne utila nek profitdona.

彼不能而主使之，则是主暗也；臣不能而诬能，则是臣诈也。

Se iu estro uzus tiun, kiu ne estas kapabla, la estro mem estas malklera; se iu nekapabla subulo pretendus sin kapabla, tiu estas falsa subulo.

主暗于上，臣诈于下，灭亡无日，俱害之道也。

Se supre estus la estro malklera kaj sube la subuloj falsaj, tuj pereos la lando. Tio estas

ja la vojo al kundamaĝo.

主文王非无贵戚也，非无子弟也，非无便嬖也，偶然乃举太公于州人而用之，岂私之也哉！以为亲邪？则周姬姓也，而彼姜姓也。以为故邪？则未尝相识也。

La reĝo Wen, estante estro, ne estas sen noblaj parencoj, nek sen filoj-fratoj, nek sen favoratoj, sed tamen li eltrovis kaj ekuzis iun provinculon Tai Gong, – ĉu tio estis privata personfavorado? Ĉu li favoris sian parencon? Malgraŭ ke la dinastio Zhou konsistis ĉefe el familinomo Ji, tiu apartenis al la familinomo Jiang. Ĉu la reĝo dungis lin laŭ la privata personrilato? Ne. Ili ĝis tiam ne konatiĝis reciproke antaŭe.

以为好丽邪？则夫人行年七十有二，鬪然而齿堕矣。

Ĉu la reĝo dungis lin laŭ lia bela aspekto? Ne. Tiu, tiam 72 -jara, havis dentojn jam tute defalintaj.

然而用之者，夫文王欲立贵道，欲白贵名，以惠天下，而不可以独也，非于是子莫足以举之，故举是子而用之。

La reĝo Wen dungis tiun, dezirante starigi la noblan vojon kaj fari la noblan nomon brila, tiel bonfari por la mondo. Tio ne atingeblus al li sola sen levi tiun asistanto, to li dungis kaj uzis tiun.

于是乎贵道果立，贵名果明，兼制天下，立七十一国，姬姓独居五十三人，周之子孙苟不狂惑者，莫不为天下之显诸侯，如是者，能爱人也。

Dank' al tio la nobla Vojo estis starigita kaj la nobla nomo estis ekbrilinta, tiel do la mondo universale estis regata kun feŭdoj de 71 landoj, kie 53 Ji-familianoj estis feŭditaj. Filoj kaj nepoj de Zhou, se ne frenezaj aŭ idiotaj, fariĝis landestroj en la mondo. Estis tiel, ĉar la reĝo Wen povis ami homojn.

故举天下之大道，立天下之大功，然后隐其所怜所爱，其下犹足以为天下之显诸侯。

Li levis la Grandan Vojon de la mondo, starigis la grandan meritulon por la mondo, kaj poste protektis la kompatindajn kaj la amatajn, tiel do sub li aperadis brilaj landestroj kiompetentaj al la mondo.

故曰：“唯明主为能爱其所爱，暗主则必危其所爱。”此之谓也。

Tial estas dirite: “Nur klera estro povas vere ami tiun, kiu devas esti amata, sed malklera estro nepre endanĝerigas la amatajn.” Tio signifas la supremenciitan.

墙之外，目不见也；里之前，耳不闻也；而人主之守司，远者天下，近者境内，不可不略知也。

Ne videblas per okuloj io ekster muro; ne aŭdeblas per oreloj io trans *Li*. Sed la estro de homoj, kiu gardas kaj administras, ne devas ne scii ĝenerale kaj pri foraĵoj en la mondo kaj pri proksimaĵoj en sia lando.

天下之变，境内之事，有弛易齟差者矣，而人主无由知之，则是拘胁蔽塞之端也。

Kvankam en monda ŝanĝiĝo kaj enlandaj aferoj estas diversaj kaj diferencaj facetoj, tamen se la estro de homoj neniam povus scii pri tiuj, tio iĝas ja la komenco de bremsado, minaco, seninformo, ŝtopiĝo.

耳目之明，如其狭也；人主之守司，如其广也；其中不可以不知也，如其危也。

Estas limigite percepti ion per oreloj kaj okuloj pro la malvasteco, sed ĉe la estro de homoj la povo de gardado kaj administrado devas esti granda tiel ke li ne devus ne scii la esencon de aferoj, ĉar alie estas danĝere.

然则人主将何以知之？曰：便嬖左右者，人主之所以窥远收众之门户牖向也，不可不早具也。

Do, kiel la estro de homoj scias la necesan? Mi diras: favoritoj kaj proksimumoj dekstra-maldekstra estas por la estro de homoj la fenestro, tra kiu la lasta povus rigardi foren por regi la homoamason, tial do ili nepre devas esti pretaj frue.

故人主必将犹便嬖左右信者然后可，其知惠足使规物，其端诚足使定物然后可，夫是之谓国具。

Do, akirinte la fidindajn favoritojn kaj proksimumojn dekstre kaj maldekstre, la estro de homoj povas reĝi kun la saĝo sufiĉa por normigi aĵojn kaj kun la sincereco sufiĉa por ordigi aĵojn. Ili estas nomataj kiel iloj de ŝtatregado.

人主不能不有游观安燕之时，则不得不有疾病物故之变焉。

Al la estro de homoj ne devas ne esti la tempo por ludadi, promenadi kaj ripozi, al li ne devas ne okazadi plagoj kiel malsano aŭ morto.

如是，国者，事物之至也如泉原，一物不应，乱之端也。

Tiel do la ŝtato estas kulmino de estaĵoj kvazaŭ la fonto de fontoj. Se unu el la estaĵoj ne taŭgas, tiu iĝas la komenco de kaoso.

故曰：人主不可以独也。卿相辅佐，人主之其杖也，不可不早具也。

Do mi diras: la estro de homoj ne devas esti solulo izolita. Ministroj kaj konsilantoj estas ir-bastono por la estro. Ili nepre devas esti pretaj frue.

故人主必将有卿相辅佐足任者然后可，其德音足以填抚百姓，其知虑足以应待万变然后可，夫是之谓国具。

Do, la estro de homoj povas reĝi nepre kun ministroj kaj konsilantoj, farantaj lian virton sufiĉa por pacigi la popolanojn, lian intelekton kaj zorgon sufiĉa por adaptiĝi al ĉiuj ŝanĝiĝoj. Tiuj estas ja t. n. iloj de ŝtatregado.

四邻诸侯之相与，不可以不相接也，然而不必相亲也。

Najbaraj landestroj en kvar direktoj ne devus ne interrilati reciproke, sed tamen ili ne ĉiam estas amikemaj unuj al la aliaj.

故人主必将有足使喻志决疑于远方者然后可。

Tial do, la estro de homoj nepre devas havi sian ambasadoron, kapablan transdoni la intencon, persvadi aŭ solvadi dubojn de malproksimumoj.

其辩说足以解烦，其知虑足以决疑，其齐断足以距难，不还秩，不反君，然而应薄扞患足以持社稷，然后可，夫是之谓国具。

Ke ties elokventeco suficu por solvi la komplikan, ties intelekto suficiu por solvi dubojn, ties decidemo forigu la malfacilan, kaj estante ne renversema nek kontraŭreĝa, estante kapabla je konvena traktado de la neatendita perturbo, povas subteni la sanktan ŝtaton. Tiu estas ja t. n. la ilo de ŝtatregado.

故人主无便嬖左右足信者谓之暗，无卿相辅佐足任者谓之独，所使于四邻诸侯者非其人谓之孤，孤独而晦谓之危。

Do malklera estas la estro sen la fidindaj favoritoj dekstre kaj maldekstre, li estas solulo sen ministroj kaj konsilantoj taŭgaj je komisiono, li estas izolita sen la peranto por interrilato kun najbaraj landestroj de kvar direktoj. Estante sola kaj izolita, li estas malluma, t. n. endanĝerigita.

国虽若存，古之人曰亡矣。《诗》曰：“济济多士，文王以宁。”此之谓也。

Eĉ se ekzistus la ŝtato, la antikvuloj konsideris tion samkiel pereinta. Estas dirite en *Poezio*: “Ĉirkaŭate de multediversaj kapabluloj, la reĝo Wen regis pace.” Tio signifas la supre menciitan.¹⁰⁹

材人：愿恣拘录，计数纤啬而无敢遗丧，是官人使吏之材也。

Personala politiko. Kiu, estante honesta, diligenta, skrupula je kalkulado kaj nombro, ne aŭdacas erari kun neniom da preterlaso, tiu taŭgas por oficisto kaj funkciulo.

修伤端正，尊法敬分而倾侧之心，守职循业，不敢损益，可传世也，而不可使侵夺，是士大夫官师之材也。

Estas tiu, kiu korektas siajn difektojn, ĝustigas sin detale, respektas leĝojn, estimas klasdividon sed ne inklinas al partio, estas fidela je sia profesio kaj laboro, ne aŭdacas alteniĝi al profito-malprofito kaj konsideras grava transdoni ion al estontaj generacioj, ne lasas al malamikoj agreson kaj rabadon – tiu estas ja persono taŭga por la granda oficisto.

知隆礼义之为尊君也，知好士之为美名也，知爱民之为安国也，知有常法之为俗也，知尚贤使能之为长功也，知务本禁末之为多材也，知无与下争小利之为便于事也，知明制度，权物称用之为不泥也，是卿相辅佐之材也，未及君道也。

Estas tiu, kiu scias justan decregulon, kaj per tio respektas la reĝon. Li scipovas ŝati personojn kaj per tio beligas la nomon, scipovas ami la popolon kaj per tio faras la landon stabila, scipovas havi la leĝon konstanta kaj per tio unuigi ordinarulojn, scipovas estimi aŭ uzi la saĝajn kaj per tio pliiĝas la meriton, scipovas plenumi la ĉefan devon kaj ignori la malgravan kaj per tio multigas riĉaĵon, scipovas ne kvereli kun la

¹⁰⁹ Citaĵo el 诗，大雅，文王.

subuloj por profiteto kaj per tio faras la aferon konvena, scipovas fari reĝimon klara aŭ mezurilojn-pesilojn utilaj kaj per tio eviti ajnan kotmakulon. Tiu estas ja persono taŭga por ministroj kaj konsilantoj, sed tamen eĉ tio ankoraŭ ne la Vojo de ĉef-estro.

能论官此三材者而无失其次，是谓人主之道也。

La kapablo enoficigi tiujn tri personecojn ne devas ne manki al la sekva fazo – tio estas ja t. n. la Vojo de la estro de homoj.

若是，则身佚而国治，功大而名美，上可以王，下可以霸，是人主之要守也。

Kun tio la estro povas regi la ŝtaton facile sen tordi sin, kaj plie la merito iĝas granda kaj la nomo bela, tiel do li povas maksimume fariĝi reĝo, almenaŭ fariĝi hegemoniulo. Tion la estro de homoj devas teni ĉefe gravega.

人主不能论此三材者，不知道此道，安值将卑势出劳，併耳目之乐，而亲自贯日而治详，一内而曲辨之，虑与臣不争小察而褻偏能，自古及今，未有如此而不乱者也。

Se iu estro de homoj ne kapablas elekti tiujn tri personecojn, ne sciante la Vojon, kiom ajn humile kaj energie li penadus labori, rezignante ĝuon de sentoj je oreloj kaj okuloj, kiom ajn li mem administradus skrupule kaj detaleme tagnokte, la regado nur tordiĝos interne, kaj li devas zorgadi, ke subuloj ne kverelu inter si ĉirkaŭ malgranda bagatelaĵo aŭ devojiĝo. En tia situacio, de antikve ĝis nun, ne troviĝas iu, kiu evitus malordon.

是所谓“视乎不可见，听乎不可闻，为乎不可成”，此之谓也。

Tio estas nomata – “Havante okulojn ne kapablas vidi, havante orelojn ne kapablas aŭdi, farante ne kapbalas efektiviĝi.” Tio signifas la supre menciitan.

13 臣道

LA VOJO DE MINISTROJ

人臣之论：有态臣者，有篡臣者，有功臣者，有圣臣者。

Se temas pri specoj de ministroj – troviĝas la flatanta, troviĝas la uzurpanta, troviĝas la meritanta, la sankta.

内不足使一民，外不足使距难，百姓不亲，诸侯不信，然而巧敏佞说，善取宠乎上，是态臣者也。

Estas tiu, kiu interne ne povas unuigi la popolon, ekstere ne povas repuŝi malamikan agreson, kaj al kiu ne intimas la popolanoj nek fidas landestroj, tamen tiu lertas je insinua parolado kaj estas favorata de la supro, – jen kia estas la flatanta ministro.

上不忠乎君，下善取誉乎民，不恤公道通义，朋党比周，以环主图私为务，是篡臣者也。

Estas tiu, kiu supre ne estas lojala al sia estro, sube estas lerta je famiĝo inter la popolo, ne zorgas pri publika vojo kaj mondrekona justo, konspire formas partion aŭ klikon, ĉirkaŭante la estron intrigas sinprofitigon, – jen kia estas la uzurpanta.

内足使以一民，外足使以距难，民亲之，士信之，上忠乎君，下爱百姓而不倦，是功臣者也。

Estas tiu, kiu interne povas unuigi la popolon, ekstere povas repuŝi alies agreson, kaj al kiu intimas la popolo kaj fidas la personoj, li supre estas lojala al sia estro, sube amas la popolanojn kaj ne laciĝas, – jen kia estas la meritanta.

上则能尊君，下则能爱民；政令教化，刑下如影；应卒遇变，齐给如响；推类接誉，以待无方，曲成制象，是圣臣者也。

Estas tiu, kiu supre povas respekti la estron, sube povas ami la popolon, kaj kies ordonoj, dekretoj, instruoj, punleĝoj estas proklamataj suben ĝuste nature kvazaŭ ombro, kies traktado de aferoj konforme al ŝanĝiĝemaj situacioj estas trafa kvazaŭ eĥo, li juĝas laŭ bontrovo ajnan demandon, neatenditan, rezonante analogie per klasifiko, do eĉ io kurba ŝajnas kontrolata laŭleĝe, – jen kia estas la sankta ministro.

故用圣臣者王，用功臣者强，用篡臣者危，用态臣者亡。

Tiel do, kiu uzas la sanktan ministron, tiu iĝas reĝa; kiu uzas la meritantan, tiu iĝas forta; kiu uzas la uzurpantan, tiu estas endanĝerigita; kiu uzas la flatantan, tiu pereas. 态臣用则必死，篡臣用则必危，功臣用则必荣，圣臣用则必尊。

Nepre mortos tiu, kiu uzas la flatantan; nepre estos endanĝerigita tiu, kiu uzas la uzurpantan; nepre prosperas tiu, kiu uzas la meritantan; nepre estos respektata tiu, kiu uzas la sanktan.

故齐之苏秦，楚之州侯，秦之张仪，可谓态臣者也。

Su Qin el Qi-regno, Zhou Hou el Chu-regno, Zhang Yi el Qin-regno povas esti nomataj la flatantaj ministroj.

韩之张去疾，赵之奉阳，齐之孟尝，可谓篡臣也。

Zhang Quji el Han-regno, Feng Yang el Zhao-regno, Meng Chang el Qi-regno povas esti nomataj la uzurpantoj.¹¹⁰

齐之管仲，晋之咎犯，楚之孙叔敖，可谓功臣矣。

Guan Zhong el Qi-regno, Jiu Fan el Jin-regno, Sun Shuao el Chu-regno povas esti nomataj la meritantoj.

殷之伊尹，周之太公，可谓圣臣矣。

Yi Yin el Yin-regno, Tai Gong el Zhou-regno, povas esti nomata sanktaj.

是人臣之论也，吉凶贤不肖之极也，必谨志之而慎自为择取焉，足以稽矣。

Ili estas tipoj de ministroj, prezentantaj la ekstremon de ekzemploj bonaj kaj malbonaj, saĝaj kaj malsaĝaj. Oni devas nepre atenti skrupule por si je la elektado kaj bone konsideri pri tio.

从命而利君谓之顺，从命而不利君谓之谄；逆命而利君谓之忠，逆命而不利君谓之篡；不恤君之荣辱，不恤国之臧否，偷合苟容，以持禄养交而已耳，谓之国贼。

Obeante la ordonon, profitigi la estron estas nomata la konformiĝo, sed obeante la ordonon, malprofitigi la estron estas nomata la flatado; spite la ordonon profitigi la estron estas nomata la lojaleco, sed spite la ordonon, malprofitigi la estron estas nomata la uzurpado. Kiu estas flatema kaj komplezema, ne zorgante pri honoro aŭ malhonoro de la estro, ne zorgante pri bonstato aŭ malbonstato de la ŝtato, kaj nur interesiĝas je sia salajro kaj nutrado de interrilato, tiu estas nomata la perfidulo de la ŝtato.

君有过谋过事，将危国家，陨社稷之惧也，大臣，父兄有能进言于君，用则可，不用则去，谓之谏；有能进言于君，用则可，不用则死，谓之争；有能比知同力，率群臣百吏而相与强君矫君，君虽不安，不能不听，遂以解国之大患，除国之大害，成于尊君安国，谓之辅；有能抗君之命，窃君之重，反君之事，以安国之危，除君之辱，功伐足以成国之大利，谓之拂。 Al estro, eraranta je la planado kaj farado de iu afero, ĵus endanĝeriganta la ŝtaton aŭ pereiganta la sanktejon de tero kaj grenoj, iu granda ministro aŭ patro kaj frato povas turni sin kun rezoluta decido, estante preta ke bone, se sukcesus, foriri se malsukcesus. Tio estas nomata “admono”. Ke iu kapablas turni sin al sia estro por proponi konsilon, esperante aŭskulton, estante preta eĉ je sia morto kaze de neaŭskulto, tio estas nomata “kontestado”. Kiam iu kapablas, kunigante intelekton kaj forton, gvidante ministrojn kaj centon da oficistoj, kune trudi al la estro ĝustigon nepre ke tiu ne devus ne aŭskulti,

¹¹⁰ Estas notinde, ke Xunzi taksas malaltaj tiujn famulojn, kiel Su Qing, Zhang Yi, Meng Changjun.

spite ties malkontenton, sed tamen per tio sukcesas solvi por la ŝtato grandan plagon, elimini grandan damaĝon, kaj tiel restarigi la respekton al la estro kaj pacigi la ŝtaton, – tio estas nomata “asistado”. Okazas, ke iu povas, spite la ordonon de la estro, prenante lian potencon, fari la aferon spite la estron, kaj per tio savi la ŝtaton el de danĝero, forviŝi honton de la estro, sukcesi sufiĉe liveri al la ŝtato profitegon, – tio estas nomata “forbalaado”.

故谏，争，辅，拂之人，社稷之臣也，国君之宝也，明君所尊厚也，而暗主惑君以为己贼也。Tial do, persono kapabla je admono, kontestado, asistado, forbalaado, estas ja ministro de la ŝtata sanktejo por la tero kaj greno, estas la trezoro por ŝtatestro. Klera estro estimas tian personon alta, sed malklera, freneza estro rigardas lin kanajlo por si.

故明君之所赏，暗君之所罚也；暗君之赏，明君之所杀也。

Kiun la klera estro laŭdas, tiun punas la malklera estro; kiun la malklera estro laŭdas, tiun devas mortigi la klera estro.

伊尹，箕子可谓谏矣，比干，子胥可谓争矣，平原君之于赵可谓辅矣，信陵君之于魏可谓拂矣。

Yi Yin kaj Ji Zi povas esti nomata persono de admono, Bi Gan kaj Zi Xi povas esti nomata persono de kontestado, Ping Yuan Jun de Zhao-regno povas esti nomata persono de asistado, Xin Ling Jun de Wei-regno povas esti nomata persono de forbalaado.¹¹¹

传曰：“从道不从君。”此之谓也。

Estas dirite perbuŝe: “Sekvu la Vojon, ne la estron.” Tio signifas la supre menciitan.

故正义之臣设，则朝廷不颇；谏，争，辅，拂之人信，则君过不远；爪牙之士施，则仇讎不作；边境之臣处，则疆垂不丧。

Do, se estos instalita iu justa ministro, tiam la registaro ne kliniĝos; se estos komisiite al personoj de admono, kontestado, asistado, forbalaado, la estro ne eraros dumlonge; se rekrutitaj estos soldatoj kun fortaj ungoj kaj dentoj, ajna malamiko ne aŭdacos agresi kaj invadi; se iu taŭga vasalo estos postenigita en fora provinco, la landlimo ne estos perdita.

故明主好同而暗主好独，明主尚贤使能而飡其盛，暗主妒贤畏能而灭其功。罚其忠，赏其贼，夫是之谓至暗，桀，纣所以灭也。

Klera estro ŝatas akordiĝon, sed malklera estro ŝatas izolezon; klera estro estimas

¹¹¹伊尹，箕子，比干，子胥，平原君，信陵君 Yi Yin – ministro sub la reĝo Tang, fondinto de Yin-dinastio. Ji Zi admonis al Zhou-tirano, sed ne akceptite, pretendis sin freneza, poste en Zhou-dinastio estis feŭdita en Koreio. Bi Gan estis moritgita de Zhou. Zi Xi servis en Wu-regno al reĝoj He Lu kaj Fu Chai. Ping Yuan Jun estis juna frato de la reĝo Hui Wen de Zhao. Xin Ling Jun estis juna frato de la reĝo An Li de Wei-regno.

saĝulojn, uzas la kapablajn, kaj ĝuas la prosperon, sed malklera estro envias al saĝuloj, timas kapablulojn, ignoras ilian meriton kaj pereigas meritulojn, punas la lojalajn, laŭdas la kanajlojn, – tial oni nomas tiun malklera, do Jie kaj Zhou pereis. .

事圣君者，有听从，无谏争；事中君者，有谏争，无谄谀；事暴君者，有补削，无拏拂。

Servante al sankta reĝo, oni bezonas nur aŭskulti. sed ne bezonas admoni aŭ disputi; servante al mezokvalita reĝo, oni iam bezonas admoni aŭ disputi, sed ne flati; servante al tirano, oni bezonas kompletigi aŭ mildigi ion, sed ne korekti nek protesti.

迫胁于乱时，穷居于暴国，而无所避之，则崇其美，扬其善，违其恶，隐其败，言其所长，不称其所短。以为成俗。

Se oni, minacate dum perturba tempo, devas daŭre loĝi en la lando de tirano kaj havas nenien eskapi, tiam oni prefere bezonas nur adoradi lian belecon, admiradi lian bonon, preterlasi lian malbonon, kaŝi lian misaĵon, diradi nur pri lia avantaĝo, ne mencii pri lia malfortaĵo, kaj oni devas fari tian agmanieron kutima moro.

《诗》曰：“国有大命，不可以告人，妨其躬身。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: “Kiam iu ŝtato havas sian grandan mision, nesciigeblan al aliuloj, oni devas teni sin nur fleksiĝema por rezisti al tio.”¹¹² Tio signifas la supre menciitan.

恭敬而逊，听从而敏，不敢有以私决择也，不敢有以私取与也，以顺上为志，是事圣君之义也。

Teni sin respektema kaj humila, obeema sed rapidmova, ne aŭdaci inklini al mi-memo je la decido kaj la elektado, ne aŭdaci preni aŭ doni ion laŭ mi-memoismo, aspirante sekvi la supron – tio estas la justa servado al sankta reĝo.

忠信而不谀，谏争而不谄，拏然刚折，端志而无倾侧之心，是案曰是，非案曰非，是事中君之义也。

Teni sin lojala, fidela sed neflatema, kuraĝa je adomono-konsilo kaj neplaĉivola, fleksiĝema sed persvada, akurata kaj ne devianta je koro, jesi al pravaĵo, nei al malpravaĵo, – tio estas la justa servado al ordinara meza reĝo.

调而不流，柔而不屈，宽容而不乱，晓然以至道而无不调和也，而能化易，时关内之，是事暴君之义也。

Akordiĝi sed ne kompromisaĉi, teni sin mola sed nevenkebla, tolerema sed ne malorda, strebanta klare al la pleja Vojo sed ne malakordiĝema, kapabla je ŝanĝiĝo konforme al la tempo ene de la ebleco, – tio estas la justa servado al tirano.

¹¹² En nuna eldono de *Poezio* ne troviĝas la citaĵo. Ideogramo 妨 diferencas en alia versio per 防. Vid. 荀子, 新积汉文大系、明治書院、1975, p. 380. Tial do la traduko de la frazo 大命 estas provizora. Mi prenas la frazon signifanta «incitegan sloganon».

若驭朴马，若养赤子，若食倭人，故因其惧也而改其过，因其忧也而辨其故，因其喜也而入其道，因其怒也而除其怨，曲得所谓焉。

Tio similas al la dresado de sovaĝa ĉevalo, aŭ al la vartado de infano, aŭ al la nutrado de malsatinto, do oni devas igi la tiranon korekti mem la misagon, kiam li eksentas timon, klarigi al li la kialon, kiam li afliktiĝas, gvidi lin al la vera vojo, kiam li ĝojas, lasi al li forigi lian rankoron, kiam li koleras. Tiel do ĉirkaŭire atingeblas la celo.

《书》曰：“从命而不拂，微谏而不倦，为上则明，为下则逊。”此之谓也。

En *Libro* estas skribite: “Oni obeas la ordonon, ne kontestante, senlace donas subtilan admonon, faras la supron klarvida, faras la subon humila.”¹¹³ Tio signifas la supre menciitan.

事人而不顺者，不疾者也；疾而不顺者，不敬者也；敬而不顺者，不忠者也；忠而不顺者，无功者也；有功而不顺者，无德者也。

Kiu, servante al la alia, ne estas obeema, al tiu mankas rapideco; kiu, estante rapidmova, ne estas obeema, al tiu mankas respektemo; kiu, havante respektemon, ne estas obeema, al tiu mankas lojaleco; kiu, havante lojalecon, ne estas obeema, al tiu mankas merito; kiu, havante meriton, ne estas obeema, al tiu mankas virto.

故无德之为道也，伤疾，堕功，灭苦，故君子不为也。

Tial, kiu sen virto altrudas la vojon, tiu damaĝas rapidecon, detruas meriton, neniigas laboron, do nobluloj ne faras tion.

有大忠者，有次忠者，有下忠者，有国贼者。

Estas plej granda lojaleco, estas sekva granda lojaleco, estas malalta lojaleco kaj estas ŝtatperfido.

以德复君而化之，大忠也；以德调君而补之，次忠也；以是谏非而怒之，下忠也；不恤君之荣辱，不恤国之臧否，偷合苟容，以之持禄养交而已耳，国贼也。

Per virto protekti la estron kaj transformi lin – estas la plej granda lojaleco; per virto akordiĝi kun la estro kaj kompletigi lin – estas la sekva granda lojaleco; per admono kritiki eraron kaj kolerigi lin – estas la malalta lojaleco; ne zorgante je prospero aŭ honto de la estro, ne zorgante je la bono aŭ malbono por la ŝtato, kaĵolante flateme kaj fi-tolereme, nur klopodi je ricevado de salajro kaj tenado de interrilato – estas la ŝtatperfido.

若周公之于成王也，可谓大忠矣；若管仲之于桓公，可谓次忠矣；若子胥之于夫差，可谓下忠矣；若曹触龙之于纣者，可谓国贼矣。

¹¹³ En la nuna eldono de *Libro* ne troviĝas tiuj frazoj. Iuj esploristoj komprenas tiun frazon, ke “kiel supro tiu estas klarvida, kiel subulo tiu estas humila.”

Konduton de la Duko Zhou al la reĝo Cheng oni povas nomi la plej granda lojaleco; konduton de Guan Zhong al la Duko Huan oni povas nomi la sekva granda lojaleco; konduton de Zi Xu al Fu Chai oni povas nomi la malalta lojaleco. Konduton de Cao Chulong al Zhou oni povas nomi la ŝtatperfido.¹¹⁴

仁者必敬人。凡人非贤则案不肖也。

Bonvolemulo nepre respektas homojn, kvankam ordinaruloj ĝenerale ne estas saĝaj, sed malsaĝaj.

人贤而不敬，则是禽兽也；人不肖而不敬，则是狎虎也。

Kiu ne respektas la saĝajn, tiu estas nur sovaĝulo samkiel birdo aŭ besto. Kiu ne montras respekton al la malsaĝajn, tiu estas nur fi-kuraĝulo, ludanta intime kun tigro. 禽兽则乱，狎虎则危，灾及其身矣。

Freneza estas la sovaĝulo, kaj endanĝerigata estas la fi-kuraĝulo, sur kiun falos malfeliĉego.

《诗》曰：“不敢暴虎，不敢冯河。人知其一，莫知其它。战战兢兢，如临深渊，如履薄冰。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: “Ne aŭdacu lukti kun sovaĝa tigro, nek aŭdacu piede transpaŝi la Flavan riveron. Homoj, sciante nur unu flankon, ne scias la alian. Do estu atentema kaj skrupula, kvazaŭ staranta ĉe la rando de profunda abismo, kvazaŭ paŝanta laŭ maldika glacio.”¹¹⁵ Tio signifas la supre menciitan.

故仁者必敬人。敬人有道：贤者则贵而敬之，不肖者则畏而敬之；贤者则亲而敬之，不肖者则疏而敬之。

Do bonvolemulo nepre respektas homojn. Kiu respektas homojn, tiu iras la veran vojon. Li respektas estiminda tiun, kiu estas saĝa kaj li respektas timenda tiun, kiu estas malsaĝa; li respektas saĝulon kiel la proksiman kaj li fortenas sin kun respekto al malsaĝulo kiel la malproksima.

其敬一也，其情二也。若夫忠信端悫而不伤害，则无接而不然，是仁人之质也。

La respektado estas unu sama, sed la sentoj diversas unu de la alia. En la zorgado de tio, ke per la lojaleco kaj honesteco ne damaĝu homojn, ke estu nenia malkonveno en interrilato, kuŝas la kvalito de bonvolemulo.

忠信以为质，端悫以为统，礼义以为文，伦类以为理，喘而言，臑而动，而一可以为法则。

Li faras lojalecon-fidelecon sia kvalito, honestecon sia tradicio, decregulojn-juston sia ornamo, etikan klasifikon sia principo, kaj lia ajna vorteto-moveto estas penetrata per la

¹¹⁴ En *Shuo Yuan* 说苑 estas skribite, ke Cao Chulong estis generalo por la tirano Jie 桀.

¹¹⁵ Citaĵo el 诗经, 小雅, 小旻. Xunzi ĉi tie ne devas ne teni sin kompromisema ĉe servado al “tirano”, ĉar la lasta estas sama kiel sovaĝa tigro, nedresita ĉevalo aŭ infano. Tiel do eĉ kritike pensanta persono ne povis rekte kontraŭi al la ĉirkaŭanta sin tiama naturo.

konsekvenca leĝo kiel la unueco.

《诗》曰：“不僭不贼，鲜不为则。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: “Sen aroganti, sen damaĝi la aliajn, – rare okazus devojiĝo.” Tio signifas la supre menciitan.¹¹⁶

恭敬，礼也；调和，乐也；谨慎，利也；斗怒，害也。

Respektplena humileco prezentas sin en decreguloj; harmonia konkordo – en muziko; atentema prudento – en profito; batalema kolero – en damaĝo.

故君子安礼乐利，谨慎而无斗怒，是以百举不过也。小人反是。

Tial nobluloj fidas al decreguloj, muziko, profito, tenas sin atenteme prudenta, estante fremda al batalema kolero, do ne eraras en cent da entreprenoj. Male kondukas malgranduloj.

通忠之顺，权险之平，祸乱之从声，三者非明主莫之能知也。

Servado preter lojaleco, kvietigo per riskoplana perforto, ĥora obeado en katastrofa ĥaoso – tiuj tri kondutoj estas komprenataj nur al klera estro.

争然后功，出死无私，致忠而公，夫是之谓通忠之顺，信陵君似之矣。

Fari meritan kontribuon tra lukto, esti preta je morto senkonsidere pri si memo, servi al publiko per pleja lojaleco, – tio estas ja t. n. la servado preter lojaleco, simila al tiu de Xin Ling Jun.¹¹⁷

夺然后义，杀然后仁，上下易位然后贞，功参天地，泽被生民，夫是之谓权险之平，汤，武是也。

Efektivigi la juston tra ŝtelado, la humanecon tra mortigo, la pravecon tra renverso de hierarkio inter la supro kaj la subo, kaj tiel kontribui meriton al la Ĉielo kaj la tero, kaj tiel komplezi al la popolo, – tio estas ja t. n. kvietigo per riskoplana perforto, kion faris reĝoj Tang kaj Wu.

过而通情，和而无经，不恤是非，不论曲直，偷合苟容，迷乱狂生，夫是之谓祸乱之从声，飞廉，恶来是也。

Pretersenta eraro, senprincipa konkordo, malzorgo al praveco-malpraveco, ignoro de kurbeco kaj rekteco, flatado kaj fi-toleremo, devojiĝa malordo kaj freneza vivo, – tio estas ja t. n. la ĥora obeado en katastrofa ĥaoso, kies primeroj estis Fei Lian kaj E Lai. 传曰：“斩而齐，枉而顺，不同而一。”

Estas dirite laŭtradicie: “Kvankam distranĉita, tamen en ordo; kvankam tordita, tamen

¹¹⁶ Citaĵo el 诗经，大雅，抑.

¹¹⁷ Por kompreni la esprimon 通忠之顺 ni devas konsideri la koncepton de lojaleco, uzatan de Xunzi, kiu skribis: «spite la ordonon profitigi la estron estas nomata la lojaleco 逆命而利君谓之忠.» (p.152) Do mi uzas «preter» por la traduko de 通.

regula, kvankam malsama, tamen unututa.”

《诗》曰：“受小球大球，为下国缀旒。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: “Ricevante kiel omaĝon ian ajnan gemon, aŭ malgrandan aŭ grandan, la reĝo asignas al ĉiu submetiĝinta lando la propran blazonan flagrubandon respektive.”¹¹⁸ Tio signifas la supre menciitan.

¹¹⁸ Citaĵo el 诗经, 商颂, 长发.

14 致士

VARBADO DE PERSONOJ

衡听，显幽，重明，退奸，进良之术：朋党比周之誉，君子不听；残贼加累之谮，君子不用；隐忌雍蔽之人，君子不近；货财禽犊之请，君子不许。

Artoj por egale aŭskulti, klarigi misteran, konfirmadi klarigitan, forpeli friponon kaj elekti bonulon. Noblulo ne aŭskultas la laŭdadon far de partiemuloj kaj frakciistoj. Noblulo ne alprenas kalumnion far de maljustulo kaj denunciinto. Noblulo ne proksimigas al si la homon, envieman kaj kaŝeman. Noblulo ne permesas la korupteman peton far de profitavidulo, kiel posedantoj de monoj, trezoroj, birdoj kaj dombestoj.

凡流言，流说，流事，流谋，流誉，流愬，不官而衡至者，君子慎之。

Noblulo skrupule detenas sin de senbazaj eldiro, parolado, servado, taktiko, honorigo, plendo, kaj de homoj, kiuj alvenas ne laŭ ĝusta procedo.

闻听而明誉之，定其当而当，然后士其刑赏而还与之，如是则奸言，奸说，奸事，奸谋，奸誉，奸愬莫之试也，忠言，忠说，忠事，忠谋，忠誉，忠愬莫不明通，方起以尚尽矣。

Aŭdante kaj aŭskultante, li klarigas ion honorindan, difinas la pravecon de io prava, kaj poste taksas la personon, ĉu punenda aŭ laŭdenda, kaj donas laŭmeritan rekompencan. Se tiel, jam ne estos provataj fi-dirado, fi-parolado, fi-servado, fi-taktiko, fi-honorigo, fi-plendo, sed nepre manifestiĝos kaj estiĝos plenplene lojaleca dirado, lojaleca parolado, lojaleca servado, lojaleca taktiko, lojaleca honoro, lojaleca plendo.

夫是之谓衡听，显幽，重明，退奸，进良之术。

Jen estas ja t. n. la artoj por egale-vaste aŭskulti, klarigi misteran, konfirmadi klarigitan, forpeli friponon kaj elekti bonulon.

川渊深而鱼鳖归之，山林茂而禽兽归之，刑政平而百姓归之，礼义备而君子归之。

Kie rivero profunda, tie loĝas fiŝoj kaj testudoj; kie arbaro densa, tie loĝas birdoj kaj bestoj; kie publika ordo kaj politiko estas pace tenata, tie loĝas popolanoj; kie troviĝas decreguloj kaj justo, tie loĝas nobluloj.

故礼及身而行修，义及国而政明，能以礼挟而贵名白，天下愿，令行禁止，王者之事毕矣。

Se la decreguloj penetras en homojn, ilia konduto estas bone kulturata; se justo penetras en la regnon, la regado iĝas brila, se la decreguloj povas disvastiĝi, la reputacio altiĝas bela, kaj la mondo envas tian regnon, ordonoj je permeso-malpermeso estas subite plenumataj, kaj tiel efektiviĝos la reĝa afero.

《诗》曰：“惠此中国，以绥四方。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: “Se per tio estus dotita la centra lando, tiam kvietiĝus ankaŭ aliaj landoj de kvar direktoj.”¹¹⁹ Tio signifas la supre menciitaj.

川渊者，龙鱼之居也；山林者鸟兽之居也；国家者，士民之居也。

Rivero profunda estas loĝejo por drakoj kaj fiŝoj; monta arbaro estas loĝejo por birdoj kaj bestoj; ŝtato estas loĝejo por personoj kaj popolanoj.

川渊枯则龙鱼去之，山林险则鸟兽去之，国家失政则士民去之。

La riveron sekigitan forlasas drakoj kaj fiŝoj; la arbaron danĝeran forlasas birdoj kaj bestoj; la ŝtaton misregatan forlasas la personoj kaj la popolanoj.

无土则人不安居，无人则士不守，无道法则人不至，无君子则道不举。

Sen tero homoj ne povas pace loĝi, sen homoj la tero ne povas esti gardata, sen vojo kaj leĝo homoj ne atingas altecon, sen noblulo la vojo ne estas levata.

故土之与人也，道之与法也者，国家之本作也。

Tial la tero estas kune kun homoj, la vojo estas kune kun leĝoj, la ŝtato estas la fundamento por farado.

君子也者，道法之总要也，不可少顷旷也。

La noblulo estas nepre necesa por la vojo kaj la leĝoj, ke oni ne devas malestimi kaj fari lin vana.

得之则治，失之则乱；得之则安，失之则危；得之则存，失之则亡。

Se oni akiris lin, estas regate, se oni perdas lin, malordiĝas; se oni akiris lin, estas kviete, se oni perdas lin, estas danĝere; se oni akiris lin, eblas ekzisti, se oni perdas lin, la lando pereas.

故有良法而乱者有之矣，有君子而乱者，自古及今，未尝闻也。

Estadas, ke okazas malordo tie, kie ekzistas bona leĝaro; sed de antikve ĝis nun ne estas aŭdate, ke okazu malordo tie, kie ekzistas la noblulo.

传曰：“治生乎君子，乱生于小人。”此之谓也。

Estas dirite en tradicio: “Bona regado naskiĝas ĉe noblulo, malordo naskiĝas ĉe malgrandulo.” Tio signifas la supre menciitan.

得众动天，美意延年。诚信如神，夸诞逐魂。

Akirinte popolamason, vi povas movi la Ĉielon; Aspirante al belo, vi povas longigi jaraĝon. Kun sinceran konvinkon vi povas fariĝi kvazaŭ dio, sed kun aroganta fiero vi forpelos vian animon.

人主之患，不在乎不言用贤，而在乎诚必用贤。

Problemo de homa estro kuŝas ne en parola aprobo pri dungo de saĝuloj, sed en

¹¹⁹ Citaĵo el *poezio*, *大雅*, *民劳*.

sincereco je la nepra dungado de saĝuloj.

夫言用贤者口也，却贤者行也，口行相反而欲贤者之至，不肖者之退也，不亦难乎！

Parola aprobo al dungado de saĝuloj estas nur buŝo, sed je la konduto oni reĵetas la saĝulojn. Kiam kontraŭas buŝo kaj konduto unu al la alia, estas ege malfacile deziri, ke kolektiĝu saĝuloj kaj retiriĝu malsaĝuloj.

夫耀蝉者务在明其火，振其树而已，火不明，虽振其树，无益也，

Se deziri kapti cikadojn, oni devas, lumigante per fajro, ekskui la arbon. Se fajro ne lumas, kiel ajn skuadus la arbon, oni ne gajnas.

今人主有能明其德，则天下归之，若蝉之归明火也。

Se, nun, iu homa estro kapablos fari la virton brila, tiam la mondo sekvas lin submetiĝi, kvazaŭ cikadoj kolektiĝas al lumanta fajro.

临事接民而以义，变应宽祐而多容，恭敬以先之，政之始也；然后中和察断以辅之，政之隆也；然后进退诛赏之，政之终也。

Ĉe la traktado de aferoj kaj la akceptado de la popolo estas necesa la justeco, kaj bezonatas abunda toleremo je la adaptiĝo al ŝanĝo kaj je la indulga helpado, antaŭ ĉio necesas humila respektemo – tio estas ja la komenco de la administrado. Sekve, asistadon per moderigo kaj harmoniigo kaj per esplorado kaj rezoluta decidemo – tio estas ja disvolviĝo de la administrado. Kaj poste, kiun promocii aŭ eksigi, kiun akuzi aŭ laŭdi, – estas la fina etapo de la administrado.

故一年与之始，三年与之终。

La komenco daŭras dum unu jaro, la fino venas post tri jaroj.

用其终为始，则政令不行而上下怨疾，乱所以自作也。

Se oni renvere farus la finan komenca, tiam ne efektivegeblus la dekretoj kaj naskiĝus rankoro inter la supro kaj la subo, tiel do okazus tumulto per si mem.

《书》曰：“义刑义杀，无庸以即，女惟曰‘未有顺事’。”言先教也。

En Libro estas dirite: “Ne hastu puni nek mortigi eĉ nome de la justo, vi mem demandu vin: ‘ĉu mi servas la aferon bonorde, aŭ ne?’”¹²⁰ Tio diras, por ke vi instruu anticipe.

程者，物之准也；礼者，节之准也。

Mezuriloj estas normo por aĵoj; decreguloj estas normo por modereco de konduto.
程以立数，礼以定伦，德以叙位，能以授官。

Laŭ mezuriloj precize staras cifero, laŭ decreguloj determiniĝas la etiko, laŭ virtoj estas asignataj la rangoj, laŭ kapablo estas asignataj la oficoj.

凡节奏欲陵，而生民欲宽，节奏陵而文，生民宽而安。

¹²⁰ Ne fidela citaĵo el 尚书, 康诰 kaj 宥坐.

Ĝenerale la principo de modera konduto bezonas rigorecon, sed vivantaj popolanoj bezonas toleron; se rigora estas la principo de modera konduto, estiĝas kulturo; se la vivantaj popolanoj estas traktataj tolereme, estiĝas sekura paco.

上文下安，功名之极也，不可以加矣。

Se estas la kulturo supre kaj la sekura paco sube, tiam la merita reputacio atingas la plej altan, ke ne bezonatus aldoni plu.

君者，国之隆也；父者，家之隆也。

Landestro estas ĉefo de la lando; patro estas ĉefo de la familio.

隆一而治，二而乱。

Se ĉefo estas unu, estas regata la lando; se ĉefoj estas du, tiam malordiĝas.

自古及今，未有二隆争重而能长久者。

De antikve ĝis nun neniam povus ekzisti dumlonge tia lando, kie konfliktadas du ĉefoj.

师术有四，而博习不与焉；尊严而惮，可以为师；耆艾而信，可以为师；诵说而不陵不犯，可以为师；知微而论，可以为师。

Por esti instruisto necesas kvar normoj, en kiuj tamen ne inkluzivita estas vasta erudicieco. Kiu estas respektata pro sia rigoreco kaj timata, tiu povas esti rigardata instruisto; kiu, maljuniĝante 50-60 jaraĝa, estas fidata, tiu povas esti rigardata instruisto; kiu povas reciti prelegon, farante nek mison nek eraron, tiu povas esti rigardata instruisto; kiu, kvankam havante malmulte da scioj, tamen kapablas argumenti, tiu povas esti rigardata instruisto.¹²¹

故师术有四，而博习不与焉。

Do bezonatas kvar normoj por la instrua tekniko. Vasta erudicieco ne estas necesa.

水深而回，树落则粪本，弟子通利则思师。

Se profunda estas akvo, tiam ĝi turniĝas; se falas folioj kaj arboj, ili ŝanĝiĝas en sterkon por fundamento; lernantoj sopiras al la instruisto, se ili komprenas la profiton.

《诗》曰：“无言不讎，无德不报。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Neniu vorto restas ne respondata, neniu virto restas ne rekompencata.”¹²² Tio signifas la supre menciitan.

赏不欲僭，刑不欲滥，赏僭则利及小人，刑滥则害及君子。

Laŭdo ne devas esti troigita, puno ne devas esti uzata tro, ĉar la troa laŭdo profitigas

¹²¹ Iuj esploristoj prenas la ideogramon 知微 por subtela scio, sed mi ne povas tian komprenon.

¹²² Citaĵo el 诗经，大雅，抑.

eĉ malgrandulojn kaj la tro uzata puno damaĝas eĉ noblulojn.

若不幸而过，宁僭无滥；与其害善，不若利淫。

Eĉ se je malfeliĉo neeviteblas troigo, ne okazu la troigo en la punado. Estas preferinde eĉ la profitigo al diboĉo ol la damaĝo al bono.

15 议兵

DEBATO PRI MILITA OPERACIO

临武君与孙卿子义兵于赵孝成王前。

Iu militestro Lin Wu-jun kaj la Majstro-ekscelenco Sun disputis pri militoperaco antaŭ Xiao Cheng, la reĝo de Zhao-regno.¹²³

王曰：“请问兵要。”

La reĝo diris: “Permesu al mi demandi pri bezonata militarto.

临武君对曰：“上得天时，下得地利，观敌之变动，后之发，先之至，此用兵之要术也。”

Lin Wu-jun diris al li: “De supre akiri la tempon de la Ĉielo, de sube akiri la avantaĝon de la tero, observi la ŝanĝon kaj la movon de malamikoj, eki pli poste ol ili sed superi per pli frua movo ol ili – tio estas ja esenca arto por militoperaco.”

孙卿子曰：“不然。臣所闻古之道，凡用兵攻战之本在乎壹民。弓矢不调，则羿不能以中微；六马不和，则造父不能以致远；土民不亲附，则汤，武不能以必胜也。故善附民者，是乃善用兵者也。故兵要在乎善附民而已。”

La Majstro Xun diris: “Ne. Laŭ antikva vojo, aŭdita de mi, la fundamento de militoperaco, atakado kaj batalado kuŝas en unuigo de la popolo. Se pafarko kun sago ne harmonias, eĉ Yi ne povas trafi la ĝustan celon. Se ses ĉevaloj ne akordiĝas, eĉ Zao Fu ne povas atingi foren. Se simplaj popolanoj ne proksimiĝis intime inter si, eĉ Tang kaj Wu ne povas nepre gajni militon.¹²⁴ Do, kiu kapablas bone kunteni la popolon, tiu bone manovras je militoperaco. Tial la esenco de militoperaco kuŝas ja en la bona kuntenado de la popolo.”

临武君曰：“不然。兵之所贵者势利也，所行者变诈也。善用兵者，感忽悠暗，莫知其所从出，孙，吴用之，无敌于天下，岂必待附民哉！”

Lin Wu-jun diris: “Ne. En militoperaco gravas la oportuna elano profitanta avantaĝon, oni devas agi per laŭokaza maĥinacio. Bone plenumas militoperacon tiu, kiu, ne sciante de kie, kapablas eksenti subite kaj prepariĝi sekrete. Tia estis la manovro de Sun kaj

¹²³ 孙卿子 estas Xunzi. reĝo Xiao Cheng 赵孝成王 surtroniĝis en Zhao-regno en 265 a.K. kaj mortis en 246 a. K. Al li servis la fama ministro Ping Yuan-jun 平原君. Diversas opinioj pri kiu estis Lin Wu-jun 临武君. Iu konsideras lin generalo de Chu-regno, alia – Sun Bin 孙臧. En 260 a. K. armeo de Zhao-regno estis disbatita per armeo de Qin-regno, komandata de la generalo Bai Qi 白起.

¹²⁴羿 Yi estas legenda pafarkisto kaj 造父 Zao Fu estas legenda kondukisto de ĉaro. Tang estas fondinto de Yin-dinastio, Wu – fondinto de Zhou-dinastio.

Wu, generaloj, senrivalaj en la mondo. Ĉu nepre atendis ili kuniĝon de la popolo?"¹²⁵

孙卿子曰：“不然。臣之所道，仁人之兵，王者之志也。

La Majstro Xun diris: «Ne. Tio, kion mi diras, estas pri la militoperaco far de bonvolemuloj, kaj pri reĝa aspiriro.

君之所贵，权谋势利也；所行，攻夺变诈也，诸侯之事也。

Tio, kion vi konsideras valora, estas potenca profito de taktika intrigo; tio, kion vi intencas fari, estas atakado, rabado kaj laŭokaza maĥinacio, t. e. aferoj de landestroj.

仁人之兵，不可诈也。彼可诈者，怠慢者也，路亶者也，君臣上下之间滑然有离德者也。

Militoperaco far de bonvolemuloj ne devas esti maĥinacio. Pere de maĥinacio eblas bati nur maldiligentulojn, laciĝintojn aŭ malvirtulojn kaŭze de dissplitiĝo inter estro kaj vasaloj, inter supro kaj subo.

故以桀诈桀，犹巧拙有幸焉。

Je milito inter tiranoj kiel Jie trompas Jie-on eble efikas iu bonsorto depende de taktiko lerta kaj mallerta.

以桀诈尧，譬之若以卵投石，以指挠沸；若赴水火，入焉焦没耳。

Sed inter tirano kaj sanktulo kiel Jie provus trompi Yao, tia militoperaco similas kvazaŭ ĵetadon de ovoj al ŝtono, aŭ kvazaŭ portadon de bolanta akvo per fingroj. Aŭ tio similas eniradon nudpiede en akvon aŭ fajron, – kiu apenaŭ eniras tien, tiu dronas aŭ brulas.

故仁人上下，百将一心，三军同力，臣之于君也，下之于上也，若子之事父，弟之事兄，若手臂之扞头目而覆胸腹也，诈而袭之，与先惊而后击之，一也。

Se bonvolemuloj troviĝas supre kaj sube, tiam cent generaloj kunligiĝas en unu koron. tri armeoj kooperas en unuigita forto, kaj la rilato de vasaloj al la reĝo aŭ de subo al la supro estas koneksa samkiel filoj servas al patro, junaj fratoj servas al pliaĝaj fratoj, samkiel manoj kaj brakoj protektas kapon kaj okulojn, kovras bruston kaj ventron. La ruza sturmo per maĥinacio tute egalas al nura surpriza atako.

且仁人之用十里之国，则将有百里之听；用百里之国，则将有千里之听；用千里之国，则将有四海之听。必将聪明警戒，和传而一。

Se bonvolemuloj regas la landon kun dek *lioj* kvadrato, tiam tion aŭdas landoj, foraj je cent lioj; se bonvolemuloj regas la landon kun cent *lioj* kvadrato, tiam tion aŭdas landoj, forajn je mil lioj; se ili regas la landon kun mil *lioj* kvadrato, tiam tion aŭdas la tuta mondo de kvar maroj. Oni, nepre klare komprenante kun atento, akordiĝas sinsekve unuigite.

故仁人之兵聚则成卒，散则成列，延则若莫邪之长刃，婴之者断；兑则若莫邪之利锋，当之者溃；圜居而方止，则若磐石然，触之者角摧，案角鹿埵，隄种，东笼而退耳。

¹²⁵孙 Sun estas 孙武 Sun Wu, generalo por Wu Helu, 吴 estas 务起 Wu Qi.

Bonvolemaj soldatoj, kolektiĝante, tuj formas vicon; disirante, tuj pretaj en ordo; etendiĝante, fariĝas kvazaŭ longa glavo nome Moye, akretranĉanta ĉion renkontatan, malingigite, fariĝas kvazaŭ akra glavdorso de Moye, disrompanta ĉion trafitan.¹²⁶ Estante en ajna formacio ĉu cirkla aŭ kvadrata, la armeo, simile al firma roko, disrompas kornojn de alvenintoj, frakasas kvazaŭ argilaĵojn, dispecigas, larmigas ilin kaj retretigas.

且夫暴国之君，将谁与至哉？彼其所与其者，彼其民也。

Cetere, kun kiu militiras tiu tiraneca landestro? Kune kun li iras lia popolo.

而其民之亲我欢若父母，其好我芬若椒兰；彼反顾其上则若灼黥，若仇讎。

Sed lia popolo sentas proksima al mi, kvazaŭ al siaj gepatroj, kaj amas min kvazaŭ bonodoran floron de orkideo. Tute male, la sian supron ili abomenas kvazaŭ brulantan ferstangon por tatuoj, kvazaŭ longan malamikon.

人之情，虽桀，跖，岂又肯为其所恶贼其所好者哉！

Laŭ homa dispozicio, eĉ tirano Jie kaj rabisto Zhi ne aprobus mistrakti per forrabado tiun, kiun ili amas!

是犹使人之子孙自贼其父母也，彼必将来告之，夫又何可诈也？

Tio estas sama, kiel lasi al filo damaĝi liajn gepatrojn, en tiu okazo la filo mem konfesion. Kiel li povus ruze trompi?

故仁人用，国日明，诸侯先顺者安，后顺者危，虑敌者削，反之者亡。

Se bonvolemluloj regas, la lando iĝas lumanta pli kaj pli ĉiutage. El landestroj, tiu, kiu unue ekobeas, estas sekura, sed tiu, kiu malfruas obei, estas malsekura. Kiu intencas kontraŭi, tiu estos nuligita; kiu ribelas, tiu pereos.

《诗》曰：‘武王载发，有虔秉钺；如火烈烈，则莫我敢遏。’此之谓也。”

Estas dirite en *Poezio*: ‘La brava reĝo ekmilitiras, prudente kun hakilo; kvazaŭ fajron ardantan, neniu aŭdacas haltigi min.’¹²⁷ Tio signifas la supre menciitan.”

孝成王，临武君曰：“善！请问王者之兵设何道，何行而可？”

La reĝo Xiao Cheng kaj Lin Wu-jun diris: “Bone! Bonvolu diri al ni, kia por la reĝa militado devas esti la vera vojo, kaj kion fari?”

孙卿子曰：“凡在大王，将率末事也。”

La Majstro Sun diris: “Ĝenerale, al la Granda reĝo tre bagatela estas tia afereto kiel gvido de militoperaco.

臣请遂道王者诸侯强弱存亡之效，安危之势。

Permesu al mi diskuti nun pri la signo, indikanta fortecon-malfortecon kaj daŭripovon-

¹²⁶ 莫邪 Moye estas legenda glavo.

¹²⁷ Citaĵo el 诗经，商颂，长发.

pereon de reĝoj kaj landestroj, pri la simptomo de sekureco-danĝereco.

君贤者其国治，君不能者其国乱；隆礼贵义者其国治，简礼贱义者其国乱。

Estas bone regata la lando, kies estro estas saĝa; malordiĝas la lando, kies estro ne estas kapabla; estas bone regata la lando, kie oni disvolvas decregulojn kaj respektas juston; malordiĝas la lando, kie oni malzorgas decregulojn kaj malestimas juston.

治者强，乱者弱，是强弱之本也。

Kiu bone regas, tiu estas forta; kiu malordas, tiu malfortas: tio estas ja bazo de forteco-malforteço.

上足印，则下可用也；上不印则下不可用也。

Se la supro meritas respektindan, tiam la subo uzeblas; se la supro ne meritas je respekto, tiam la subo ne uzeblas.

下可用则强，下不可用则弱，是强弱之常也。

Forta estas tiu, al kiu uzeblas la subo; malforta estas tiu, al kiu ne uzeblas la supro. Tio estas ja ĉiama leĝo por forteco-malforteço.

隆礼，效功，上也；重禄，贵节，次也；上功，贱节，下也，是强弱之凡也。

La disvolvado de decreguloj kaj la esplorado de utileco-taŭgeco estas la plej supra laŭ la graveco; la zorgado pri postenigo-salajro kaj la estimo de bonordeco estas la sekva; troa inklino al merito kaj malestimo de la bonordeco estas la plej suba. Tio estas ĝenerala distingo de forteco-malforteço.

好士者强，不好士者弱；爱民者强，不爱民者弱；政令信者强，政令不信者弱；民齐者强，民不齐者弱；赏重者强，赏轻者弱；刑威者强，刑侮者弱；械用兵革攻完便利者强，械用兵革窳不便利者弱；重用兵者强，轻用兵者弱；权出一者强，权出二者弱，是强弱之常也。

Kiu ŝatas memstaran personon, estas forta, kiu ne ŝatas memstaran personon, estas malforta; kiu amas la popolon, estas forta, kiu ne amas la popolon, estas malforta; tiu, kies direkto estas fidinda, estas forta, tiu, kies dekreto ne estas fidinda, estas malforta; kiu akordigas la popolon, estas forta, kiu ne akordigas la popolon, estas malforta; kiu rigardas laŭdadon grava, estas forta, kiu rigardas laŭdadon negrava, estas malforta; kiu faras punleĝon timenda, estas forta, kiu faras punleĝon netimenda, estas malforta; kiu faras militmaŝinojn, armilojn, panopliojn pretaj je tuja uzado, estas forta, kiu ne faras militmaŝinojn, armilojn kaj panopliojn sendifektaj por la uzado, estas malforta; kiu atenteme faras militoperacon, estas forta, kiu faras militoperacon facilanime, estas malforta; kiu faras la potencon unuigita, estas forta, kiu faras la potencon duigita, estas malforta; jen kia aperas ĉiam la forteco-malforteço.

齐人隆技击，其技也，得一首者则赐赎镒金，无本赏矣。

Qi-landanoj lertas je batalartoj, pro la lerteco estas kompensata. Al tiu, kiu prenis po malamikan kapon, estas donita la gratifiko de mono laŭ nombro de kapoj, sed sen

oficiala honoriga ordeno.

是事小敌彘则偷可用也，事大敌坚则涣焉离耳，若飞鸟然，倾侧反覆无日，是亡国之兵也，兵莫弱是矣，是其去赁市佣而战之几矣。

Se milito estas de malgranda skalo kaj malamiko estas fragila, momente uzeblus tia manovro, sed se milito estas granda kaj malamiko estas firma, al tia manovro mankas koheriga forto, kvazaŭ disflugantaj birdoj, baldaŭ venos la tago de detruigo-renversiĝo, do tio estas ja militoperaco pereiga por la lando, ne pro tio, ke soldatoj estas malfortaj, sed pro tio, ke la soldatoj militiras samkiel tagsalajre dungitaj sur merkato nur dum la milito.

魏氏之武卒，以度取之，衣三属之甲，操十二石之弩，负服矢五十个，置戈其上，冠[革由]带剑，赢三日之粮，日中而趋百里，中试则复其户，利其田宅，是数年而衰而未可夺也，改造则不易周也。是故地虽大，其税必寡，是危国之兵也。

En Wei-regno, soldatoj estas koletitaj laŭ la certa normo, kaj liveritaj per kiraso kun trio da vestoj, manipulas arbaleston kun forteco de dekduo da tensioj *dan*, portas surdorse sagujon kun 50 sagoj, aldone halebardon sur sin, metas al si kaskon kaj glavon, kaj kun la manĝaĵo de tri tagoj, rapidiras cent *li*ojn ĉiu tagnokte. Se iu sukcesis trapasi la prov-ekzamenon, tiu, reveninte hejmen, ricevas profiton je la kampo kaj la domo, ne forprenotaj dum kelkaj jaroj, eĉ se li seniliĝus. Sed estas ne facile daŭrigi tian trakton ĉe la ĉiufoja rekrutado de sekvaj soldatoj, ĉar la impostenspezo nepre reduktiĝos kvankam la granda teritorio. Ankaŭ tio estas danĝera armadopolitiko por la lando.

秦人其生民也阨阨，其使民也酷烈，劫之以势，隐之以阨，忸之以庆赏，鲡之以刑罚，使天下之民所以要利于上者，非斗无由也。

Koncernante Qin-regnanojn, la popolanoj vivas mizere kaj premate, ili estas traktata severe kaj krude, minacate ege per aŭstera potenco, subpremate per malfacila mizero. Oni kaĵolas popolanojn per laŭdado kaj panegirado, streĉas ilin per la punado, kaj insinuas, ke al ili restus neniu alia rimedo ol batali por apenaŭ ne ricevi de la supro la profiton.

阨而用之，得而后功之，功赏相长也，五甲首而隶五家，是最为众强久，多地以正。故四世有胜，菲幸也，数也。

Mizerigange ilin kaj uzi, venkinte rekompenci ilin por la merito per la laŭdado laŭgrade, ke, por ekzemplo, doni kvar servut-familiojn al preninto de kvar altrangulaj kapoj, – jen la plej efika metodo por fari popolamason forta dumlonge, por multigi la teron je la impostado. Ke daŭras la venko dum kvar generacioj, estas ne hazarda, sed prikalkulata.

故齐之技击不可以遇魏氏之武卒，魏氏之武卒不可以遇秦之锐士不可以当桓，文之节制，桓，文之节制不可以敌汤，武之仁义，有遇之者，若以焦熬投石焉。

Do, la batalarto de Qi-regno ne povis konkurenci kun la armea sistemo de Wei-regno, la armea sistemo de Wei ne povas konkurenci kun akraj soldatoj de Qin-regno. La akraj soldatoj de Qin ne povus konkurenci kun al la ordigita sistemo de la dukoj Huan kaj Wen. La ordigita sistemo de Huan kaj Wen ne povus konkurenci kun la bonvoleco de Tang kaj Wu, same kiel la ĵetado de fulgbulo al ŝtono.

兼是数国者，皆干赏蹈利之兵也，佣徒鬻卖之道也，未有贵上，安制，綦节之理也；诸侯有能微妙之以节，则作而兼殆之耳。

En tiuj koncernantaj regnoj, ĉiuj soldatoj serĉadas la laŭdadon kaj la profiton, samkiel monlaboristoj dungitaj kaj aĉetitaj, do ili tute neniom havas tian noblan ideon estimi la supron, stabiligi reĝimon, fondi la bazon de bonordo. Se aperos iu landestro, kapablan ordigi la landon subtile kaj prudente, tiu certe fariĝos estro, imponanta ĉiujn.

故招近募选，隆势诈，尚功利，是渐之也；礼义教化，是齐之也。

Alvoki, rekruti, kolekti, elekti soldatojn kaj akceli ruz-lertan taktikon estas la altigo de utilitismo kaj profitismo, tio estas ja stimulo por movi. La civilizado per decreguloj kaj justo estas ja ordigo kun unisona aranĝo.

故以诈遇诈，犹有巧拙焉；以诈遇齐，辟之犹以锥刀堕太山也，非天下之愚人莫敢试。故王者之兵不试。

Se kontraŭstari per sia ruz-lerta taktiko al alies ruz-lerta taktiko, ekzistas malsameco inter taktikoj lerta kaj mallerta; kontraŭstari per sia ruz-lerta taktiko al la alies ordigita estas same kiel detruigi Grandan monton per borilo kaj glavo – tion aŭdacus provi neniun se ne mondiskala stultulo. Do reĝa armeo ne provas.

汤，武之诛桀，纣也，拱挹指麾而强暴之国莫不趋使，诛桀，纣若诛独夫。

Kiam Tang-Wu punis tiranojn Jie-Zhou, dum ili komandis per siaj fingroj kun premitaj brakoj, la landoj sub brutalaj tiranoj haste turnis sin al ili, kaj la punado de Jie-Zhou estis facila kvazaŭ la punado de soluloj izolitaj.

故《泰誓》曰：‘独夫纣。’此之谓也。

Do estas dirite en «*Tai Shi*»: ‘Zhou, la solulo’.¹²⁸ Tio signifas la supre menciitan.

故兵大齐则制天下，小齐则治邻敌。

Tiel do la armeo kun granda ordo regas la mondon, kun malpli granda ordo subigas najbarajn malamikojn.

若夫招近募选，隆势诈，尚功利之兵，则胜不胜无常，代翁代张，代存代亡，相为雌雄耳矣。

Armeo, konsistanta el soldatoj alvokita, rekrutita, kolektita, elektita, foje povas leviĝi per ruz-lerta taktiko kaj stimuli soldatojn per favorado kaj profitado, sed tamen ne estante konstanta je venko aŭ malvenko, ripetante koherecon aŭ malkoherecon, ekzistadon aŭ pereon, nur rivaladas reciproke unu kontraŭ la alia.

¹²⁸ *Tai Shi* estas unu el ĉapitroj en *Libroj* 尚书.

夫是之谓盗兵，君子不由也。

Tia armeo estas nomata «armeo de rabistoj», sur kiu nobluloj ne apogas sin.

故齐之田单，楚之庄蹻，秦之卫鞅，燕之繆蟻，是皆世俗之所谓善用兵者也，是其巧拙强弱则未有以相君也，若其道一也，未及和齐也，掎契司诈，权謀倾覆，未免盗兵也。

Tian Dan de Qi-regno, Zhuang Qiao de Chu-regno, Wei Yang de Qin-regno, Miao Ji de Yan-regno estis ĉiuj bonaj je militoperaco laŭ la monda publika opinio, sed ili kun sia lerteco aŭ mallerteco, kun sia forteco aŭ malforteco, ankoraŭ ne indas je la nomo de reĝa ministro, estante samaj je sia vojo, tamen ili ankoraŭ ne atingis harmonian akordon, apogante sin sur ruz-lerta taktiko kun insido kaj konspiro, sur intrigemaj manovroj por renversi la aliajn, tiel do ne eviteblas fariĝi armeo de rabistoj.¹²⁹

齐桓，晋文，楚庄，吴阖闾，越勾践，是皆和齐之兵也，可谓入其域矣，然而未有本统也，故可以霸而不可以王。是强弱之效也。”

Huan de Qi-regno, Wen de Jin-regno, Zhuang de Chu-regno, He Lü de Wu-regno, Gou Jian de Yue-regno estis ĉiuj, eblus diri, atingintoj de ia grado, ke ili sukcesis organizi la armeon en akordo kaj harmonio, tamen eĉ ili ankoraŭ ne havis la veran fundamenton, do ili povas esti nomataj nur “hegemoniuloj”, sed ne “veraj reĝoj”. Tio estas ligita al valorkoncepto de forteco aŭ malforteco.”

孝成王，临武君曰：“善！请问为将。”

La reĝo Xiao Cheng kaj Lin Wu-jun diris: “Bone! Bonvolu diri pri generalo, kia li devas esti.”

孙卿子曰：“知莫大乎弃疑，行莫大乎无过，事莫大乎无悔。”

La Majstro Xun diris: “Se temas pri la scio, nenio estas pli grava ol forĵeti dubon; se temas al la ago, nenio pli gravas ol ne fari eraron; se temas pri la afero, nenio pli gravas ol ne bedaŭri.

事至无悔而止矣，成不可必也。

Se vi ekbedaŭrus dum la farado de afero, tiam via afero ĉesas, kaj nepre ne povas sukcesi.

故制号政令，欲严以威；庆赏刑罚，欲必以信；处舍収臧，欲周以固；徙举进退，欲安以重，欲疾以速；窥敌观变，欲潜以深，欲伍以参；遇敌决战，必道吾所明，无道吾所疑，夫是之谓六术。

Kiam vi proklamas ordonon kaj dekreton, deziru esti severa kun majesteco; en kazo de la laŭdado kaj la punado, deziru firme nepre kun fido; en kazo de instaligo de tendaro

¹²⁹齐之田单，楚之庄蹻，秦之卫鞅，燕之繆蟻，Tian Dan estis generalo de Qi-regno, Zhuang Qiao estis generalo de Chu-regno, Wei Yang, alinme Shang Yang estis fama legalizisma ideologo, ministro de Qin-regno. Pri Miao Ji de Yan-regno estas ne sciate precize.

kaj provizejo, deziru ke la ĉirkaŭo estu sekura; je transmovo, antaŭen- kaj retro-irado, deziru sendanĝerecon singardeme kaj deziru tujan rapidecon; je observado pri movo de malamikoj, deziru sondi profunden kaj deziru penetri por skolti kvinope aŭ trio-ope en malamikan kampon; ĉe la decida batalo kun malamikoj, agadu nepre kun via klara konvinko, ne agadu kun via nedecidema dubo. Jen tiuj estas ses teknikoj.

无欲将而恶废，无急胜而忘败，无威内而轻外，无见利而不顾其害，凡虑事欲孰而用财欲泰，夫是之谓五权。

Ne alrokciĝu al la generaleco, nek malŝatu esti forpelita; ne hastu venki, nek forgesu okazon de malvenko; ne timigu siajn internajn ulojn, nek malestimu la eksterajn; ne vidu nur profiton-avantaĝon, nek misatentu pri la damaĝon-malavantaĝon; konsideru skrupule la entreprenon kaj estu malavara je la uzado de bezonataj mono-joj. Jen tiuj estas nomataj kvin zorgoj.

所以不受命于主有三：可杀而不可使处不完，可杀而不可使击不胜，可杀而不可使欺百姓，夫是三至。

Estas tri okazoj, ke la generalo ne devas obei al ordonoj de estro: eĉ se li estu preta je morto, ne sendu sian armeon al la loko nefidinda; eĉ se li estu preta je morto, ne sendu sian armeon ataki la nevenkeblan; eĉ se li estu preta je morto, me lasu al sia armeo trompi popolanojn. Jen tiuj estas tri limpunktoj netranspaŝendaj.

凡受命于主行三军，三军既定，百官得序，群物皆正，则主不能喜，敌不能怒，夫是之谓至臣。

Post kiam la generalo ricevis de la estro la ordonon gvidi tri armeojn, la tri armeoj estas jam formiĝintaj, cent rangoj estas vicigitaj, amaso de provizoj estas ĉiuj pretigitaj, – se tiel, spite ĉion ajn, eĉ se la estro ne povus ĝoji je tio, eĉ se la malamikoj ne povus koleri je tio, eblas diri, ke la generalo estas la plej bona vasalo.

虑必先事而申之以敬，慎终如始，终始如一，夫是之谓大吉。

Nepre bone antaŭkonsideri pri la aferoj, esplori ilin respektoplene, skrupule finplenumi tiel same, kiel komenci, laŭ kohera unututeco de la komenco ĝis la fino, jen kio estas nomata granda feliĉego.

凡百事之成也必在敬之，其败也必在慢之。

Ĝenerale la sukceso je cent aferoj rezultas nepre el la respektplena alirado, kaj la malsukceso rezultas nepre el la aroganteca alirado al la aferoj.

故敬胜怠则吉，怠胜则灭；计胜欲则从，欲胜计则凶。

Do estas bone, se la respekto superas la pigrecon; estas pereige, se la pigreco superas la respekton. Sekvas bona rezulto, se la kalkulado superas la pasion; okazas sinistro, se la pasio superas la kalkuladon.

战如守，行如战，有功如幸。

Konsideru humile la lukton kiel la defendon, skrupule la marŝon kiel la realan luktheadon, la akiritan meriton kiel la bonsorton.

敬谋无圯，敬事无圯，敬吏无圯，敬众无圯，敬敌无圯，夫是之谓五无圯。

Respektu taktikon senvane, respektu servadon senvane, respektu oficistojn senvane, respektu popolamason senvane, respektu malamikojn senvane, – jen kio estas nomata kvin senvanaj respektoj.

谨行此六术，五权，三至，而处之以恭敬无圯，夫是之谓天下之将，则通于神明矣。”

Prudente plenumu tiujn instruojn je ses teknikoj, kvin zorgoj, tri limpunktoj, kaj traktu la aferojn senvane kun respekto plena humileco, – jen kion faras t. n. la mondskala generalo, kiu atingis diecan iluminiĝon.”

临武君曰：“善！请问王者之军制。”

Lin Wu-jun diris: “Bone! Bonvolu diri, kia estas la vere reĝeca armea sistemo.”

孙卿子曰：“将死鼓，御死辔，百吏死职，士大夫死行列。

La Majstro Xun diris: «Generalo estas preta je la morto ĉe tamburo, ĉaristo – preta je la morto ĉe gvidrimeno, cent ranguloj – pretaj je la morto ĉe la ofico, kavaliroj kaj grandoficistoj – pretaj je la morto ĉe la vicordo.

闻鼓声而进，闻金声而退，顺命为上，有功次之。

Aŭdante sonon de tamburo marŝi antaŭen, aŭdante tinton de sonoriloj retiriĝi, ĝuste obei antaŭ ĉio la ordonon de la supro, – lasi posten per ajna merito distingi sin aŭ ne.

令不进而进，犹令不退而退也，其罪惟均。

Se iu iros antaŭen spite la ordonon, ke ne antaŭeniru, tio estas samkiel retiriĝi spite la ordonon, do tio estas tute egale ja krimo.

不杀老弱，不猎禾稼，服者不禽，格者不舍，犇命者不获。

Ne mortigi maljunulojn kaj malfortulojn, ne tretadi grenojn kaj kultivaĵojn, ne turmenti brutale kapitulacintojn, sed ne indulgi rezistantojn, kaj ne konsideri militkaptitojn tiujn, kiuj alkuris subite por obei.

凡诛，非诛其百姓也，诛其乱百姓者也；百姓有扞其贼，则是亦贼也。

Ĝenerale, okaze de la ekzekutado, ekzekutu ne popolanojn, sed tiujn, kiuj instigis la popolanojn kontraŭi. Kiam popolanoj protektas krimulon, tiam ankaŭ ili devas esti kalkulataj kiel krimuloj.

以故顺刃者生，苏刃者死，犇命者贡。

Lasu vivi obeanton al via glavo, tamen mortigu malobeanton al via glavo, traktu la transdonintajn sin al via dispono kiel tributulojn.

微子开封于宋，曹触龙断于军，殷之服民，所以养生之者也，无异周人。

Weizi Qi estis feŭdita en Song-lando, Cao Chulong estis tranĉita en batalo.¹³⁰ Popolanoj el Yin-anoj, ekobeante al Zhou, estis allasataj vivi kaj nutrataj same, kiel Zhou-anoj.

故近者歌讴而乐之，远者竭蹶而趋之，无幽闲辟陋之国莫不趋使而安乐之，四海之内若一家，通达之属莫不从服，夫是之谓人师。

Kiu loĝas proksime al Zhou, tiu ĝuas kaj prikantas la vivon; kiu loĝas for, tiu alkuras haste kvzaŭ enruliĝante sub la regadon; kiu loĝas periferie en provincaj landoj, tiu sendas tuj delegitojn por ricevi konfirmon de bienoj kaj sekurigi pacon; tuta mondo ĉirkaŭita de kvar maroj fariĝas kvazaŭ unu familio. El ĉiuj gentoj tra la mondo neniu malobeas. Tiu estas nomata gvidanto de homoj.

《诗》曰：‘自西自东，自南自北，无思不服。’此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: 'De okcidento, de oriento, de sudo, de nordo, neniu dezirus malobei'.¹³¹ Tio signifas la supre menciitan.

王者有诛而无战，城守不攻，兵格不击，上下相喜则庆之。

La reĝo de reĝoj ne batalas, kvankam iam punas, defendas la urbon sed ne agresas, havas soldatojn streĉitaj sed ne atakantaj, donas al la supro kaj la subo kune ĝui kaj gratuli reciproke.

不屠城，不潜军，不留众，师不越时。

Li ne amasbuĉas urbojn, ne ekstermas surprize alies armeojn, ne detenas nek deportas popolamason, ne militiras transe de unu sezono.¹³²

故乱者乐其政，不安其上，欲其至也。”

Do kiu suferis malordon, tiu ĝojas je lia regado; kiu estis maltrankvila sub la supro, tiu deziras atingi lin.”

临武君曰：“善！”

Lin Wu-jun diris: “Bone!”

陈嚣问卿子曰：“先生议兵，常以仁义为本。仁者爱人，义者循理，然则又何以兵为？凡所为有兵者，为争夺也。”

Chen Ao¹³³ demandis la Majstron Xunzi: “Vi, s-ro, parolante pri militafero, ĉiam asertas, ke bonvoleco kaj justo estas la fundamento. Bonvoleco estas ami homojn, justo estas laŭ rezono, se tial, kio do estas la militafero? Ĝenerale milito estas batalado kaj

¹³⁰ Weizi, nomo estis Qi 启, bofrato de Zhou 纣. Liu Xiang 刘向 ŝanĝis lian nomon en Kai 开 por eviti samecon kun la nomo de la reĝo Jing de Han-dinastio, 汉景帝.

¹³¹ Citaĵo el 诗经, 大雅, 文王有声.

¹³² Pri 不留众 estas diversaj komprenoj. Iu opinias, ke ne restigi popolamason tro longdaŭre en alia lando, la alia – ne mortigi vane popolamason, la tria – ne longigi al sia popolo tempon de militservado.

¹³³ Esploristoj konjektas, ke li estas unu el lernantoj de Xunzi.

okupado.”

孙卿子曰：“非女所知也。彼仁者爱人，爱人，故恶人之害之也；义者循理，循理，故恶人之乱之也。

La Majstro Xunzi diris: “Ci ne komprenas. La bonvolemlulo amas homojn. Ĉar amas homojn, malamas iun-ajn, kiu damaĝas la alian. Justulo sekvas rezonon. Ĉar sekvas la rezonon, malamas iun-ajn, kiu malordigas.

彼兵者，所以禁暴除害也，非争夺也。

Ilia militafero kuŝas en malpermeso de violenco kaj eliminado de damaĝo, sed ne en batalo kaj okupado.

故仁人之兵，所存者神，所过者化，若时雨之降，莫不说喜。

Do ĉe la bonvoleca militafero, – kio ekzistas nun, fariĝas animoplana kaj kio ekzistis antaŭe, transformiĝas, kvazaŭ ĉe bonfara pluvo, tiel do ĉiuj iĝas ĝojplenaj.

是以尧伐驩兜，舜伐有苗，禹伐共工，汤伐有夏，文王伐崇，武王伐纣，此四帝两王，皆以仁义之兵行于天下也。

Tiel Yao batis protokanajlon Huan Dou, Shun konkeris genton You Miao, Yu punis respondeculon por akvopolitiko Gong Gong, Tang renversis la dinastion Xia, la reĝo Wen atakis la landon Chong, la reĝo Wu venkobatis tiranon Zhou. Tiuj kvar imperiestroj kaj du reĝoj, ĉiuj faris bonvolecan kaj justecan militoperacon por la mondo. 故近者亲其善，远方慕其德，兵不血刃，远迩来服，德盛于此，施及四极。

Tial do, la proksimaj intime ĝuis ilian bonon, la foraj sopiris ilian virton, glavoj de iliaj armeoj ne estis sange makulitaj, la foraj kaj la najbaraj alvenis obei ilin. Ilia virto prezentiĝis tiom plena, ke ilia beno disvastiĝis al kvar ekstremoj.

《诗》曰：‘淑人君子，其仪不忒。’此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: ‘La modelo de bonuloj-nobluloj neniam ŝanceblas.’¹³⁴ Tio signifas la supre menciitan.

李斯问孙卿子曰：“秦四世有胜，兵强海内，威行诸侯，非以仁义为之也，以便从事而已。”

Li Si demandis la Majstron Xunzi, dirante: “Qin-regno estas venkanta daŭre dum kvar generacioj, ĝia armeo estas la plej forta en la mondo, ĝia aŭreolo kovras landestrojn, – tio ne estas rezulto de bonvoleco kaj justo, sed nur rezulto de laŭafera konveneco.”¹³⁵

孙卿子曰：“非女所知也。女所谓便者，不便之便也；吾所谓仁义者，大便之便也。

¹³⁴ Citaĵo el 诗经，曹风，尸鸠.

¹³⁵ Li Si 李斯 kune kun Han Feizi 韩非子 iam estis disciploj de Xunzi. Li Si asistis al Qin Shi Huang-di kiel ĉefministro.

La Majstro Xunzi diris: “Ci nenion komprenas. Cia konveneco estas konvena por granda malkonveno. Mia bonvoleco kaj justo estas konvena por granda konveno.

彼仁义者，所以修政者也，政修则民亲其上，乐其君，而轻为之死。

La bonvoleco kaj justo povas korekti politikon. La korektita politiko igas la popolon proksima al la supro, igas ĝuanta je la estro, lasas la popolon vivoriske servi al la reĝo.

故曰：‘凡在于军，将率末事也。’

Do estas dirite: ‘Ĝenerale, se temas pri la militafero, bagatela estas la demando de generaloj-oficiroj.’

秦四世有胜，謏謏然常恐天下之一合而轧己也，此所谓末世之兵，未有本统也。

Kvankam Qin-regno venkas dum kvar generacioj, tamen ĉiam timante, ĉu aliaj landoj de la mondo unuiĝinte kontraŭstarus al ĝi. Eblas diri, ke ĝi estas ja la armeo de degenera epoko, sed ankoraŭ ne vere aŭtentika.

故汤之放桀也，非其逐之鸣条之时也；武王之诛纣也，非以甲子之朝而后胜之也。

Tang forpelis tiranon Jie ne en tiu momento de la bataalkampo Ming Tiao; la reĝo Wu batis la tiranon Zhou ne en tiu momento de la venko en la mateno de Jia Zi.¹³⁶

皆前行素修也，此所谓仁义之兵也。

Antaŭ ol tiu momento, ĉio estis jam pretigita per ĉiama konduto de kulturado. Jen kial mi diras pri neceso je la militoperaco surbaze de bonvoleco kaj justo.

今女不求之于本而索之于末，此世之所以乱也。

Nun ci serĉas ne la bazon, sed nur la bagatelaĵon. Tio kondukas al malordo de ĉi tiu mondo.

“礼者，治辨之极也，强国之本也，威行之道也，功名之总也。

Decreguloj estas ja la plej gravaj por la enorda regado, bazo de bazoj por la forta ŝtato, la vojo por majesta irado, la fundamento de merita nomo.

王公由之，所以得天下也；不由，所以隕社稷也。

Reĝo aŭ duko, apogante sin sur la decreguloj, povos akiri la mondon, sed se ne, povos pereigi la ŝtatan sanktejon de grenoj kaj tero.

故坚甲利兵不足以为胜，高城深池不足以为固，严令繁刑不足以为威，由其道则行，不由其道则废。

Kun firme armita armeo ne sufiĉas por venki, kun alta kastelo kaj profunda digo ne sufiĉas por sekure defendi, kun severa ordono kaj ofta punado ne sufiĉas por montri majestecon. Per la vojo ireblas la regado, se ne, pereos la vojo.

楚人蛟革犀兕以为甲，鞬如金石，宛钜铁铍，惨如蜂蚕，轻利僿遽，卒如飘风，然而兵殆于

¹³⁶ 甲子之朝 estas skribite en *Libro* 尚书, 牧誓, ke en tiu tago (en la kvara de la dua monato) la armeo de Zhou estis venkita de Wu.

垂沙，唐蔑死，庄躄起，楚分而为三四。

Chu-regnantoj faras la kirason el ŝarka haŭto aŭ ledo de rinoceroj, faras ilin forte kunmetitaj kvazaŭ metala aŭ ŝtona, faras el solidaj feroj de Yuan la halebardon tiel akra, kiel pikilo de vespo aŭ skorpio, kaj ili sturmas subite kaj rapide, kvazaŭ kirlvento. Sed ilia armeo estis venkita ĉe la kampo de Chui Sha, ilia generalo Tang Mie mortis. Kaj poste aperis la generalo Zhuang Qiao, de kiu estis disdividita la Chu-regno en tri aŭ kvar partojn.

是岂无坚甲利兵也哉？其所以统之者非其道故也。

Ĉu ili ne posedis armilojn fortan kaj akran? Ili pereis pro tio, ke la gvidanto iris ne laŭ la vojo.

汝，颍以为险，江，汉以为池，限之以邓林，缘之以方城，然而秦师至而郢，郢举，若振槁然。

Ĉhu-regno estas favorata per natura kondiĉo de la defendo, ĉar estas riveroj Rui kaj Yin kun krutaj klifoj, estas riveroj Chang Jiang kaj Han kun digoj, estas la arbaro Deng por apartigi la landlimon, estas la montaro Fang Cheng ĉe la rando. Malgraŭ ĉio ĉi tio, la armeo de Qin-regno atingis la ĉefurbojn Yan-Ying, kiuj falis kvazaŭ velkintaj folioj el skuita arbo.

是岂无固塞隘阻也哉？其所以统之者非其道故也。

Ĉu tiu perejo estus pro manko de firma fortikaĵo kaj krutega muro? Ĝi pereis, ĉar al la reganto mankis la vojo.

纣刳比干，囚箕子，为炮烙刑，杀戮无时，臣下慄然莫必其命，然而周师至而令不行乎下，不能用其民。

La tirano Zhou dissekis la korpon de Bi Gan, malliberigis Jizi, brulstampadis al homoj kaj senĉese mortigis-buĉadis, do liaj subuloj timeme zorgadis almenaŭ supervivi, sed kiam la armeo de Wu alvenis, lia ordono ne estis plenumata de la subo kaj ne eblis uzi la popolon.

是岂令不严，刑不繁也哉？其所以统之者非道故也。

Ĉu la ordono ne estus severa? Ĉu la punado ne estus farata ofte? Ĝi pereis pro tio, ke al la reganto mankis la vojo.

古之兵，戈矛弓矢而已矣，然而敌国不待试而诘；城郭不辨，沟池不拊，固塞不树，机变不张，然而国晏然不畏外而明内者，无它故焉，明道而分钧之，时使而诚爱之，下之和上也如影响，有不由令者然后诛之以刑。

Antikve, armiloj konsistis nur el halebardo, lanco, pafarko kaj sago, sed malamikaj landoj submetiĝis sen uzi tiujn armilojn. Malgraŭ ke kasteloj-fortikaĵoj ne estis sufiĉe distingaj, digoj ne estis fosataj, ne estis la firmaj abatadoj el lignoj, ne estis kanonoj kaj balistoj, sed tamen la ŝtato estis stabila sen timo kontraŭ la eksteraj kaj kun klara fido

al la internaj, ne pro alia kialo ol ke laŭ la klara vojo efektiviĝis la divido kaj la egaleco, laŭ ĝustatempe oni uzis kaj honeste amis homojn, la subo akordiĝis kun la supro, kvazaŭ ombro aŭ eĥo. Se troviĝas iu, ne obeanta al ordono, tiam li estas akuzita kaj punita.

故刑一人而天下服，罪人不卹其上，知罪之在己也。

Nur se oni punas unu el ili, la tuta mondo obeas. La krimulo ne plendas pri la supro, ĉar li scias sian kulpon en si mem.

是故刑罚省而威流，无它故焉，由其道故也。

Tiel do malmultas la punado, sed disvastiĝas la majesteco de reganto, ĉar estas farala la vojo.

古者帝尧之治天下也，盖杀一人，刑二人而天下治。

Ĉe la monda regado far de antikva imperiestro Yao, nur se oni ekzekutis unu aŭ punis du homojn, la mondo estis bone regata.

传曰：‘威厉而不试，刑错而不用。’此之谓也。

Estas dirite: ‘Kvankam ekzistas drakono majesta kaj severa, tamen ne estas provata; kvankam estas punjuro, tamen ne estas uzata.’ Tio signifas la supre menciitan.

“凡人之动也，为赏庆为之，则见害伤焉止矣。

Se temas pri agmanieroj de ĉiuj homoj, la agado, farata por rekompenco-premio, ĉesiĝas tuj, kiam videblas damaĝo-vundiĝo.

故赏庆，刑罚，势诈不足以尽人之力，致人之死。

Per rekompenco-premio, punado-sankcio, minaco kaj trompo, ne sufiĉas por lasi homojn dediĉi la tutan energion kaj vivon ĝismorte.

为人主上者也，其所以接下之百姓者无礼义忠信，焉虑率用赏庆，刑罚，势诈除阨其下，获其功用而已矣。大寇则至，使之持危城则必畔，遇敌处战则必北，劳苦烦辱则必犇，霍焉离耳，下反制其上。

Koncerne de la supra homa estro, se al liaj proksimaj popolanoj mankas decreguloj, justo, lojaleco, fideleco, tiam kiel ajn li provu elimini al la subo malbonon pere de klopodoplena rekompenco-premio, punado-sankcio, minaco kaj trompo, kiel ajn li provu nur gajni la profiton per tiuj rimedoj, tamen apenaŭ la granda malamiko alvenos, kiel ajn li igus siajn popolanojn subteni la endanĝerigitan kastelon, ili nepre perfidos kaj nepre malvenkos en la batalo kun la malamiko, aŭ se li ŝarĝu ilin per peniga kaj komplika laborego, ili nepre eskapos, aŭ dispeciĝos kaj disiĝos, aŭ ili de sube renversos la supron.

故赏庆，刑罚，势诈之为道者，用徒鬻卖之道也，不足以合大众，美国家，故古之人羞而不道也。

La vojo de rekompenco-premio, punado-sankcio, minaco kaj trompo estas ja vojo de dungosoldatoj kaj komercistoj, ke ne eblas kunigi la popolamason nek beligi la ŝtaton. Do antikvuloj hontis pri tio kaj ne prenis tian vojon.

故厚德音以先之，明礼义以道之，致忠信以爱之，尚贤使能以次之，爵服庆赏以申之，时其事，轻其任以调齐之，长养之，如保赤子。

Do por stari antaŭ la popolo ili akumulis la virton alta, klarigis decregulojn-juston kaj predikis la vojon al ĝi, kun lojaleco kaj fideleco amis ĝin, promociinte saĝulojn kaj uzante kapablulojn, vicordigis ĝin, kaj, per rangoj, vestoj, premioj rekompencis ĝin, kaj entreprenante aferojn konforme al tempo, faris al ĝi la taskon pli facila per la bona aranĝo, kreskigis kaj nutris ĝin tiel zorgoplene, kvazaŭ tenus bebon ĝentile.

政令以定，风俗以一，又离俗不顺其上，则百姓莫不敦恶，莫不毒孽，若祓不祥，然后刑于是起矣。

Se, spite stabiligitan dekretan kaj unuecan moron, iu-ajn, malkiel ordinaruloj, ne obeus al la supro, tiam poplanoj malamas kaj naŭzas tiun, kvazaŭ forigus malbonaŭguron, kaj ekpunas lin.

是大刑之所加也，辱孰大焉？将以为利邪？

Ke oni punegas lin, kiom granda hontego tio estas? Kiu prenis tion por profito?

则大刑加焉，身苟不狂惑贳陋，谁睹是而不改也哉？

Ĉe la granda punado, kiu do, vidante tion, ne korektus sin, se li ne estus freneza kaj obstuna.

然后百姓晓然皆知修上之法，像上之志而安乐之。

Kaj aldone, ĉiuj poplanoj scias bone kiel korekti sin laŭ la supra modelo, kiel aspiri alte kaj kiel ĝui tian memaltigon.

于是有能化善，修身，正行，积礼义，尊道德，百姓莫不贵敬，莫不亲誉，然后赏于是起矣。

Per tio, la kapabla ŝanĝiĝos bona, memkulturos, ĝustigos la konduton, akumulos decregulojn kaj juston, respektos la vojon-virton, tiel do poplanoj nepre respektos lin kiel la noblan, kutimiĝos al honora konduto, kaj tial ekestas necese laŭdi per premio.

是高爵丰禄之所加也，荣孰大焉？将以为害邪？

Jen en kio kuŝas la enkonduko de laŭdado per altaj rangoj kaj riĉaj salajroj. Kia granda honoro tio estas! Ĉu tio estus konsiderata kiel damaĝo?

则高爵丰禄以持养之，生民之属，孰不愿也？

Kiu ricevas altan rangon kaj riĉan salajron, tiu povas nutri sin dumlonge. Kiu do el vivantaj poplanoj ne dezirus tion?

雕雕焉县贵爵重赏于其前，县明刑大辱于其后，虽欲无化，能乎哉？

Kiu ne dezirus ŝanĝiĝon, vidante klare noblan rangon kaj grandan premion pendantaj antaŭe kaj vidante klare la hontindan punon pendantaj malantaŭe, kiu povus ne

ŝanĝiĝi?

故民归之如流水，所存者神，所为者化而顺。

Tiel do la popolo returnas sin al la estro kvazaŭ fluanta akvo, kiel sekvas al vivanta dio, ŝanĝigante je la konduto.

暴悍勇力之属为之化而愿，旁辟曲私之属为之化而公，矜纠叟繚之属为之化而调，夫是之谓大化至一。

Homoj violentaj, krudaj, kuraĝaj kaj fortaj transformiĝas en volontulojn; homoj torditaj, kontraŭemaj, kurbaj kaj egoismecaj transformiĝas en sociemajn, homoj orgojlaj, arogantaj kaj arbitraj transformiĝas en akordiĝemajn, – tio estas nomata la granda ŝanĝiĝo al la unueco.

《诗》曰：‘王犹允赛，徐方既来。’此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: 'Kie plenas la reĝa regado, tien venas omaĝi eĉ Xu-landanoj.'¹³⁷ Tio signifas la supre menciitan.

“凡 兼人者有三术：有以德兼人者，有以力兼人者，有以富兼人者。

Ĝenerale estas tri metodoj por kunigi homojn: kunigi homojn pere de virto, kunigi homojn pere de forto, kunigi homojn pere de riĉaĵo.

彼贵我名声，美我德行，欲为我民，故辟门除涂以迎吾入，因其民，袭其处，而百姓皆安，立法施令莫不顺比，是故得地而权弥重，兼人而兵俞强，是以德兼人者也；非贵我名声也，非美我德行也，彼畏我威，劫我势，故民虽有离心，不敢有畔虑，若是，则戎甲俞众，奉养必费，是故得地而权弥轻，兼人而兵俞弱，是以力兼人者也；非贵我名声也，非美我德行也，用贫求富，用饥求饱，虚腹张口来归我食，若是，则必发夫掌窳之粟以食之，委之财货以富之，立良有司以接之，已~~禁~~三年，然后民可信也，是故得地而权弥轻，兼人而国俞贫，是以富兼人者也。

De la metodo kunigi homojn pere de virto rezultas, ke oni rigardas mian nomon nobla, mian virtan konduton bela, deziras fariĝi mia popolano, do, malfermante pordon kaj purigante vojon, akceptas min eniri, tial do la popolo daŭre tenas la lokon heredinda, kaj ĉiuj popolanoj iĝas trankvilaj, promulgitaj dekretoj kaj leĝoj nepre esas obeataj, tial do la majesteco sur akirita teritorio grandiĝas pli kaj pli, la homoj, kunigite, faras la armeon pli fortaj – tia estas ja kunigo de homoj pere de virto. De la metodo kunigi pere de forto rezultas, ke oni rigardas mian nomon ne nobla, mian virtan konduton ne bela, timas mian majestecon, minacate de mia potenco, do la popolo malsimpatias al mi, kvankam ne aŭdacas ribeli, tiel do bezonatas pli kaj pli multe da armiloj, da nepraj elspezoj por nutri servistaron, kaj la majesteco sur la akirita teritorio iĝas malpeza pli kaj pli, homoj, kunigite, faras la armeon pli kaj pli malforta – tia estas ja kunigo pere de

¹³⁷ Citaĵo el 诗经，大雅，常武.

forto. De la kunigo pere de riĉaĵo rezultas, ke oni rigardas mian nomon ne nobla, mian virtan konduton ne bela, pro malriĉeco serĉas riĉaĵon, pro malsato serĉas satmanĝon, pro malplena stomako oni gape turnas sin al mi por manĝi, tiel do ni nepre devas malfermi la grenejon por doni cerealon al la popolo manĝi, doni monon kaj varon al ili por riĉigi ilin, devas postenigi bonajn oficistojn por trakti ilin, kaj apenaŭ post tri jaroj de tia traktado la popolo povos fariĝi kredinda. La majesteco sur la akirita teritorio iĝas malpeza pli kaj pli, kun la popolo kunigita la ŝtato iĝas malriĉa pli kaj pli – tia estas la kunigo pere de riĉaĵo.

故曰：以德兼人者王，以力兼人者弱，以富兼人者贫。古今一也。

Do estas dirite: kiu kunigas homojn pere de virto, iĝas vera reĝo; kiu kunigas homojn pere de forto, iĝas malforta; kiu kunigas homojn per riĉaĵo, iĝas malriĉa. Tio estas ja unu samo inter antikvo kaj nuno.

“兼并易能也，唯坚凝之难焉。

Aneksi estas facile, tamen estas malfacile teni la anekson firme.

齐能并宋而不能凝也，故魏夺之；燕能并齐而不能凝也，故田单夺之；韩之上地，方数百里，完全富足而趋赵，赵不能凝也，故秦夺之。

Qi-regno povis aneksi Song-landon, sed ne povis teni ĝin firme, do Wei-regno rabis ĝin; Yan-regno povis aneksi Qi-regnon, sed ne povis teni ĝin firme, do Tian Dan rabis ĝin; parto de la teritorio Shang Dang de Han-regno kun kelk-cent *li*oj kvadrato, perfekta kaj sufiĉe riĉa, transiris subite al Zhao-regno, sed Zhao-regno ne povis teni ĝin firme, tiel do Qin-regno rabis ĝin.¹³⁸

故能并之而不能凝，则必夺；不能并之又不能凝其有，则必亡。

Kvankam eblas aneksi landon, tamen ne eblas teni ĝin firme, do ĝi nepre estos forrabita; kiu ne povas aneksi ĝin kaj ne povas teni ĝin firme, tiu nepre pereas.

能凝之，则必能并之矣。

Kiu povas teni ĝin firme, tiu nepre povas aneksi ĝin.

得之则凝，兼并无强。

Se iu povas akiri ĝin kaj teni ĝin firme, la aneksado iras sen perforte.

古者汤以薄，武王以瀆，皆百里之地也，天下为一，诸侯为臣，无他故焉，能凝之也。

Antikve, Tang, apogante sin sur la lando Bo, la reĝo Wu, apogante sin sur la lando Hao, ĉiuj nur kun cent *li*oj kvadrato, faris la mondon unu, kaj landestroj fariĝis vasaloj. En

¹³⁸ En 286 a.K. Qi atakis Song, kies reĝo Yan fuĝis al Wei, kaj mortis en Wen. En 284 a.K. Wei-regno kune kun Qin, Zhao, Han, Yan atakis Qi-regnon, kies reĝo Min fuĝis, kaj la antaŭa Song-lando grandparte apartenis al Wei. En 284 a.K. generalo Yue Yi batis landojn de Qi-regno, sed poste Tian Dan de Qi-regno batis la armeon de Yan-regno. En 262 a.K. Qin-regno batis Han-regnon, okupis la provincon Shang Dang.

tio ne estas alia kialo ol ke ili povis firmigi la mondon.

故凝士以礼，凝民以政，礼修而士服，政平而民安。

Firmigu personojn per decreguloj, firmigu la popolon per politiko. Personoj, posedante desregulojn, servas bone; la popolo, regate per egala politiko, vivas en paco.

士服民安，夫是之谓大凝，以守则固，以征则强，令行禁止，王者之事毕矣。”

Ke personoj servas bone kaj la popolo vivas en paco, tio estas nomata la firmega solidiĝo, ĉe kiu estas solida la defendo, forta la militiro, plenumata la ordono, ne farata io malpermesita. Tiel efektiviĝas finfine la reĝa afero.”

16 强国

LA FORTA ŜTATO

刑范正，金锡美，工冶巧，火齐得，部刑而莫邪已。

Se muldilo estu rekta, metalo kaj stano estu belaj, metalurganto estu lerta, fairo estu enorda, tiam el la frakasita muldilo aperos akra glavo, kiel Moye.

然而不剥脱，不砥厉，则不可以断绳；剥脱之，则斲盘盂，勿牛马忽然耳。

Sed se ne estu senigita la rubo, ne estu akrigita per akrigŝtono, tiam ne eblas tranĉi eĉ ŝnuron; se estu enigita la rubo, tiam eblas haki metalan pelvon, tranĉi tuj bovon aŭ ĉevalon.

彼国者，亦强国之部刑已。

Rilate al la ŝtato, estas la sama procezo de elmuldado por fariĝi forta.

然而不教诲，不调一，则入不可以守，出不可以战；教诲之，调一之，则兵劲城固，敌国不敢婴也。

Do se ne instruas, nek edifas, nek harmoniigas en unueco, tiam interne ne eblos defendi, ekstere ne eblos ekmiliti; instruite, edifite, harmoniigite en unueco, la armeo estas forta kaj la kastelo estas firma, kaj tial malamika lando ne aŭdacas ektuŝi.

彼国者亦有砥厉，礼义节奏是也。

Ĉe la ŝtato estas propra akrigŝtono, t. e. decreguloj, justo, laŭtempa ritaro.

故人之命在天，国之命在礼。

Homa vivo dependas de la Ĉielo, ŝtata vivo dependas de decreguloj.

人君者隆礼尊贤而王，重法爱民而霸，好利多诈而危，权谋倾覆幽险而亡。

La homa estro, kiu popularigas decregulojn kaj respektas la saĝan, estas vera reĝo; kiu intensigas leĝaron, amante la popolon, estas hegemonia reĝo; kiu ŝatas profiton kaj ruzas multe por hipokriti, estas danĝera reĝo; kiu kaŝite intrigas por konspiri kaj komploti, pereos.

威有三：有道德之威者，有暴察之威者，有狂妄之威者。

Se temas pri aŭtaritato, troviĝas tri specoj: aŭtoritato surbaze de laŭvoja virto, aŭtoritato surbaze de kruela kontrolo, aŭtoritato surbaze de freneza obsedo.

此三威者，不可不孰察也。

Mi devas bone esplori tiujn tri specojn de aŭtoritato.

礼乐则修，分义则明，举措则时，爱利则形，如是，百姓贵之如帝，高之如天，亲之如父母，畏之如神明，故赏不用而民劝，罚不用而威行，夫是之谓道德之威。

La aŭtoritato, baziĝinta sur la laŭvoja virto, estas jena – decreguloj kaj muziko estas ellernataj, divido kaj justo estas klaraj, entreprenoj estas farataj laŭ konvena tempo, amo kaj profito estas serĉataj enorde, tiel do la supron la popolanoj respektas kiel dion, rigardas alta kiel la Ĉielon, rigardas intima kiel gepatrojn, timas kiel klarvidpovan spiriton, do necesas nenia premio por movi la popolon, necesas nenia punado por devigi laboron.¹³⁹

礼乐则不修，分义则不明，举措则不时，爱利则不形，然而其禁暴也察，其诛不服也审，其刑罚重而信，其诛杀猛而必，黜然而雷击之，如墙厌之，如是，百姓劫则致畏，羸则敖上，执拘则最，得间则散，敌中则夺，非劫之以形势，非振之以诛杀，则无以有其下，夫是之谓暴察之威。

Aŭtoritato, baziĝinta sur kruela kontrolo, estas jena – oni ne posedas decregulojn kaj muzikon, ne klaraj estas divido ka justo, oni entreprenas aferojn ekster tempo, senorde oni serĉas amon kaj profiton, sed la malpermeso estas kruela kaj rigora, la akuzo al ne submetiĝanto estas severa, la punado estas peza kaj strikta, la punmortigo feroca, nepra, neatendite subita, ekfalas sur homojn kvazaŭ fulmotondro aŭ muro, tial do la popolanoj timas dum premate, arogantas dum nesubpremate, farus la plej eblan dum devigate, tamen disiĝas laŭ bontrovo, kaj atendante la eniron de malamikoj, la homoj ekkrabas. Se ne timigi ilin per minaco, se ne ŝanceli ilin per punmortigo, neniel eblas subigi ilin. Tia estas t. n. la aŭtoritato surbaze de kruela kontrolo.

无爱人之心，无利人之事，而日为乱人之道，百姓讙敖则从而执缚之，刑灼之，不和人心，如是，下比周贲溃以离上矣，倾覆灭亡可立而待也，夫是之谓狂妄之威。

Mankas la homama koro, mankas la profitodona servo al homoj, anstataŭe estas farata ĉiutage la politiko perturbi homojn, kaj kiam popolanoj tumultas, oni kaptas ilin, punas ilin per brulstampado, ne mildigas koron de homoj, tiel do la subo grupe fuĝas kaj forlasas la supron, kaj tiam nur atendas la sorto baldaŭ renversiĝi kaj pereji – tia estas t. n. la aŭtoritato surbaze de freneza obsedo.

此三威者，不可不孰察也。

Pri tiuj tri specoj de aŭtoritato oni ne devas ne studi.

道德之威成乎安强，暴察之威成乎危弱，狂妄之威成乎灭亡也。

Kun aŭtoritato de laŭvoja virto la ŝtato fariĝos stabila kaj forta, kun aŭtoritato de kruela kontrolo ĝi fariĝos danĝerigita kaj malforta, kun aŭtoritato de freneza obsedo ĝi pereos.

¹³⁹分 signifas «dividi, dispartigi, apartigi, distingigi, diferencigi, distribui»(vd. la vortaron de Wang Chongfang.) Xunzi rigardas 分 tre grava por stabila regado. Tiu koncepto, kontraŭ egalismo, fariĝis la baza principo por feŭdalismo kaj kastismo en orienta azio.

公孙子曰：“子发将西伐蔡，克蔡，获蔡侯，归致命曰：‘蔡侯奉其社稷而归之楚，舍属二三人而治其地。’

Gong Sunzi diris: “Zi Fa, estante generalo de Chu-regno, militiris okcidenten konkeri Cai-landon, venkis ĝin, kaj kaptis ĝian landestron. Post la plenumo de ordono, reveninte, la generalo raportis: ‘La landestro de Cai fordonis al Chu-regno sian landon kun la ŝtata sanktejo, do mi lasis miajn du-tri subulojn regi la teritorion.’¹⁴⁰

既，楚发其赏，子发辞曰：‘发诫布令而敌退，是主威也；徙举相攻而敌退，是将威也；合战用力而敌退，是众威也。臣舍不宜以众威受赏。’ ”

Chu-regno jam decidis doni al Zi Fa la premion, sed li rifuzis, dirante: ‘Se rivalo malvenkis tuj kiam ni deklaris militon, tio okazas dank’ al la reĝa aŭtoritato; se rivalo malvenkis kiam ni ekmobilizis armeon kaj ekatakis reciproke, tio okazas dank’ al la aŭtoritato de generalo; se rivalo malvenkis post kiam ambaŭ armeoj batalis per militforto, tio okazas dank’ al aŭtoritato de nia homamaso. Mi ne taŭgas ricevi la premion, ĉar ni venkis dank’ al la aŭtoritato de homamaso.’ ”

讥之曰：“子发之致命也恭，其辞赏也固。

Xunzi primokis, dirante: “Zi Fa ŝajnas laŭdinda je la plenumo de ordono, sed obstinaĉas je la rifuzo de premio.

夫尚贤使能，赏有功，罚有罪，非独一人为之也，彼先王之道也，一人之本也，善善恶恶之应也，治必由之，古今一也。

Respekti la saĝan kaj uzi la kapablan, laŭdi la meritan kaj puni la kulpan – tio estas ne la afero de unu solulo, sed la vojo de antaŭaj reĝoj kaj la bazo por unuigi homojn. Rekompenci al bono per bono aŭ al malbono per malbono – jen de tio nepre dependas la regado tute same en la antikvo kaj en la nuno.

古者明王之举大事，立大功也，大事已博，大功已立，则君享其成，群臣享其功，士大夫益爵，官人益秩，庶人益禄。

Antikve, se klera reĝo entreprenis grandan aferon, atingis grandan meriton, kaj la granda afero jam disvastiĝis kaj la granda merito jam estiĝis, tiam la reĝo ĝuas la gajnitan rezulton, ministaro ĝuas la meriton, kavaliroj kaj grandoficistoj ricevas la rangon-titolon, oficistaro ricevas pli da salajro kaj plebanoj ricevas pli da mono.

是以为善者劝，为不善者沮，上下一心，三军同力，是以百事成而功名大也。

Tio estas por promocii la bon-faranton, malhelpi la malbon-faranton. Per tio unuiĝas koro de la supro kaj la subo, kuniĝas fortoj de la tri armeoj – tiel do cent aferoj sukcese efektiviĝos kaj la merito estos granda.

¹⁴⁰ Ne estas sciata, kiu estas Gong Sunzi. Iu konjektas, ke ĝi povus esti titolo de iu libro. Zi Fa estas generalo de Chu-regno, familinomo estas 景 Jing, nomo estis 舍 She. 西伐蔡, - la regno Cai situis norde de Chu-regno, do la menciita okcidenta lando devas esti alia.

今子发独不然，反先王之道，乱楚国之法，堕兴功之臣，耻受赏之属，无僇乎族党而抑卑其后世，案独以为私廉，岂不过甚矣哉！

Sed nur Zi Fa ne estis tia, kontraŭis al la vojo de antikvaj reĝoj, malordigis la leĝon de Chu-regno. Li malestimis la meritindajn subulojn, hontinte ricevi la premion. Li, ne havante ĉe si kulpajn klikon aŭ partion de punendaj proksimuloj, detenis sin tro humila, ke liaj posteuloj devus humiliĝi samkiel li. Li mem konsideris sin sole honesta, sed ĉu tio ne estas ja troa miskompreno?

故曰：子发之致命也恭，其辞赏也固。”

Do mi diras: Zi Fa ŝajnas laŭdinda je la plenumo de ordono, sed obstinaĉas je la rifuzo de premio.”

荀卿子说齐相曰：“处胜人之势，行胜人之道，天下莫忿，汤，武是也；处胜人之势，不以胜人之道，厚于有天下之势，索为匹夫不可得也，桀，纣是也。

La Majstro Xunzi rakontis al ĉef-ministro de Qi-regno, dirante: “Okazas, ke la mondo tute ne koleras al tiuj, kiuj okupas postenon superregi homojn per potenco kaj kiuj iris superregi homojn per vera vojo. Tiuj estis reĝoj Tang, Wu. Estas tiuj, kiuj, havante potencon superregi homojn, ne iris laŭ la vera vojo por superregi homojn. Kvankam posedante la grandan potencon por regi la mondon, tamen ili ne povis resti nuraj simpluloj, eĉ se dezirus postvivi tiel. Tiuj estis tiranoj Jie, Zhou.

然则得胜人之势者，其不如胜人之道远矣。

Posedi la potencon por superregi homojn estas neniel pli bone ol iri laŭ la vera vojo superregi homojn.

夫主相者，胜人以势也，是为是，非为非，能为能，不能为不能，并己之私欲，必以道夫公道通义之可以相兼容者，是胜人之道也。

Ĉefministro estas la potenculo, superreganta homojn. Tamen, la ago difini jeson jesa, neadon nea, eblon ebla, neblon nebla neniam apartenas al ajna arbitra deziro de egoa memo, sed nepre al la vera vojo, la komuna vojo kaj ĝenerala justo universale akceptebla de ĉiuj. Tio estas ja la vojo por superregi homojn.

今相国上则得专主，下则得专国，相国之于胜人之势，宜有之矣。

Nun la ĉefministro havas la specialan influon supre al la estro, sube al la ŝtato, do la ĉefministro ja vere havas potencon superregi la homojn.

然则胡不驱此胜人之势赴胜人之道，求仁厚明通之君子而托王焉，与之参国政，正是非？

Se tiel, kial do vi ne transiros elane de la potenco superregi homojn al la vojo superregi homojn, kial ne klopodas lasi bonvoleman kaj kompreneman noblulon asisti al la reĝo, ke li kune kun vi partoprenu en la ŝtata politiko, kaj ĝustigi pravecon kaj malpravecon? 如是，则国孰敢不为义矣？

Se estos farate tiel, kiu en la regno aŭdacus ne fari juston?

君臣上下，贵贱长少，至于庶人，莫不为义，则天下孰不欲合义矣？

Reĝo kaj ministroj, supro kaj subo, nobeloj kaj nenobeloj, aĝaj kaj junaj, ĝis plebanoj, ĉiuj el ili faros juston, kaj tiam kiu en la mondo ne dezirus kunvivi konforme al la justo? 贤士愿相国之朝，能士愿相国之官，好利之民莫不愿以齐为归，是一天下也。

Saĝuloj volus ĉeesti en la asembleo sub la ĉefministro, kapabluloj volus fariĝi oficistoj sub la ĉefministro, la popolo ŝatanta profiton nepre volus obei Qi-regnon, – tiel do unuiĝos la mondo.

相国舍是而不为，案直为是世俗之所以为，则女主乱之宫，诈臣乱之朝，贪吏乱之官，众庶百姓皆以贪利争夺为俗，曷若是而可以持国乎？

Sed vi, s-ro ĉefministro, forlasis tion kaj ne faras tiel, sed prenas nur la politikon eluzitan en vulgara mondo, tial korteganinoj-ĉambelaninoj malordigas la kortegon, trompantoj-ministroj malordigas la asembleon, avidaj oficistoj malordigas la oficojn, homoamaso kaj popolanoj ĉiuj vulgare avidas profiton kaj konkurencas gajni kaj ŝteladi. Kiel do tiamaniere eblus pluteni la ŝtaton?

今巨楚县吾前，大燕鲮吾后，劲魏钩吾右，西壤之不绝若绳，楚人则乃有襄贲，开阳以临吾左，是一国作谋则三国必起而乘我，如是，则齐必断而为四三，国若假城然耳，必为天下大笑。曷若？两者孰足为也？

Nun giganta Chu-regno pendas antaŭ ni, granda Yan-regno premas malantaŭ ni, forta Wei-regno alkroĉas dekstre de ni, orkcidenta periferio similas apenaŭ rompiĝontan ŝnuron, Chu-regnantoj, okupante la terojn Xiangfei kaj Kaiyang, ĉeestas maldekstre apud ni. Se unu el tiuj regnoj ekintrigos, tiam aliaj tri regnoj nepre tuj ekleviĝos por ataki nin. Se tiel, Qi-regno nepre estos disdividita en tri-kvar partojn, la ŝtato ŝanĝiĝos nur en fantomurbon, kaj nepre estos granda ridindaĵo de la mondo. Kion vi faros? Kiun el la supre menciitaj opcioj vi elektos?¹⁴¹

夫桀，纣，圣王之后子孙也，有天下者之世也，势籍之所存，天下之宗室也，土地之大，封内千里，人之众数以亿万，俄而天下倏然举去桀，纣而犇汤，武，反然举恶桀，纣而贵汤，武，是何也？

Koncernante Jie kaj Zhou, ili estas praidoj de sanktaj reĝoj, posedintoj de la mondo, kaj ili havis la potencon, estante ĉeffamilio de la mondo. La tero estis granda kun feŭdo je mil *li*oj kvadrato, enhavanta popolnombron je kelk-dek miloj.¹⁴² La popolanoj de la mondo subite forlasis Jie-Zhou kaj alkuris al Tang-Wu, malamante Jie-Zhou kaj respektante Tang-Wu. Kial?

¹⁴¹襄贲，开阳 estis lokonomoj, situantaj norde de nuna Linyi 临沂, Shangdong. Lanling 兰陵, kie Xunzi servis kiel prefekto 令, estas proksime al tiuj lokoj.

¹⁴² 亿万 tiama 亿 estis cent miloj.

夫桀，紂何失而汤，武何得也？曰：是无它故焉，桀，紂者，善为人所恶也；而汤，武者，善为人所好也。

Kion perdis Jie-Zhou, kion gajnis Tang-Wu? Mi diras, ĉar Jie-Zhou faris kion bonuloj malamas kaj Tang-Wu faris kion bonuloj amas.

人之所恶何也？曰：污漫，争夺，贪利是也。

Kion malamas homoj? Mi diras jenon – malversacion-korupton, ekspluat-konkuradon, profitavidemon.

人之所好者何也？曰：礼义，辞止，忠信是也。

Kion amas homoj? Mi diras jenon – decregulojn kaj juston, cedemon-humilecon, lojalecon-fidelecon.

今君人者，辟称比方则欲自并乎汤，武，若其所以统之，则无以异于桀，紂，而求有汤，武之功名可乎？

Nunaj landestroj volus kompari sin kun Tang-Wu, sed kiam ili reale estras, la regado neniom estas alia ol Jie-Zhou. Ĉu ili rajtus postuli la saman meriton kaj famecon kiel de Tang-Wu?

故凡得胜者必与人也，凡得人者必与道也。

Kiu deziras venki, tiu agas nepre kune kun homoj; kiu deziras havigi al si homojn, tiu iras nepre laŭ la vera vojo.

道也者何也？曰：礼让忠信是也。

Kio estas la vojo? Mi diras, ke la vojo estas decreguloj, humileco, lojaleco kaj fideleco.

故自四五万而往者强胜，非众之力也，隆在信矣；自数百里而往者安固，非大之力也，隆在修政矣。

Se kolektiĝis pli ol tridek-kvardek miloj da personoj, fariĝos sufiĉe forta por venki. Tio ne dependas de poploamasa forto, sed dependas de fido. Ŝtato kun teritorio je cent *lioj* kvadrato kaj pli povas fariĝi sufiĉe stabila kaj firma ne dank' al grandeco de forto, sed elkulturita politiko.

今已有数万之众者也，陶诞，比周以争与；已有数百里之国者也，污漫，突盗以争地。

Nuntempe, kiu havas jam kelk-dek mil da popoloamaso, tiu luktadas por kolekti homojn reciproke klevetante, fraŭdante, frakciante, partiemante. Kiu havas jam teritorion kun kelk-cent *lioj* kvadrato, tiu batalas por terpeco reciproke malversaciante, koruptante, ŝovante kaj rabante.

然则是弃己之所安强，而争己之所以危弱也，损己之所不足，以重己之所有余，若是其悖缪也，而求有汤，武之功名可乎？

Tio estas ja la forĵetado de la sia latenteco por stabiligi kaj fortigi sin mem, kaj la batalado por danĝerigi kaj malfortigi sin mem. Oni baraktas por malpliigi tion, kio mankas, kaj por pliigi tion, kio jam superfluas. Ĉu eblus kun tia kontraŭdiro kaj eraro

havigi al si la meriton kaj la famon de Tang-Wu?

辟之是犹伏而喅天，救经而引其足也，说必不行矣，愈务而愈远。

Tio estas ja provo samkiel leki la Ĉielon vizaĝaltere, samkiel savi pendanton, suben tirante la piedojn. La provo nepre ne sukcesos, – ju pli penas, des pli foriĝas la celo.

为人臣者不恤己行不行，苟得利而已矣，是渠冲入穴而求利也，是仁人之所羞而不为也。

Se iu persono, servante kiel ministro, ne zorgus pri sia konduto, ĉu bona aŭ malbona, kaj nur okupus sin pri gajno de profito, tio similus kvazaŭ oni ŝovus militĉaron en truon por serĉi profiton. Bonvolemulo hontas tion kaj ne faras.

故人莫贵乎生，莫乐乎安，所以养生安乐者莫大乎礼义。

Por homoj nenio estas pli kara ol la vivo, nenio esta pli ĝojinda ol paco, kaj por nutri la vivon kaj por ĝoji la trankvilan pacon nenio estas pli grava ol dereguloj kaj justo.

人知贵生乐安而弃礼义，辟之是犹欲寿而殒颈也，愚莫大焉。

Se iu, sciante, ke vivo kaj paco estas kara, tamen forĵetus deregulojn kaj juston, tiu similas homon, kiu, dezirante longan vivon, tranĉus sin je la gorĝo. Neniu estas pli stulta ol li.

故君人者爱民而安，好士而荣，两者无一焉而亡。

La estro de homoj povas vivi, amante la popolon, prosperi, ŝatante taŭgan personon, perej, perdinte nur unu el ambaŭ.

《诗》曰：‘价人维藩，大师维垣。’此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: ‘Taŭga persono estas remparo, granda majstro estas palisaro.’ Tio signifas la supre menciitan.¹⁴³

“力术止，义术行。曷谓也？曰：秦之谓也。

Tekniko surbaze de forto haltas iam mezvoje, sed tekniko surbaze de la vera vojo iras daŭre. Pri kio estas dirite? Mi diras pri Qin-regno.

威强乎汤，武，广大乎舜，禹，然而忧患不可胜校也，認認然常恐天下之一合而軋己也，此所谓力术止也。

Ĝia potenco estas pli forta ol Tang-Wu, pli vasta ol Shun-Yu, sed ĝi ege nekalkuleble zorgas kaj maltrankvilas, ĉiam timante, ĉu la tuta mondo kune, formante unu aliancon, dispremu ĝin. Jen kio estas la limo, kie haltas la tekniko surbaze de forto.

曷谓乎威强乎汤，武？汤，武也者，乃能使说己者使耳。

Kial eblas diri, ke la potenco estas pli forta ol Tang-Wu? Tang-Wu nur povis uzi tiujn, kiuj volis memstare sekvi ilin kun plezuro.

今楚父死焉，国举焉，负三王之庙而辟于陈，蔡之间，视可，司间，案欲剡其胫而以蹈秦之腹，然而秦使左案左，使右案右，是乃使讎人役也，此所谓威强乎汤，武也。

¹⁴³ Citaĵo el 诗经，大雅，板.

Nun la reĝa patro de Chu-regno mortis, la regno renversiĝis, la maŭzoleo de tri reĝoj evakuiĝis al loko inter regnoj de Chen kaj Cai. Videblas, ke Chu-landanoj dezirus revenĝi sin kontraŭ Qin, kaptante okazon, volus bati per sia kruro almenaŭ la ventron de Qin. Sed tamen ili devas obei al Qin – devas turni maldekstren, se Qin ordonas ilin maldekstren, devas turni dekstren, se Qin ordonas dekstren. Tiel do Qin laborigis vengemajn malamikojn, Chu-landanojn. Tial do eblas diri, ke la potenco de Qin estas pli forta ol de Tang-Wu.¹⁴⁴

曷谓广大乎舜，禹也？曰：古者百王之一天下，臣诸侯也，未有过封内千里者也。

Kial Qin estas pli vasta ol Shun-Yu? Mi diras, ke antikve cent reĝoj konsistigis unu subĉielan mondon, t. e. landestroj. Ne estis iu landestro, posedanta feŭdon pli ol je mil *li*oj kvadrato.

今秦南乃有沙羡与俱，是乃江南也，北与胡，貉为邻，西有巴，戎，东在楚者乃界于齐，在韩者踰常山乃有临虑，在魏者乃据圉津，即去大梁百有二十里耳，其在赵者剡然有苓而据松柏之塞，负西海而固常山，是地遍天下也。

Nun Qin posedas sude lokojn Sha kaj Xian ambaŭ, posedas provincojn sude de la rivero Chang Jiang, posedas norde landojn, najbarajn al etnoj Hu kaj Mo, posedas okcidente landojn de Ba kaj Rong, posedas oriente teritorion de Chu, tanĝantan landlimon de Qi, okupas en teritorio de Han-regno la lokon Linlü trans monto Chang Shan, okupas en teritorio de Wei-regno la lokon Yujin, situantan de ĉefurbo Daliang en la distanco nur je 120 *li*oj, okupas en Zhao-regno la lokon Ling kaj tie la citadelon el pinoj kaj kverkoj. Tiel, malantaŭ de Qin sterniĝas okcidenta maro kaj ĝia fortikaĵo staras firme ĉe la monto Chang Shan, tio estas ja granda tero, egala al la universala mondo.¹⁴⁵

威动海内，强殆中国，然而忧患不可胜校也，謷謷然常恐天下之一合而轧己也，此所谓广大乎舜，禹也。

Kvankam ĝia majesteco movas la tutan landon, ĝia potenco minacas la centran landon, tamen ĝi havas nekalkuleblan ĝenon, ĉiam timante, ke la tuta mondo, unuiĝinte, kune ne rulpremu ĝin. Tial estas dirite, ke ĝi estas pli vasta ol teritorio de Shun-Yu.

然则奈何？曰：节威反文，案用夫端诚信全之君子治天下焉，因与之参国政，正是非，治曲直，听咸阳，顺者错之，不顺者而后诛之。

Se tiel, kion ĝi devus fari? Mi diras: Ĝi restriktu la potencon kaj revenu al la kulturo de

¹⁴⁴ 楚父 La reĝo Huai de Chu-regno estis kaptita de Qin en 299 a. K., kaj mortis tie. En 278 a. K. La armeo sub generalo Bai Qi de Qin venkobatis la ĉefurbon Ying de Chu, kaj la reĝo de Chu, Xiang, translokigis la ĉefurbon al Chen.

¹⁴⁵沙羡 estis lokonomoj, nunaj Wuchang 武昌 de Hubei 湖北. 胡, 貉 estis etnoj. 巴 estas orienta parto de Sichuan 四川, 戎 estis nomo de etno. 临虑, 圉津 estis lokonomoj en nuna Henan 河南. 大梁 estis ĉefurbo de Wei. 苓 estis lokonomo, nun ne sciata. 西海 signifas eble okcidentan dezerton. 常山 Iuj konjektas 恒山, aliaj – 赵山, sed al mi ne estas sciata.

arto-literaturo, utiligu sincerajn-honestajn personojn por ke la reĝo povu regi bone la mondon kaj ili povu partopreni en la ŝtat-administrado por ĝustigu pravecon aŭ malpravecon, reguligi kurbon aŭ rekton, kaj regu, sidante en ĝia ĉefurbo Xianyang. Lasu tiun, kiu sekvas, akuzu poste tiun, kiu ne sekvis.

若是，则兵不复出于塞外而令行于天下矣；若是，则虽为之筑明堂于塞外而朝诸侯，殆可矣。Se tiel, ĝia ordono atingas la tutan mondon sen sendadi la armeon eksteren el de sia landlima kastelo. Se tiel, kie ĝi instalos Lumhalon eĉ trans la landlimon, tien landestroj apenaŭ povos kolektiĝi por tributi kaj konsiliĝi.¹⁴⁶

假今之世，益地不如益信之务也。”

En la nuna efemera mondo, grandigi teritorion estas malpli avantaĝe ol diligenti je grandigo de konfido.”

应侯问孙卿子曰：“入秦何见？”

La markizo Ying demandis la Majstron Xunzi, dirante: “Kion vi vidis en Qin-regno?”

孙卿子曰：“其固塞险，形势便，山林川谷美，天材之利多，是形胜也。”

La Majstro Xunzi diris: “Por defendo, firmaj estas ĝiaj fortikaĵoj kaj konvena estas ĝia topografio, belaj estas montoj, arbaroj, riveroj kaj valoj, abunda estas profito je naturaj resursoj – tio estas la geopolitika avantaĝo.

入境，观其风俗，其百姓朴，其声乐不流污，其服不挑，甚畏有司而顺，古之民也。

Transpasinte la landlimon, mi observis la moron kaj la popolanojn simplaj, la kantojn kaj la muzikon ne poluitaj per modo, la vestaĵojn ne lascivaj, vidis, ke oni respektive timas la aŭtoritatojn kaj estas obeemaj, similas al la antikva popolo.

及都邑官府，其百吏肃然，莫不恭俭，敦敬，忠信而不桀，古之吏也。

Koncerne de ĉefurbo kaj registaraj burooj, la cent oficistoj solene servas kun humileco kaj modereco, servas respektplene kun lojaleco kaj fideleco, servas senmanke, simile al la antikvaj oficistoj.

入其国，观其士大夫，出于其门，入于公门，出于公门，归于其家，无有私事也，不比周，不朋党，倜然莫不明通而公也，古之士大夫也。

Enirinte la regnon, mi observis, kiel la grandoficistoj eliras de siaj pordoj, eniras en la oficejan pordon, eliras el la oficeja pordo kaj revenas hejmen, kaj mi vidis dume nenion privatan, nenion kontraŭeman, nenion partiemajn kaj vidis ilin klare komprenantaj je aferoj kaj servantaj al publiko, simile al la antikvaj grandoficistoj.

观其朝廷，其间听决百事不留，恬然如无治者，古之朝也。

Mi observis, ke oni en la kortega konsilio aŭskultas, diskutas kaj decidas pri centoj da

¹⁴⁶筑明堂于塞外 Lumhalo 明堂 estas la ofico, kie reĝoj de Zhou-dinastio okupiĝis je ŝtat-administrado kaj donis al landestroj aŭdiencon.

aferoj senprokraste, aplombe kvazaŭ okazus nenia regado. Tio similas al la antikva kortego.

故四世有胜，非幸也，数也。是所见也。

Tiel do dum kvar generacioj ĝi estas daŭre venkanta ne pro ia hazarda bonsorto, sed pro la ĝusta kalkulado, kion mi vidas.

故曰：佚而治，约而详，不烦而功，治之至也。秦类之矣。

Do mi diras: Kvankam ŝajnas senĝene malstreĉita, tamen ĝi estas bone regata; kvankam loza, tamen ĝi estas regata skrupule en detaloj; kvankam senzorga, tamen ĉi estas farata meritoplene. Tia regado estas ja la plej bona. Qin-regno estas tia.

虽然，则有其謬矣。

Sed tamen ĝi havas ion, kio ĝenas ĝin.

兼是数具者而尽有之，然而县之以王者之功名，则倜倜然其不及远矣。是何也？则其殆无儒邪？

Ĝi havigis al si ĉion, supre elnombratan, sed de la nomo merita je reĝo de reĝoj ĝi ankoraŭ nekontesteble diferencas for kiel nokto de tago. Kial? Ĉu tial, ke al ĝi mankas konfuceanismo?

故曰：粹而王，驳而霸，无一焉而亡。此亦秦之所短也。”

Do mi diras, ke iu landestro kun pura konfuceanismo povas fariĝi vera reĝo, alia landestro kun la hibrida konfuceanismo povas fariĝi hegemono, sed sen tio li pereos. Jen en kio kuŝas la malavantaĝo de Qin.¹⁴⁷

积微，月不胜日，时不胜月，岁不胜时。

Gravas la akumulado de mikro – ĉiumonata akumulado superas malpli oli ĉiutaga akumulado, la sezona superas malpli ol la ĉiumonata, la jara superas malpli ol la ĉiusezona.

凡人好傲慢小事，大事至然后兴之务之，如是则常不胜夫敦比于小事者矣。是何也？

Ordinara homo inklinas arogante ignori la malgrandan aferon. Apenaŭ alfrontante iun grandan aferon, li elane ekzorgas plenumi la taskon. Se tiel, li neniam povas superi ol tiu, kiu diligente faradas malgrandan aferon. Kial?

则小事之至也数，其县日也博，其为积也大；大事之至也希，其县日也浅，其为积也小。

Ĉar la malgranda guto da afereto kreskadas je nombro, ĉiun tagon vastiĝas pli kaj pli, akumuliĝas grande. La granda afero okazas malofte, traktate iun tagon malprofunde,

¹⁴⁷ 应侯 Markizo Yin estas 范雎 Fan Sui, Wei-regnanto, kiu servis al Zhao 昭, reĝo de Qin, kiel ĉefministro. 驳 estas 駁, mi tradukis ĝin per “hibrida”, eble laŭ Xunzi, aliaj konfuceanojn kiel Mengzi kaj ko. ne puraj, sed hibridaj. Unu el lernintoj de Xunzi, Li Si 李斯 proponis enfosi konfuceanojn por mortigi. Kiu estas “pura 粹”? Neniu alia ol Xunzi mem.

akumuliĝas malgrande.

故善日者王，善时者霸，补漏者危，大荒者亡。

Tial do, kiu bone uzas ĉiun tagon, fariĝas vera reĝo; kiu bone uzas ĉiun sezonon, fariĝas hegemono; kiu ellasas guton vane, falas en danĝeron; kiu dezertigas guton, pereos.

故王者敬日，霸者敬时，仅存之国危而后戚之，亡国之亡而后知亡，至死而后知死，亡国之祸败不可胜悔也。

La vera reĝo respektas tagon, la hegemono respektas sezonon, la apenaŭ ekzistanta lando, falante en danĝeron, eksuferas, la pereinta lando ekscias la pereon nur poste, kvazaŭ mortinto eksciis sian morton post la morto. Poste pri miso kaj eraro neniam povus penti eĉ kontricie la pereinta lando.

霸者之善箸焉，可以时托也；王者之功名不可胜日志也。

Iom da bonfarado de hegemoniulo kalkuleblas nur po sezene; famaj meritoj far de vera reĝo estas tre abundaj, ke estas ne kalkuleble por enskribi en ĉiutagan libron.

财物货宝以大为重，政教功名反是，能积微者速成。

Pri trezoroj, monoj kaj varoj estas mezurate tuj kiel ju pli granda des pli grava, sed pri la regado, la instruo, la merito, la nomo, estas mezurate kontraŭe – pli rapide atingas la sukceson nur tiu, kiu povas akumuladi mikron unu sur la alian.

《诗》曰：“德輶如毛，民鲜克举之。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Virto estas tiel malpeza kiel hareto, sed troviĝas malmulte da popolo, kiu levprenas ĝin.” Tio signifas la supre menciitan.¹⁴⁸

凡奸人之所以起者，以上之不贵义，不敬义也。

La kaŭzo, de kie leviĝas malbonuloj, estas pro tio, ke la supro ne faras juston valora nek respektas la juston.

夫义者，所以限禁人之为恶与奸者也。

Estas la justo, kiu limigas kaj melpermesas al malbonuloj la malbonfaradon.

今上不贵义，不敬义，如是，则下之人百姓皆有弃义之志，而有趋奸之心矣，此奸人之所以起也。

Nun la supro ne valorigas la juston, ne respektas la juston, tial do la subaj popolanoj ĉiuj forĵetas la strebon al la justo, havante pli haste la malbonan koron. Jen en kio kuŝas la kaŭzo, ke leviĝas la malbonuloj.

且上者，下之师也，夫下之和上，譬之犹响之应声，影之像形也。

La suprujoj estas instruistoj por la subo. Ke la subo akordiĝas kun la supro estas samkiel eĥo, reaganta al la krio, kaj ombro, akompananta la realan objekton.

故为人上者不可不顺也。

¹⁴⁸ Citaĵo el 诗经，大雅，烝民.

Do kiu staras supre, tiu ne devas ne teni sin prudenta.

夫义者，内节于人而外节于万物者也，上安于主而下调于民者也。内外上下节者，义之情也。

La justo estas tiu, kiu interne kontrolas personon, ekstere kontrolas ĉion estaĵon kaj supre faras la estron stabila, sube faras la subon harmonia en la popolo. Kiu faras internon-eksteron kaj supron-subon prudenta, tiu estas ja la justa sento.

然则凡为天下之要，义为本而信次之。

Do la ĉefpunkto, konsistiganta la mondon, estas antaŭ ĉio la justo, sekve la fido.

古者禹，汤本义务信而天下治，桀，纣弃义倍信而天下乱，故为人上者必将慎礼义，务忠信然后可。此君人者之大本也。

Antikve ĉe la reĝoj Yu kaj Tang estis regata la mondo per la justo kaj la devo je fido. La tiranoj Jie kaj Zhou forĵetis la juston kaj perfidis je la fido, tiel do la mondo malordiĝis. Por la homa estro nepre necesas humile sekvi la decregulojn kaj la juston, kaj nur poste plenumeblos al subo la devo de lojaleco kaj fideleco. Jen kio estas la bazo de bazoj por la homa reĝo.

堂上不粪，则郊草不瞻旷芸；白刃扞乎胸，则目不见流矢；拔戟加乎首，则十指不辞断。

Dum ne purigate en la halo, ne videblas herbaĉoj sarkendaj ekstere sur vasta kampo. Dum glavo estas direktata al la brusto, ne videblas okule ia alfluganta sago. Dum per elingigita halebardo estas alpuŝite al la kolo, ne eblas rifuzi minacon fortranĉi dek fingrojn.

非不以此为务也，疾养缓急之有先者也。

La farenda devo estas tiel sama, kiel tio. Al kuracado estas la unuaeco kaj urĝeco en vicordo, kion fari rapide aŭ malrapide.

17 天论

DISKURSO PRI LA ĈIELO

天行有常，不为尧存，不为桀亡。

La Ĉiela movado estas konstanta, ekzistas ne dank' al sankta Yao, ne pereas eĉ pro tirana Jie.

应之以治则吉，应之以乱则凶。

Rezultos feliĉo, se oni regas bone konforme al ĝi. Rezultos sinistro, se oni respondas al ĝi per ĥaoso.

强本而节用，则天不能贫；养备而动时，则天不能病；修道而不贰，则天不能祸。

Se homoj faras bazon forta kaj ŝparas ekonomie, tiam la Ĉielo ne povas igi homojn malriĉaj. Se homoj estas bone pretaj je la nutrado kaj laboras konforme al sezonoj, tiam la Ĉielo ne povas igi ilin malsanaj. Se homoj elkulturas sin laŭ la vera vojo kaj ne ŝanceliĝas, tiam la Ĉielo ne povas doni al ili katastrofon.

故水旱不能使之饥渴，寒暑不能使之疾，妖怪不能使之凶。

Do inundo kaj sekego ne povas doni al ili malsategon kaj soifon, malvarmo kaj varmeĝo ne povas doni al ili malsanon, nenormalaj fenomenoj ne povas doni al ili malfeliĉegon.

本荒而用侈，则天不能使之富；养略而动罕，则天不能使之全；倍道而妄行，则天不能使之吉。

Se homoj faras la bazon dezerta kaj malŝparas ekstreman, tiam la Ĉielo ne povas riĉigi ilin. Se homoj preterlasas la nutradon kaj laboras maldiligente, tiam la Ĉielo ne povas doni al ili plene. Se homoj iras kontraŭ vojo kaj kondukas freneze, tiam la Ĉielo ne povas doni al ili feliĉon.

故水旱未至而饥，寒暑未薄而疾，妖怪未至而凶。

Do eĉ sen inundo kaj sekego ili malsatas, eĉ sen troa malvarmo kaj varmeĝo ili malsanas, sen nenormalaj fenomenoj ili malfeliĉas.

受时与治世同，而殃祸与治世异，不可以怨天，其道然也。

Ili ricevas de sezonoj kaj dank' al konforma regado de la mondo, sed ricevas plagon se la regado malkonformas. Pro tio oni ne devas blaspemi la Ĉielon, ĉar tio estas ja la natura nepreco.

故明于天人之分，则可谓至人矣。

Do kiu distingas klare la rolon de la Ĉielo kaj la rolon de personoj, tiu povas esti nomata la Pleja persono.

不为而成，不求而得，夫是之谓天职。

Perfektigās sen ago, ricevas sen postulo, jen tio estas nomata la Ĉiela metio.

如是者，虽深，其人不加虑焉；虽大，不加能焉；虽精，不加察焉。

Al tia Ĉielo, al ties profundeco neniu homo povas aldoni sian penson, al ties grandeco neniu povas aldoni sian kapablon, al ties energinon neniu povas aldoni sian sagacon.

夫是之谓不与天争职。

Tiu afero estas, t. n. “nekonkurebla kun la Ĉielo”.

天有其时，地有其财，人有其治，夫是之谓能参。

La Ĉielo disponas la tempon, la tero disponas la riĉaĵon, la homoj disponas la regadon, – tio estas nomata la Triopo je kapablo.

舍其所以参而愿其所参，则惑矣。

Freneza estas tiu, kiu, ignorante la Triopon, dezirus disponi ĉiujn tri.

列星随旋，日月递炤，四时代御，阴阳大化，风雨博施，万物各得其和以生，各得其养以成，不见其事而见其功，夫是之谓神。

Stelaro sinsekve rotacias, la suno kaj la luno alterne brilas, la kvar sezonoj sekvas kontrolate, *yin-yang* (minuso-pluso) okazigas grandan transformaĵon, vento kaj pluvo vaste favoras, tiel do ĉiu estaĵo okupas respektive sian lokon kaj kune naskas harmonie la vivon, kaj ĉiu ricevas la nutraĵon kaj kreskas, ne sciante pri sia propra afero sed vidante nur la meriton. Tio estas ja nomata Dio.

皆知其所以成，莫知其无形，夫是之谓天。

Ĉiuj scias, ke ili kreskas kaj fariĝas, ne sciante mem nehavanta difinitan formon. Tio estas ja nomata la Ĉielo.

唯圣人为不求知天。

Nur sanktulo kondutas lasante la Ĉielon nekognebla, kaj ne traserĉas ĝin.

天职既立，天功既成，形具而神生，好恶，喜怒，哀乐臧焉，夫是之谓天情。

La Ĉiela metio jam ekfunkcias, la Ĉiela merito estas jam kompleta, kaj korpo estas pretigita kaj la spirito naskiĝas, tiam aperas la sento de ŝato-malŝato, de ĝojo-kolero, de malĝojo-plezuro, tio estas nomata la Ĉiela sento.

耳目鼻口形能，各有接而不相能也，夫是之谓天官。

Oreloj, okuloj, nazo kaj buŝo, ĉiu korpa parto havas neanstatauigeblan kapablon akcepti respektive sian propran objekton, tio estas nomata la Ĉiela dispozicio.

心居中虚以治五官，夫是之谓天君。

La koro situas en la centra vakuo kaj regas kvin sentojn, tio estas nomata la Ĉiela estro. 财非其类，以养其类，夫是之谓天养。

Estas tiu, kiu nutras organojn, kies riĉaĵoj ne apartenas al tiu, tio estas nomata la Ĉiela nutrado.

顺其类者谓之富，逆其类者谓之祸，夫是之谓天政。

Okazas, ke riĉiĝas la obeanta al iu grupo de organismo kaj pereas la kontraŭanta al iu grupo, tio estas nomata la Ĉiela ĝustigo.

暗其天君，乱其天官，弃其天养，逆其天政，背其天情，以丧天功，夫是之谓大凶。

Ke malsaĝa estas la Ĉiela estro, malorda estas la Ĉiela dispozicio, forlasita estas la Ĉiela nutrado, ke kontraŭas al la Ĉiela ĝustigo, perfidas la Ĉielan senton, perdas la Ĉielan meriton, – tio estas ja nomata Granda malfeliĉo.

圣人清其天君，正其天官，备其天养，顺其天政，养其天情，以全其天功。

Sanktulo purigas la Ĉielan estron, korektas la Ĉielan dispozicion, pretigas la Ĉielan nutrandon, obeas al la Ĉiela ĝustigo, nutras la Ĉielan senton, kaj plenigas la Ĉielan meriton.

如是，则知其所为，知其所不为矣，则天地官而万物役矣。

Tiel do li scias kion fari, scias kion ne fari, tiam en ordo estos la dispozicio de la Ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj estaĵoj estos servemaj.

其行曲治，其养曲适，其生不伤，夫是之谓知天。

Lia ago tute estos regata, la nutrado tute estos konvena, la vivo estos sen vundiĝo, – tio estas nomata “Scii la Ĉielon”.

故大巧在所不为，大智在所不虑。

Tiel do, granda lerteco kuŝas en nefarado, granda saĝeco kuŝas en senzorgado.

所志于天者，已其见象之可以期者矣；所志于地者，已其见宜之可以息者矣；所志于四时者，已其见数之可以事者矣；所志于阴阳者，已其见知之可以治者矣。

Ĉe aliro al la Ĉielo nur rigardu fenomenon, espekteblan por atingi; ĉe aliro al la tero nur rigardu konvenecon, utiligeblan por vivi; ĉe aliro al kvar sezonoj rigardu nur la kalkuleblan kaj la entrepreneblan por labori; ĉe aliro al *yin-yang* nur rigardu la rekoneblan kaj la regeblan.

官人守天而自为守道也。

Sentiva homo gardu la Ĉielon kaj por si mem gardu la vojon.¹⁴⁹

治乱，天邪？曰：日月，星辰，瑞历，是禹，桀之所同也，禹以治，桀以乱，治乱非天也。

Ordo aŭ malordo – ĉu estiĝas kaŭze de la Ĉielo? Mi diras: la suno, la luno, la stelaro, la rotacio, – estas samaj, tiel ĉe Yu kiel ĉe tirano Jie. Ĉe Yu estis enorde, ĉe Jie estis malorde, tial do ordo aŭ malordo estiĝas ne kaŭze de la Ĉielo.

时邪？曰：繁启蕃长于春夏，畜积收臧于秋冬，是又禹，桀之所同也，禹以治，桀以乱，治

¹⁴⁹ Multaj esploristoj prenas 官人 por oficisto kaj 自 por sanktulo aŭ reĝo. Sed mi prenas 官 por sensoranoj. Liu Shipai 刘师培, Esperantisto-ĉinologo, prenas la tekston tute alie, kiel oficistetoj inklinus alteniĝi al fiksideo pri la Ĉielo, – eble li tenis kritikon de taoismo en sia kapo.

乱非时也。

Ĉu kaŭze de sezonoj? Mi diras: Grenoj-cerealoj multiĝas kaj kreskas en printempo kaj somero, ili estas rikoltitaj, akumulitaj kaj konservitaj en aŭtuno kaj vintro, – tio estas sama, kaj ĉe Yu kaj ĉe Jie. Sed ĉe Yu estis en ordo kaj ĉe Jie malordigis. Do ordo aŭ malordo ne dependas de sezonoj.

地邪? 曰: 得地则生, 失地则死, 是又禹, 桀之所同也, 禹以治, 桀以乱, 治乱非地也。

Ĉu kaŭze de la tero? Mi diras: Homoj, havante teron, vivas, tamen perdinte teron, mortas – tio estas sama, ĉu ĉe Yu kaj aŭ ĉe Jie. Sed ĉe Yu estis en ordo kaj ĉe Jie en malordo. Do ordo aŭ malordo ne dependas de la tero.

《诗》曰: “天作高山, 大王荒之; 彼作矣, 文王康之。” 此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: «La Ĉielo kreis altan monton kaj granda reĝo ekspluatis ĝin; Li kreis kaj la reĝo Wen faris ĝin paca.” Tio signifas la supre menciitan.¹⁵⁰

天不为之恶寒也辍冬, 地不为之恶辽远也辍广, 君子不为小人匈匈也辍行。

La Ĉielo neniam ĉesas vintron malgraŭ ke homoj malŝatus malvarmon., la tero ne faras sin malvasta malgraŭ ke homoj malŝatas longan distancon, nobluloj ne ĉesas sian konduton spite ke malgranduloj grumblas.

天有常道矣, 地有常数矣, 君子有常体矣。

La Ĉielo havas la vojon konstanta, la tero havas la ciferon konstanta, la nobluloj havas la formon konstanta.

君子道其常而小人计其功。

La nobluloj havas la vojon konstanta, sed malgranduloj kalkulas por si la profiton -meriton.

《诗》曰: “何恤人之言兮!” 此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Ne ĝenu vin tio, kion ajn homoj diradus!”¹⁵¹

楚王后车千乘, 非知也; 君子啜菽饮水, 非愚也。是节然也。

Reĝo de Chu-regno havas mil militĉarojn postsekvantaj, sed sen saĝo; nobluloj manĝas kaĉon el legumenaĉoj kaj trinkas akvon, sed kun prudento.

若夫心意修, 德行厚, 知虑明, 生于今而志乎古, 则是其在我者也。

Kiu kulturas sin je koro kaj strebo, je virta konduto, je klara intelekto kaj pensado, tiu, kvankam naskiĝis nuntempe, tamen aspiras al la antikveco. Tiu vivas en kaj per si mem.

¹⁵⁰ Citaĵo el 诗经, 周颂, 天作. La alta monto estas Qi-shan 岐山. La granda reĝo estas la avo de la reĝo Wen, 古公亶父. 荒 signifas 好乐 (bone ĝui) laŭ la vortaro 阮元 『经籍纂诂』, 宏业书局 p.309

¹⁵¹ Citaĵo ne troviĝas en la nuna *Poezio*.

故君子敬其在己者，而不慕其在天者；小人错其在己者，而慕其在天者。

Noblulo estas tiu, kiu respektas sin estanta en si mem; malgrandulo, male, ne kapablas resti en si mem kaj sopiras, ke li estu en la Ĉielo.

君子敬其在己者而不慕其在天者，是以日进也；小人错其在己者而慕其在天者，是以日退也。

Noblulo, respektante sin en si mem, ne sopiras al la Ĉielo, tial do progresas tagon post tago. Malgrandulo, male, ne restante en si mem, nur sopiras, ke li estu en la Ĉielo, tial do malprogresas tagon post tago.

故君子之所以日进与小人之所以日退，一也。

Unu sama estas la kaŭzo, ke noblulo progresas de tago post tago kaj etulo regresas de tago post tago.

君子小人之所以相县者在此耳。

Noblulo kaj etulo estas nur inverse proporcia inter si.

星队，木鸣，国人皆恐，曰：是何也？

Kiam steloj estas falantaj aŭ arboj estas fajfantaj, homoj ĉiuj ektimas, dirante – Kio estas tio?

曰：无何也，是天地之变，阴阳之化，物之罕至者也，怪之可也，而畏之非也。

Mi diras: Nenio. Tio estas nenio alia ol iu speco de ŝanĝiĝo en la Ĉielo kaj la tero, transformado de *yin-yang*; rara fenomenaro de estaĵoj, do pro tio oni povas miri, sed ne devas timi.

夫日月之有蚀风雨之不时，怪星之党见，是无世而不常有之。

Ke la suno kaj la luno iam eklipsas, aŭ ventas kaj pluvas ekster tempe, aŭ estas vidata ia grupo de strangaj steloj, tio ĉiam okazadas en la mondo..

上明而政平，则是虽并世起，无伤也；上暗而政险，则是虽无一至者，无益也。

Nur se la supro estas klera kaj la regado estas glata, eĉ se la rara fenomenaro okazadus ofte en la mondo, tio damaĝas nenion. Kie la supro estas malklera kaj la regado estas danĝera, eĉ se tie nenio okazus, neniom profitas.

夫星之队，木之鸣，是天地之变，阴阳之化，物之罕至者也，怪之可也，而畏之非也。

Ke steloj falas aŭ arboj fajfas, tio estas nur ŝanĝiĝo en la Ĉielo-teroj aŭ transformado de *yin-yang* aŭ rara fenomenaro de estaĵoj, do tio povas esti mirinda, sed ne timenda.

物之已至者，人袄则可畏也。

Kiam aperas al estaĵoj ia ajn homdevena monstro, tio estas ja timenda.

耜耕伤稼，耘耨失穰，政险失民，田蕝稼恶，余贵民饥，道路有死人，夫是之人袄。

Ke fuŝa plugado damaĝas la plantadon, fuŝa sarkado lasas herbaĉon malhelpi al plantitaĵoj kreskon kaj rikolton, danĝera regado forlasas la popolon perdita, kampoj sterilas kaj rikolto malbonas, varoj tro multe kostas kaj la popolo malsatas, sur stratoj

plenas kadavroj – jen tio estas ja la homdevena monstro.

政令不明，举错不时，本事不理，夫是之畏人袄。

Malklaraj ŝtataj ordonoj kaj dekretoj, ne laŭsezonaj entreprenoj, senrezonaj traktoj de fundamentaj aferoj – tiuj estas ja monstroj, timendaj al homoj.

礼义不修，内外无别，男女淫乱，则父子相疑，上下乖离，寇难并至，夫是之谓人袄。

Decreguloj kaj justo ne estas lernataj, la interno kaj la ekstero ne estas apartigitaj, viroj kun virinoj diboĉadas tiom malĉaste ke elvokas reciprokan dubon inter patroj kaj filoj, la supro kaj la subo disiĝas, malamikaj landoj apenaŭ ne venas agresi, – tio estas nomata la homodevena monstro.

袄是生于乱，三者错，无安国。

Naskas sin la monstroj en ĥaoso, se ili kune aperos trioje, tiam la ŝtato ne estos stabila. 其说甚尔，其菑甚惨。

La probableco estas tre granda, la plago kaŭzos nekompareble grandan mizeron.

勉力不时，则牛马相生，六畜作袄，可怪也，而不可畏也。

Ke homoj estas vane laborigataj ne ĝustatempe, bovoj kaj ĉevaloj naskas rasmiksiĝe, ses hombestoj naskas monstrojn, tio povas esti kvankam mirinda, tamen ne timenda.

传曰：“万物之怪，书不说。”无用之辩，不急之察，弃而不治。

Estas dirite tradicie: “Pri anomaliaj strangaĵoj de ĉiuj estaĵoj ne estas klarigite en libroj.” Pti tio ne estas utile argumenti, nek necesas haste esplori, forlasu kaj ne okupu sin je tio.

若夫君臣之义，父子之亲，夫妇之别，则日切磋而不舍也。

Koncerne la juston inter la estro kaj vasaloj, la rilaton inter patro kaj filo, la distingon inter edzo kaj edzino, oni devas ĉiun tagon serioze praktikadi ilin kaj ne devas preterlasi.

雩而雨，何也？曰：无何也，犹不雩而雨也。

Je preĝo por pluvo ekpluvas, kial? Nenia kialo. Eĉ sen preĝo pluvas.

日月食而救之，天旱而雩，卜筮然后决大事，非以为得求也，以文之也。

Kiam estiĝas suneklipso aŭ luneklipso, oni volus savi tion; kiam okazas sekeco, oni preĝas por pluvo; oni decidas grandan aferon post la aŭgurado; – tion mi rigardas ne kiel peton efektivegeblan, sed kiel ornamon kulturon.

故君子以为文，而百姓以为神。

Kion noblulo konsideras ornama kulturo, tion rigardas la popolanoj spiriteca.

以为文则吉，以为神则凶也。

Estas bone, se oni rigardas tion kultura, sed estas ege malbone, se oni konsiderus tion spiriteca.

在天者莫明于日月，在地者莫明于水火，在物者莫明于珠玉，在人者莫明于礼义。

Se temas pri estaĵoj en la Ĉielo, neniu estas pli luma ol la suno kaj la luno. Se temas pri estaĵoj de la tero, neniu estas pli pura ol akvo kaj fajro. Se temas pri objektoj inter estaĵoj, neniu estas pri hela ol perloj kaj jadoj. Se temas pri homoj, neniu estas pli brila ol decreguloj kaj justo.

故日月不高，则光晖不赫；水火不积，则晖润不博；珠玉不睹乎外，则王公不以为宝；礼义不加于国家，则功名不白。

Se ne altas la suno aŭ la luno, ili ne lumas pli; se ne amasiĝas akvo aŭ fajro, ili ne iĝas masiva pli vaste; se ne aperas eksteren ia ajn perlo aŭ jado, ili ne estas rigardataj de reĝoj kaj dukoj kiel trezoroj; se decreguloj kaj justo ne estas aldonataj al iu ŝtato aŭ familio, ties merito kaj renomo neniam brilos.

故人之命在天，国之命在礼。

Tial do la homa vivo dependas de la Ĉielo, la ŝtata vivo dependas de decreguloj.

君人者隆礼尊贤而王，重法民而霸，好利多诈而危，权谋倾覆幽险而尽亡矣。

La homa estro, disvastiganta decregulojn kaj respektanta saĝulojn, fariĝos la vera reĝo; la estro, preninta leĝaron grava, fariĝos hegemono; kiu ŝatas profiton kaj manovras multe, tiu endanĝerigas sian ŝtaton; kiu kaŝe riskas komploti, insidi kaj renversi reĝimon, tiu pereigas ĝisfine la ŝtaton.

大天而思之，孰与物畜而制之？

Kio estas preferinda, aspiri al la granda Ĉielo aŭ akumuli scion pri aĵoj kaj reguligi ilin? 从天而颂之，孰与制天命而用之？

Kio estas preferinda, obei la Ĉielon kaj laŭdi ĝin aŭ reguligi la Ĉielan ordonon kaj utiligi ĝin?

望时而待之，孰与应时而使之？

Kio estas preferinda, esperante la bonan tempon kaj atendi ĝin aŭ respondante al la donita tempo kaj uzi ĝin?

因物而多之，孰与骋能而化之？

Kio estas preferinda, atendi la spontanegan multiĝon laŭ materia leĝo aŭ eltrovi la eblecon kaj transformi ĝin?

思物而物之，孰与理物而勿失之也？

Kio estas preferinda, pensadi pri objektoj kaj lasi ilin stati per si mem aŭ racie trakti objektojn por ne perdiĝi?

愿于物之所以生，孰与有物之所以成？

Kio estas preferinda, serĉadi la fonton, de kie iu objekto naskiĝis, aŭ rigardi la kreskon, kien ĝi disvolviĝas?

故错人而思天，则失万物之情。

Kiu, preterlasante homojn, nur aspire pensas pri la Ĉielo, tiu perdas la dispoziciojn de ĉiuj estaĵoj.¹⁵²

百王之无变，足以为道贯。

Kio ne ŝanĝiĝis dum la tronado de cent reĝoj, tion oni povas sufiĉe konsideri kiel koheran vojon.

一废一起，应之以贯，理贯不乱。

Malgraŭ iama malleviĝo kaj iama leviĝo, ĉio konformas al la kohera procezo, kaj la kohera principo ne malordiĝas.

不知贯，不知应变，贯之大体未尝亡也。

Ne sciante la koherecon, oni ne scias laŭan ŝanĝiĝon, ĉar neniam pereas la kohera granda tuto.

乱生其差，治尽其详。

La malordo estiĝas inter la devioj el de kohera principo, kaj la ordo rezultas de la skrupula esplorado pri ĝi.

故道之所善，中则可从，畸则不可为，匿则大惑。

La bono estiĝas laŭ la vojo, kies centron oni devas sekvi. Per bagatelaĵo oni ne devas okupi sin, ĉar se la kohera vojo estus kaŝita, okazus la granda konfuzo.

水行者表深，表不明则陷；治民者表道，表不明则乱。

Kiu ĉiam iradas akvon, tiu starigas markilon ĉe ŝanelo. Se la markilo ne estas klara, oni povas enfali. Kiu regas la popolon, tiu starigas la markilon de la vera vojo. Se la markilo ne estas klara, tiam estiĝas malordo.

礼者表也。非礼，昏世也；昏世，大乱也。

Decreguloj estas ja markilo. Sen decreguloj la mondo blindiĝas. Se la mondo iĝos blinda, tiam estiĝos granda ĥaoso.

故道无不明，外内异表，隐显有常，民陷乃去。

Do la vojo ne devas esti malklara, oni devas starigi diversajn markilojn kaj ekstere kaj interne, por ke ĉiam videblas la kaŝita danĝero, kien la popolo ne enfalu, preterirante.

万物为道一偏，一物为万物一偏，愚者为一物一偏，而自以为知道，无知也。

¹⁵² Demandoj de Xunzi estas starigitaj en alternativo kiel “substanco aŭ fenomeno”, “principo aŭ apliko”, “rezonado pri teorio aŭ praktiko”, kaj Xunzi preferas la lastajn al la unuaj. Lia starpunkto estas pragmatismo, materialismo surbaze de fenomenismo. Li konsideras grava subjekton de saĝa persono 君子, kiu racie observas fenomenon kaj elektas taŭgan konduton. Ĉi tie de li estas kritikata Mozi pro aprobo de spiritoj kaj Zhuangzi pro meditado pri la Ĉielo.

Ĉiuj aĵoj estas unu faceto de la vojo, kaj unu aĵo estas unu faceto de ĉiuj aĵoj. Stultulo rigardas unu faceton de unu aĵo, kaj konsideras sin scianto de la vojo – do restas sen scio.

慎子有见于后，无见于先；老子有见于诘，无见于信；墨子有见于齐，无见于畸；宋子有见于少，无见于多。

Shenzi, vidante malantaŭon, ne vidas la antaŭon; Laozi, vidante la fleksan, ne vidas la streĉan; Mozi, vidante la kompletan, ne vidas la apartan; Songzi vidas la malmulton je deziro kaj ne vidas la multon.¹⁵³

有后无先，则群众无门，有诘而无信，则贵贱不分；有齐而无畸，则政令不施；有少而无多，则群众不化。

Kun malantaŭo sen antaŭo, la popolamaso perdas la pardonon; kun fleksio sen streĉo, ne estas dividate inter la nobla kaj la malnobla; kun kompleto sen aparto ne efektivigeblas politiko kaj dekreto; kun malmulto je deziro sen multo la popoloamaso ne povas aliformiĝi.

《书》曰：“无有作好，遵王之道；无有作恶，遵王之路。”此之谓也。

Estas skribite en *Libro*: “Ne havigante al si arbitran favoron, sekvu respektplene la reĝan vojon; ne havigante al si arbitran malfavoron, sekvu respektplene la reĝan padon.” Tio signifas la supre menciitan.¹⁵⁴

¹⁵³ Shenzi 慎到 estis ideologo de legalismo 法家. Xunzi skribis pri li, ke “kovrite de leĝaro li ne scias saĝecon.” Laozi estis filozofo, fama je Nefarado 无为. Mozi prelegis pri 兼爱 Universala amo, kaj kritikis la apartan amon 别爱. Songzi asertis gravecon de 寡欲 malgranda deziro. Vidu la ĉap. 6 kaj 21. 非十二子, 解蔽

¹⁵⁴ Citaĵo el 尚书, 周书, 洪范.

18 正论

KOREKTADO DE TEZOJ

世俗之为说者曰：“主道利周。”是不然。

Snoboj-mondanoj asertas, dirante: “Al estro estas utile-profitdone disponi la aferojn sekrete.” Tia opinio ne pravas.

主者，民之唱也；上者，下之仪也。

La estro alivorte estas direktanto de popola ĥoro; la supro estas kriterio por la subo.
彼将听唱而应，视仪而动。

La popolo sekvante kantas kaj reagis, vidante normon, moviĝas.
唱默则民无应也，仪隐则下无动也。

Se la direktanto de ĥoro silentas, la popolo ne repondas; se la normo estas kaŝita, la subo ne povas moviĝi.

不应不动，则上下无以相有也。

Se ne reagis nek moviĝis, tiam la supro kaj la subo havas nenion komunan.
若是，则与无上同也，不祥莫大焉。

Tiel do eblus nenia akordiĝo al la supro kaj estus nenia malfeliĉo pli granda ol tio.
故上者，下之本也。

Do la supro estas la fonto por la subo.

上宣明则下治辨矣，上端诚则下愿恣矣，上公正则下易直矣。

Se la supro deklaras klare, la subo iĝas facile regebla kaj komprenema; se la supro estas deca kaj sincera, la subo volus esti honesta; se la supro estas justa kaj ĝusta, la subo iĝas simpla kaj rekta.

治辨则易一，愿恣则易使，易直则易知。

Se facile regebla kaj komprenema, estas facile unuigi; kiu volus esti honesta, tiun estas facile uzi; kiu estas simpla kaj rekta, tiun estas facile kompreni.

易一则强，易使则功，易知则明，是治之所由生也。

Facile unuigite, fortas; facile uzebla, meritas; facile komprenate, brilas. Jen de kio naskiĝas la regado.

上周密则下疑玄矣，上幽险则下渐诈矣，上偏曲则下必周矣。

Se la supro havas aferon sekreta, la subo kaŝe dubos la malklaran; se la supro tenas sin obskure kaj insideme, la subo estos trompanta pli kaj pli; se la supro estas deviema kaj kurbiĝema, la subo nepre inklinos teni sekreton en koro.

疑玄则难一，渐诈则难使，比周则难知。

Kiuj kaŝe dubas la malklaran, tiujn estas malfacile unuigi; kiuj trompas pli kaj pli, tiujn estas malfacile uzi; kiuj grupiĝas sekrete, tiujn estas malfacile kompreni.

难一不强，难使则不功，难知则不明，是乱之所由作也。

Se ne facile unuigebla, malfortas; se ne facile uzebla, ne meritas; se ne facile komprenebla, malklaras. Jen de kie naskiĝas malordo.

故主道利明不利幽，利宣不利周。

Do estro taksas la klarecon profitdona, sed la obskuron malprofita, estimas publikecon utila, sed ensekretigon malutila.

故主道明则下安，主道幽则下危。

Se la estro estimas klaran publikecon, la subo estas trankvila; se la estro estas kaŝema, la subo antaŭtimas je danĝero.

故下安则贵上，下危则贱上。

Estante trankvila, la subo estimas la supron; antaŭtimante je danĝero, ĝi malestimas la supron.

故上易知则下亲上矣，上难知则下畏上矣。

Se la supron estas facile kompreni, la subo simpatias la supron; se la supro estas malfacile komprenebla, la subo timas la supron.

下亲上则上安，下畏上则上危。

Se la subo simpatias la supron, la supro estas trankvila; se la subo timtremas je la supro, la supro estas en danĝero.

故主道莫恶乎难知，莫危乎下畏己。

Do la estro ne devas teni sin nesciigebla, por eviti la danĝeron, ke la subo timtremu je li mem.

传曰：“恶之者众则危。”《书》曰：“克明明德。”

Tradicie oni diras: “Ĉe la estro malbona estos endanĝerigita la homoamaso.” Estas skribite en *Libro*: “Tenu sin serena kaj faru la virton brila.”¹⁵⁵

《诗》曰：“明明在下。”故先王明之，岂特玄之耳哉！

En *Poezio* estas dirite: “Li havis la virton hela kaj luma al la subo.”¹⁵⁶ Do antikvaj reĝoj sintenis publike klaraj. Kio okazus, se nur en aparta mallumo!

世俗之为说者曰：“桀，纣有天下，汤，武篡而夺之。”是不然。

Snob-mondanoj asertas, dirante: “Jie, Zhou havis la mondon, tiun Tang, Wu uzurpis.”

Sed tia opinio ne pravas.

以桀，纣为常有天下之籍则然，亲有天下之籍则不然，天下谓在桀，纣则不然。

¹⁵⁵ Citaĵo el 尚书，尧典. Sed en nuna eldono estas skribite 克明俊德.

¹⁵⁶ Citaĵo el 诗经，大雅，大明.

Koncerne de Jie-Zhou, estas prave diri, ke ili heredinte havis la mondon, sed ne pravus diri, ke ili per si mem simpatie posedis la hereditan mondon. Tial do ne direblas, ke la mondo apartenis al Jie-Zhou.

古者天子千官，诸侯百官。以是千官也，令行于诸夏之国，谓之王；以是百官也，令行于境内，国虽不安，不至于废易遂亡，谓之君。

Antikve al Ĉiela filo servis mil burokratoj, al landestro – cent burokratoj. Se tra tiuj mil burokratoj la dekreto estis transdonita al landoj sub Xia-dinastio, tiam oni nomis la ĉefon vera reĝo “Wang”. Se tra cent burokratoj la dekreto estis transdonita en la landlimo, kiel ajn maltrankvile estu en la lando ankoraŭ ne tiom grade ke la lando falu aŭ pereu, oni nomis la ĉefon reganto “Jun”.

圣王之子也，有天下之后也，势籍之所在也，天下宗室也，然而不材不中，内则百姓疾之，外则诸侯叛之，近者境内不一，遥者诸侯不听，令不行于境内，甚者诸侯侵削之，攻伐之，若是，则虽未亡，吾谓之无天下矣。

Filo de sankta reĝo estas la posteulo, kiu heredis la rajton regi la mondon kaj la ĉeffamilion de la mondo. Sed se mankus al li la kapablo kaj la taŭgeco por la trono, tiuokaze interne popolanoj malŝatus lin, ekstere landestroj ribelus al li, enlandaj proksimuloj ne estus unuigitaj, foraj landestroj ne obeus lin, lia dekreto ne estus efektivigita eĉ ene de la landlimo, krizokaze landestroj ekagresus lin forrabi la teron, ekatakus bati lin, tiel do, kvankam ankoraŭ ne forpereus, tamen eblus diri, ke al li estas jam senigita la mondo.

圣王没，有势籍者罢不足以县天下，天下无君，诸侯有能德明威积，海内之民莫不愿得以为君师。

Post kiam sanktaj reĝoj mortis, se al laŭleĝa heredinto mankus kompetenteco apogi la mondon, tiam al la mondo estas senigita la reganto. Se kiu ajn el landestroj havas kapablon kaj virton kun plena majesteco, al tiu deziras ĉiuj popoloj de la tuta mondo petegi la rolon de reganto-generalo.

然而暴国独侈，安能诛之，必不伤害无罪之民，诛暴国之君若诛独夫。

Se iu tirano diktatoras la ŝtaton arbitre, estas preferinde puni lin, por ke la senkulpa popolo nepre ne vundiĝu. Puni la tiranon estas same facile kiel puni la unusolan kampulon.¹⁵⁷

若是，则可谓能用天下矣。能用天下之谓王。

Tiel do eblas utiligi la mondon. Kiu kapablas uzi la mondon, estas nomata la vera reĝo.

¹⁵⁷ Tiu opinio estas simila al de Mengzi 孟子, kiu diras al la reĝo Xuan de Qi: 残贼之人, 谓之一夫, 闻诛一夫纣矣, 未闻弑君也。梁惠王下篇。(Malbonvoleculon-maljustulon oni nomas unu kampulo. Mi aŭdis, ke oni punis kampulon-Zhou, sed ne aŭdis, ke oni atencis la supran reganton.) Pro tiu frazo Mengzi estis rigardata kiel danĝera, revolucia pensulo en Japanio.

汤，武非取天下也，修其道，行其义，兴天下之同利，除天下之同害，而天下归之也。

Tang-Wu ne forrabis la mondon, sed korektis la vojon, faris la juston, promociis la komunan profiton de la mondo, senigis la komunan malutilon de la mondo, tiel do la mondo revenis hejmen al al sia loko.

桀，纣非去天下也，反禹，汤之德，乱礼义之分，禽兽之行，积其凶，全其恶，而天下去之也。

Jie-Zhou ne forlasis la mondon, sed la mondo forlasis ilin, ĉar, male al la virto de Yu-Tang, ĉe ili malordiĝis la decreguloj kaj la justo sen klara distingo, estiĝis sovaĝa konduto samkiel bird-bestoj, amasiĝis malbonaŭguroj, plenis je la malbono.

天下归之之谓王，天下去之之谓亡。故桀，纣无天下而汤，武不弑君，由此效之也。

Al kiu la mondo apartenas, tiu estas nomata la reĝo; kiun forlasis la mondo, tiu fariĝis t. n. pereinto. Mi asertas klare, ke Jie-Zhou fariĝis senmondaj pereintoj, tial do Tang-Wu mortigis ne la suprajn regantojn.

汤，武者，民之父母也；桀纣者，民之怨贼也。

Tang-Wu estis gepatroj de la popolo; Jie-Zhou estis banditoj malamindaj al la popolo.

今世俗之为说者，以桀，纣为君而以汤，武为弑，然则是诛民之父母而师民之怨贼也，不祥莫大焉。

Nunaj snob-mondanoj asertas, kvazaŭ Jie-Zhou, kiel regantoj, estus mortigitaj de Tang-Wu. Sed la lastaj punis la unuajn kiel gepatroj de la popolo, aŭ batis la banditojn malamatajn de la popolo. Granda estas la miskompreno.

以天下之合为君，则天下未尝合于桀，纣也。

Se difini la reganton kiel akordiĝinton kun la mondo, la mondo neniam akordiĝis kun Jie-Zhou.

然则以汤，武为弑，则天下未尝有说也，直堕之耳。故天子唯其人。

Sekve, tian opinion, ke Tang-Wu atencus la estron, oni en la mondo neniam subtenas, sed mallaŭdas kiel orel-malpuraĵon. La Ĉiela filo estas nur la taŭga persono.

天下者，至重也，非至强莫之能任；至大也，非至辨莫之能分；至众也，非至明莫之能和。

La subĉiela mondo estas tre grava, ke nur la plej forta kapablas preni sur sin la ŝarĝon, tre granda, ke nur la plej prudenta kapablas dividi ĝin racie, tre multopa, ke nur la plej klera kapablas harmonie akordigi ĝin.

此三至者，非圣人莫之能尽，故非圣人莫之能王。

Tiu triopo ne disponebla se ne al la pleja sanktulo, do nur la sanktulo povas fariĝi la vera reĝo.

圣人备道全美者也，是县天下之权称也。

La sanktulo estas preta je la perfekte bela vojo, do al li apartenas la tutmonda potenco kaj la pesilo.

桀，纣者，其知虑至险也，其至意至暗也，其行之为至乱也；亲者疏之，贤者贱之，生民怨之，禹，汤之后也，而不得一人之与；刳比干，囚箕子，身死国亡，为天下之大僂，后世之言恶者必稽焉，是不容妻子之数也。

Jie-Zhou estas la plej danĝeraj je sia intelekto kaj konsidero, estas la plej mallumaj je sia volo-strebo, estas la plej haŭsa je sia konduto, ke iliaj parencoj tenis distancon for de ili, saĝuloj malestimis ilin, vivaj poplanoj havis rankoron kontraŭ ili. Malgraŭ ke ili estis posteuloj de Yu aŭ Tang, ilin povis subteni neniu. Unu el ili, Zhou, incizis ventron de Bigan, malliberigis Jizi. Ili mortis kaj la regnoj pereis. Ili fariĝis grandaj hontinduloj de la mondo, estas ĉiam nepre mokate citataj de postaj generacioj kiel la malbona ekzemplo.

故至贤畴四海，汤，武是也；至罢不容妻子，桀，纣是也。

Kiuj estas dumlonge laŭdata kiel saĝaj en la tuta mondo, estas Tang-Wu; la plej stultaj, ne kapablaj teni eĉ edzinojn kaj gefilojn sekuraj, estis Jie-Zhou.

今世俗之为说者，以桀，纣为有天下而臣汤，武，岂不过甚矣哉！

Nun snob-mondanoj asertas, dirante, ke Jie-Zhou estis posedinto de la mondo dum Tang-Wu estis iliaj vasaloj. Kia eraro tiu opinio estas!

譬之，是犹佞巫，跛匡大自以为有知也。

Tia eldiro estas sama, kiel iu ĝiba aŭguristino aŭ lama sorĉisto konsiderus sin grandaj saĝuloj.

故可以有夺人国，不可以有夺人天下；可以有窃国，不可以有窃天下也。

Povas esti, ke iu rabus la landon, sed ne povas okazi, ke iu rabu la mondon. Eble, oni povas ŝteli landon, sed oni ne povas ŝteli la mondon.

可以夺之者可以有国，而不可以有天下；窃可以得国，而不可以得天下。

Kvankam eblus, ke oni povas rabi iun landon kaj posedi ĝin, tamen neniam eblus, ke tiu povos posedi la mondon. Per la ŝtelado eblus akiri iun landon, sed neniam akireblas la mondo.

是何也？曰：国，小具也，可以小人有也，可以小道得也，可以小力持也；天下者，大具也，不可以小人有也，不可以小道得也，不可以小力持也。

Kial? Mi diras, ke lando esta malgranda ilo, havebla eĉ al malgrandulo, akirebla per malgranda vojo, tenebla per malgranda forto, sed la mondo estas tiom granda ilo, kiom ĝi ne estas havebla al malgrandulo, ne akirebla per malgranda vojo, ne tenebla per malgranda forto.

国者，小人可以有之，然而未必不亡也；天下者，至大也，非圣人莫之能有也。

La lando estas havebla eĉ al malglandulo, sed nepre ne evitebla la perejo. La mondo estas la plej granda, ke ĝin kapablas posedi neniu alia ol sanktulo.

世俗之为说者曰：“治古无肉刑而有象刑：墨黥；髡髻；共；艾毕；对屨；杀，赭衣而不纯。治古如是。”

Snob-mondanoj asertas, dirante: “En la antikva regado la punado estis nur simbola, sed ne fizika, por ekzemplo, surmeti al punito nigran kamajon anstataŭ tatui, nigran ŝnuron al ĉapo anstataŭ tranĉi nazon, palan genuŝirmilon anstataŭ katri, kanabajn ŝuojn anstataŭ haki piedojn, surmeti ruĝan veston anstataŭ mortigi. Tia estis la antikva regado.”¹⁵⁸

是不然。以为治邪？则人固莫触罪，非独不用肉刑，亦不用象刑矣。

Tio ne pravas. Kio ili konsideras la regadon? Se bone regate, homoj neniam farus krimon per si mem, do ne necesus ne nur fizika punado, sed ankaŭ simbola punado.

以为人或触罪矣，而直轻其刑，然则是杀人者不死，伤人者不刑也。

Kiam iu krimis, se la punado estus malpeza, tiam eĉ murdinto ne devus esti mortigita, vundinto ne devus esti punita.

罪至重而刑至轻，庸人不如恶矣，乱莫大焉。

Se la punado estus plej malpeza eĉ kontraŭ plej peza krimo, tiuokaze ordinaruloj jam ne malamuz la krimon, tiam estiĝus la ĥaoso grandega.

凡刑人之本，禁暴恶恶，且征其未也。

Ĝenerale, la ekzistkaŭzo de la punado kuŝas en tio, ke malpermesi perforton, malami malbonon kaj preventi la okazon.

杀人者不死而伤人者不刑，是谓惠暴而宽贼也，非恶恶也。

Se murdinto ne estus mortigita kaj vundinto ne estus punata, tio signifas, ke favori perforton kaj toleri kanajlon, sed ne malami malbonon.

故象刑殆非生于治古，并起于乱今也。

Tia simbola punado nenial aperus en la antikva regado, se nun, okazigus ĥaoson.

治古不然。凡爵列，官职，赏庆，刑罚，皆报也，以类相从者也。

La antikva regado estis ne tia. Titoloj-vicoj, oficoj-postenoj, laŭdado-premioj, punado, ĉiuj rezultis laŭ rekompenco, konformante al la klasifiko.

一物失称，乱之端也。

Se erarus je la taksado de eĉ unu kazo, ekus la ĥaoso.

夫德不称位，能不当功，罚不当罪，不祥莫大焉。

Se iu virto estus ne taksata ĝuste, iu kapablo estus rigardata kiel ne merita, iu puno estus mezurata ne konforme al la krimo, tiam grandega estus la minaco.

昔者武王伐有商，诛纣，断其首，县之赤旆。

¹⁵⁸墨黥；髡髻；共；艾毕；对屨；杀，赭衣而不纯 慎子曰：“有虞氏之诛，以画跪当黥，以草纓当劓...荀子集解下, 386

Antikve, la reĝo Wu batis la Shang-regnon, punis la tiranon Zhou, hakis lian kapon, kaj pendigis ĝin sur la ruĝa standardo.

夫征暴诛悍，治之盛也。

La konkero de tirano kaj la punado de fripono, – t. e. la kulmino de la regado.

杀人者死，伤人者刑，是百王之所同也，未有知其所由来者也。

Al murdinto la morton, al vundinto la punon, – tio estas la sama principo de cent reĝoj, malgraŭ ke neniu scias de kie tiu principo devenis.

刑称罪则治，不称罪则乱。

Se la punado konformas al la krimo, tiam bone estas regate; se ne konformas, tiam malordiĝas.

故治则刑重，乱则刑轻，犯治之罪固重，犯乱之罪固轻也。

Do en la bona regado la punado estas peza, en malordo la punado estas malpeza, ĉar la krimo farata dum la bona regado estas memkompreneble serioza, la krimo farata dum la malordo estas memkompreneble malpeza.

《书》曰：“刑罚世轻世重。”此之谓也。

Estas skribite en *Libro*: “Grado de punado dependas de la tempo, en iu tempo malpeza, en la alia tempo peza.” Tio signifas la supre menciitan.¹⁵⁹

世俗之为说者曰：“汤，武不能禁令。是何也？”曰：“楚，越不受制。”

Snob-mondanoj asertas, dirante: “Tang kaj Wu ne povis penetre regi la tuta mondon per la dekretoj de malpermeso, ĉar eblus diri, ke landoj de Chu kaj Yue ne akceptis la reĝimon.”

是不然。汤，武者，至天下之善禁令者也。

Tio ne pravas. Tang kaj Wu povis bone aldoni al la mondo siajn dekretojn.

汤居亳，武王居鄗，皆百里之地也，天下为一，诸侯为臣，通达之属莫不振动从服以化顺之，曷为楚，越独不受制也？

Tang, sidante en la urbo Bo, la reĝo Wu, sidante en la urbo Hao, kvankam ambaŭ havis antaŭe nur teritorion je cent *li*oj kvadrato, tamen unuigis la mondon, ke landestroj fariĝis iliaj vasaloj, submetiĝis al ili senŝancele ĉiuj, kiuj povis komunikiĝi kun ili. Kial eblus diri, ke Chu kaj Yue ne akceptis sole la reĝimon?

彼王者之制也，视形势而制械用，称远迩而等贡献，岂必齐哉！

Ilia reĝa reĝimo, obervante situacion, reguligis subigan ŝarĝon-katenon, depende de distanco diversigis la formon de tributo. Kial tio necesus nepre la sama?

故鲁人以糖，卫人用柯，齐人用革，土地刑制不同者，械用备饰不可不异也。

Tiel do Lu-landanoj tributis per *tang*, We-landanojn per *ke*, Qi-landanoj per *yige*. Kiel

¹⁵⁹ Citaĵo el 尚书，吕刑.

malsamas landoj kun sia propra tero kaj leĝaro, tiel ne devas ne diferenci la ŝarĝo kaj la ornamaĵo je tributo.¹⁶⁰

故诸夏之国同服同仪，蛮，夷，戎狄之国同服不同制。

Do landoj ene de Xia-regno submetis sin per la sama servado kaj la sama rito, kaj barbaroj, kiel Man, Yi, Rong, Di, submetis sin per la sama servado kaj la malsama rito. 封内甸服，封外侯服，侯卫宾服，蛮夷要服，戎狄荒服。

Ene de la feŭdo oni submetiĝis per rekta servo al la reĝo, ekster la feŭdo oni submetiĝis per landestra devontigita servo, ekster la ekstera feŭdo oni submetiĝas per certa deĵorado, en landoj de Man-Yi oni submetiĝis per bezonata civiliza servo, en barbaroj Rong-Di submetiĝis per sia primitiva servo.¹⁶¹

甸服者祭，侯服者祀，宾服者享，要服者贡，荒服者终王。

Submetiĝintoj per la rekta servo tributis ĉe la taga festo, per landestra servo tributis ĉe la monata festo, per deĵorado tributis ĉe la sezona ofero, per bezonata civiliza servo tributis ĉe la jara festo, kaj per la primitiva servado tributis ĉe la festo de la reĝa de- kaj surtroniĝo.

日祭，月祀，时享，岁贡，夫是之谓视形势而制械用，称远近而等贡献，是王者之制也。

La taga festo, la monata festo, la sezona ofero, la jara tributo estis farataj por la observado de majesteco kaj la kontrolado de deviga ŝarĝo, t. e. tributoj konforme al la distanco, ĉu fora aŭ proksima. Tia estis la reĝa reĝimo.

彼楚，越者，且时享，岁贡，终王之属也，必齐之日祭，月祀之属然后曰受制邪？

La tributo-maniero de Chu-lando kaj Yue-lando apartenis al la sezona ofero, la jara festo aŭ la troniĝa festo. Ĉu la snoboj volus diri, ke nur la landoj apartenantaj al la taga festo kaj la monata festo estis sub la reĝimo？

是规磨之说也，沟中之瘠也，则未足与及王者之制也。

Tia opinio estas ja antaŭjuĝo de enkotiĝinta magra fiksideulo, povas neniel tuŝi la kernon de la reĝa regulo.

语曰：“浅不足于测深，愚不足与谋智，坎井之蛙不可与语东海之乐。”此之谓也。

Estas dirite: «Ilia ilo estas tro mallonga por mezuri la profundon, tro stulta por cerbumi. Kun rano en putro ne eblas kune babili pri la ĝojo de la Orienta maro.» Tio signifas la supre menciitan.

世俗之为说者曰：“尧，舜擅让。”

¹⁶⁰ Estas ne sciate, kio estas 糖,柯,一革. Esploristoj konsideras tiujn manĝuoj. Mi konjektas la vorton 械用 iu devontigita ŝarĝo al submetiĝinto.

¹⁶¹封内 signifas la areon ene de 500 lioj. 封外 – la areon ekster 500 lioj. 甸服 kultivi la reĝan kampon, t. e. rekta dervado al la reĝo. 侯服 servado al la reĝo far landestroj,宾服 laŭtempa aŭdienco,要服 servi kun promeso de civilizo je moroj,荒服 neregula tributo al la reĝo.

Snob-mondanoj asertas, dirante: “Yao memvole rezignis la tronon por cedi al Shun.”¹⁶²
是 不 然。天 子 者， 势 位 至 尊， 无 敌 于 天 下， 夫 有 谁 与 让 矣？

Tio ne pravas. Filo de la Ĉielo estas ja la plej respektinda je aŭtoritato kaj statuso, tial neniun kun li ne komparelas en la mondo, do al kiu eblus cedi?

道 德 纯 备， 智 惠 甚 明， 南 面 而 听 天 下， 生 民 之 属 莫 不 振 动 从 服 以 化 顺 之， 天 下 无 隐 士， 无 遗 善， 同 焉 者 是 也， 异 焉 者 非 也， 夫 有 恶 擅 天 下 矣？

La filo de la Ĉielo estas preta je la pura virto kaj je la brila sagaco, ke li nur sidas sur trone fronte al sudo kaj aŭdas la mondon. Popolanoj ne devas ne moviĝi, obei kaj ŝanĝiĝi humilaj. En la mondo rivelas ĉio, do malaperas ermitoj kaj ajna bono ne kaŝiĝas. Kiu estas identa kun li, estas prava; kiu ne estas identa kun li, ne pravas. Kial do bezonus cedi la mondon al la alia?

曰：“死而擅之。”

Ili diras: “Mortas, do cedas al la alia.”

是 又 不 然。圣 王 在 上， 图 德 而 定 次， 量 能 而 授 官， 皆 使 民 载 其 事 而 各 得 其 宜； 不 能 以 义 制 利， 不 能 以 伪 饰 性， 则 兼 以 为 民。

Tio ankaŭ ne pravas. Sankta reĝo, estante supre, taksas la virton de subuloj kaj asignas al ili la rangojn, mezuras al ili la kapablon kaj donas la postenojn, lasas ĉiun popolon okupiĝi pri la aferoj por ke ĉiuj havigu al si la konvenan laboron, universale faras sia popolo eĉ tiun, kiu ne kapablas deteni profiton per justo, eĉ tiun, kiu ne kapablas ornamu sian naturon per arta kultrado.

圣 王 已 没， 天 下 无 圣， 则 固 莫 足 以 擅 天 下 矣。

Kiam la sankta reĝo jam mortis kaj ne troviĝas la sankta en la mondo, tiam tute ne eblas cedi la mondon al la alia.

天 下 有 圣 而 在 后 者， 则 天 下 不 离， 朝 不 易 位， 国 不 更 制， 天 下 厌 然 与 乡 无 以 异 也， 以 尧 继 尧， 夫 又 何 变 之 有 矣？

Kiam post li troviĝas iu sanktulo en la mondo, tiam la mondo ne disiĝas, en la kortego ne ŝanĝiĝas rangoj, en la regno ne bezonatas reformo de la reĝimo, la mondo restas paca kaj provincoj restas sen ajna diferenco. En tiu okazo estas same, kiel Yao heredas Yao-n, tiel do nenio ŝanĝiĝas.

圣 不 在 后 子 而 在 三 公， 则 天 下 如 归， 犹 复 而 振 之 矣， 天 下 厌 然 与 乡 无 以 异 也， 以 尧 继 尧， 夫 又 何 变 之 有 矣？

Se, kvankam ne troviĝas iu sanktulo, tamen ĉe la posteulo estas Tri Dukoj, tiam la mondo obeas samkiel antaŭe kaj reviviĝas denove prosperi, tiel do la mondo restas paca kaj provincoj restas sen ajna diferenco. Ankaŭ tiuokaze estas same, kiel Yao heredas

¹⁶² Ĉiuj esploristoj tradukis la frazon, ke “Yao kaj Shun memvole abdikis kaj cedis la tronon al la aliaj.”

Yao-n, tiel do nenio ŝanĝiĝas.

唯其徙朝改制为难。

Se estus io malfacila, tio estus nur en rearanĝo de la korteganoj kaj en reformo de la reĝimo.

故天子生则天下一隆，致顺而治，论德而定次，死则能任天下者必有之矣。

Dum la filo de la Ĉielo vivas, en la mondo evoluas decreguloj, oni sekvas kaj estas bone regata, estas asignata laŭ taksata virto. Kiam li mortas, nepre troviĝas la kompetenta heredonto de la mondo.

夫礼义之分尽矣，擅让恶用矣哉？

Ĉar la mondo estas trapenetrita per decreguloj, justo kaj klasdivido, ĉu tiam bezonatus speciale la memvola cedado de la trono.

曰：“老衰而擅。”是又不然。

Ili diras: “Pro maljuniĝo aŭ pro kadukiĝo.” Ankaŭ tio malpravas.

血气筋力则有衰，若夫智虑取舍则无衰。

Je sanga energio kaj muskola forteco eblas kadukiĝo, sed je sagaco kaj je kapablo de selektado ne kadukiĝas.

曰：“老者不堪其劳而休也。”是又畏事者之议也。

Ili diras: “Maljunulo ne povas elteni la pezan laboron kaj devas ripozi.” Ankaŭ tio estas argumento de tiu, kiu timas la aferon far de li.

天子者，势至重而形至佚，心之愉而志无所诎，而形不为劳，尊无上矣。

Filo de la Ĉielo estas la plej energia je potenco kaj kapablas sin relasi je la korpo, kaj ĝojas plene je la koro, ne ŝanceliĝas je la strebo, nek laciĝas je la korpo, restas la plej respektinda.

衣被则服五采，杂间色，重文绣，加饰之以珠玉；食饮则重大牢而备珍怪，期臭味，曼而饗，代罍而食，《雍》而彻乎五祀，执荐者百人侍西房；居则设张容，负依而坐，诸侯趋走乎堂下；出户而巫覡有事，出门而宗祀有事，乘大路，趋越席以养安，侧载罍苙以养鼻，前有错衡以养目，和鸾之声，步中《武》《象》，驹中《韶》《护》以养耳，三公奉辔持纳，诸侯持轮挟舆先马，大侯编后，大夫次之，小侯，元士次之，庶士介而夹道，庶人隐辇，莫敢视望；居如大神，动如大帝，持老养衰，犹有善于是者与不？

Koncerne vestaĵon, la Ĉiela filo estas vestita per kvin koloroj kun intermeza ombrumado, kun multetavolaj brokaĵoj kaj ornamoj de perloj kaj jadoj. Lia manĝaĵo kaj trinkaĵo konsistas el diversaj viandoj kaj bongustaj raraj delikataĵoj, bonodoraj kaj aromaj, servataj dumlonge unu post la alia por manĝadi laŭvice kaj sinsekve. Ĉe kvin festoj ludas la muzikon, nomatan *Yong*; la orkestro el cent homoj-servantoj en la okcidenta ĉambro.¹⁶³ Ĉe kunsido lia sidejo estas instalata sub kurtenoj en la halo kaj,

¹⁶³ Multaj esploristoj prenas la frazon ne por muzika orkestro, sed por servo al ĉiutaga

dum li sidas fone de la ornamita vando, vasaloj-landestroj servile kaŭrekuradas sub la halo. Ĉe la interna pordo sorĉistino aŭ divenisto aŭguras por li. Elirante de la pordo, li preĝas al la prapatra maŭzoleo. Kiam li veturas per kaleŝo, la sidejo estas kovrita per mola graso de tifaŭ komforta al lia korpo kaj en la vagono bonodoras je aroma planto por ĝojigi la nazon, antaŭ de la vagono estas ornamitaj per desegno la jugoj por ĝojigi okulojn, kaj pendas feniksformaj sonoriletoj, kiuj ludas melodiojn de Wu, Xiang dum malrapida iro, melodion de Shao, Hu dum rapida kuro, ĝojigante orelojn. Tri dukoj, prenante timonojn, kontrolas gvidrimenojn. Landestroj ĉe radoj, akompanante ambaŭflanke de la kaleŝo, kondukas la ĉevalojn. La kaleŝon postsekvas grandaj dukoj, kaj ilin postsekvas grandoficistoj, kaj ilin postsekvas foraj markizoj, kaj ilin postsekvas burokratoj, kaj laŭ vojo ambaŭflanke staras vice simplaj oficistoj-soldatoj. Popolanoj, mallevente kapojn, ne aŭdacas okulumi tion. La Ĉiela Filo sidas kiel Granda Dio, movas sin kiel la Ĉiela Imperiestro. Ĉu estus pli bona kontraŭsenila rimedo ol tio por teni sin tia je maljuniĝo kaj nutri sin tiel dum kadukiĝo?

老者，休也，休犹有安乐恬愉如是者乎？

Maljunulo ripozas, sed ĉu en ripozo estus ankaŭ tia trankvilo, distro kaj ĝojo?

故曰：诸侯有老，天子无老，有擅国，无擅天下，古今一也。

Do estas dirite: Landestroj senilas, sed la Ĉiela Filo ne seniliĝas; okazus, ke landestroj cedas la tronon al la alia, sed ne okazas, ke la Ĉiela Filo cedas la mondon al la alia. Tio estas sama nun kaj antikve.

夫曰“尧，舜擅让”，是虚言也，是浅者之传，陋者之说也，不知逆顺之理，小大，至不至之变者也，未可与及天下之大理者也。

Eldiro, ke Yao volonte cedis al Shun la tronon, estas mensogo, kiun facilanimuloj transdonas kaj pedantoj diktadas. Ili ne scias dialektikon pri pro kaj kontraŭ, pri malgrando kaj granda, pri ŝanĝiĝo inter ekstremo kaj neekstremo, tial do ne povas alproksimiĝi la grandan rezonon de la mondo.¹⁶⁴

世俗之为说者曰：“尧，舜不能教化。是何也？”曰：“朱，象不化。”

Snob-mondanoj asertas, dirante: “Yao, Shun ne povis eduki aliulojn, kial? – ili diras, – ili eĉ ne povis eduki siajn filon Zhu aŭ fraton Xiang.”

manĝado. Mi konjektas tiun farata nur ĉe kvin festoj.

¹⁶⁴尧舜擅让是虚言也“Eldiro, ke Yao volonte cedis al Shun la tronon, estas mensogo.”

Grandan signifon havas tiu opinio de Xunzi, ĉar volonta abdiko kaj cedo de trono al alisangulo (Chanrang) estis konsiderata kiel ideala formo de senrevolucia transdono de la potenco. Laŭ Xunzi, en la mondo, regata per decreguloj, estas nature laŭ historia nepreco transdonata la potenco al la ajna plej taŭga heredonto, tute egale ĉu samsangulo aŭ alisangulo.

是不然也。尧，舜，至天下之善教化者也，南面而听天下，生民之属莫不振动从服以化顺之；然而朱，象独不化，是非尧，舜之过，朱，象之罪也。

Tio ne pravas. Yao, Shun estas la plej bonaj instruistoj-transformantoj en la mondo. Ili, turnante sin al sudo, aŭdadis la mondon, kaj la popolanoj k. c., imponate, ne devis ne obei kaj transformi sin por humile sekvi ilin. Sed nur Zhu kaj Xiang ne povis ŝanĝiĝi. Je tio ne kulpas Yao kaj Shun, sed kulpas mem Zhu kaj Xiang.

尧，舜者，天下之英也；朱，象者，天下之嵬，一时之琐也。

Yao, Shun estas la plej elstaraj en la mondo; Zhu, Xiang estis frenezuloj de la mondo, sentaŭguloj en tiu epoko.

今世俗之为说者不怪朱，象，而非尧，舜，岂不过甚矣哉！夫是之谓嵬说。

Nunaj snob-mondanoj ne vidas Zhu kaj Xiang strangaj, sed kritikis Yao kaj Shun. Ĉu tio ne estas granda eraro? Tio estas nomata 'torda vidpunkto'.

羿，彘门者，天下之善射者也，不能以拨弓，曲矢中；王梁，造父者，天下之善驭者也，不能辟马，毁舆致远；尧，舜者，天下之善教化者也，不能使嵬琐化。

Yi kaj Feng Men estis bonegaj pafarkistoj de la mondo. Sed eĉ ili ne povus trafi la celon per distordita arko kun malrekta sago. Wang Liang kaj Zao Fu estis bonegaj ĉarkondukistoj, sed eĉ ili ne povus atingi la foran per fikaleŝo kun ĉevalaĉoj. Yao kaj Shun estas bonegaj instruistoj de la mondo, sed eĉ ili ne povis transformi la torditajn sentaŭgulojn.

何世而无嵬，何时而无琐，自太皞，燧人莫不有也。

En kiu epoko ne troviĝis frenezuloj, en kiu tempo ne troviĝis sentaŭguloj? De praantikva epoko de Tai Hao kaj Sui Ren ĉiam ekzistas tiuj fiuloj.¹⁶⁵

故作者不祥，学者受其殃，非者有庆。

Do, kreinto estas vidata kiel malbonaŭgura kaj scienculo estas persekutata, sed nenionfaranto estas premiita.

《诗》曰：“下民孽，匪降自天；噂沓背憎，职竞由人。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Malbono al la suba popolo falas ne de sur la ĉielo, sed devenas de homoj, kiuj fake kverelas, publike klaĉas kaj kaŝe malamas.”¹⁶⁶ Tio signifas la supre menciitan.

世俗之为者说：“太古薄葬，棺厚三寸，衣衾三领，葬田不妨田，古不掘也。乱今厚葬饰棺，故[才日]也。”

Snoboj asertas, dirante: “Antikve malluksa estis funebro, oni faris ĉerkon el tabulo dika

¹⁶⁵ Tai Hao, alinome Fu Xi 伏羲, estis mita reĝo, kiu instruis fiŝadon kaj agrokulturon. Sui Ren instruis fajrigon.

¹⁶⁶ Citaĵo el 诗经, 小雅, 十月之交.

je tri *cunoj*, kun triopo da vestaĵoj kaj kusenoj, enterigis por ke la tombo ne malhelpu grenkampon. Kaj ne estis ŝtelite el ĝi. Nun en malpaca tempo la funebro fariĝis luksa, do el la tomboj estas ŝtelfosate.”¹⁶⁷

是不及知治道，而不察于[才曰]不[才曰]者之所言也。

Tia opinio ne trafas la kernon de la regado, nek komprenas la problemon de la ŝtelfosado.

凡人之盗也，必以有为，不以备不足，足则以重有馀也。

Ĝenerale homoj ŝtelas nepre pro iu kaŭzo: se ne por ŝtopi la mankon per tio, tiam spite sufiĉon por gajni multoble superfluan profiton.

而圣王之生民也，使皆当厚优犹不知足，而不得以有馀过度。

Popolanoj, vivantaj ĉe sanktaj reĝoj, ĉiuj estis plej sufiĉe bone traktataj, ke ne bezonis serĉi eksceson de superflua profito.

故盗不窃，贼不刺，狗豕吐菽粟，而农贾皆能以货财让；风俗之美，男女自不取于涂而百姓羞拾遗。

Do oni ne ŝtelis, nek pikis, sataj hundoj kaj porkoj eĉ sputis fabon kaj milion, kamparanoj kaj negocistoj povis reciproke cedi unu al alia la monon kaj varojn. La moro estis bela, viroj kaj virinoj ne adultadis maljuste, popolanoj hontis levpreni kaj proprigi ion falintan surstrate.

故孔子曰：“天下有道，盗其先变乎！”虽珠玉满体，文绣充棺，黄金充椁，加之以丹斝，重之以曾青，犀象以为树，琅玕，龙兹，华覲以为实，人犹且莫之[才曰]也。

Do Konfuceo diris: “Se estas la Vojo en la mondo, unue ŝanĝiĝas rabistoj!” Malgraŭ ke la korpo estis plenkovritaj per perloj kaj jadoj, la interna ĉerko estis plena de brodaĵoj, la ekstera ĉerko estis plena de oro kaj bronzoj, aldonite kun cinabro kaj verdigra tavolo, kun rinocera korno kaj eburo instalitaj kvazaŭ arbaro, kun instalitaj rubeno, malakito, *longzi*, *huajin*, similaj al fruktoj, sed tamen neniu aŭdacis ŝtelfosi.¹⁶⁸

是何也？则求利之诡缓，而犯分之羞大也。

Kial? Ĉar malforta estis profitavido kaj granda estis honto je transpaso de *fen* morallimo je klasa divido-distingo.

夫乱今然后反是：上以无法使，下以无度行，知者不得虑，能者不得治，贤者不得使。

Post kiam estiĝas nuna ĥaoso, la situacio fariĝis alia. La supro senleĝe ordonas, la subo senbride kondukas, intelektuloj ne kapablas pripensi, talentuloj ne kapablas administri, saĝuloj ne kapablas iniciati.

若是，则上失天性，下失地利，中失人和。

Tiel do supre perdiĝis la Ĉiela naturo, sube perdiĝis la Tera avantaĝo, meze perdiĝis la

¹⁶⁷ Mohistoj insistis pri malluksa funebro kontraŭ konfuceanismo.

¹⁶⁸ *longzi*, *huajin* estas nomoj de gemoj, sed ne sciante, kion ili signifis.

Homa harmonio.

故百事废，财物浊而祸乱起。

Do cent aferoj estas forlasitaj, trezoroj estas elĉerpitaj, ekis plago kaj ĥaoso.

王公则病不足于上，庶人则冻餒羸瘠于下，于是焉桀，纣群居，而盗贼击夺以危上矣。

Supre reĝo kaj dukoj malsaniĝis, ke ne povu plenumi la taskon je la regado, sube popolanoj suferas frostiĝon-malsaton kaj iĝas magraj. Tial ekaperas amase tiranoj, kiel Jie-Zhou, leviĝas agresemaj rabistoj-ŝtelistoj endanĝerigi la supron.

安禽兽行，虎狼贪，故脯巨人而炙婴儿矣。

Oni facile kondutas kiel birdoj kaj bestoj, avidas, kiel tigroj kaj lupoj, faras homon sekviando kaj rostas bebon por manĝi

若是，则有何尤[才曰]人之墓，扶人之口而求利矣哉？

Tial do, por profitavido neniel ĝenas ilin ŝtelfosi tombon kaj forrabi el buŝo de mortinto. Malsanuloj, kiuj estas mortintaj, kaj mortintoj, kiuj estas malsanuloj, ambaŭ estas mortintaj. Malsanuloj, kiuj estas mortintaj, kaj mortintoj, kiuj estas malsanuloj, ambaŭ estas mortintaj.

Eĉ se enteriĝite nude, ajna korpo ne evitas la ŝtelfosadon, kiel do oni povus teni la enterigitan sendefekta? Ili voras ne nur viandon sed la ostojn.

夫曰：“太古薄葬，古不[才曰]也；乱今厚葬，故[才曰]也。”

Tiuj snoboj diras: “Antikve la entombigo estis malluksa, do oni ne ŝtelfosis, nun en ĥaoso la entombigo estas luksa, do oni ŝtelfosas.”

是特奸人之误于乱说，以欺愚者而潮陷之以偷取利焉，夫是之谓大奸。

Tio estas erara kaj fia opinio de friponoj, kiuj, trompante stultulojn, intencas en tajda vakuo kaŝe proprigi al si la profiton. Tiu estas nomata granda fripono.

传曰：“危人而自安，害人而自利。”此之谓也。

Estas dirite en proverbo: “Endanĝerigante alian, gardi sin sendanĝera; difektante alian, gajni al si profiton.”¹⁶⁹ Tio signifas la supre menciitan.

子宋子曰：“明见侮之不辱，使人不斗。人皆以见侮为辱，故斗也；知见侮之为不辱，则不斗矣。”

La Majstro Songzi diris: “Kiu, vidante sin insultita, ne sentas malhonoron, tiu ne batalas. Batalas ĉiuj, kiuj, vidante sin insultita, eksentas malhonorigita. Se insultite, oni ne konsiderus tion hontenda, tiam okazus nenia batalo.”

应之曰：“然则亦以人之情为不恶侮乎？”

Mi responde demandis: “Se tiel, ĉu la homa sento ne malamas insultitecon?”

曰：“恶而不辱也。”

¹⁶⁹ Malklara estas kion signifas la kritiko de Xunzi al malluksa funebro. Estas malfcile kompreni, kiel mohistoj ‘profitas’ el la kritiko de luksa funebro. Laŭ mia suspekto, Xunzi malestimas la mohistojn pro tio, ke la lastaj provus akiri popularecon inter suferantoj de luksa funebro, ĉar tio kontraŭas konfuceismon kaj subfosas ĝin.

Li diris: “Malamas, sed ne hontas.”

曰: “若是, 则必不得所求焉。凡人之斗也, 必以其恶之为说, 非以其辱之为故也。”

Mi diris: “Se tial, al vi nepre ne eblus akiri kion vi serĉas. Ĝenerale homoj batalas nepre pro la malamo, sed ne pro la honto.

今俳优, 侏儒, 狎徒詈侮而不斗者, 是岂锯知见侮之为不辱哉? 然而不斗者, 不恶故也。

Nun burleskuloj, nanoj, klaŭnoj, insultite, ne batalas, – ĉu tio ne estas pro tio, ke ili ne rigardas la insulton hontinda? Ili ne batalas, ĉar ne malamas.

今人或入其央渎, 窃其猪彘, 则援剑戟而逐之, 不避死伤, 是岂以丧猪为辱也哉? 然而不悛斗者, 恶之故也。

Se nun iu, enpenetrante tra kanaletoj, estas ŝtelanta porkon, tiam domestro prenas glavon kaj forpelas tiun vivriske. Ĉu tio estas pro tio, ke li rigardas la perdon de porko hontinda? Li nepre senhezite batalas pro malamo.

虽以见侮为辱也, 不恶则不斗; 虽知见侮为不辱, 恶之则必斗。

Eĉ se, insultite, hontas, tamen se ne malamas, oni ne batalas; eĉ se, insultite, ne hontas, tamen se malamas, oni nepre batalas.

然则斗与不斗邪, 亡于辱之与不辱也, 乃在于恶之与不恶也。

Se tiel, ĉu batali aŭ ne batali dependas ne de tio, ĉu honti aŭ ne honti, sed de tio, ĉu malami aŭ ne malami.

夫今子宋子不能解人之恶侮, 而务说人以勿辱也, 岂不过甚矣哉!

Nun la Majstro Song-zi ne povas kompreni homan malamon al insulto, sed klopodas admoni, ke oni ne estu hontema, – ĉu tio ne estas ja erarego?

金舌弊口, 犹将无益也。

Estas vane insisti tian opinionon ripete eĉ per multvorta buŝo kun metala lango.

不知其无益则不知; 知其无益也, 直以欺人则不仁。

Estas malsaĝe, se li ne scias la senutilecon; ne estas bonvolece, se li, sciante la senutilecon, simple trompas homojn.

不仁不知, 辱莫大焉。

Sen bonvoleco kaj sen scio, nenio estas pli granda honto ol tio.

将以为有益于人, 则与无益于人也, 则得大辱而退耳。说莫病是矣。”

Eble, li konsiderus tian eldiron utila por homoj, sed fakte estas senutile por homoj, do li devas nur retiriĝi kun granda honto. Nenia eldiro estas pli malsana ol tio.”

子宋子曰: “见侮不辱。”

La Majstro Song-zi diris: “Esti insultita ne malhonoro.”

应之曰: “凡议, 必将立隆正然后可也。无隆正, 则是非不分而辨讼不决。”

Responde mi diras: “Ĝenerale por disputi nepre necesas starigi la kriterion ĝusta. Sen la

ĝusta kriterio estos ne distingebla la praveco kaj la malpraveco, nek solvebla la proponata argumento.

故所闻曰：‘天下之大隆，是非之封界，分职名象之所起，王制是也。’

Mi aŭdis iun diranta: ‘Laŭ la Granda kriterio de la mondo estas dividate pri la praveco kaj malpraveco, estiĝas kaj divido de laboroj kaj nomoj de fenomenoj. Jen la Reĝa Regulo.’

故凡言议期命，是非以圣王为师，而圣王之分，荣辱是也。

Do ĝenerale koncernante vorton, disputon, tempon, ordonon, pravecon kaj malpravecon oni devas fari sanktajn reĝojn gvidantoj, devas distingi aŭ dividi laŭ sanktaj reĝoj. Ankaŭ koncerne de honoro kaj malhonoro.

是有两端矣：有义荣者，有势荣者；有义辱者，有势辱者。

Estas du specoj – honoro laŭ justo kaj honoro laŭ cirkonstanco; malhonoro laŭ justo kaj malhonoro laŭ cirkonstanco.

志意修，德行厚，知虑明，是荣之由中出者也，夫是之谓义荣。

Ke kulturitaj estas la strebo kaj la volo, firma estas la virta konduto, brila estas la intelekto kaj konsidero, tio estas ja la honoro devenanta de interne, t. n. laŭjusta honoro.

爵列尊，贡禄厚，形势胜，上为天子诸侯，下为卿相士大夫，是荣之从外至者也，夫是之谓势荣。

Ke eminenta estas la titolo-rango, abunda estas la enspezo-salajlo, supera estas la potenco, kiel supre de la Ĉiela Filo, landestroj, sube ĝis ministroj, ŝtatoficistoj, kavalaroj kaj grandaj oficistoj, – tio estas ja honoro devenanta de ekstere, t. n. laŭcirkonstanta honoro.

流淫污慢，犯分乱理，骄暴贪利，是辱之由中出者也，夫是之谓义辱。

Troa diboĉado kaj koruptado, transpaŝo de distingo-divido kaj perturbado de rezonoj, ekscesa aroganteco kaj profitavidemo, – tio estas malhonoro, devenanta de interne, t. n. laŭjusta malhonoro.

詈侮摔搏，捶笞腩脚，斩断枯磔藉靡舌^纛举，是辱之由外至者也，夫是之谓势辱。

Insultegoj, molestoj, skurĝo, vipado, krurtranĉado, fortranĉado de membroj, eksponado de kadavro, krucumado, rozaria ligado de homoj, tranĉado de lango, – tio estas malhonoro, devenanta de ekstere, t. n. laŭcirkonstanca malhonoro..

是荣辱之两端也。

Jen kio estas ja du ekstretoj de honoro-malhonoro.

故君子可以有势辱，而不可以有义辱；小人可以有势荣，而不可以有义荣。

Noblulo povus ricevi laŭcirkonstancan malhonoron, sed ne devas ricevi laŭjustan malhonoron. Malgranduloj povas ricevi laŭcirkonstancan honoron, sed ne povus ricevi

laŭjustan honoron.

有势辱无害为尧，有势荣无害为桀。

Laŭcirkonstanca malhonoro ne damaĝus la aperon de la reĝo Yao, laŭcirkonstanca honoro ne damaĝus la aperon de la tirano Jie.

义荣，势荣，唯君子然后兼有之；义辱，势辱，唯小人然后兼有之。

Ambaŭ konscion de honoro, laŭjusta kaj laŭcirkonstanca, povas havigi al si poste nur noblulo, ambaŭ konscion de malhonoro, laŭjusta kaj laŭcirkonstanca, povas havigi al si poste nur malgrandulo.

是荣辱之分也。

Jen en tio kuŝas la distingo-divido je honoro-malhonoro.

圣王以为法，士大夫以为道，官人以为守，百姓以为成俗，万世不能易也。

Sanktaj reĝoj tenas tion la leĝo, grandaj oficistoj tenas tion la vojo, burokuratoj tenas tion gardenda principo, popolanoj tenas tion la kutima moro, – jen kio estas ne ŝanĝebla tra miloj da generacioj.

今子宋子案不然，独拙容为己，虑一朝而改之，说必不行矣。

Nun la Majstro Song-zi opinias ne tiel, sed li pensas, ke nur se iu persono sola humile cedus sin akcepti la problemon, ĉio subite sanĝiĝus en la bonon per unu pensado.

譬之，是犹以[土專]涂塞江海也，以焦侥而戴太山也，蹶跌碎折不待顷矣。

Se diri metafore, li pensas, kvazaŭ eblus ŝtopi riveregon aŭ maron per terbulo, eblus al nano Jiao Yao porti la grandan monton. Ne estas neatendite, ke tia provo tuj stumblas kaj rompiĝas.

二三子之善于子宋子者，殆不若止之，将恐得伤其体也。”

Se iuj rigardus la opinion de la Majstro Song-zi bona, al tiuj estas preferinde ĉesi tian pensmanieron, ĉar ili probable vundos sin mem.

子宋子曰：“人之情，欲寡，而皆以己之情为欲多，是过也。故率其群徒，辨其谈说，明其譬称，将使人知情欲之寡也。”

La Majstro Song-zi diris: “Laŭ denaska sento, da homa avido-deziro estas malmulte. Se, iuj supozus sian senton plena de avido-deziro, ili ĉiuj eraras. Do mi gvidas amason da lernantoj, prelegante per lekcioj kaj klarigaj paraboloj, por ke ili sciigu homojn pri malmulteco de avido-deziro.”

应之曰：“然则 亦以人之情为欲。目不欲綦色，耳不欲綦声，口不欲綦味，鼻不欲綦臭，形不欲綦佚。此五綦者，亦以人之情为不欲乎？”

Mi responde al li diras: «Se tiel, rezultas el tiu logiko pri homa sento je avido-deziro, ke okuloj ne dezirus la plenan gamon de koloroj, oreloj ne dezirus la plenan gamon de voĉoj, buŝo ne dezirus la plenan gamon de gustoj, nazo ne dezirus la plenan gamon de odoroj,

korpo ne dezirus la plenan gamon de plezuroj. Rilate al tiuj kvin elementaj gamoj, ĉu vi konsideras ilin homa sento, ne deziranta?”

曰：“人之情欲是已。”

Li diras: «Homa sento deziras tiujn.»

曰：“若是，则说必不行矣。以人之情为欲此五綦者而不欲多，譬之是犹以人之情为欲富贵而不欲货也，好美而恶西施也。”

Mi diras: «Se tiel, via doktorino nepre ne akcepteblas. Diri, ke homa sento deziras tiujn kvin gamojn, sed ne deziras multe, egalas, por ekzemplo, al tio, ke homa sento deziras riĉon kaj rangon, sed ne deziras monon, aŭ ke oni ŝatas belecon, sed malŝatas la belulinon Xi Shi.

古之人为之不然。以人之情为欲多而不欲寡，故赏以富厚而罚以杀损也，是百王之所同也。

Antikvuloj supozis ne tiel. Supozante, ke homa sento deziras multon kaj ne deziras malmulton, ili laŭdis per granda riĉo kaj punis per mortigo-vundado. Tio estas sama ĉe cent reĝoj.

故上贤禄天下，次贤禄一国，下贤禄田邑，愿恚之民完衣食。

Do, la plej elstara saĝo estis rekompencata per posedo de la mondo, la sekva saĝo – per posedo de unu regno, la tria saĝo – per posedo de vilaĝo-provinco, la honesta popolo estis kompencata per plene da vestaĵoj kaj manĝaĵoj.

今子宋子以是之情为欲而不欲多也，然则先王以人之所不欲者赏，而以人之所欲者罚邪？乱莫大焉。

Nun la Majstro Song-zi konsideras, ke, kvankam sento deziras, tamen ne deziras multe. Se tiel, ĉu antikvaj reĝoj laŭdis per la nedezirata premio kaj punis per la dezirata? Kia granda konfuzo! ¹⁷⁰

今子宋子严然而好说，聚人徒，立师学，成文曲，然而说不免于以至治为至乱也，岂不过甚矣哉！”

Nun la Majstro Song-zi tenas sin rigore kaj ŝatas paroli, kolektas amason da lernantoj, starigas sciencon gvidanta, kompilas literaturon tordita, sed al li ne eviteblas la pleja malordigo spite la intencon de la pleja ordigo. Ĉu tio ne estas ja grandega eraro?

¹⁷⁰ Bedaŭrinde verko de Song-zi ne restas ĝis nun. Iuj konsideras lin mohisto. Mi supozas, ke lia pensmaniero similas al rusa Tolstojismo – je la senperforto kaj malavareco.

19 礼论

DISKURSO PRI DECREGULOJ

礼起于何也？曰：人生而有欲，欲而不得，则不能无求；求而无度量分界，则不能不争；争则乱，乱则穷。

De kio devenas la decreguloj? Estas dirite, ke homoj denaske havas deziron-avidon, kvankam la deziro estas ofte neatingebla aŭ satigebla, tamen ili ne povas ne postuladi la deziratan, al la postulado estas ne mezurebla la limo, do ili ne povas ne bataladi; se batalas – malordiĝas, la malordo kondukas al mizero.

先王恶其乱也，故制礼义以分之，以养人之欲，给人之求，使必不穷乎物，物必不屈于欲，两者相持而长，是礼之所起也。

Antaŭaj reĝoj malamis la malordon, do establis laŭjustajn decregulojn kaj dividis klasojn, per tio lasis al ĉiu homo nutri la propran deziron, donis al ĉiu homo serĉadi la deziratan, por ke homoj nepre ne mizeru je aĵoj kaj la aĵoj nepre ne distordu homojn per la deziro, por ke aĵoj kaj deziro, ambaŭ kresku prosperi, reciproke subtenante unu la alian. Jen la komenco de decreguloj.

故礼者，养也。刍豢稻粱，五味调香，所以养口也；椒兰芬苾，所以养鼻也；雕琢，刻镂，黼黻，文章，所以养目也；钟鼓，管磬，琴瑟，笙簧，所以养耳也；疏房，檟豸，越席，床第，几筵，所以养体也。故礼者，养也。

Decreguloj estas ja kio nutras. Viandoj de breditaj bestoj, rizo kaj milio, kvin bongustoj kaj diversaj spicoj – nutras buŝon. Pipro, orkido, aromo kaj parfumo – nutras nazon. Inkrustaĵoj, insignoj, skulptaĵoj, gravuraĵoj, desegnaĵoj – nutras okulojn. Sonoriloj, tamburoj, blov- kaj perkut-instrumentoj, citroj, liutoj, tub-orgenoj – nutras orelojn. Aerlasiva ĉambro, klimatizita palaco, sidejo kovrita per tifao-mato, planko kovrita per hurdo, pajlmato – nutras la korpon. Do, decreguloj estas la nutrado.

君子既得其养，又好其别。曷谓别？曰：贵贱有等，长幼有差，贫富轻重皆有称者也。

Nobluloj jam posedas tion, kio nutras, kaj ŝatas apartigi tion. Kial apartigi? – mi diras, – Ĉar estas klasoj de nobeloj kaj malnobeloj, estas diferenco inter la pliĝa kaj la malpliĝa, estas propra loko ĉe ĉiuj: la povraj kaj la riĉaj, la malpezaj kaj la pezaj.

故天子大路越席，所以养体也；侧载翠芷，所以养鼻也；前有错衡，所以养目也；和鸾之声，步中《韶》《护》，所以养耳也；龙旗九旂，所以养信也；寝兕，持虎，蛟韞。丝末，弥龙，所以养威也；故大路之马必倍至教顺，然后乘之，所以养安也。

Do kiam la Ĉiela Filo veturas laŭ granda strato per kaleŝego, la sidejo estas kovrita per tifao-mato por nutri la korpon, kun ornamita apude bonodora aroma herbo por nutri la

nazon, kun fronta jungstango bele gravurita por nutri la okulojn, kaj por nutri la orelojn kun belsonaj tintiloj, sonorantaj konforme al rapideco – lante je melodio de *Wu* kaj *Xiang*, rapide je melodio de *Shao* kaj *Hu* ¹⁷¹–, por nutri la memfidon sub drakona standardo kaj rubando el naŭ bantoj, kaj aliaj ornamoj por nutri la majestecon, kiel bildoj de kuŝanta rinocero kaj kaŭranta tigro, ĉevalaj zonegoj, silka kovraĵo, apogseĝoj. Estas alligitaj al la kaleŝo nur ĉevaloj, nepre bone dresitaj en maneĝo, por nutri la pacan komforton.

孰知夫出死要节之所以养生也？孰知夫出费用之所以养财也？孰知夫恭敬辞让之所以养安也？孰知夫礼义文理之所以养情也？

Sciu, ke fari tutforte kaj morti kun prudento estas la nutrado de la vivo. Sciu, ke malavare elspezi estas la nutrado de riĉaĵoj. Sciu, ke ĝentileco, respekto, humiliĝo kaj cedo estas la nutrado de paca komforto. Sciu, ke laŭjusta decregularo kaj kohereco estas la nutrado de sentoj.

故人苟生之为见，若者必死；苟利为之见，若者必害；苟怠惰偷懦之为安，若者必危；苟情说之为乐，若者必灭。

Do, kiu nur alteniĝas fikse al sia vivo, tiu nepre mortas; kiu nur alteniĝas fikse al sia profito, tiu nepre perdas; kiu pigre-timeme alteniĝas al sia paca komforto, tiu nepre falas en danĝeron; kiu serĉas ĝuon nur je sia senta plezuro, tiu nepre pereas.

故人一之于礼义，则两得之矣；一之于情性，则两丧之矣。

Sekve, se iu koncentras sian koron sur laŭjusta decregularo, li gajnas ambaŭflanke; se enfokusiĝas sur denaska sento, li perdas ambaŭ.

故儒者将使人两得之者也，墨者将使人两丧之者也，是儒，墨之分也。

Do, konfuceanoj lasas al homoj gajni ambaŭflanke, sed mohistoj lasas al homoj perdi ambaŭ. Jen la diferenco inter la konfuceanismo kaj la mohismo.¹⁷²

礼有三本：天地者，生之本也；先祖者，类之本也；君师者，治之本也。

Je decregularo estas tri fontoj: La Ĉielo kaj la Tero estas fonto de vivo, la prapatroj estas fonto de parenca klasifiko, la reĝoj-gvidantoj estas fonto de orda regado.

无天地恶生？无先祖恶出？无君师恶治？三者偏亡焉，无安人。

Ĉu io viva naskiĝus sen la Ĉielo kaj la tero? Ĉu io devenus sen prapatroj? Ĉu io estus regata bonorde sen reĝoj-gvidantoj? Se mankus unu el la triopo, neniu paco eblus por homoj.

¹⁷¹ Wu, Xiang estas muziko de la reĝo Wu 武王. Shao, Hu estas muziko de la reĝo Tang 汤王.

¹⁷² 两 ambaŭ signifas ĝuon de sentoj kaj ĝuon de racio. En *Shiji* 史记 de Sima Qian troviĝas la sama esprimo.

故礼上事天，下事地，尊先祖而降君师，是礼之三本也。

Do decregularo estas supre servi al la Ĉielo, sube servi al la tero, respekti prapatrojn kaj estimi reĝojn-gvidantojn – ĉar tiuj tri fontoj konsistigas la decregularon.

故王者天太祖，诸侯不敢坏，大夫士有常宗，所以别贵始。贵始，得之本也。

Do reĝo konsideras la Ĉielon sia praulo, landestroj ne aŭdacas defekti la kredon, grandoficistoj kaj kavalerioj havas ĉiam siajn praularojn, tiel apartigas la komencon kara. Kara estas la komenco, kiu estas la fonto de akirado.

郊止乎天子，而社止于诸侯，道及士大夫，所以别尊者事尊，卑者事卑，宜大者巨，宜小者小也。

La feston al la Ĉielo prezidas la Filo de la Ĉielo, la feston al landa sanktejo – la landestroj, ofer-feston al prauloj – kavalerioj kaj grandoficistoj.¹⁷³ Tiel ĉiuj apartigas sian respekt-objekton per sia oferservado laŭ si mem, simplulo servas simple, grandulo servas grande, malgrandulo servas malgrande.

故有天下者事十世，有一国者事五世，有五乘之地者事三世，有三乘之地者事二世，持手而食者不得立宗庙，所以别积厚，积厚者流泽广，积薄者流泽狭也。

Reganto de la mondo servas al prapatra maŭzoleo de dek generacioj, reganto de unu lando servas al maŭzoleo de kvin generacioj, posedanto de la tero je kvin *chengoj* servas al maŭzoleo de tri generacioj, posedanto de la tero je tri *chengoj* servas al maŭzoleo de du generacioj, vivtenantoj per siaj manoj ne povas starigi prapatran maŭzoleon, do estas apartigite laŭ merito – kies merito estas ju pli amasa, ties legaca influo al posteuloj estas des pli granda, ju malpli multa, des malpli vasta.¹⁷⁴

大飨，尚玄尊，俎生鱼，先大羹，贵食饮之本也。

Ĉe la granda konsekro al reĝaj prauloj estas oferataj la valoraj bazaj manĝaĵo kaj trinkaĵo, kiel fajna spiriteca barelo, surplata kruda fiŝo, granda brogaĵo.¹⁷⁵

飨，尚玄尊而用酒醴，先黍稷而饭稻粱。

Ĉe la sezona konsekro estas oferataj la fajna spiriteca barelo da vino, milioj, cerealoj kaj vaporita rizo kaj sorgo.

祭，齐大羹而饱庶羞，贵本而亲用也。

Ĉe la monata festo estas oferataj la granda brogaĵo kaj pletoj plenaj de diversaj simplaj manĝaĵoj por valora fonto kaj por gustumado.

¹⁷³ 郊 La Ĉiela filo faris oferservon suburbe. Laŭ Shirakaŭa 道 signifas porti la kapon de mortinto, mi konjektas, ke eble el tio povus deveni ankaŭ la signifo de oferservo al mortintaj prauloj.[白川静、字統] Liu Shipei prenas ĝin por 禫 dan, festo de fino je tri-jara devo de funebro. Notinde, ke ĉi tie estas uzata la termino “别 apartigo”, grava koncepto por distingi-dividi valoron de personeco laŭ la deveno, laŭ maniero de oferservado al prauloj.

¹⁷⁴ Tero je 10 *lioj* kvadrato egalas al 1 *cheng* (成, 乘).

¹⁷⁵ 玄 signifas nigran koloron kaj simbolon de mistereco.

贵本之谓文，亲用之谓理，两者合而成文，以归大一，夫是之谓大隆。

Valora fonto estas nomata la formo, kaj la gustumado estas nomata la rezono, kaj ambaŭ kune konsistigas la kulturon, kondukantan al la granda unueco. tiu procedo estas nomata la Granda Dec-Rito.

故尊之尚玄酒也，俎之尚生鱼也，俎之先大羹也，一也。

Do ke barelo da fajna spirita vino, pleto kun kruda fiŝo, granda brogaĵo – estas la unuopo.

利爵之不醮也，成事之不俎不尝也，三臭之不食也，一也。

Ke rolulo de medio ne eltrinkas, plenumanto de aferoj je plorkriado ne gustumas, tri manĝigistoj ne manĝas – estas la unuopo.

大昏之未发齐也，太庙之未入尸也，始卒之未小敛也，一也。

Rito de granda dormo antaŭ la forsendado, rito antaŭ la enirado de mortinto en grandan maŭzoleon, rito por vestigi mortinton per mortokostumo – estas la unuopo.¹⁷⁶

大路之素未集也，郊之麻纁也，丧服之先散麻也，一也。

Kaleŝego kovrita per silko, kanaba krono ĉe la suburba festo, funebra kostumo kun loza kanaba zono – estas la unuopo

三年之丧，哭之不文也，《清庙》之歌，一倡而三叹也，县一钟，尚拊之膈，朱弦而通越也，一也。

Tri-jara funebro, la plorkriado senafekta, la kanto de “Qing Miao” por purigo de templo, unu kantado kun tri suspiroj, unu sonorileto, kastanjeto, kord-muzikilo en detenata tono – estas la unuopo.

凡礼，始乎悦，成乎文，终乎悦校。

Ĝenerale decregularo estas kruda kvazaŭ ŝtupo en la komenco, kulturata poste je la formo, kaj atingas ĝojigan fajnecon en la fino.

故至备，情文俱尽；其次，情文代胜；其下，复情以归大一也。

Do en la plej prepara fazo ambaŭ sento kaj formo kunas elĉerpate; en la sekva fazo sento kaj formo alterne superadas unu sur la alia; en la suba fazo la sento denove revenas al la Granda unueco.¹⁷⁷

天地以合，日月以明，四时以序，星辰以行，江河以流，万物以昌。好恶以节，喜怒以当，以为下则顺，以为上则明，万物变而不乱，贰之则丧也。

Per tiu procezo de decregularo la Ĉielo kaj la tero harmonias, la suno kaj la luno per tio lumas, kvar sezonoj per tio alternas laŭvice, stelaro per tio rotacias, riveroj per tio fluas,

¹⁷⁶ 昏 Ĉiuj prenas la ideogramon por nupto 婚, sed mi provas traduki laŭlitere kiel 冥.

¹⁷⁷ Antimonias sento kaj formo (decregularo) kaj la sento denove atingas la pli altan dimension, reveninte al la unueco de kontrastoj. Videblas iuspeca dialektiko de Xunzi. Ankaŭ vidu rimarkon 178.

miriado da aĵoj per tio prosperas. Ŝato kaj malŝato per tio dispozicias laŭmezure, ĝojo kaj kolero per tio dispozicias modere. Per tio la subo fariĝas disciplinite obeema, per tio la supro fariĝas klera, tiel do miriado da aĵoj, ŝanĝigante, ne malordas, kaj ili tuj perdiĝus, se kontraŭus al la decregularo.

礼岂不至矣哉！立隆以为极，而天下莫之能损益也。

Kiel gravega estas la decregularo! Establi ĝin estas plej grave. Neniom en la mondo oni povas al ĝi adicii aŭ subtrahi el ĝi.

本末相顺，终始相应，至文以有别，至察以有说。

Ĉe ĝi fonto kaj ekstremo akordas inter si reciproke, fino kaj komenco konformas inter si reciproke. Dank' al ĝi, formo estas kvankam plej plena, tamen kun apartigo, dogmo estas kvankam pleja, tamen kun diskursoj.

天下从之者治，不从者乱；从之者安，不从者危；从之者存，不从者亡。小人不能测也。

La mondo, sekvante ĝin, estas bone regata; ne sekvante, malordiĝas. Kiu sekvas ĝin, tiu vivas en paco; kiu ne sekvas, tiu falas en danĝeron. Kiu sekvas ĝin, tiu ekzistas; kiu ne sekvas, tiu pereas. Al malgranduloj ne eblas kompreni tion.

礼之理诚深矣，“坚白”“同异”之察入焉而溺；其理诚大矣，擅作典制辟陋之说入焉而丧；其理诚高矣，暴慢，恣睢，轻俗以为高之属入焉而队。

Decregulara principo estas vere tiel profunda, ke la dogmaro pri “dureco-blankeco” aŭ “sameco-malsameco”, male, tuj mergiĝas antaŭ ĝi. Ĝia principo estas vere tiel grandega, ke doktrinoj, kiel lerte faritaj fi-leĝaro, fi-ritaro kaj fi-precedencaro, tuj perdiĝas antaŭ ĝi. Ĝia principo estas vere tiel alta, ke fanfaronoj, kiel arogantaj, arbitraj, facilanimaj, vulgaraj, tuj frakasite kraŝas antaŭ ĝi.

故绳墨诚陈矣，则不可欺以曲直；衡诚县矣，则不可欺以轻重；规矩诚设矣，则不可欺以方圆；君子审于礼，则不可欺以诈伪。

Se tuĉsnura nezurilo estas foje aplikita, tiam oni ne povas trompi linion, ĉu rektan aŭ kurban. Se pesilo estas foje aplikita, tiam oni ne povas trompi pezon, ĉu pezan aŭ malpezan. Se cirkelo kaj ortilo estas aplikitaj, tiam oni ne povas trompi figuron, ĉu cirklan aŭ rektangulan. Se noblulo juĝas ion laŭ decregularo, tiam oni ne povas trompi lin per fraŭdo.

故绳者，直之至；衡者，平之至；规矩者，方圆之至；礼者，人道之极也。

Tuĉsnuro estas la pleja kriterio de rekteco, pesilo estas la pleja pezmezurilo laŭ vertikaleco, cirkelo kaj ortilo estas la precizaj mezuriloj de ortangulo kaj cirklo. Tiel same, la decregularo estas la pleja kriterio de homeca vojo.

然而不法礼，不足礼，谓之无方之民；法礼足礼，谓之有方之士。

Tial do, al kiu mankas normo de decregularo nek sufiĉas decregularo, tiun oni nomas sendisciplina popolo. Kiu estas ekipita per normo de decregularo kaj kontenta je la

decregularo, tiu estas nomata la personeco kun disciplino.

礼之中焉能思索，谓之能虑；礼之中焉能勿易，谓之能固。

Kapablo pensadi surbaze de la decregularo estas nomata la prudento, kapablo je neŝancebleco surbaze de la decregularo estas nomata la solideco.

能虑能固，加好者焉，斯圣人矣。

Kapablo esti prudenta kaj solida, aldonite al bona personeco, kreas la sanktulon.

故天者，高之极也；地者，下之极也；无穷者广之极也；圣人者，道之极也。

La Ĉielo estas la plej alta, la tero sube estas la plej profunda. La senlima estas la plej vasta, la sanktulo estas la pleja je la vojo.

故学者固学为圣人也，非特学为无方之民也。

Kiu lernas, tiu solide devas lerni por fariĝi sanktulo, nepre ne por fariĝi sendisciplina popolo.

礼者，以财物为用，以贵贱为文，以多少为异，以隆杀为要。

La decregularo estas ilo por utiligi riĉaĵon kaj valoron, por distingi ornamon de la nobla kaj la malnobla, por diferencigi multon kaj malmulton, por fari pliigon aŭ malpliigon je asignado al ĉiu necesa.

文理繁，情用省，是礼之隆也；文理省，情用繁，是礼之杀也；文理，情用相为内外表里，并行而杂，是礼之中流也。

Pliigi laŭforman rezonon kaj malpliigi laŭsentan praktikadon estas vigligo de la decregularo, malpliigi laŭforman rezonon kaj pliigi laŭsentan praktikadon estas mortigo de la decregularo. Ke laŭforma rezono kaj laŭsenta praktikado estu farataj unu kun la alia interne kaj ekstere, paralele kaj intermikse, tio estas ja la meza fluo de la decregularo.¹⁷⁸

故君子上致其隆，下尽其杀，而中处其中。

Do noblulo tenas sin meza en la mezo inter la ekstrema vigligo supre kaj la ekstrema mortigo sube.

步骤，驰骋，厉鹜不外是矣，是君子之坛宇，宫廷也。

Li ne devias de tio dum piedirado, kurado aŭ trotado, ĉar tio estas por nobluloj la estrado kaj korteza scenejo.

人有是，士君子也；外是，民也；于是其中焉，方皇周狭，曲得其次序，是圣人也。

Kiu havigis al si tion, estas kavaliro kaj noblulo; kiu estas fremda al tio, estas popolo. Sanktulo estas tiu, kiu, prenante la mezan vojon, vicigas en ordo ajnan devojiĝon, eksceson, flankeniĝon kaj kurbiĝon.

故厚者，礼之积也；大者，礼之广也；高者，礼之隆也；明者，礼之尽也。

¹⁷⁸ Xunzi asertas ĉi tie, ke ĉiu objekto aŭ nocio enhavas samtempe kontrastojn kaj antimoniojn. La decregularo ankaŭ obeas konstantan transformiĝon 隆杀.

Do indulgema estas tiu, kiu akumulas en si la decregularon; granda estas tiu, kiu estas vasta je la decregularo; alta estas tiu, kiu prosperigas la decregularon; klera estas tiu, kiu havigis al si la decregularon plene.

《诗》曰：“礼仪卒度，笑语卒获。”此之谓也。

En *Poezio* estas dirite: “Se konforme al la decregularo, ankaŭ ridado kaj parolado iĝas laŭmezuraj.” Tio signifas la supre menciitan.¹⁷⁹

礼者，谨于治生死者也。生，人之始也；死，人之终也。

Laŭ decregularo estas farata la prudenta rito rilate al naskiĝo kaj morto. La naskiĝo estas la komenco de homo, la morto estas fino de homo.

终始俱善，人道毕矣。故君子敬始而慎终。

Se la fino kaj la komenco ambaŭ bonas, tiam la homo vojo estas kompleta. Do nobululoj tenas sin respektplena je la komenco kaj skrupula je la fino.

终始如一，是君子之道，礼义之文也。

Unuigi la finon kaj la komencon estas la vojo de nobluo kaj la formo de laŭjusta decregularo.

夫厚其生而薄其死，是敬其有知而慢其无知也，是奸人之道而倍叛之心也。君子以倍叛之心接臧穀，犹且羞之，而况以事其所隆亲乎！

Se estimi la vivon grava kaj la morton malgrava, tio signifas nur respekti la kogneblan kaj neglekti la nekogneblan. Tio estas la vojo de kanajlo kaj la koro de perfidulo. Nobluloj hontas je la perfidemo eĉ por la traktado de sklavo kaj infanoj, des pli por la rilato al respektendaj parencoj!

故死之为道也，一而不可得再复也，臣之所以致重其君，子之所以致重其亲，于是尽矣。

Se temas pri la vojo de la morto, unufoja kaj nerepetebla, la subuloj-vasaloj devas ekstreme respektigi sian estron, gefiloj – siajn gepatrojn, jen en kio kuŝas ĉio.

故事生不忠厚，不敬文谓之野，送死不忠厚，不敬文谓之瘠。

Servi al la vivanto sen lojalplene estas ne respekti la formon, t. n. estas sovaĝe; sendi mortinton sen lojalplene estas ne respekti formon, t. n. estas magre.

君子贱野而羞瘠，故天子棺槨十重，诸侯五重，大夫三重，士再重，然后皆有衣衾多少厚薄之数，皆有斐斐文章之等以敬饰之，使生死终始若一，一足以为人愿，是先王之道，忠臣孝子之极也。

Nobluloj malestimas la sovaĝecon kaj hontas je la magrecon, do la ĉerko, interna kaj ekstera, por la Ĉiela Filo konsistas el dek tavoloj, por la landestroj – el kvin, por la grandoficistoj – el tri, por kavaliroj-oficistoj – el du, aldone ĉiuj pli dense-malpli dense kun pli-malpli da vestaĵoj kaj kusenoj, ĉiuj kun laŭrangaj emblemoj kaj desegnoj por

¹⁷⁹ Citaĵo el *诗经*, *小雅*, *楚茨*.

ornami respektplene, kvazaŭ oni faru unueca la vivon-morton, la komencon-finon, por plenumi la homan esperon al la unueco. Tio estas la vojo de antaŭaj reĝoj kaj la plenumo de devo far lojalaj vasaloj kaj fidelaj filoj.

天子之丧动四海，属诸侯；诸侯之丧动通国，属大夫；大夫之丧动一国，属修士；修士之丧动一乡，属朋友；庶人之丧合族党，动州里。

La funebro de la Ĉiela Filo estas informata al kvar maroj, kaj venigas landestrojn; la funebro de landestro estas informata al landoj, kaj venigas grandoficistojn; la funebro de grandoficisto estas informata al la tuta lando, kaj venigas kavalirojn kaj oficistojn; la funebro de kavaliro aŭ oficisto estas informata al la provinco, kaj venigas amikojn; la funebro de simpla popolano estas informita al la distrikto kaj la vilaĝo, kaj kunvokas la familianojn kaj parencojn.

刑餘罪人之喪不得合族黨，獨屬妻子，棺槨三寸，衣衾三領，不得飾棺，不得昼行，以昏殮，凡緣而往埋之，反無哭泣之節，無衰麻之服，無親疏月數之等，各反其平，各復其始，已葬埋，若無喪者而止，夫是之謂至辱。

Al la funebro de punitoj, kondamnitaj kaj krimuloj ne devas esti kunvokataj la familianoj kaj parencoj krom nur edzino kaj gefiloj, do ĉerko, interna kaj ekstera, estas dika je tri *cunoj*, kun triopo de vestaĵoj kaj kusenoj, ne devas esti ornamita kaj je la funebro devas esti farate ne tage, sed enterigite en krepusko, vestite per ordinara vestaĵo. Reveninte, postlasitoj ne povas plorkriadi je la mortinto, ne povas vesti sin per ĉifona vestaĵo el kanabo en ajna dumfunebra monato, ĉu longa aŭ mallonga. Ili devas reveni al sia ordinareco por denove komenci rutinan vivon, nur ol se enteriginte la mortinton, kvazaŭ oni devus fari neniun funebradon plu. Tio estas ja nomata la plej hontinda.¹⁸⁰

礼者，谨于吉凶不相厌者也。

La decregularo estas skrupula, ke ne koliziu reciproke en la rito ajna aŭgurado, ĉu bona aŭ malbona.

絀紼听息之时，则夫忠臣孝子亦知其闵已，然而殓之具未有求也；垂涕恐惧，然而幸生之心未已，持生之事未辍也；卒矣，然后作具之。

Dum lojala subulo aŭ fidela filo ne sciiĝas pri la stato de mortanto, ekzamenante la spiron per gazo, ili ne ekserĉas pretigi ilojn por la enterigo. Ili, larmante kaj timante, ne ĉesas esperi la reviviĝon en sia koro, ankoraŭ ne rezignas daŭrigi la vivon. Apenaŭ konstatinte la morton, ili ekfaras ilojn.

故虽备家，必踰日然后能殓，三日而成服，然后告远者出矣，备物者作矣。

Eĉ ĉe la bone preparita domo nepre necesas du tagoj por la enĉerkigo, tri tagoj por pretigi vestaĵon, kaj poste oni alvokas fore-loĝantojn veni, kaj povas fari aĵojn pretaj.

¹⁸⁰ Ĉi tie Xunzi kritikis la malluksan funebradon, subtenatan de mohistoj.

故殡，久不过七十日，速不损五十日。是何也？

Tiel do por la plena enĉerkigo necesas malpli ol 70 tagoj, almenaŭ pli ol 50 tagoj. Kial?

曰：远者可以至矣，百求可以得矣，百事可以成矣，其忠至矣，其节大矣，其文备矣。

Estas dirite: ĉar ĝis tiam povu alveni fore-loĝantoj, povu esti akiritaj cent necesajoj, povu esti plenumitaj cent aferoj, povu esti pleje prezentata la lojaleco, estu granda la soleno, estu preta la formo.

然后月朝卜日，月夕卜宅然后葬也。

Kaj poste por la enterigo oni aŭguras ĉe lun-mateno la daton, ĉe lun-vespero la lokon, kaj finenterigas.¹⁸¹

当是时也，其义止，谁得行之？其义行，谁得止之？

Koncernante la tempon, kiu povus promocii ĝin, se la rito estus haltigenda laŭ aŭgura justo; kiu povus ĉesigi, se la rito farenda laŭ aŭgura justo.

故三月之葬，其豸页以生设饰死者也，殆非直留死者以安生也，是致隆思慕之义也。

Tiu enteriga procedo dum tri monatoj estas por ornami fizionomion de la mortinto kvazaŭ vivanta, sed ne por kontentigi vivantojn per la retenado de mortinto. Tio estas ja la plej justa rito por sopiri al la mortinto.

丧礼之凡：变而饰，动而远，久而平。

Ĝenerala procedo de funebra rito estas jena. Kun ŝanĝigo oni ornamas, kun transigo oni distancas, kun tempa trapaso oni revenas al rutino.

故死之为道也，不饰则恶，恶则不哀，尔则玩，玩则厌，厌则忘，忘则不敬。

Sur la vojo je la sendado de mortinto, sen ornamento iĝas hide; se hida ne eblus kondolenci; estante proksima al la korpo, oni perdas streĉon, sen streĉo oni ekenuas, kun enuo oni forgesas, kun forgeso oni malrespektas.

一朝而丧其严亲，而所以送葬之者不哀不敬，则嫌于禽兽矣，君子耻之。

Iun tagon enterigante la respektendan patron, se la ĉeffunebranto ne esprimus la kondolencon nek respekton, tiu vokas abomenon kiel bestaĉo. Tion hontas la noblulo.

故变而饰，所以灭恶也；动而远，所以遂敬也；久而平，所以优生也。

Tial do kun la ŝanĝigo oni ornamas por estingi hidon, kun la transigo oni tenas sin fora je distanco, kun tempa trapaso oni revenas al ordinara rutino por vivi plu laŭ bontrovo.

礼者，断长续短，损有馀，益不足，达爱敬之文，而滋成行义之美者也。

La decregularo kompletigas, tondi la tro longan, daŭrigi la tro kurtan, redukti la superfluan, ŝtopi la deficiton, per tio atingas la formon de amrespekto, kaj sufiĉe plenumas la kondutan juston kaj belecon.

¹⁸¹ Iuj konjektas, ke la lun-mateno estas komenco de monato kaj lun-vespero estas fino de monato. Sed estas ne sciate, kion ili vere signifas.

故文饰，粗恶，声乐，哭泣，恬愉，忧戚，是反也，然而礼兼而用之，时举而代御。

Ornamita formo kaj malbeleco, muziko kaj plorkrio, ĝojo kaj malĝojo prezentas sin kiel kontrasto, sed ĉe la rito laŭ la decregularo ili ĉiuj estas praktikataj alterne konforme al la tempo.

故文饰，声乐，恬愉，所以持平奉吉也；粗衰，哭泣，忧戚，所以持险奉凶也。

La ornamita formo, la muziko, la ĝojo estas oferataj por bonaŭguro en paco; la malbeleco, la plorkrio, la malĝojo estas oferataj por malbonaŭguro en danĝero.

故其立文饰也，不至于窳冶；其立粗衰也，不至于瘠弃；其立声乐恬愉也，不至于流淫惰慢；其立哭泣哀戚也，不至于隘摄伤生，是礼之中流也。

La ornamado de formo ne falas en troan afekton, la kruda malbeligado ne falas en troan magron, la muziko, prezentante la ĝojon kaj la plezuron, ne falas en troan volupton aŭ demoralizon, kaj la plorkriado por esprimo de tristeco ne falas en troan mornon aŭ deprimitecon, ĉar la decregularo tenas la mezon-modercon la rita principo..

故情貌之变足以别吉凶，明贵贱亲疏之节，期止矣；外是，奸也，虽难，君子贱之。

Rilate al la ŝanĝiĝo de sento kaj mieno, sufiĉas, se per tio eblas klare apartigi bonaŭguron kaj malbonaŭguron, klare distingi nobelecon- malnoblecon, proksimecon- malproksimecon. Krom tio, malbonas io ajn, kiom asketa ĝi ŝajnus, noblulo malestimas ĝin.

故量食而食之，量要而带之，相高以毁瘠，是奸人之道也，非礼义之文也，非孝子之情也，将以有为者也。

Do manĝi, mezurante kvanton de manĝaĵo, nodi zonon, mezurante la talion, aŭ montri la malgrasiĝon – tia pozo de asketo estas ja la vojo de friponoj, sed ne la formo de laŭjusta desregularo, nek la sento de fidela filo. Tio estas ja la hipokrita afektado.

故说豫婉泽，忧戚萃恶，是吉凶忧愉之情发于颜色者也。

Sur la mieno nature aperas la ĝoja-malĝoja dispozicio laŭ bon- kaj malbon-aŭguro, t. e. per plezuro kun ĉarma rideto, aŭ malĝojo kun malgrasa malbeleco.

歌谣讖笑，哭泣啼号，是吉凶忧愉之情发于声音者也。

Sur la voĉo kaj la sono nature aperas la ĝoja-malĝoja dispozicio laŭ bon- kaj malbon-aŭguro, t. e. per kantoj, ridoj, ploroj kaj krioj.

刍豢，稻粱，酒醴，[食衍]鬻，鱼肉，菽藿，酒浆，是吉凶忧愉之情发于食饮者也。

Ĉe la manĝado kaj la trinkado nature aperas la ĝoja-malĝoja dispozicio laŭ bon- kaj malbon- aŭguro, t. e. per viandoj, grenoj, vinoj, spiritoj, kaĉoj, fiŝoj, faboj, vinsukoj.

卑纒，黼黻，文织，资粗，衰经，非纒，菅屨，是吉凶忧愉之情发于衣服者也。

Sur vestaĵoj nature aperas la ĝoja-malĝoja dispozicio laŭ bon- kaj malbon- aŭguro, t. e. per ĉapoj-kronoj, vestaĵoj kun blank-blauaj strioj, vestaĵoj kun desegnitaj brodaĵoj, krudaj

vestaĵoj, roboj el kanabo, humilaj vestaĵoj, pajlŝuoj.

疏房, [木遂][豸页], 越席, 床第, 几筵, 属茨, 倚庐, 席薪, 枕块, 是吉凶忧愉之情发于居处者也。

En la loĝejo nature aperas la ĝoja-malĝoja dispozicio laŭ bon- kaj malbon- aŭguro, t. e. per malplena ĉambro, izolita ĉambro, tifaomato, lito, bambua tapiŝo, baldakeno el miskanto, provizora kabano, kuseno el karekso, kapkuseno el terbulo.

两情者, 人生固有端焉。

Ambaŭ sentoj de ĝojo-malĝojo estas denaske propraj al homo.

若夫断之继之, 博之浅之, 益之损之, 类之尽之, 盛之美之, 使本末终始莫不顺比, 足以以为万世则, 则是礼也。

Se iu, povante ilin tranĉi aŭ daŭrigi, vastigi aŭ malvastigi, aldoni aŭ subtrahi, klasifiki aŭ plenigi, abundigi aŭ beligi, tiel povos bonproporcie akordigi radikon kun branĉon, finon kun komencon kaj fari tion la eterna normo por ĉiuj generacioj – tiam tio iĝos ja la decregularo.

非顺孰修为之君子, 莫之能知也。

Povas scii tion nur noblulo, kulturanta sindone kaj discipline.

故曰: 性者, 本始材朴也; 伪者, 文理隆盛也。

Do mi diras: Denaska naturo estas nur simpla materialo je la radiko kaj la komenco, do per artefarata penego, laŭ forme kaj racie kreskas kaj prosperas.

无性则伪之无所加, 无伪则性不能自美。

Sen la denaska naturo nenion povas fari la artefarata penego, sen la artefarata penego la denaska naturo ne povas fari sin bela.

性伪合, 然后圣人之名一, 天下之功于是就也。

Kiam la denaska naturo kaj la artefarata peno kuniĝas, estiĝas la nomo de sankta persono kaj kompletas la unuiĝo de monda merito.

故曰: 天地合而万物生, 阴阳接而变化起, 性伪合而天下治。

Do mi diras: Ĉio naskiĝas kaj vivas per akordiĝo de la Ĉielo kaj la Tero, ŝanĝiĝas per kontakto de *Ying* kaj *Yang*, la mondo estas en ordo, se la denaska naturo kun artefarado kuniĝas.

天能生物, 不能辨物也; 地能载人, 不能治人也; 宇中万物, 生人之属, 待圣人然后分也。

La Ĉielo povas naski la estaĵojn, sed ne povas dividi ilin, la Tero povas porti homojn, sed ne povas regi ilin. Ĉiuj estaĵoj ekzistas en la kosmo, al kiu apartenas ankaŭ vivantoj. Ili estas apartigitaj, dividitaj kaj distingitaj nur atendante la aperon de sanktulo.

《诗》曰: “怀柔百神, 及河乔岳。” 此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Li mildigas cent spiritojn, ankaŭ riverojn kaj montojn.” Tio

signifas la supre menciitan.¹⁸²

丧礼者，以生者饰死者也，大象其生以送其死也。

Ĉe funebro laŭ la decregularo, oni ornamas la mortinton kvazaŭ vivanta, kaj ŝajnigas sendi la mortinton kvazaŭ sendi la vivanton.

故如死如生，如亡如存，终始一也。

Tiel do la funebrato mortas samkiel vivas, perdiĝas samkiel ekzistas, ĉar la fino kaj la komenco unuiĝas.

始卒，沐浴，髻体，饭哈，象生执也。

Tuj, kiam li mortis, oni banas lin je haroj kaj korpo, aranĝas al li harfuton, donas al li manĝi, same kiel al vivanto.

不沐则濡帚三律而止，不浴则濡巾三式而止。

Okaze, kiam oni ne lavas al li harojn, nur kombas per malseka kombilo tri fojojn, kiam ne banas lin, nur viŝas per malseka tuko tri fojojn.

充耳设瑱，饭以生稻，哈以槁骨，反生术矣。

Oni ŝtopas al li orelojn per vatoj, donas al li manĝi krudan rizon kaj enmeti konkon en lian buŝon, kvankam alie ol la servado al vivanto.

说褻衣，袭三称，缙绅而无钩带矣。

Oni vestas lin per tolaĵo kaj vestaĵoj konsistantaj el triopo, zoninte kun sceptringo sed sen buko.

设掩面儼目，髻而不冠笄矣。

La vizaĝo kaj okuloj estas kovritaj per tuko, la kapo estas aranĝita kun hartufo sed nek krono nek harornamilo.

书其名，置于其重，则名不见而柩独明矣。

Oni enskribas la nomon de la mortinto en rubando, pendiĝonta sur la ligna tabuleto, ĉar okaze, kvankam nur la ĉerko kuŝas lumigita, sed ne videblas la nomo.

荐器则冠有鍪而毋紼，瓮庑虚而不实，有簟席而无床第，木器不成斫陶器不成物，薄器不成内，笙竿具而不和，琴瑟张而不均，輿藏而马反，告不用也。

Akcesora sepultaĵaro konsistas el ĉapo kun bando sed sen harkovrilo, kruĉoj malplenaj, mato plektita el bambuo sed sen divano, lignaj vazoj sen gravuraĵo, argilaĵoj sen entenaĵo, senenhavaj plektaĵoj, neagordigitaj orgeno kaj fluto, netemperitaj kord-instrumentoj, senĉevala ĉerkĉaro (la ĉevalo revenos post forportado de la ĉerko), – tio signifas, ke la iloj estas ne por praktika celo.

具生器以适墓，象徙道也。

Tiuj vivrimedaj iloj taŭgas por la tombo, nur por ŝajnigi la vojon translokiĝo.

¹⁸² Citaĵo el 诗经，周颂，时迈.

略而不尽，**豸页**而不功，趋舆而藏之，金革辔鞞而不入，明不用也。

Koncizigante, oni ne faras ĉion perfekta; arangânte ekstere, oni ne faras ĉion utila; entombigante ĉerkoĉaron, oni ne enmetas kune la metalaĵojn, ledaĵon, enbuŝaĵon, rimenon, – tio klarigas, ke ĉio ne estas por praktika uzado.

象徙道，又明不用也，是皆所以重哀也。

Ŝajnigante la vojon translokiĝo, oni ne faras ĉion por praktika uzado, ĉar ĉio estas por esprimi la profundan kondolencon.

故生器文而不功，明器**豸页**而不用。

Tial do vivrimedaj iloj havas nur formon sed ne por la uzado, klare montras, ke ili estas nur la formaĵo kaj ne uzebla en praktiko.

凡礼，事生，饰欢也；送死，饰哀也；祭祀，饰敬也；师旅，饰威也。

Ĝenerale la decregularo ornamas la ĝojon, servante al vivantoj, kaj ornamas malĝojon, servante al mortintoj. Funebra ceremonio estas ornamo por esprimi respekton, akompano ĝis enterigo estas ornamo je majesteco de mortinto.

是百王之所同，古今之所一也，未有知其所由来者也。

Tio estas sama, kiel ĉe cent reĝoj, restas unu sama de antikve ĝis nun, kvankam ne sciate, de kie devenis tio.

故圜墼，其**豸页**象室屋也；棺槨，其**豸页**象版盖斯象拂也；无帙丝髻缕髻，其**豸页**以象菲帷旒尉也。

Tombo estas ŝajnigita kiel domo, ĉerko estas ŝajnigita kiel ĉaro kun partoj – antaŭo, tegmento, ambaŭ flankoj, malantaŭo. Por dekoracio de ĉerko estas surmetitaj la silka kovrilo, plumornamo, kaj kurtenoj el herbo kaj pendantaj vualoj-puntoj.

抗折，其**豸页**以象幔茨番阙也。

Entombiga galerio ŝajnigas muron, tegmenton, heĝon kaj pordon.

故丧礼者，无它焉，明死生之义，送以哀敬而终周藏也。

Do funebra decregularo estas nenio alia ol klarigo de justo je la morto kaj la vivo, kiam oni sendas kun malĝojo kaj kun respekto kaj fine entombigas por konservi ĉion.

故葬埋，敬藏其形也；祭祀，敬事其神也；其铭，谏，系世，敬传其名也。

Tial do la funebra entombigo estas la respektplena konservado de la korpo, la funebra ceremonio estas la respektplena servado al dioj. Epitafo, laŭdado de aferoj, genealogio estas la respektplena transdonado de la nomo.

事生，饰始也；送死，饰终也。

La servado al vivanto estas la komenca ornamo, la sendado de mortinto estas la fina ornamo.

终始具而孝子之事毕，圣人之道备矣。

Ekipite ambaŭ kun la fino kaj la komenco, la afero de fidela filo estas efektivigita, kaj la

vojo de sanktulo estas pretigita.

刻死而附生谓之墨，刻生而附死谓之惑，杀生而送死谓之贼。

Kiu, subtrahante la morton, adicias la vivon, estas nomata mohisto; kiu, subtrahante la vivon, adicias la morton, estas nomata forloganto; kiu, mortiginte la vivanton, sendas mortinton, estas nomata kanajlo.¹⁸³

大象其生以送其死，使死生终始莫不称宜而好善，是礼义之法式也，儒者是矣。

Ŝajnigante, kvazaŭ sendi la mortinton kiel la vivanton, fari morton kaj vivon, finon kaj komencon, konvenega kaj bonega – estas la maniero de laŭjusta decregularo. Konfuceanoj prenas tion.

三年之丧何也？曰：称情而立文，因以饰群，别亲疏，贵贱之节，而不可益损也。

Kial devas esti la funebro dum tri jaroj? Mi diras: Mezurante senton, oni starigis la formon por ornami la gregan komunecon, apartigi proksimecon-malproksimecon je rilato, distingi limon inter nobelojn-malnobelojn, por ke estu neniom da pliaĵo-malpliaĵo. 故曰：无适不易之术也。

Do mi diras, ke tio estas la arto nmovebla kaj neŝanĝenda.

创巨者其日久，痛甚者其愈迟，三年之丧，称情而立文，所以为至痛极也。

Ju pli granda la vundo, des pli longa la periodo por resaniĝo, ju pli severa la doloro, des pli malfrua la konvalesko. Tri-jara funebro estas starigita formo laŭ mezuro de sento, por esprimi la plejan doloron.

齐衰，苴杖，居庐，食粥，席薪，枕块，所以为至痛饰也。

Funebranto vestas sin per kruda vestaĵo, iras subtenate per bastono, loĝas en kabanaĉo, manĝas kaĉon, sidas sur brulligno, metas la kapon sur terbula kapkuseno, tio estas por ornami la plej doloran senton.

三年之丧，二十五月而毕，哀痛未尽，思慕未忘，然而礼以是断之者，岂不以送死有已，复生有节也哉？

Trijara funebro finiĝas post 25 monatoj, malgraŭ ke malĝoja doloro ankoraŭ ne foriris kaj sopiro ankoraŭ ne estas forgesita, sed tamen la decregularo fortranĉas la funebro pro tio, ke devas esti la limdato por forsendi mortinton kaj la tempo por la vivanto reveni al la ordinara vivo.

凡生乎天地之间者，有血气之属必有知，有知之属莫不爱其类。

El ĉiuj vivantoj inter la ĉielo kaj la tero, estas iu speco kun sango kaj spiro *qi*, havanta scion. La speco, havanta scion, ne devas ne ami siajn samspeculojn.

¹⁸³ Ĉi tie estas dividite je tri ekstremaj manieroj de funebro: la unua konsideras la vivon de la vivantoj grava, la dua – la sendadon de mortinto grava, la tria igas vivantojn akompani la mortinton.

今夫大鸟兽则失其群匹，越月踰时则必反铅；过故乡，则必徘徊焉，鸣号焉，踟躅焉，踟躅焉，然后能去之也。

Se nun iu el grandaj birdoj aŭ bestoj perdiĝas el de siaj gregoj, ĝi nepre revenos laŭ vojo iam post monato aŭ sezono. Kiam ĝi pasigas la tempon en sia hejmo, ĝi nepre vagadas kaj kriadas, tretadas kaj hezitas, kaj poste ĝi povas apenaŭ foriri de tie.

小者是燕爵，犹有啁噍之顷焉，然后能去之。

Eĉ malgrandaj kiel hirundoj aŭ paseroj, nur post kiam ili ekkriĉas, ili povas foriri de sia hejmo.

故有血气之属莫知于人，故人之于其亲也，至死无穷。

El specoj kun sango kaj spiro neniu estas pli konscia ol homo, do homoj rilatas al siaj gepatroj surkoste de sia morto kaj senlime.

将由夫愚陋淫邪之人与？

Ĉu oni sekvas iun stultan, malĉastan kaj perversan？

则彼朝死而夕忘之，然而纵之，则是曾鸟兽之不若也，彼安能相与群居而无乱乎？

Se tiel, kiu mortis matene, tiu estas forgesita vespere. Kiu sekvus tian, tiu estas malpli ol birdoj kaj bestoj. Kiel do tiuj homoj povus komune vivi sen tumulto？

将由夫修饰之君子与？

Oni devas sekvi noblulon, etike kultivitan, ĉu ne？

则三年之丧，二十五月而毕，若驷之过隙，然而遂之，则是无穷也。

Tri jaroj de funebro, t. e. 25 monatoj pasas tre rapide, kvazaŭ momento, dum kvarĉevala ĉaro trakuras la fendon de muro. Sed se tio estus plenumata, senlime daŭrus la funebro. 故先王圣人安为之立中制节，一使足以成文理，则舍之矣。

Tial do antaŭaj reĝoj kaj sanktuloj firme starigis la mezon por reguli ceremonion kaj faris la formon kaj la principon sufiĉe perfekta. Do estas la limo por forlasi la ceremonion.

然则何以分之？曰：至亲以期断。

Kiel devas dividite je la daŭro de alies funebro？ Mi diras, ke oni finas je unu jaro por la plej proksima.

是何也？曰：天地则已易矣，四时则已遍矣，其在宇中者莫不更始矣，故先王案以此象之也。

Kial？ Mi diras： La Ĉielo kaj la Tero rotacias, kvar sezonoj alternas unu la alia, kaj ĉio en la universo ne devas ne renoviĝi kaj komenciĝi, do la antaŭaj reĝoj prezentis tiel laŭ tio. 然则三年何也？曰：加隆焉，案使倍之，故再期也。

Se tiel, kial do tri-jara？ Mi diras： Por ke oni aldonu la respekton per duobligo, do pli daŭrigas denove jaron.

由九月以下何也？曰：案使不及也。

Kial do estas ankaŭ funebro de naŭ monatoj aŭ malpli？ Mi diras： Ĉar ĝi devas esti

diferenca laŭgrade de interrilato.

故三年以为隆，纁，小功以为杀，期，九月以为间。

La tri-jara estas rigardata kiel kulmino de respekto; la tri-monata funebro, nomata Si, kaj la kvin-monata, nomata Xiao Gong, estas rigardataj kiel simpligitaj; la unu-jara kaj la naŭ-monata estas rigardataj kiel mezaj.

上取象于天，下取象于地，中取则于人，人所以群居和一之理尽矣。

En la funebro estas simboligita supre la Ĉielo, sube la tero, meze la homoj, por ke estu efektivigita la principo de komuna vivo de homoj en harmonio kaj en unueco.

故三年之丧，人道之至文者也，夫是之谓至隆，是百王之所同，古今之所一也。

Do la tri-jara funebro estas la kulmina formo de la homa vojo, t. n. la plej respektenda.

Tio estas la sama je cent reĝoj, estante unueca kaj antikve kaj nuntempe.

君之丧所以取三年，何也？曰：君者，治辨之主也，文理之原也，情貌之尽也，相率而致隆之，不亦可乎？

Kial necesas la tri-jara por la funebro de reĝo? Mi diras: Reĝo estas la estro por la regado kaj administrado, estas la fonto de la formo kaj la principo, estas la idealo de temperamento. Oni kunligite devas pleje respekti lin, ĉu ne?

《诗》曰：“恺悌君子，民之父母。”

Estas dirite en *Poezio*: “Afabla kaj simpatia reĝo estas gepatroj por la popolo.”¹⁸⁴

彼君子者，固为民父母之说焉。

Tio diras, ke reĝo estas certe gepatroj por la popolo.

父能生之，不能养之；母能食之，不能教诲之；君者，已能食之矣，又善教诲之者也，三年毕矣哉？

Patro povas naskigi, sed ne povas nutri filojn; patrino povas doni al ili manĝi, sed ne povas instrui-eduki ilin; reĝo povas doni al ili manĝi kaj bone instrui-eduki ilin. Ĉu li indas nur la tri-jaran funebro?

乳母，饮食之者也，而三月；慈母，衣被之者也，而九月；君，曲备之者也，三年毕乎哉？

Nutristino donas al ili manĝi, kaj ŝi meritas la tri-monatan funebro; bopatrino donas al ili vesti, kaj ŝi meritas la naŭ-monatan funebro; reĝo estas preta klopodi ĉion, ĉu li indas nur je la tri-jara funebro?

得之则治，失之则乱，文之至也；得之则安，失之则危，情之至也。

Havante reĝon, la mondo estas bone regata, se perdinte, malordas – do reĝo estas la pleja apogeo de formo. Havante paciĝas, malhavante falas en danĝeron – reĝo estas la pleja apogeo de sento.

两至者俱积焉，以三年事之犹未足也，直无由进之耳。

¹⁸⁴ Citaĵo el 诗经，大雅，洞酌.

Du plejoj estas kondensitaj en la reĝo, do estus ne sufiĉe funebri nur dum tri jaroj. Sed malgraŭ tio ĉi tio jam estas ne preferinde daŭre plu funebradi.

故社，祭社也；稷，祭稷也；郊者，并百王于上天而祭祀之也。

Ĉar krome estas festofero al la Tera Altaro, estas festofero al la Sanktejo de grenoj, kaj estas festofero en la Suburbo, oferata al cent reĝoj kaj al la Ĉielo.

三月之殡何也？曰：大之也，重之也。

Kial necesas tri monatoj da kondolenco ĝis la enterigo? Mi diras: Ĉar la forpasinto estas granda kaj grava.

所致隆也，所致亲也，将举措之，迁徙之，离宫室而归丘陵也，先王恐其不文也，是以繇其期，足之日也。

Por pleje esprimi la respekton kaj la simpatian. Oni devas pretigi skrupule la enterigon, kiel la translokigon el de la reĝa palaco al la monta tombo. Antaŭaj reĝoj timis senformecon je reguloj. Do oni longigis la antaŭ-enterigan tempon, por ke la tagoj sufiĉu.

故天子七月，诸侯五月，大夫三月，皆使其须足以容事，事足以容成，成足以容文，文足以容备，曲容备物之谓道矣。

Tial do necesas sep monatoj por la Ĉiela Filo, kvin monatoj por landestroj, tri monatoj por grandoficistoj, por ke ĉio estu sufiĉe preta je la enterigo, estu sufiĉe kompleta la servo, estu sufiĉe perfekta la formo. Eblas diri, ke kun la formo sufiĉe pretigita kaj kun la diversspecaj aĵoj instalitaj kompletas la vojo.

祭者，志意思慕之情也。

La festofero estas esprimo de sento je bonvolo kaj sopiro.

憚诡，啗僂而不能无时至焉。

En sia emociiĝo aŭ tristeco oni ne povas perdi la tempon por esprimi la senton.

故人之欢欣和合之时，则夫忠臣孝子亦憚诡而有所至矣。

Ĉe sia ĝoja harmonio lojalaj vasaloj kaj fidelaj filoj eksopiregas kun emociiĝo kaj tristeco al siaj estimataj forpasintoj.

彼其所至者甚大动也，案屈然已，则其于志意之情者惘然不嗛，其于礼节者阙然不具。

Kiu, kvankam ege emociiĝinte, tamen farus nenion al si, tiu, se bonvola kaj sentema, perdus esperon aŭ malkontentus, kaj, se prudenta je la decregularo, eksentus sin erarinta kaj malkompleta.

故先王案为之立文，尊尊亲亲之义至矣。

Do antaŭaj reĝoj starigis la sekvendan formon por plenumi la devon je justo al iu respektinda kaj intima.

故曰：祭者，志意思慕之情也，忠信爱敬之至矣，礼节文貌之盛矣，苟非圣人，莫之能知也。

Do mi diras: La festofero estas por esprimi la senton de bonvolo kaj sopiro, estas la pleja rito por esprimi lojalecon, fidon, amon kaj respekton, estas je la prospera formo de decregularo. Tion ne povas kompreni tiu, kiu ne estas la sanktulo.

圣人明知之，士君子安行之，官人以为守，百姓以成俗。

Sanktulo klare scias tion, inteligentulo kaj noblulo sekure praktikas tion, oficistoj firme gardas tion, popolanoj faras tion moro.

其在君子，以为人道也；其在百姓，以为鬼事也。

Inter ili la princo faras tion la homa vojo, la popolanoj faras tion servado al spiritoj.

故钟鼓，管磬，琴瑟，笙簧，《韶》，《夏》，《护》，《武》，《沟》，《桓》，《箭》，简，《象》，是君子之所以憚诡其所喜乐之文也。

Muzikiloj kiel Sonoriloj-tamburoj, blov-perkut-instrumentoj, kord-instrumentoj, buŝ-blov-orgenoj, kaj muzikoj kiel «Shao», «Xia», «Hu», «Wu», «Zhuo», «Huan», «Xiao», Jian, «Xiang», – tiuj prezentas al princoj kaj nobluloj la formon por esprimi la emocijn kaj ĝojon.

齐衰，苴杖，居庐，食粥，席薪，枕块，是君子之所以为憚诡其所哀痛之文也。

Dumfunebra humileco kiel vestiĝi en ĉifono, loĝi en kabanaĉo, manĝi kaĉon, sidi sur brullignoj, dormi ĉe terbula kapkuseno, – ĉio prezentas al princoj-nobluloj la formon por esprimi la emociiĝon kaj tristecon.

师旅有制，刑法有等，莫不称罪，是君子之所以为憚诡其所敦恶之文也。

Mobilizo de armeo por reguligi, punleĝoj por teni egalecon, laŭkrima punado, – tiuj prezentas al princoj-nobluloj la formon por esprimi la koleron kaj malamon.

卜筮视日，斋戒修涂，几筵，馈荐，告祝，如或飧之；物取而皆祭之，如或尝之；毋利举爵，主人有尊，如或觴之；宾出，主人拜送，反易服，即位而哭，如或去之。

Oni ŝajnigas la riton de kunmanĝado, kvazaŭ en realo farus ĝin kune kun forpasinto, aŭgurante la bonan daton, fastante, sinpurigante, sternante maton, oferante viandon, parolante al mediumo. Ĉiuj festoferadas, prenante la manĝaĵon, kvazaŭ la formasinto manĝus en realo; la ĉeffunebranto tostas respektplene al la forpasinto, ne tra la mediumo, kvazaŭ en realo interŝanĝus taseton; la ĉeffunebranto, forsendante kun riverenco la gaston-forpasinton, mem alivestiĝas kaj tuj ekploras, kvazaŭ la gasto forirus reale.

哀夫敬夫！事死如事生，事亡如事存，状乎无形影，然而成文。

Kia tristo, kia respekto! Oni servas al la mortinto samkiel al la vivanto, servas al malaperinto samkiel al ekzistanto. Kvankam fakte estiĝas nek korpo nek ombro, tamen troviĝas la formo.

20 乐论

DISKURSO PRI MUZIKO

夫乐者，乐也，人情之所必不免也，故人不能无乐。

Muziko estas ĝojo, nemankebla al homa sento. Do al homo ne eblas sen muziko.

乐则必发于声音，形于动静，而人之道，声音，动静，性术之变尽是矣。

Ĝojante, oni nepre eligas la voĉon kaj la sonon, La ĝojo korpigiĝas en la movon kaj malmovon, do la homa vojo realiĝas en voĉo kaj sono, en movo kaj malmovo. Jen en kio la ŝanĝo de natura sento manifestiĝas.

故人不能不乐，乐则不能无形，形而不为道，则不能无乱。

Homoj ne povas ne ĝoji, la ĝojo ne povas ne enkorpigi. Se la korpigo ne obeas la vojon, tiam ne povas ne esti ĝi ĥaoso.

先王恶其乱也，故制《雅》《颂》之声以道之，使其声足以乐而不流，使其文足以辨而不讷，使其曲直，繁省，廉肉，节奏足以感动人之善心，使夫邪污之气无由得接焉。

Antaŭaj reĝoj malamis ĥaason, do instalas en voĉo regulojn, kiel “Odon *Ya*” kaj “Himnon *Song*”, por ke, prezentante la vojon, oni faru la voĉon taŭga je ĝojiga muziko sen diboĉemo, faru la formon distingebla sen perverseco, faru kurbon-rekton, komplikecon-simplecon kaj magron-grason, sufiĉe modera por movi la homan bonkoron kaj por ke ia malbona aŭ malpura spiro ne ektuŝu.

是先王立乐之方也，而墨子非之，奈何！

Tio estas la maniero, ke antaŭaj reĝoj starigis la muzikon. Sed Mozi neas la muzikon, kia absurdo!

故乐在宗庙之中，君臣上下同听之，则莫不和敬；闺门之内，父子兄弟同听之，则莫不和亲；乡里族长之中，长少同听之，则莫不和顺。

Kiam muzikas en prapatra templo, estro kaj vasaloj, la supro kaj la subo, kune aŭdas la muzikon, oni ne devas ne akorigi kaj respekti unu la alian. Kiam muzikas en la familio, gepatroj kaj gefiloj, gefratoj kune aŭdas la muzikon, oni ne devas ne harmonii kaj intimigi. Kiam muzikas en vilaĝo de samklananoj, kune aŭdas maljunuloj kaj junuloj, oni ne devas ne harmonii kaj mildigi.

故乐者，审一以定和者也，比物以饰节者也，合奏以成文者也，足以率一道，足以治万变。

Do muziko estas tiu, kiu kontrolas unuigon de tono laŭ unu fundamenta pitĉo kaj certigas harmonion kaj akordon, diversaj instrumentoj konkurence ornamas certan tonalon, koncertas kaj per la kunludado komponas la formon, povas konduki al unuigo je la vojo, kaj per tio povas regi en unueco miriadon da ŝanĝigo.

是先王立乐之术也，而墨子非之，奈何！

Do por tiu arto la antaŭaj reĝoj starigis la muzikon. Sed Mozi neas la muzikon, kia absurdo!

故听其《雅》《颂》之声，而志意得广焉；执其干戚，习其俯仰屈伸，而容貌得庄焉；行其缀兆要其节奏，而行列得正焉，进退得齐焉。

Aŭdante voĉon de la *Yā* kaj la *Song*, oni grandiĝas je la strebo kaj la volo, kaj prenante ŝildon kaj hakilon, oni sponte ekdancas kun la tuta korpo turnata suben kaj supren, fleksata, rektigata, kun la mieno solena kaj majesta. Dancante en la difinita sceno konforme al la muzikado, oni ĝuste vicas kaj en orde moviĝas antaŭen kaj malantaŭen. 故乐者，出所以征诛也，入所以揖让也。

Muziko estas tiu, kiu ekmarŝigs homojn eksteren al konkerado aŭ punado kaj revenigas internen por humiliĝi kaj cedi modeste.

征诛揖让，其义一也。

La konkero-punado kaj la humiliĝo-cedo estas unu laŭ justo.

出所以征诛，则莫不听从；入所以揖让，则莫不从服。

Eksteren eliri por konkeri kaj puni estas por ke oni aŭskultu kaj obeu; internen reveni por humiliĝo kaj cedi estas por ke oni obeu kaj submetiĝu.

故乐者，天下之大齐也，中和之纪也，人情之所必不免也。

La muziko estas granda ordo de la mondo, kriterio por milda harmonio, nepre ne mankebla al la homa sento.

是先王立乐之术也，而墨子非之，奈何！

Tial do la antaŭaj reĝoj starigis la muzikon kiel la arton. Sed Mozi neas la muzikon, kia absurdo!

且乐者，先王之所以饰喜也；军旅鉞钺者，先王之所以饰怒也。

Muziko estas tio, per kio la antaŭaj reĝoj esprimis la ĝojon, tiel same, kiel armeo kaj armmiloj, per kio la antaŭaj reĝoj esprimis la koleron.

先王喜怒皆得其齐焉。是故喜而天下和之，怒而暴乱畏之。

Kiam la antaŭaj reĝoj ĝojis aŭ kolervis, ĉiuj akordiĝis unuvoĉe al ili. Se ili ĝojis, ĉiuj en la mondo kune ĝojis, se ili kolervis, ĉiuj eksplodis de indigno aŭ timis.

先王之道，礼乐正其盛者也，而墨子非之。

La vojo de la antaŭaj reĝoj estis ĝuste plena je decregularo kaj muziko. Sed Mozi neas la muzikon.

故曰：墨子之于道也，犹瞽之于白黑也，犹聋之于清浊也，犹欲之楚而北求之也。

Do mi diras: Koncernate la vojon, Mozi vidas blankon-nigron kvazaŭ blindulo, aŭdas altvoĉan kaj basan sonojn kvazaŭ surdulo, iras norden, kiam li volus atingi la regnon

Chu.

夫声乐之入人也深，其化人也速，故先王谨为之文。

La voĉa muziko penetras profunden en homan koron kaj transformas homon rapide, do antaŭaj reĝoj prudente aranĝis la formon.

乐中平则民和而不流，乐肃庄则民齐而不乱。

Se la muziko estas milda kaj paca, la popolo ne diboĉas; se la muziko estas solena kaj majesta, la popolo sidas en ordo kaj ne tumultas.

民和齐则兵劲城固，敌国不敢婴也。

Se la popolo harmonias en ordo, la armeo estas forta kaj la kastelo estas firma, do malamikaj landoj ne aŭdacas invadi.

如是，则百姓莫不安其处，乐其乡，以至足其上矣。

Tiam la popolanoj vivas pace, ĝuas la vivon hejme, estante plej kontentaj je sia supro.

然后名声于是白，光辉于是大，四海之民莫不愿得以为师。是王者之始也。

Tiam la reputacio de la supro evidentas, la brilo grandiĝas, la popolo de la mondo esperas fari lin la gvidanto. Jen ekas la reĝa regado.

乐姚冶以险，则民流僇鄙贱矣。

Se muziko estas koketa kaj malica, tiam la popolo ekdiboĉas, iĝas vulgara kaj maldeca. 流僇则乱，鄙贱则争。

Estante diboĉa, oni tumultas; estante vulgara kaj maldeca, oni kverelas.

乱争则兵弱城犯，敌国危之。

Se la popolo tumultas kaj kverelas, la armeo malfortiĝas kaj la kastelo iĝas malsoiida, kaj malamikaj landoj endanĝerigas nin.

如是，则百姓不安其处，不乐其乡，不足其上矣。

Tiel do, la popolanoj sentas sin malkvietaj en sia loko, ne ĝojas en sia hejmo, estas malkontentaj je la supro.

故礼乐废而邪音起者，危削侮辱之本也。

Degenero de la decreguloj kaj la muziko kaj apero de la malbona sono, estas la fonto de danĝera regreso kaj malhonoro.

故先王贵礼乐而贱邪音。

Do la antaŭaj reĝoj estimis la decregularon kaj la muzikon, malestimis la maldecan sonon.

其在序官也，曰：“修宪命，审诛赏，禁淫声，以时顺修，使夷俗邪音不敢乱雅，太师之事也。”

En la «Ofica Vicordo» estas dirite: “Reguligi la leĝaron kaj la ordonon, ekzameni la kritikon kaj la laŭdadon, malpermesi diboĉan kanton, korektadi konforme al la tempo, fari, ke fremda, vulgara aŭ maldeca sono ne aŭdacu perturbi la fajnecon, – jen en kio kuŝas la afero de la granda Majstro.”

墨子曰：“乐者，圣王之所非也，而儒者为之，过也。”

Mozi diras: “Muzikon neis la sanktaj reĝoj, estas eraro, ke konfuceanoj faras ĝin grava.”

君子以为不然。乐者，圣人之所乐也，而可以善民心，其感人深，其移风易俗，故先王导之以礼乐而民和睦。

Nobluloj konsideras ne tiel. Muzikon ĝuis la sanktaj reĝoj. La muziko povas fari la koron de la popolo bona, faras la homan senton profunda, transformas la moron facile, do la antaŭaj reĝoj gvidis homojn per deregularo kaj muziko, por ke la popolo harmoniu kaj amikiĝu.

夫民有好恶之情而无喜怒之应则乱。

Se la popolo, havante senton de ŝato kaj malŝato, ne povas elmontri la reagon per ĝojo aŭ kolero, tiam okazos tumulto.

先王恶其乱也，故修其行，正其乐，而天下顺焉。

La antaŭaj reĝoj malamis la tumulton, do lernis kulturi la konduton kaj ĝustigi la muzikon, kaj la mondo obeis ilin.

故齐衰之服，哭泣之声，使人之心悲；带甲婴[革由]，歌于行伍，使人之心伤；姚冶之容，郑卫之音，使人之心淫；绅，端，章甫，舞《韶》，歌《武》，使人之心庄。

Do funebra vesto, voĉo de lamento kaj plorkrio, lasas homan koron trista; ke kun kiraso vestite kaj kun kasko rimenligite, soldatoj kantante marŝas kvin vicajn, tio lasas homan koron dolora; flateme koketa mieno kaj muziko de Zheng kaj Wei lasas la homan koron diboĉa; surmeti ritan skarpon, robon, ĉapon, aŭ danci laŭ la muziko Shao kaj kanti laŭ la muziko Wu, – lasas la homan koron solena.

故君子耳不听淫声，目不视女色，口不出恶言。此三者，君子慎之。

Oreloj de noblulo ne aŭdas diboĉan voĉon, liaj okuloj ne vidas amoradon kun virinoj, liaj buŝoj ne eldiras malbonajn vortojn. Je tiu triopo la noblulo sin detenas.

凡奸声感人而逆气应之，逆气成象而乱生焉，正声感人而顺气应之，顺气成象而治生焉。

Ĝenerale, kiam maldeca voĉo movas homon, responde ekaperas kontraŭa aero Qi, kaj la kontraŭa aero Qi, aperigante sin, malordigas la vivon. Kiam ĝusta voĉo movas homon, responde ekaperas favora aero Qi, kaj la favora aero Qi, aperigante sin, ordigas la vivon. 唱和有应，善恶相象，故君子慎其所去就也。

Harmonio en kantado havas la konforman respondon, ankaŭ bono kaj malbono elmontras sin responde al tio, do noblulo atentigas skrupule kion preni kaj kion eviti.

君子以钟鼓道志，以琴瑟乐心，动以干戚，饰以羽旄，从以磬管。

Noblulo aspiras la vojon laŭ sonorilo kaj tambulo, ĝojas je sia koro per kotoo kaj citro, dancas kun ŝirmo kaj hakilo, ornamite per plumoj kaj vosto de poefago, sekvante al

ŝtona ksilofono kaj fluto.

故其清明象天，其广大象地，其俯仰周旋有似于四时。

Muziko estas pura kaj klara kvazaŭ la Ĉielo, vasta kaj granda kvazaŭ la Tero, turniĝas suben-supren, cirkulas kaj vorticiĝas kvazaŭ kvar sezonoj.

故乐行而志清，礼修而行成，耳目聪明，血气和平，移风易俗，天下皆宁，美善相乐。

Do per muziko estas purigata la konduto kaj la aspiro, kulturata la decregularo, perfektigata la agmaniero, akras saĝe oreloj kaj okuloj, kvietiĝas pace la sango kaj la temperamento, aliĝas kutimo kaj ŝanĝiĝas moro, paciĝas ĉio en la mondo, ĉiuj ĝuas kune la belon kaj la bonon.

故曰：乐者，乐也。

Do estas dirite: Muziko estas plezuro.

君子乐得其道，小人乐得其欲。

Noblulo ĝojas je la plenumado de sia vojo, malgrandulo ĝojas je la plenumado de sia deziro.

以道制欲，则乐而不乱；以欲忘道，则惑而不乐。

Se la vojo detenas la deziron, tiam eblas la ĝojo sen malordo; se la deziro forgesas la vojon, tiam estiĝas konfuzo kaj malplezuro.

故乐者，所以道乐也。

La amuzo-muziko estas amuziĝi je la vojo.

金石丝竹，所以道德也。

Instrumentoj el metaloj, ŝtonoj, kordoj, bambuoj, estas la vojo, laŭ kiu aperas la virto.

乐行而民乡方矣。

Muzikado direktas la popolon hejmen.

故乐者，治人之盛者也，而墨子非之。

Do la muziko estas io la plej alta por regi homojn, sed Mozi neas tion.

且乐也者，和之不可变者也；礼也者，理之不可易者也。

La muziko estas ja harmonio, neŝangebla; la decregularo estas principo, neanstataŭigebla.

乐合同，礼别异，礼乐之统，管乎人心矣。

La muziko akordigas en sameco-egaleco, la decregularo distingas en apartigo-diferenciigo. La decregularo kaj la muziko kune kontrolas la homan koron.

穷本极变，乐之情也；著诚去伪，礼之经也。

La naturo de la muziko kuŝas en serĉado de la fonto de fontoj kaj adaptado al pleja ŝanĝiĝo. La tezo de la decregularo estas aperigi la sincerecon kaj kutimiĝi al senkonscia laŭmorala konduto.¹⁸⁵

¹⁸⁵ 去伪 Por Xunzi la ideogramo 伪 havas signifon «artefarata konscia ago», do estas

墨子非之，几遇刑也。

Mozi neas tion, do li devus renkonti la taŭgan punon.

明王已没，莫之正也。

Kleraj reĝoj jam formasis, do ili ne povas korekti lin.

愚者学之，危其身也。

Stultuloj lernas lin, endanĝerigas sin.

君子明乐，乃其德也。

Ke noblulo klare komprenas la muzikon, tio estas lia virto.

乱世恶善，不此听也。

Senorda mondo malamas la bonon, do ne aŭdas la noblulon.

於乎哀哉，不得成也！

Ho, domaĝe! En nenio oni sukcesas.

弟子勉学，无所营也。

Studentoj, lernu diligente, por ke vi ne devojiĝu.

声乐之象：鼓大丽，钟统实，磬廉制，竽笙箫和，箎箫发猛，埙篪翁博，瑟易良，琴妇好，歌清尽，舞意天道兼。

Imago de kantoj kaj muzikiloj estas jena. La tamburoj prezentas grandan intenson, sonoriloj – integrecon, ŝtonaj tintiloj-celesto – memregon, ŝalmoklarnetoj kaj orgenoj – harmonion, blovinstrumentoj – eksplodon, okarinoj kaj kornoj – nebulecan elŝprucon, citro – mildan facilecon, kotoo – bonan virinecon, kantoj – plejan purecon, dancoj – kuniĝon al la Ĉiela vojo.

鼓，其乐之君邪！故鼓似天，钟似地，磬似水，竽笙，箫和，箎箫似星辰日月，鞀，柷，拊，鼙，控，楬似万物。

Tamburo ja estas la reĝo de muzikiloj! Do la tamburo similas al la Ĉielo, sonorilo similas al la Tero, ŝtonaj tintiloj-celesto similas al akvo, ŝalmoklarnetoj kaj orgenoj en harmonio kaj okarinoj-blovinstrumentoj similas al steloj, suno, kaj luno, kaj tiuj muzikiloj, kiel *tao*, *zhu*, *fu*, *ge*, *qiang*, *jie*, similas al dek miloj da aĵoj.¹⁸⁶

曷以知舞之意？曰：目不自见，耳不自闻也，然而治俯仰，诘信，进退，迟速莫不廉制，尽筋骨之力以要钟鼓俯会之节，而靡有悖逆者，众积意[𠄎 𠄎]乎！

Kiel do estas sciate pri la signifo de danco? Mi opinias: Okuloj vidas sen memo, oreloj aŭdas sen memo, kaj estas direktate en ordo je la turniĝo suben kaj supren, la kurbiĝo

evitende traduki la frazon «forigi falson». Laŭmorala konduto estas farenda senkonscie.
¹⁸⁶ *tao*, *zhu*, *fu*, *ge*, *qiang*, *jie*, estas antikvaj perkutinstrumentoj. Estas dirite, ke *Tao* estis tamburineto kun du buletoj ligitaj per ŝnuroj, *Zhu* estis frapilo en sonkesto, *Fu* estis marakoj, enhavantaj rizbranon, *Ge* estis bongo, farata el ledo, *Jie* estas krotaleta aŭ multripa klakraspilo.

kaj rektiĝo, la irado antaŭen kaj malantaŭen, kaj la forta movado de muskoloj kaj ostoj strikte konformas al ritmo de sonoriloj kaj tamburoj, sen ajna misago. Tio estas amasigita akumulado de volo, trejnata dumlonge kaj intense.

吾观于乡，而知王道之易易也。

Observante adiaŭan ceremonion de la drinkado okaze de ies eliro el hejmvilaĝa lernejo, mi scias, ke la reĝa vojo estas tre facila.

主人亲速宾及介，而众宾皆从之，至于门外，主人拜宾及介而众宾皆入，贵贱之义别矣。

La ĉefa gastiganto mem subite bonvenigas ĉefan gaston kaj lian akompananton, kiujn amaso da aliaj gastoj, ĉiuj, postsekvas. Kiam gastoj atingis eksteren de la pordo, la ĉefa gastiganto riverencas la ĉefan gaston kaj la akompananton, kaj poste ĉiuj aliaj eniras, ĉar estas distingite je la diferenco inter nobeloj kaj malnobeloj.

三揖至于阶，三让以宾升，拜至，献酬，辞让之节繁。

Salutante kun manoj kunmetitaj ĝis atingo al ŝtuparo, post trifoja cedado la gasto ascendas kaj la gastiganto riverencas plej profunde, proponas toston, poste sekvas reciproka rifuzado kaj cedado interŝanĝata por deca etiketo.

及介省矣。

Estas preterlasite al la akompananto je tia interŝanĝo.

至于众宾，升受，坐祭，立饮，不酢而降。

Amaso da aliaj gastoj ascendas, sidas oferante, drinkas, ne redonante toston, descendas. 隆杀之义辨矣。

Estas distingite tiel laŭ la grado de deca etiketo inter estimenda supro kaj subo.

工入，升歌三终，主人献之；笙入三终，主人献之；间歌三终，合乐三终，工告乐备，遂出。

Muzikistoj eniras, traludas [el *Xiaoya* de *Shijing*] tri kantojn, kaj la gastiganto tostas por ili. Orgenistoj eniras, traludas tri pecojn, kaj la gastiganto tostas por ili. Kantistoj trakantas tri pecojn sube de la sceno, orkestro ludas tri pecojn, kaj muzikistoj, anoncanta la finon de muziko, eliras.

二人扬觶，乃立司正，焉知其能和乐而不流也。

Du personoj estas elektitaj de la gastiganto por tosti pokalojn, kaj estas starigita la rita prezidanto, por ke la rito povu iri harmonie kaj ne malstreĉiĝu.

宾酬主人，主人酬介，介酬众宾，少长以齿，终于沃洗者焉。

La gasto priverŝas vinon al la gastiganto, la gastiganto – al la akompananto, la akompananto – al amaso da gastoj. Junaj kaj maljunaj priverŝadas unu al la alia, finfine al servantoj, lavantaj pokalojn.

知其能弟长而无遗也。

Oni povas scii, ke neniu el la junaj kaj la pliaĝaj estas preterlasita je la respekta

kundrinkado.

降，说屨，升坐，修爵无数。

Ĉiuj descendas, malmetas ŝuojn, sidante, reciprokas da tasetoj sennombre.

饮酒之节，朝不废朝，莫不废夕。

Laŭ etiketo de la vindrinkado matene oni ne devas ignori la matenan taskon, vespere la vesperan.

宾出，主人拜送，节文终遂。

Kiam la gastoj estas forirantaj, la gastiganto riverence forsendas ilin, tiel laŭforme finiĝas la ceremonio.

焉知其能安燕而不乱也。

Oni povas scii, ke la rito fareblas en paco kaj sen malordo.

贵贱明，隆杀辨，和乐而不流，弟长而无遗，安燕而不乱。

Klara estas divido je rangoj inter nobeloj-malnobeloj, estas distingo inter la estimataj pli alte kaj malpli, estas harmonia ĝuo sen orgia malstreĉiĝo, kaj neniu el plijunaj kaj pliaĝaj estas preterlasita, estas ĉio en paco kaj ne malordas.

此五行者，是足以正身安国矣。

Kun tiuj kvin punktoj eblas fari vin ĝusta kaj la landon paca.

彼国安而天下安。

Se lando estas en paco, tiam la mondo estas paca.

故曰：吾观于乡，而知王道易易也。

Do estas dirite: Observante adiaŭan ceremonion de la drinkado okaze de ies eliro el hejmvilaĝa lernejo, mi scias, ke la reĝa vojo estas tre facila.

乱世之征：其服组，其容妇，其俗淫，其志利，其行杂，其声乐险，其文章匿而采，其养生无度，其送死瘠墨，贱礼义而贵勇力，贫则为盗，富则为贼。

Signo de la malorda epoko estas jena: la vestaĵoj estas brilaĉaj, la aspekto de homoj estas virineca, la moro estas voluptema, la strebo estas profitema, la konduto estas senkohera, la kanto-muziko estas malica, la desegnoj kaj ornamoj estas mornaj kaj afektemaj, la vivmaniero estas senbrida, la funebrado de mortintoj estas laŭ magra mohismo, malestimata estas decregularo kaj justo, estimata estas forto, malriĉulo fariĝas ŝtelisto, riĉulo fariĝas rabisto.

治世反是也。

La epoko en ordo estas tute alia.

21 解蔽

MALKOVRO

凡人之患，蔽于一曲而暗于大理。

Ĝenerale malsano de homoj fontas el kovriteco per unuflanka devio kaj el blindeco je granda principo.

治则复经，两疑则惑矣。

Se resaniĝos, revenos al la ĝusta vojo; se disdubiĝos, ŝanceliĝos.

天下无二道，圣人无两心。

En la mondo ne estas la vojo disdubigita, sankatulo ne havas la koron disdubigitan.

今诸侯异政，百家异说，则必或是或非，或治或乱。

Nun landestroj faras diversajn politikojn, cent pensuloj parolas diversajn ismojn, do nepras aperi aŭ praveco aŭ malpraveco, aŭ ordo aŭ malordo.

乱国之君，乱家之人，此其诚心莫不求正而以自为也，妒繆于道而人诱其所迨也。

Eĉ estro de malorda lando aŭ uloj de malorda skolo, kavankam ili sincere serĉus la ĝustan kaj mem klopodus fari ĝuste, tamen jaluzo aŭ envio malhelpas la vojon kaj iu delogas ilin de la vojo.

私其所积，唯恐闻其恶也；倚其所私，以观异术，唯恐闻其美也。

Ili, apogante sin sur la akumulita de si mem, nur timas audi la malagrablan; apogante sin sur si mem ĉe vidado de alia tekniko, nur timas aŭdi la alies belecon.

是以与治虽走而是已不辍也，岂不蔽于一曲而失正求也哉！

Kvankam ili volus iri en ordo, tamen ili konsideras nur sin pravaj kaj ne cedas; kvankam ne volus esti kovrata per unuflankeco, tamen ili malsukcesas serĉi la ĝustan. 心不使焉，则白黑在前而目不见，雷鼓在侧而耳不闻，况于使者乎！

Se ne uzeblas la koro, tiam ne videblas eĉ blanko-nigro antaŭ okuloj, ne aŭdeblas eĉ tondro de tamburo ĉe oreloj. Plie estas uzenda!

德道之人，乱国之君非之上，乱家之人非之下，岂不哀哉！

Persono kun virta vojo estas ignorata supre per estroj de malordaj landoj, estas ignorata sube per uloj de malordaj skoloj. Kiel ne domaĝe!

故为蔽？欲为蔽，恶为蔽；始为蔽，终为蔽；远为蔽，今为蔽；博为蔽，浅为蔽；古为蔽，今为蔽。

Kiel estas kovrite de iluzio? Estas kovrite per deziro, kovrite per malamo; je la komenco estas kovrite, je la fino estas kovrite; je malproksimo estas kovrite, je proksimo

estas kovrite; je vasteco estas kovrite, je malprofundeco estas kovrite; je antikvo estas kovrite; je nuno estas kovrite.

凡万物异则莫不相为蔽，此心术之公患也。

En tute, ĉiuj estaĵoj estas diferencaj, do neeviteble kovrataj unu per la alia reciproke, jen en kio kuŝas ĝenerala malsano en la mensa scienco.

昔人君之蔽者，夏桀，殷纣是也。

El antikvaj reĝoj, la kovritoj de iluzio estis Jie de Xia dinastio kaj Zhou de Yin dinastio.

桀蔽于末喜，斯观，而不知关龙逢，以惑其心而乱其行；纣蔽于妲己，飞廉，而不知微子启，以惑其心而乱其行。

Jie estis kovrita de Moxi, Siguan, kaj ne povis kompreni Guan Longpang, estis delogita je koro kaj freneziĝis je la konduto. Zhou, kovrite de Da Ji, Feilian, ne povis kompreni Weizi Qi, estis delogita je koro kaj freneziĝis je la konduto.¹⁸⁷

故群臣去忠而事私，百姓怨非而不用，贤良退处而隐逃，此其所以丧九牧之地而虚宗庙之国也。

Do amaso da subuloj forlasis sian lojalecon kaj okupiĝis je io privata, popolanoj rankore ignoras la estrojn kaj ne utilas al ili, kaj saĝaj elitoj retiriĝas kaj fuĝas kaŝe, tial do ili perdis la tutan teritorion kaj vane pereis la lando de prapatroj.

桀死于亭山，纣县于赤旆。

Jie mortis ĉe la monto Ting, Zhou estis pendigita ĉe la pinto de ruĝa standardo.

身不先知，人又莫之谏，此蔽塞之祸也。

Ili mem ne sciis antaŭe pri sia estonteco, ne havis ĉe si iun admonantan, tiel do ili estas ŝtopite kovritaj per plago.

成汤监于夏桀，故主其心而慎治之，是以能长用伊尹而身不失道，此其所以代夏王而受九有也。

La reĝo Tang, observante la kazon pri Jie de Xia, prudente detenis sin je la koro, tiel do povis uzi Yi Yin dumlonge kaj mem ne perdis la vojon. tial li ricevis anstataŭ la reĝo de Xia la tutan teritorion.

文王监于殷纣，故主其心而慎治之，是以能长用吕望而身不失道，此其所以代殷王而受九牧也。

La reĝo Wen, observante la kazond pri Zhou de Yin, prudente detenis sin je la koro, povis dumlonge uzi Lü Wang kaj mem ne perdis la vojon, tial ricevis anstataŭ la reĝo de

¹⁸⁷ 末喜 konkubino de Jie, 斯观 ne sciate precize, sed flatema subulo de Jie, 关龙逢 estis mortigita pro admono al Jie. 妲己 estis konkubino de Zhou, 飞廉 ministro ĉe Zhou, 微子启 pliaĝa frato de Zhou, ne sukcesinte admoni Zhou, foriris, kaj poste estis feŭdita en Song-regno sub Zhou dinastio.

Yin la tutan teritorion.

远方莫不致其珍，故目视备色，耳听备声，口食备味，形居备宫，名受备号，生则天下歌，死则四海哭，夫是之谓至盛。

Foraj landoj ne devis ne tributi al ili valorajn raraĵojn, iliaj okuloj vidis ajnan koloron, oreloj aŭdis ajnan muzikon, buŝoj manĝis ajnan bongustaĵon, korpoj loĝis en palacoj, nomoj ricevis ajnan reputacion. Dum ili vivis, la tuta mondo kantadis, ĉe la morto kvar maroj ploris. Tio estas nomata la plej granda prospero.

《诗》曰：“凤凰秋秋，其翼若干，其声若箫。有凤有凰，乐帝之心。”此不蔽之福也。

Estas dirite en *Poezio*: “Gefeniksoj flugadas, ĝiaj aloj kvazaŭ ŝirmiloj, ĝiaj voĉoj kvazaŭ fajfo. Kaj vir- kaj in- feniksoj ĝojigas la reĝon je koro.”¹⁸⁸ Tio estas ja feliĉo, kovrita per nenio.

昔人臣之蔽者，唐鞅，奚齐是也。

El antikvuloj-ministroj estis kovritaj per iluzio Tang Yang kaj Xi Qi.

唐鞅蔽于欲权而逐载子，奚齐蔽于欲国而罪申生，唐鞅戮于宋，奚齐戮于晋。

Tang Yang, kovrite per la deziro je la potenco, forpelis Zaizi. Xi Qi, kovrite per la deziro je la regno, akuzis Shen Sheng. Tang Yang estis mortigita en la Song-regno, Xi Qi estis mortigita en la Jin-regno.¹⁸⁹

逐贤相而罪孝兄，身为刑戮，然而不知，此蔽塞之祸也。

Unu forpelis la saĝan ministron, la alia kalumniis la pian pliaĝan fraton, kaj ili mem estis murditaj, ne sciante estonton, ĉar ili estis ŝtopite kovritaj je plago.

故以贫鄙，背叛，争权而不危辱灭亡者，自古及今，未尝有之也。

De antikve ĝis nun neniam troviĝas iu, kiu, estante avara, perfidema, potenc-avida, ne estus endanĝerigita per senhonorigo kaj perejo.

鲍叔，宁戚，隰朋仁知且不蔽，故能持管仲而名利福禄与管仲齐；召公，吕望仁知且不蔽，故能持周公而名利福禄与周公齐。

Bao Shu, Ning Qi, Xian Peng estis bonvolemaj inteligentoj kaj ne kovrataj de iluzio, do povis subteni Guan Zhong kaj ricevis famon, profiton, feliĉon kaj salajron, egalan al Guan Zhong. La duko Shao, Lü Wang, bonvolemaj inteligentoj, ne kovrataj de iluzio, povis subteni la dukon Zhou, kaj ricevis famon, profiton, feliĉon kaj salajron, egalan al la duko Zhou.¹⁹⁰

¹⁸⁸ Ne troviĝas tiu poemo en nuna *Poezio*.

¹⁸⁹唐鞅 estis ministro ĉe Kang 康, reĝo de Song-regno, 载子(戴欢)estis ĉefministro de tiama Song-regno. 奚齐 estis filo de Li Ji 驪姬, amata de Xian 献公, duko de Jin-regno. 申生 estis kronprinco de la duko Xian.

¹⁹⁰ 鲍叔, 宁戚, 隰朋 estis grandoficistoj en Qi-regno. 召公 plijuna frato de la reĝo Wu en Zhou dinastio, 吕望 estis Tai gong Wang, feŭdita en Qi-regno.

传曰：“知贤之为明，辅贤之谓能。勉之强之，其福必长。”此之谓也。此不蔽之福也。

Estas dirite laŭ tradicie: “Klera estas tiu, kiu komprenas la saĝulon; kapabla estas nomata tiu, kiu helpas la saĝulon. Kiu diligente penadas fortigi tion, tiu estas feliĉa nepre dumlonge.” Tio signifas la supre menciitan. Tio estas la beno por esti neniom kovrata per iluzio.

昔宾孟之蔽者，乱家是也。

Antaŭe estis kovritaj de iluzio tiuj gast-propagandistoj kiel Meng, kiuj estas de ĥaosigantaj skoloj.¹⁹¹

墨子蔽于用而不知文，宋子蔽于欲而不知得，慎子蔽于法而不知贤，申子蔽于势而不知知，惠子蔽于辞而不知实，庄子蔽于天而不知人。

Mozi, kovrite de utilismo, ne komprenis kulturon; Song-zi, kovrite de la ideo je minimumigo de deziro, ne komprenis la signifon de posedo; Shen Dao, kovrite de juroscienco, ne komprenis la valoron de saĝo; Shen Buhai, kovrite de la ideo je aŭtoritata potenco, ne komprenis la valoron de scio; Hui-zi, kovrite de vortumado, ne komprenis la realan esencon; Zhuang-zi, kovrite de la ideo de la Ĉielo, ne komprenis pri homoj.

故由用谓之道，尽利矣；由俗谓之道，尽赚矣；由法谓之道，尽数矣；由势谓之道，尽便矣；由辞谓之道，尽论矣；由天谓之道，尽因矣。

Se prenas la utilismon por vojo, falos en profitismon. Se prenas moran simplecon por vojo, falos en mankon. Se prenas jurosciencon por vojo, falos en kalkulon. Se prenas potencon por vojo, falos en oportunecon. Se prenas vortumadon por vojo, falos en sofismon. Se prenas la Ĉielon por vojo, falos en serĉon de prakaŭzo.

此数具者，皆道之一隅也。

Ĉiu el la supre menciitaj enhavas en si nur unu angulon de la vojo.

夫道者，体常而尽变，一隅不足以举之。

Pri la vojo, kun la korpo konstanta kaj kun la ekstremoj diversigitaj, ne sufiĉas amplekse kompreni nur per unu angulo.

曲知之人，观于道之一隅而未之能识也，故以为足而饰之，内以自乱，外以惑人，上以蔽下，下以蔽上，此蔽塞之祸也。

Homo de unuflanka scio, vidante nur unu angulon de la vojo, ne povas kogni la vojon, do ili konsideras sian kognon sufiĉa kaj ornamas la kognitan, tiel do li konfuziĝas mem interne kaj konfuzas la aliajn ekstere. Al la supro li kovras la subon, al la subo li kovras la supron. Kaj per tio estiĝas la plago pro kovrita ŝtopiĝo.

¹⁹¹ Esploristoj prenas Meng 孟 ne por persono, sed 萌 popolo. Mi ne povas kredi je tia anstataŭigo.

孔子仁知且不蔽，故学乱术，足以为先王者也。

Konfuceo, bonvolema kaj inteligenta, ne estis kovrita per iluzio, do lernadis sciencojn vaste kaj multe, taŭgis esti rigardata same kiel antaŭaj reĝoj.

一家得周道，举而用之，不蔽于成积也。

Lia skolo posedis la vojon de Zhou dinastio, disvastigis kaj praktikadis ĝin, kaj plie ne estis kovrata de la akumulitaj fiksideoj.

故德与周公齐，名与三王并，此不蔽之福也。

Do je la virto li egalas al la duko Zhou, je la nomo li egalas al tri reĝoj.¹⁹² Tio estas la feliĉo pro nekovriteco.

圣人知心术之患，见蔽塞之祸，故无欲无恶，无始无终，无近无远，无博无浅，无古无今，兼陈万物而中县衡焉。

Sanktuloj scias la malsanon je mensa uzmaniero, vidis plagon de kovrita ŝtopiĝo, do tenis sin havanta nenian inklinon – nek deziron nek malŝaton, nek komencon nek finon, nek proksimon nek malproksimon, nek vastecon nek malprofundecon, nek antikvon nek nunon – pendigante ĉion kaj ĉiujn tute sur vekta pesilo, serĉadis la mezon.

是故众异不得相蔽以乱其伦也。何谓衡？

Tial eĉ amaso da diferencoj ne povas kovradi unu la alian kaj ĥaosigi la ordon. Kion signifas la vekta pesilo?

曰：道。故心不可以不知道。心不知道，则不可道而可非道。

Mi diras: La vojon. Do la koro ne devas ne koni la vojon. Se la koro ne konas la vojon, tiam ĝi ne allasas la vojon aŭ lasas fi-vojon.

人孰欲得恣而守其所不可，以禁其所可？

Ĉiu homo deziras arbitre preni ion ajn, ĉu li gardus kion li ne allasas, aŭ ĉu li detenus kion li lasas?

以其不可道之心取人，则必合于不道人，而不知合于道人。

Kiun regas la koro, ne allasanta la vojon, tiu nepre akordiĝos kun devojiĝinta homo, aŭ ne konatiĝos kun envojiĝinta persono.

以其不可道之心，与不道人论道人，乱之本也。

La koro, ne allasanta la vojon, kaj la ĉikanado far devojiĝinto al envojiĝinto estas la fonto de ĥaoso.

夫何以知？曰：心知道，然后可道；可道，然后能守道以禁非道。

Kial estas sciate pri tio? Mi diras: Post kiam la koro ekkonas la vojon, eblas eniri la vojon: Post kiam enireblas la vojo, oni povas gardi la vojon kaj ne allasi fi-vojon.

以其可道之心取人，则合于道人，而不合于不道之人矣。

¹⁹² 三王 estas Yu de Xia, Tang de Yin, Wen de Zhou.

Kiun ekregas la koro, allasanta la vojon, tiu akordiĝas kun la envojiĝinta persono, ne akordiĝas kun devojiĝintoj.

以其可道之心，与道人论非道，治之要也。

La koro, allasanta la vojon, kaj persvado far envojiĝinta persono al devojiĝintoj, estas la grava esenco por la bonorda regado.

何患不知？故治之要在于知道。

Kia malsano en la nesciado. La grava esenco je la bonorda regado kuŝas en la sciado de la vojo.

人何以知道？曰：心。

Per kio konas homoj la vojon？ Mi diras： Per koro.

心何以知？ 曰： 虚壹而静。

Per kio la koro perceptas ĝin？ Mi diras： Per io malpleneca en unututo kaj per kvieto.

心未尝不臧也，然而有所谓虚；心未尝不满也，然而有所谓一；心未尝不动也，然而有所谓静。

La koro nepre rezervadas en si, sed tamen estas iu spaco malplena. La koro estas nepre plenigebla, ĉar ĝi estas unututo. La koro nepre moviĝas, estante ankaŭ kvieta.

人生而有知，知而有志。

Homo, vivante, havigas al si scion. La scio akiras strebon.

志也者，臧也，然而有所谓虚，不以所以臧害所将受谓之虚。

Ĉe la strebado oni rezervas scion, kaj estiĝas ankaŭ spaco malplena. Ĉar estas t. n. la malpleno, do akcepteblas plie sen difekti la rezervitan.

心生而有知，知而有异，异也者，同时兼知之。

Koro, vivante, posedas konscion. Kun la sciado prezentiĝas diferenco. La diferenco samtempe konsistigas la pli ampleksan scion.

同时兼知之，两也；然而有所谓一，不以夫一害此一谓之壹。

Tiu samtempa ampleksa scio estas ja scia duiĝo, sed tamen ĉio estas en la unueco. Ke per unu ne difektiĝas la alia, tio estas nomata la unututeco.

心，卧则梦，偷则自行，使之则谋。

Koro dormante vidas sonĝon, pigriĝante arbitras, uzate intrigas.

故心未尝不动也，然而有所谓静，不以梦剧乱知谓之静。

Tiel do la koro ne povas ne moviĝi, tamen iam povas kvietiĝi. Oni nomas la kvieteco la mensostatton, ne perturbatan de sonĝo kaj burleskaĵo.

未得道而求道者，谓之虚壹而静。

Al homo, ankoraŭ ne envojiranta aŭ dume serĉanta vojon, rekomendu teni sin malplena en unututo kaj kvieta.

作之，则将须道者之虚则人，将事道者之壹则尽，尽将思道者静则察。

Se fari tiel, voj-serĉanto tenas sin malplena kaj iĝas homeca, envojiĝinto tenas sin unututeca kaj iĝas penetranta, kaj la trapenetranta voj-pensanto tenas sin kvietaj kaj iĝas ekzamenanta.

知道察，知道行，体道者也。

Kiu scipovas ekzameni la vojon kaj scipovas praktiki la vojon, tiu enkorpiĝas la vojon.
虚壹而静，谓之大清明。

La malpleno en unututo kaj la kvieteco – estas t. n. la Granda Pura Lumo.

万物莫形而不见，莫见而不论，莫论而失位。

Ĉe tiu stato videblas ĉio ajn, havanta la formon; argumenteblas ĉio ajn vidata; klasifikeblas ĉio ajn argumentata.

坐于室而见四海，处于今而论久远，疏观万物而知其情，参稽治乱而通其度，经纬天地而材官万物，制割大理，而宇宙里矣。

Sidante en la ĉambro, li povas vidi tutan mondon, ĉirkaŭitan de kvar maroj; vivante en nuno, li povas argumenti pri la fora eterneco; nur momente observante ĉion ajn, li povas kompreni ĉies naturon; esplorante iun ajn ordon-malordon, li povas kompreni kaj mezuri la kaŭzecon; retumante la Ĉielon kaj la teron varpe kaj vefte, li tajloras ĉiun estaĵon utila kaj klasifika; reguligante kaj dividante ĉion ajn laŭ la granda principo, li tenas en si la universon – kosmon kaj tempon.

恢恢广广，孰知其极！ 濯濯广广，孰知其德！ 涓涓纷纷，孰知其形！

Kiel granda kaj vasta! Kiu scias lian plejon! Kiel alta kaj vasta! Kiu scias lian virton!
Kia elfluo kaj abundo! Kiu scias lian formon!

明参日月，大满八极，夫是之谓大人！夫恶有蔽矣哉！

Luma, samkiel suno kaj luno, plen-plena je ok polusoj, li estas ja vera grandulo! Kial li povus esti kovrota de iluzioj!

心者，形之君也，而神明之主也，出令而无所受令。

Koro estas la reĝo sur la korpo, la estro de spirita lumo, kaj donas ordonon, sed ne estas ordonata.

自禁也，自使也，自夺也，自取也，自行也，自止也。

Ĝi mem malpermesas, mem uzas, mem forprenas, mem ricevas, mem iras, mem haltas.
故口可劫而使墨云，形可劫而使诘申，心不可劫而使易意，是之则受，非之则辞。

Kvankam buŝon oni povas silentigi kun minaco, korpon oni povas kurbigi-rektigi kun minaco, tamen koro oni ne povas obeigi laŭ sia volo. Se io aprobinda, akceptas la koro mem, se io malaprobenda, malakceptas la koro mem.

故曰：心容其择也，无禁必自见，其物也杂博，其情之至也不贰。

Do estas dirite: La koro mem elektas kion ĝi akceptas; mem malpermesas ion ajn, vidante nepre per siaj okuloj. Eĉ se aĵoj estas komplike miksitaj kaj multediversaj, tamen la naturo finfine perceptiĝas ne dualece.

《诗》云：“采采卷耳，不盈倾筐。嗟我怀人，寘彼周行。”

Estas skribite en *Poezio*: “Kolektas, kolektas mi cerastion, sed ne pleniĝas la kesto. Ĉar mi sopiras al iu, kiu enoficigite foriras al Zhou por servi.”¹⁹³

倾筐易满也，卷耳易得也，然而不可以贰周行。

La kesto facile pleniĝblas, estas facile preni cerastion. Sed tio ne eblas, ĉar ŝia koro disduiĝis disŝirite pro lia foriro al Zhou.

故曰：心枝则无知，倾则不精，贰则疑惑。

Do mi diras: Koro, disbranĉigite, povas koni nenion; defleksiĝinte, ne povas diligenti; disduigite, ŝanceliĝas en dubo.

以赞稽之，万物可兼知也。

Per klara primeditado kaj komparado, ĉio estas universale kognebla.

身尽其故则美，类不可两也，故知者择一而壹焉。

Beleco riveliĝos nur se oni tute sindediĉos. Je klasifiko ne allaseblas disduiĝo en dualeco.

Do sciulo elektas unu por atingi la unututecon.

农精于田而不可以为田师，贾精于市而不可以为贾师，工精器而不可以为器师。

Terkulturisto diligentas sur la kampo, sed oni ne povas konsideri lin majstro je agrokulturo. Negocisto diligentas sur la merkato, sed oni ne povas konsideri lin majstro je komerco. Metiisto diligentas sur uzado de aparatoj, sed oni ne povas konsideri lin majstro je trknologio.

有人也，不能此三技而可使治三官，曰：精于道者也，精于物者也。

Estas iu, kiu havas ne kapablon je tiuj tri laboroj, sed kapablon administri tri oficojn.

Mi diras: Estas tiu, kiu diligentas je vojo kaj estas tiu, kiu diligentas je aĵoj.

精于物者以物物，精于道者兼物物。

Diligenta je aĵoj estas tiu, kiu okupas sin per ĉiu aĵo de aĵoj aparte. Diligenta je la vojo estas tiu, kiu ampleksas ĉiujn aĵojn en tuto.

故君子壹于道而赞稽物。

Noblulo surbaze de la unututeco je la vojo kontrolas aĵojn.

壹于道则正，以赞稽物则察，以正志行察论，则万物官矣。

Laŭ unututeco je la vojo li ĝustigas, kontrolas aĵojn kaj esploras, per ĝusta strebo iras esplori kaj diskuti, tial de li estas klasifikataj je rango ĉiuj estaĵoj.

¹⁹³ Citaĵo el 诗经，周南，卷耳.

昔者舜之治天下也，不以事诏而万物成。

Antikve Shun regis la mondon, kvankam li ne dekretis ordonon je aferoj, tamen ĉio efektiviĝis plene.

处一危之，其荣满侧；养一之微，荣矣而未知。

Se doni atenton unu sole al danĝero, la prospero estos plena nur en flankoj; se nutri unu komprenon je io subtila, la prospero estas atingebla sen scie.¹⁹⁴

故《道经》曰：“人心之危，道心之微。”

Do estas dirite en *Sutro de Vojo*: “Homa koro atentis ion danĝeran, la koro de vojo ion subtilan.”¹⁹⁵

危微之几，惟明君子而后能知之。

La efekton de io danĝera kaj io subtila povas scii nur klera noblulo.

故人心譬如槃水，正错而勿动，则湛浊在下而清明在上，则足以见须眉而察理矣。

Homa koro similas al akvo en pelvo, se ĝi ĝuste metite senmoviĝas, tiam suben sinkas io malpura kaj supre estiĝas pure kaj klare, kie videblas haretoj de barboj kaj brovoj kaj distingeblas haŭta glateco.

微风过之，湛浊动乎下，清明乱于上，则不可以得大形之正也。心亦如是矣。

Se ekblovas subtila vento kaj trairas, sube moviĝas malpuro kaj supre perturbiĝas la pura tavolo, tiam ne eblas vidi la ĝustan figuron de granda formo. La koro estas sama.

故导之以理，养之以清，物莫之倾，则足以定是非，决嫌疑矣。

Por tia koro, nur gvidate per rezono, nutrate per pureco, la aĵo ne dekliniĝas, kaj difineblas pravenco aŭ malpravenco, solveblas dubo.

小物引之则其正外易，其心内倾，则不足以决庶理矣。

Iu malgranda facile influeblas kaj ekstere deturnas sin de la ĝusteco, ties koro kliniĝas interne, kaj ne povas solvi eĉ ordinaran problemon.

故好书者众矣，而仓颉独传者，壹也；好稼者众矣，而后稷独传者，壹也；好乐者众矣，而夔独传者，壹也。好义者众矣，而舜独传者，壹也。倕作弓，浮游作矢，而羿精于射；奚仲作车，乘杜作乘马，而造父精于御。

Ekzistas amaso da talentoj je literoj, sed unu sola Cang Jie restas transcenda pro la unututeco; ekzistas amaso da agronomoj, sed unu sole Hou Ji restas transcenda pro la unututeco; ekzistas amaso da muzikistoj, sed unu sola Kui restas transcenda pro la unututeco. ekzistas amaso da justuloj, sed unu sola Shun restas transcenda pro la unututeco. Chui faris pafarkon, Fuyou faris sagon, sed Yi estas eksperto je la pafado; Xi

¹⁹⁴ Ĉi tie mi prenas ideogramon 一 kiel unu, kaj 壹 kiel unututon. 壹 havas formon de unu vazo, do unu ujo kun enhavo, plena je Qi. Mi ne konsentas kun multaj esploristoj, kiuj prenas ideogramon 一 por mensa koncentriĝo sur unu.

¹⁹⁵道经 ne troviĝas nun, sed simila frazo troviĝas en 书经, 大禹谟 *Shujing*, Dayumo. Esploristoj konjektas, ke la lasta povus esti skribita laŭ Xunzi.

Zhong faris ĉaron, Cheng Du rajdis ĉevalon, sed Zao Fu estas eksperto je la stirado.¹⁹⁶
自古及今，未尝有两能精者也。

De antikve ĝis nun ne troviĝas iu kapabla je du fakoj.

曾子曰：“是其庭可以搏鼠，恶能与我歌矣！”

Zeng-zi diris: “Kiel kun mi eblus kune kanti al tiu, kiu en ĉambro devas bati raton?”¹⁹⁷

空石之中有人焉，其名曰觥。

En ŝtona kavo loĝis iu homo, nomata Ji.

其为人也，善射以好思。

La person estis lerta je divenado kaj ŝatis pensadi.

耳目之欲接则败其思，蚊虻之声闻则挫其精，是以辟耳目之欲，而远蚊虻之声，闲居静思则通。

Sentante, ke la deziro de oreloj kaj okuloj malhelpas al li pensi kaj la zumado de kuloj kaj tabanoj rompas al li atentofiksadon, por eviti la deziron de oreloj kaj okuloj kaj for de la zumado de kuloj kaj tabanoj, li en izoleco trasidas kviete kaj pensadas trankvile. 思仁若是，可谓微乎？

Se tiamaniere li pensas pri bonvoleco, ĉu al li atingeblus io subtila？

孟子恶败而出妻，可谓能自强矣；有子恶卧而焮掌，可谓能自忍矣，未及好也。

Meng-zi, abomenante maldecon, forpelis sian edzinon, konsiderante, ke li povus fortigi sin per tio. You-zi, malŝatante sian dormemon, bruligis al si la polmon, konsiderante, ke li povus pacience elteni sin persista. Sed per tio ankoraŭ ne eblus ŝati kion li faras. 辟耳目之欲，可谓能自强矣，未及思也。

Eviti la deziron de oreloj kaj okuloj ebligis fari sin pli forta, sed per tio ankoraŭ ne eblus elpensi.

蚊虻之声闻则挫其精，可谓危矣，未可谓微也。

Povas esti nomata ‘danĝera’ tio, ke la zumado de kuloj kaj tabanoj rompas al li atentofiksadon, sed tio ne povas esti nomata ‘subtila’.

夫微者，至人也。

Kiu atingis la subtilan, tiu estas la pleja homo.

至人也，何强，何忍，何危？

Kial do por la pleja homo necesus la trudemo, pacienco aŭ atento je danĝero？

¹⁹⁶ 仓颉 inventis ideogramojn ĉe emperato Huang, 后稷 oficisto je agrokulturo ĉe la reĝo Yao, 夔 muzikisto ĉe Yao, Shun, 偃 legenda metiisto, 浮游 inventis sagon ĉe Huang, 羿 la plej talenta pafisto, 奚仲 inventis ĉaron ĉe Yu de Xia dinastio, 乘杜 nepo de prapatro Qi 契 por Yin-dinastio, inventis kvar-ĉevalan kaleŝon, 造父 la plej fama ĉarokondukisto ĉe la reĝo Mu 穆 de Zhou dinastio.

¹⁹⁷ 曾子 unu el disĉiploj de Konfuceo, alinome Shen 参.

故浊明外景，清明内景。

Kie malpuras, tie li reflektas eksteron; kie puras, tie li reflektas internon.

圣人纵其欲，兼其情，而制焉者理矣。

Sanktulo sekvas sian deziron, ampleksas en si tutan senton, estante samtempe bone regata de racio.

夫何强，何忍，何危？

Kial do al li necesus esti trudema, pacienca, atenta je danĝero?

故仁者之行道也，无为也；圣人之道也，无强也。

La vojo, irata de bonvoleculo, estas senfara; la vojo, irata de sanktulo, estas sentruda.¹⁹⁸
仁者之思也恭，圣人之思也乐。

Bovolema persono pensas humile, sanktulo pensas ĝoje.

此治心之道也。

Jen kio estas la vojo de la regata koro.

凡观物有疑，中心不定，则外物不精。吾虑不清，则未可定然否也。

Ĝenerale, al tiu, kiu havante dubon rigardas ion, ne certas la fokuso, ne precizas la ekstera objekto. Kun malklara konsidero ne eblas decidi, ĉu ĝi estas prava aŭ ne.

冥冥而行者，见寝石以为伏虎也，见植林以为后人也，冥冥蔽其明也。

Iranto en obskura mallumo vidas kuŝantan ŝtonon embuskanta tigro aŭ plantitan arbon homo postsekvanta, ĉar de la obskura mallumo estas kovrita la klaro.

醉者越百步之沟，以为躅步之浚也；俯而出城门，以为小之闾也；酒乱其神也。

Ebriulo volus trapasi kloakon longan je cento paŝoj, misprenante ĝin foseto je duona paŝo, kvarpiede provus eliri urban pordegon, misprenante ĝin por malgranda hejma pordeto, ĉar vino perturbas al li la psikon.

厌目而视者，视一以为两；掩耳而听者，听漠漠而以为啾啾，势乱其官也。

Kiu rigardas kun okuloj premitaj, vidas unuaĵon du; kiu aŭskultas kun oreloj kovritaj, aŭdas etan sonon bruego, ĉar la organoj estas forte malordigitaj.

故从山望牛者若羊，而求羊者不下牵也，远蔽其大也；从山下望木者，十仞之木若箸，而求箸者不上折也，高蔽其长也。

Se el de monto subenrigardas, li vidas bovojn ŝafoj, do serĉanto de ŝafoj ne povas tiri ilin al si, ĉar la malproksimeco kovras la grandan distancon. Kiu suprenrigardas arbojn el sub la monto, al tiu ili ŝajnas manĝobastonoj, do serĉanto de manĝobastonoj ne povas rompi ilin, ĉar la alteco kovras la longecon.

水动而景摇，人不一定美恶，水势玄也。

Se spegulo ŝanceliĝas kun akvo moviĝanta, oni ne povas distingi belon kaj malbelon, ĉar ĝin malheligas la malkvieta akvo.

¹⁹⁸ La pensmaniero de Xunzi ĉi tie similas al ideo de Laozi-Zhuangzi.

瞽者仰视而不见星，人不以定有无，用精惑也。

Eĉ se blindulo suprenrigardas, ne videblas steloj, do nedistingeblas, ĉu ili estas aŭ ne, ĉar la penado estas vana.

有人焉，以此时定物，则世之愚者也。

Se iu difinas tiam objekton, tiu devas esti mondskala stultulo.

彼愚者之定物，以疑决疑，决必不当。

Ĉar la stultulo por difini la objekton uzas ion dubindan kaj decidas dubinde, do la dubinda decido nepre estas malĝusta.

夫苟不当，安能无过乎？

Se malĝusta, kiel tio povus esti senerara？

夏首之南有人焉，曰涓蜀梁。

En la sudo de la riverbuŝo Xia vivis iu homo, nomata Juan Shuliang.

其为人也，愚而善畏。

Laŭ personeco li estis stulta, sed bona kaj timema.

明月而宵行，俯见其影，以为伏鬼也，仰视其发，以为立魅也，背而走，比至其家，失气而死，岂不哀哉！

Iam nokte irante sub la lumanta luno, li vidis sube sian ombron, prenis ĝin por kuŝanta fantomo, kaj rigardante supren, li ekvidis siajn harojn kvazaŭ starantajn ogrojn. Li forkuris malantaŭen, apenaŭ alveninte sian domon, perdis konscion kaj mortis. Kiel povra li estis!

凡人之有鬼也，必以其感忽之间，疑玄之时正之。

Ĝenerale, fantomon vidas iu, nepre konsternite, prenas obskure ion dubindan por ĝusta. 此人之所以无有而有无之时也，而已以正事。

Tiu prenas ne ekzistantan por io ekzistanta aŭ ion ekzistantan por ne ekzistanta, kaj li mem konsideras tion vere okazinta.

故伤于湿而击鼓鼓痹，则必有敝鼓丧豚之费矣，而未有俞疾之福也。

Kontraŭ reŭmato iu kompresas la doloran parton, batante tamburon por forigi malsanon, sed spite la elspezon de rompiĝinta tamburo kaj de oferita porkido, ne estos feliĉo resaniĝi.

故虽不在夏首之南，则无以异矣。

Kvankam tiu ne estu loĝanto sude de la riverbuŝo Xia, tamen nenia diferenco inter ili. .

凡以知，人之性也；可以知，物之理也。

Ĝenerale, la sciado apartenas al la homa denaska naturo; kion oni devas scii, tio estas la principo de objektaj aĵoj.

以可以知人之性，求可以之物之理，而无所疑止之，则没世穷年不能遍也。

Per tio koneblas la homa naturo, kaj serĉeblas la principo de estaĵoj. Sed se la limo de dubo ne estus starigita, oni ne povus ampleksi ĉion spite multjaran penadon ĝis sia morto.

其所以贯理焉虽亿万，已不足浹万物之变，与愚者若一。

Kiu, ĉe se sciante milionojn da principoj, tamen ne povas kompreni ŝanĝiĝon de objektoj, tiu estas sama kiel stultulo.

学，老身长子而与愚者若一，犹不知错，夫是之谓妄人。

Li mem, lernante, jam maljuniĝis, kaj liaj filoj kreskis, sed li restas tute egala al stultulo, ĉar li ne scias sian eraron, do oni nomas lin malklera.

故学也者，固学止之也。恶乎止之？

Do kiu lernas, tiu firme decidas la celan punkton por halti. Kie estas la punkto?

曰：止诸至足。

Mi diras: La punkto, kie oni atingos sufiĉe la plejon.

曷谓至足？曰：圣也。

Kiel estas nomata la pleja punkto? Mi diras: Ĝi estas sanktulo.

圣也者，尽伦者也；王也者，尽制者也。

La sanktulo estas tiu, kiu penetris la profundon de etiko; reĝo estas tiu, kiu penetris la profundon de reĝimo.

两尽者，足以为天下极矣。

Ambaŭ penetrintoj kapablas atingi la apogeon de la mondo.

故学者，以圣王为师，案以圣王之制为法，法其法，以求其统类，以务象效其人。

Do lernantoj devas konsideri sanktajn reĝojn kiel majstrojn, projekti leĝojn samkiel en la reĝimo de la sanktaj reĝoj, laŭ tiu ĉi leĝaro serĉi la unuigon je regado de klasoj, penadi efektiviĝi por si la similan personecon.

向是而务，士也；类是而几，君子也；知之，圣人也。

Kiu strebas kaj penadas al tio, estas klerulo; kiu aliras al la kategorio, estas noblulo; kiu scipovas tion, estas sanktulo.

故有知非以虑是，则谓之惧；有勇非以持是，则谓之贼；察孰非以分是，则谓之篡；多能非以修荡是，则谓之知；辩利非以言是，则谓之詘。

Kiu, havante scion, ne elpensas tion, estas nomata timemulo; kiu, havante kuraĝon, ne kapablas teni tion longe, estas nomata kanajlo; kiu, esplorante multe, ne kapablas distingi tion, estas nomata falsisto; kiu, estante kapabla je multe da kampoj, ne povas korekti sian diboĉon, estas nomata nura sciulo por scioj; kiu, argumentante pri profito aŭ utileco, ne kapablas vortigi tion, estas nomata nura babilemulo.

传曰：“天下有二：非察是，是察非。”

Estas dirite tradicie: “En la mondo estas dueco, do esploru ion jesan en la neado, ion

nean en la jesado.”

谓合王制与不合王制也。

T. e. ĉu io akordas aŭ ne akordas kun reĝa reĝimo?

天下有不以是为隆正也，然而犹有能分是非，治曲直者邪？

En la mondo estas ‘jeso’, kiu ne faras ion prospera kaj ĝusta. Sed ĉu troviĝas iu, kiu kapablas dividi jeson kaj neon, ĝuste trakti ion ajn kurban kaj rektan?

若夫非分是非，非治曲直，非辨治乱，非治人道，虽能之无益于人，不能无损于人。

Se ne povas dividi jeson kaj neon, trakti la kurban kaj la rektan, distinge ordigi la malordon, sekvi la homan vojon, tiam, kiom ajn kapablaj ili estas, ili ne estas taŭgaj al homoj. Sen tiaj fi-kapabluloj estos nenia perdo al homoj.

案直将治怪说，玩奇辞，以相挠滑也；案强钳而利口，厚颜而忍诟，无正而恣睢，妄辨而几利；不好辞让，不敬礼节，而好相推挤。

Ili, estante rektaĉaj, nur posedas strangan doktorinon, ludas kuriozan dirmanieron, ĉikanadas unu la alian reciproke; estante fortaĉaj, ili esta ruzaj je buŝoj, dikhaŭtaj kaj senhontaj, maljustaj kaj arbitraj, arogantaj je sinteno kaj profitemaj, ne ŝatas intercedadi, ne respektas decregularon kaj etiketon, sed ŝatas faligi unu la alian en insidon.

此乱世奸人之说也，则天下之治说者方多然矣。

En la nuna ĥaosa epoko tiaj estas manifestoj de kanajloj. Verdire, la samaj estas multaj ideologoj en la mondo.

传曰：“析辞而为察，言物而为辨，君子贱之；博闻强志，不合王制，君子贱之。”此之谓也。

Estas dirite tradicie: “Tiun, kiu konsideras nuran analizon de vortoj esploro aŭ konsideras nuran paroladon pri aĵoj distingo, nobluloj malestimas. Tiun, kiu, kiom ajn vaste aŭdu kaj havu fortan strebon, se ne konformas al reĝa reĝimo, noblulo malestimas.” Tio signifas la supre menciitan.

为之无益于成也，求之无益于得也，忧戚之无益于几也，则广焉能弃之矣。不以自妨也，不少顷干之胸中。

Se la ago ne utilas je sukceso, se la serĉado ne utilas je atingo, se la sufero ne utilas je aliro, tiam povu tute forigi ilin, por ke ili ne malhelpu vin mem kaj neniom ĝenu vin je via brusto.

不慕往，不闵来，无邑怜之心，当时则动，物至而应，事起而辨，治乱可否，昭然明矣。

Ne sopiru al la pasinta, ne ĉagreniĝu je la venonta, ne lasu vian koron tro sinĝenema. Se tempas, agu; se io atingis vin, akceptu kaj respondu; se io okazas, distingu; se tiel, riveliĝos klare, kio estas allasebla aŭ ne en ordo kaj malordo.

周而成，泄而败，明君无之有也；宣而成，隐而败，暗君无之有也。

Ĉe klera reĝo ne okazos, ke sekretplene sukcesos aŭ sekretmanke malsukcesos. Ĉe

malklera reĝo ne okazos, ke malkaŝe sukcesos aŭ kaŝe malsukcesos.

故君人者周则谗言至矣，直言反矣，小人迩而君子远矣。

Se reĝo estas kaŝema, atingas lin kalumnio, retiriĝas rektaj vortoj, aliras malgranduloj, foriras nobluloj.

《诗》云：“墨以为明，狐狸而苍。”此言上幽而下险也。

Estas dirite en *Poezio*: “Se ĉikane sofismumi la nigron hela, flava lupo fariĝus blua.” Tio diras, ke ĉe kaŝema supro estas danĝerigita la subo.¹⁹⁹

君人者宣则直言至矣，而谗言反矣，君子迩而小人远矣。

Se reĝo sintenas malkaŝa, atingas lin rektaj vortoj, retiriĝas kalumnioj, aliras nobluloj, foriras malgranduloj.

《诗》云：“明明在下，赫赫在上。”此言上明而下化也。

Estas dirite en *Poezio*: “Lumas sube, brilas supre.” Tio diras, ke ĉe klara supro transformiĝas la subo.²⁰⁰

¹⁹⁹ Ne troviĝas en la nuna *Poezio*.

²⁰⁰ Citaĵo el 诗经，大雅，大明

22 正名

ĜUSTIGO DE NOMOJ

后王之成名：刑名从商，爵名从周，文名从《礼》。

Maniero de la nomumado ĉe postaj reĝoj estas jena: nomoj pri punjuroj estas hereditaj el Shang dinastio, nomoj de titoloj el Zhou dinastio, nomoj pri kulturo de 'Dec-regularo'.²⁰¹

散名之加于万物者，则从诸夏之成俗曲期，远方异俗之乡则因之而为通。

Aldonante la diversspecajn nomojn al multaj estaĵoj, oni sekvis ĉefe morojn kaj kutimojn de centraj Xia-landoj, kaj lasis al foraj periferioj sekvi ankaŭ diferencajn morojn de provincoj en diversaj flankoj, kaj tiel interkomunikeblas.

散名之在人者：生之所以然者谓之性。

Koncernante diversspecajn ĝenerale uzatajn nomojn pri homoj, io ekzistanta ĉe naskiĝo nomiĝas 'homa naturo'.

性之和所生，精合感应，不事而自然谓之性。

La denaska homa naturo estas animo laŭ reflektita sento, ne laŭ homa arto, sed laŭ homa naturo, okazanta per si mem

性之好，恶，喜，怒，哀，乐谓之情。

Al sentoj apartenas ŝato, malŝato, ĝojo, kolero, malĝojo, ĝuo, devenantaj de la homa naturo.

情然而心为之择谓之虑。

Ke koro faras la elektadon el inter naturaj sentoj, tio estas nomata 'la pripenso'.

心虑而能为之动为之伪。

Ke laŭ la kora pripenso oni kapablas fari kaj movi ion, tio estas 'la artefarata penado'.

虑积焉，能习焉而后成谓之伪。

Efektivigi ion kun pripenso akumulita, kun kapablo lernadi – tio estas nomata 'la artefarata penado'.

正利而为谓之事。

Fari ion ĝusta je profito estas nomata 'la afero'.

正义而为谓之行。

Fari ion ĝusta je justo estas nomata 'la praktiko'.

²⁰¹ Laŭ 《尚书》康诰 estas skribite «En Yin dinastio estis punjuro, do estis etiko 殷罚有伦». Titoloj estas: 公侯伯子男 kaj 360 oficoj. Decregularo estis rit- kaj dec-reguloj ĉe Zhou dinastio 周礼.

所以知之在人者谓之知。

Scii tion, kio ekzistas ĉe homoj, estas nomata 'la sciado'.

知有所合谓之智。

Sinteze kombinita scio estas nomata 'la saĝo'.

智所以能之在人者谓之能。

Povi sinteze scii la ekzistantajn ĉe homoj – estas nomata 'la kapablo'.

能有所合谓之能。

Povi sintezi tion, kio estas, – estas nomata 'la kapablo'.

性伤谓之病。

Ke denaska naturo vundiĝas, tio estas nomata 'la malsano'.

节遇谓之命。

La bonŝanca reguligo estas nomata 'la destino'.

是散名之在人者也，是后王之成名也。

Diversspecaj ĝenerale uzataj nomoj pri tio, kio ekzistas ĉe homoj, estas nomoj, establitaj de postaj reĝoj.

故王者之制名，名定而实辨，道行而志通，则慎率民而一焉。

Kiam reĝo establis nomon, la nomo estas fiksita kaj la objekto estas distingita, la vojo estas irebla kaj la intenco estas komunikebla – tiel do oni povas prudente gvidi la popolon kaj estas unuigite en la reĝa lando.

故析辞擅作名以乱正名，使民疑惑，人多辨讼，则谓之大奸，其罪犹为符节，度量之罪也。

Kiam oni dispecigas vortojn, aŭ arbitre donadas nomojn, kaj per tio malordigas ĝustajn nomojn, tiam oni faras la popolon pli dubema kaj malfidema, la homoj multe ekplendadas je procesoj en juĝejo. Tio estas nomata 'granda tumulto', kaj oftas krimo falsadi markojn-legitimilojn kaj krimo je mezuriloj kaj pesiloj.

其民莫敢托为奇辞以乱正名，故其民恇，恇则易使，易使则公。

Kiam la popolo ne aŭdacas bizare vortumadi kaj malordigi la ĝustan nomon, tiam la popolo restas honesta. Se honesta, uzeblas facile. Do estas facile uzi ilin por publika bono.

其民莫敢托为奇辞以乱正名，故壹于道法而谨于循令矣。

Se la popolo ne aŭdacas bizare vortumadi kaj malordigi la ĝustan nomon, tiam estas unututeco je la vojo kaj la leĝaro, kaj oni sincere obeas dekretojn.

如是，则其迹长矣。

Se tiel, longdaŭras la reĝimo.

迹长功成，治之极也，是谨于守名约之功也。

Atingi la longdaŭran meriton estas plej necese por la regado. Tiu merito estas ŝuldata al la sincera konservado de konsentitaj nomoj.

今圣王没，名守慢，奇辞起，名实乱，是非之形不明，则虽守法之吏，诵数之儒，亦皆乱也。

Nun, kiam ne estas la sanktaj reĝoj, oni maldiligentas je la konservado de nomoj, aperas strangaj vortoj, malordas realeco inter nomoj kaj objektoj, malklaras esprimformo inter jesado kaj neado. Spite ke estas oficistoj gardantaj leĝaron kaj estas konfuceanoj recitantaj regularon, ĉio malordas.

若有王者起，必将有循于旧名，有作于新名。

Se ekaperus nun reĝo, tenante nepre la nomojn malnovajn, li iam kreos ankaŭ novajn nomojn.

然则所为有名，与所缘以同异，与制名之枢要，不可不察也。

Tiam li ne devas ne esplori pri tio, kiel estas akceptita la nomo, kiu estas sameco kaj diferenco rilate al estantaj nomoj, kio estas la regula principo je la establo de nomo.

异形离心交喻，异物名实玄纽，贵贱不明，同异不别，如是则志必有不喻之患，而事必有困废之祸。

Diference de formo, aliĝas koro kaj oni provus reciproke kompreni; diference de aĵo, malhele komplikiĝas nomo kaj objekto, tiuokaze ne klaras kio nobla aŭ malnobla, ne apartigeblas la sameco kaj malsameco, tiel do aperas nepre la malsano miskompreni je la intenco, okazas nepre la plago de embaraso kaj obstrukco en aferoj.

故知者为之分别，制名以指实，上以明贵贱，下以辨同异。

Do intelektulo faras al tio dividon kaj apartigon, establas la nomon kaj montras la objekton, supre klarigas la noblon kaj la malnoblon, sube distingas la samecon kaj la malsamecon.

贵贱明，同异别，如是则志无不喻之患，事无困废之祸，此所为有名也。

Klarigite je la noblo kaj la malnoblo, apartigite je la sameco kaj la malsameco, de la intenco malaperas malsano de miskompreno, de la aferoj neniiĝas la plago de embaraso kaj obstrukco, ĉar la nomoj estas establataj.

然则何缘而以同异？曰：缘天官。

Se tiel, per kiu rilato distingiĝas la sameco kaj la malsameco? Estas dirite: Per la Ĉiela sensorgano.

凡同类，同情者，其天官之意物也同，故比方之疑似而通，是所以共其约名以相期也。

Ĝenerale, kiu apartenas je klasfiko al la sama kategorio, tiu okazigas la saman senton kaj tiun la Ĉiela sensorgano prenas kiel la samon. Se, komparante iujn suspektendajn similajn, oni trovas la komunan, tiam oni donas al ili la interpromesitan nomon,

reciproke konsentite.

形体，色，理以目异，声音清浊，调竽奇声以耳异，甘，苦，咸，淡，辛，酸，奇味以口异，香，臭，芬，郁，腥，臊，洒，酸，奇臭以鼻异，疾，养，沧，热，滑，皴，轻，重以形体异，说，故，喜，怒，哀，乐，爱，恶，欲以心异。

La malsamecon de formo je objekto, koloro, desegno, distingas la okuloj; la malsamecon je voĉo, sono pura kaj malpura, tono, fajfo, bruoj, distingas la oreloj, la malsamecon je io dolĉa, maldolĉa, sala, milda, pika, acida, strangagusta, distingas la buŝo; la malsamecon je io bonodora, malbonodora, aroma, stinka, fetora, grasodoraĉa, ŝvitodoraĉa, acida, fiodoraj, distingas la nazo; la malsamecon je doloro, juko, frosto, varmego, glateco, aspro, malpezo, pezo, distingas la korpo; la malsamecon je agrablo, aflikto, ĝojo, kolero, tristo, ĝuo, amo, malamo, deziro, distingas la koro.

心有征知。征知则缘耳而知声可也，缘目而知形可也，然而征知必将待天官之当簿其类然后可也。

La koro perceptas fenomenon. Eblas tra oreloj percepti fenomenon de voĉoj, eblas tra okuloj percepti fenomenon de formoj, tiel do eblas percepti fenomenojn nepre tra la Ĉiela sensororgano, kaj la prezentitaj en koro klasifikeblas laŭ kategorio.

五官簿之而不知，心征之而无说，则人莫不然谓之不知，此所缘而以同异也。

Se la kvin organoj ne povas percepti la prezentatan, se la koro ne povas vorti pri la perceptataj, tiam oni ne povas ne nomi tion malkapabla percepti. Jen kial estas necese distingi la samecon kaj la malsamecon.

然后随而命之：同则同之，异则异之，单足以喻则单，单不足以喻则兼，单与兼无所相避则共，虽共，不为害矣。

Sekve post tio oni donas nomojn: al la samaj objektoj la saman nomon, al la malsamaj la malsamajn, se sufiĉas, al unu objekto unu nomon; se ne sufiĉas, al unu kunmetitan; se unu kaj kunmetita nomoj ne kontraŭas unu al la alia, donas la komunan nomon, ĉar kvankam komuna, ĝi ne difektas objektojn.

知异实者之异名也，故使异实者莫不异名也，不可乱也，犹使异实者莫不同名也。

Se estas sciate, ke la objektoj malsamas, oni donas malsamajn nomojn. Se donas al malsamaj objektoj malsamajn nomojn, ne povas okazi tiu ĥaoso, kiu rezultas el tio, ke doni al malsamaj objektoj la saman nomon.

故万物虽众，有时而欲遍举之，故谓之物。

Ĉar troviĝas amaso da objektoj, oni volas iam ampleksi ilin, kaj tial oni donas al ili nomon de klasifikita aĵo.

物也者，大共名也。

La aĵo nun havas la komunan nomon grupigitan en granda klasifiko.

推而共之，共则有共，至于无共然后止。

Laŭ analogio oni grupigas aĵojn en la komuna aĵo, kaj la komuna aĵo havas plie komunecon kun la alia, kaj tiel atingas finfine la kulminon, kie troviĝas jam nenio komuna.

有时而欲遍举之，故谓之鸟兽。鸟兽也者，大别名也。

En iu momento oni volas ampleksi ĉion, kaj nomas ilin, ekz-le, 'birdoj', 'bestoj'. Tiuj birdo kaj besto estas apartaj nomoj de granda klasifiko.

推而别之，别则有别，至于无别然后止。

Laŭ analogio oni apartigas ilin, la apartigita havas plie apartigendan, kaj tiel la apartigo atingas finfine la kulminon, kie troviĝas jam nenio apartigebla.

名无固宜，约之以命。约定俗成谓之宜，异于约则谓之不宜。

Nomo ne havas iun konvenon firme fiksitan, ĝi estas nomata laŭ interkonsento. La nomoj, kiuj fariĝis moro decidita kun interkonsento, iĝas konvenaj. Kiuj diferencas de la interkonsentita, tiuj estas nomata malkonvenaj.

名无固实，约之以命实，约定俗成谓之实名。

Rilate al nomo sen fiksita objekto, interkonsento donas la nomon al la objekto, kaj kiam la interkonsento fiksiĝos kiel moro, ĝi fariĝos la nomo de la objekto.

名有固善，径易而不拂，谓之善名。

Estas nomo kun certa bono; kiu estas rekta, facila sen konfuzo, tiu estas nomata la bona nomo.

物有同状而异所者，有异状而同所者，可别也。

Inter aĵoj troviĝas io sama je la ŝajno, estante malsama je la klasifiko, kaj io malsama je la ŝajno, estante sama je la klasifiko. Oni devas apartigi ilin.

状同而为异所者，虽可合，谓之二实。

La samaj je la ŝajno, fariĝintaj malsamaj je la klasifiko, kvankam kunmetebblas, tamen oni devas nomi ilin du objektoj.

状变而实无别而为异者，谓之化。

Kvankam ŝanĝiĝas la ŝajno, tamen la realaĵo ne apartigeblas sed malsamiĝis, tio estas nomata la transformiĝo.

有化而无别，谓之一实。

Kiu transformiĝas sed neapartigeblas, tiu estas nomata la unu objekto.

此事之所以稽实定数也，此制名之枢要也。

Tio estas farenda por observi objektojn kaj difini nomojn. Tio estas esence gravega por establi la nomojn.

后王之成名，不可不察也。

Je la establo de nomoj far de la postaj reĝoj oni ne devas ne ekzameni tion.

“见侮不辱”“圣人不爱己”“杀盗非杀人也”，此惑于用名以乱名者也。

“Ke estas insultate, ne estas malhonoro”, “Sanktulo ne amas sin mem”, “Mortigi ŝteliston ne estas hommortigo” – tiuj estas konfuzo je la uzado de nomoj, ke malordigas nomojn.²⁰²

验之所以为有名而观其孰行，则能禁之矣。

Se ekzameni por kio ekzistas la nomoj kaj observi kiel estas efektivigitaj tiuj nomoj, tiam malpermesblas tiuj eldiroj.

“山渊平”“情欲寡”“刍豢不加甘，大钟不加乐”，此惑于用实以乱名者也。

“Monto kaj abismo estas ebenaj”, “pasio estas malgranda”, “bredita viando ne donas dolĉon, granda sonorilo ne donas muzikecon”²⁰³ – tiuj estas konfuzo je la esenco de objektoj, ke malordigas nomojn.

验之所缘无以同异而观其孰调，则能禁之矣。

Se ekzameni kaŭzan rilaton de sameco-malsameco kaj observi kiel ili akordas, – tiam malpermesblas tiuj eldiroj.

“非而谒楹”“有牛马非马也”，此惑于用名以乱实者也。

“Fluganta sago ne trapasas kolonon”, “Bovoĉevaloj ne estas ĉevaloj”²⁰⁴, – tiuj estas konfuzo je la esenco de objektoj, ke malordigas nomojn.

验之名约，以其所受悖其所辞，则能禁之矣。

Se ekzameni interkonsenton de nomoj kaj la akceptata kompreno kontraŭas la esprimitan per vortoj, tiam malpermesblas tiuj eldiroj.

凡邪说辟言之离正道擅作者，无不类于三惑者矣。

Ĝenerale, malpravaj eldiroj kaj tordita argumento, devojiĝintaj de ĝusta vojo kaj ruzlerte faritaj, povas esti klasifikitaj en tri konfuzoj.

故明君知其分而不与辨也。

Do kleraj estroj, sciante la distingon, ne diskutas kun ili.

夫民易一以道而不可共故，故明君临之以势，道之以道，申之以命，章之以论，禁之以刑。

Estas facile unuigi la popolon laŭ la vojo, sed ne eblas kundividi egale kun ili la motivon, tial do klera estro turnas sin al ili kun potenca aŭtoritato, gvidas ilin per la vojo, sciigas ilin per dekretoj, klarigas al ili kun sentencoj, malpermesas al ili per punjuroj.

故其民之化道也如神，辨势恶用矣哉！

Transformi la popolon laŭ la vojo estas kvazaŭ dieca ago, kial necesus uzi potencon de

²⁰² La unua estas eldiro de Song Xing 宋铨, la tria – de Mozi 墨子. Ankaŭ la dua estas supozata, ke apartenas al Mozi.

²⁰³ La unua estas la eldiro de Huishi, la dua – de Song-zi, la tria – de Mozi.

²⁰⁴ Je la unua mi sekvas Knoblock. La lasta videblas en Mozi. Vd. p. 238

sofizmado?

今圣王没，天下乱，奸言起，君子无势以临之，无刑以禁之，故辨说也。

Nun malestas sanktaj reĝoj, tumultas la mondo, aperadas maligna vortumado, al kio nobluloj-reĝoj ne havas potencon por kontraŭstari, ne troviĝas punjuroj por malpermesio, tiel do oni sofismumas kun dialektiko.

实不喻然后命，命不喻然后期，期不喻然后说，说不喻然后辨。

Sen kompreni la realan objekton oni donas la nomon, sen kompreni la nomon oni difinas, sen kompreni la difinon oni parolas, sen kompreni la parolon oni distingas.

故期，命，辨，说也者，用之大文也，而王业之始也。

Difini, nomi, distingi, klarigi estas granda kulturo por utila funkciigo, kaj tio estas ja la komenco de la reĝa afero.

名闻而实喻，名之用也。

Ke, aŭdante nomon, oni povas kompreni la objekton, tio estas la utileco de nomoj.

累而成文，名之丽也。

Kombinite konsistigi frazon estas ja beleco de nomoj.

用，丽俱得，谓之知名。

Havigi al si ambaŭ la utilecon kaj la belecon estas nomata la scipovo je nomoj.

名也者，所以期累实也。

Nomumo estas difino de akumulitaj objektoj.

辞也者，兼异实之名以论一意也。

Vortumo estas konsistigi unu signifon en la parolado ampleksa kun nomoj de diversaj objektoj.

辨，说也者，不异实名以喻动静之道也。

Argumento estas la parolado por komprenigi dinamikon-statikon de la vojo pere de sendiferentaj objektnomoj.

期，命也者，辨，说之用也。

Difino estas la nomumado por ke la argumento kaj la parolado estu utilaj.

辨，说也者，心之象道也。

La argumento kaj la parolado estas la vojo por prezenti la koro.

心也者，道之工宰也。

La koro estas inĝeniero je la vojo.

道也者，治之经理也。

La vojo estas ĝenerala direktanto de la regado.

心合于道，说合于心，辞合于说，正名而期，质请而喻，辨异而不过，推类而不悖，听则合文，辨则尽故。

La koro akordas kun la vojo, la parolado akordas kun la koro, la vortumo akordas kun la

parolado, kaj ĝusta nomo, difinite, estas komprenebla bonkvalite laŭ la reala postulo. La kontraŭstaro je argumento estas ne troigata, la analogio estas ne kontraŭdira, io aŭskultata konformas al la frazo, la argumento penetras la rezonon.

以正道而辨奸，犹引绳以持曲直。

Per ĝusta vojo atakargumenti la ĉikanaĵon estas samkiel tenante ŝnuron mezuri ion kurban aŭ rektan.

是故邪说不能乱，百家无所窜。

Tial do perturba parolado ne povas okazigi ĥaoson, cent oratoroj ne havas lokon por ĉirkaŭvagadi plu.

有兼听之明而无奋矜之容，有兼覆之厚而无伐德之色。说行则天下正，说不行则白道而冥穷，是圣人之辨说也。

Estas tia persono, kiu, estante klera por amplekse aŭskultadi, neniom arogantas je la mieno, estante grandanima por amplekse kovri ĉion ajn, neniom faras mienon fieri je la virto. Se farate, kion li parolis, la mondo iĝas ĝusta; ne farate, kion li parolas, li, nur eklumigante la vojon, kaŝas sin nekonate en mallumo. Jen kia esta la argumenta parolado far de sanktuloj.

《诗》曰：“颙颙印印，如珪如璋，令闻令望。岂弟君子，四方谓纲。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Humile milda, alta je aspiro, li ŝajnas jado aŭ juvelo, estante fama kaj respektata, li estas ĝojplene trankvila noblulo, modela por kvar direktoj.” Tio signifas la supre menciitan.²⁰⁵

辞让之节得矣，长少之理顺矣，忌讳不称，祆辞不出，以仁心说，以学心听，以公心辨。

La noblulo posedas moderecon cedi humile, sekvas vicordon inter homoj pli maljuna kaj pli juna, nomas nenion tabuan, eldiras nenion malbonsignan, ĝojas je koro per bonvoleco, aŭdas elkore por la lernado, argumentas elkore por publiko.

不动乎众人之非誉，不治观者之耳目，不赂贵者之权势，不利传辟者之辞，故能处道而不贰，吐而不夺，利而不流，贵公正而贱鄙争，是士君子之辨说也。

Li ne estas influata per honorigo aŭ malhonorigo far de homoamaso, ne aŭdacas mastri orelojn kaj okulojn de observantoj, ne subaĉetas aŭtoritatan potencon de nobeloj, ne profitigas al si vortojn de flatemuloj, tiel do povas sekvi la vojon sen disdubiĝo, insultate ne skuiĝas, profitante ne inercias, estimas justecon kaj malestimas kverelaĉon, – jen kia estas la maniero de argumentparolado far de kavaliroj-nobluloj.

《诗》曰：“长夜漫兮，永思寡兮。大古之不慢兮，礼义之不愆兮，何恤人之言兮！”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Longa estas la nokto, longe mi pensadas pri miaj eraroj.

²⁰⁵ Citaĵo el 诗经，大雅，卷啊.

Antikvan historion mi ne ignoras, je decreguloj mi ne devojiĝas, kial do mi devus timi alies eldiron!”²⁰⁶ Tio signifas la supre menciitan.

君子之言，涉然而精，俛然而类，差差然而齐。

Parolado de noblulo estas vasta sed esenca, simpla sed kategoria, dispersa sed enorda.

彼正其名，当其辞，以务白其志义者也。

Li ĝustigas la nomojn, faras la vortojn celkonformaj, klopodas fari la justan strebon klara.

彼名辞也者，志义之使也，足以相通则舍之矣；苟之，奸也。

Ĉe li la nomoj kaj vortoj estas por esprimi la justan strebon, do sufiĉas, nur se eblas interkomunikiĝi. Malbone, se uzi ilin senzorge.

故名足以指实，辞足以见极，则舍之矣。

Do sufiĉas, nur se la nomo povu montri la objekton, nur se vortoj povu prezenti la plej gravan.

外是者谓之切，是君子之所弃，而愚者拾以为己宝。

Kio devias de tio, estas nomata la afektaĵo, kiun noblulo forĵetas, sed stultulo levprenas kiel sian trezoron.

故愚者之言，芴然而粗，嘖然而不类，譖譖然而沸。

Do dirmaniero de stultulo estas senbaza kaj kruda, disputema sed senkategoria, bruanta kaj bolanta.

彼诱其名，眩其辞，而无深于其志义者也。

Li trompas la nomojn, blufas la vortojn, estante malprofunda je la strebo al justeco.

故穷藉而无极，甚劳而无功，贪而无名。

Do li, penante fervore, ne atingas la plej gravan; laborante multe, ne ricevas meriton; avidante, ne akiras reputacion.

故知者之言也，虑之易知也，行之易安也，持之易立也，成则必得其所好而不遇其所恶焉。而愚者反是。

La parolado de intelektulo estas prudenta kaj facile komprenebla, facile praktikebla, facile kunportebla, do, efektive, nepre ricevas bonan rezulton kaj ne alfrontas la malbonan. Sed male estas al stultulo.

《诗》曰：“为鬼为蜮，则不可得；有靦面目，视人罔极。作此好歌，以极反侧。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Se fantomo, se monstra testudo, tio ne akireblas; se io havanta mienon kaj okulojn, videblas klarege al homoj. Tiu bona kanto estas versita, por ke la

²⁰⁶ Citaĵo ne troviĝas en nuna eldono de *Poezio*.

plej grava ne kliniĝu flanken.”²⁰⁷ Tio signifas la supre menciitan.

凡语治而待去欲者，无以道欲而困于有欲者也。

Ĝenerale, kiu, parolante regadon, pledas por forigo de deziroj, tiu, sen gvidi la dezirojn laŭ la vojo, estas ĝenata per siaj propraj deziroj.

凡语治而待寡欲者，无以节欲而困于多欲者也。

Ĝenerale, kiu, parolante regadon, pledas por malpliigo de deziroj, tiu, sen deteni sin je la deziroj, estas ĝenata per multe da deziroj.

有欲无欲，异类也，生死也，非治乱也。

Havi dezirojn kaj malhavi dezirojn apartenas al tute alia kategorio, t. e. apartenas al vivo aŭ morto, sed ne al regado aŭ ĥaoso. .

欲之多寡，异类也，情之数也，非治乱也。

Multo kaj malmulto je deziroj apartenas al alia kategorio, t. e. apartenas al kvanto de sentoj, sed ne al regado aŭ ĥaoso.

欲不待可得，而求者从所可。

La deziroj ne atendas permeson, sed postulas, obeante al ebleco.

欲不待可得，所受乎天也；求者从所可，受乎心也。

La deziroj ne atendas la permeson, ĉar ili estas ricevataj de la Ĉielo; dezirantoj obeas al la ebleco, ricevita per la koro.

所受乎天之一欲，制于所受乎心之多，固难类所受乎天也。

Unu deziro, ricevita de la Ĉielo, estas multe reguligata per io ricevata de la koro, do estas malfacile klasifiki ĝin en unu kategorio kun io ricevita de la Ĉielo.

人之所欲，生甚矣；人之所恶，死甚矣。

Kio estas la plej dezirata de homoj, tio estas la vivo; kio estas la plej maldezirata de homoj, tio estas la morto.

然而人有从生成死者，非不欲生而欲死也，不可以生而可以死也。

Sed homoj, sekvante la vivon, iĝas mortanta – tio estas ne pro tio, ke ili ne deziras la vivon kaj deziras la morton. Ili devas morti, ĉar ne eblas al ili vivi plu.

故欲过之而动不及，心止之也。

Tio, ke oni ne povus iam moviĝi laŭdezire, kvankam havante tro da deziroj, estas, ĉar la koro haltigas.

心之所可中理，则欲虽多，奚伤于治！

Se la koro konformas ĝuste al rezono, malgraŭ kiom ajn multe da deziroj, la regado neniel difektiĝas.

欲不及而动过之，心使之也。

²⁰⁷ Citaĵo el 诗经，小雅，何人斯. Vd. la ĉap. 8 儒效

Ke kun neperfekta deziro oni iam moviĝas tro, tion faras ankaŭ la koro.

心之所可失理，则欲虽寡，奚止于乱！

Kiam mankas la rezono al tiu, kiun allasas la koro, eĉ se la deziro malmultas, kiel estus haltigebla la malordo!

故治乱在于心之所可，亡于情之所欲。

Ordo kaj malordo allaseblas depende de la koro, sed ne de deziroj el sentoj.

不求之其所在，而求之其所亡，虽曰我得之，失之矣。

Se oni serĉas la kaŭzon ne tie, kie ĝi ekzistas, sed tie, kie ĝi ne ekzistas, tiam, kvankam dirus ke “Mi trovis ĝin”, tamen fakte perdis ĝin.

性者，天之就也；情者，性之质也；欲者，情之应也。

Per denaska naturo estas dotite de la Ĉielo; sentoj estas kvalito de la denaska naturo; deziroj estas reflektado de la sentoj.

以所欲为可得而求之，情之所必不免也；以为可而道之，知所必出也。

Serĉi tion, kio estas dezirata kiel io atingebla, nepre estas neeviteble al sentoj. Kapablo rigardi ion atingebla laŭ la vojo devenas nepre de intelekto.

故虽为守门，欲不可去，性之具也。

Do eĉ pordgardisto ne povas forigi dezirojn, ĉar donitajn denaske.

虽为天子，欲不可尽，欲虽不可尽，可以近尽也；欲虽不可去，求可节也。

Eĉ al Ĉiela Filo ne elĉerpeblas deziroj. Kvankam ne elĉerpeble, tamen eblas proksimiĝi al la plejo. Kvankam estas neforigeblaj la deziroj, tamen eblas lasi la postulon modera.

所欲虽不可尽，求者犹近尽；欲虽不可去，所求不得，虑者欲节求也。

Kvankam deziroj estas neelĉerpeblaj, tamen serĉanto proksimiĝas al la plejo. Kvankam deziroj estas neforigeblaj, tamen, se neakirebas io serĉata, pensanto detenas sin je la postulo de deziroj.

道者，进则近尽，退则节求，天下莫之若也。

Vojserĉanto, irante antaŭen, proksimiĝas al la plejo aŭ, irante malantaŭen, detenas sin de la postulo. Nenio estas pli bona ol tio en la mondo.

凡人莫不从其所可，而去其所不可。

Ĝenerale, ĉiuj homoj sekvas kion li rigardas allasebla, kaj forigas kion li rigardas neallasebla.

知道之莫之若也，而不从道者，无之有也。

Estus neniu, kiu ne sekvas la vojon, sciante, ke nenio estas pli bona ol la vojo.

假之有人而欲南无多，而恶北无寡，岂为夫南者之不可尽也，离南行而北走也哉？

Supozu, ke iu deziretas iri suden sed ne deziregas iri norden. Ĉu li irus norden, rezignante iri suden, kiel ajn fora al li ŝajnus la vojo al sudo？

令人所欲无多，所恶无寡，岂为夫所欲之不可尽也，离得欲之道而取所恶也哉？

Lasu iun dezireti ion aŭ ne deziregi. Kiel ajn neatingebla estu la dezirata de li, ĉu li prenis la nedeziratan, forĵetante la deziratan?

故可道而从之，奚以损之而乱！不可道而离之，奚以益之而治！

Tial do, kiu aprobas la vojon kaj sekvas ĝin, tiun oni neniel povus malprofitigi kaj malordigi. Kiu ne aprobas la vojon kaj forĵetas ĝin, tiun oni neniel povus profitigi kaj ordigi.

故知者论道而已矣，小家珍说之所愿皆衰矣。

Intelektulo parolas nur la vojon. Malgrandulo parolas strangan fi-doktorinon, dezirante, ke ĉio atrofiĝu kaj pereu.

凡人之取也，所欲未尝粹而来也；其去也，所恶未尝粹而往也。

Ĝenerale, homoj prenas ne tuton, kion ili dezirus, kaj forĵetas ne tuton, kion ili maldezirus.

故人无动而不可以不与权俱。

Do homoj ne povas ne konduti sen vekta pesilo.

衡不正，则重县于仰而人以为轻，轻县于俛而人以为重，此人所以惑于轻重也。

Se la vekto estas ne ĝusta, io peza leviĝas supren, ke oni supozus tion malpeza, io malpeza malleviĝas suben, ke oni supozus tion peza. Tiel do oni konfuziĝas je pezo-malpezo.

权不正，则祸托于欲而人以为福，福托于恶而人以为祸，此亦人所以惑于祸福也。

Se la pesilo estas ne ĝusta, ion malfeliĉan oni laŭ sia arbitra ŝato supozus feliĉo, ion feliĉan oni laŭ sia arbitra malŝato supozus malfeliĉo. Tiel do oni kofuziĝas je feliĉo-malfeliĉo.

道者，古今之正权也，离道而内自择，则不知祸福之所托。

La vojo estas ja ĝusta pesilo de antikve ĝis nun. Kiu, disiĝinte de la vojo, elektas laŭ sia konsidero, tiu ne povas scii en kio kuŝas malfeliĉo kaj feliĉo.

易者以一易一，人曰无得亦无丧也；以一易两，人曰无丧而有得也；以两易一，人曰无得而有丧也。

Se komercisto interŝanĝis unuopon kontraŭ unuopo, oni diras, ke tiu ne gajnis nek perdis. Se li interŝanĝis duopon kontraŭ unuopo, oni diras, ke li ne perdis sed gajnis. Se li interŝanĝis unuopon kontraŭ duopo, oni diras, ke li ne gajnis sed perdis.

计者取所多，谋者从所可。

Kiu kapablas kalkuli, tiu prenas plimulte; kiu konsideras, tiu obeas al io allasebla.

以两易一，人莫之为，明其数也。

Homoj ne faras interŝanĝi unuopon kontraŭ duopo, ĉar ili klare kalkulas.

从道而出，犹以一易两，奚丧？

Irado laŭ la Vojo similas al interŝanĝo de duopo kontraŭ unuopo, kia perdo en tio?

离道而内自择，是犹以两易一也，奚得？

Disiĝo de la Vojo egalas kun memelektado laŭ sia konsidero, similas al interŝanĝo de unuopo kontraŭ duopo, kia gajno en tio?

其累百年之欲，易一时之嫌然且为之，不明其数也。

Tio estas same, kiel interŝanĝi momentan eksplodon de malamo kontraŭ akumulita longe dum cent jaroj deziro. Se iu aŭdacus fari tion malgraŭe, estas pro tio, ke ne kapablas kalkuli klare.

有尝试深观其隐而难其察者，志轻理而不重物者，无之有也；外重物而不内忧者，无之有也。

Nun ni provu profunde observi ion kaŝitan, malfacilan esplori. Ne povas esti tiu, kiu, malestimante rezonon en sia strebo, ne traktas la aĵojn grave. Ne povas esti tiu, kiu, estimante ekstere aĵojn grave, ne ĝenas sin interne.

行离理而不外危者，无之有也；外危而不内恐者，无之有也。

Ne povas esti tiu, kiu, disiĝinte de rezono, ekstere kondutas sendanĝere. Ne povas esti tiu, kiu, endanĝerigante ekstere, ne timas interne.

心忧恐则口衔刍豢而不知其味，耳听钟鼓而不知其声，目视黼黻而不知其状，轻暖平簟而体不知其安。

Ĝenate per timo en la koro, homo ne povas gustumi viandojn de bestoj breditaj per furaĝo, nek povas aŭdi la belsonojn de sonoriloj kaj tamburoj, nek povas ĝui per okuloj desegnojn de brodaĵoj, nek povas ripozi trankvile je la korpo, vestite malpeze kaj varme, sidante sur ebena kana mato.

故向万物之美而不能赚也，假而得问而赚之，则不能离也。

Eĉ se ĉe la beleco de miriado da estaĵoj, li ne povas ĝui ĝin; eĉ se li havas ŝancon vidi kaj ĝui ĝin, li ne povas liberiĝi.

故向万物之美而盛忧，兼万物之利而盛害。

Ĉe la beleco de miriado da estaĵoj ŝvelas lia spleno. Dum li ricevas abunde profiton de miriado da estaĵoj, despli kreskas lia ofendiĝo.

如此者，其求物也，养生也？粥寿也？

Ĉu tia homo, kun dezirataj posedaĵoj, povus nutri sian vivon? Ĉu li povus longe vivi?

故欲养其乐而攻其心，欲养其名而乱其行。

Li, dezirante nutri sian ĝuon, turmentas al si la koron; dezirante nutri al si la renomon, lasas sin malorde konduti.

如此者，虽封侯称君，其与夫盗无以异；乘轩戴纁，其与无足无以异。

Tia homo, eĉ se feŭd-landestro, nomata reĝo, tamen ne diferencas de simpla rabisto, eĉ se rajdanta pompan kaleŝon, portanta altrangan ĉapon, tamen estas ne alia ol senpiedulo.

夫是之谓以己为物役矣。

Oni nomas lin faranta sin sklavo de aĵoj.

心平愉，则色不及佣而可以养目，声不及佣而可以养耳，蔬食菜羹而可以养口，粗布之衣，粗糲之履而可以养体，屋室，庐庑，葭稊蓍，尚机筵而可以养形。

Kies koro estas trankvila, ties okulojn povas nutri eĉ ne luksa koloro, ties orelojn povas nutri eĉ ne luksa sono, ties buŝon povas nutri simpla manĝaĵo kaj legoma supo, ties korpon povas nutri kruda vestaĵo kaj linaj ŝuoj, ties vivformon povas nutri mansardo, kana kurteno, pajlmato, tablo kaj pajlkuseno.

故万物之美而可以养乐，无势列之位而可以养名。

Do la beleco de miriada da aĵoj povas nutri lian plezuron kaj senpotenca majesteco povas nutri lian nomon.

如是而加天下焉，其为天下多，其和乐少矣，夫是之谓重己役物。

Se tiel, kiam estos al li aldonita la mondo, li faros multe por la mondo. Eĉ se li havus al si malmulte da distro, li faros sin t. n. grava por uzi utile aĵojn.

无稽之言，不见之行，不闻之谋，君子慎之。

Noblulo prudente detenas sin de senbaza parolado, nevidanta ago, neaŭdinta projekto.

23 性恶

MALBONECO DE LA HOMA NATURO

人之性恶，其善者伪也。

Denaska naturo de homo estas malbona, io bona en li estas artefarita.

今人之性，生而有好利焉，顺是，故争夺生而辞让亡焉；生而有疾恶焉，顺是，故残贼生而忠信亡焉；生而有耳目之欲，有好声色焉，顺是，故淫乱生而礼义文理亡焉。

Nun laŭ la homa naturo naskiĝas profitamo. Sekve, okazas konkurenco kaj rabado, malestas humileco kaj cedemo; denaske estas envio kaj malamo, sekve, aperas krueleco kaj malestas lojaleco kaj fideleco; denaske kun deziro de oreloj kaj okuloj estas inklimo al belsono kaj eroto, sekve, estiĝas voluptemo kaj ĥaoso, mankas decreguloj, justo, civilizo kaj rezono.

然则从人之性，顺人之情，必出于争夺，合于犯分乱理而归于暴。

Tial do, se iu obeas la homan naturon kaj sekvas al homaj sentoj, nepre tiu okazigas konkurencon kaj rabadon, aŭdacas krimi je la divido de devoj kaj malordigi principon, atingas perforton aŭ tiranecon.

故必将有师法之化，礼义之道，然后出于辞让，合于文理，而归于治。

Do nepre necesas la transformigo laŭ la leĝoj de sanktaj majstroj, laŭ la vojo de decreguloj kaj justo, rezulte de tio, estiĝas la humileco kaj cedemo, la akordiĝo kun civilizo kaj rezono, la sekvado de bonordo.

用此观之，然则人之性恶明矣，其善者伪也。

Se observi el tiu vidpunkto, estas klare, ke la homa naturo estas malbona, kaj io bona estas artefarita.

故枸木必将待鬻栝蒸矫然后直，钝金必将待砉厉然后利。

Do, kurba arbo estas rektigita nepre nur post ĝustiga kadro kun vaporiĝa varmo, malakra metalo estas akrigita nepre nur per akriĝŝtono.

今人之性恶，必将待师法然后正，得礼义然后治。

Nun la homa naturo estas malbona, nepre post ricevado de la majstraj leĝoj ĝi iĝas rekta, havigante al si la decregulojn kaj justo, ĝi ordiĝas.

今人无师法则偏险而不正，无礼义则悖乱而不治。

Sen leĝoj de majstroj homoj bigotas kaj malrektas, sen decreguloj kaj justo ili devojiĝas en ĥaoso kaj malordas.

古者圣王以人之性恶，以为偏险而不正，悖乱而不治，是以为之起礼义，制法度，以矫饰人之情性而正之，以扰化人之情性而导之也。

Antikve sanktaj reĝoj trovis la homan naturon malbona, bigota kaj malrekta, devojiĝanta en ĥaoso kaj ne regebla, tial do starigis la decregulojn kaj juston, leĝaron, kaj per tio korektis kaj ornamis homajn pasiojn, gvidis, transformante homajn pasiojn. 始皆出于治，合于道者也。

Ĉiuj komencis esti regataj bonorde, konforme al la vojo.

今之人，化师法，积文学，道礼义者为君子；纵性情，安恣睢，而违礼义者为小人。

El nunaj homoj, oni konsideras noblulo tiun, kiu transformiĝas laŭ la leĝoj de majstroj, akumulas civilizan scion kaj lernas, iras la vojon de decreguloj kaj justo, sed oni konsideras malgrandulo tiun, kiu obeas la denaskan naturon kaj pasiojn, vivas sinindulge, kontraŭe al decreguloj kaj justo.

用此观之，然则人之性恶明矣，其善者，伪也。

Se observi el tiu vidpunkto, klaras, ke la homa naturo estas malbona, io bona estas artefarita.

孟子曰：“人之学者，其性善。”

Mengzi diris: “Ke homo lernas, tio montras la bonecon de la homa naturo.”

曰：是不然。是不及知人之性，而不察乎人之性，伪之分者也。

Mi diras: Ne pravas. Li ne atingis la komprenon de la homa naturo, ĉar li ne inspektis homon por distingi la naturon kaj la artefaritan.

凡性者，天之就也，不可学，不可事；礼义者，圣人之所生也，人之所学而能，所事而成者也。

Ĝenerale, la naturo, dotita de la Ĉielo, ne akirebla per lernado, nek per servado; sed decreguloj kaj justo estas kreitaj de sanktuloj, do al homoj estas lerneblaj kaj praktikeblaj, estas serveblaj por perfektigi.

不可学，不可事而在人者谓之性，可学而能，可事而成之在人者谓之伪。

Io neakirebla per lernado nek per servado estas denaska naturo en la homo. Kion oni povas lerni kaj praktiki, kion oni povas servi kaj perfektigi, tio estas nomata la artefariteco.

是性，伪之分也。

Jen la distingo inter la naturo kaj la artefariteco.

今人之性，目可以见，耳可以听。

Se temas pri la homa naturo, per okuloj oni povas vidi, per oreloj povas aŭdi.

夫可以见之明不离目，可以听之聪不离耳，目明而耳聪，不可学明矣。

Ke klare videblas, tio ne disiĝas de okuloj; ke aŭdeblas delikate, tio ne disiĝas de oreloj.

Evidente, ke fari okulojn klaraj kaj orerojn akraj estas nelerneble.

孟子曰：“今人之性善，将皆丧失其性故也。”

Mengzi diris: “Kvankam la homa naturo estas bona, tamen nun ial ĉiuj perdas la naturon.”

曰：若是，则过矣。

Mi diras: Erara estas tia eldiro.

今人之性，生而离其朴，离其资，必失而丧之。

Nun se temas pri la homa naturo, homo, naskiĝinte, jam disiĝas de sia simpleco, disiĝas de sia kvalito, nepre perdinte ilin.

用此观之，然则人之性恶明矣。

Se observi el tiu vidpunkto, estas evidente, ke la homa naturo estas malbona.

所谓性善者，不离其朴而美之，不离其资而利之也。

Laŭ t. n. la boneco de denaska naturo, estus bela tiu, kiu ne disiĝus de la simpleco, estus utila tiu, kiu se ne disiĝus de la natura kvalito.

使夫资朴之于美，心意之于善，若夫可以见之明不离目，可以听之聪不离耳，故曰目明而耳聪也。

Tiu teorio traktas la denaskan kvaliton kaj simplecon kiel belecon, denaskan koron kaj volon kiel bonon, samkiel okulojn, nedisigeblajn de klarvido, samkiel orelojn, nedisigeblajn de akra aŭdado, dirante, ĉar denaske okuloj estas klaraj, oreloj estas akraj.

今人之性，饥而欲饱，寒而欲暖，劳而欲休，此人之情性也。

Laŭ denaska naturo homoj malsataj volas satmanĝi, en malvarmo volas varmon, en laciĝo volas ripozi, – tio estas la natura sento de homoj.

今人饥，见长而不敢先食者，将有所让也；劳而不敢求息者，将有所代也。

Se iu, malsata, vidante la pliaĝan, ne aŭdacas manĝi antaŭ ol li ekmanĝas, tio estas rezulto de humileco. Se iu, kvankam laciĝinte, tamen ne aŭdacas peti ripozon, tio devenas de sindona servemo al la alia.

夫子之让乎父，弟之让乎兄，子之代乎父，弟之代乎兄，此二行者，皆反于性而悖于情也；然而孝子之道，礼义之文理也。

Gefiloj humile cedas al sia patro, malpliaĝa frato cedas al la pliaĝa, gefiloj serveme plenumas laboron anstataŭ la patro, malpliaĝa frato serveme plenumas laboron anstataŭ la pliaĝa frato, – tiuj du agoj montras, ke ĉiuj kondutas spite la naturon, kontraŭ la natura sento, sed laŭ la vojo de fila pietato kaj laŭ civiliza rezono de justaj dereguloj.

故顺情性则不辞让矣，辞让则悖于情性矣。

Malsamas du agoj ‘sekvi denaskan naturon de sentoj’ aŭ ‘humile cedi’, kaj cedi humile kontraŭas al la denaska naturo de sentoj.

用此观之，然则人之性恶明矣，其善者伪也。

Se observi el tiu vidpunkto, estas evidente, ke la denaska naturo de homoj estas malbona. Io bona estas artefarata.

问者曰：“人之性恶，则礼义恶生？”

Iu demandus, dirante: “Se malbona estas la homa naturo, tiuokaze ankaŭ la decreguloj kaj justo naskiĝis de malbono, ĉu ne?”²⁰⁸

应之曰：凡礼义者，是生于圣人之伪，非故生于人之性也。

Mi respondas: Ĝenerale, la decreguloj kaj justo estas naskitaj de sanktuloj kiel artefaritaĵo, sed ne naskiĝis el la homa naturo.

故陶人埴埴而为器，然则器生于工人之伪，非故生于人之性也。

Kiam potfaristo faras el argilo vazon, la vazo estas naskita de metiisto kiel artefaritaĵo, sed ne naskiĝis el la homa naturo.

故工人斫木而成器，然则器生于工人之伪，非故生于人之性也。

Kiam metiisto faras el arbo lignaĵon, la lignaĵo estas naskita de la metiisto kiel artefaritaĵo, sed ne naskiĝis el la homa naturo.

圣人积思虑，习伪故，以生礼义而起法度，然则礼义法度者，是生于圣人之伪，非故生于人之性也。

Sanktuloj akumulis pensojn, lernis artefaradi, naskis decregulojn kaj juston, starigis leĝaron kaj mezurojn. Do la decregularo, justo, leĝaro kaj mezuroj naskiĝis kiel artefaritaj de sanktuloj, sed ne naskiĝis el la homa naturo.

若夫目好色，耳好声，口好味，心好利，骨体肤理好愉佚，是皆生于人之情性者也，感而自然，不待事而后生之者也。

Okuloj ŝatas kolorojn, oreloj ŝatas belsonon, buŝo ŝatas bonguston, koro ŝatas profiton, kaj ostoj, karno, haŭto ŝatas sens-plezuron, – ĉio ĉi-tio naskiĝas laŭ denaska homa naturo. La sensaro estas la naturo, ne atendanta rezulton de homa penado, nek aposteriore naskiĝanta.

夫感而不能然，必且待事而后然者，谓之生于伪。

Kio sentata sed ne eblas nature estiĝi, kaj kio, nepre atendante la penadon estiĝas, tio estas nomata la artefarite naskiĝanta.

是性，伪之所生，其不同之征也。

Malsamas karakterizaĵo inter la kaŭzitaj per la naturo kaj per la artefarado.

故圣人化性而起伪，伪起而生礼义，礼义生而制法度。

Sanktuloj transformas la naturon kaj estigas la artefaritaĵon, rezulte de la artefarado naskis laŭjustajn decregulojn, kaj rezulte de ties naskiĝo estas starigitaj la leĝoj kaj la

²⁰⁸ 恶 havas signifon 'malbono' kaj 'kiel'. Ĉiuj esploristoj tradukas la frazon “Kiel naskiĝis la decreguloj?”

normo de mezuroj.

然则礼义法度者，是圣人之所生也。

Tial do laŭjustaj decreguloj, leĝoj kaj mezurnormo estas naskitaj de sanktuloj.

故圣人之所以同于众，其不异于众者，性也；所以异而过众者，伪也。

Tio, kio estas sama inter sanktuloj kaj popolamaso, kio ne diferencas inter popolamaso, estas ja la denaska naturo; tio, kio diferencas aŭ superas popolamason, estas io artefarita.

夫好利而欲得者，此人之情性也。

Profitamo kaj avideco estas la denaska naturo de homoj.

假之人有弟兄资财而分者，且顺情性，好利而欲得，若是则兄弟相拂夺矣；且化礼义之文理，若是则让乎国人矣。

Ni supozu, kiam iuj fratoj dividas heredaĵon inter si, tiam laŭ denaska naturo de sentoj, per profitamo kaj avideco, la fratoj ekkverelas inter si por rabi unu de la alia. Se ili ŝanĝiĝus por sekvi decregulojn kaj civilizan rezonon, tiam ili humile cedus eĉ al samnaciuloj.

故顺情性则弟兄争矣，化礼义则让乎国人矣。

Tiel do, se laŭ la denaska naturo de sentoj, eĉ fratoj interbaltalas, sed se transformite de decreguloj, ili humile cedas eĉ al samnaciuloj.

凡人之欲为善者，为性恶也。

Ĝenerale, homoj dezirus fari bonon, ĉar la denaska naturo estas malbona.

夫薄愿厚，恶愿美，狭愿广，贫愿富，贱愿贵，苟无之中者，必求于外；故富而不愿财，贵而不愿势，苟有之中者，必不及于外。

Kiu estas maldika, tiu dezirus esti dika; kiu estas malbela, dezirus esti bela; kiu malvasta, dezirus esti vasta; kiu malriĉa, dezirus esti riĉa; kiu malnobela, dezirus esti nobela, – tiel do kion ne havas interne, tion oni kore dezirus de ekstere. Kiu estas riĉa, tiu ne deziras propraĵon; kiu estas nobela, ne deziras potencon. Havante interne ĉe si, oni ne bezonas postuli de ekstere.

用此观之，人之欲为善者，为性恶也。

Se observi el tiu vidpunkto, homoj dezirus fari bonon, ĉar ilia denaska naturo estas malbona.

今人之性，固无礼义，故强学而求有之也；性不知礼义，故思虑而求知之也。

Nun, la homa naturo ne estas ekipita per laŭjustaj decreguloj, do homoj devas lerni forte kaj serĉi por havigi al si tiujn. Laŭ naturo oni ne scias laŭjustan decregulojn, do per profunda pensado oni devas serĉi por scii tiujn.

然则生而已，则人无礼义，不知礼义。

Je nura naskiĝo al homoj mankas laŭjustaj decreguloj, ne sciate pri tiuj.

人无礼义则乱，不知礼义则悖。

Homoj sen laŭjustaj decreguloj malordos, ne sciante pri decreguloj, ili kontraŭos.
然则生而已，则悖乱在己。

Je nura naskiĝo, oni restas perversa kaj ribelema en si mem.

用此观之，人之性恶明矣，其善者伪也。

Se observi el tiu vidpunkto, estas evidente, ke la homa naturo estas malbona kaj io bona estas artefarita.

孟子曰：“人之性善。”

Mengzi diris: “Homa naturo estas bona.”

曰：是不然。凡古今天下之所谓善者，正理平治也；所谓恶者，偏险悖乱也。

Mi diras: Ne pravas. Ĝenerale t. n. bono en la mondo de antikve ĝis nun kuŝas en ĝusta rezono kaj paca ordo, t. n. malbono kuŝas en danĝera devio kaj perversa ĥaoso.

是善恶之分也已。

Jen riveligas la distingo inter bono kaj malbono.

今诚以人之性固正理平治邪？

Ĉu li nun sincere vidas la homan naturon havanta origine la ĝustan rezonon kaj la pacan ordon？

则有恶用圣王，恶用礼义矣哉！

Se jes, kial estis bezonataj la sanktaj reĝoj, kial estis bezonataj la decreguloj kaj justo？

虽有圣王礼义，将曷加于正理平治也哉！

Kvankam al sanktaj reĝoj propre apartenas la decreguloj ka justo, kial estis aldonataj la ĝusta rezono kaj la paca ordo？

今不然，人之性恶。

Li nun ne pravas. La homa naturo estas malbona.

故古者圣人以人之性恶，以为偏险而不正，悖乱而不治，故为之立君上之势以临之，明礼义以化之，起法正以治之，重刑罚以禁之，使天下皆出于治，合于善也。

Antikve sanktuloj vidis la homan naturon malbona, rigardis ĝin devianta danĝere kaj malĝusta, perverse ĥaosa kaj malorda, tial do starigis supre la reĝon por trakti ĝin per potenco, por fari laŭjustajn decregulojn klaraj kaj transformi ĝin, starigi leĝojn ĝuste kaj regi ĝin, establi pezan punjuron kaj per tio malpermesi krimon, kaj lasi ĉion en la mondo regata en ordo konforme al la bono.

是圣王之治，而礼义之化也。

Tio estas ja la regado far sanktaj reĝoj, la transformado per decreguloj.

今当试去君上之势，无礼义之化，去法正之治，无刑罚之禁，倚而观天下民人之相与也。

Nun prove ni forigu la potencon de supra reĝo, provu transformi sen decreguloj, senigu

ĝustan leĝaron kaj regi, provu sen punjuroj malpermesi, nur observu, kiel la poplo en la mondo interrilatatos.

弱勢，則夫強者害弱而奪之，眾者暴寡而晬之，天下之悖亂而相亡不待頃矣。

Ĉe malforta regpotenco, la pliforta damaĝos la malplifortan kaj forrabos lin, la plimulto tirane perfortos la malplimulton kaj taŭzos ĝin, la mondo malordiĝos kaj baldaŭ pereos kune.

用此觀之，然則人之性惡明矣，其善者偽也。

Se observi el tiu vidpunkto, estas evidente, ke la homa naturo estas malbona kaj io bona estas artefarita.

故善言古者必有節於今，善言天者必有征於人。

Kiu povas bone argumenti pri la antikvo, nepre havas bazon en nuno. Kiu povas bone argumenti pri la Ĉielo, posedas nepre pruvon je la homoj.

凡論者，貴其有辨合，有符驗，故坐而言之，起而可設，張而可施行。

Ĝenerale, la argumentanto konsideras kara tion, kio konformas al identiga distingo kaj al eksperimentoj, do lia vorto, dirita sidante, efektiveblas ekstarante, manifestite tuj fareblas.

今孟子曰“人之性善”，無辨合符驗，坐而言之，起而不可設，張而不可施行，豈不過甚矣哉！

Nun Mengxi diris: “La homa naturo estas bona.” Tio ne konformas al identiga distingo kaj eksperimentoj. La vorto, dirite sidante, ne efektiveblas ekstarante, manifestite ne fareblas. Kia erarego tio estas!

故性善則去聖王，息禮義矣；性惡則與聖王，貴禮義也。

Tezo pri bona naturo forigas sanktajn reĝojn, likvidas decregulojn; tezo pri malbona naturo rilatas kun sanktaj reĝoj kaj respektas decregulojn.

故槩括之生，為枸木也；繩墨之起，為不直也；立君上，明禮義，為性惡也。

Naskiĝis prem-rektigilo por kurba arbo, estiĝis tuĉŝnuro por malrektaĵo, supre staras reĝo, por ke decreguloj estu klaraj, ĉar la denaska naturo estas malbona.

用此觀之，然則人之性惡明矣，其善者偽也。

Se observi el tiu vidpunkto, estas evidente, ke la homa naturo estas malbona kaj io bona estas artefarita.

直木不待槩括而直者，其性直也；枸木必將待槩括烝矯然後直者，以其性不直也。

Rekta arbo ne bezonas prem-rektigilon, ĉar ĝia naturo estas rekta per si mem. Kurba arbo nepre bezonas rektigilon kaj varman vaporon por fariĝi rekta, ĉar ĝia naturo estas malrekta.

今人之性惡，必將待聖王之治，禮義之化，然後皆出于治，合于善也。

Nun la homa naturo estas malbona, do nepre atendas la regadon far sankta reĝo, la transformiĝon per decreguloj, por ke ĉiuj ekiru poste en ordo konforme al la bono.

用此观之，然则人之性恶明矣，其善者伪也。

Se observi el tiu vidpunkto, estas evidente, ke la homa naturo estas malbona kaj io bona estas artefarita.

问者曰：“礼义积伪者，是人之性，故圣人能生之也。”

Iu demandas, dirante: “Decreguloj, akumulita artefaritaĵo, devenas ankaŭ de la homa naturo, tial do sanktuloj povis naski ilin.”

应之曰：是不然。夫陶人埴埴而生瓦，然则瓦埴岂陶人之性也哉？

Mi respondas: Tio ne pravas. Potisto produktas tegolon el argilo, sed ĉu la portegola argilo estas la naturo de potisto?

工人斫木而生器，然则器木岂工人之性也哉？

Metiisto produktas ujon el hakita ligno, sed ĉu la ligno por la ujo estas la naturo de metiisto?

夫圣人之于礼义也，辟则陶埴而生之也，然则礼义积伪者，岂人之本性也哉？

La decreguloj de sanktuloj, por ekzemplo, estis naskitaj kvazaŭ kneditaj de potisto. La decreguloj estas aklumulita artefaritaĵo, sed ĉu eblus konsideri ilin origina naturo de homoj?

凡人之性者，尧，舜之与桀，跖，其性一也；君子之与小人，其性一也。

Ĝenerale, la homa naturo estas unu sama inter ĉe Yao-Shun kaj ĉe Jie-Zhi; la denaska naturo estas unu sama inter ĉe nobluloj kaj ĉe malgranduloj.

今将以礼义积伪为人之性邪？然则有曷贵尧，禹，曷贵君子矣哉？

Se nun konsideri akumulitan artefaritaĵon, decregulojn, la homa denaska naturo, tiam en kio do kuŝas la nobleco de Yao-Yu, la nobleco de nobluloj?

凡所贵尧，禹，君子者，能化性，能起伪，伪起而生礼义。

Ĝenerale, la nobleco de Yao, Yu kaj nobluloj kuŝas en la kapablo transformi la naturon, en la kapablo ekkonstrui artefaritaĵon, kaj per artefarado naski laŭjustajn decregulojn. 然则圣人之于礼义积伪也，亦犹陶埴而生之也。

Tial do, decreguloj ĉe sanktuloj estas akumulite artefaritaj samkiel potisto knedas argilon kaj produktas.

用此观之，然则礼义积伪者，岂人之性也哉？

Se observi el tiu vidpunkto, ĉu eblus konsideri la decregulojn, akumulitan artefaritaĵon, la homa denaska naturo?

所贱于桀，跖，小人者，从其性，顺其情，安恣睢，以出乎贪利争夺。

Malnobleco ĉe Jie, Zhi, kaj malgranduloj devenas de la obeado al la denaska naturo, de la sekvado al sentoj, de sinindulgo je la kaprica arbitreco, elmontris avidecon, profitamon, batalemon kaj rabemon.

故人之性恶明矣，其善者伪也。

Do estas evidente, ke la homa naturo estas malbona kaj io bona estas artefarita.

天非私曾，骞，孝己而外众人也，然而曾，骞，孝己独厚于孝之实而全于孝之名者，何也？

Pro fila pietato la Ĉielo altetaksis Zeng, Qian, Xiaoji, tamen ne kun personfavorado, ignorante popolamason.²⁰⁹ Ceng, Qian, Xiaoji estis sole plenestimindaj je la praktiko kaj je la nomo de la fila pietato, kial?

以褻于礼义故也。

Ĉar ili penetris la profundon de laŭjustaj decreguloj.

天非私齐，鲁之民而外秦人也，然而于父子之义，夫妇之别，不如齐，鲁之孝具敬父者，何也？

La Ĉielo pli alte taksis popolojn de Qi-regno kaj Lu-regno ne kun personfavorado, ol Qin-reganojn. Rilate al justo inter patro kaj filo, rilate al distingo inter geedzoj, Qin ne estas pli bona je la fila pietato kaj je la patrorespekto ol Qi kaj Lu, kial?

以秦人之从情性，安恣睢，慢于礼义故也。

Ĉar Qin-regnantoj, obeante al sentoj, denaska naturo kaj sinindulgo je kaprica arbitreco, malinklinas al decreguloj.

岂其性异矣哉？

Ĉu diferencas la denaska naturo inter ĉiuj landanoj？

“涂之人可以为禹”，曷谓也？

“Ajna surstrata homo povas fariĝi Yu” – kion signifas tiu eldiro？

曰：凡禹之所以为禹者，以其为仁义法正也。

Mi diras: Kio faris Yu la sankta Yu, estas lia sindediĉo al bonvoleco, justeco, juro, rekteco.

然则仁义法正有可知可能之理，然而涂人之也，皆有可以知仁义法正之质，皆有可以能仁义法正器具，然则其可以为禹明矣。

La bonvoleco, la justeco, la leĝaro, la rekteco estas konebla kaj celumebla principo eĉ al surstrata homo. Ĉiu homo havas kvaliton kaj kapablon por kompreni la bonvolecon, la justecon, la juron, la rektecon. Ĉiu havas ilon kaj kapablon por praktiki la bonvolecon, la justecon, la juron, le rektecon. Do estas evidente, ke ĉiu povas fariĝi Yu.

今以仁义法正为固无可只可能之理邪？

Nun supozu, kio okazus, se definitive ne eblus kompreni nek praktiki la principon de bonvoleco, justeco, juro, rekteco？

然则唯禹不知仁义法正，不能仁义法正也。

²⁰⁹ 曾参 Zeng Shen, 闵子骞 Minzi Qian estas disĉiploj de Konfuceo, 孝己 Xiaoji estas filo de 高宗 Gao Zong de Yin Dinastio.

Tiuokaze, eĉ Yu ne povus kompreni bonvolecon, justecon, juron, rektecon, ne povus praktiki la bonvolecon, la justecon, la juron, la rektecon.

将使涂之人固无可以知仁义法正之质，而固无可以能仁义法正之具邪？

Supozu, kio okazus, se surstrataj homoj ne havus kvaliton nek kapablon kompreni la bonvolecon, la justecon, la juron, la rektecon, ne havus ilon por praktiki la bonvolecon, la justecon, la juron, la rektecon？

然则涂之人也，且内不可以知父子之义，外不可以知君臣之正。

Tiam surstrataj homoj ne povus kompreni la justan devon inter patro kaj filo interne, nek povus kompreni rektecon de rilatoj inter reĝon kaj vasalon ekstere.

不然。今涂之人者，皆内可以知父子之义，外可以知君臣之正，然则其可以知之质，可以能之具，本夫仁义之可知之理，可能之具，然则其可以为禹明矣。

La fakto ne estas tia. Nun surstrataj homoj ĉiuj povas kompreni la justan devon inter patro kaj filo interne, povas kompreni rektecon de rilatoj inter reĝon kaj vasalon ekstere, do havas kvaliton kaj kapablon kompreni, havas ilon kaj kapablon praktiki. Ĉar ili principe havas rezonon por kompreni la bonvolecon-justecon kaj havas ilon por ebligi la praktikon, evidentas, ke ili povas fariĝi persono kiel Yu.

今使涂之人伏术为学，专心一志，思索孰察，加日县久，积善而不息，则通于神明，参于天地矣。

Se nun oni lasas al ĉiu ajn surstrata homo studi arton-teknikon, praktikadi kaj lernadi, koncentriĝi je unu aspiro kaj strebo, pensadi kaj eskzamenadi, dum longe tagon post tago por ĉiam, akumuladi bonon senĉese, tiam li scipovos fariĝi diece klera, konsistiganta la triopon kune kun la Ĉielo kaj la Tero.

故圣人者，人之所积而致矣。

Sanktulo estas tiu, kiu kiel homo faras la plejeblan al homoj por akumulado de bono.

曰：“圣可积而致，然而皆不可积，何也？”

Iu demandas: “Sanktulo povas fari la akumuladon, tamen ĉiuj aliaj ne povas akumuli bonon, kial?”

曰：可以而不可使也。

Mi respondas: Povas fariĝi tia ĉiuj, sed oni ne povas igi ilin fari tion.

故小人可以为君子而不肯为君子，君子可以为小人而不肯为小人。

Malgrandulo povas fariĝi noblulo, sed tamen li ne konsentas fari sin nobla; noblulo povas fariĝi malgrandulo, sed tamen li ne konsentas fari sin malgranda.

小人，君子者，未尝不可以相为也，然而不相为者，可以而不可使也。

Al malgrandulo kaj noblulo ambaŭ eblus fariĝi la alia, sed tamen ambaŭ ne povas fari tion, ĉar kvankam eblus, tamen oni ne povas igi ilin fari tion.

故涂之人可以为禹则然，涂之人能为禹，则未必然也。

Do al surstrata homo eblus fariĝi tia, kia estas Yu. La surstrata homo povus fariĝi Yu, sed ankoraŭ ne ĉiam tiel.

虽不能为禹，无害可以为禹。

Kvankam li ne povus fariĝi Yu, tamen malhelpas lin fari sin tia nenio.

足可以遍行天下，然而未尝有能遍行天下者也。

Piedoj povas traŭri la mondon, sed tamen ankoraŭ neniu povis piediri tra la mondon.

夫工匠，农，贾，未尝不可以相为事也，然而未尝能相为事也。

Ne estas maleble al metiisto, terkulturisto kaj komercisto ŝanĝi inter si okupon, sed tamen ankoraŭ neniu povas ŝanĝi la asignitan rolon.

用此观之，然则可以以为，未必能也；虽不能，无害可以为。

Se observi el tiu vidpunkto, kio farebla, tio ne ĉiam eblas efektiviĝi. Malgraŭ ke ne eblas efektiviĝi, tamen nenio malhelpas onin fari tion.

然则能不能之与与不可，其不同远矣，其不可以相为明矣。

Estas granda malsameco inter kio efektiveblas aŭ ne kaj kio fareblas aŭ ne. Evidente, ke oni ne devas miskompreni ambaŭ eblecon.

尧问于舜曰：“人情何如？”

Yao demandis Shun, dirante: “Kia estas homa sento?”

舜对曰：“人情甚不美，又何问焉？妻子具而孝衰于亲，嗜欲得而信衰于友，爵禄盈而忠衰于君。人之情乎！人之情乎！甚不美，又何问焉？”

Shun respondis: “La homa sento estas tre malbela, kial do vi demandas? Havante ĉe si edzinon kaj gefilojn, oni ŝrumpas je la fila pietato al gepatroj. Saturite je apetito kaj avido, oni ŝrumpas je fideleco al amikoj. Ricevinte titolon kaj salajron, oni ŝrumpas je lojaleco al sia estro. Ho, homa sento, homa sento! Kiel malbela ĝi estas! Kial vi demandas?”

唯贤者为不然。有圣人之知者，有士君子之知者，有小人之知者，有役夫之知者。

Ne estas tia nur ĉe saĝuloj. Estas saĝeco de sanktulo, estas saĝeco de klerulo-noblulo, estas saĝeco de malgrandulo, estas saĝeco de laborulo.

多言则文而类，终日议其所以，言之千举万变，其统类一也，是圣人之知也。

Estas tiu – multaj vortoj, parolataj de li, enhavas klerecon bone klasifikite, lia diskurso, dirite tutan tagon, enhavas la rezonon, lia parolado estas kvankam kalejdoskopa, tamen kohera en unueco, tia estas la saĝeco de sanktulo.

少言则径而省，论而法，若佚之以绳，是士君子知也。

Estas tiu – kvankam li parolas malmulte, tamen la vorto, dirita de li, estas rekta kaj

konciza, logika kaj laŭleĝa, kvazaŭ ordigita per tuĉŝnura liniilo – tia estas la saĝeco de klerulo-noblulo.

其言也諛，其行也悖，其举事多悔，是少人之知也。

Estas tiu – lia vorto flata, lia konduto malmorala, lia afero-entrepreno plena de rimorso – tia estas la saĝeco de malgrandulo.

齐给便敏而无类，杂能旁魄而无用，析速粹孰而不急，不恤是非，不论曲直，以期胜人为意，是役夫之知也。

Estas tiu – li estas kvankam vigla, varilerta, facila, rapidmova, tamen klasifikas ion ajn senkategorie, kvankam kapabla je senordaj scikonoj kaj pedante multescia, tamen senutila, kvankam decidema, lerta je parolado, tamen sentaŭga por urĝa uzo, li, ne zorgante pri pravenco-malpravenco nek argumentante pri kurbeco-rekteco, celas nur triumfi en disputado – tia estas la saĝeco de laborulo.

有上勇者，有中勇者，有下勇者。

Estas supra kuraĝo, estas meza kuraĝo, estas suba kuraĝo.

天下有中，敢直其身；先王有道，敢行其意；上不循于乱世之君，下不俗于乱世之民；仁之所在无贫穷，仁之所亡无富贵；天下知之，则欲与天下同苦乐之；天下不知之，则傀然独立天地之间而不畏，是上勇也。

Persono de la supra kuraĝo estas tiu, kiu aŭdacas teni sin rekta, kiam ekzistas la meza vojo en la mondo; tiu, kiu aŭdacas efektiviĝi la volon, kiam ekzistas la vojo de antikvaj reĝoj; tiu, kiu ne obeas supre estron, malordigantan la mondon, nek cedas sube al moro de popolo en la ĥaosa mondo; tiu, kiu ne zorgas je sia malriĉeco-mizero, kie troviĝas homa bonvoleco, nek zorgas je sia riĉeco-rango, kie ne troviĝas bonvoleco; tiu, kiu dividas ĝojon-malĝojon kune kun la mondo, se la mondo akceptas lin, sed tenas sin sendependa, firme starante sen timo inter la Ĉielo kaj la tero, se la mondo ne akceptas lin.

礼恭而意俭，大齐信焉而轻货财，贤者敢推而尚之，不肖者敢援而废之，是中勇也。

Persono de la meza kuraĝo estas tiu, kiu tenas sin humila laŭ decreguloj kaj detenas sin je libervolo; tiu, kiu alte estimas konvinkon kaj fidon, malestimas monon, aŭdacas elekti saĝulojn kaj laŭdi ilin, kaj aŭdacas mallevi aŭ forĵeti malkompetentulojn. , 轻身而重货，恬祸而广解，苟免，不恤是非，然不然之情，以期胜人为意，是下勇也。

Persono de la suba kuraĝo estas tiu, kiu vidas sin malgrava kaj avidas grave monon, serĉas senĝene plagon kaj ĉiam sinpravigas, senkulpigas sin, laŭemocie ne zorgante pri vero aŭ malvero, pravenco aŭ malpravenco, sed nur celante iel ajn venki aliulojn.

繁弱，钜黍，古之良弓也，然而不得排檠则不能自正。

Fanruo kaj Jushu estas nomoj de antikvaj bonaj sagoj. Sed sen iu prema framo ili ne

povis fariĝi rektaj per si mem.

桓公之葱，太公之阙，文王之录，庄君之芻，闔閭之干将，莫邪，钜阙，辟闾，此皆古之良剑也，然而不加砥厉则不能利，不得人力则不能断。

Zong ĉe la duko Huan, Que ĉe la Granda duko, Lu ĉe la reĝo Wen, Hu ĉe la regnestro Zhuang, plue Ganjiang, Moye, Juque kaj Bilü ĉe Helü, estas nomoj de antikvaj bonaj glavoj. Sed sen akriĝi per akriĝŝtono ili ne povas esti akraj, sen homa forto ili ne povas tranĉi iun ajn.

骅骝，驪驥，纒离，绿耳，此皆古之良马也，然而前必有衔轡之制，后有鞭策之威，加之以造父之馭，然后一日而致千里也。

Hualiu, Qiji, Xianli, kaj Lüer, estas ĉiuj la nomoj de antikvaj bonaj ĉevaloj. Sed anticipe nepre bezonatas trajnado kun mordaĵo kaj brido, kaj poste bezonatas minacado kun skurĝo kaj vergo, kaj aldone bezonatas trejnado far lerta ĵokeo kiel Zaofu. Poste ili fine ekpovas kuratingi mil *li*ojn en unu tago.

夫人虽有性质美而心辩知，必将求贤师而事之，择良友而友之。

Eĉ se havante denaske belan kvaliton kaj rezoneblan scipovon en sia koro, la persono devas nepre serĉi por si la saĝan instruiston kaj sekvi lin, elekti por si la bonan amikon kaj amikiĝi kun li.

得贤师而事之，则所闻者尧，舜，禹，汤之道也；得良友而友之，则所见者忠信敬让之行也。

Kiu akiris saĝajn instrusitojn kaj sekvas illin, tiu povas aŭdi la vojon de Yao, Shun, Tang; kiu akiris bonajn amikojn kaj amikiĝis kun ili, tiu povas vidi la konduton de lojaleco, fideleco, respektemo kaj cedemo.

身日进于仁义而不自知也者，靡使然也。

Tiu persono progresas ĉiutage je bonvoleco kaj justeco, ne sciante mem, ĉar la ĉirkaŭo faras lin tia.

今与不善人处，则所闻者欺诬诈伪也，所见者污漫，淫邪，贪利之行也，身且加于刑戮而不自知者，靡使然也。

Se nun iu vivas kune kun malbonuloj, li aŭdas trompon, kalumnion, perfidon kaj falson, kaj vidas konduton malpuran, senbridan, diboĉan, malĉastan, avidan, profitaman. Eĉ se li estu kondamnita per ia ajn puno kaj mortpuno, tamen li ne scias mem, ĉar la ĉirkaŭo faras lin tia.

传曰：“不知其子视其友，不知其君视其左右。”靡而已矣，靡而已矣。

Estas dirite tradicie: “Se vi ne komprenas la filon, vidu lian amikon; se vi ne scias la estron, vidu lian ĉirkaŭularon dekstran kaj maldekstran.” Gravas nur la ĉirkaŭo, nur la ĉirkaŭo.

24 君子

LA NOBLULO

天子无妻，告人无匹也。

Ne estas partnera edzino ĉe la Ĉiela Filo, car neniu el homoj egalas al li.

四海之内无客礼，告无适也。

Ene de kvar maroj al li ne bezonatas decreguloj, sekvendaj por si kiel gasto, ĉar al li nenien eliri eksteren.

足能行，待相者然后进；口能言，待官人然后诏。

Kvankam liaj gamboj kapablas piediri, tamen li, atendante gvidon de ministroj, ekiras. Kvankam lia buŝo kapablas paroli, tamen li, atendante raporton de servistoj, ekparolas dekreton.

不视而见，不听而聪，不言而信，不虑而知，不动而功，告至备也。

Li, ne vidante, rigardas; ne aŭdante, aŭskultas; ne parolante, kredigas; ne zorgante, povoscias, ne moviĝante, meritas. Tio signifas, ke li estas perfekte preta je ĉio.

天子也者，势至重，形至佚，心至愈，志无所诎，形无所劳，尊无上矣。

La Ĉiela Filo estas la plej aŭtoritata kaj potenca, relasas pleje je la korpo, ĝojas pleje je la koro, ne subiĝas je la strebo, ne penigas la korpon – li estas la plej estimata supro.

《诗》曰：“普天之下，莫非王土；率土之滨，莫非王臣。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Ĉie ajn sub la Ĉielo estas reĝa lando, ĉie ajn en ĉiu regata periferio estas reĝaj subuloj.” Tio signifas la supre menciitan.²¹⁰

圣王在上，分义行乎下，则士大夫无流淫之行，百吏官人无怠慢之事，众庶百姓无奸怪之俗，无盗贼之罪，莫取犯大上之禁，天下晓然皆知夫盗窃之人不可以为富也，皆知夫贼害之人不可以为寿也，皆知夫犯上之禁不可以安也。

Kiam supre staras sankta reĝo kaj oni sube praktikas ĉiu per si mem devon laŭ klasdistingo kaj juston, tiam kleruloj-ŝtatofuncistoj ne degeneras en diboĉado, cent laborfunkciuloj ne maldiligentas je siaj oficoj, simpla popolamaso ne infektiĝas de malbona groteska moro, ne estiĝas krimoj de rabistoj, oni ne aŭdacas leĝrompi la malpermeson, proklamitan de supro. Ĉiuj en la mondo bone scias, ke ŝtelintoj ne povas riĉiĝi, kaj scias, ke murdintoj-atencintoj ne povas vivi longe, kaj scias, ke trapaŝintoj de malpermeso, proklamita de supro, ne povas resti trankvila.

由其道，则人得其所好焉；不由其道，则必遇其所恶焉。

²¹⁰ Citaĵo el *poezio*, 小雅, 北山.

Laŭ ĉi tiu vojo oni ricevas la ŝatatan, sen ĉi tiu vojo oni nepre renkontas la malŝatatan.
是故刑罚綦省而威行如流。

Tiel do, eĉ se estu reduktita la punado, la majesteco de potenco disvastiĝas, kvazaŭ akvo fluas.

世晓然皆知夫为奸则虽隐窜逃亡由不足以免也，故莫不服罪而请。

Ĉiuj en la mondo bone scias, ke ne sukcesos eskapi krom akcepti punon aŭ peti indulgon ĉiu malbonulo, kien ajn li kaŝas sin aŭ fuĝas.

《书》曰：“凡人自得罪。”此之谓也。

Estas dirite en *Libro*: “Ĉiu krimulo konfesas sian kulpon kaj ricevas memvole la punon.” Tio signifas la supre menciitan.²¹¹

故刑当罪则威，不当罪则侮；爵当贤则贵，不当贤则贱。

Se puno estas laŭmezura al krimo, ĝi havas aŭtoritaton; se puno ne estas laŭmezura al krimo, ĝi estas ignorata; se titolo estas taŭga por saĝo, ĝi estas estimata; se titolo ne estas taŭga por saĝo, ĝi estas malestimata.

古者刑不过罪，爵不踰德，故杀其父而臣其子，杀其兄而臣其弟。

Antikve la puno ne estis tro pli peza ol la krimo taŭgas, la titolo donata ne estis pli alta ol la virto posedata. Do eĉ se kies patro estis mortopunita, ties filo povis esti postenigita ministro; kies frato estis mortopunita, ties juna frato povis fariĝi ministro.

刑罚不怒罪，爵赏不踰德，分然各以其诚通。

La punado ne malamas krimulon, la postenigo-honorigo ne superas la virton posedatan. Al ĉiu estis asignita io taŭga laŭmezure kun distingo kaj sincereco.

是以为善者劝，为不善者沮，刑罚綦省而威行如流，政令致明，而化易如神。

Do, kiu faras bonon, al tiu estas subtenate; kiu faras malbonon, al tiu estas barate. Eĉ se la punjuro estu reduktita, tamen la aŭtoritato disvastiĝas majeste, kiel akvo fluanta.

Ordonoj kaj dekretoj estas plej klaraj, ĉio transformiĝas facile kvazaŭ diece.

传曰：“一人有庆，兆民赖之。”此之谓也。

Estas dirite tradicie: “Se unu persono havas bonon por celebri, tiam ankaŭ miriada da popoloj per tio estas favorata.”²¹² Tion signifas la supre menciitaj.

乱世则不然：刑罚怒罪，爵赏踰德，以族论罪，以世举贤。

Sed en malorda tempo ne estas tiel: la punado ekscesas terure pli severe ol la krimo taŭgas, la postenigo kaj honorigo altas ekscese pli ol la virto posedata, laŭ kolektiva respondeca sistemo la tuta familio de unu krimulo estas akuzata, laŭ la devena avantaĝo estas promociataj la posteuloj de antaŭaj saĝuloj.

²¹¹ Videblas simila frazo en 尚书，康诰， sed ne ĝuste sama, kiel la citaĵo.

²¹² Videblas en 尚书，吕刑.

故一人有罪而三族皆夷，德虽如舜，不免刑均，是以族论罪也。

Do, se unu homo kulpas, tiam tri rilataj al li generacioj estas ĉiuj kulpigitaj. Eĉ se troviĝus el akuzitoj iu virta persono kiel Shun, li ne povas eviti la saman punon, – jen tia estas la familia respondeca sistemo de punado.

先祖当贤，后子孙必显，行虽如桀，纣，列从必尊，此以世举贤也。

Sed, kies prapatro antaŭe estis saĝulo, ties posteuloj nepre povas ĝui privilegion. Eĉ se ili kondukas samkiel Jie-Zhou, ili viciĝas nepre respektataj. Jen tia estas la promocio laŭ estimo de deveno.

以族论罪，以世举贤，虽欲无乱，得乎哉？

Sub la sistemo kiel la punado laŭ familia respondeco kaj la promocio laŭ la deveno, kvankam oni volus, ke ne estu malordo, tamen ne atingebblas la celo.

《诗》曰：“百川沸腾，山家峯崩，高岸为谷，深谷为陵。哀今之人，胡憯莫惩！”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Cent riveroj bolegas, montpintoj disfalas, altaj bordoj iĝas valoj, ravinoj fariĝas montetoj, – veas nunaj homoj, sed al ili eblas neniel kaj neniam tion haltigi.”²¹³ Tio signifas la supre menciitan.

论法圣王，则知所贵矣；以义制事，则知所利矣。

Se publika opinio viglas laŭ la leĝo de sankta reĝo, oni scias kion estimi kara. Se entrepreno estas kontrolata laŭ justo, oni scias en kio kuŝas profito.

论知所贵，则知所养矣；事知所利，则动知所出矣。

Se publika opinio scias kion estimi kara, oni scias kion kaj per kio nutradi; se oni scias kiun entreprenon profitodona, oni scias la movon de kie eliri.

二者，是非之本，得失之原也。

Tiuj du kondiĉoj estas la fundamento de praveco kaj malpraveco, la fonto de akiro kaj perdo.

故成王之于周公也，无所往而不听，知所贵也。

Do, en rilato de la reĝo Cheng al la Duko Zhou, la unua ĉiam kaj ĉie aŭdadis la lastan, ĉar sciis kion estimi.

桓公之于管仲也，国事无所往不用，知所利也。

En la rilato de la Duko Huan al Guan Zhong, la unua utiligis la lastan ĉiam kaj ĉie en la ŝtataj aferoj, ĉar sciis kie kuŝas profito.

吴有伍子胥而不能用，国至于亡，倍道失贤也。

En Wu-regno servis Wu Zixu, sed oni ne povis uzi lin, do la regno finfine pereis, devojiĝinte kaj perdinte la saĝulon.

故尊圣者王，贵贤者霸，敬贤者存，慢贤者亡，古今一也。

²¹³ Citaĵo el 诗经，小雅，十月之交.

Do, kiu estimas la sanktan, fariĝas reĝo, kiu estimas la saĝan, fariĝas hegemoniulo, kiu respektas la saĝan, povas ekzisti, kiu ignoras la saĝan, pereas – tio estas same en la antikvo kaj en la nuno.

故尚贤使能，等贵贱，分亲疏，序长幼，此先王之道也。

Do estimi la saĝan kaj utiligi la kapablan, klasifiki la noblan kaj la malnoblan, dividi la proksiman kaj la malproksiman, vicigi la pliaĝan kaj la malpliaĝan – tio estas la vojo de antikvaj reĝoj.

故尚贤使能，则主尊下安；贵贱有等，则令行而不流；亲疏有分，则施行而不悖；长幼有序，则事业捷成而有所休。

Se oni estimas la saĝan kaj utiligas la kapablan, tiam la estro estas respektata kaj la subo vivas trankvile. Se oni klasifikas la noblan kaj la malnoblan, tiam ordonoj estas efektivigitaj senprokraste. Se oni dividas la proksiman kaj la malproksiman, tiam sen maljusto estas disdonate je almozo kaj favoro. Se enorde estas la vico inter la pliaĝa kaj la malpliaĝa, tiam aferoj estas farataj subite kaj oni povas ripozi.

故仁者，仁此者也；义者，分此者也；节者，死生此者也；忠者，惇慎此者也。

Bonvoleco estas fari tion bonvoleme, justo estas distingi kaj dividi tion, prudenteco estas vivi kaj morti laŭ tio, lojaleco estas servi al tio honeste kaj humile.

兼此而能之，备矣。

Kiu povas ampleksi en si ĉion, tiu estas preta.

备而不矜，一自善也，谓之圣。

Kiu, estante preta, ne arogantas kaj mem unuanime strebas al bono, tiu estas nomata la sanktulo.

不矜矣，夫故天下不与争能而致善用其功。

Li ne estas aroganta, do ne lasas al la mondo interbatali, kaj li povas fari bonon laŭeble plej meritante.

有而不有也，夫故为天下贵矣。

Li, ekzistante, ne troviĝas, tial do fariĝis kara al la mondo.

《诗》曰：“淑人君子，其仪不忒；其仪不忒，正是四国。”此之谓也。

Estas dirite en *Poezio*: “Puranima noblulo, lia sinteno ne devojiĝas. Ĉar lia sinteno ne devojiĝas, li rektigas kvar landojn.”²¹⁴ Tio signifas la supre menciitan.

²¹⁴ Citaĵo el 诗经，曹风，尸鸠。 Sama frazo estas en la ĉap. 富国.

25 成相

LABORKANTOJ

请成相，世之殃，愚暗愚暗堕贤良。人主无贤，如瞽无相何依！

Lasu min kanti! Monda plago estiĝas, kiam stultuloj mallumaj faligas saĝulojn. Estro de homoj ne havas saĝulojn, kiel blindulo sen gvidanto, vagaĉas en konfuzo.

请布基，慎圣人，愚而自专事不治。主忌苟胜，群臣莫谏必逢灾。

Lasu min diri bazon! Estu prudenta, samkiel sanktulo, se vi, stulta, faras aferojn arbitre, vi ne povas regi ilin. Al estro ĵaluza kaj obsedita de tuja venko ministroj ne povas konsili kaj vi nepre renkontos katastrofon.

论臣过，反其施，尊主安国尚贤义。拒谏饰非，愚而上同国必祸。

Por diskuti eraron de ministroj, observu la faritan de ili, ĉu ili respektas la estron, faras la ŝtaton stabila, estimas alte saĝulojn kaj juston. Se ili rifuzas konsilon, garnas misaĵon, stulte akordas sin al la supro, tiam la ŝtato nepre disfalas.²¹⁵

曷谓罢？国多私，比周还主党与施。远贤近谗，忠臣蔽塞主势移。

Kiun oni nomas sentaŭga? Tiun, kiu en la ŝtataj aferoj estas multe interesata de sia propra profito, kaj intrigas formi klikon ĉirkaŭ la estro por efektiviĝi celon, forigi saĝulojn kaj proksimigi kalumniulojn-denuncistojn. Tiel do, lojala ministro estas kaŝita kaj enfermita, la potenco de estro transiras.

曷谓贤？明君臣，上能尊主爱下民。主诚听之，天下为一海内宾。

Kiun oni nomas la saĝa? Tiun, kiu klare distingas la reĝon kaj la ministron, supre povas respekti la estron kaj sube ami la popolon. Kiam la estro sincere aŭskultas la saĝulojn, la tuta mondo unuiĝas kaj ĉiuj sur la tero sekvas lin.

主之孽，谗人达，贤能遁逃国乃蹙。愚以重愚，暗以重暗成为桀。

Malfeliĉo por la estro kuŝas en tio, ke alvenas kalumniulo, fuĝas la saĝaj kaj kapablaj kaj la lando renversiĝas. La stulta iĝas pli stulta, la malklera iĝas pli malklera, kaj fariĝas tirano, kiel Jie.

²¹⁵反其施 Iuj esploristoj prenas la demonstrativan pronomon 其 por 'estro'.

世之灾，妒贤能，飞廉知政任恶来。卑其志意，大其园囿高其台。

Plago en la mondo estiĝas de ĵaluzo al la saĝa-kapabla. Fei Lian mastrumas kaj komisiis administradon al E Lai. Ili estas malaltaj je sia strebo ekposedi grandajn ĝardenon kaj ĉasejon kaj konstrui altan palvilionon.

武王怒，师牧野，纣卒易乡启乃下。武王善之，封之于宋立其祖。

Reĝo Wu koleris kaj ekmilitis en la bataalkampo Mu. Soldatoj de Zhou facile dizertis kaj Qi submetis sin al Wu. La reĝo Wu taksis tion bona, kaj feŭdis en Song-lando tiun Qi, kiu fariĝis la fondinto-prapatro de la lando.

世之衰，谗人归，比干见刳箕子累。武王诛之，吕尚招麾殷民怀。

Atrofiigo de generacioj okazas de tio, ke kalumniuloj-denuncistoj alvenas reen. Bigan estis dissekiita kaj Ji-zi prizonigita. La reĝo Wu akuzis tiun tiranecon, Lü Shang lanĉis militon kun sia standardo levita kaj la popolo de Yin bonvenigis lin.

世之祸，恶贤士，子胥见杀百里徙。穆公任之，强配五伯六卿施。

Monda plago devenas el malestimo de saĝaj personoj. Zixu estis mortigita, Bai Xi eskapis. La duko Mu akceptis tiun Bai Li kaj fortiĝis kiel unu el kvin hegemoniuloj. Mu instalas ses ministrojn.²¹⁶

世之愚，恶大儒，逆斥不通孔子拘。展禽三绌，春申道缀，基毕输。

Monda stultaĵo devenas el malestimo de grandaj konfuceanoj. Konfuceo, ekskludite kaj ne akceptite, estis detenita. Zhan Qin estis forpelita tri fojojn, Chun Shen estis barita survoje kaj la fundamento tute disrompiĝis.²¹⁷

请牧基，贤者思，尧在万世如见之。谗人网极，险陂倾侧此之疑。

Volu establi fundamenton, estimi saĝulojn, kion Yao ĉiam rigardis grava por miriado da generacioj. Kalumniuloj-denuncistoj metas ĉie ajn senlime la reton insideme kaj bigote, suspektante saĝulojn.

基必施，辨贤罢，文武之道同伏戏，由之者治，不由者乱何疑为？

²¹⁶ 百里奚 Bai Lixi estis grandoficisto de Yu-lando 虞国, 穆 Mu de 秦 Qin-regno faris lin ĉefministro. Mu ne estas inkluzivita de Xunzi mem inter 5 hegemoniuloj, tamen en ĉi tiu popolkanto estas kalkulita.

²¹⁷ 展禽三绌, 春申道缀 Zhan Qin estis grandoficisto de Lu-regno, alinome Liu Xiahui 柳下惠. Chun Shen estis ĉefministro de Chu-regno, faris Xunzi prefekto de Lan Ling 兰陵. Post kiam Chun Shen estis murdita, Xunzi ekŝiĝis de la posteno.

Por instali nepre la fundamenton necesas distingi la saĝan kaj la sentaŭgan. Tio estas la vojo de la reĝoj Wen kaj Wu, samkiel de Fu Xi: Kiu iras laŭ la vojo, tiu povas regi bonorde; kiu ne iras laŭ la vojo, tiu malordas en ĥaoso. Kia dubo en tio?

凡成相，辦法方，至治之極復後王。復慎，墨，季，惠，百家之說誠不詳。

Ĉiuj laborkantoj kantas pri la distingo de rektaj rimedoj por pleje atingi la bonordan regadon kaj sekvi la postajn reĝojn. Sekvi la ideojn de cent ideologoj, kiel Shen, Mo, Ji, Hui, estas vere malklere. ²¹⁸

治復一，修之吉，君子執之心如結。眾人貳之，讒夫棄之形是詰。

Regu, sekvante al la unuaĵo. Ellerni tion estas feliĉe. Noblulo konvinkiĝis elkore pri tio. Popolamaso disdubiĝas ĉirkaŭ tio. Kalumniulo-denuncisto malakceptas tion, nur riproĉante formalaĵon.

水至平，端不傾，心術如此象聖人。而有勢，直而用拙必參天。

Akvo formas ebenon, eĉ ĝia parteto neniam oblikvas. Kies koro estas tia kiel la akvo, tiu similas al saĝulo. Kiu, posedante potencon, tenas sin rekta kaj utiligas impulson, tiu nepre atingos ĝis la Ĉielo.

世無王，窮賢良，暴人刳豢仁人糟糠。禮樂滅息，聖人隱伏墨術行。

Se en la mondo mankas reĝo, falas en mizeron la saĝaj kaj la bonaj, tiam perfortuloj manĝas bonkvalitan viandon-delikataĵon, sed bonvolemuloj nur feĉon kaj branon. Decreguloj kaj muziko ĉesas sufokite, sanktuloj kaŝas sin suben kaj mohismo supre ĉirkaŭvagadas.

治之經，禮與刑，君子以修百姓寧。明德慎罰，國家既治四海平。

Principo de la regado konsistas el decreguloj kaj punjuro. Noblulo per tio tenas la popolanojn kvietaj. Se oni faras la virton klara kaj prudentas je punado, la ŝtato estas regata bonorde kaj kvar maroj estas pacaj.

治之志，後勢富，君子誠之好以待。處之敦固，有深藏之能遠思。

Celo de la regado kuŝas en moderigo de potenco kaj riĉo. Noblulo sincere strebas al tio

²¹⁸ 慎，墨，季，惠 estas 慎到，墨翟，季梁，惠施. Ekzistas diversaj opinioj pri Ji, mi sekvas Fang Yong, ke Ji Liang estis amiko de Yang Zhu 杨朱. Estas diversaj opinioj pri 'postaj reĝoj', iu konsideras ilin samtempaj reĝoj [荀子集解下 544], la alia – reĝoj de Zhou dinastio, t. e. Wen, Wu, Zhou Gong [藤井專英、荀子下、732].

kaj atendas bone la realigon. Tial li traktas aferojn senŝancele, klopodas por tio profunde kaj elkore, povas pripensi fore en perspektivo.

思乃精，志之荣，好而壹之神以成。精神相反，一而不贰为圣人。

Kun delikata pensado li havas la strebon prosperanta, ŝatas integre koncentriĝi je sia koro kaj sukcesas efektiviĝi diecon. Kontraŭantaj reciproke partoj de spirito jam unuiĝis kaj ne disduiĝas plu. Jen li fariĝis sankta.

治之道，美不老，君子由之佼以好。下以教诲子弟，上以事祖考。

La vojo de regado estas bela kaj ne maljuniĝas. Noblulo laŭ la vojo belas bona pli kaj pli. Sube laŭ tio oni instruas gefilojn kaj gefratojn, supre laŭ tio oni servas al prapatroj.

成相竭，辞不蹶，君子道之顺以达。宗其贤良，辨其殃孽。

La kanton ni finas portempe, sed vortoj ne stumblas. Noblulo laŭ la vojo atingas la celon. La saĝa kaj la bona estas estimataj, kaj io malfeliĉa-malbona klare distingeblas.

请成相，道圣王，尧，舜尚贤身辞让。许由，善卷，重义轻利行显明。

Lasu nin kanti la vojon de sanktaj reĝoj. Yao kaj Shun, estimante saĝulojn, cedis mem tronon humile al la aliaj. Xu You kaj Shan Juan, estimante juston grava kaj rigardante profitamon evitenda, kondukis elstare kaj brile.²¹⁹

尧让贤，以为民，泛利兼爱德施均。辨治上下，贵贱有等明君臣。

Yao cedis la tronon al saĝulo favore la popolo, alportis egale al ĉiuj profiton, makroamon, virton, kaj distingis la supron kaj la subon en la regado, por ke estu klasifikate inter la nobla kaj la malnobla, la reĝo kaj la vasaloj.

尧授能，舜遇时，尚贤推德天下治。虽有贤圣，适不遇世孰知之？

Yao, favorate per kapabluloj, kaj Shun, favorate per tempo, estimis saĝulojn kaj promociis virtulojn kaj regis bonorde la mondon. Eĉ se vivus iu saĝa kaj sankta, se li ne estus favorata per tempo kaj kondiĉo, kiu scipovas trovi lin?

尧不德，舜不辞，妻以二女任以事。大人哉舜！南面而立万物备。

Yao, ne virta, donis du siajn filinojn kiel edzinojn al Shun, kiu ne malakceptis tronon, kaj komisiis al li la aferojn. Shun estis ja grandulo, starante kiel reĝo kun vizaĝo al sudo,

²¹⁹ Laŭ legendo Yao cedintus la tronon al Xu You, kiu rifuzis kaj ermitiĝis., Shun – al Shan Juan, kiu ne akceptis la tronon.

pretigis perfektaj miriadon da aĵoj.²²⁰

舜授禹，以天下，尚得推贤不失序。外不避仇，内不阿亲贤者予。

Shun transdonis al Yu la mondon. Shun estimis-promociis saĝulon sen perdi la vicordon. Li ekstere ne evitis akcepti rivalojn, interne ne patronadis nepotisme la parencojn, donis al saĝulo la tronon.

禹劳心力，尧有德，干戈不用三苗服。举舜驯亩，任之天下身休息。

Yu laboradis kore kaj korpe. Yao estis tiel virta, ke sen lia uzado de armiloj la tribo de San Miao submetiĝis. Li distinge promociis Shun el kampulo, komisiis al la lasta la regadon de la mondo, kaj mem ripozis.

得后稷，五谷殖，夔为乐正鸟兽服。契为司徒，民知孝弟尊有德。

Kiam ekservis agronomo Hou Ji, kvin cerealoj ekabundis. Kiam estis investita muzikisto Kui, eĉ birdoj kaj bestoj submetiĝis. Kiam Xie fariĝis popolgvidanto, la popolo komprenis pri la fila pietato kaj la obeo de pli juna frato al la pli aĝa kaj respektis la virtan.²²¹

禹有功，抑下鸿，辟除民害逐共工。北决九河，通十二渚，疏三江。

Yu meritis, retenante inundon, eliminis por la popolo damaĝon, forpelis Gonggong, antaŭan hidrografaron. Norde li bontenis naŭ branĉojn de Flava rivero, faris dek du sablejojn trapaseblaj, riparis tri branĉojn de la Longa rivero Chang-jiang.²²²

禹傅土，平天下，躬亲为民事劳苦。得益，皋陶，横革，直成为辅。

Yu per terkonstruo faris la mondon ebena. Li tutkorpe kontribuis al la popolo, farante mem penigan laboron. Asistis lin taŭguloj, kiel Yi, Gao Yao, Heng Ge, Zhi Cheng.²²³

²²⁰ 尧不德 Esploristoj prenas la frazon ne rekte, kiel 'Yao ne elmontris la virton'. Sed mi tradukis laŭvorte, ĉar ne virta estas la konduto doni al Shun du filinojn kiel edzinojn (娥皇, 女英).

²²¹ Vera nomo estis 弃 Qi, filo de Di Ku 帝嚳, servis al Yao Shun kiel 后稷 administranto pri agrikulturo, tiu estas prapatro de Zhou-dinastio. 夔 Kui estis ĉefmuzikisto ĉe Shun. 契 Xie, ankaŭ filo de Di Ku, estas prapatro de la reĝo Tang, Yin-dinastio, estis feŭdita en Shang 商-lando.

²²² Pri Gonggong Gonggong estas diversaj opinioj, unu prenas ĝin kiel personon, la alia – kiel tribon.

²²³ 益, alinome Bo Yi, al kiu Yu volus cedi la tronon, sed Yi ermitiĝis. 皋陶 servis al Shun, kiel Juristo, instalis punjuron. Ne estas bone sciate pri du personoj 横革 kaj 直成.

契玄王，生昭明，居于砥石迁于商。十有四世，乃有天乙是成汤。

Xie, alinome reĝo-hirundo, naskigis Zhaoming, loĝis antaŭe en Dishu poste translokiĝis en Shang. Dek kvar generaciojn poste aperis Tian Yi, kiu estas la reĝo Tang.

天乙汤，论举当，身让卞随举牟光。道古贤圣基必张。

Tian Yi, Tang, trafe aranĝis kaj promociis personaron, dezirus cedi sian postenon al Bian Sui kaj Mou Guang. Laŭ la vojo de antikvaj saĝuloj kaj sanktuloj la bazo estas nepre fortigita.

愿陈辞，世乱恶善不此治。隐讳疾贤，良由奸诈鲜无灾。

Lasu min diri vorton: La mondo malordas en ĥaoso, oni malamas la bonon kaj neniu korektas tion. Oni kaŝas malbonon, ĵaluzas saĝulojn, kanajle insidas, do apenaŭ eviteblas pereco.

患难哉！阪为先，圣知不用愚者谋。前车已覆，后未知更何觉时？

Ho ve! Mizerco kaj malfacilo! Unue oni faras kontraŭon, rigardas la sanktan saĝon senutila, konsiliĝas kun stultuloj. Vidante la antaŭan ĉaron renversita, oni malantaŭe ne scias kion fari, kiam do oni vekigis?

不觉悟，不知苦，迷惑失指易上下。中不上达，蒙掩耳目塞门户。

Ne vekigante nek sciante aflikton, oni perdas direkton, ŝanceliĝante, kaj ŝanĝiĝas respektive la supro suben, la subo supren. Modera mezeco jam ne atingas la supron, oni hermetike kovras siajn orelojn kaj okulojn, ŝtopas la pordon.

门户塞，大迷惑，悖乱昏莫不终极。是非反易，比周欺上恶正直。

Ŝtopite je la pordo, oni ege devojiĝas, konfuziĝas senfine en mallumo. Renversiĝas praveco kaj malpraveco, oni partiemas, formas klikojn kaj trompas la supron. Oni malamas honestecon.

正直恶，心无度，邪枉辟回失道途。己无鄙人，我独自美岂独无故？

Kiu malamas la honestecon, al tiu mankas mezurnormo en koro. Li kurbiĝis malbone, devojiĝis kaj perdis la vojon por iri. Ne kritikante sin mem, li konsideras nur sin sole bela. Kial ne estus katastrofo?

不知戒，后必有，恨后遂过不肯悔。谗夫多进，反覆言语生诈态。

Kiu ne scias disciplinon, tiu nepre misagos poste. Estante obstina, li eraros, sed sen rimorso. Antaŭeniras multe da kalumniuloj, ripetante denuncvortojn kaj falsan sintenon.

人知态，不如备，争宠嫉贤利恶忌。妒功毁贤，下敛党与上蔽匿。

Sciu teni sin pli bone preta je tio, ke oni luktas inter si por ricevi favoron, ĵaluzas saĝulojn, profitamas kaj abomenas, malamante reciproke. Oni ĵaluzas meritulon, priklaĉas saĝulon, sube formas partion kaj supre kaŝas sin sekrete.

上壅蔽，失辅势，任用谗夫不能制。郭公长父之难，厉王流于彘。

La supro, kovrite kaj ŝirmite, perdas asiston kaj potencon, promocias kaj uzas kalumniulojn, nekontrolablajn. Iam okazis perturbo de la duko Guo Zhang Fu, do la reĝo Li devis ekziliĝi en Zhi.

周幽，厉，所以败，不听规谏忠是害。嗟我何人，独不遇时当乱世！

You kaj Li de Zhou dinastio malvenkis, car ili ne aŭdis konsilon sed persekutis la lojalajn. Kio estas mi, kiu sole ne konformas al la tempo en la nuna ĥaosa mondo? ²²⁴

欲衷对，言不从，恐为子胥身离凶。进谏不听，刳而独鹿弃之江。

Volus servi sincere, sed la vorto ne estas akceptata. Eble, malbonsorto de Zi Xu atakos ankaŭ min. Mi konsilis supren, ne aŭdate. Do, tranĉote per la glavo Du Lu, mi estos forĵetita en rivero Cang Jiang. ²²⁵

观往事，以自戒，治乱是非亦可识。托于成相以喻意。

Observante la pasintan, mi detenas min mem. Estas konebla ordo kaj malordo, kion fari kaj kion ne fari. Uzante laborkanton, mi eldiris alegorie mian volon.

请成相，言治方，君论有五约以明。君谨守之，下皆平正国乃昌。

Laborkantante, mi diras kiel regi enorde. Estas por estro kvin kondiĉoj, klaraj. Se la estro sekvas firme ilin, ĉiuj en la subo iĝos egalaj-rektaj kaj la lando prosperos.

臣下职，莫游食，务本节用财无极。事业听上，莫得相使一民力。

Ministroj sube servos sendisipeme, senvoreme. Ĉiu plenumos prudente sian taskon

²²⁴ Li (surtrone -878-841) kaj You (-781-771) estis fifamaj je malbona konduto. Verŝajne, ke Xunzi eldiras sian senton pri sia situacio en tiu tempo, uzante la pronomon “mi”.

²²⁵ Du Lu estas nomo de glavo, donacita de Fu Chai 夫差 al Zi Xu por sinmortigo.

kaj ekonomios senlime. Je la aferoj ili aŭdas la supron, unuigas forton de la popolo, kiun ne tro laborigante.

守其职，足衣食，厚薄有等明爵服。利往印上，莫得擅与孰私得？

Kiu okupas sin honeste je sia ofico, tiun oni devas provizi per sufiĉe da vestaĵoj kaj mangaĵoj. Estas diferencigo je vestaĵoj, luksa aŭ ne, laŭ la rango-titolo por klasifiki, la profitigo dependas de la supra decido, kaj oni ne lasas arbitradi al iu ajn je la ricevado de profito.

君法明，论有常，表仪既设民知方。进退有律，莫得贵贱孰私王？

Se estas klare al la reĝo observi leĝojn, tiam publikopinio havas konstantecon, prezentas la modelon kaj sciigas la popolon pri ĝusta direkto. Estiĝas ordo en promocio kaj mallevido de personoj. Kiu do aŭdacus akiri privatatan favoron de la reĝo por gradigi iun nobla aŭ malnobla?

君法仪，禁不为，莫不说教名不移。修之者荣，离之者辱孰它师？

La leĝaro de reĝo estas la modelo, kiun oni ne devas ne sekvi. Oni ne devas ne ĝui la instruon kaj la nomoj ne ŝanĝiĝas. Kiu lernas tion, prosperas, kaj kiu devojiĝas de tio, malhonoras. Kion krom tio oni faros gvidanto?

刑称陈，守其银，下不得用轻私门。罪祸有律，莫得轻重威不分。

Se la punjuro konformas al krimoj kaj ne translimas la arĝentan leĝon, subuloj ne misuzas facilanime ĝin siafavore. Se la punado havas certan normon, kiun neniu povas pezigi aŭ malpezigi, tiam la jura aŭtoritato ne dispersas.

请牧祺，明有基，主好论议必善谋。五听修颂，莫不理续主执持。

Paŝtu bonaŭguron, faru la bazon klara. Ju pli ŝatas la estro diskutadi, nepre des pli boniĝas la plano. Se oni gvidas la landon laŭ kvin normoj, ne estas senrezone al la estro teni daŭre la potencon.

听之经，明其请，参伍明谨施赏刑。显者必得，隐者复显民反诚。

La ĝusta politiko baziĝas sur klarigo de situacio. Tri fojojn, kvin fojojn klarigi la realon skrupule, kaj poste laŭdi aŭ puni. Kio rivelita, tio nepre estas ricevita. Kio kaŝita, tio ripete estas rivelata. Tiel do la popolo revenas al sincera honesteco.

言有节，稽其实，信诞以分赏罚必。下不欺上，皆以情言明若日。

Por ke la vorto havu laŭleĝan bazon, oni devas esplori la realon, distingi la fidindan kaj la falsan, kaj poste laŭdi aŭ puni nepre. La subo ne trompas la supron. Ĉiuj konfesas honeste la veran vorton, klaran kiel la suno. ,

上通利，隐远至，观法不法见不视。耳目既显，吏敬法令莫敢恣。

Se la supro trapenetas la realon, tiam riveleĝas eĉ io kaŝita fore, eblas observi ion ĉu laŭleĝa aŭ kontraŭleĝa kaj videblas io ne vidata. Se ĉio riveleĝas jam al oreloj kaj okuloj, tiam funkciuloj, respektante leĝaron kaj dekreton, ne aŭdacas agi arbitre.

君教出，行有律，吏谨将之无铍滑。下不私请，各以宜舍巧拙。

Se estas elmontrita la instruo de estro, kies konduto havas disciplinon, tiam la funkciuloj asiduas al sia ofico sen preterlaso. La subo ne serĉas sian privatan intereson, ĉiu faras ion taŭgan laŭ sia kapablo lerte aŭ mallerte.

臣谨修，君制变，公察善思论不乱。以治天下，后世法之成律贯。

Subuloj humile lernas servi, la estro kontrolas reformon, oni publike esploras bonan ideon, por ke la diskuto ne estu malorda. Tiel la mondo estas regata bone, kaj postaj generacioj faros la leĝaron pli perfekta, penetrita per kohera principo.

26 赋

POEZIECA KVIZPROZO

爰有大物，非丝非帛，文理成章。

Jen io grandega. Tio ne estas silko, nek ŝtofo, sed konsistigas formon de ornamo kaj desegno.

非日非月，为天下明。

Nek suno, nek luno, sed tio lumigas la mondon.

生者以寿，死者以葬，城郭以固，三军以强。

Kiu vivas, ties vivon ĝi faras longdaŭra. Kiu mortis, tiun ĝi funebras. Ĝi faras urbon kaj kastelon firmaj, kaj tri armeojn fortaj.

粹而王，驳而伯，无一焉而亡。

La senmikse ĝin havanta fariĝas reĝo, la mikse havanta – grafo. Al kiu ĝi tute mankas, tiu pereas.

臣愚不识，敢请之王。

Mi, estante stulta, ne scias kio estas tio, do mi aŭdacas peti vin respondi, via Moŝto.

王曰：此夫文而不采者与？

La reĝo diris: “Ĉu tio havas formon aŭ sen koloro?”

简而易知而致有理者与？

Ĉu estas simple kaj facile scii tion kaj atingi la sciencan aksiomon ?

君子所敬而小人所不者与？

Ĉu tion estimas la nobluloj kaj ignoras la malgranduloj?

性不得则若禽兽，性得之则甚雅似者与？

Ĉu, je karaktero, nehavanto de tio similas al birdoj-bestoj, havanto de tio similas al fajnega personeco?

匹夫隆之则为圣人，诸侯隆之则一四海者与？

Simplulo, disvolvante tion, fariĝos sanktulo; landestro, disvolvante tion, unuigos la tutan mondon ĉirkaŭitan de kvar maroj.

致明而约，甚顺而体，请归之礼。 - 礼

Tio estas plej klara kaj konciza, ege laŭvoja kaj konkreta. Rezultas, ke tio estas ja decregularo. La respondo estas la decreguloj.

皇天隆物，以示下民，或厚或薄，帝不齐均。

Estas io, kion la majesta Ĉielo degnas doni suben por prezenti al la suba popolo.

Estante aŭ dika aŭ maldika, tio estas al ĉiu donata de Dio ne egale.

桀，紂以乱，汤，武以贤。

Jie, Zhou, donite per tio, freneziĝis; Tang, Wu, per tio fariĝis saĝaj.

昏昏淑淑，皇皇穆穆，周流四海，曾不崇日。

Estante ŝpruca kaj milda, majesta kaj solena, tio ĉirkaŭfluas tutan mondon ene de kvar maroj en malpli ol unu diurno.

君子以修，跖以穿室。

Nobluloj per tio memkulturadas je personeco, Zhi per tio enŝteliĝas domojn.

大参乎天，精微而无形。

Tio estas tiom granda, ke atingas la Ĉielon, tiom subtila, ke ne havas formon.

行义以正，事业以成。

Laŭjusta konduto per tio estas rektigata, afero kaj entrepreno per tio povas esti efektivigita.

可以禁暴足穷，百姓待之而后宁泰。

Per tio eblas inhibicii perfortaĵon kaj savi mizeron. Popolanoj, atendante tion havigi al si, poste pluvivas pace kaj trankvile.

臣愚不识，愿问其名。

Mi, stultulo, ne scias ties nomon. Mi volus demandi vin.

曰：此夫安宽平而危险隘者邪？

Li diris: Ĉu tio estas io, kio sekura en vasta ebenaĵo, aŭ kio danĝera en malvasta krutejo?

修洁之为亲而杂污之为狄者邪？

Ĉu al kulturata persona pureco tio proksimigas homon kaj faras lin fremda al kruda malpureco?

甚深藏而外胜敌者邪？

Ĉu tio, interne rezervite profunde, venkas malamikojn ekstere?

法禹，舜而能弇迹者邪？

Ĉu oni povas laŭ la modelo de Yu kaj Shun sekvi la ilian postsignon?

行为动静，待之而后适者邪？

Ĉu konduto dinamike kaj statike konformiĝos al konveneco post lernado de tio?

血气之精也，志意之荣也，百姓待之而后宁也，天下待之而后平也，明达纯粹而无疵也，夫是之谓君子之知。 - 知

Sango kaj spiro iĝas pura per tio, strebo kaj aspiro ekzaltiĝas per tio. Popolanoj trankviliĝos post lernado de tio. En la mondo iĝos pace post akirado de tio, iĝos lume kaj pure sen makuloj. Tio estas nomata la scio de nobluloj. Jen kio estas Scio.

有物于此，居则周静致下，动则綦高以矩。

Jen estas io, kio, nur sidante, lasas ĉirkaŭon kvieta ĝis sube, kaj moviĝante, iĝas altega kaj grandega.

圓者中规，方者中矩。

Tio iĝas ronda, kvazaŭ skribite per cirkelo, iĝas kvadrata, kvazaŭ skribite per ortilo.
大参天地，德厚尧，禹。

Tio atingas ĝis la Ĉielo kaj la tero, kaj ties virto estas tiel granda kiel de Yao kaj Yu.
精微乎毫毛，而大盈乎大禹。

Tio estas tiel subtila kiel haretoj, iĝas plena kaj vasta en la granda universo.
忽兮其极之远也，攬兮其相逐而反也，印印兮天下之咸蹇也。

Tio subite iras plej foren, kaj revenas, turniĝante kaj kurante unu post la alia. Kiam estas plene de tio, ĉiuj en la mondo profitas abunde.

德厚而不捐，五采备而成文。

Ties virto estas granda kaj forlasas neniun. Kolorigite per kvin koloroj, tio prenas formon perfekta.

往来愔愔，通于大神，出入甚极，莫知其门。

Tio tien kaj reen iradas iam stupora kaj laca, sed tamen iam trapenetrita per granda spirito, el- kaj en- iras plej rapide, ne sciante ajnan pardonon.

天下失之则灭，得之则存。

Se la subĉiela mondo perdus tion, ĝi pereus; se havas tion, ĝi povas ekzisti.

弟子不敏，此之愿陈，君子设辞，请测意之。

Mi, via disĉiplo malklera, petas vin diri al mi kio estas tio. Se vi, noblulo, degnas diri vorton, mi divenos la signifon.

曰：此夫大而不塞者与？

Li diris: Ĉu tio estas tiel granda ke estas neŝtopeble?

充盈大宇而不窳，入郛穴而不逼者与？

Ĉu de tio iĝas la granda universo iam tiel plen-plena, ke nenie estas interspaco? Ĉu tio iam trairas trueton, ne sentante la malvastecon?

行远疾速而不可托讯者与？

Ĉu tio iras foren tro rapide, ke ne eblus alproli al tio?

往来愔愔而不可为固塞者与？

Ĉu tio iradas tien reen kvazaŭ stupora kaj laca, sed tamen estas neŝtopebla?

暴至杀伤而不亿忌者与？

Ĉu tio iam atencas homojn per pleja perforto sen ajna rankoro?

功被天下而不私置者与？

Ĉu ties merito kovras la tutan mondon sen privata partiemio?

托地而游宇，友风而子雨。

Apogante sin sur tero, tio lud-vagadas en universo, faras venton amiko kaj pluvon ido.

冬日作寒，夏日作暑。

En vintraj tagoj tio alportas malvarmon, en someraj tagoj – varmon.

广大精神，请归之云。 - 云

Tio estas granda kaj vasta je spirito, lasu min nomi tion «nubo». Jen nubo.

有物于此，[𧈧][𧈧]兮其状，屡化如神。

Jen estas io, kies stato estas tute nuda kaj ofte transformiĝas kvazaŭ spirito.

功被天下，为万世文。

La merito kovras la mondon kaj ornamas miriadon da generacioj per desegnoj.

礼乐以成，贵贱以分。

Decreguloj kaj muziko ekzistas per tio kompletigite, kaj la divido inter la nobla kaj la malnobla klaso per tio distingiĝas.

养老长幼，待之而后存。

Eblas nutri grandaĝulojn kaj kreskigi infanojn dank' al tio.

名号不美，与暴为邻。

La nomo ne estas bela, ĉar tio najbaras al krudeco.²²⁶

功立而身废，事成而家败。

Post kiam la merito estas finfarita, ties korpo formortas. Tuj kiam la afero estas plenumita, ties domo detruigas.

弃其耆老，收其后世。

La maljunulo estas forlasita, kaj la posteulo enmetiĝas.

人属所利，飞鸟所害。

La profito apartenas al homoj, kaj flugantaj birdoj pikas tion.

臣愚而不识，请占之五泰。

Mi, stulta servanto, ne scias tion, do, s-ro aŭguristo Wu Tai, bonvolu diveni tion por mi,

五泰占之曰：此夫身女好而头马首者与？

Wu Tai aŭguris, dirante: Ĉu tio havas korpon virinecan kaj kapon ĉevalsimilan?²²⁷

屡化而不寿者与？

Ĉu tio ofte transformiĝas kaj estas mallonge vivanta？

²²⁶ Prononco de silkraŭpo 蚕 samas al «kruela» 惨 aŭ 残.

²²⁷ Iuj konsideras Wu Tai kiel nomojn de kvin imperatoroj 五帝, la aliaj kiel nomon de aŭguristo [vid. Fang Yong, Fang Da, p. 460]. 女好而头马首: Hutton opinias, ke tiu esprimo rilatas al la legendo 马头娘, kiu, kovrite per haŭto de ĉevala kapo, transformiĝis en silkraŭpo. [vid. Hutton, p. 282]

善壮而拙老者与?

Ĉu tio estas bona je maturaĝo sed hida je maljuniĝo?

有父母而无牝牡者与?

Ĉu tio kvankam havas gepatrojn, tamen al tio mankas masklo kaj femalo?

冬伏而夏游，食桑而吐丝，前乱而后治，夏生而恶暑，喜湿而恶雨。

Dum vintro tio kuŝas, somere vagadas, manĝas morusfoliojn, elsputas silkfadenojn unue malorde, poste bonorde, naskiĝas en somero, sed malŝatas varmegon, ŝatas malsekecon sed malŝatas pluvon.

蛹以为母，蛾以为父。

Tio havas krizalidon kiel sian patrinon, moteon kiel sian patron.

三俯三起，事乃大已。

Trifoje tio dormas kaj trifoje vekigigas, kaj la granda afero efektiviĝas finfine.

夫是之谓蚕理。 - 蚕

Tio estas nomata 'naturleĝo de silkraŭpo'. Tio estas silkraŭpo.

有物于此，生于山阜，处于室堂。

Jen estas io, kio naskiĝis en monto kaj loĝas en ĉambro.

无知无巧，善治衣裳。

Mem ne sciante sen ia lerteco, tio bone aranĝas vestaĵojn.

不盗不窃，穿窬而行。

Ne ŝtelas nek rabas, tio trairas en truon kaj antaŭeniras.

日夜合离，以成文章。

Tagnokte tio kunigas la disajn, tiel faras desegnon.

以能合从，又善连衡。

Tio povas kunigi vertikale kaj bone kombini horizontale.

下覆百姓，上饰帝王。

Sube tio kovras popolanojn, supre tio ornamas imperatorojn kaj reĝojn.

功业甚博，不见贤良。

La merito de ties afero estas tre granda, sed tion oni ne rigardas saĝa elstarulo.

耐用则存，不用则亡。

Tio ekzistas tiam, kiam estas uzata. Sed ne ezate, tio kaŝiĝas.

臣愚不识，敢请之王。

Mi, stulta servanto, ne scias kio estas tio, do aŭdacas demandi vin, via reĝa Moŝto.

王曰：此夫始生钜，其成功小者邪？

La reĝo diris: Ĉu tio estis kolosa en la komenco antaŭ ol naskiĝo, kaj fariĝis malgranda poste je la sukcesa finfaro?

长其尾而锐其剽者邪？

Ĉu tio havas voston longan kaj pinton akran？

头铎达而尾赵缭者邪？

Ĉu la kapo povas akre trabori funden kaj la vosto sekvas kun longa vico？

一往一来，结尾以为事。

Tio iradas tien kaj reen, komencas aferon kun randeto laĉita.

无羽无翼，反复甚极。

Havante nekflugilojn nek alojn, tio ripetadas movon plej rapide.

尾生而事起，尾遭而事已。

La afero ekas kun vosto naskita, finiĝas kun vosto ĉirkaŭirinta.

簪以为父，管以为母。

Harpinglo estas ties patro kaj tubosimila ingo estas patrino.

既以缝表，又以连里。

Per kudrado de surfaco jam kudriĝas ankaŭ la dorsa flanko.

夫是之谓箴理。 - 箴

Tio estas nomata 'kudrilo' laŭrezone. Jen kudrilo.

天下不治，请陈侓诗：天地易位，四时易乡。

La mondo ne estas bonorde regata. Permesu al mi deklami satiron. La Ĉielo kaj la tero ŝanĝiĝas renverse je pozicio, kvar sezonoj ŝanĝiĝas renverse je hejmlukoj.

列星殒坠，旦暮晦盲。

Stelaro disfalas meteore, maten- kaj vesperruĝoj mallumiĝis blinde.

幽晦登昭，日月下藏。

Io malhela kaj malluma leviĝis supren, la suno kaj la luno kaŝiĝis malsupren.

公正无私，反见从横；志爱公利，重楼疏堂；无私罪人，愆革贰兵。

Tiun, kiu estas justa kaj senegoismeca, oni rigardas intrigulo. Tiun, kiu strebas al amo kaj publika profito, oni rigardas ŝatanto de grandaj turoj kaj vastaj palacoj. Tiun, kiu sen egoismo akuzas kulpulon, oni rigardas preparanto de insurekcio per duobligo de soldatoj.

道德纯备，谗口将将。

Ju pli virta kaj pura estas iu vojiranto, des pli ofte oni denucas aŭ kalumnias lin.

仁人绌约，敖暴擅强。

Bonvolemulo mizeras ekskludate, arogantulo-krudulo potencas impertinente.

天下幽险，恐失世英。

La mondo estas endanĝerigita en mallumo, eble perdiĝas heroo de nia epoko.

螭龙为蝮蛇，鷗泉为风皇。

Drako ŝanĝiĝis en gekon, strigo fariĝis fenikso.

比干见刳，孔子拘匡。

Bigan estis dissekcita por ke estu videbla la koro, Konfuceo estis sieĝita en Kuang.

昭昭乎其知之明也，郁郁乎其遇时之不祥也。

Kiel ajn brile lumanta la intelekto, ho ve, ĝi malbonsorte ne konformis al la tempo.

拂乎其欲礼义之大行也，暗乎天下之晦盲也。

Kiel ajn ili dezirus, ke decreguloj kaj justo estu praktikataj grandskale, ho ve, la mondo restas obskura kaj blinda.

皓天不复，忧无疆也。

Serena Ĉielo ne revenas, malĝojo daŭras senlime.

千岁必反，古之常也。

Post mil jaroj ĝi nepre revenos denove kiel kutime de antikve.

弟子勉学，天不忘也。

Do diligente lernu, miaj disĉiploj, la Ĉielo ne forgesas vin!

圣人共手，时几将矣。

Sanktuloj atendas favoran tempon, nenion farante kun manoj krucigitaj.

与愚以疑，愿闻反辞。

Mi, stulta, suspetante, dezirus aŭdi la respondon.

其小歌曰：念彼远方，何其塞矣。

Iu kanteto diras: Rigardu malproksimen en perspektivo, kiel ŝtopita estas la vojo.

仁人绌约，暴人衍矣。

Bonvolemuloj estas mizere persekutataj, perfortuloj abundas.

忠臣危殆谗人服矣。

La lojalaj subuloj estas endanĝerigitaj, kalumniuloj-denuncantoj servas.

璇，玉，瑶，珠，不知佩也。

Jadoj, jaspoj, agatoj, perloj estas forlasitaj, ne sciate kiel ekipi per ili.

杂布与锦，不知异也。

Oni miksas tolaĵon kaj brokaĵon, ne sciante pri diferenco.

閼媿，子奢，莫之媒也。

Oni ne geedzigas la belajn viron kaj inon, kiel Lü Qu kaj Zi She.

媿母，力父，是之喜也。

Oni ĝojas je malbelaj, kiel Momu kaj Lifu.²²⁸

以盲为明，以聋为聪；以危为安，以吉为凶。

Oni prenas la blindan por klare-vidanto, la surdan por klare-aŭdanto; oni konsideras

²²⁸閼媿 estis belulino de Wei-regno 魏，子奢 estis belulo de Zheng-regno 郑. 媿母 estis malbela virino en la epoko Huang Di 黄帝，pri 力父 aŭ 刁父 estas nesciate.

ion danĝeran sekura, ion bonaŭguran sinistra.

鸣乎上天，曷维其同！

Ho, Supra Ĉielo! Kiel eblus kunmiksi ilin!

27 大略

KOMPENDIO

大略：君人者，隆礼尊贤而王，重法爱民而霸，好利多诈而危。

Kompendio: El nobluloj tiu, kiu laŭdas decregulojn kaj respektas saĝulojn, fariĝos reĝo, kaj tiu, kiu estimas leĝon kaj amas la popolon, fariĝos hegemoniulo. Kiu ŝatas profiton kaj multe fraŭdas, tiu estas danĝera.

欲近四旁，莫如中央，故王者必居天下之中，礼也。

Se iu dezirus esti proksima al kvar flankoj, li situu en la centro. Do reĝo nepre sidas en centro de la mondo. Tio estas laŭ decreguloj.

天子外屏，诸侯内屏，礼也。外屏，不欲见外也；内屏，不欲见内也。

La Ĉiela Filo starigas ekranon ekstere, landestroj ene, tio estas laŭ decreguloj. Ekstera ekranon, por ke oni ne deziru vidi eksteren. Interna ekranon, por ke oni ne deziru vidi internen.²²⁹

诸侯召其臣，臣不俟驾，颠倒衣裳而走，礼也。《诗》曰：“颠之倒之，自公召之。”天子召诸侯，诸侯辇舆就马，礼也。《诗》曰：“我出我舆，于彼牧矣。自天子所，谓我来矣。”

Kiam landestro alvokas subulon, ĉi tiu subulo, ne atendante ĉaron, ekkuras al la estro haste eĉ vestite malĝuste je supro kaj subo. Tio estas laŭ decreguloj. Estas dirite en *Poezio*: “Li alruliĝas haste, vokite de la duko.” Kiam la Ĉiela Filo alvokas landestrojn, ili tirigas kaleŝon al ĉevaloj. Tio estas laŭ decreguloj. Estas dirite en *Poezio*: “Mi eligas mian kaleŝon al la ĉevalpaŝtejo. Ĉar la Ĉiela Filo alvokas min, ke mi venu al li.”²³⁰

天子山冕，诸侯玄冠，大夫裨冕，士韦弁，礼也。

La Ĉiela Filo vestas sin en robo kun montsimila krono, landestroj en nigra robo kun krono, grandoficistoj en robeto kun alta krono, oficistoj kun leda ĉapo. Tio estas laŭ decreguloj.

天子御珽，诸侯御荼，大夫服笏，礼也。

La Ĉiela Filo portas bastonon el jado *Tin*, landestroj tabuleton el jado *Tu*, grandoficistoj porservan tabuleton. Tio estas laŭ decreguloj.

²²⁹ Estas malfacile kompreni, kion signifas la vortoj ‘外屏,内屏 ekstera kaj interna ekranoj’. Mia traduko estas nur provizora. Iu prenas ilin kiel arbaron ekstere aŭ ene de pordo. Alia prenas ilin kiel landlimon. La tria kiel abstraktan ŝirmon, por ke oni ne tro arogantu.

²³⁰ Citaĵoj el 诗经, 齐风, 东方未明 kaj 小雅, 出车. Kutime, ĉevaloj estas altiritaj kaj jungitaj al ĉaro.

天子雕弓，诸侯彤弓，大夫黑弓，礼也。

La Ĉiela Filo uzas pafarkon kun gravuraĵo, landestroj– ruĝan pafarkon, grandoficistoj – nigran pafarkon. Tio estas laŭ decreguloj.

诸侯相见，卿为介，以其教出毕行，使仁居守。

Kiam landestroj renkontiĝas unu kun la alia, ilin peras iu konsilanto, kiu instruas kiel tute kondukti je elirado kaj irado, igas bonvolece gardi la restadon.²³¹

聘人以珪，问士以璧，召人以瑗，绝人以玦，反绝以环。

(La Ĉiela Filo) rilatas al vasaloj per diversformaj jadoj: al la invitito per *gui*, al la konsultanta klerulo per *bi*, al alvokita persono per *yuan*, al la senfeŭdigoto per *jue*, al la rehabilitito per *huan*.²³²

人主仁心设焉，知其役也，礼其尽也，故王者先仁而后礼，天施然也。

Estro de homoj havigu al si bonvoleman koron, tiam la intelekto asistos al li kaj la decreguloj kondukos lin al zenito. Do reĝo unue posedu bonvolecon, poste decregulojn, tiel do la Ĉielo favoros lin nature.

《聘礼》志曰：“币厚则伤德，财侈则殄礼。”礼云礼云，玉帛云乎哉？《诗》曰：“物其指矣，唯其偕矣。”不时宜，不敬交，不驩欣，虽指非礼也。

En la ĉapitro “Decreguloj por invito” estas dirite: “Se abundas mono, tio vundas la virton, se troas malŝparemo, formortas decreguloj.” Gravas decreguloj, gravas decreguloj. Ĉu gravas jadoj aŭ silkaĵoj? Estas dirite en *Poezio*: “Aĵoj prezentas, sed gravas, ke ili kunas.” Se io ne konformas al tempo, se oni ne interrilatatas kun respekto, se oni ne ĝojas elkore, tio farata prezentas ne decregulojn. ²³³

水行者表深，使人无陷；治民者表乱，使人无失。礼者，其表也，先王以礼表天下之乱。今废礼者，是去表也。故民迷惑而陷祸患，此刑罚之所以繁也。

Akvotransiranto starigas markon de avertilo, por ke homoj ne enfalu profunden; reganto de la popolo prezentas avertilmarkon de malordo, por ke homoj ne misagu. Decreguloj estas la avertilmarko. Antaŭaj reĝoj per decreguloj elmontris avertilmarkojn de la monda malordo. Kiu forĵetas decregulojn nun, tiu forŝovas la avertilmarkojn. Do la popolo, delogate, falas en malfeliĉon. Jen kial oftas la punado kaj la sankcio.

舜曰：“维予从欲而治。”故礼生，为贤人以下至庶民也，非为成圣也，然而亦所以成圣也。不学不成。尧学于君畴，舜学于务成昭，禹学于西王国。

²³¹ Multaj esploristoj anstataŭigas la ideogramon 出 per 土. Sed mi ne povas aprobi tian ŝanĝon.

²³² 珪 *gui* estas glavoforma, uzata por feŭdi, 璧 *bi* estas ronda kun malgranda trueto en centro, 瑗 *yuan* estas ronda kun truego, 玦 *jue* estas krescenta, 环 *huan* estas ringo.

²³³ En antikva libro “仪礼 *Yili*” estas unu ĉapitro, nomata Pinli, en kiu skribite: 多货则伤于德. Pri citaĵo el *Poezio* estas ŝanĝite alie ol en originalo: 旨 per 指, 谐 per 偕. Vd. 诗经, 小雅, 鱼丽.

Shun diris: “Mi regas nur laŭ mia deziro.” Do decreguloj naskiĝis por saĝuloj kaj sube por simplaj popoloj, ne por kreskigi aparte sanktulojn, kaj tamen surbaze de ili kreskas eĉ sanktuloj. Sen lernado atingebblas nenio. Yao lernis ĉe Jun Chou, Shun lernis ĉe Wu Chengzhao, Yu lernis ĉe Xi Wang Guo.²³⁴

五十不成丧，七十唯衰存。

50-jarulo jam faras funebron ne en kompleta formo; 70-jarulo nur vestas sin per funebra vesto el kanaba tolo.

亲迎之礼：父南乡而立，子北面而跪，醮而命之：“往迎尔相，成我宗事，隆率以敬先妣之嗣，若则有常。”子曰：“诺。唯恐不能，敢忘命矣！”

Decregulo por akcepti novedzinon. Patro staras fronte al sudo, filo genuiĝas, alfrontante nordon kaj la patro, donante al la filo tason da vino, ordonas lin: “Iru akcepti vian kunulinon, plenumu kune la taskon de nia familio, heredatan de prapatroj. Gvidu ŝin respektplene, por ke antaŭ ĉio ŝi heredu vian patrinon. Tiel do estu tenata la konstanteco.” La filo diras: “Konsentite. Mi nur timas, ke mi ne kapablos plenumi la taskon kaj aŭdace forgesus vian ordonon.”²³⁵

夫行也者，行礼之谓也。礼也者，贵者敬焉，老者孝焉，长者弟焉，幼者慈焉，贱者惠焉。

Se temas pri ‘konduco’, tio signifas ‘konducon laŭ decreguloj’. La decreguloj estas jene: respekti la noblan, montri filan pietaton al maljunulo, esti humila al pliaĝulo, esti afabla al infanoj, bonfari al mizerulo.

赐予其宫室，犹用庆赏于国家也；忿怒其臣妾，犹用刑罚于万民也。

Donaco al siaj familianoj estas farata same, kiel laŭdado en ŝtato. Riproĉo al siaj subuloj kaj virinoj estas farata same, kiel punado al miriado da popoloj.²³⁶

君子之于子，爱之而勿面，使之而勿貌，导之以道而勿强。

Noblulo rilatas al siaj ĝefiloj tiamaniere, ke li, amante ilin, ne montras al ili la aminklinon survivizaĝe, kaj, laborigante ilin, ne elmontras kompaton sur la mieno. Kiam li instruas ilin pri la vojo, li ne tenas sin altrudiĝema.

礼以顺人心为本，故亡于《礼经》而顺于人心者，皆礼也。

La fundamento de decreguloj estas akordiĝi kun la homa koro, do eĉ se ne estus skribite en la libro “Sutro de Decreguloj”, ĉio, kio akordas kun la homa koro, estas laŭ decreguloj.

礼之大凡：事生，饰驩也；送死，饰哀也；军旅，饰威也。

²³⁴ Pri tri instruistoj 君畴，务成昭，西王国 estas ne sciate bone. Wu Chengzhao havis 11 verkojn laŭ 汉艺文志[荀子集解下 p. 578].

²³⁵ En 仪礼士昏礼篇 estas skribite: 不敢忘命.

²³⁶ Samaj frazoj troviĝas en la verkoj de Zengzi 大戴礼曾子制言上篇，曾子立事篇..

Granda esenco de decreguloj estas jena. Ĉe la servado al la vivo ili ornamu ĝojon, ĉe la funebro ili ornamu malĝojon, ĉe la militirado ili ornamu majestecon.

亲亲，故故，庸庸，劳劳，仁之杀也。贵贵，尊尊，贤贤，老老，长长，义之伦也。行之得其节，礼之序也。仁，爱也，故亲。义，理也，故行。礼，节也，故成。仁有礼，义有门。仁非其里而虚之，非礼也。义非其门而由之，非义也。推恩而不理，不成仁；遂理而不敢，不成义；审节而不知，不成礼；和而不发，不成乐。故曰：仁，义，礼，乐，其致一也。君子处仁以义，然后仁也；行义以礼，然后义也；制礼反本成末，然后礼也。三者皆通，然后道也。

Simplega formo de la bonvoleco estas jena – Trakti parencojn taŭge al parenceco, malnovajn amikojn kun taŭga amikeco, servantojn taŭge al la servado, laboristojn taŭge al la laboro.

Etika klasifikigo de la justo estas jena – Trakti la noblan taŭge al la nobleco, la respektindan respektplene, la saĝan taŭge al la saĝeco, la maljunan taŭge al la maljuneco, la pliaĝan taŭge al la pliaĝeco.

Ke ĉe la konduto estas la propra principo, estas la komenco de decreguloj. Bonvoleco estas la amo, kun kio interrilati kiel parencoj. Justo estas racio, laŭ kio kondukti. Decreguloj estas principo, kio devas esti efektivigita en praktiko. La bonvoleco havas la grundon por enloĝiĝi. La justo havas la pordon por trairi. Vana estas bonvoleco sen ajna grundo, t. e. sen decreguloj. Dependi de justo sen pordo estas ne justa. Per bonfaro sen ajna racio estas nerealigebla la bonvoleco. Se oni ne povas sekvi racion, neatingeblas la justo. Kiu, esplorante, ne komprenas la principon, tiu ne povas praktiki la decregulojn. Eĉ se agordi harmonie, sen plenumo ne realiĝas la muziko.

Do estas dirite, ke unu tutecon konsistigas bonvoleco, justo, decreguloj kaj muziko. Noblulo povas vivi bonvolema, apogante sin unue sur la justo, post kiu eblos la bonvoleco. Konduto iĝas justa, apogante sin unue sur decreguloj, post kiuj eblos la justo. Por posedi decregulojn oni povas, reveninte al la fundamento, atingi la pinton. Post ĉio ĉi-tio efektivegiblos decreguloj. Kien la triopo ĉiuj trairas, tie finfine troviĝas la vojo.

货财曰赙，舆马曰赗，衣服曰襚，玩好曰赠，玉贝曰唅。赙，赗所以佐生也，赠，襚所以送死也。送死不及柩尸，吊生不及悲哀，非礼也。故吉行五十，奔丧百里，赗，赠及事，礼之大也。

Kondolenca oferado per mono kaj valoraĵo nomiĝas *tu*, oferado de cevaloj nomiĝas *feng*, oferado de vestaĵoj nomiĝas *sui*, oferado de ŝatludiloj nomiĝas *zeng*, oferado de jado kaj konkpeco nomiĝas *han*. *Tu* kaj *feng* estas por helpi postlasitajn vivantojn, *zeng* kaj *sui* estas por forsendi mortinton. Ke la oferado por forsendo de mortinto malfruas al enĉerkigo kaj la oferado por vivantoj malfruas al malĝoja priploro, tio kontraŭas decregulojn. Estas grave, ke al feliĉo oni devas alveni kun rapideco po 50 *li*oj ĉiutage,

sed al funebro – po 100 *lioj*, ĉar la ofero de *feng* kaj *zeng* estas havas grandan signifon en decreguloj.

礼者，政之挽也。为政不以礼，政不行矣。

Decreguloj estas tirŝnuro-kondukilo por politiko. La politiko, farata sen decreguloj, malsukcesas.

天子即位，上卿进曰：“如之何忧之长也！能除患则为福，不能除患则为贼。”授天子一策。中卿进曰：“配天而有下土者，先事虑事，先患虑患。先事虑事谓之接，接则事优成；先患虑患谓之豫，豫则祸不生。事至而后虑者谓之后，后则事不举；患至而后虑者谓之困，困则祸不可御。”授天子二策。下卿进曰：“敬戒无怠。庆者在堂，吊者在闾。祸与福邻，莫知其门。豫哉！豫哉！万民望之。”授天子三策。

Ĉe la surtroniĝo de la Ĉiela Filo, la supra konsilisto turnas sin al li, dirante: “Kion fari? Longdaŭras maltrankvilo! Se forigeblas plago, tiam estos feliĉo, se ne forigeblas la plago, tiam estos pandemonio.” Kaj li prezentas al la Ĉiela Filo la unuan proponon.

La meza konsilisto diras al la suvereno: “Kiu staras en la Ĉielo kaj regas la suban teron, tiu anticipas aferon, kiun li traktos, kaj anticipas plagon, kiun li alfrontos. Se aliri la aferon kun anticipo, la aferoj estos sukcese faritaj. Se sondi plagon anticipe, eblas antaŭsondi, ke la plago ne estiĝu. Post kiam okazis la akcidento, malfruas ia ajn zorgado, malsukcesas ia ajn entrepreno. Post kiam estiĝis plago, la postzorgado estas nur aflikto, kiu estos ne regebla.” Kaj li prezentas al la Ĉiela Filo la duan proponon.

La suba konsilisto diras al la suvereno: “Antaŭgardu kaj ne maldiligentu. Okazadas, ke en la halo sidas tiu, kiu venis gratuli, ĉe la pordo staras vizitanto por kondolenci. Kunestas najbare la malfeliĉo kaj la feliĉo. Neniu scias kiu eniros la pordon. Gardu antaŭe! Gardu antaŭe! Miriado da popolo esperas tion.” Kaj li prezentas al la Ĉiela Filo la trian proponon.

禹见耕者耦立而式，过十室之邑必下。

Vidante kamparanojn duope kulturantaj teron, la reĝo Yu ekstaris por saluti ilin. Trapasante vilaĝeton el dek familioj, li nepre malsupreniris de la kaleŝo.

杀大蚤，朝大晚，非礼也。治民不以礼，动斯陷矣。

Tro frue ĉasi aŭ tro malfrue prezentiĝi en la kortego kontraŭas decregulojn. Se oni regas la popolon ne per decreguloj, tuj fiaskas ĉe la ekmoviĝo.

平衡曰拜，下衡曰稽首，至地曰稽顙。大夫之臣拜不稽首，非尊家臣也，所以辟君也。

Kapklino por riverenco, farata horizontale al la lumbo, nomiĝas *bai*, malpli alta – nomiĝas *qishou*, kapklino ĝis sur tero – *qisang*. Subuloj de grandoficisto kapklinas horizontale, sed ne per *qishou*. Tio ne signifas, ke la subuloj ne respektas lin, sed signifas, ke aliaj kapklinoj estas rezervitaj rilate al la landestro.

一命齿于乡；再命齿于族；三命，族人虽七十，不敢先。上大夫，中大夫，下大夫。

Rilate la grandoficistoj, suba, meza kaj supra, la unua okupas sidlokon, taŭgan al sia aĝo laŭ vicordo en la vilaĝo, la dua – laŭ vicordo en la klano, la tria – okupas la plej altan sidlokon eĉ antaŭ 70-jara samklanulo.²³⁷

吉事尚尊，丧事尚亲。

Je bonaŭgura ceremonio la sidloko estas decidita laŭ ranga vicordo, je funebro – laŭ parenca proksimeco.

君臣不得不尊，父子不得不亲，兄弟不得不顺，夫妇不得不驩。少者以长，老者以养。故天地生之，圣人成之。

Sen decreguloj, rilate estron kaj subulojn ne estus respekto, rilate patron kaj filon ne estus parenca pietato, rilate fratojn pliaĝan kaj plijunan ne estus cedemo, rilate geedzojn ne estus ĝojo. Kun decreguloj, la juna iĝas matura, la maljuna estas nutrata, ĉar la Ĉielo kaj la tero naskis ilin kaj sanktuloj faris ilin kompletaj.

聘，问也。享，献也。私觐，私见也。

Reciproka vizitado inter estroj estas por informiĝi. Ĝua bankedo estas por fari donacojn. Privata renkontiĝo estas por private intervidiĝi unu kun la alia.

言语之美，穆穆皇皇。朝廷之美，济济鎗鎗。

Beleco de lingvo kuŝas en humila respekto kaj klara ĝusteco. Beleco de kortego kuŝas en majesteco kaj bonordo.

为人臣下者，有谏而无讪，有亡而无疾，有怨而无怒。

Al subulo necesas sinteni, ke li admonu supron sed ne kalumniu, prefere kaŝu sin sed ne abomenu, ne furiozu eĉ en sia rankoro.

君于大夫，三问其疾，三临其丧；于士，一问一临。诸侯非问疾吊丧，不之臣之家。

Rilate al grandoficisto, la landestro vizitadas lin tri fojojn okaze de lia malsaniĝo, kondolencas tri fojojn je lia funebro. Rilate al oficisto tiukaze, la landestro vizitas lin unu fojon kaj kondolencas unu fojon. Landestro ne vizitas domojn de subuloj escepte de ilia malsaniĝo kaj funebro.

既葬，君若父之友，食之则食矣，不辟梁肉，有酒醴则辞。

Post la sepulta ceremonio, la ĉeffunebranto manĝas, eĉ ne evitante viandon, nur tiam, kiam la estro aŭ patra amiko manĝigas lin. Sed li abstinas de vino kaj brando.

寝不逾庙，设衣不逾祭服，礼也。

Privata dormoĉambro ne superas la prapatran templon je skalo, ĉiutaga vestaĵo ne superas la festan vestaĵon. Tio estas laŭ decreguloj.

《易》之《咸》，见夫妇。夫妇之道，不可不正也，君臣父子之本也。咸，感也，以高下下，以男下女，柔上而刚下。

En la ĉapitro Xian de la libro de *Ŝanĝo Yi* troviĝas mencio pri geedzoj, t. e. la vojo de

²³⁷ Teksto ŝajnas nekompleta.

geedzoj, kiu ne devas esti malĝusta, ĉar tio estas la bazo de rilato inter la estro kaj la subuloj, inter gepatroj kaj gefiloj. *Xian* signifas la senton, kiu metas la altan sub la malaltan, metas viron sub virinon, metas la molan supren kaj la malmolan suben.²³⁸

聘士之义，亲迎之道，重始也。

Rilate al justa regulo en varbado de oficistoj kaj al la vojo je la akceptado de novedzino, gravas la komenco.

礼者，人之所履也，失所履，必颠蹶陷溺。所失微而其为乱大者，礼也。

La decreguloj estas la grundo, sur kiu homoj baziĝas, do sen la grundo ili nepre stumblas, falas aŭ droniĝas. Kiu, perдите eĉ malmulte, estigas grandan malordon, tiu estas decreguloj.

礼之于正国家也，如权衡之于轻重也，如绳墨之于曲直也。故人无礼不生，事无礼不成，国家无礼不宁。

La decreguloj ĝustigas ŝtaton kaj familion, samkiel pesilo mezuras pezon aŭ tuĉsnuro faras linion rekta. Do homoj ne povas vivi sen decreguloj, aferoj ne efektiviĝos sen decreguloj, ŝtato kaj familio ne povas ekzisti en paco sen decreguloj.

和鸾之声，步中《武》《象》，趋中《韶》《护》。君子听律习容而后士。

Sonoriloj de ĉevalĉaro faras muzikon agordiĝantan. Je troto eligas melodiojn, nomatajn Wu kaj Xiang, je galopo – Shao kaj Hu. Noblulo, aŭdante sonaltecon, lernas sinteniĝon, kaj poste iras al ofico.²³⁹

霜降逆女，冰泮杀内，十日一御。

Post kiam prujno descendas, oni akceptas virinojn. Post kiam glacio degelas, oni detenas sin de seksrilato kun ĉiu konkubino je unu fojo en ĉiu deka tago.²⁴⁰

坐视膝，立视足，应对言语视面。立视前六尺而大之，六六三十六，三丈六尺。

Ĉe intervado kun patro: sidante, oni direktas okulojn al liajn genuojn, starante – al piedoj, interparolante – al vizaĝo. Ĉe reĝa aŭdienco: starante, oni direktas siajn okulojn antaŭen je 6 *ch'ioj*, kaj ekstreme, foren je ses per ses = tridek ses, t. e. je 3 *zhang* 6 *ch'ioj*.

文貌情用，相为内外表里，礼之中焉。能思索谓之能虑。

La formo de aspekto kaj la servema sento, farante reciproke eksteron kaj internon, averson kaj reverson unu kun la alia, konsistigas la centron de decreguloj. Kapablo je pripensado estas nomata la kapablo je prizorgado.

礼者，本末相顺，终始相应。

²³⁸ Xian 咸 konsistas el ĉiuj supraj signoj de yin 阴 kaj ĉiuj subaj signoj de yang 阳.

²³⁹ 《武》《象》 estas muziko en la epoko Zou dinastio, 《韶》《护》 farata, laŭdire, de la reĝo Tang en la epoko Yin dinastio.

²⁴⁰ Estas diversaj komentoj pri la signifo de teksto. Kiel kompreni la ideogramojn 杀, 内 estas la punkto de disiĝo. Mi prenas 杀 sha kiel “dedukti”, 内 nei kiel amrilaton kun konkubinoj.

Koncerne deeregulojn, la radiko kaj la branĉa pinto akordiĝas unu kun la alia, la komenco kaj la fino – konformiĝas unu al la alia.

礼者，以财物为用，以贵贱为文，以多少为异。下臣事君以货，中臣事君以身，上臣事君以人。

Koncerne deeregulojn, je valoraĵoj estas uzate en praktiko, je la nobla kaj malnobla estas distingite per formo, en kies plenumo multe aŭ malmulte estas diferencigite. Subaj oficistoj servas al la estro per materia varolaĵo, mezaj oficistoj – per sia korpo, supraj oficistoj – per sia personeco.

《易》曰：“复自道，何其咎？”《春秋》贤穆公，以为能变也。

Estas dirite en *Libro de Ŝanĝoj*: “La reveninton al la vojo kial do kulpigi?” En *Printempo-Autuno* estas skribite, ke la duko Mu, la saĝa, kapablas ŝanĝiĝi.²⁴¹

士有妒友，则贤交不亲；君有妒臣，则贤人不至。蔽公者谓之昧，隐良者谓之妒，奉妒昧者谓之交谄。交谄之人妒昧之臣，国之葳蕤也。

Al la oficisto, havanta ĵaluzulon kiel sian amikon, saĝulo ne rilatas proksime; al la estro, havanta ĵaluzulon kiel sian subulon, saĝulo ne alvenas. Kiu kaŝas senpartiulon, tiu nomiĝas obskuranto. Kiu vualas bonulon, tiu nomiĝas ĵaluzulo. Kiu admiras obskuranton kaj ĵaluzulon, tiu nomiĝas friponemulo. Se triumfas friponemuloj kun subuloj, ĵaluzaj kaj obskuraj, tiam la ŝtato ruiniĝas sakrilegiite.

口能言之，身能行之，国宝也。口不能言，身能行之，国器也。口能言之，身不能行，国用也。口言善，身行恶，国妖也。治国者敬其宝，爱其器，任其用，除其妖。

Kiu kapablas paroli kaj kapablas konduti, tiu estas trezoro de la ŝtato. Kiu ne kapablas paroli sed kapablas konduti, tiu estas ujo de la ŝtato. Kiu kapablas paroli sed ne kapablas konduti, tiu estas ilo de la ŝtato. Kiu, parolante bonon buŝe, kondutas mem malbone, tiu estas minaco de la ŝtato. Reganto de la ŝtato respektu la trezoron, amu la ujon, dungu la ilon, sed forigu la minacon.

下富无以养民情，不教无以理民性。故家五亩宅，百亩田，务其业而勿夺其时，所以富之也。立大学，设庠序，修六礼，明十教，所以道之也。《诗》曰：“饮之食之。教之诲之。”王事具矣。

Se ne riĉigi la subon, ne eblas nutri senton de la popolo; se ne instrui, ne eblas racie poluri denaskan naturon de la popolo. Do atribuu al familio po kvin *mouj* por loĝejo, po cent *mouj* por agro, kaj lasu la popolanojn plenumi la okupon, ne rabu de ili la tempon, ĉar oni devas enriĉigi ilin. Fondu universitatojn-institutojn, starigu lernejojn, ke oni ellernu ses disciplinojn de deereguloj kaj klare komprenu dek instruojn, ĉar tio estas laŭ la vojo. En *Poezio* estas dirite: “Donu al ili trinki kaj manĝi, donu al ili instruon kaj

²⁴¹ Citaĵo el 周易，小畜，初九.

disciplinon.” Tio estas ilo de la reĝa afero.²⁴²

武王始入殷，表商容之闕，釋箕子之囚，哭比干之墓，天下鄉善矣。

Tuj post kiam la reĝo Wu eniris ĉefurbon de Yin, li esprimis laŭdon al Shang Rong ĉe la pordo, liberigis Jizi el la malliberejo, ploris antaŭ la tombo de Bigan. Tiam la mondo revenas al la bono.²⁴³

天下，國有俊士，世有賢人。迷者不問路，溺者不問遂，亡人好獨。《詩》曰：“我言維服，勿用為笑。先民有言，詢于芻蕘。”言博問也。

En la mondo, ĉiu lando havas sian elstaran personon, ĉiu generacio havas saĝulon. Eraras tiu, kiu ne demandas la vojon; dronas tiu, kiu ne demandas la transvadejon. Perdiĝema estas tiu, kiu ŝatas solecon. En *Poezio* estas dirite: “Sekvu kion mi diras. Ne rigardu ion ridinda. Antaŭa popolo posedas ion diri, do demandu eĉ kampulojn.” Tio diras, ke oni demandu vaste.²⁴⁴

有法者以法行，無法者以類舉。以其本知其末，以其左知其右，凡百事異理而相守也。

Kie estas leĝo, tie faru laŭleĝe; kie ne estas leĝo, tie faru laŭ kategorio je klasifiko de precedencoj. Sciu la branĉon laŭ la radiko, sciu la dekstron laŭ maldekstro. Ĝenerale, kvankam cent aferoj diferencas laŭforme, tamen interrilatas reciproke unu kun la alia.

慶賞刑罰，通類而后應；政教習俗，相順而后行。

Laŭdi laŭdindan, puni punendan, nur laŭ klasifikita kategorio farate, iĝos konvene. Koncerne de administrado, instruado, kutimo, moro, nur sekvante konvencion, iros sukcese.

八十者一子不事，九十者舉家不事，廢疾非人不養者，一人不事。父母之喪，三年不事；齊衰大功，三月不事。從諸侯不，與新有昏，替不事。

En familio kun 80-jarulo al unu filo estas liberigite de servuto, en familio kun 90-jarulo al ĉiuj estas liberigite de la servuto, en familio kun kripulo aŭ kadukulo al unu persono estas liberigite de la servuto, al familio, perdinta gepatrojn, estas liberigite de militservo dum tri jaroj, al funebrantoj je *zicui* kaj *dagong* estas liberigite de la servuto dum tri monatoj. Al servantoj de aliaj landestroj estas liberigite de la servuto, kaj al novedzoj estas liberigite de la servuto dum unu jaro.²⁴⁵

²⁴² En la epoko de Zhou dinastio, unu *mou* egalas al 1.82 a. Ses disciplinoj konsistas el 冠, 昏, 喪, 祭, 鄉, 相見, t. e. ritoj de kroniĝo, geedziĝo, funebro, oferfesto, festeno de drinkado, renkontiĝo. Esploristoj konsideras dek instruojn kiel sep instruojn, konsistantajn el rilatoj de 父子, 兄弟, 夫婦, 君臣, 長幼, 朋友, 賓客, t. e. disciplinoj inter patro-filo, fratoj, geedzoj, estro-subulo, pliaĝulo-malpliaĝulo, amikoj, gastoj. Citaĵo el *Poezio* estas 詩經, 小雅, 綿蠻.

²⁴³ Shang Rong estis saĝulo-grandoficisto, eksigita de la tirano Zhou. ,

²⁴⁴ Citaĵo el 詩經, 大雅, 板.

²⁴⁵ Estis kvin formoj de funebra vestaĵo, nome, 斬衰, 齊衰, 大功, 小功, 緦麻. *Dagong* daŭras dum naŭ monatoj, *zicui* – dum de tri monatoj ĝis unu jaro.

子谓子家驹续然大夫，不如晏子；晏子，功用之臣也，不如子产；子产，惠人也，不如管仲。管仲之为，力功不力义，力知不力仁，野人也，不可为天子大夫。

La Majstro diris: Zijia Ju estis grandoficisto de kohera konduto, sed malpli ol Yanzi; Yanzi estis merita kaj utila ministro, sed malpli ol Zichan; Zichan estis filantropa, sed malpli ol Guan Zhong. Guan Zhong estis la persono, klopodinta je utileco sed ne je justo, strebinta al saĝo sed ne al humaneco, t. e. ja krudulo. Lin ne indas fari grandoficisto de la Ĉiela Filo.²⁴⁶

孟子三见宣王 不言事。门人曰：“曷为三遇齐王而不言事？”孟子曰：“我先攻其邪心。”

Mengzi ricevis trifoje la aŭdiencon de la reĝo Xuan, sed ne parolis pri aferoj. Unu el disĉiploj demandis: “Kial vi ne parolis pri aferoj, vidante dume la reĝon de Qi-regno tri fojojn?”

Mengzi respondis: “Mi antaŭ ĉio observis lin por ataki lian perversan koron.”

公行子之之燕，遇曾元于涂，曰：“燕君何如？”

曾元曰：“志卑。志卑者轻物，轻物者不求助；苟不求助，何能举？氏，羌之虏也。不忧其系垒也，而忧其不焚也。利天秋毫，害靡国家，然且为之，几为知计哉？”

Gong Xingzi iris al Yan-regno, renkontiĝis kun Zeng Yuan kaj demandis: “Kio estas la reĝo de Yan-regno?”

Zeng Yuan respondis: “Lia strebo estas malalta. Persono de malalta strebo rigardas aĵojn facilanime. Kiu rigardas la aĵojn facilanime, tiu ne petas la helpon. Kion povus entrepreni tiu, kiu ne petas la helpon? Homoj de triboj Di kaj Qiang, militkaptite, ne timas esti alŝnurataj, sed nur timas esti nekremaciataj. Tio estas same, kiel, vidante profiton en la Ĉielo je akiro de peltpalto, ili damaĝas malŝpare la ŝtaton kaj la familion. Malgraŭ tio, ili faras tiel. Ĉu ili povoscias racie kalkuli?”²⁴⁷

今夫亡箴者，终日求之而不得，其得之，非目益明也，眸而见之也。心之于虑亦然。

Okazas, ke iu, serĉante perditan kudrilon, tutan tagon ne povas trovi ĝin. Se li povis trovi ĝin, tio estas ne ĉar liaj okuloj akriĝis, sed ĉar li rigardis pli atenteme. Tia estas la rilato inter koro kaj atentema konsidero.

义与利者，人之所两有也。虽尧，舜不能去民之欲利，然而能使其欲利不克其好义也。虽桀，纣亦不能去民之好义，然而能使其好义不胜其欲利也。故义胜利者为治世，利克义者为乱世。上重义则义克利，上重利则利克义。故天子不言多少，诸侯不言利害，大夫不言得失，士不通货财，有国之君不息牛羊，错质之臣不息鷄豚，冢卿不修币，大夫不为场园，从

²⁴⁶ Laŭ opinio de esploristoj, la Majstro estas Konfuceo. Zijia Ju estis grandoficisto en Lu-regno en 6-a jc. aK. Yanzi estis grandoficisto en Qi-regno, Zichan – en Zheng, Guan Zhong estis ĉefministro de Qi-regno ĉe la dukoj Huan.

²⁴⁷ Gong Xingzi estis grandoficisto en Qi-regno. Zeng Yuan estas filo de Zengzi, disĉiplo de Konfuceo. Di kaj Qiang estis triboj barbaraj en okcidento.

士以上皆羞利而不与民争业，乐分施而耻积臧。然故民不困财，贫窶者有所甯其手。

Se temas pri inklino al justo kaj profit, ambaŭ apartenas al homoj. Eĉ al Yao kaj Shun ne eblis forigi la inklinton de la popolo al profitamo, sed ili povis fari, ke la profitamo ne superu la justamon. Kvankam al Jie kaj Zhou ne eblis forigi la inklinton de la popolo al justoamo, sed ili povis fari, ke la justamo ne superu la profitamon. Se la justamo superas la profitamon, la mondo estas bone regata. Se la profitamo superas la justamon, la mondo malordiĝas en ĥaoso. Se la supro konsideras la justamon grava, ĝi superas la profitamon. Se la supro konsideras la profitamon grava, ĝi superas la justamon. La Ĉiela Filo ne kalkulas je multo aŭ malmulto, landestroj ne kalkulas je profit aŭ malprofito, grandoficistoj ne kalkulas je gajno aŭ malgajno, kleruloj ne kalkulas je mono aŭ proprajo. Reĝo, posedanta regnon, ne allogiĝas per bovoj aŭ ŝafoj; minisroj, investitaj, ne allogiĝas per kokoj kaj porkoj; konsilistoj neatentas je interezo, grandoficistoj ne atentis je rento de bieno; oficistoj pli altrangaj ol kleruloj hontas je profitoavido, ne konkurencas kun la popolanoj por entrepreno, sed restas kontentaj per asignita distribuo kaj hontas akumuli kaj rezervi propraĵojn. Tiel do la popolo ne suferas pro manko de posedaĵo, kaj ankaŭ al povruloj estas kie labori mane por vivteni.

文王诛四，武王诛二，周公卒业，至成康则案无诛已。

La reĝo Wen punis kvar landojn, la reĝo Wu punis du, la duko Zhou fin-plenumis la aferon, kaj al la reĝoj Cheng kaj Kang restis neniu landon puni.

多积财而羞无有，重民任而诛不能，此邪行之所以起，刑罚之所以多也。

Akumuladi riĉaĵon-propraĵon laŭeble multe kaj honti je malhavo, pezigi al la popolo la devon kaj ne povi puni – jen en kio kuŝas la kialo okazigi la perversan agon kaj la kialo multigi la punadon.

上好羞，则民暗饰矣；上好富，则民死利矣。二者，乱之衢也。民语曰：“欲富乎？忍耻矣，倾绝矣，绝故旧矣，与义分背矣。”上好富，则人民之行如此，安得不乱？

Se la supro ŝatas la hontindan, tiam la popolo mallevas sin en mallumo sen ornami; se la supro ŝatas riĉon, tiam la popolo profitavidas vivriske ĝis morto. La duopo estas ja ĉefvojo al malordo. Estas dirite en popola aforismo: “Ĉu vi volas riĉiĝi? Se tiel, eltenu la hontindan, turnu vin al ekstremo, rompu malnovan amikecon, deturnu sin de justeco.” Se la supro ŝatas riĉon, tiam la popolo kondutas tiel. Kiel eblus eviti la malordon?²⁴⁸

汤旱而祷曰：“政不节与？使民疾与？何以不雨至斯极也！宫室荣与？妇谒盛与？何以不雨至斯之极也！苞苴行与？谗夫兴与？何以不雨至斯极也！”

Ĉe sekego la reĝo Tang preĝis jene: “Ĉu la politiko ne estas regula? Ĉu mi suferigis la popolon? Kial ne pluvas ĝis tioma ekstremo? Ĉu la palaco estas tro pompa? Ĉu virinoj

²⁴⁸ 上好羞 Esploristoj prenas la ideogramon 羞 por eraro, kaj anstataŭigas per 义 justo. Mi ne povas sekvi tiun revizion.

havas da voĉo tro multe? Kial ne pluvas ĝis tioma ekstremo? Ĉu oftas la koruptado? Ĉu denuncantoj ĉirkaŭvagadas? Kial ne pluvas ĝis tioma ekstremo?”

天之生民，非为君也；天之立君，以为民也。故古者列地建国，非以贵诸侯而已；列官职，差爵禄，非以尊大夫而已。

La Ĉielo naskas la popolon ne por la reĝo; la Ĉielo starigas la reĝon por la popolo. Tial do, tio, ke antikve iuj estis feŭditaj kaj landoj estis konstruitaj, ne estas por estimi landestrojn; tio, ke iuj estas enoficigitaj, postenigitaj je rangoj kaj salajrataj, ne estas por respekti grandoficistojn.

主道知人，臣道知事。故舜之治天下，不以事诏而万物成。农精于田而不可以为田师，工贾亦然。

La vojo de ĉefo estas scii homojn, la vojo de ministroj estas scii la aferojn. En la regado de la mondo far Shun, sen komandi de supre je la aferoj ĉio estis farata sukcese. Kampanoj diligente terkulturadis sen fariĝi mem agronomoj. Ankaŭ metiistoj kaj komercistoj.

以贤易不肖，不待卜而后知吉。以治伐乱，不待战而后知克。

Se anstataŭigi malsaĝulon per saĝulo, tiam tuj videblas la bona efiko, ne atendente divenon aŭ aŭguron. Se bone regi, konkerante malordon, tiam tuj videblas la venko, ne atendente militiron.

齐人欲伐鲁，忌卞庄子，不敢过卞。晋人欲伐卫，畏子路，不敢过蒲。

Qi-landanoj volus konkeri Lu-regnon, sed evitante Zhuang-zi de Bian, ne aŭdacis trapasi la lokon de Bian. Jin-landanoj volus konkeri Wei-regnon, sed timante Zilu, ne aŭdacis trapasi la lokon de Pu.²⁴⁹

不知而问尧，舜，无有而求天府。曰：先王之道，则尧，舜已；六贰之博，则天府已。

Se vi ne scias, tiam demandu al Yao kaj Shun; se vi nenion havas, postulu al la Ĉiela Tenejo. Estas dirite: La vojo de antaŭaj reĝoj estas ja la vojo de Yao kaj Shun. Erudicio de ses artoj kuŝas en la Ĉiela Tenejo.²⁵⁰

君子之学如蜕，幡然迁之。故其行效，其立效，其坐效，其置颜色，出辞气效。无留善，无宿问。

Lernado far de noblulo, kvazaŭ mudo, transformas sin je subita metamorfozo. Do al li efikas – kaj la irado, kaj la stariĝo, kaj la sidiĝo. Efikas ĉiu esprimo de vizaĝo kaj mieno, efikas ĉiu el- kaj en-spirado de Qi. La bono stagnas neniam, la demando haltas neniam.

善学者尽其理，善行者究其难。

²⁴⁹ Bian Zhuangzi, fama je sia kuraĝo, estis grandoficisto de Bian en Lu-regno. Bian estis nuna Sishui 泗水. Zilu, reganto de Pu, estas unu el disĉiploj de Konfuceo,

²⁵⁰ 天府 La Ĉiela Tenejo signifas naturan trezorejon.

Kiu bone lernas, tiu penetras profunde la rezonon; kiu agas bone, tiu radikale defias la malfacilon.

君子立志如穷，虽天子三公问正，以是非对。

Noblulo starigas sian strebon rigore ĝis ekstremo, do, kiam ajn la Ĉiela Filo kaj Tri Duko demandas lin, li respondas precize per jesado kaj neado.

君子隘穷而不失，劳倦而不苟，临患难而不忘细席之言。岁不寒无以知松柏，事不难无以知君子无日不在是。

Noblulo ne perdas sin mem eĉ en ekstrema mizerego, nek fuŝkonduktas en sia ellaciĝo kaj enuo, nek forgesas skrupulecon je vortoj eĉ ĉe sia suferiga malfacilo. Kiel nur en frostoj estas sciataj pri la valoro de pinoj kaj cipresoj, tiel same nur en malfacila kondiĉo de afero eblas scii noblulon, kiu estas ĉiam vivanta en praveco.

雨小，汉故潜。夫尽小者大，积微者著，德至者色泽洽，行尽而声问远。小人不诚于内而求之于外。

Kvankam pluvero estas malgranda, la rivero Han iĝas profunda. Io malgranda, akumuliĝante, fariĝas granda. Io subtila, amasiĝante, fariĝas rimarkinda. Kiu celas la plej altan virton, tiu kolorigas sin kaj ĉirkaŭon vaste kaj harmonie; kiu agas plej eble, ties voĉo atingas malproksimen. Malgrandulo estas tiu, kiu, estante ne sincera interne, sed serĉas ion deziratan ekstere.

言而不称师谓之畔，教而不称师谓之倍。倍畔之人，明君不内，朝士大夫遇诸涂不与言。

Kiu argumentas sen mencii pri antaŭirintaj mastroj, estas nomata *unuflankulo*; kiu instruas sen mencii pri la antaŭirintaj mastroj, estas nomata *perfidulo*. Unuflankulojn kaj perfidulojn ne dungas klera reĝo, kaj kun ili ne komuniĝas kortegaj oficistoj kaj grandoficistoj.

不足于行者说过，不足于信者诚言。故《春秋》善胥命，而《诗》者非屡盟，善为《易》者不占，善为《礼》者不相，其心同也。

Kiu kondukas ne sufiĉe, tiu parolas tro; kiu ne sufiĉe estas konvinkita, tiu estas elokventa. Tial do la libro *Printempo-aŭtuno* diras, ke bone estas interkonsenti. La libro *Poezio* kritikis oftajn interligojn, specialistoj pri la libro *Ŝanĝoj* ne estas trudiĝema je la divenado, bona praktikanto laŭ la libro *Decreguloj* ne trudas sin mastrumadi. La esenco estas sama.

曾子曰：“孝子言为可闻，行为可见。言为可闻，所以说远也；行为可见，所以说近也。近者说则亲，远者说则附远，孝子之道也。”

Zeng-zi diris: “Pia filo diras nur tion, kio estas aŭdinda, agas tiel, kiel indas vidi. Diri ion indan aŭdi estas por alparoli la malproksimajn, agi, kiel indas vidi, estas por alparoli la proksimajn. Proksimuloj alparolas siajn parencojn, malproksimuloj alparolas homojn pli forajn. Jen la vojo de fila pietato.”

曾子行，晏子从于郊，曰：“婴闻之，君子赠人以言，庶人赠人以财。婴贫无财，请假于君子，赠吾子以言：乘舆之轮，太山之木也，示诸櫜，三月五月，为疇菜蔽而不反其常。君子之櫜，不可不谨也。慎之！兰茝，稟本，渐于蜜醴，一佩易之。正君渐于香酒，可谗而得也。君子之所渐，不可不慎也。”

Kiam Zeng-zi estis foriranta, Yan-zi sekvis lin por adiaŭi ĝis la suburbo kaj diris: “Mi aŭdis, ke noblulo donacas vorton al foriranto, simplulo – valoraĵon. Mi, povra, havas nenion valoran, do permesu min imiti noblulon kaj omaĝi al vi jenan vorton: ‘Radoj de ĉaro estas faritaj el arboj de la Granda Monto Taishan. Meti lignon en framon-premilon por rondigi dum tri aŭ kvin monatoj, kaj la elpremita jam ne revenos al la antaŭa formo, eĉ kun ĝia ledmasiva bendo rompita. Al la noblulo necesas esti ege skrupula je la elektado de premilo! Estu atentema! Bonodoraj herboj, kiel orkido, valeriano, dumlonge trempite en brando, fariĝas tiom miela vino, kiom interŝanĝeblas je valoro kun jado. Do eĉ ĝusta reĝo, longe trempite en odora vino, povas havigi al si kalumniulojn-denuncantojn. Je iom-post-ioma trempiĝo la noblulo ne devas ne singardi.”²⁵¹

人之于文学也，犹玉之玉琢磨也。《诗》曰：“如切如磋，如琢如磨。”谓学问也。和之璧，井里之厥也，玉人琢之，为天子宝。子赣，季路，故鄙人也，被文学，服礼义，为天子列士。

Homoj estas polurataj per literaturo kaj lernado tiel same, kiel jado estiĝas ĉizate kaj polurate. Estas dirite en *Poezio*: “Kiel tranĉate, kiel polurate, kiel facetate, kiel smirgate.” Tio aludas pri la lernado-studado. La jadodisko de He, eltrovita de sub puto, estis tiom facetita de juvelisto, ke ĝi fariĝis la trezoro de la Ĉiela Filo. Zi Gong kaj Ji Lu estis provincanoj, sed, edukite per literaturo kaj lernado, vestite per disciplinoj de decreguloj kaj justo, ili fariĝis elstaraj kleruloj en la mondo.²⁵²

学问不厌，好士不倦，是天府也。

Nesatigebla la lernado-esplorado, nelacigebla la bravulo-persono – jen kio estas la Ĉiela Tenejo.

君子疑则不言，未问则不立，道远日益矣。

Noblulo ne eldiras ion dubindan, nek starigas ion ankoraŭ ne priesploritan. Dum la vojo longa, ĉiu tago utila.

多知而无亲，博学而无方，好多而无定者，君子不与。

Estas tiu, kiu scias multe sed ne estas mastro je unu objekto, estas tiu, kiu lernante vaste ne havas la direkton, estas tiu, kiu ŝatas multe sed senfokusa. Kun tiuj ne amikas la noblulo.

少不谏，壮不论议，虽可，未成也。

²⁵¹ Yan-zi kaj Zeng-zi, pli juna ol Konfuceo je 46 jaroj, ne povas renkontiĝi, do la epizodo estas fikcia.

²⁵² Citaĵo el *poŝio*, *卫风*, *淇奥*. 子赣 estas 子贡, 季路 estas 子路.

Kiu en infaneco ne voĉlegadis, kaj en juneco ne diskutadis, tiu, kvankam eble talenta, tamen ne maturiĝas.

君子壹教，弟子壹学，亟成。

Kiam noblulo instruas en koncentriĝo kaj disĉiploj lernas en koncentriĝo, tiam subite efektivigi la lernado-esplorado.

君子进则能益上之誉而损下之忧。不能而居之，诬也；无益而厚受之，窃也。学者非必为仕，而仕者必如学。

Noblulo estas tiu, kiu, promociite, povas esti utila por honoro al la supro kaj povas redukti suferon al la subo. Kiu ne kapablas kaj restas en tiu posteno, tiu estas fripono. Kiu, estante senutila, ricevas favoran postenon, estas ŝtelisto. Okazas, ke scienculo ne estas nepre enoficigita, sed kiu estas enoficigita, tiu nepre devas ellernadi.

子贡问于孔子曰：“赐倦于学矣，愿息事君。”

孔子曰：“《诗》云：‘温恭朝夕，执事有恪。’事君难，事君焉可息哉！”

“然则赐愿息事亲。”

孔子曰：“《诗》云：‘孝子不匮，永锡尔类。’事亲难，事亲焉可息哉！”

“然则赐愿息于妻子。”

孔子曰：“《诗》云：‘刑于寡妻，至于兄弟，以御于家邦。’妻子难，妻子焉可息哉！”

“然则赐愿息于朋友。”

孔子曰：“《诗》云：‘朋友攸摄，摄以威仪。’朋友难，朋友焉可息哉！”

“然则赐愿息耕。”

孔子曰：“《诗》云：‘昼尔于茅，宵尔索綯，亟其乘屋，其始播百谷。’耕难，耕焉可息哉！”

“然则赐无息者乎？”

孔子曰：“望其圻，皋如也，[山真]如也，鬲如也，此则知所息矣。”

子贡曰：“大哉死乎！君子息焉，小人休焉。”

Zigong demandis Konfuceon, dirante: “Mi tediĝis je la lernado, do por ripozi mi volas ekservi al iu landestro.”

Konfuceo diris: “Estas dirite en *Poezio*, – ‘Estante milda kaj humila matene kaj vespere, ni okupiĝas pri oficeja laboro skrupule.’ Kiel do eblus ripozi en la servado al estro?”

Zigong diris: “Se tiel, mi volus servadi al gepatroj por ripozi.”

Konfuceo diris: “Estas dirite en *Poezio*, – ‘Pia filo, ne elĉerpate, por ĉiam sindonas al gepatroj.’ La servado al gepatroj estas malfacila afero, kiel do eblus ripozi en la servado al gepatroj?”

Zigong diris: “Se tiel, mi volus ripozi en la vivo kun mia edzino kaj gefiloj.”

Konfuceo diris: “Estas dirite en *Poezio*: ‘Se vi estos punita pro krimo, via postlasita

edzino ankaŭ estos punata, kaj la puno atingas ŝiajn fratojn, kaj fine ĝi rilatas al la familio kaj hejmo.' Estas ankaŭ malfacilaĵo por havi edzinon kaj gefilojn. Kiel do eblus ripozi kun edzino kaj gefiloj?"

Zigong diris: "Se tiel, mi volus ripozi kun amikoj."

Konfuceo diris: "Estas dirite en *Poezio*: 'Por asimili sin kun amikoj necesas konservi sian dignon en la asimilado.' Do estas malfacile kun amikoj, kiel do eblus ripozi kun amikoj?"

Zigong diris: "Se tiel, mi volus ripozi en agrokulturo."

Konfuceo diris: "Estas dirite en *Poezio*: 'Tage oni devas falĉadi kanojn, vespere – plektadi ŝnurojn, kaj en urĝa momento devas ripari la domon je tegmento, kaj devas semadi centon da grenojn kaj legomojn.' Estas malfacile terkulturadi. Kiel do eblus ripozi en agrokulturo?"

Zigong diris: "Se tiel, al mi nenie eblas ripozi?"

Konfuceo diris: "Vidu la tombon, altan, situantan sur la pinto, bronzvazosimilan. Jen kie ripozeblas."

Zigong diris: "Kiel granda estas la morto, kie al noblulo eblas ripozi kaj al malgrandulo eblas finiĝi."²⁵³

《国风》之好色也，传曰：“盈其欲而不愆其止。其诚可比于金石，其声可内于宗庙。”《小雅》不以于污上，自引而居下，疾今之政，以思往者，其言有文焉，其声有哀焉。

Se temas pri la ĉapitro Guo Feng de *Poezio*, estas prezentata tie la ŝato de amoro. Estas dirite tradicie: "Tio montras satplenigon de deziroj sen troa transigo. La sincera honesteco estas komparebla kun altvalora metalo kaj ŝtono. La kanto estas sonorinda ene de prapatra templo." En la parto Xiao Ya, la poetoj kvankam ne sakrilegias la supron, tenante sin sube humila, tamen kritikis la samtempan politikon kaj sopiras pri la pasinteco. La vortoj enhavas belan formon kaj la kantoj – tristecon.²⁵⁴

国将兴，必贵师而重傅，贵师而重傅则法度存。国将衰，必贱师而轻傅则人有快，人有快则法度坏。

Kiam la regno estas ĝuste prosperanta, oni nepre estimas instruistojn kaj rigardas majstrojn gravaj, kaj ekzistas laŭleĝa disciplino je la respektado de karaj instruistoj kaj gravaj majstroj. Kiam la regno estas pereanta, oni nepre malestimas instruistojn kaj rigardas majstrojn malgravaj, homoj inklinas arbitre al sia plesurigo. Se homoj serĉas arbitran plezurigon, tiam laŭleĝa disciplino detruigas.

古者匹夫五十而士。天子，诸侯子十九而冠，冠而听治，其教至也。

²⁵³ Citajoj el *Poezio* estas respektive: 商颂·那，大雅·既醉，大雅·思齐，大雅·既醉，豳风·七月。

²⁵⁴ Guo Feng konsistas el multe da provincaj popolkantoj, enhavantaj amkantojn inter geviroj.

Antikve, ordinara homo fariĝis oficisto kiel klera persono en 50-jara. Filoj de la Ĉiela Filo kaj landestroj ricevis en 19-jara la ceremonian ĉapon, kiu simbolas al ili komencon de la regado, ĉar ili ricevis instruon ĝis tiomgrade ke necesas por tiu afero.

君子也者而好之，其人；其人也而不教，不祥。非君子而好之，非其人也；非其人而教之，賚盜糧，借賊兵也。

Noblulo estas tiu, kiu volas esti nobla; sed se ne instuate, ankaŭ li restas sinistra. Nenoblulo, kiu ŝatas esti nenobla, restas tia fihomo. Se doni al tia homo instruon, tio estas samkiel doni al marodisto grenojn kaj pruntedoni al bandito soldatojn.²⁵⁵

不自矜其行者，言濫过。古之贤人，贱为布衣，贫为匹夫，食则饘粥不足，衣则竖褐不完，然而非礼不进，非义不受，安取此？

Kiu ne malkontentas mem reflektante je sia konduto, tiu inklinas esti troparolema. Antikvaj saĝuloj estis mizeraj je vestaĵo, povraj samkiel ordinaruloj, manĝadis nur da kaĉo ne sufiĉe, vestadis sin neplene per porinfana ĉifono. Sed ili ne akceptis promocion se mankus decreguloj en traktado, nek ricevis ion, se mankus tie la justeco. Kiel do akcepti la favoron facilanime?

子夏贫，衣若县鹑。人曰：“子何不仕？”曰：“诸侯之骄我者，吾不为臣；大夫之骄我者，吾不复见。柳下惠与后门者同衣而不见疑，非一日之闻也。争利如蚤甲而丧其掌。”

Zixia estis malriĉa, vestite per pendantaj ĉifonoj kiel koturno. Iu demandis: “Kial vi ne enoficiĝas?”

Zixia respondis: “Landestroj arogantis antaŭ mi, do mi ne faras min ilia subulo. Grandoficistoj fieraĉis antaŭ mi, do mi ne revidos ilin. Liu Xia Hui vestis sin samkiel malfruinto al la horo de pordofermo, sed oni ne rigardis lin suspektinda, kaj lia renomo estas aŭdata ĉiam. Konkuradi por profito similas tion, kvazaŭ perdus polmon, zorgante pulosimilan unĝon.”²⁵⁶

君人者不可以不慎取臣，匹夫不可以不慎取友。友者，所以相有也。道不同，何以相有也？均薪施火，火就燥；平地注水，水流湿。夫类之相从也，如此之著也，以友观人，焉所疑？取友善人，不可不慎，是德之基也。《诗》曰：“无将大军，维尘冥冥。”言无与小人处也。

Regnoestro ne devas ne esti skrupula je elekto de ministroj, ordinarulo ne devas ne esti skrupula je elekto de amikoj. La amikoj estas tiuj, kun kiuj oni dividas havaĵon. Se la vojo ne estas sama, kiel eblus kundiĉi? Se sekaj brullignoj estas bone pretaj, tiam tuj eblas fajrigi. Se akvumi sur ebena tero, tiam la akvo fluas glate kaj malsekigas la teron. Ĉar estas aranĝitaj bone la aĵoj, kiuj interrilatas unu kun alia, kio estas klare

²⁵⁵ Frazo estas tre grava por kompreni la signifon de eduko-instruo ĉe Xunzi. Sed ne estas klare kion montras pronomoj 之，其. Do diversaj opinioj inter esploristoj.

²⁵⁶ Zixia estas unu el disĉiploj de Konfuceo. Liu Xia Hui estas grandoficisto de Lu-regno. Liu Xia estas lokonomo, kie li loĝis. Estas diversaj opinioj pri la frazo 与后门者同衣. Iuj konsideras tion kiel “vestiĝis samkiel pordogradisto”[方达 501]

videbla. Kia amiko, tia persono, ĉu estas suspektinde pri tiu observo? Estu atentema, por ke vi havigu al vi bonulon kiel amikon. Tio estas ja la fundamento de la virto. Estas dirite en *Poezio*: “Ne postsekvu grandegan ĉaron, ĉar vi estos blindigita per polvoj.”²⁵⁷ Tio avertas vin, ke vi ne kunestu kun malgranduloj.”

藍莛路作，似知而非。懦弱易奪，似仁而非。悍戇好斗，似勇而非。

Ruza cerbumado kaj taktiko kvankam similas intelekton, tamen estas tute alia. Malforta moleco kaj cedemo kvankam similas al bonvolemo, tamen estas tute alia. Maltimema kaj batalema pozo kvankam similas al braveco, tamen estas tute alia.

仁义礼善之于人也，辟之若货财粟米之于家也，多有之者富，少有之者贫，至无有者穷。故大者不能，小者不为，是弃国捐身之道也。

Bonvoleco, justo, decreguloj kaj bono por persono estas komparebla kun mono, trezoro, grenoj kaj rizoj por familio. Ju pli multe posedas, des pli riĉas. Ju pli malmulte havas, des pli estas malriĉa. Al kiu mankas ili tute, tiu estas mizera. Kie en iu lando la granduloj estas ne kapablaj kaj la malgranduloj ne aĝemaj, tie nur restas la vojo kun la lando forlasita kaj homoj forĵetitaj.

凡物有乘而来，乘其出者，是其反者也。

Ĝenerale, la aĵoj, kiuj rajdante alvenas kaj eliras rajdante, tiuj denove revenas al vi. 流言灭之，货色远之。祸之所由生也，生自纤纤也，是故君子蚤绝之。

Senbaza onidiro damaĝas aferon, mono kaj eroto faras ĝin malproksima. Katastrofo okazas tie, kie estiĝas malgrandaj bagatelaĵoj. Tial do noblulo tuj likvidas ilin.

言之信者，在乎区盖之间。疑则不言，未问则不立。

Fido de vortoj troviĝas inter distingo kaj kovriĝo.²⁵⁸ Ne diru la dubindan, ne starigu la neekzamenitan.

知者明于事，达于数，不可以不诚事也。故曰：“君子难说，说之不以道，不说也。”

Intelektulo estas klare konas la aferon, kiun li atingas per preciza kalkulo. Li ne povas ne esti sincera-honesta je la afero. Do estas dirite: “Noblulo ne estas parolema, ne depende de la vojo li ne eldiras.”

语曰：“流丸之于瓿，舆，流言之于知者。”此家言邪学之所以恶儒者也。是非疑则度之以远事，验之以近物，参之以平心，流言止焉，恶言死焉。

Estas dirite en proverbo: “Fluanta pilko haltas ĉe kavo, fluanta onidiro haltas ĉe intelektulo.” Tiu eldiro montras, kial konfuceanoj estas malŝatataj de herezuloj. Se susupektante ion je praveco kaj malpraveco, oni mezuras laŭ ekzemplo malproksima, ekzamenas laŭ ekzemplo proksima, kaj observas per senantaŭjuĝa koro, tiam senbaza

²⁵⁷ Citaĵo el *poemoj*, *malgranda*, *sen granda*.

²⁵⁸ Diversas opinioj ĉirkaŭ la frazo *区盖*. Mi tradukis laŭlitere, komprenante, ke en la procedo de distingo al malkovro estas ekzamenata la fidindeco de vortoj.

onidiro ĉesos kaj abomenaj eldiroj mortos.

曾子食鱼有余，曰：“泔之。”

门人曰：“泔之伤人，不若奥之。”

曾子泣涕曰：“有异心乎哉！”

伤其闻之晚也。

Zeng-zi iam manĝis fiŝon, tamen ne formanĝis. Li diris: “Metu en riz-akvon la restintan.”

Unu lernanto diris: “La akvumita povus damaĝi al manĝonto, do estas pli bone kuiri ĝin.”

Zeng-zi ekploris kaj diris: “Mi havis koron nenian apartan!”

Li mem vundiĝis, aŭdante tiun averton malfrue.

无用吾之所短遇人之所长，故塞而避所短，移而从所仕。疏知而不法，察辨而操辟，勇果而亡礼，君子之所憎恶也。

Ne utilas al vi konkurenci per via malfortaĵo kun fortaĵo de aliulo. Preferinde, ke vi kovru la malfortaĵon por eviti malvenkon kaj transiru al via fortaĵo por okupiĝi per la fortaĵo. Estas tiu, kiu, havante scion, faras la kontraŭleĝan, havante klarvidon, faras la kanajlaĵon, havante kuraĝon, perdas decregulojn. Noblulo abomenas kaj malamas tiun.

多言而类，圣人也。少言而法，君子也。多言无法而流喆然，虽辩，小人也。

Multe parolas kaj la parolado estas kohera je klasifiko – tiu estas sanktulo. Parolas malmulte kaj en la parolado estas leĝo – tiu estas noblulo. Parolas multe sed la parolado, senleĝa, fluas supraĵe – tiu estas, eĉ se elokventa, sed nura malgrandulo.

国法禁拾遗，恶民之串以无分得也。有夫分义则容天下而治，无分义则一妻一妾而乱。

Leĝo de regno malpermesas, ke oni levprenu al si ion ajn perditan de aliuloj, ĉar estas ne preferinde por la popolo kutimiĝi al la hazarda gajno, nekonforma al ilia sociklasa stato. Se ĉiu persono obeas la devon juste asignatan laŭ sia klasdivido, la mondo estas bone regata. Se mankas justa distingo, tiam malordiĝas eĉ la sistemo, allasanta al unu edzo havi unu edzinon kaj unu kromedzinon.

天下之人，唯各特意哉，然而有所共予也。言味者予易牙，言音者予师旷，言治者予三王。三王既以定法度，制礼乐而传之，有不用而改自作，何以异于变易牙之和，更师旷之律？无三王之法，天下布待亡，国不待死。

Mondanoj, ĉiu el ili havas sian propran konscion kaj ankaŭ havas la komunan inter ili. Koncerne guston ĉiuj konsentas nomi Yi Ya, koncerne muzikon – Majstro Kuang, koncerne regadon – Tri reĝoj. La Tri reĝoj jam instalas leĝaron kaj regularon, starigis decregulojn kaj muzikon, kaj tiuj estas transdonitaj al posteuloj. Se iu, rigardante tiujn neutilaj, provus reformi aŭ mem krei la novajn, ĉu li povus aliigi aŭ ŝanĝi la harmonian bonguston de Yi Ya aŭ la melodion de Majstro Kuang? Se estus neniigita la leĝaro de Tri

reĝoj, tiam la mondo subite pereus, kaj la regno subite mortus.²⁵⁹

饮而不食者，蝉也；不饮不食者，浮游也。

Trinkas sed ne manĝas la cikado; ne trinkas nek manĝas la efemero.

虞舜，孝己孝而亲不爱，比干，子胥忠而君不用，仲尼，颜渊知而穷于世。

Shun el Yu-lando estis pia filo, sed la gepatroj ne amis lin. Bi Gan kaj Zi Xu estis lojaluloj, sed la regantoj ne uzis ilin. Zhongni kaj Yan Yuan estis intelektuloj, sed ili dum sia vivo faladis en ekstreman mizeron.

劫迫于暴国而无所辟之，则崇其善，扬其美，言其所长而不称其所短也。

Kiu estas persektata sub tiraneca ŝtato kaj ne havas lokon por eskapi, tiu povas adori nur la bonon, laŭdi la belon, parolante nur la eldireblan meriton de ĉirkaŭo kaj ne menciante la malmeriton.²⁶⁰

惟惟而亡者，诽也；博而穷者，訾也；清之而俞浊者，口也。

Kio pereigas la lojalan, tio estas kalumnio; kio mizerigas la eruditon, tio estas denunco; kio malpurigas la puran, tio estas buŝo.

君子能为可贵，不能使人必贵己；能为可用，不能使人必用己。

Noblulo povas fari sin estiminda, sed ne povas igi aliulojn nepre estimi lin; povas fari sin utila, sed ne povas igi aliulojn nepre uzi lin.

誥誓不及五帝，盟诅不及三王，交质子不及五伯。

Ajna ĵurpromeso estas malpli valida je la fidindeco ol tradicio de Kvin Imperiestroj, ajna ĵurligo estas malpli valida ol tradicio de Tri Reĝoj, ajna interŝanĝo de hostaĝoj per reĝidoj estas malpli valida ol tradicio de Kvin Hegemoniaj Reĝoj.²⁶¹

²⁵⁹ 易牙 estis kuiristo ĉe la duko Huan en Qi-regno. 师旷 estis muzikisto ĉe la reĝo Ping en Jin-regno. 三王 estas Yu 禹 de Xia-dinastio, Tang 汤 de Yin-dinastio, Wen-Wu 文武 de Zhou-dinastio.

²⁶⁰ Multaj esploristoj prenas la frazon por la alia signifo, ke Xunzi kvazaŭ rekomendus al intelektuloj submetiĝi al estanta tirano. Mi komprenas la frazon admono, ke ili serĉadu ion bonan kaj ion belan sub kia ajn la tiraneco.

²⁶¹ 五帝 estas 黄帝, 颛顼, 嚳, 尧, 舜. 五伯 estas laŭ Xunzi 齐桓, 晋文, 楚莊, 吴闔閭, 越勾践. Multaj esploristoj tradukis la frazon tute alie, por ekzemplo: “Kutimo de ĵurpromeso ne retroiras ĝis la epoko de Kvin Imperiestroj, ĵurligo – ne ĝis Tri Reĝoj, interŝanĝo de hostaĝoj per reĝidoj – ne ĝis Kvin Hegemoniaj Reĝoj.”

28 宥坐

DEKSTRESTARANTA VAZO-DEVIZO

孔子观于鲁桓公之庙，有欹器焉。

孔子问于守庙者曰：“此为何器？”

守庙者曰：“此盖为宥坐之器。”

孔子曰：“吾闻宥坐之器者，虚则欹，中则正，满则覆。”

孔子顾谓弟子曰：“注水焉。”

弟子挹水而注之，中而正，满而覆，虚而欹。

孔子喟然而叹曰：“吁！恶有满而不覆者哉！”

子路曰：“敢问持满有道乎？”

孔子曰：“聪明圣知，守之以愚；功被天下，守之以让；勇力抚世，守之以怯；富有四海，守之以谦。此所谓挹而损之之道也。”

Iam Konfuceo vizitis la templon por la duko Huan de Lu-regno kaj trovis tie unu strangan vazon kliniĝintan.²⁶²

Konfuceo demandis al la gardisto de la templo: “Por kio estas la vazo?”

La gardisto respondis: “Ĝi estas nomata Dekstrestaranta vazo-devizo.”

Konfuceo diris: “Mi aŭdis ke la Dekstrestaranta vazo-devizo estas jena: estante malplena, ĝi estas klinita; duonplenigite, ĝi staras rekte; plen-plenigite, ĝi falas.”

Konfuceo petis sian disĉiplon, dirante: “Enverŝu akvon tien”

La disĉiplo komencis verŝi akvon, – duonplenigite, la vazo rektiĝis; plenigite, falis, malplenigite, staris kliniĝinte.

Konfuceo suspiris kaj admire diris: “Ha! Kiu do ne povus fali, plenigite?”

Zilu diris: “Permesu al mi demandi, ĉu estas iu rimedo por teni la plenecon daŭre plu?”

Konfuceo diris: “Kiu havas saĝon de klera sanktulo, gardu per intenca stulteco; kiu regas meritplene la mondon, gardu per cedemo; kiu kun kuraĝa potenco regas la epokon, gardu per timemo; kiu havas la riĉon de Kvar maroj, gardu per humileco. Tio estas t. n. la vojo – ‘jugi sin pere de malprofitigo’.²⁶³

²⁶² 鲁桓公 La duko Huan, surtrone 711-694 a.K., estis mortigita de la duko Rang de Qi-regno, kies fratino estis lia edzino.

²⁶³ Videblas taoismeca ideo. Troviĝas simila teksto en libroj 孔子家语三恕篇, 说苑敬慎, 淮南子道应训. La humileco estas baza moralo en konfuceanismo.

孔子为鲁摄相，朝七日而诛少正卯。

门人进问曰：“夫少正卯，鲁之闻人也，夫子为政而始诛之，得无失乎？”

孔子曰：“居！吾语女其故。人有恶者五，而盗窃不与焉：一日心达而险，二日行辟而坚，三日言伪而辩，四日记丑而博，五日顺非而泽。此五者，有一千人，则不得免于君子诛，而少正卯兼有之。故居处足以聚徒成群，言谈足以饰邪营众，强足以反是独立，此小人之桀雄也，不可不诛也。是以汤诛尹谐，文王诛潘止，周公诛管叔，太公诛华仕，管仲诛付里乙，子产诛邓析，史付。此七子者，皆异世同心，不可不诛也。《诗》曰：‘忧心悄悄，愠于群小’。小人成群，斯足忧矣。”

Konfuceo, fariĝinte provizore anstataŭanto de ĉefministro en Lu-regno, sep tagojn poste akuzis iun deputaton Shao Zheng Mao. Lernanto de Konfuceo demandis aŭdace: “Shao Zheng Mao estas famulo en Lu-regno, kial vi, Majstro, akuzis lin unue ĉe via administrado? Ĉu vi ne eraris?”

Konfuceo diris: “Sidiĝu! Mi rakontos al vi la kialon. Ĉe homoj estas kvin malbonoj escepte de rabado kaj ŝtelado. Unue, tiu, kiu, havante penetran travidon, estas intrigema; due, kondutas devie kaj kun persisteco; trie, parolante ne veron, estas elokventa; kvare, memoras strangajon kaj erudicia; kvine, sekvas malpravecon kaj fervore insistas ĝin. Homo, havanta eĉ unu el tiuj kvin, ne evitas la akuzon far de reĝo. Shao Zheng Mao havas ĉiujn. Tial do ĉirkaŭ li kolektiĝis amaso da homoj en gregoj, lia parolado povis ornami sian malicon kaj blindigi homoamason, Li estis tiom forta, ke li sendepende staras kontraŭ praveco. Li estas elstara heroo inter malgranduloj, do mi ne devas ne akuzi. Tiukaŭze la reĝo Tang akuzis Yin Xie, la reĝo Wen akuzis Pan Zhi, la Duko Zhou akuzis Guan Shu, Tai Gong Wang akuzis Hua Shi, Guang Zhong akuzis Fu Li Yi, Zi Chan akuzis Deng Xi kaj Shi Fu.²⁶⁴ Tiuj sep akuzitoj estas samspecaj je koro, kvankam diversaj je generacioj, do oni ne devis ne akuzi ilin. Estas dirite en *Poezio*: “Mi ĉagreniĝas, malbenite de amaso da etuloj.” Estas ja sufiĉe da aflikto, ke malgranduloj kungregiĝas.

孔子为鲁司寇，有父子讼者，孔子拘之，三月不别。其父请止，孔子舍之。

季孙闻之不说，曰：“是老也欺予，语予曰：‘为国家必以孝。’今杀一人以戮不孝，又舍之。”

冉子以告。孔子慨然叹曰：“呜呼！上失之，下杀之，其可乎？不教其民而听其狱，杀不辜也。三军大败，不可斩也；狱犴不治，不可刑也，罪不在民故也。嫚令谨诛，贼也；今生

²⁶⁴ Tio okazis, kiam Konfuceo estis 56-jara. Estas ne sciate pri kelkaj akuzitoj: 尹谐,潘止,付里乙,史付. 华仕 estis ermito de Qi-regno en la epoko de Okcidenta Zhou-dinastio. 邓析 estis sofisto de Zheng-regno en la epoko de la Printempo-aŭtuno. Citaĵo el *Poezio*, 诗经, 邶风, 柏舟.

也有时，斂也无时，暴也；不教而责成功，虐也。已此三者，然后刑可即也。

《书》曰：‘义刑义杀，勿庸以即，予维曰未有顺事。言先教也。’

Kiam Konfuceo estis justicministro de Lu-regno, apelaciis al la justico iu patro kaj lia filo, kiujn Konfuceo retenis dum tri monatoj ne aljuĝinte. La patro retiris sian akuzon kaj Konfuceo liberigis ilin. Ji Sun, aŭdinte tion, malĝojis kaj diris: “Tiu oldulo trompis min, dirante al mi, ke nepre necesas la fila pietato por la Ŝtato. Tiukaze devus esti mortigita unu homo por likvidi la malobeemon al fila pietato. Sed tio estas preterlasita.”

Ran-zi transdonis tiun vorton al Konfuceo. La lasta profunde ĝemspiris, dirante: “Ho ve! Mortigi la subon, kiam la supro eraras, ĉu tio estas allaseble? Ne edukante anticipe la popolon, nur juĝi la pekon kaj malliberigi aŭ mortigi simplulojn. Kiam tri armeoj estas venkitaj, tiukaze ne allaseble tranĉepuni la soldatojn kaj dum la kortuma proceso ne iras bonorde, ne allaseble puni la akuzaton, ĉar ne kulpas la popolo. Kiu, pigre plenumante la leĝojn-dekretojn, nur fervoras pri la akuzado, tiu estas fripono. Estas la tempo por naskiĝi, do kolekti imposton, ne konsiderante la tempon, estas tiraneco. Sen instrui disciplinon anticipe, nur akuzi la rezulton, estas kruelaĵo. Rilate al tri menciitaj, nur poste, plenuminte la necesan kondiĉon, oni apenaŭ povas fari la punadon. Estas dirite en *Libro*: ‘Eĉ ĉe laŭjusta punado kaj laŭjusta mortigo, ne hastu ekzekucii la verdikton, sed diru, ke mi ankoraŭ ne plenumas la aferon bonorde.’ Tio diras, ke gravas la anticipa instruado de disciplinoj.²⁶⁵

故先王既陈之以道，上先服之；若不可，尚贤以綦之；若不可，废不能以单之；綦三年而百姓从往矣。邪民不从，然后俟之以刑，则民知罪矣。《诗》曰：‘尹氏大师，维周之氏。秉国之均，四方是维。天子是庠，卑民不迷。’是以威力而不试，刑错而不用，此之谓也。

Tial do antaŭaj reĝoj anticipe proklamadis la vojon kaj la supro antaŭ ĉio sekvis tion unue; se tio ne atingeblus, ili faris la estimon de saĝuloj baza; se tio ne atingeblas, ili forigis netaŭgulojn aŭ malakceptis tiujn. Se dum tri jaroj instruas al popolanoj la bazan disciplinon, ili obeas ĝin. Se malgraŭ tio malbona popolano ne obeas, tiam oni povas puni lin, ĉar la popolo jam devas kompreni, kio estas krimo. Estas dirite en Poezio: ‘S-ro Yin, granda mastro, servis por la Zhou-dinastio kiel la subtenanto. tenis la regnon en harmonio, kaj kunigis la kvar direktojn. Asiduante la Ĉielan Filon, li faris la humilan popolon ne eraranta.’ Tio signifas, ke estu severe kun majesteco, tamen ne provu tion en praktiko, pretigu punjuron, tamen ne trouzu ĝin.²⁶⁶

²⁶⁵ Ji Sun estis la plej potenca el tri Huan familioj 三桓, intendanto de Lu-regno. Ran-zi, 冉求, estas unu el disĉiploj de Konfuceo. Citaĵo el *Libroj*: 尚书, 康诰.

²⁶⁶ 单 havis signifon “ŝildo” laŭ la vortaro de Shirakawa Shizuka. Citaĵo el 诗经, 小雅, 节南山. 大师 estas unu el Tri Dukoj 三公.

今之世则不然：乱其教，繁其刑，其民迷惑而堕焉，则从而制之，是以刑弥繁而邪不胜。三尺之岸而虚车不能登也，百仞之山任负车登焉，何则？陵迟故也。数仞之墙而民不踰也，百仞之山而竖子冯而游焉，陵迟故也。今夫世之陵迟亦久矣，而能使民勿踰乎？

Nuna generacio ne estas tia – ĥaosa estas la instruo, oftas la punado, ke la popolo ŝanceliĝas, perpeksiĝas kaj falas en eraron, kaj sekve estas punata pro tio, ĉar la punjuro estas tro abunda kaj kompleksa, sed ne konkerebla estas la malbono. Okazas, ke bordon, altan je 3 *ĉhó*j, ne povas transiri la malplena ĉaro, kaj monton, altan je cent *renoj*, povas supreniri la ĉaro, ŝarĝita per peza aĵabundo, kial? Pro malkruteco de deklivo. Okazas, ke la muron, altan je kelkaj *renoj*, ne povas transiri popolanoj, sed okazas, ke la monton, altan je cent *renoj*, povas ludvagante transiri infanoj, se malkruta estas la deklivo. En nuna generacio jam longe daŭras la malkruta deklivo, sed kial oni ne povus lasi al la popolo transpaŝi ĝin?²⁶⁷

《诗》曰：‘周道如砥，其道如矢。君子所履，小人所视。眷焉顾之，潜焉出涕。’出不哀哉！”

Estas dirite en *Poezio*: ‘La vojo de Zhou-dinastio estas glata kiel akriĝŝtono, la vojo estas rekta kvazaŭ sago. Nobluloj iras laŭ tiu vojo, malgranduloj nur rigardas ĝin. Vidante retrospekte tion, mi larmas senĉese.’²⁶⁸Vere, ĉu estas ne triste?”

《诗》曰：“瞻彼日月，悠悠我思。道之云远，曷云能来。”

子曰：“伊稽首，不其有来乎？”

Estas dirite en *Poezio*: “Vidante la sunon kaj la lunon, mi pensas lante. La vojo estas tiel fora, kiel do al ili eblus tiel venadi reen?”

Konfuceo diris: “Se li riverencadas kapaltere, ĉu ne okazus, ke ili venadas reen?”²⁶⁹

孔子观于东流之水，子贡问于孔子曰：“君子之所以见大水必观焉者是何？”

孔子曰：“夫水，大遍与诸生而无为也，似德。其流也埤下，裾必循其理，似义，其洸洸乎不涸尽，似道。若有决行之，其应佚若声响，其赴百仞之谷不惧，似勇。主量必平，似法。盈不求概，似正。淖约微达，似察。以出以入，以就鲜絮，似善化。其万折也必东，似志。是故君子见大水必观焉。”

Kiam Konfuceo estis observanta la akvon fluanta orienten, Zigong demandis lin, dirante: “Nobluloj, vidante la grandan akvon, kion do nepre observas?”

Konfuceo diris: “La akvo estas granda-universala kaj lasas multon vivi, nenion farante por si, tio similas al virto. Ĝi fluas suben, malalten, kurbiĝante ĉe montpiedoj, nepre sekvas la naturan leĝon, tio similas al justo. Ĝi fontadas, elfluadas senĉese kaj senlime, tio similas al la vojo. Foje lasite libere iri, ĝi respondas kun voĉo, kvazaŭ reeĥo,

²⁶⁷ La lastan frazon mi prenas diference de aliaj esploristoj, kiuj prenas “malkrutan deklivon” por senrigora leĝforteco.

²⁶⁸ Citaĵo el 诗经, 小雅, 大东.

²⁶⁹ Mi tradukas laŭlitere dum aliaj esploristoj komprenis diverse ĉirkaŭ enigma farazo.

impete ekfluas direkte al abismo, profunda je cent *remoj*, sen timo, tio similas al kuraĝo. Verŝite en basenon, ĝi iĝas ebena-horizontala surface, tio similas al leĝaro. Pleniĝinte, ĝi ne bezonas ebenigilon de surfaco, tio similas al ĝusteco. Estante febla kaj fleksebla, ĝi atingas la subtilan mikron, tio similas al penetrema klarvido. Povante el- kaj en- iradi, ĝi ĉiam freŝe pura, tio similas al boniĝo. Malgraŭ multe da zigzagoj ĝi alfluas nepre orienten, tio similas al strebo. Tial do nobluloj, vidante la grandan akvon, observadas nepre.

孔子曰：“吾有耻也，吾有鄙，吾有殆也。幼不能强学，老无以教之，吾耻之。去其故乡，事君而达，卒遇故人，曾无旧言，吾鄙之。与小人处者，吾殆之也。”

Konfuceo diris: “Jen kiun mi taksas hontinda, kiun mi taksas malestiminda, kiun mi taksas danĝera. Kiu, ne povante en juneco forte lerni, havas en maljuneco nenion instrui, tiun mi hontas. Kiu, forlasinte hejmon, servante fine eĉ al regnestro, havas nenion diri al malnova konato ĉe hazarda renkontiĝo, tiun mi malestimas. Kiu grupiĝas kun malgranduloj, tiun mi rigardas danĝera.”

孔子曰：“如埳而进，吾与之；如丘而止，吾已矣。”今学曾未如臧鬻，则具然欲为人师。

Konfuceo diris: “Kiu kvankam kun kapablo tiel malalta, kiel armikejo, tamen antaŭeniras, tiun mi kunas; kiu, havante kapablon tiel altan, kiel monteton, ĉesas progresi, tiun mi forlasas.” Nun troviĝas iu, kiu, kun lernado tiom malgranda kiom nura akno aŭ veruko, volus jam fariĝi instruisto por aliuloj.

孔子南适楚，厄于陈，蔡之间，七日不火食，藜羹不糗，弟子皆有饥色。

子路进问之曰：“由闻之：为善者天报之以福，为不善者天报以祸。今夫子累德，积义，怀美，行之日久矣，奚居之隐也？”

孔子曰：“由不识，吾语女。女以知者为必用邪？王子比干不见剖心乎！女以忠者为必用邪？关龙逢不见刑乎！女以谏者为必用邪？伍子胥不磔姑苏东门外乎！夫遇不遇者，时也；贤不肖者，材也；君子博学深谋不遇时者多矣。由是观之，不遇世者众矣，何独丘也哉！且夫芷兰生于深林，非以无人而不芳。君子之学，非为通也；为穷而不困，忧而意不衰也，知祸福终始而心不惑也。夫贤不肖者，材也。为不为者，人也；遇不遇者，时也；死生者，命也。今有其人不遇其时，虽贤，其能行乎？苟遇其时，何难之有？故君子博学，深谋，修身，端行以俟其时。”

孔子曰：“由！居！吾语女。昔晋公子重耳霸心生于曹，越王勾践霸心生于会稽，齐桓公小白霸心生于莒。故居不隐者思不远，身不佚者志不广。女庸安知吾不得之桑落之下！”

Kiam Konfuceo kun disĉipuloj veturis suden al Chu-regno, ilin trafis malfeliĉego en iu loko inter landoj de Chen kaj Cai. Ili manĝis dum sep tagoj ne kuiritaĵon, sed nur supon el kenopodio sen grenoj, do ĉiuj disĉipuloj mienis malsataj.

Zilu aŭdacis demandi, dirante: “Mi aŭdis, ke bonfaranton rekompencas la Ĉielo per feliĉo kaj malbonfaranton per malfeliĉo. Nun vi, Majstro, jam akumulis virton, rezervis

justecon kaj havas belecon, tamen, veturante delonge multajn tagojn, kial vi devas suferi de tia mizerego?”

Konfuceo diris: “Vi, You, ne komprenas. Mi rakontos al vi. Ĉu vi konsideras ke saĝulo estas nepre akceptita? La princo Bi Gan estis dissekcita por vidi koron, ĉu ne? Ĉu vi konsideras ke lojalulo nepre estas akceptita? Guan Longfeng estis punita, ĉu ne? Ĉu vi konsideras ke admonanto estas nepre akceptita? Wu Zixu estis ekzektitita kun korpo eksponita ekstere de la orienta pordo ĉe Gusu-palaco, ĉu ne? Tio, ke esti akceptata aŭ malakceptata, dependas de la tempo. Ke esti saĝa aŭ malsaĝa, tio dependas de kapablo. Inter saĝuloj kun vasta lernado kaj profunda penetrado troviĝas multe da personoj neakceptataj pro malfavora tempo. El tia vidpunkto, estas amaso da malakceptatoj de la mondo, ne nur sola mi, Qiu.

Angeliko kaj orkideo kreskas kvankam fore en profunda arbaro, tamen ili bonodoras ĉiam ajn sen la homoj, vidantaj ilin. La lernado far de nobluloj estas ne por fariĝi eminenta, sed por ne suferi en la mizero kaj por ne desapontiĝi en la malĝojo, kaj por ke ili ne ŝanceliĝu, komprenante pri fino kaj komenco de la feliĉo-malfeliĉo. Esti saĝa aŭ malsaĝa – dependas de la kapablo. Fari aŭ ne fari – dependas de la persono. Esti akceptata aŭ malakceptata – dependas de la tempo. Morti aŭ vivi – dependas de la destino. Se nun iu ne estas akceptita de la tempo, kia ajn saĝa li estus, li mem ne povas efektiviĝi la kapablon. Se akceptite de la tempo, kia malfacileco estas? Tial do nobluloj lernas vaste, profunde kontemplas, kulturigas sin mem, ĝustigas la konduton, atendante la tempon.”

Konfuceo diris: “Vi, You, sidiĝu. Mi rakontas al vi. Iam antaŭe ĉe la princo de Jin-regno, Chong Er, naskiĝis la ideo de hegemonio pro la hontego dum loĝado en Cao-lando, kaj ĉe la reĝo de Yue-regno, Goujian, naskiĝis la ideo de hegemonio pro la hontego en Kuaiji. kaj ĉe la duko Huan de Qi-regno naskiĝis la ideo de hegemonio pro la hontego en Ju-lando. Tiel do, kiu ne suferas pro mizero, ties ideo atingas ne malproksimen; kiu ne estas ekzilita, tiu ne estas vasta je la strebado. Kiel do vi povus scii min, kion mi akiras sub la falantaj morusfolioj, nome Sangluo?”²⁷⁰

子贡观于鲁庙之北堂，出而问于孔子曰：“乡者赐观于太庙之北堂，吾亦未辍，还复瞻被九盖皆继，被有说邪？匠过绝邪？”

孔子曰：“太庙之堂，亦尝有说。官致良工，因丽节文，非无良才也，盖曰贵文也。”

Zigong observis la nordan halon en maŭzoleo de Lu-regno, elirinte de tie, demadis Konfuceon: “Mi ĵus observis la nordan halon de Granda maŭzoleo. Mi senĉese kaj ripete

²⁷⁰ Tre fama estas epizodo, ke Chong Er kaj Goujian estis ege hontigitaj. La duko Huan fuĝis en Ju-landon antaŭ sia surtroniĝo. Notinde, ke “honto” estas konsiderata la grava motivo por efektiviĝi la ideon.

rigardadis, kaj trovis, ke naŭ pordoj ĉiuj estas konstruitaj per pecoj kunflikitaj. Ĉu estas iu kialo? Ĉu la metiistoj mishakis ilin?”

Konfuceo diris: “Se temas pri la halo de Granda maŭzoleo, devas esti la kialo. La ŝtata ofico invitis bonajn metiistojn, kiuj povas ornamu desegnaĵon belega laŭ la diskreta formo. Devus esti ne pro tio, ke mankas tie materialoj bonkvalitaj. Eble, oni estimis la formon.” ²⁷¹

²⁷¹ Iuj esploristoj konsideras la tekston neperfekta. Kial en la fino de la ĉapitro estas metita tiu epizodo, ke la flikaĵo de lignaj pecoj estas rigardata pli konvena al la pordoj de la Granda maŭzoleo, ol ununuraj bonaj materialoj? Tio signifas, ke por la maŭzoleo laŭkutime estas pli taŭga la formo de la flikaĵo ol bonkvalitaj materialoj. En sanktejoj ne bezonatas elstaraj bonkvalitaj personoj.

29 子道

LA VOJO DE FILOJ

入孝出弟，人之小行也；上顺下笃，人之中行也；从道不从君，从义不从父，人之大行也。若夫志以礼安，言以类使，则儒道毕矣。虽舜，不能加毫末于是矣。孝子所以不从命有三：从命则亲危，以不从则亲安，孝子不从命乃衷；从命则亲辱，不从命则亲荣，孝子不从命乃义；从命则禽兽，不从命则修饰，孝子不从命乃敬。故可以从而不从，是不子也；未可以从而从，是不衷也。明于从不从之义，而能致恭敬，忠信，端悝以慎行之，则可谓大孝矣。传曰：“从道不从君，从义不从父。”此之谓也。故劳苦雕萃而能无失其敬，灾祸患难而能无失其义，则不幸不顺见而能无失其爱，非仁人莫能行。《诗》曰：“孝子不匮。”此之谓也。

Esti filo kun pietato hejme kaj esti obeema al pliaĝuloj – tio estas la homa konduto malgranda. Esti submetiĝema al la supro kaj esti korfavora al la subo – tio estas la homa konduto meza. Sekvi la vojon kaj ne sekvi la estron, sekvi la juston kaj ne sekvi la patron – tio estas la homa konduto granda. Ke la stremo estas stabila laŭ decreguloj kaj la vortoj estas uzataj laŭ ĝusta klasifiko – tio estas la vojo de konfuceanoj kompleta. Eĉ la reĝo Shun apenaŭ povus aldoni hareton al tio.

Estas tri kazoj en tio, ke pia filo ne obeu al ordonoj – se li obeus la ordonon, liaj gepatroj estus endanĝerigitaj, se li ne obeas, la gepatroj restos trankvilaj en paco, tiukaze estas sincere al la pia filo ne obei la ordonon; se li obeus la ordonon, liaj gepatroj estus malhonorigitaj, se li ne obeas la ordonon, liaj gepatroj prosperos, tiukaze estas juste al la pia filo ne obei la ordonon; se li obeus la ordonon, li devus konduki kruele kiel bestoj, se ne obeas, li povas teni sin bela je personeco, tiukaze estas estiminde al la pia filo ne obei la ordonon. Kiu ne obeas, kiam povas obei, tiu ne estas filo. Kiu obeas, kiam ne devus obei, tiu ne estas sincera. Kiu, klare komprenante pri justeco je tio, ke obei aŭ ne obei, faras la plej eblan por montri sin himila, respekema, lojala, fidela, honesta kaj skrupule praktikas, tiun eblas nomi filo de la granda pietato.

Estas dirite tradicie: “Obeu la vojon, ne obeu la estron; obeu la juston, ne obeu la gepatrojn.” Tio signifas la supre menciitan. Estas tia persono, kiu, kiam ajn vivante vundite kaj ofendite en peniga- suferiga kondiĉo, povas ne perdi la respetplenan koron, kaj kiam ajn, travivante plagon, katastrofon, malsanon kaj malfacilon, povas ne perdi la juston, kaj kiu, kiam ajn, spektante malfeliĉon, malhelpon, malbonon, povas ne perdi la amon, tiu estas ja bonvolemlulo, povanta praktiki la pietaton en la konduto. Estas dirite en *Poezio*: “Fila pietato neelĉerpeblas.”²⁷² Tio signifas la supre menciitan.

²⁷² Citaĵo el 诗经, 大雅, 既醉.

鲁哀公问于孔子曰：“子从父命，孝乎？臣从君命，贞乎？”

三问，孔子不对。孔子趋出，以语子贡曰：“乡者君问丘也，曰：‘子从父命，孝乎？臣从君命，贞乎？’三问而丘不对，赐以为何如？”

子贡曰：“子从父命，孝矣；臣从君命，贞矣。夫子有奚对焉？”

孔子曰：“小人哉！赐不识也。昔万乘之国有争臣四人，则封疆不削；千乘之国有争臣三人，则社稷不危；百乘之家有争臣二人，则宗庙不毁。父有争子，不行无礼；士有争友。不为不义。故子从父，奚子孝？臣从君，奚臣贞？审其所以从之之谓孝，之谓贞也。”

La duko Ai de Lu-regno demandis al Konfuceo, dirante: “Ĉu la fila pietato konsistas en la obeado de filo al la patro? Ĉu la fideleco konsistas en la obeado de subuloj al la reĝa ordono?” Tri fojon la duko demandadis, sed Konfuceo ne respondis.

Konfuceo, elirinte, tuj rakontis al Zigong, dirante: “Ĵus nun la reĝo demandis min, dirante: ‘Ĉu la fila pietato konsistas en la obeado de filo al la patro? Ĉu la fideleco konsistas en la obeado de subuloj al la reĝa ordono?’ Mi ne respondis al li, spite ke li demandadis tri fojojn. Kion vi, Ci, opinias pri tio?”

Zigong diris: “Estas fila pietato, ke filo obeas al la patro; estas fideleco, ke subuloj obeas al la reĝo. Majstro, kial vi ne respondis per jesado?”

Konfuceo diris: “Kia malgrandulo vi estas! Vi nenion komprenas. La granda regno kun miriado da militĉaroj, havante kvar kritike-diskutantojn inter subuloj, ne perdas landliman parteton de sia teritorio. la regno kun milo da militĉaroj, havante tri kritike-diskutantojn inter subuloj, ne endanĝerigas la regnan sanktejon de tero kaj grenoj. La klano kun centoj da militĉaroj, havante du kritike-diskutantojn inter subuloj, ne detruas la templon de prapatroj. Ke patro havas filon, kritike-diskutantan, tio ne kontraŭas al decreguloj. Ke persono havas amikon, ktitike-diskutantan, tio ne kontraŭas al justo. Do, kia estus fila pietato, se filo nur obeas al la patro? Kia estus fideleco, se subuloj nur obeas al la reĝo? Pristudi taŭgecon de la obeado estas nomata la fila pietato, kaj estas nomata la fideleco.”

子路问于孔子曰：“有人于此，夙兴夜寐，耕耘树艺，手足胼胝，以养其亲，然而无孝之名，何也？”

孔子曰：“意者身不敬与？辞不逊与？色不顺与？古之人有言曰：‘衣与，繆与，不女聊。’今夙兴寐，耕耘树艺，手足胼胝，以养其亲，无此三者，则何以为而无孝之名也？”

孔子曰：“由志之，吾语女。虽有国士之力，不能自举自身，非无力也，势不可也。故入而行不修，身之罪也；出而名不章，友之过也。故君子入则笃行，出则友贤，何为而无孝之名也？”

Zilu demandis Konfuceon, dirante: “Jen troviĝas tia homo. Li ellitiĝas frue ĉe aŭroro kaj enlitiĝas nokte, plugas, terkulturas, semas, plantas kun kaloj en manoj kaj

piedoj, tiel nutras siajn gepatrojn. Malgraŭ tio li ne havas reputacion de pia filo. Kial?”

Konfuceo diris: “Mi konjektas, ke eble ne estas vidata eksplicite la respekto plena agmaniero je lia korpo, aŭ ke ne estas vidata la cedemo en lia parolmaniero, aŭ ke ne estas vidata la obeemo en lia mieno. Estas jena vorto de antikvulo: “Vi vestas min kaj flikas por mi, tamen mi ne volas babili kun vi.” Li ellitiĝas frue ĉe aŭroro kaj enlitiĝas nokte, plugas, terkulturas, semas, plantas kun kaloj en manoj kaj piedoj, tiel nutras siajn gepatrojn. Sen menciitaj tri punktoj, kial povus estiĝi tia fifamo, kiel manko de fila pietato?”

Konfuceo daŭre diris: “You, havu jenon en via memoro! Mi rakontos al vi. Ajna mondoskala luktisto ne povas supren levi sin mem per sia forto. Ne pro tio, ke mankas la forto, sed ne eblas pro la pozicio. Do, kiam iu ne kulturas sin interne per sia konduto, tiam kulpas li mem. Se eksteren eksplicite ne videblas lia famo, tiukaze eraris liaj amikoj. Koncerne la noblulon, kiu interne kondutas virtplene kaj ekstere havas amikojn saĝajn, tiun oni neniam taksas senpietata filo.”

子路问于孔子曰：“鲁大夫练而床，礼邪？”

孔子曰：“吾不知也。”

子路出，谓子贡曰：“吾以夫子为无所不知，夫子徒有所不知。”

子贡曰：“女何问哉？”

子路曰：“由问：‘鲁大夫练而床，礼邪？’夫子曰：‘吾不知也’”

子贡问曰：“练而床，礼邪？”

孔子曰：“非礼也。”

子贡出，谓子路曰：“女谓夫子为有所不知乎？夫子徒无所不知。女问非也。礼，居是邑，不非其大夫。”

Zilu demandis Konfuceon, dirante: “Tu grandoficisto de Lu-regno enlitiĝis, vestite de la glacea silkaĵo por la unua jara funebro, ĉu tio taŭgas je decreguloj?”

Konfuceo diris: “Mi ne scias.”

Zilu eliris kaj diris al Zigong: “Mi opiniis, ke la Majstro ne scias nenion, sed eĉ li havas kion li ne scias.”

Zigong diris: “Kion vi demandis?”

Zilu diris: “Mi demandis jenon. ‘Tu grandoficisto de Lu-regno enlitiĝis, vestite de la glacea silkaĵo por la unua jara funebro, ĉu tio taŭgas je decreguloj?’ La Majstro diris: ‘Mi ne scias.’”

Zigong diris: “Mi por vi demandas al li pri tio.”

Zigong demandis, dirante: “Ĉu taŭgas je decreguloj enlitiĝi, vestite de glacea silkaĵo por unua jara funebro?”

Konfuceo diris: “Tio kontraŭas al decreguloj.”

Zigong eliris kaj diris al Zilu: “Vi diris, ke la Majstro havas kion li ne scias, ĉu ne? Sed la Majstro nenion ne scias. Via demando estis malkonforma al situacio. Por decreguloj gravas la loko. Ne devas insulti la grandoficiston tie, kie li loĝas.”²⁷³

子路盛服见孔子，孔子曰：“由，是裾裾何也？昔者江出于岷山，其始出也，其源可以滥觞，及其至江之津也，不放舟，不避风则不可涉也。非维下流水多邪？今女衣服既盛，颜色充盈，天下且孰肯谏女矣？由！”

子路趋而出，改服而入，盖犹若也。

孔子曰：“志之，吾语女。奋于言者华，奋于行者伐，色知而有能者，小人也。故君子知之，不知曰不知，言之要也；能之曰能之，不能曰不能，行之至也。言要则知，行至则仁。既知且仁，夫恶有不足矣哉！”

Zilu aperis antaŭ Konfuceo, vestite en pompa vestaĵo, Konfuceo diris al li: “ You, por kio estas tiu dandeco? Kiam la rivero Changjiang ekiras de la montaro Min, la fonto estas tiel malgranda, ke eĉ pokalo povas flosi, sed kiam ĝi atingis jam pramejon, estas ne transireble sen boato, sen eviti la venton. Ĉu tio ne estas pro abundeco da akvo en la malsupra rivero? Nu vi vestas vin per tia pompa vestaĵo kun mieno briligita, kiu do en la mondo povus admoni vin, You?”

Zilu haste eliris kaj eniris, alivestite en modereco.

Konfuceo diris: “Atentu, mi rakontos al vi jenon. Estas vanto paroladi ekscitite, estas fanfaroni konduti ekscitite, estas malgrandulo, kiu elmontras sin intelekta kaj kapabla. Do noblulo diras, ke li scias rilate kion li scias; li diras, ke ne scias rilate kion li ne scias. Tio estas ja esenca por la parolado. Li diras, ke li povas rilate kion li povas fari; li diras, ke li ne povas rilate kion li ne povas fari. Tio estas ja la plej grava por konduto. Io esenca en la parolado estas intelekto, io plej grava en konduto estas bonvoleco. Se kunestas intelekto kaj bonvoleco, ĉu io mankus?”

子路入，子曰：“由，知者若何？仁者若何？”

子路对曰：“知者使人知己，仁者使人爱己。”

子曰：“可谓士矣。”

子贡入，子曰：“赐，知者若何？仁者若何？”

子贡对曰：“知者知人，仁者爱人。”

子曰：“可谓士君子矣。”

颜渊入，子曰：“回，知者若何？仁者若何？”

颜渊对曰：“知者自知，仁者自爱。”

²⁷³ 练 Antikve en Ĉinio oni vestis sin per vestaĵo el glacea silko en datreveno post unu jara funebro.

子曰：“可谓明君子矣。”

Zilu eniris kaj la Majstro demandis lin: “Kio estas la intelektulo, kaj kio estas la bonvolemlulo?”

Zilu respondis, dirante: “La intelektulo estas tiu, kiu igas homojn scii lin, kaj la bonvolemlulo estas tiu, kiu igas homojn ami lin.”

La Majstro diris: “Tiu povas esti nomata la personeco.”

Zigong eniris kaj la Majstro demandis lin: “Ĉi, kio estas la intelektulo, kaj kio estas la bonvolemlulo?”

Zigong respondis, dirante: “La intelektulo estas tiu, kiu scias homojn, kaj la bonvolemlulo estas tiu, kiu amas homojn.”

La Majstro diris: “Tiu povas esti nomata la personeca noblulo.”

Yan Yuang eniris kaj la Majstro demandis lin: “Hui, kio estas la intelektulo, kaj kio estas la bonvolemlulo?”

Yan Yuan respondis: “La intelektulo estas tiu, kiu scias sin mem, kaj la bonvolemlulo estas tiu, kiu amas sin mem.”

La Majstro diris: “Tiu povas esti nomata la klera noblulo.”

子路问于孔子曰：“君子亦有忧乎？”

孔子曰：“君子，其未得也，则乐其意；既已得之，又乐其治。是以有终生之乐，无一日之忧。小人者，其未得也，则忧不得；既已得之，又恐失之。是以有终身之忧，无一日之乐也。”

Zilu demandis Konfuceon, dirante: «Ĉu ankaŭ noblulo havas ĉagrenon?»

Konfuceo diris: “La noblulo, dum li ankoraŭ ne akiras la deziratan, ĝuas je sia aspiro; akirinte ĝin al si, li ankaŭ ĝuas, ke ĉio estas regata en ordo. Tiel do li ĝuas la vivon ĝis la fino, sen ĉagreniĝi unu tagon. La malgrandulo, dum li ne akiras la deziratan, ĉagrenas sin pro malsukceso; jam akirinte ĝin al si, li ankoraŭ timas, ĉu li perdus ĝin. Tiel do li ĉagrenas sin ĝis la fino de sia vivo sen ĝui eĉ unu tagon.”

30 法行

LAŬREGULARA KONDUCTO

公输不能加于绳，圣人莫能加于礼。礼者，众人法而不知，圣人法而知之。

Eĉ Gongshu je la mezurado povas aldoni nenion al la precizeco de tuĉŝnuro, eĉ sanktulo ne povas aldoni ion novan al decreguloj.²⁷⁴ Se temas pri la decreguloj, popoloamaso senkonscie sekvas la regulojn, sed sanktulo sekvas la regulojn konscie.

曾子曰：“无内人之疏而外人之亲，无身不善而怨人，无刑已至而呼天。内人之疏而外人之亲，不亦远乎！身不善而怨人，不亦反乎！刑已至而呼天，不亦晚乎！《诗》曰：‘涓涓源水，不澌不塞。穀已破碎，乃大其辐。事已败矣，乃重大息。’其云益乎！”

Zeng-zi diris: “Oni ne devas, fremdiĝante malintime disde la siaj internaj homoj, intimiĝi kun fremduloj. Oni ne devas, tenante sin mem malbona, rankori aliulojn. Oni, jam punate ekzekutate, ne devas plendi al la Cielo. Dum fremdiĝi disde siaj internuloj, intimiĝi kun fremduloj – ĉu tio ne estas tro pretera? Dum tenadi sin malbona, malbeni aliulojn – ĉu ne estas maltrafe? Dum ekzekutate jam, plendi al la Ĉielo – ĉu ne estas malfrue? Estas dirite en *Poezio*: ‘Ne digi nek bari la akvon dum ĝi fluas rivereton, post disrompiĝo de rada akso grandigi la radiojn, ĝemspiregi post la malsukceso de afero’.²⁷⁵ – Ĉu tio estas utila?”

曾子病，曾元持足，曾子曰：“元志之！吾语女。夫螿螿犹以渊为浅而掘其中，鹰鸢犹以山为卑而增巢其上，及其得也，必以饵。故君子苟能无以利害义，则耻辱亦无由至矣。”

Malsaniĝis Zeng-zi, al kiu Zeng Yuan masaĝis la piedojn, Zeng-zi diris: “Yuan, atentu jenon! Mi rakontos al vi. Fiŝego, testudo kaj krokodilo, sentante la profundon malpli profunda, subfosas la fundon plu; falko kaj milvo, rigardante monton malalta, faras la neston sur la pinto. Ili tamen povas esti kaptitaj nepre pro logaĵoj. Noblulo neniam povas damaĝi la juston per la serĉado de profito, tial do lin ne tuŝas malhonoro kaj hontindaĵo.”

子贡问于孔子曰：“君子之所以贵玉而贱珉者，何也？为夫玉之少而珉之多邪？”

孔子曰：“恶！赐，是何言也！夫君子岂多而贱之，少而贵之哉！夫玉者，君子比德焉。温润而泽，仁也；栗而理，知也；坚刚而不屈，义也；廉而不刿，行也；折而不挠，勇也，

²⁷⁴ 公输般 estis fama inĝeniero, metiisto kaj inventisto de Lu-regno en 6-5 jc. a.K.

²⁷⁵ En la nuna *Poezio* ne videblas la citaĵo.

瑕适并见，情也；扣之，其声清扬而远闻，其止輟然，辞也。故虽有珉之雕雕，不若玉之章章。《诗》曰：‘言念君子，温其如玉。’此之谓也。”

Zigong demandis Konfuceon, dirante: “Nobluloj taksas jadon pli kara, sed agaton malpli, kial? Ĉu, ĉar la jado estas rara sed da agato estas pli multe?”

Konfuceo diris: “Ho ve! Ci, kion vi diras! Ĉu noblulo malestimas ion pro la multeco, estimas ion pro la rareco? Noblulo la jadon komparas kun virto, pro la milda freŝeco kaj la glatbrilo komparas ĝin kun bonvoleco, pro la hardeco kaj la kohereco komparas kun saĝo, pro la firma solideco kaj la persisteco komparas kun justo, pro la rekteco kaj la senmakuleco komparas kun konduto, pro la malcedemo al ofendiĝo komparas kun kuraĝo, pro kunestado de malperfektaĵo komparas kun sento. Batite, ĝi sonoras kun pura voĉo kaj aŭdeblas de malproksime, kaj ĉesigite, la sono haltas subite, tio memorigas vorton. Kvankam ankaŭ agato povas esti bele gravurita, tamen malpli fajna ol gravurita jado. Estas dirite en *Poezio*: ‘Memoras la vorton de noblulo, mildan kiel jadon.’ Tio signifas la supre menciitan.”²⁷⁶

曾子曰：“同游而不见爱者，吾必不仁也；交而不见敬者，吾必不长也；临财而不见信者，吾必不信也。三者在身，曷怨人？怨人者穷，怨天者无识。失之己而反诸人，岂不亦迁哉！”

Zeng-zi diris: “Ke mi ne estas amata de miaj kunludantoj, tio estas nepre pro mia manko de bonvoleco; ke mi ne estas respektata de miaj interkonatoj, tio estas nepre pro mia manko de merito; ke mi ne estas fidata de kredit-alpruntistoj, tio estas nepre pro mia manko de kredindeco. Havante tri mankojn ĉe mi, kiel mi povus malbeni aliulojn? Kiu malbenas aliajn homojn, tiu mizeras; kiu malbenas la Ĉielon, tiu estas senscia. Kiam eraro estas en si mem, se riproĉi aliajn homojn, ĉu ne estas tute kontraŭrezone?”

南郭惠子问于子贡曰：“夫子之门，何其杂也？”

子贡曰：“君子正身以俟，欲来者不距，欲去者不止。且夫良医之门多病人，隳括之侧多枉木，是以杂也。”

Nanguo Huizi demandis Zigong, dirante: “Kial do estas tiom disorde ĉe la pordo de la Majstro?”

Zigong diris: “La noblulo, ĝusitigante sin mem, atendas; ne rifuzas iun ajn, kiu alvenas, ne haltigas iun ajn, kiu foriras. Al la bona kuracisto venas nulte da malsanuloj, ĉe rektiganto de lignoj kolektiĝas multe da kurbaj arboj – tiel do estiĝas la disordo.”

孔子曰：“君子有三怨：有君不能事，有臣而求其使，非怨也；有亲不能报，有子而求其孝，非怨也；有兄不能敬，而弟而求其所令，非怨也。士明于此三怨，则可以端身矣。”

²⁷⁶ Citaĵo el 诗经, 秦风, 小戎.

Konfuceo diris: “Al noblulo apartenas tri punktoj de indulgemo. Estas ne indulgo, ke ne povanto mem servi al la estro postulas de subuloj la servadon al si. Estas ne indulgo, ke ne povanto mem rekompenci siajn gepatrojn postulas de siaj gefiloj la filan pietaton. Estas ne indulgo, ke ne povanto mem servi la pliagŝan fraton postulas de sia malpli aĝa frato obei sian ordonon. Klera personeco komprenas pri tiuj tri punktoj de indulgo, kaj povas rektigi sin mem.”

孔子曰：“君子有三思，而不可不思也。少而不学，长无能也；老而不教，死无思也；有而不施，穷无与也。是故君子少思长则学，老思死则教，有思穷则施也。”

Konfuceo diris: “Noblulo havas tri okazojn de sia pensado, pri kio oni ne devas ne konsideri. Kiu ne lernis en sia infaneco, tiu ne kapablas en sia plenaĝo. Kiu al neniu donis instruon en sia maljuneco, pri tiu sopiras neniu post la morto. Kiu, havante riĉon, neniom almozdonis, al tiu neniu donos en lia ekstrema mizero. Tial do la noblulo pensas en sia infaneco kaj lernas ankaŭ en sia maturiĝo, maljuniĝante ankaŭ pensadas kaj mortinte donas la instruon, kaj iam en sia ekstrema mizero ankaŭ pensadas kaj eĉ almozdonas al mizeruloj.”

31 哀公

LA DUKO AI

鲁哀公问于孔子曰：“吾欲论吾国之士，与之治国，敢问何如取之邪？”

孔子对曰：“生今之世，志古之道，居今之俗，服古之服，舍此而为非者，不亦鲜乎！”

哀公曰：“然则夫章甫，絢屨，绅而搢笏者，此贤乎？”

孔子对曰：“不必然。夫端衣，玄裳，纁而乘路者，志不在于食荤；斩衰，菅屨，杖而啜粥者，志不在于酒肉。生今之世，志古之道，居今之俗，服古之服，舍此而为非者，虽有，不亦鲜乎！”

哀公曰：“善！”

La duko Ai de Lu-regno demandis Konfuceon, dirante: “Mi volas selekti taŭgajn personojn de mia lando por regi kune la regnon. Ĉu mi povus demandi vin kiel dungi ilin?”

Konfuceo respondis: “Kiu, naskiĝinte en nuntempa mondo, strebas al la antikva vojo, kaj kiu, vivante en nuna moro, vestas sin per la antikva stila vestaĵo, tiu ne lasas sin fari malbonon. Kvankam ekzistus malbonfarantoj, tamen da ili devas esti malmulte.”

La duko Ai diris: “Se tiel, kiuj metas al si sur kapon la ĉapon Zhanfu, metas al si la ŝuojn Quju, portas ĉe zono la tableton Jinhu, tiuj estas ĉiuj saĝaj?”

Konfuceo respondis: “Ne ĉiam. Sed, kiu je ceremonio atentis kostumon korekta, vestante sin per nigra robo kaj portante ĉapon dum veturado sur ĉaro, tiu ne intencas manĝi ajlon dum ekzorcado. Kiu ĉe funebro metas al si veston Zhanshuai kaj ŝuojn Jianju, apoganta sin kun bastono kaj manĝanta nur kaĉon, tiu ne intencas trinki vinon nek manĝi viandon dum fasto. Do kiu, naskiĝinte en nuntempa mondo, strebas al la antikva vojo, kaj kiu, vivante en nuna moro, vestas sin per la antikva stila vestaĵo, tiu ne lasas sin fari malbonon. Kvankam ekzistus malbonfarantoj, tamen da ili devas esti malmulte.”²⁷⁷

La duko Ai diris: “Bone dirite!”

孔子曰：“人有五仪：有庸人，有士，有君子，有贤人，有大圣。”

²⁷⁷章甫 estis krono en la epoko de Yin-dinastio, 絢屨 estas ŝuoj kun ornamo, 搢笏 skribtableto, 纁 estas ĉapo por grandoficisto. 荤 ajlo kun fortaodoro; 斩衰 estas funebra vestaĵo, 菅屨 estas ŝuoj el karekso. Laŭ konfuceanismo, vestoj difinas la kvaliton de persono.

哀公曰：“敢问何如斯可谓庸人矣？”

孔子对曰：“所谓庸人者，口不能道善言，心不知色色；不知选贤人善士托其身焉以为己忧，勤行不知所务，止交不知所定；日选择于物，不知所贵；从物如流，不知所归；五亩为正，心从而坏。如此，则可谓庸人矣。”

哀公曰：“善！敢问何如斯可谓士矣？”

孔子对曰：“所谓士者，虽不能尽道术，必有率也；虽不能遍美善，必有处也。是故知不务多，务审其所知；言不务多，务审其所谓；行不务多，务审其所由。故知既已知之矣，言既已谓之矣，行既已由之矣，则若性命肌肤之不可易也。故富贵不足以益也，卑贱不足以损也。如此，则可谓士矣。”

哀公曰：“善！敢问何如斯可谓之君子矣？”

孔子对曰：“所谓君子者，言忠信而心不德，仁义在身而色不伐，思虑明通而辞不争，故犹然如将可及者，君子也。”

哀公曰：“善！敢问何如斯可谓贤人矣？”

孔子对曰：“所谓贤人者，行中规绳而不伤于本，言足法于天下而不伤身，富有天下而无怨财，布施天下而不病贫。如此，则可谓贤人矣。”

哀公曰：“善！敢问何如斯可谓大圣矣？”

孔子对曰：“所谓大圣者，知通乎大道，应变而不穷，辨乎万物之情性者也。大道者，所以变化遂成万物也；情性者，所以理然不，取舍也。是故其事大辨乎天地，明察乎日月，总要万物于风雨，缪缪肫肫。其事不可循，若天之嗣；其事不可识，百姓浅然不识其邻。若此，则可谓大圣矣。”

哀公曰：“善！”

Konfuceo diris: “Inter homoj troviĝas kvin klasoj laŭ kvalito: vulgarulo, memstara personeco, noblulo, saĝulo, kaj granda sanktulo.”

La duko Ai diris: “Bonvolu diri al mi, kiu estas la vulgarulo?”

Konfuceo respondis: “La vulgarulo estas tiu, kiu ne povas paroli buŝe bonajn vortojn konforme al la vojo, nek povoscii kore nuancojn de fajneco. Al li ne estas scate, kiel elitaj saĝuloj kaj bonaj personecoj dediĉas sin al aferoj zorgoplenaj por si, nek sciate, kiel ili diligente agas por plenumi sian taskon, nek sciate, kiel difini por si la star- kaj kruc-punktojn, nek sciate, kiu estas pli kara en sia ĉiutaga elektado de aĵoj, nek sciate, kien reveni, dum li mem, obeante aĵojn, fluas kaj drivadas. Kvankam kvin sensoroj estas ĝustaj, sed tamen lia koro, estante obeema, detruigiĝas. Tial do, li nomiĝas ‘vulgarulo’.”

La duko Ai diris: “Bone! Permesu demandi vin, kio estas la memstara personeco?”

Konfuceo respondis: “La memstara personeco estas tiu, kiu, kvankam ne kapablas ellerni sciencon, tamen nepre havigas al si ion por sekvi, kvankam ne kapablas kompreni ĉion belan kaj bonan, tamen nepre havas sian lokon por stari. Do, kvankam li ne penas scii tre multe, tamen li multe penas ekzamenadi la sciatan; kvankam li ne

penas paroli multe, tamen li penas ekzamenadi la diritan; kvankam li ne penas agadi tre multe, tamen li multe penas ekzamenadi kaŭzon de sia konduto. Do li firme komprenas kion li jam scias, li firme eldiras kion li jam parolis, li firme kondutas tiel, kiel li jam kondukis, neŝanĝeble, kvazaŭ penetrite en karakteron, vivon kaj haŭton. Tial do ajna riĉaĵo kaj rango ne povas allogi lin, kaj ajna malestimo ne povas difekti lin. Jen kia estas la t. n. personeco.”

La duko Ai diris: “Bone! Permesu al mi demandi vin, kio estas la noblulo?”

Konfuceo respondis: “La noblulo estas tiu, kiu estas lojala kaj fidela en siaj vortoj, ne fieras en la koro sian virton. Li estas mem bonvolema kaj justama, sed ne elmontras tion sur sia mieno. Li pensas profunde kaj komprenas klare, sed ne estas disputema je vortoj. Li tenas sin aplomba kaj natura, kvazaŭ facile allirebla. Jen kia estas la t. n. noblulo.”

La duko Ai diris: “Bone! Bonvolu diri al mi, kio estas la saĝulo?”

Konfuceo respondis: “La saĝulo estas tiu, kies konduto estas preciza, kiel konforme al tuĉŝnura mezurilo, kaj neniom damaĝas la fundamenton, kaj kiel vortoj povas fariĝi reguloj al la mondo kaj neniom damaĝas la korpon. Kiam li havas riĉaĵon de lamondo, neniu malbenas lin pro lia riĉeco, ĉar li almozdonas al la mondo, ne timante malriĉiĝon. Tial do oni povas nomi lin saĝulo.”

La duko Ai diris: “Bone! Mi demandas vin, kio estas la granda sanktulo?”

Konfuceo respondis: “La granda saĝulo estas tiu, kiu scias kaj komprenas la grandan vojon, respondante al ŝanĝiĝo senĉese kaj senlime, distingas la denaskan naturon de ĉiuj estaĵoj. La granda vojo mem entenas la ŝanĝiĝon kaj la transformiĝon de ĉiuj estaĵoj. La denaska naturo mem entenas principan leĝon de la aprobo-malaprobo, t. e., la elektado preni aŭ forĵeti. Tiel do li komprenas la grandan aferon de distingo inter la Ĉielo kaj la tero, klare esploras la sunon kaj la lunon, kontrolas miriadon da aĵoj konforme al vento kaj pluvo harmonie kaj akurate. Lia afero estas neimitebla, kvazaŭ la Ĉiela heredo. Lia afero ne sciiĝebla. Al popolanoj kun malprofunda scio ne eblas sciiĝi pri la sanktulo eĉ se li estus najbare. Jen kia estas la granda sanktulo.”

La duko Ai diris: “Bone!”

鲁哀公问舜冠于孔子，孔子不对。三问，不对。

哀公曰：“寡人问舜冠于子，何以不言也？”

孔子对曰：“古之王者，有务而拘领者矣，其政好生而恶杀焉，是以凤在列树，麟在郊野，鸟鹄之巢可府而窥也。君不此问，而问舜冠，所以不对也。”

La duko Ai de Lu-regno demandis Konfuceon pri krono de Shun, sed Konfuceo ne respondis. Tri fojojn demandite, li ne respondis.

La duko Ai diris: “Mi demandadis vin tri fojojn pri la krono de Shun, sed kial vi nenion diras?”

Konfuceo respondis: “La antikva reĝo, eĉ se metante al si ion ajn, kufon aŭ skarpon, tamen je la politiko ŝatis vivi kaj malŝatis mortigi, tiel senarte, samkiel la vento blovas inter viciĝintaj arboj, la unikorno vagas en suburba kampo, korvoj kaj pigoj, faras nestojn tiel alte, kiel oni supren rigardu ilin. Pri tio vi ne demandas, sed nur demandis pri la krono de Shun, tial do mi ne respondis.”

鲁哀公问于孔子曰：“寡人生于深宫之中，长于妇人之手，寡人未尝知哀也，未尝知忧也，未尝知劳也，未尝知惧也，未尝知危也。”

孔子曰：“君之所问，生君之问也。丘，小人也，何足以知之？”

曰：“非吾子无所闻之也。”

孔子曰：“君入庙门而右，登自阼阶，仰视榱栋，俛见几筵，其器存，其人亡，君以此思哀，则哀将焉而不至矣？君昧爽而栉冠，平明而听朝，一物不应，乱之端也，君以此思忧，则忧将焉而不至矣？君平明而听朝，日昃而退，诸侯之子孙必有在君之末庭者，君以思劳，则劳将焉而不至矣？君出鲁之四门以望鲁四郊，亡国之虚则必有数盖焉，君以此思惧，则惧将焉而不至矣？且丘闻之：君者舟也，庶人者水也。水则载舟，水则覆舟，君以此思危，则危将焉而不至矣？”

La duko Ai demandis Konfuceon, dirante: “Mi naskiĝis en la profunda palaco, kreskis, zorgate per la manoj de virinoj, do mi ankoraŭ ne scias malĝojon, nek ĉagrenon, nek penigan laboron, nek timon, nek danĝeron.”

Konfuceo diris: “Via demando estas la demando de sankta reĝo. Mi, Qiu, estas malgrandulo, kial do mi povas scii pri tio?”

La duko diris: “Mi ne havas neniun por demandi krom vin.”

Konfuceo diris: “Se vi, enirante tra la maŭzolea pordo, turnas sin dekstren kaj ascendas la stuparon, nomatan Zuo, tiam videblas supre trabo kaj ĉevrono, sube tabulo kaj mato, vi vidas, ke ekzistas la iloj, uzitaj de mortintoj, tiuokaze vi eksentas malĝojon, sopirante je forpasintoj, ĉu ĝuste tiel la malĝojo ne atingus vin?”

Se vi, je la horo de aŭroro ekmetante sur vi la kronon, matene aŭskultante konsilion en la kortego, trovas unu aĵon malkonvena kiel komenco de ĥaoso, tiuokaze vi eksentas ĉagrenon, ĉu ĝuste tiel ne atingus vin la ĉagreno? Se vi, matene aŭskultante konsilion en la kortego kaj retiriĝante de tie en la horo de krepusko, trovas filojn kaj nepojn de landestroj ĉeestantaj en la kortego, tiam vi eksentas la penigan laboron, ĉu ĝuste tiel la peniga aflikto atingus ĝuste vin? Se vi, elirante el la kvar pordoj de Lu-regno kaj observas landojn en kvar direktoj, vi nepre povas trovi kelkajn postsignojn de ruinigitaj landoj, tiam vi eksentas la timon, ĉu ĝuste tiel la timo ne atingus vin?”

Cetere mi, Qiu, aŭdis jenon: Reĝo estas boato, popolanoj estas akvo. La akvo portas sur si la boaton, do la akvo povas renversi la boaton. Se vi eksentas la danĝeron per tio, ĉu ĝuste tiel ne atingus vin la danĝero?”

鲁哀公问于孔子曰：“绅，委，章甫有益仁乎？”

孔子蹴然曰：“君号然也！资衰，直杖者不听乐，非耳不能闻也，服使然也。黼衣，黻裳者不茹葷，非口不能味也，服使然也。且丘闻之：好肆不守折，长者不为市。窃其有益与其无益，君其知之矣。”

La duko Ai de Lu-regno demandis Konfuceon, dirante: “Zonego, Zhou-eska silka ĉapo Wei, kaj Yin-eska ĉapo Zhangfu, ĉu ili estas profitodonaj por bonvoleco?”

Kofuceo konsternite diris: “Vi, la reĝo, eldiras tiel! Ke iu, dum la funebro, portante al si povran vestaĵon, apogante sin sur kana bastono, ne aŭskultas la muzikon, tio ne signifas, ke li ne kapablas aŭdi, sed la vestaĵo igas lin fari tion. Kiu vestas sin per ceremoniaj vesto kaj robo, tiu ne manĝas ajlojn, ne pro tio, ke li ne havas kapablon gustumi, sed la vestaĵo igas lin fari tion. Cetere, mi, Qiu, aŭdis jenon: ‘Bona vendisto ne rabatas, miliardulo ne faras negocon sur bazaro.’ Esplori, ĉu io estus profitodona aŭ ne profitodona, ĉu estas la afero, kiun endas scii al la reĝo?”

鲁哀公问于孔子曰：“请问取人？”

孔子对曰：“无取健，无取詘，无取口噤。健，贪也；詘，乱也；口噤，诞也。故弓调而后求劲焉，马服而后求良焉，士信惑而后求知能焉。士不信惑而有多知能，譬之其豺狼也，不可以身尔也。语曰：‘桓公用其贼，文公用其盗。’故明主任计不信怒，暗主任怒不任计。计胜怒则强，怒胜计则亡。”

La duko Ai de Lu-regno demandis Konfuceon, dirante: “Bonvolu diri al mi, kiel elekti homojn?”

Konfuceo respondis: “Ne elektu la fortikan, ne elektu la tiranecan, ne elektu la paroleman. Iu fortika estas avida; iu tiraneca incitas ĥaoson; iu parolema estas trompema. Se temas pri pafarko, unue elektu la flekseblan por agordi, poste postulu streĉi ŝnuron; se temas pri ĉevalo, elektu unue la obeeman, poste postulu bonigi; se temas pri persono, elektu la fidindan-honestan, kaj poste postulu de li intelekton. Persono, ne fidinda-honesta sed plena de intelekto, estas komparebla al feroca lupoj, kiun ne eblus teni proksima. Estas dirite, ke ‘la duko Huan uzis por si malamikon, la duko Wen uzis por si ŝteliston.’ Klera estro apogas sin sur la kalkulado, ne fidante sian koleron, sed malklera estro fidas je sia kolero, ne apogante sin sur la kalkulado. Tiu, al kiu la kalkulado superas la koleron – fortas, sed tiu, al kiu la kolero superas la

kalkuladon – pereas.²⁷⁸

定公问于颜渊曰：“东野子之善驭乎？”

颜渊对曰：“善则善矣。虽然，其马将失。”

定公不悦，入谓左右曰：“君子固谗人乎！”

三日而校来谒，曰：“东野毕之马失。两骖列，两服入厩。”

定公越席而起曰：“趋驾召颜渊！”

颜渊至，定公曰：“前日寡人问吾子，吾子曰：‘东野毕之驭，善则善矣。虽然，其马将失。’不识吾子何以知之？”

颜渊对曰：“臣以政知之。昔舜巧于使民而造父巧于使马。舜穷其民，造父不穷其马，是舜无失民，造父无失马也。今东野毕之驭，上车执轡，衡体正矣；步骤驰骋，朝礼毕矣；历险致远，马力尽矣。然犹求马不已，是以知之也。”

定公曰：“善！可得少进乎？”

颜渊对曰：“臣闻之：鸟穷则啄，兽穷则攫，人穷则诈。自古及今，未有穷其下而能无危者也。”

La duko Ding demandis Yan Yuan, dirante: “Dongye-zi estas bona ĉevalkondukisto, ĉu ne?”

Yan Yuan respondis: “Bona estas bona, se diri tiel. Tamen, liaj ĉevaloj baldaŭ perdiĝos.”

La duko Ding ne ĝojis, enirinte diris al servistoj de dekstra kaj maldekstra flankoj: “Eĉ noblulo kalumnias la alian!”

Tri tagojn poste oficisto pri ĉevaloj venis peti aŭdiencon, dirante: “Ĉevaloj de Dongye Bi perdiĝis. Du eksteraj ĉevaloj de la kaleŝo forkuris kaj du internaj eniris en la stalon.”

La duko Ding forlasis la seĝon, stariĝinte, diris: “Tuj sendu iun alvoki Yan Yuan ĉi tien!”

Alvenis Yan Yuan, al kiu la duko Ding diris: “Antaŭe mi demandis vin kaj vi respondis: ‘Bona estas bona, tamen, liaj ĉevaloj baldaŭ perdiĝos.’ Mi ne komprenas, kiel vi sciiĝis pri tio?”

Yan Yuan respondis: “Mi sciiĝis pri tio laŭ ekzemploj en politiko. Antaŭe Shun estis lerta je la uzado de la popolo kaj Zaofu estis lerta je la uzado de ĉevaloj. Shun ne suferigis la popolon, Zaofu ne suferigis la ĉevalojn, tial do Shun ne perdis la popolon, Zaofu ne perdis la ĉevalojn. Nun, se temas pri la maniero de konduko far Dongye Bi,

²⁷⁸ Al mi ŝajnas, ke la opinio de Konfuceo enhavas kontraŭdiron pri la dungo de personoj. En la unua parto li diras pri graveco de obo kaj fideleco, sed en la dua – pri utileco de kontraŭulo. Kaj la kalkulado finfine dependas de la kvalito de la estro. Se la estro taksas sin ordinarulo, al li estas preferinde preni la admonon de unua parto, se li taksas sin geniulo, li povas adopti la duan varianton, manieron de Huan kaj Wen.

estas normale al li rajdi, teni kondukilon kaj karoson ĝusta, kaj ĉevaloj trotras, galopas rapide, galopas libere, amblas komplete laŭ la rito en la kortego. Sed se sperti iradi ien krutan aŭ ien malproksimen, liaj ĉevaloj forkonsumiĝas, malgraŭ tio li postulas plue de ĉevaloj ne halti. Tial do mi sciiĝis pri tio.”

La duko Ding diris: “Bone! Ĉu vi povas ekspliki plu?”

Yan Yuan respondis: “Mi aŭdis jenon. Birdoj en krizo bekatakas, bestoj en krizo mordatakas, homoj en krizo ekfriponas. De antikve ĝis nun, povis eviti dangĉeron ankoraŭ neniu, suferigante la subon mizera.”

32 尧问

DEMANDOJ DE LA REĜO YAO

尧问于舜曰：“我欲致天下，为之奈何？”

对曰：“执一无失，行微无怠，忠信无倦，而天下自来。执一如天地，行微如日月，忠诚盛于内，贲于外，形于四海。天下其在一隅邪！夫有何足致也？”

Yao demandis Shun, dirante: “Mi volus dediĉi mian forton al la tuta mondo, kion mi devas fari?”

Shun respondis: “Koncentru vian forton sur unuaĵo sen perdi, faru mikran afereton sen maldiligenti, estu lojala kaj fidela senlace, tiam la mondo mem venos al vi. Okupiĝi je la unuaĵo, kiel je la Ĉielo kaj la tero, trakti la mikron, kiel la sunon kaj la lunon, esti lojala kaj sincera energie al interno, kaj klare al ekstero, kaj tiel prezenti la formon al kvar maroj. La tuta mondo ekzistas en unu angulo! Jen al kiu estas sufiĉe por vi dediĉi vian forton.”

魏武侯谋事而当，群臣莫能逮，退朝而有喜色。吴起进曰：“亦尝有以楚庄王之语闻于左右者乎？”

武侯曰：“楚庄王之语何如？”

吴起对曰：“楚庄王谋事而当，群臣莫逮，退朝而有忧色。申公巫臣进问曰：‘王朝而有忧色，何也？’庄王曰：‘不穀谋事而当，群臣莫能逮，是以忧也。其在中蘼之言也，曰：‘诸侯自为得师者王，得友者霸，得疑者存，自为谋而莫己若者亡。’今以不穀之不肖而群臣莫吾逮，吾国几千亡乎！是以忧也。’楚庄王以忧，而君以憙。”

武侯逡巡再拜曰：“天使夫子振寡人之过也。”

Markizo Wu de Wei-regno ellaboris planon tiom taŭgan, ke amaso da ministroj povis komenti nenion. Li lasis la kortegan konsilion kun ĝojplena mieno.

Wu Qi turnis sin al li, dirante: “Ĉu vi iam aŭdis de viaj adjunktoj epizodon de la reĝo Zhuang de Chu-regno?”

La markizo Wu diris: “Kio do estas la epizodo de la reĝo Zhuang de Chu-regno?”

Wu Qi respondis: “La reĝo Zhuang de Chu-regno ellaboris planon tiom taŭgan, ke amaso da ministroj ne povis komenti nenion. Li lasis la kortegan konsilion kun trista mieno. La duko Shen Wu Chen aliris al li, dirante: ‘Kial vi tristis, lasinte la konsilion?’

La reĝo Zhuang diris: ‘Mi ellaboris planon, kaj, konsiderante ĝin taŭga, neniu el ministroj povis komenti. Pro tio do mi malĝojas. Zhong Hui diris, ke el landestroj, haviginto al si la majstron – fariĝos la reĝo, la amikon – la hegemono, kaj la kritikanton,

kapablan demandi – povas daŭrigi la ekzitadon, sed pereos tiu, kiu mem devas ellabori sian planon, havante ĉe si neniun pli kapablan. Nun mi mem estas sentaŭgulo, kaj neniun el amaso da ministroj estas pli taŭga ol mi, do mia regno baldaŭ pereos! Tial mi tristas.’ La reĝo Zhuang de Chu-regno malĝojis, sed vi ĝojas.”

La markizo Wu heziteme diris, riverencante: “La Ĉielo igis al vi riproĉi min pro mia eraro.”²⁷⁹

伯禽将归于鲁，周公谓伯禽之傅曰：“汝将行，盖志而子美德乎？”

对曰：“其为人宽，好自用，以慎。此三者，其美德已。”

周公曰：“嗚呼！以人恶为美德乎？君子好以道德，故其民归道。彼其宽也，出无辨矣，女又美之。彼其好自用也，是所以褻小也。君子力如牛，不与牛争力；走如马，不与马如走；知如士，不与士争知。彼争者，均者之气也，女之美之。彼其慎也，是其所以浅也。闻之曰：‘无越踰不见士。’见士问曰：‘无乃不察乎？’不闻，即物少至，少至则浅。彼浅者，贱人之道也，女又美之。吾语女：我，文王之为子，武王之为弟，成王之为叔父，吾于天下不贱矣，然而吾所执贄而见者十人，还贄而相见者三是人，貌执之士者百有馀人，欲言而请毕事者千有馀人，于是吾仅得三士焉，以正吾身，以定天下。吾所以得三士者，亡于十人与三十人中，乃在百人与千人之中。故上士吾薄为之貌，下士吾厚为之貌。人人皆以我为越踰好士，然故士至，士至而后见物，见物然后知其是非之所在。戒之哉！女以鲁国骄人，几矣！夫仰禄之士犹可骄也，正身之士不可骄也。彼正身之士，舍贵而为贱，舍富而为贫，舍佚而为劳，颜色黎黑而不失其，是以天下之纪不息，文章不废也。”

Bo Qin estis revenanta al Lu-regno, la duko Zhou demandis al lia instruisto, dirante: “Vi nun ekiras kune, ĉu vi povus diri al mi pri tio, kia bela virto apartenas al mia filo?”

Li respondis: “Li estas tolerema al homoj, ŝatas memstari kaj memfari, kaj estas singardema. Jen tri punktoj de lia bela virto.”

La duko Zhou diris: “Ho ve! Vi prenas la malbonon por bela virto. Se reĝo ŝatas konsideri la vojon kiel virton, tiam ankaŭ la popolo inklinas al la vojo. Lia toleremo devenas de tio, ke li ne povas distingi. Vi vidas tion bela. Ke li ŝatas memstari kaj memfari, tio montras lian malvastecon kaj malgrandecon. Eĉ se iu reĝo estus forta kiel bovo, li ne konkurencas kun la bovo je forteco; eĉ se li kuras, kiel ĉevalo, li ne konkurencas kun la ĉevalo je rapideco; eĉ se li havus intelekton, samkiel klera personeco, li ne konkurencas kun li je scio. Mia filo konkurencas nur por intenco montri, ke li havu egalan fortecon kun rivaloj. Sed vi vidas tion bela. Lia singardemo devenas de tio, ke li estas malprofunda. Mi aŭdis jenon: ‘Se ne transiri limojn, vi ne vidos taŭgan

²⁷⁹ 魏武侯 estis la reĝo de Wei-regno, surtrone 395-370 a. K.. 吴起 estis fama strategisto. 中蘼, 仲虺 estis ministro ĉe Tang de Yin-dinastio. 楚庄王 surtrone 613-591 a.K.

personecon.²⁸⁰ Se vi vidis la taŭgan personecon, demandu: ‘Ĉu ne estas io, kion mi miskomprenas?’ Se ne demandus, estas malmulte da atingitaĵo. Se malmulte, tiam malprofunde. Mia filo estas malprofunda sur la vojo de malnobeloj. Sed vi vidas tion bela.

Mi rakontos al vi jenon. Mi estas filo de la reĝo Wen, estas juna frato de la reĝo Wu, kaj estas onklo de la reĝo Cheng. Mi estas ne malnobela en la mondo. Estis dek homoj, kiujn mi vizitis kun donacoj, estis tridek homoj, kiuj vizitis min kun donacoj, estis pli ol cent personoj, kiujn mi akceptis dece, estis pli ol mil homoj, kiujn mi petis konsili kaj kunlabori. El ili mi akiris al mi nur tri personojn, kiuj helpis al mi ĝustigi min kaj rektigi la mondon. Tiuj tri estas trovitaj ne el unuaj dek homoj, nek el tridek, sed el inter cent homoj kaj mil homoj. Do laŭ mia sinteno mi rilatas al supraj personoj ne tiom dense, sed al subaj personoj pli dense. Ĉiuj homoj rigardas min transpasanta limojn je la amo de taŭgaj personecoj. Sed tiel do mi akiris la personecojn, kaj tra atingo de la personecoj videblis realaĵo, kaj tra la realaĵo atingeblis scio pri praveco-malpraveco. Atentu je tio!

Se je la regado de Lu-regno vi arogantus, estus dangere. Salajrataj oficistoj inklinas aroganti, do persono bezonas ĝustigi sin mem, por ke li ne estu aroganta. La personeco, ĝustigante sin mem, rifuzas sian privilegion de la nobeloj kaj faras bonon por la malnobelojn, rifuzas sian privilegion de riĉuloj kaj faras bonon por la malriĉuloj, rifuzas komfortecon por si kaj faras penigan laboron. Li nigriĝas je la mieno, sed ne perdas la dignon. Tiel do la disciplino ne perdiĝas en la mondo, la kulturaj formoj ne velkas.

语曰：纘丘之封人见楚相孙叔敖曰：“吾闻之也：处官久者士妒之，禄厚者民怨之，位尊者君恨之。今相国有此三者而不得罪楚之士民，何也？”

孙叔敖曰：“吾三相楚而心愈卑，每益禄而施愈博，位滋尊而礼愈恭，是以不得罪于楚之士民也。”

Estas dirite, ke iu limgradisto de Zeng Qiu, vidante la ĉefministron Sun Shuao de Chu-regno, diris al li: “Mi aŭdis jenon. Kiu dumlonge okupas la postenon en oficejo, tiun ĵaluzas personoj; kiu ricevas abundon da salajro, tiun rankoras la popolo; kiu estas en eminenta rango, tiu alvokas koleron al la reĝo. Nun vi, kiel ĉefministro, malgraŭ ke vi kunhavas tri menciitajn punktojn, neniam estas denunciata de aliaj personoj kaj poloj, kial?”

Sun Shuao diris: “Mi estas postenigita en ĉefministro de Chu-regno tri fojojn, sed

²⁸⁰ 无越踰不见视 Iu esploristo konsideras ideogramon 踰 kiel eraron. Sed laŭ mi tiu vorto estas tre grava por kompreni la ideologion de Xunzi pri distingo de klasoj. Transiri limojn 越踰 signifas ne nur limoj de krono-topo, sed ankaŭ limoj de klaso-rango.

mi tenas sin humila je koro; ju pli multe da salajroj ricevante, des pli vaste mi almozdonas kaj oferadas; ju pli eminenta mi iĝas je la rango, des pli humile mi kondutas laŭ decreguloj. Tial do min ne kulpigas personoj kaj popolanoj de Chu-regno.”²⁸¹

子贡问于孔子曰：“赐为人下而未知也。”

孔子曰：“为人下者乎？其犹土地？深拍之而得甘泉焉，树之而五谷蕃焉，草木殖焉，禽兽有焉，生则立焉，死则入焉，多其功而不息。为人下者，其犹土地。”

Zigong demandis Konfuceon, dirante: “Mi ankoraŭ ne scias kion signifas submeti sin sub homojn.”

Konfuceo diris: “Ĉu submeti sin sub homojn? Tio estas same, kiel la tero. Se fosi ĝin profunden, ĝi donas la bonan akvofonton. Se semi sur ĝi, ĝi donas kvin grenojn. Sur ĝi kreskas herboj kaj arboj, birdoj kaj bestoj. Sur ĝi stariĝas la naskiĝintoj kaj vivantoj, en ĝin eniras mortintoj. Ne elĉerpiĝas ĝiaj multaj meritoj. Submeti sin sub homojn estas tiel same, kiel la tero.”

昔虞不用宫之奇而晋并之，莱不用子马而齐并之，纣剖王子比干于而武王得之。不亲贤用知，故身死国亡也。

Antaŭe Yu-lando ne uzis Gongzhi Qi, do Jin aneksis ĝin, Lai-lando ne uzis Zi Ma, do Qi aneksis ĝin, Zhou desekcis koron de Princo Bi Gan kaj la reĝo Wu ricevis la regnon. Kiu ne kutimiĝas al la utiligo de intelektuloj, tiu mem mortas kaj ties regno pereas.²⁸²

为说者曰：“孙卿不及孔子。”是不然。孙卿迫于乱世，讎于严刑，上无贤主，下遇暴秦，礼义不行，教化不成，仁者绌约，天下冥冥行全刺之，诸侯大倾。当是时也，知者不得虑，能者不得治，贤者不得使，故君上蔽而无睹，贤人距而不受。然则孙卿怀将圣之心，蒙佯狂之色，视天下以愚。《诗》曰：“既明且哲，以保其身。”此之谓也。是其所以名声不白，徒与不众，光辉不博也。今知学者，得孙卿之遗言余教，足以为天下法式表仪，所存者神，所遇者化。观其善行，孔子弗过，世不详察，云非圣人，奈何！天下不治，孙卿不遇时也。德若尧，禹，世少知之；方术不用，为人所疑。其之至明，循道正行，足以为纪纲。呜呼！贤哉！宜为帝王。天地不知，善桀，纣，杀贤良，比干剖心，孔子拘匡，接舆避世，箕子佯狂，田常为乱，阖闾擅强。为恶得福，善者有殃。今为说者又不察其实，乃信其名。时世不同，誉何由生？不得为政，功安能成？志修德厚，孰谓不贤乎！

Saĝsajnaj pedantoj diras: “Sun Qing ne egalas al Konfuceo.” Sed ili ne pravas. Sun

²⁸¹ 孙叔敖 estis ĉefministro ĉe la reĝo Zhuang de Chu-regno.

²⁸² 虞 estis nomo de malgranda lando, pereigita de Jin-regno en 655 a. K. Gongzhi Qi estis grandoficisto de Yu. Lai estis pereigita de Qi-regno en 567 a. K.

Qing travivis ĥaosan epokon, minacate per severa punado. Supre mankis saĝaj estroj, sube lin persekutis la tiraneca Qin-regno. Decreguloj ne estis observataj, edukoj kaj reformoj ne estis sukcesaj, bonvolemluloj vivis en ekstrema mizero, la mondo estis malluma, morala konduto estis tute mokridata, landestroj ambiciis por granda renverso. En tiu tempo intelektuloj ne povis pensadi, kapabluloj ne povis partopreni en la regado, saĝuloj ne povis esti uzataj, Tiel do supre al reĝoj ĉio estis kaŝita en obskuro kaj ne videblas, kaj saĝuloj estis forigitaj aŭ malakceptitaj. Sed Sun Qing, havante ĝuste la sanktan koron, ekstere sur la mieno afektis sin frenezulo kaj ŝajnis sin stultulo al la mondo. Estas dirite en *Poezio*: “Estante jam brila kaj akrevida, li konservis sin mem.”²⁸³ Tio signifas la supre menciitan.

Tial do li ne estas fama je reputacio, ne havas multajn disĉiplojn-adeptojn kaj lia brila lumo ne estas vaste konata. Se nunaj studantoj ellernos la vortojn kaj la instruojn, postlasitajn de Sun Qing, tiam ili povos suface prezenti al la mondo disciplinojn laŭ reguloj kaj esprimojn de ritoj, kiuj inspiras al la vivantoj spiritecon kaj transformas la renkontantojn.²⁸⁴

Laŭ la bonfarado li ne malsuperas Konfuceon, sed oni en la mondo ne detale esploras, dirante, ke li ne estas sankta persono. Kia domaĝo! La mondo estis ne bone regata, kaj Sun Qing ne konformis al la tempo. Kvankam havante virton, samkiel Yao kaj Yu, tamen li estis konata al la mondo malmulte. Li ne uzis ajnan mirigan arton, do oni dubis lin. Sed lia scio estas plej brila, sekvante fidele la vojon, kondukis ĝuste, kion sufiĉe eblas konsideri kiel la modelon de disciplinoj laŭ reguloj. Ho! Kia saĝulo li estis! Li povus esti taŭgulo, egala al imperiestro aŭ reĝo. La Ĉielo kaj la tero ne sciis lin, kaj estis allasate kiel bone je tiaj agoj, ke Jie, Zhou mortigis saĝulojn kaj bonulojn, deseckis koron de Bi Gan, kaj Konfuceo estis sieĝita en Kuang, Jie Yu vivis izolite de la mondo, Jizi ŝajnis sin frenezulo, sed Tian Chang faris renverson kaj He Lü estis lerta kaj forta. Farante malbonon, iuj akiras feliĉon, farante bonon, la aliaj ricevis suferon. Kiu nun ŝvelparolas, ne esplorante la faktojn, tiun oni kredas pro la fameco de la nomo. Al kiu ne konformas la tempo kaj la mondo, al tiu kia honoro povus naskiĝi tiukaze? Al kiu ne estis allasate partopreni en la regado, ĉu al tiu eblus efektiviĝi la meriton? Personon kun strebo altigita kaj kun virto akumulita, kiu do povus nomi lin ne saĝa!

²⁸³ Citaĵo el 诗经, 大雅, 烝民.

²⁸⁴ 所存者神, 所遇者化 frazo varias de la ĉap. 15, kie estas skribite 所过者化 kaj 所为者化顺.